

Kolomano Mikszáth



La Nigra Urbo
Romano

2022

ISBN: 978-615-01-4295-1

Kolomano Mikszáth

La Nigra Urbo

Romano esperantigita de László Pásztor

*

Lingve kontrolis, konsilojn donis al la korektoj: Rob Moerbeek

*

La poemojn esperantigis, la tekstofidelecon atentis, lingve korektis laŭ la konsiloj de la kontrolanto kaj la klarigojn aldonis

Adrienne Pásztor

*

La originala nomo de la verkisto: Mikszáth Kálmán

*

La originala titolo de la verko: A Fekete Város

*

Frontispica bildo de urbodomo de Lőcse, el:

<https://dka.oszk.hu/039200/039250>

**La hungarlingva originalo presita en: Akadémiai Nyomda Budapest,
eldonita de: Akadémiai Kiadó Budapest en 1961**

*

La eldonrajtoj rezervitaj ĉe Lászlóné Pásztor

*

Ĉi tiu verko aperis en la Hungara Elektra Biblioteko ĉe:

<https://mek.oszk.hu/22700/22763>

*

Redaktis kaj la bildojn aldonis: László Drótos

Enhavotabelo

Antaŭparolo.....	4
1-a ĈAPITRO Kelkaj antaŭaĵoj kaj detaloj, kiujn oni nepre devas scii	7
2-a ĈAPITRO La suspekto.....	16
3-A ĈAPITRO Ne ĝenu aferojn en la trankvila stato.....	26
4-A ĈAPITRO Hasta mencio de kelkaj publikaj aferoj.....	46
5-A ĈAPITRO Artifiko de la saksoj.....	54
6-A ĈAPITRO La urbo Lőcse funebras.....	61
7-A ĈAPITRO Fraŭlinoj taŭgaj junedzinoj.....	86
8-A ĈAPITRO Ni donas nian vivon kaj sangon por nia vicprefekto	96
9-A ĈAPITRO La sorto de la malgranda Rozalia ŝanĝiĝas	130
10-A ĈAPITRO „Nia paŝao” kaj aliaj okazintaĵoj.....	152
11-A ĈAPITRO Rozalia Otrókóczy estos svatebla fraŭlino	172
12-A ĈAPITRO Maltrankvilaj jaroj	207
13-A ĈAPITRO La mortinta juĝisto lastfoje movas sin.....	244
14-A ĈAPITRO Kelkaj rimarkoj pri la forto de la okuloj de la patrino kaj pri la ekscitado de la amaj sentoj.....	256
15-A ĈAPITRO En kiu, laŭ la kaprico de la Providenco, sed ne laŭ la volo de la aŭtoro finiĝas la historio	275
Opinioj pri la kreiĝo de la romano La Nigra Urbo	293
Vivovojo de László Pásztor, la tradukinto de la romano: La Nigra Urbo	295

Antaŭparolo

Karaj gelegantoj!

Antaŭ ol vi komencos la legon de la agado de tiu ĉi historia romano, vi devas ricevi informojn iom el la vivo de la aŭtoro kaj kelkajn aliajn gravajn sciindaĵojn kaj pri la verko kaj pri ĝia esperantiganto.

Pri la aŭtoro vi povos legi en la esperanto-wikipedia artikolo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/K%C3%A1lm%C3%A1n_Miksz%C3%A1th

Nu, post tiu ĉi antaŭparolaj vortoj vi povos legi tekston de la esperanto wikipedia artikolo pri la aŭtoro, elparolenda Kalman Miksat. Poste vi ne trovos apartajn notojn kiel indajn kaj necesajn klarigojn pri la fremdaj familiaj nomoj kaj ceteraĵoj, ĉar tiujn enhavas la piednotoj.

En la hungara historio ĝenerale la nobelaj familionomoj estas skribitaj per la nomfinaĵa litero: y kaj enhavas ofte cz literojn. Sed, ĉar la nom-elparoloj estas malfacilaj, la esperantiganto lasis la nomojn de la plej gravaj rolantoj en ilia origina, hungarmaniere skribita formo kun esperantlingvaj klarigoj inter la piednotoj.

Aliaokaze, la esperantiganto de la teksto skribis la familionomojn per esperanto-literoj, sed anstataŭ la nomfina litero: -y- per la litero -i-, kaj havas la literojn -cz- simple per la litero -c- por pli facila elparolo. Kelkaj havas klarigojn pri la nomorigina formo, aliaj nomoj ne havas. Bonvolu nun akcepti ĉi klarigojn anstataŭ la mankaj, kiujn vicigi estus tro longe.

La romano havas ankaŭ multegajn nomojn de la diversaj lokoj, kiuj estas skribitaj en siaj hungarlingvaj literoj kun klarigoj koncerne ilian elprolan manieron kaj la historion de la setlejoj. Tamen kelkaj, por faciligo de la elparolo estas skribitaj per esperantoliteroj. Tamen inter ili estas legeblaj duoblaj konsonantoj, ja tiel ekzistas ili en la hungara lingvo kaj sen la duobligoj la nomoj ne estus samaj (ekzemple ĉe la nomo Kaŝŝa).

Pri la romano kiel opinias la esperanto wikipedio, vi povos legi en ĝia artikolo:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/La_nigra_urbo_\(romano\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/La_nigra_urbo_(romano))

Mi devas menci, ke la esperantiganto multe suferis pro sia malsano: la alta sangopremo, medikamentojn kontraŭ kiu la kuracistoj ne povis trovi. Anstataŭ tiuj ili devigis lin engluti la de ili opiniatajn bonefikajn kemiaĵojn, kiuj tamen ne estis konvenaj. Por eviti la terurajn kaj longdaŭrajn suferojn pro iliaj flankefikoj, por iel elteni la dolorojn kaŭzitajn de la medikamentaj kromefikoj, li komencis esperantigi verkojn el la hungara literaturo. Li esperis forpeli sian atenton pri la doloregoj pere de tiu forta cerbo-laboro. Eldireblas, ke liaj verkoj naskiĝis el doloregoj turmentantaj lin dum 7 jaroj. Tiuj flankefikoj fine murdis lin,

kaŭzantaj: tutblindiĝon, tutsurdiĝon, pardon de la parola kaj moviĝkapablo, poste kaŭzis duflankan grandan cerban hemoragion – ne ĝustatempe rekonitan – kaj tutan sekiĝon kiuj faris lin neniamaniere savebla la 21-an de aŭgusto 2021. La romano: La Nigra Urbo ne estis lia lasta tradukaĵo, sed ĝi estas unu el liaj plej ŝatataj perloj de la hungara literaturo.

Bonvolu akcepti de li ĉi tiun verkon tiel bonkore, kiel li pretigis la esperantigon por la uzantoj de esperanto en la nuntempa kaj estontaj generacioj, kredanta en la evoluo kaj la longjara restado de ĉi internacia lingvo. Ja li kredis, ke la kulturo-transdono al alinacianoj estas ĉiam bona ponto por estigi amikecon_inter la diversaj popoloj.

Karaj legantoj, nia ambaŭ dankas la bonegan laboron de la kontrolanto Rob Moerbeek el Nederlando. Pri lia agado vi povos legi en la Esperanto-Wikipedio ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Rob_Moerbeek

Nia triopo deziras al vi agrablan legadon:

Miŝkolco, la 28-an de januaro 2022a.

Nianome: Adrienne sinjorino László Pásztor,
la vidva edzino de la tradukinto: László Pásztor

Kolomano Mikszáth

La nigra urbo

Historia romano

– Unua volumo –

1-a ĈAPITRO

Kelkaj antaŭaĵoj kaj detaloj, kiujn oni nepre devas scii

Paŭlo Görgey¹ estis memorinda vicprefekto de la fortikaĵa departemento (alinome prefektujo) Sepeŝ² en la tempo de Thököly³. Tiuj tempoj estis malbonaj kaj malcertaj. Nome lunde la imperiestranoj ordonis, sed merkrede jam la kurucoj. Oni devis danci inter ovoĵoj, sed kiu paŝis malbone, ties kapo rompiĝis. Kvankam tiutempe la homaj kapoj estis pli malmultekostaj, ol la ovoĵoj. Nu, tio estas tute egala, ja la potenco estas tamen potenco kaj similas al maniulo de morfino, kiu petas pligrandigitan porcion da morfino. Ja estas malfacile atingi la potencon, resti ĉe la potenco estas komforte.

Paŭlo Görgey estas sufiĉe bonhava sinjoro, lia familio havis reputacion en la tiama fortikaĵa departemento Sepeŝ, sed tiu ĉi reputacio (simila al tiu de la iama) ne estas simila al tiu dum la iama reĝdinastio Arpad. Dio donu al ili eternan trankvilon, eĉ se ili donis al sia lando eternan maltrankvilon.

Ja la tempo pasis kaj la reputacio de la familio Görgey malpliigis... Iliaj unuaj prauloj estis Arnold kaj liaj filoj, kiuj portis la oficon de saksa grafo kaj estis la plej gravaj oligarkoj apud la pola limo. Arnold eklogis la saksojn al la senhoma fortikaĵdepartemento Sepeŝ, sed ne tiel, kiel la ratkaptisto de Hannover logis la Saksojn de Transilvanio. (Laŭ la legendo de Hannover en 1284. iu ratfascinanto per sia fajfilo logis la ratojn al la rivero Weser⁴. Sed ĉar premion li ne ricevis, la infanojn de Hameln li logis al Kompelberg, poste al Transilvanio. Laŭ la legendo ili fariĝis prapatroj de la saksoj de Transilvanio). Ĉi tiuj Saksoj⁵ estis pli saĝaj ol tiuj de Hanovro, la fajfilo ne imponis al ili, sed ili petis promesojn kaj privilegiojn. Tiujn ili ankaŭ ricevis. Al Arnold la reĝo Béla/Adalberto la 4a⁶ donis eĉ terbienon inter la riveroj Dunajec kaj Poprad kaj ĉar la reĝoj de la dinastio Arpad estis donacemaj, li mezuris la bienon de riverego ĝis riverego. La filoj de Arnold same estis bravaj homoj, ĉefe la grafo Jordan. La reĝo László (laslo – Ladislao) la 4a donis al ili ankaŭ la vilaĝon nomitan Görgő. Pro tio ĉi oni nomas ilin Görgő-anoj.

¹ Pri la familio Görgey legeblas ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Artúr_Görgey – Pri la Nigra urbo: [https://eo.wikipedia.org/wiki/La_nigra_urbo_\(romano\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/La_nigra_urbo_(romano))

² La origina departementa nomo estas: Szepes, hungarlingve skribite.

³ Pri la grafo Emeriko Thököly legeblas ĉe:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Emeriko_Thököly

⁴ Pri la rivero Weser/Vezero legeblas ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Weser>

⁵ Pri la Saksoj: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Saksoj>

⁶ Pri la hungara reĝo Béla/Adalberto la kvara, vi povas legi ĉe:
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Béla_la_4-a_\(Hungario\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Béla_la_4-a_(Hungario))

Ili havis grandegan terenon. Ili estis en la fortikaĵa departemento Sepeŝ la unuaj gravaj homoj. Kaj dum multe da generacioj ili estis ĉefĵupanoj. Nur Dio scias, kiel rotaciis tiutempe la planedo Tero, sed sufiĉas diri, ke iom post iom ili iĝis ĉiam pli kaj pli malriĉaj. La familioj Csáky, Zápolya, Thurzo⁷ iĝis multe pli potencaj, kio malpliigis la reputacion de la Görgő-anoj. La riveroj Dunajec kaj Poprad fluas en la malnovaj fluejoj, sed la terbienojn inter la riveroj ili ne havis tute. La restaĵo estis malgranda, la fameliestro kadukiĝis kaj ne naskiĝis inter ili ŝtatviroj kaj estroj, nur simplaj vicprefektoj. Tamen la centsepjaraĝa ciganino de Keŝmark profetis al ili, ke la familio de Miĥelo Görgey same estas sana, tamen ĝi nun ripozas en vintro, kiu daŭros ĝis ducent jarojn. Post la vintro, la familioarbo denove kreskigos novajn ŝosojn.

Nia heroo, Paŭlo Görgey, apartenas al la pli bonhavaj nobeloj, en parenceco kun la familioj Berzevici, Jekelfaluŝi, Mariaŝi kaj Darvaŝ. Lia pli aĝa fratino Katarino, estas la edzino de iu Darvaŝ en Osgyán⁸ en la departemento Gömör⁹. Pro tio mi mencias la familian rilaton kaj ne la terbienon, kiu apartenis al Görgő, ĉar la familia rilato determinis la reputacion de la familiano. Helpe de la bona familia rilato estis eblo akiri facile grandegajn bienojn. (Dum la verkado de tiu ĉi romano.) Tiam eblis akiri per granda bieno bonajn familiajn rilatojn. La pli sangvinaj potenculoj Balaŝi, Csáky kelkfoje havas havaĵon, kelkfoje ne, hodiaŭ festene, morgaŭ malplene. Ili havas kelkfoje nur tiun vestaĵon, kiun ili portas. Ĉi tiel ili kaŝvagadis en la malhelaj arbaroj, serĉas rifuĝejon en kabanoj, kanejoj. Sed dirante, ke tio estas nur ludo kaj ili ne ĉagreniĝas. Nome se la reĝo forprenas la havaĵon, tiam pli malfrue li redonas tion. Se iu familiano faras malbonon, tiam la aliaj karesas la reĝon kaj iom post iom ĉio estos en ordo.

Ne estas strange, ke la bienoj de Paŭlo Görgey pli malgrandiĝis kaj ili plie nenion havus, sed tio estas la problemo, ke ili ne estas inter la potencaj dinastioj. Kial tio okazis? Ne estas inde okupiĝi pri ĝi. Por prosperi tiutempe estis slogano: „Bone interbatali kaj bone geedziĝi.” Nu, ili geedziĝis malbone, sed laŭ la kronikoj bone interbatalis. Sed cetere ankaŭ ili havis malbonŝancon; ili aliĝis al neĝustaj reĝoj en la tempo de Johano Szapolyai¹⁰ kaj Ferdinando – konfesante la dogmarojn de Luther¹¹.

El inter la familianoj de Görgey tamen Paŭlo heredis pli multe da aĵoj de siaj prauloj. Kvankam li ricevis ege malgrandan bienon, fieregon li ricevis multe. Li estis grandstatura figuro. Fiereco radiis el liaj okuloj, kvazaŭ glaciglobo moviĝus

⁷ Csáky, Zápolya, Thurzo familionomoj elparolendas: ĉaki, zapoja, turzo.

⁸ La loknomo Osgyán, elparolendas: oŝdjan.

⁹ Pri la departemento Gömör kaj Kishont, bv. vidi la wikipedian artikolon: https://eo.wikipedia.org/wiki/Gömör_kaj_Kis-Hont

¹⁰ La nomo Zápolya, ofte aperas ankaŭ kiel Szapolyai (sapoljai).

¹¹ La nomo Luther, elparolendas: luter.

sub la hirtaj brovoj. Li havis malbelan vizaĝon, sed dum li oratoris okaze de iu kunveno de la departemento, sur ĝi videblis la beleco kaj genieco. Sub lia nazo estis densa longa liphararo, sed lia barbo konsistis el maloftaj krinoj. Lia frunto forte tuberiĝis kaj sur ĝi la sulkoj montris la obstinecon kaj kverelecon de la homo. Li ĉiam kunpremias siajn lipojn, neniam ridetis, sed ofte liaj lipoj tremadis pro kolero. Kvazaŭ tiu ĉi vizaĝo estus malvarma, malhela regiono, kie neniam brilas la Suno. Nur la fulmoj lumigas tiun kelkfoje.

Lia kapo estis tiom granda, ke sinjoro Kammleitner, la fama ĉapelisto de Lőcse, faris por Paŭlo eksterordinaran ĉapon. Sed tiu kapo havis ankaŭ menson. Li direktis la departementajn nobelojn laŭ sia volo. Kvankam li estis nur 42-jara, lin oni elektis jam triafoje al vicprefekto kaj ĉiam unuvoĉe. La unuvoĉeco estis grava por li, ja post ĉiuj elektoj li komunikis aŭdace:

– Miaj nobelaj sinjoroj! Se estas iu el inter vi, kiu ne volas vidi min kiel vicprefekton, tiu anoncu sin kaj tiam mi ne akceptos ĉi tiun oficon. Tiel helpu min Dio!

Estis kompreneble, ke tomba silento sekvis. La nobeloj ne volis alparoli, sed sekrete ĉiuj deziris tion, ke iu kamarado diru opinion kontraŭ Paŭlo. Sed ĉiuj sciis, ke ĝi povus esti morta alparolo. Paŭlo Görgey kaj ankaŭ la aliaj taksis la silenton al populareco. Ja la aliaj tiel pensadis: „Mi ne volas vidi lin kiel vicprefekton, sed se la aliuloj ŝatas lin, tiam mi ne estas freneza mortbatigi min.”

La populareco estas stranga afero. El ĝi la ŝajno egalas kun la realaĵo. Sed povas esti, ke la ŝajno signifas al li pli multe. Nome se la homo estas populara, li multon eĉ ĉion povas atingi ankaŭ tiuokaze, se oni malamas lin. Sed li atingas nenion, se oni amas lin, sed tiu amo ne videblas. La realaĵo estas forta granitŝtono, sed la kariero baziĝas sur la ŝajno.

Eĉ centvorta teksto finiĝas per unu vorto, sinjoron Paŭlon Görgey eĉ hundo ne amis, sed li portis la titolon „ame estimata” kaj neniu kuraĝis forigi tiun. Ĉiuj sciis, ke li estas kruela, vanta, kaprica, suspektanta, orgojla kaj pigra homo. Sed ĉi tiuj malbonaj ecoj estas plejparte nur ŝajno. Li estis kruela, kio devenis el lia sangvina naturo. Tiuokaze li estas furiozema, sed kiam li trankviliĝas tiam li enprofundiĝas, li bedaŭras la malbonfaron kaj kelkfoje rebonigas tion.

Oni diras, ke unufoje li malsaniĝis en Lőcse¹² dum iu kunveno. Li suferis pro tremfebzo, kaj kuracisthelpisto donis al li kininon konstante, sed la tremfebzo ne ĉesis, eĉ fortiĝis. La medikamentoj estis senefikaj. Li kuŝis dum multe da tagoj en la departementdomo. Li sendis sian husaron al Görgő por porti tien lian flanelan suban jakon. La husaro portis tiun. Paŭlo rimarkis dum ĝia surmeto, ke sur ĝi mankas la supra butono. Pro tio li furioziĝis, eksaltis de sia lito, sin vestis kaj elkuregis de la ĉambro, surĉevaliĝis kaj forgalopis.

¹² La urbonomo Lőcse, laŭ la reguloj de Esperanto elparolendas: leĉe.

– Kien vi iras? – kriis la sinjoroj de la departemento surprizate.
– Dio mia! Kion vi faras? – teruriĝis la kuracisthelpisto, Andreo Plasnjik.
– Mi devas hejmeniri – li respondis raŭke, – por vangofrapi mian mastrumistion.

Li galopis duonhoron al Görgő sur la serpentuma malnova landvojo, dum kio li trankviliĝis kaj ĉesis lia tremfebzo. Rilate al tio li konis sin, ĉar la punjugon, punbenkon kaj la ceterajn ilojn li gardis en iu kamero, la ŝlosilon de tiu kamero iu infano devis porti sur iun poplon por ligi per ŝnuro sur iun arbobranĉon. Se, la ŝlosilon li devis uzi, tiam Paŭlo prenis la pafilon kaj la ŝnureton trapafis kaj la ŝlosilo falis sur la teron. Ĉi tio estis lia amuzo, kiu daŭris kelkfoje unu horon, ĉar liaj manoj tremetis pro kolero. Se li trankviliĝis, tiam li trafis la ŝnureton. Tiokaze li faris nenian kondamnon.

Sendube li klopodis por esti justa kaj pro tio li ne estis malbona homo, nur mishumora, kiun la plagoj igis nerva. Vane li estis saĝa, tamen li ne sciis fari tri aferojn: manĝi, dormi kaj forgesi. Sed li tre ege ŝatus bonan dormadon. Li ekstermigis ĉiujn kokojn en la ĉirkaŭaĵo de la kastelo, eĉ kokojn de la najbaraj kamparanoj. Tiu bovinpaŝtisto, kiu tagiĝe kornis, ricevis dudek kvin batojn per bastono. Ĉefe lian posttagmezan dormon estis malpermesite ĝeni. Multe da homoj ricevis pro tio ĉi punon. Nome la noktan dormon Dio donas, sed la posttagmeza dormado okazas en la departementdomo dum labortempo kaj pro tio estas pli bona ol la nokta.

Ĉiuj devis iradi piedfingre antaŭ liaj fenestroj, dum li finis la tagmanĝon. Finon de la tagmanĝo signis kanonpafo. Ekde tiam la najbara muelejo ne povis mueladi, ĉar la muĝado ĝenus lin. Ĉiuj zorgadis pri tio, ke bruo ne estu. La putro ne grincu, la ĉeno ne tintu, oni rompu nenion en la pistujo, ĉar sinjoro Görgey dormetas. Estis malpermesite kanti, paroladi laŭte. Ankaŭ la maljuna ĝardenisto Miĥelo Apró¹³ sciis, ke antaŭ la fenestroj de la kastelo li devas iri piedfingre. Pro tio ĉi vintre li surmetis gumoŝuojn anstataŭ la botoj, kaj somere li nudpiede iris sur la danĝera loko.

Foje okazis, ke lia eta nepo vizitis ilin dum la ferioj en Görgő.¹⁴ La geavoj ĝojis pro la vizito de la kara knabo, kiu havas jam sinjoran sorton, nome lia patro estas mielkukon faranta majstro de Késmárk, kiu instruigas la knabon por esti pastoro, ĉar la knabo estas sufiĉe magra. La geavoj iradas – venadas ĉirkaŭ la knabo, zorgas pri li, dorlotadas lin, ĉion faras ĉirkaŭ la knabo kaj klopodas fari bonon al li. Kio okazas nun? (Dio mia, la infanoj ĉiam scias tion, kion estas malpermesate fari.) La bubo rimarkas iun harmonikon sur iu ŝranko, deprenas

¹³ La nomo Apró estas familiano, nomsignifo: tre malgranda.

¹⁴ Görgő estas loknomo, loĝloko de Paŭlo Görgey.

tiun, portas al la korto, sidiĝas sub la tilio ĉe la fenestro de la dormoĉambro de la vicprefekto kaj muzikas gaje iun melankolian malnovan kanton:

„Hej, Buda, Buda, ĉu povus iu kredi?
Kiom da hungara sango fluis por vi?”

La muziko ne daŭris longtempon, ĝi povis esti unu minuto, sed la tie estantaj homoj tuj alkuregis la knabon por atentigi lin. Kaj sinjorino Apró preskaŭ flugis, kvankam sufiĉe kaduka ŝi estis, ŝiaj amelitaj juvoj preskaŭ krakis kaj siblis, ŝi perforte demetis la harmonikon el la manoj de la knabo.

– Ĉit! Malfeliĉulo! Venu tuj de ĉi tie!

Ŝi kun si tiregis, kuname kovrinte la knabon per sia antaŭtuko kaj kunportis trans la dornajn arbustojn, dum aŭdiĝis malfermo de fenestro de la kastelo. (Ho, ve, mia Dio!) Kaj iu ordonanta voĉo aŭdeblis:

– Nu, kio estas tio?

Respondo ne venis, li aŭdis nur susuron de la folioj de la arbustoj ĉiam pli de malproksimo. Li nerve alkuregis la korton, kiu estis belega paradizo, dank’ al sinjoro Apró, kiu faris kaj zorgis tiun. Tiu plantis la arbojn, kiuj jam iĝis gigantaj arboj, inter la arbojn li plantis arbustojn kaj el la floroj elformis la blazonon de la departemento Sepeŝ, kiu konsistas el la blazonoj de la familioj Thurzo, Berzevici kaj Dravecki. Kaj la portanton de unu korno el la familio Koroknai. Ĉiun dimanĉon de malproksimo venas la kamparanoj viziti la miraklon, ĉar ili kredas, ke ĝin ne sinjoro Apró faris, sed la Tero-patrino, kiu memstare elpuŝas la blazonon de la departemento Sepeŝ, montrante, ke tiu homo de Sepeŝ nun atingas sian reĝecon. (Ja li preskaŭ vere atingis tion – sed tio jam finiĝis – sinjoro Thököly kaj la edzino¹⁵ kaŝvagadas ie en la malproksima oriento.)

La geservistoj ĝuste akvumadis la plantojn de la belega blazono, kiam Paŭlo Görgey ekaperis sur la verando.

– Portu ĉi tien tiun homon, kiu harmonikis – li kriegis. – tuj serĉu kaj portu ĉi tien aŭ vivanta, aŭ mortinta.

Li grincigis siajn dentojn pro kolerego. Liaj dentoj estis ege malbelaj, ĉar li estis ankaŭ „progresanto” (nome tiutempe tiuj estis progresantoj, kiuj ellernis de la turkoj la virajn ĝuegojn de la fumado.)

Sed la geservistoj rigardadis unu la alian ektimante, la maljuna Apró paliĝis, kiel la muro, sinjorino Marják komencis purigadi la oblatofaran feron.

– Kiu harmonikis? – li demandis morne.

Neniu respondis, kvankam ĉiuj sciis la respondon, sed la geservistaro amis la geedzojn Apró kaj pro tio ili silentis.

– Sinjorino Marják, vi devis vidi la muzikanton.

¹⁵ Pri la edzino de Emeriko Thököly, naskita Helena Zrínyi, vi povas legi ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Helena_Zrínyi

– Mi ne vidis – respondis sinjorino Marják aŭdace – ĉi tiel mi kurbiĝu. (Sed ŝi estas saĝa kaj siajn manfingrojn rektigis.)

– Nu, vi bele mistraktas min. – furioziĝis Görgey – Ĉu neniuj scias?

Denove neniuj respondis.

– Preston, ĉu ankaŭ vi ne scias? (Tiel estis nomita la husaro.)

– Mi ne scias, sinjoro vicprefekto.

– Matiaso, ĉu ankaŭ vi ne scias? (Matiaso estis la koĉero de la parada kaleŝo.)

– Nek mi – tiu raŭkis singultantvoĉe.

– Do, estas tre bone, niaj filetoj, vi estas bravaj infanoj – kaj li ridaĉis grincigante la dentojn terurante. (Tiuokaze li estis afabla kaj plej senindulga.) – Se post duonhoro vi ne kunportos ĉi tien la muzikanton, tiam vi ĉiuj ricevos baton de bastono. Mi eldiris.

Poste li iris en la kastelon terure murmurante kaj piedfrapis la pordojn kaj la hundojn. La lastaj tre dolore hojlis. Tiun hojladon oni aŭdis eĉ ankaŭ en la korto.

Ja iĝis granda malĝojiĝo en la korto. La geservistoj konsiliĝadis pri la farendaĵoj: ĉu ili transdonu la knabon al Görgey, aŭ ne? Sinjorino Apró veis kaj diris, ke tiun ĉi tagon ŝi ne transvivos, li estas preta por ensalti en puton, sed oni ne atingu bati tiun knabon. (Dio mia! Kio estus la opinio de mia filino?)

Aŭdante la veadon de la onjo, ankaŭ oĉjo Apró perdis sian kapon, estante influebla homo, li kuregis en sian ĉambron por serĉi sian rozarion kaj kiel bona katolika kristano komencis preĝi, pensante, ke ĝi estos utila. Nur sinjorino Marják metis la manojn sur siajn koksojn.

– Nu, mi ne permesas, bati al neniuj bati tiun maldikan infanon! Timu neniun, mia fileto, mi ŝirmos vin! (Ŝi karesis la kapon de la lernanto, kiu tremante staris apud ŝi.) Iru en la kuirejon, la pordon mi ŝlosos. Poste mi aranĝos la aferon. Eniru, sidiĝu trankvile ĝis la tempesto ĉesos. Vi trovos tie kazean flanon en tuko kaj anserfemuron. Nu, mi iras kaj kunportos la ŝlosilojn. Estu trankvila, sinjorino Apró!

Sinjorino Marják ekiris tra la ĝardenon kaj de tie rekte iris al la vilaĝanaj ciganoj sur la korto la gapvagantaj geservistoj kaj la geedzoj Apró komprenis la planon de sinjorino Marják. (Ŝi amikece alprenis Peĉjon kaj apud kuraĝigoj helpis konduki lin antaŭ sinjoron Görgey. Nur la perfidema Preston teruris Peĉjon, flustrante en lian orelon: „Mi ne ŝatus esti en via cigana haŭto.”

Tiel ŝajnis, ke ankaŭ Peĉjo fartas malbone kaj deziras forfuĝi, sed sinjorino Marják forte prenis lian kolumon, malfermis la pordon de la laborĉambro kaj kvazaŭ ĵetis lin tien.

– Ĉi tie estas la deliktulo, mia sinjoro – ŝi kriis entuziasme.

La vicprefekto, kiu silente pipfumis dum kuŝo sur la kanapo kovrante sin per ursoledo, lace rigardis Peĉjon.

– Ho! – li diris indiferece kaj enue, – Vi bele harmonikis, Peĉjo! Sinjorino Marják! Donu al li unu forinton de Rejnlando¹⁶ kaj kvar rulaĵojn da drapoj.

Multe da similaj eventoj okazis tiutempe. Paŭlon Görgey oni malfacile povis ekkompreni. Li estis kaprica. Tamen oni ne koleris lin. Iu stranga feliĉo petolis pri li kaj en falsaj speguloj la malbonaj aĵoj iĝis bonaĵoj. Alia homo ricevintus baton, sed lin oni ŝirmis. Lasu lin! Tiun homon oni devas kompreni. Lia animo estas amarigita pro la forpaso de lia edzino, Li havas funebron, tiukaze lin estas malpermesate bati. Li estas tiukaze incitiĝema kaj kruela – sed ĝuste ĉi tio pravas, ke li estas bonkora.

Sed oni ankaŭ tion flustradis, ke ankaŭ la alian homon oni devas aŭskulti, ja la granda funebro pasis, sed la malbonaĵoj restis kaj li iĝis malvarm-kondukta asketo kiel li ŝajnis, ja dum super la kastelo de Görgő malheliĝas, ofte eblas vidi flugantajn ombrojn sur la muro de la kastelo kaj aŭdiĝas susuroj de juĵoj sur la nelogataj koridoroj...

Kiuj pli bone konis Paŭlon Görgey, ne kredis, ke li estas frivola. Sed tiuj, kiuj pli bone konis la kamparanajn junedzinojn de Görgő, ili kredis, ĉar tiuj junedzinoj estis famaj pri siaj beleco kaj koketado. Pro tio ĉi la viroj malvenkis en la bataloj de la „Reĝo de Késmárk”.

La familio Görgey havis puritanajn moralojn kaj inter la familianoj kaŭzis ĉagrenon la klaĉoj pri la „sovaĝulo.” Nur la bonhumora Johano Görgey, la pli aĝa frato, de Paŭlo klarigis ŝercadante la klaĉojn:

– Kvankam mi ne kredas tion, tamen se li faras tion, tio ne estas kulpo. Jam antaŭ dek jaroj forpasis la kompatinda Karolina. Ja li ne estas el ligno, sed se li estus el ĝi, jam ne estas krucifikso super la tombo. Ja ekde tio jam dudek jaroj pasis. Cetere neniu havas iun ajn komunaĵon pri ŝi. La homo plimultigas siajn servutulojn, kiom eble.

Pro la lasta frazo sinjoro Johano bone batis sur la dorson de sia edzino, Maria Jánoki. Sed efike de tio, ĉi tiu afero de Johano finiĝis, nome sinjoro Johano estis orakolo de la familio, kvankam li ne estis granda talento, kiel lia pli juna frato Paŭlo, sed li estis bona patrioto, fama patrujdefendanto kaj fortkaraktara homo.

Do, jes. Paŭlo Görgey vidviĝis en 1689, kiam ŝi naskis belan bebinon, kiun ŝi petis baptigi Rozalia. Ekde tiam li iĝis „sovaĝulo”. En la familio ĉiuj nomis lin ĉi tiel. La maljuna Johano kutimis diri al li: „Fraĉjeto, vi foriris el la blazono de la familio Görgey.”

Antaŭ tio li estis gaja, trankvila, aminda homo, sed la morto de lia edzino malbonigis liajn nervojn. Oni diras, ke boneco estas en lia koro, sed la bonecon

¹⁶ En la frazo temas pri ora mono de la Rejnlandaj (germanaj) regnestro rezidejoj:

https://hu.wikipedia.org/wiki/Rajnai_forint:

<https://www.google.com/search?q=Rajnai%20forint>

kovras la amareco kaj tiu amareco estas pli forta, ol la boneco. Nerva, kaprica, despota sovaĝulo li iĝis post la mortokazo.

La mortintan sinjorinon vere estis inde priplori. „Ni enfosas veran perlon en la teron.” – ĉi tiel komencis la funebran parolon sinjoro Samuele Podolinci, la pastro, okaze de la entombigo. Sinjorino Karolina Jekelfaluŝi ankaŭ jam kiel fraŭlino estis la plej bela en la tuta mondo, sed kiel junedzino, ŝi iĝis iom pli bela. Laŭ kroniko de Porubski; dum sia 17-a jaro ŝi havis 96 svatiĝantojn kaj ŝia orgojla patro Georgo Jekelfaluŝi ne volis doni ŝin al Kristoforo Mariaŝi, kvankam ambaŭ junaj homoj plaĉis unu al alia, ĉar talenta kavaliro li estis, sed la patro volis atendi ĝis ŝi akiros 100 svatiĝantojn. Nu, Kristoforo Mariaŝi instigis ruze siajn kelkajn bonajn amikojn svati ŝin ŝajnigante, ke la maljuna patro estu bonhumora. Paŭlo Görgey iris ankaŭ pro ŝerco al la familio Jekelfaluŝi kaj Karolina. Paŭlo kaj ŝi ekamis unu la alian. Oni ne parolis plu pri Mariaŝi, ja la hominoj estas ĉi tiaj. Ĉi tiel la geedziĝo okazis. Emeriko Thököly komencis la dancon kun la bela fianĉino kaj tiel raviĝis de ŝi, ke pro tio kelkfoje li pretis brakumi ŝin. Pro kio la fianĉo ofendiĝis.

– Ej, nu! Kio ĝi estas? Kial vi murmuradas, Görgey? – demandis la regnestro dum la festa festeno. – Ŝi plie estas mia, ol la via. Se mi estas reĝo de la *Altlando*, (tiutempe la sultano donis al li tiun titolon), tiam kiu havas la reĝinon de la *Altlando*?

Tamen oni diris ŝerce ĉi tiujn vortojn, sed tiuj havis seriozan komprenon. Ankaŭ dum la mielsemajnoj tiu ĉeestis en Görgő inkognite, akompanate de iu ĉevalisto. Paŭlon Görgey tiu vizito ege ĉagrenis. Kaj dum li estis en Késmárk kiel delegito, tiu mesaĝis al la edzino de Görgey, ke li vizitos al Görgő por vespermanĝi. Efike de tio Görgey ruĝiĝis kaj moroze respondis:

– Dum ĉi tiuj tagoj mi ne estos ĉi-hejme.

Thököly kuntiris siajn brovojn. Nikolao Berzevici maldiskrete, sed volante bonon ektiris la mantelon de Görgey kaj duonlaŭte petpetegis lin:

– Gardu vian kapon, mia fraĉjo-sinjoro!

Efike de tio ĉi la juna edzo rifuzis fiere la petpetegon:

– Mian kapon havas Lia moŝto, tiu gardu tion. Sed mi havas mian edzinon, tiun mi gardos.

La respondo plaĉis al Thököly kaj li respondis:

– Se vi ne volas esti mia dommastro, tiam almenaŭ estu mia gasto.

Kaj li restigis tiun por tagmanĝi, kio estis bela afero laŭ la delegitoj. Sed ne estis Thököly aliokaze en Görgő. Ĉu tiu ekkoleris? Dio scias. Povas esti, ke tiu ne havis tempon.

La suno, brilanta tiam plej brile sur lia vivovojo, post iom da tempo subiris. Nome ĝi estis malbona sunbrilo. Nome ĝi venis ne el la ĉielo, sed el la okuloj de la sultano. Kaj la sultano multfoje fermis la okulojn, ĉar en tiuj la ombro de la

kolero aperis. Unuvorte la triumfaj bataloj finiĝis. Thököly iĝis silenta homo, kiu en Turkujo meditas pri siaj memoroj. Ĉi-hejme en Hungarujo la situacio malboniĝis. Kelkaj enuaj, malgajaj jaroj sekvis. Nur en la kurio de Görgő regis feliĉo kaj kontenteco. Karolina iĝis aminda junedzino. Paŭlo Görgey deziris ĉi tiun perfektan paradizon. La ĵaluzo, kiu komence ege ekscitis lin, malaperis el lia koro. Kiu kuraĝos forrabi lian Karolinan? Ja, Thököly ne kuraĝis fari tion.

Sed tiam jam pli granda sinjoro venis por ŝi, ol Thököly: la morto. La bela sinjorino naskis filinon en 1689 al Paŭlo Görgey. Poste ŝi poreterne fermis siajn okulojn. Sed antaŭ la morto ŝi petis aldoni la infanon al ŝi kaj petis bapti la infanon al la nomo Rozalia.

Paŭlo Görgey eksterordinare malesperiĝis. Li kriegis, li ŝiris siajn vestaĵojn kaj volis bati kaj mordi kiel iu besto. Laŭ sia konduto fari tion dum la lasta honoro al la mortinto, Paŭlo iĝis freneza.

– Kiu estas tiu homo? – li konsciiĝis. – Kion li volas fari ĉi tie? Kiu vokis lin ĉi tien? Mi ne lasas forporti Karolinan. Forigu lin!

– Pro Dio! Bofrato! Havu menson! – sinjoro Darvaŝ silentigis lin – Ĉu vi ne hontas, ĉar vi insultas serviston de Dio?

– Kiu? Ĉu tiu estas servisto de Dio? Ĝuste mi havas aferon aranĝi pri ties ĉefulo. Ne lasu lin foriri! – kriis li febre – ja, mi volas ekkapti serviston de Dio, se Dion oni ne povas kapti, kiu forprenis mian karan edzinon. Laŭvorte ĉi tiu pastro estas via servanto, vi kruela dio. (Kaj li levis siajn manojn minacante al la ĉielo.). Nu, estas bone. Preston, Slimiĉka! Batu sur lin per bastono dudekkvar batojn.

La funebrantaroj konsterniĝis, teruriĝis pro la konduto de Paŭlo Görgey. La pastro milde rigardis al la ĉielo: „Pardonu lin, Sinjoro, ĉar pro doloro li kriegas!” La parencoj hontis, sed ne estis kapablaj silentigi lin kaj bremsi lin. Fine tri fortaj homoj: Johano Görgey, Kristoforo Jekelfaluŝi kaj Davido Horanski akompanis lin perforte en iun kelon, ĝian pordon ŝlosis kaj oni faris la funebran ceremonion sen lia ĉeesto, honorante la mortintan belegan junedzinon kaj li restigis la pastron por tagmanĝi.

2-a ĈAPITRO

La suspekto

La singardema forto de la Providenco certe estas rekonebla ĉe la plej etaj aferoj kaj tiu ankaŭ nun tiel aranĝis la aferon, ke samtempe ankaŭ Maria Jánoki sinjorino Johano Görgey naskis filineton, kiu iĝis Borbalo kaj nun estis sepsemajna. La brava edzino, havanta sufiĉe da patrinlakto, decidis, ankaŭ la alian knabineton ŝi mamnutros. Ja ŝi ne volis, ke tiun orfulinon ŝi lasu senpatrine, do konfidante tute al la servistino. La tiamaj homoj estis sensciaj kaj ili ne pensis, ke je efiko de la blanka lakto de la kamparana mam-nutristino, nobela, do blua sango formiĝos en la sinjora bebo. Kiam la geedzoj povis paroli kor' al koro kun la bofrato Paŭlo, tiam ili konsentis kaj la suĉinfano estis transportita en la kastelon Toporc.

La melankolia patro ankoraŭ ne vizitis sian filineton kaj sinjorino Marják daŭre teruris lin per tio, ke lia filineto ne havos sufiĉe da lakto, kiam alvenis la malgaja famo, ke mortis filineto Birike (la karesnomita Borbalo) de Johano Görgey. Nome tiu filineto estis malfrua infano kaj laste naskita (gesinjoroj Johano Görgey havis plenkreskajn infanojn), Paŭlon ne interesis la morto de tiu infano. Ĉi tiu infano estis neniu, ĉar ĝi estis fremda, nekonata. La infano estis nekonata por ĉiuj. La parencoj ne faris grandan zorgon, ili ne iris al la entombiga ceremonio pro la tiutempe reganta neĝblovada vetero. La gepatroj silente kaj doloreme akompanis sian etan mortinton al la familia kriptoj. Ne okazis eksterordinara okazaĵo. Sinjoro Paŭlo faris viziton pentekoste al Toporc (tiutempe la infano jam sciis ridi), kie li spertis diversajn aferojn. Li serĉis en la neevoluinta vizaĝeto la dolĉajn trajtojn de Karolina, sed li ne trovis tiujn. Li atentis la infanon el tiu vidpunkto dum multe da horoj. La infano estis bela kaj kara, sed tamen ne estis ŝi la sama. Ho, ne. Nur kelkfoje ekbrilis io en rigardo de la infano, kvazaŭ tio estus el cervulineta rigardo ŝia, sed tiu flamo baldaŭ malestiĝis. Eble tio estis nur frukto de imago. La etulino estis dika kiel la flugilaj anĝeletoj pentritaj en la katolikaj preĝejoj, kiuj flugis ĉirkaŭ ŝiaj lipoj. Kiam la etulino vidis sinjoron Johano, ŝi etendis sajn brakojn, sed kiam la bofratino metis sur la brakojn de la patro, ŝi ekploris lin timante. Kie estas la infana instinkto? Lin kaptis ia stranga maltrankvileco, al kiu li ne povis nomdoni. Liaj pensoj kirliĝis en lia zumanta kapo, kiel la korvoj en la nebulo. Li kuntiris siajn brovojn, kiam Johano ellevis la infanon el la lulilo kaj per infanecaj vortetoj provis allogadi ŝian sunradian rideton kiel pardonpeton al sia patro.

Estas mirinde, ke li ne hontas kondukti tiel ĉi antaŭ la advokat-kandidatoj, kiuj primokadis lin malantaŭ lia dorso: „Jen, la vicprefekto freneziĝis, ĉar li iĝis infanzorga servisto.” Se la infano estus infano de Johano, – li fantaziis plu tiel

same kiel la advokat-kandidatoj, – sed ĉi tiuj pensoj estis la propraj pensoj kaj tiuj flugadis ĉirkaŭ la temo kiel la muŝoj.

Kiel povas ami Johano tiun ĉi infanon? Ĉu ĉi tio estas natura? Kial amas tiu serioza vicprefekto tiun fremdan infanon? (Nome tiutempe Johano Görgey estis vicprefekto.) Ankaŭ la bofratino adoras la infanon. Kaj ili ne menciadas sian filineton. Ŝi mortis. Ili ne bedaŭras ŝian morton. Sinjoro Paŭlo parolis pri tiu infano, sed apenaŭ ili estis malĝojaj. Kvazaŭ iu kanario estus mortinta. Johano diris tion, ke ŝiaj piedoj ankoraŭ ne tuŝis teron kaj ŝi mortis en la vindo kaj ne estis sur brakoj sidanta. La infano sidanta sur la brakoj ja estas preskaŭ fraŭlino.

– Ĉu vi estas jam fraŭlino, mia karulino? Nu, ridu iomete al via patro.

Sed Rozalia ne ridis sed kaŝis sin malantaŭ kapon de Johano. Tio ne estas miraklo, ĉar la sovaĝulo iĝis vere sovaĝa homo, kies vizaĝo estis malhela kaj acerba. Lia barbo estis hirta, lia aspekto estis neglektita. Ne nur la infanoj, sed ankaŭ la plenkreskuloj timis lian aspekton. Sinjoreto Georgo, belega dekjara adoleska studento de Késmárk¹⁷ same hejmeniris por festi la Pentekoston. Sinjoro Paŭlo volante scii pri la de li spertitaj aferoj demandadis la sinjoreton.

– Ĉu vi ricevis feriojn ankaŭ dum Pentekosto? Kiam vi kutimas studi? Certe ankaŭ vi estas simila al Steĉjo Ŝvabi, kiu petas forirpermeson ankaŭ tiam, kiam lia patrino buĉas anseron.

– Onklo Paŭlĉjo! Mi kutimas peti nenion, eĉ ne feriojn.

– Nu, mi vidas, ke vi estas ido de familio Görgey. Kio vi volas esti?

– Soldato.

– Ĉu jes? Sed la soldato devas obei.

– Vi pravas. Mi estas kapabla por obei, sed por peti ne. Mi nur per permesilo venas hejmen. – - Ho! Vi estas amiko de la virto. Kiomfoje vi estis ĉi-hejme ĉi-jare?

– Kristnaske, paskofeste kaj nun.

– Ĉu vi estis ĉi-hejme, kiam via eta pli juna fratino mortis?

– Okaze de tio mi ne estis ĉi-hejme.

– Kial?

– Ĉar mi ne informiĝis pri ŝia morto.

– Ĉu ne? Ĉu ili ne skribis al vi pri tio?

– Ne.

– Kiam kaj de kiu vi informiĝis pri tio?

Pli malfrue mia patro diris tion, kiam li vizitis min en Késmárk.

– Ĉu via patro ege malĝojadis pro ŝia morto?

– Povas esti.

¹⁷ Pri la iama hungara urbo Késmárk, legeblas ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Kežmarok>

- Ĉu vi ne vidis tion?
- Mi ne rigardis lian vizaĝon.
- Ĉu vi ege bedaŭris, ke via pli juna fratino mortis?

Sinjoreto Georgo pensis por diri la veron, ĉar li sciis, ke mensogi neniam estas permesate. - Mi ne konis ŝin - li respondis tute aplombe.

- Sed vi devis vidi ŝin kristnaske.
- Jes, mi vidis ŝin, sed...
- Tiukaze vi scias, kiel ŝi aspektis ... Nu, cerbumu! - instigis lin Paŭlo Görgey.

- Nu, nenia.
- Kia parolo estas tio? - li riproĉis la knabon.
- Mi konceptis tiel, onklo Paŭlĉjo, ke la infanetoj ne similas al la katetoj, kiuj tuj post la naskiĝo estas aŭ buntaj, aŭ nigraj, aŭ grizaj kaj oni povas bone ekkoni, kiu estas kia. Mi povas distingi la knabinojn nur tiam, se tiuj portas jam jupon.

- Nu, vi estas ege ruza. Ĉu vi volas diri tion, ke Borbalo estis simila al Rozalia? Kiel povis ekkoni via patrino sian filineton?

- Ho, ŝia tasko estas facila, ĉar ŝi signis ambaŭ filinetojn per diverskoloraj kufoj.

Paŭlon Görgey ne kontentigis ĉi tiu naive stulta parolado, ĉar dume li iĝis iom ekscitita. Kiam post tritaga restado li kisis sian filineton dolĉe dormantan en la lulilo, kaj li adiaŭis siajn fraton kaj bofratinon kaj ekiris al Görgő sur sia kaleŝo tirata de kvar ĉevaloj, en li sentanta ilian teneron, elformiĝis iu dolorema suspekto ĉiam pli kaj pli fortiĝanta. Povas esti, ke lia Rozalia estas ilia Borbalo kaj Rozalia mortis.

Dio mia! Ĉu tio povus esti? Lia koro ekdoloris, sed li konsideris, ĉu tio povas esti ebla?

Nu, kial ĝi ne povus esti ebla? Johano estas la plej noblaanima homo kaj la plej bona frato tutlande. Ja li estas bonkora kun fremduloj kaj nomiĝas de la regionanoj: „Patrono kaj patro de la luteranoj.” Lia bona koro sugestas al li bonajn aferojn. Kaj Maria estas lia inda kunulino. Ŝi estas la enkorpiĝo de la nobla poezio. Kvazaŭ ŝi estus ne edzino, sed sanktulino.

Nu, ni povas diri nun, ke Rozalia mortis, ni supozu tion - saĝumis sinjoro Paŭlo en si - la geedzoj Johano Görgey malesperiĝis, ĉar ili sciis, ke la plago min frenezigos. Kaj ili sciis, ke ili devos informi min iel pri la morto. Dume ili ekhavis iun savideon, kiun ili komunikis unu al alia: „La infano mortis, sed Paŭlon ni devas delikate sciigi. Ĉi tiu eta animo foriris al sia panjo, sed se Paŭlo sciigis pri tio, tiukaze li ne iros post siaj amatinoj, sed li iros en la eternan konfuzon. Pro tio, ni ne diru al li, ke Rozalia mortis, sed diru tion, ke Borbalo mortis. Ja ni ne havas problemon. Nia Borbalo estas vivanta, ni amos ŝin, ni estos feliĉaj. Ne

okazis io alia, nur tio, ke ŝi nomiĝas Rozalia. Ĉu Paŭlo havas profiton el tio? Por Paŭlo ĉio ĉi estas utila. Sen tio ĉi, li damniĝos, kun tio ĉi, li estos savita por la publikaferoj, por la patrujo kaj li povos esti feliĉa. Ni havas du filinojn, kvankam ili havas jam edzojn. Ankaŭ ŝi havos edzon. Kaj iliaj infanoj kurados ĉe ni. Sed Paŭlo havas neniun.”

Por Paŭlo ĉio ĉi estas utila. en sia cerbo kaj nun jam li komprenis, kial ili ne faris problemon pri la morto de sia infano. (Nu, ĉar la bebo ne estis ilia infano.) Kaj kial ili adoras la vivantan infanon (ĉar maljunaj gepatroj pli forte amas la infanon, ol la junaj.). Kaj nun jam estas klare, kial ne similas la infano al Karolina kaj kial mankas la patra stimulo ĉe li...

Tiu ĉi suspekto pligrandiĝis en Paŭlo kiel ia tubero. Ĝi unue nur ĝenis lin, pli malfrue ĝi estis dolora kaj pro tio li ne povis dormi. Post du-tri semajnoj li denove iris al Toporc kaj kiel detektivo esploradis, demandadis ruze la geservistojn pri la afero, liajn fraton, bofratinon, sed la afero iĝis ĉiam pli kaj pli malklara. Li sciis klarigi ĉion de alia flanko de la medalo. Ho! Dio mia! Mi estas ege freneza! Ĉi tiuj bonaj homoj karesnomadas la infanon, ke ili konsolu min kaj pro tio ili ne menciadas la nomon de Borbalo, ke mian animon ili deturnu de la malĝojaj temoj.

– Kial ili ne faris grandan ceremoniadon? Kio kiel estis? Kion ili sentis, ej do mi ne scias. Ĉu tiu fakto, ke la eta infano ne similas al Karolina? Sed, ĉu en la embrio la malgranda pomo similas al la pasintjara granda pomo? Sed ĉu tio ne similos somerfine? Ne, tio ne estas ebla, kion mi pensis.

Ho, ve! Vane estis fuĝi. Ĉi tiuj animon mordantaj sukuboj ripozis nur momentojn, poste returniĝis kaj denove turmentis lin. Li okupis sin pri ceteraj farendaĵoj, vizitis siajn vilaĝojn, ĉasadis multe, sed tio ne helpis solvi la problemon. Dume li volis, ke li al iu rakontu la malĝojon kaj de tio lia animo malpeziĝu. Li ne fidis jam sian propran konfirman juĝon, kvankam kiel aliuloj, ankaŭ li mem estimis sian juĝkapablon. Sed ĉar li estis saĝulo, li sciis, ke la plej saĝa homo povas penetri en iun fiksan ideon kun kiu li komunikis sian suspekton. Li pensis pri sinjorino Marják: ŝi estas fidela virino, kiu vidis la etan Rozalian dum tri – kvar tagoj. Ŝi helpis ĉe la banado ĝis oni forportis ŝin. Sinjorinon Marják Karolina venigis al lia domo kaj per ia superstiĉa antaŭsento li sentis, kvazaŭ li povus paroladi pere de ŝi kun Karolina pri la afero.

Stefano Roli, ano de la asiza ĵurio, ne estis hejme kaj la ĉefjuĝisto tagmanĝis sola. Paŭlo alparolis la sinjorinon, kiu okupis sin ĉe la servica ŝranko.

- Bonvolu diri al mi, sinjorino Marják, al kiu similas la eta Rozalia?
- Tiu similas kompreneble al sia patrino – ŝi respondis simple. – Ĉu ne?
- Nome mi ne scias malkovri similecon – daŭrigis Paŭlo Görgey ĝemante.
- Sinjorino Marják tiris ŝultron.
- Neniun similecon – plendis plu Görgey. – Ĉu tio ne estas stranga?

– Kial ĝi estus stranga? Se estus ia strangeco, tio estus en tio, ke ĉiuj okuloj alie vidas, ĉiuj homoj havas alian opinion. Ĉu ne?

– Vere, vi pravas. Sed tiu cirkonstanco ĝenas min, ke el inter la du suĉinfanoj unu mortis, kaj ankaŭ kromaj ceteraj cirkonstancoj ĝenas min.

– Ĉu ankaŭ alia cirkonstanco? Hm.

Nome la homo rememoras pri multe da frenezaĵoj, ke oni la du infanojn interŝanĝis.

SinJORINO MarJák kaptis ĉi tiun penson kiel la serpento la dikan skarabon dum flugado. Nome ŝi ŝategis la klaĉojn, ŝi estis feliĉa malkovri la malbonaĵojn kaj tiujn disvastigis. Sed la Providenco donis al ŝi senkulpan vizaĝon, sincerajn okulojn. Ŝi uzis sian langon arte, kaj oni ne povis nomi ŝin malica klaĉanto. Ŝia metodo estis, ke ŝi ĉiam nur demandis kaj nenion asertis kaj demandis kaŝe pri pikantaj aferoj.

– Ĉu vi tion asertas, ke oni interŝanĝis la du infanojn? (Ŝi gapis pro la surprizo.) Ho, Dio mia! (Pie ŝi faris krucon al sia bruso.) Ĉu nia Rozalia estus ĉe sia panjo? (Ne portu nin en tenton! Ĉu oni interŝanĝis ilin)?

– Nu, mi ne asertas tion. Mi nur pensis tion.

– Ĉu vi menciis tion – meditis sinJORINO MarJák. – Vi estas ege saĝa. Kiel mi ne pensis tion ĉi, kiam mi aŭdis multe da samaj kazoj.

Kaj ŝi menciis iun filon de sinJORO Ostrolucki, kiun oni iam interŝanĝis. Poste ŝi aŭdis pri iu filino, kies nomon ŝi forgesis sed sciis, ke tiu estis grafodevena fraŭlino kaj loĝis en Kaŝŝa. Multajn historioj ŝi rakontis el sia memoro, ĉion kolektante kiel el nestoj iu monedo.

– Sed ĉi tiuj kazoj bone finiĝis – ŝi diris. – Iu nevuso ĉiam solvis la enigmon. Tio estas problemo, ke nia infano ne havis nevuson sur siaj korpopartoj. Tiel ŝajnas, ke la iamaj infanoj havis tion.

– Vi parolas denove naivan stultaĵon.

– Ĉu mi parolas naivan stultaĵon? – ŝi ekskuzis sin kolere. – Jes, ĉar mi estas nur iu malklera vidvino de iu malfeliĉa peltisto. Mi ne povas paroli saĝajn aferojn. Ĉar se la afero estas vera, tiam kion vi volas aŭdi kaj mi ne povas helpi. Sed se la afero ne estas vera, tiam kial mi estas naive stulta?

– Ho! sinJORINO MarJák! Via parolo estas pikanta – li diris ĝisduone ŝerce, sed plaĉis al li, ke la sinJORINO komencis mokadi.

– Nu, tio estas „bela afero”. Mi estas pikanta kaj sarkasma. Pro tio mi silentas, ĉar mia animo estas bona, ja mi ne volas diri malbonon al vi kaj al viaj parencoj en Toporc.

– Ej! – ĉagreniĝis Paŭlo GÖrGEY – ja ankaŭ mi tiel pensis, ke ĉio okazis pro bonaĵo.

– Jes, kompreneble pro la bonaĵo – ŝi kaptis la vorton „bonaĵo”. – Ho, Dio mia! Ĉio okazis pro la boneco, ne pro io alia. Ĉu ekzistas pli granda bono, ol la gepatra

amo? Ĉu estas tio pli pia antaŭ Dio? Ĉu la sinjoroj de Toporc ne havas piecon kaj perfektecon? Kiom povas esti dankema tiu infano, kiun la gepatra mano portas al la paradizo de la havaĵo de la Tero? Ĉefe se tiu ne devas akiri la havaĵojn perforte. Se nur ili devis diri, ke ŝia nomo estu Rozalia. Al kiu estas tio malbona? Por neniu. Ĉar ŝi heredas la kastelon de Görgő, la muelejojn kaj la arbarojn.

– Tio estas stulta afero – murmuris Paŭlo Görgey duonvoĉe plie alparolante al si mem. – Ja la kastelon de Görgő ĉielmaniere mia pli aĝa frato heredos, nome la geedzoj Darvaŝ ne havas infanojn.

Sinjinino Marják estis konvinkita. Ŝi diris nenion, sed savis sin kontraŭ iu vespo, kiu enflugis tra la fenestro kajflugadis ĉirkaŭ ŝi.

– Huŝ vi fia! Vi ĝenas mian penson. Ankaŭ vi turmentas min kontraŭ tio, ke mi neniun neniam turmentas... Ĉu ĉion ili heredos ĉielmaniere? Tio povas esti. Vi certe scias pli bone. Mi diras malbone, ĉar mi scias ĉion malbone. Kion povas scii la simpla vidvino de iu peltisto? Sed mi deziras plej bone, se ĉion havus la vera Rozalia. Kial mi parolas pri vera Rozalia, kvazaŭ ŝi estus ne la vera Rozalia? En la mondo ĉio havas kaŭzon. Ĝi atingos sian sorton same kiel ankaŭ la aliaj setlejoj Jekelfalva, Lesnice; la posedaĵoj de familio Jekelfaluŝi. Sed tion ĉi denove nur vi scias kaj povas diri ankaŭ al mi.

Ŝi sekrete ĵetis sian mildan, sinceron radiantan rigardon al sia mastro kaj vidis lin ŝanceliĝi malantaŭen, kvazaŭ bato estus lin trafinta.

– Iru de tie ĉi en la inferon! – li murmuris laŭte kaj batis sur la tablon. Je tio la glaso kaj la teleroj ekiris al la tero sur la glitiĝanta tablotuko, sed ekiris ankaŭ sinjinino Marják, nu ne en la inferon, sed en la kuirejon. La inferon ŝi lasis por Görgey.

Novaj perspektivoj malfermiĝis antaŭ li. Li ne pensis pri tiuj ĝis nun. Ĉi tio estas nova eblo. Ĉi tiu eblo ekzistas. Sinjinino Marják ĉe ĉi tio serĉis la solvon. Ĉu estas permesate supozi, ke geedzoj Johano Görgey havas malaltnivelan volon? Certe ne. Ili ne mensogos pro la profitgajno. Ĉu ili forĵetus la profiton? Povas esti, ke ili ne estas puritanaj tiome. Fine ĉiuj emas akiri la propran utilon kaj tial en ĉiuj familioj povas ekesti iaspeca makulo de ilia beleco. Li pensadis pri la konataj nobelaj familioj, kiu kiel akiris siajn havaĵojn. Inter la makuloj de beleco okazis ruzaĵoj, artifiko. Jes. Paŭlo Görgey ne bruligus sian manon por pruvi la bonecon de Johano. Penso sekvis penson, el kio sekvis, ke sinjinino Marják, kvankam ŝi tial komunikis la kazon, ke ŝi demetu kelkajn ŝtonojn de la animo de sinjoro Paŭlo, nun ŝi alrulis unu grandegan rokon.

Ĉi tiel cerbumadis Paŭlo Görgey fandiĝinte en profundan maltrankvilecon. Ofte li vizitis al Toporc. Li tion kredis, ke la novaj impresoj ĉesigos la malnovajn. Li provis ĉion. Ekzemple li sendis spionon en la kastelon Toporc. Li ordonis Suzana filino de sinjinino Marják esti infanzorga servistino, al kiu li donis sekretajn

ordonojn. Sed la malnovaj spuroj plue restis, novaj ne malkovriĝis. Kvazaŭ la tempo estus haltinta, nur la vento susuris super Késmárk...

Foje io tamen susuris. Informo venis el Transilvanio, laŭ kiu Emeriko Thököly invadis en Transilvanion kun la sultana armeo kaj la entuziasma eta lando proklamis lin regnestro. Ĉi tiu novaĵo entuziasmigis la homojn, kiuj kriis: „Enseliĝu, kurucoj!” La homoj antaŭprenis la malnovajn selojn kaj akiris la rustajn glavojn...

Ankaŭ Johano Görgey varbis kelkajn nobelojn nomitajn lancaj nobeloj de Sepeš kaj ili tuj ekiris. En la departementdomo li lasis nur unu leteron, en kiu li rezignis la vicprefektan oficon, dirante, ke „pli gravan aferon li devas aranĝi.” (Ĉi tiel oni nomis la militiron, plie li estis dirinta unu longan blufan frazon.) Li proponis akcepti kiel sian posteulon lian pli junan fraton vicprefekto. Nome lia pli juna frato havas fortajn manojn, akran menson, kiuj estas bezonataj, dum la tiutempa malcerta vivo.

Kiel ni jam scias, do Paŭlon oni elektis unuvoĉe al vicprefekto. La nova ofico, ekzercado de la potenco amuzis lin dum iom da tempo, kio estis terapio por li. En la departementdomo okazis pli brua socia vivo, kiu malpliigis lian malĝojon pro la morto de lia edzino. Samtempe tio malklarigis la fantastaĵon de la interŝanĝo de la infanoj. Sed vana estis la multo da pritraktadoj, la vigla politika vivo, tamen ne restariĝis lia anima ekvilibro. La suspekto estis en lia cerbo konstante lin urmentanta, ankaŭ la publikaferoj ofte pelis liajn pensojn ĝuste al tiu tereno.

Pro tio elformiĝis tiu rezulto, laŭ kiu, li kiel vicprefekto kaj parenco zorgadu pri la transporto de la familio de Johano al sekura loko, ĉar la kastelo Toporc estas danĝera. Nome la imperiestraj armeoj eble povus okazigi venĝon kontraŭ ĝi. Do, Paŭlo devus porti la loĝantojn de la kastelo Toporc en sekuran rifuĝejon, eble en la urbon Lőcse¹⁸, kiu estis forta urbo. Sed la plano de Paŭlo Görgey estis alia koncerne la sekurecon. Li volis akiri provaĵon unue koncerne la sekurecon de Rozalia. Li decidis tiel, ke Rozalian li portos al Osgyán ĉe sia pli juna fratino. Li kaj sinjorino Darvaš iris al Toporc por forporti de tie la infanon. Tie ili aludis al la milita situacio kaj al tio, ke en Osgyán (ja sinjoro Darvaš estas malsana kaj ne politikas) la infano plie estos en sekuro, kvankam Rozalia en Toporc nun ne estas en danĝero. Pro tio ĉi ili petis la bofratinon paki aĵojn de la infano, ĉar ili tuj kunportos la infaneton. Ili pensis, se ili tuj kuregos en la ĉambron, tiam la patrino (se vere estas tiu) perfidos sin kaj ne donos la infanon. Sed se ŝi ne donas facile la filineton, tiam certas, ke la filineto estas infano de Karolina.

Ĉi tiel okazis ĉio. Perletere li preparolis ĉion kun sia pli juna fratino, kiu estis kuraĝa, amazona kaj rapide faranta brava sinjorino. Ŝi iris al Görgő kaj ili kune iris al Toporc por la filineto. Ili kunportis sinjorinon Marják, kiu pro du kaŭzoj

¹⁸ Pri la urbo Lőcse /leĉe/ vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Levoča>

volis iri: unuparte ŝi volis vidi Rozalian por kompari la dusemajnan kaj la nunan Rozalian, aliparte por adiaŭi sian Suzanan.

Estis agrabla, sunbrila, aŭtuna vetero. Ili ĝuis la veturadon, kiu memorigis sinjorinon Darvaŝ pri ŝiaj infanĵaroj. Ili iris surmonte – survale inter arbaroj, boskoj, akvofaloj al la montaro Karpatoj de Sepeŝ. Ili vidis malnovajn fortikaĵojn sur la montoj kaj en la valoj vilaĝojn ŝajne dormantajn. Laŭ la arĝentkolora rivereto nur la muelejoj ŝajnis movi sin. Gregoj paŝtiĝis sur la montoflankoj. El la malproksimo malfacila estis eltrovi kio estas la rokoj kaj kio la ŝafoj, ja tiuj estis tre similaj. La domanoj en Toporc ĝojis pro la gastoj, sed nur mallongan tempon. Nome sinjorino Darvaŝ ne multe ceremoniis, sed anoncis, ke ili venis viziti la filineton kaj efike de tio ĉi la edzino de Johano Görgey ege surpriziĝis.

– Ambaŭ estas junedzinoj.

– Sed mi venis ne nur por rigardi la filineton, sed ŝin tuj ni kunportos.

Dume sinjoro Paŭlo rapide konfesis la kaŭzon de la forporto de la bebo al Osgyán. La sinjorino de Toporc ektimis kaj rigardadis la vicprefekton kaj la bofratinon el Osgyán. Ŝi esperis, ke la tuto nur estas ŝerco.

– Sed mi povas defendi la infaneton per mia korpo.

– Ho, mia animo, bofratino kara, via korpo estas sufiĉe dika, sed estas bagatela la ŝtonmuro.

Sinjorino Darvaŝ ridetis, ĉar Maria estis longstatura, bela sinjorino havanta grandegan korpon.

– Mi tre ege ekaminte ŝin, ne povas disiĝi de ŝi, mi prefere mortos – ŝi ĝemis, kaj dume el ŝiaj okuloj ekiris la larmoj.

Sur la frunto de Paŭlo Görgey pro la kontraŭdiroj ekaperis faltoj.

– Ĝi devas esti ĉi tiel, Maria. Tion sugestas la maltrankvilo de koro de la patro.

– Nu, ja, mi dankas pro tiu koro de la patro! Vi kunportos vian solan infanon tien, de kie mi ne povos aŭdi informojn pri ŝi, kien mi ne povas iri, se mi volas kisi ŝin.

– Ŝi estos tie nur dum la milito, poste denove ni reportos ŝin al Toporc.

– Ja tio estas la problemo, ke estas milito. Mia edzo estas sur la batalkampo, mia fileto estas en Késmárk, nur ĉi tiu infaneto estas mia konsolanto.

– Kial vi ne diras tion, – diris moke la vicprefekto, – ke ŝi estas via defendanto? Kiel ŝi povas konsoli vin, mia kompatindulino?

Dume sinjorino Darvaŝ levis sur la brakojn la infaneton.

– Ŝi estas tre dika – ŝi diris – ĉi tie ŝi havis bonan lokon, estus malbone forporti ŝin de tie ĉi, sed ŝia patro deziras tiel. Trankvilu Maria, ŝi ne malsatos ĉe mi.

Ŝi remetis la infanon sur la ursoledon, kuŝantan sur la mezo de la ĉambro. La bebo estis bela kaj ruĝa, mola kaj pigra. Ŝi jam ne mamsuĉis (tiutage estanta unujara), ŝi scias balbuti sed iri ne. (Ja la filinoj unue ekparolas, la filoj unue

ekiras). La eta Rozalia ne volis ekiri. Ŝi glitis sur la tero, aŭ iris mane – piede. Prefere ŝi staris kiel iu damo de la kortego de Liliputo kaj ordonadis Suzana, aŭ al sinjorino Johano Gőrgy: „Portu min tien – portu min ĉi tien!”

Nun la maljuna sinjorino Marján kaŭris apud ŝi kaj amuzis ŝin recitanta diraĵojn, kiuj gajigis la infanon. Ekzemple la sekva estis grandsukcesa: „Ho, kankroj de la riveroj Dráva, Rába, Rábca mordetas miajn piedojn.” Rozalia laŭte ridis, ĉar en la teksto klakis la „r” – sonoj. (Dum tiu diraĵo la ĉambro subite heliĝis kaj la mebloj ekbrilis.) Sinjorino Marján tre sciis paroli laŭ la infanlingvo por la beboj ĝinde. Poste la dirado estis daŭrigita:

– Ĉu vi rememoras min, mia eta kolombino? Ĉu ne? Ej, vi estas malbela infano. Mi tuj batos vin. – Kaj ŝi batadis la ursoledon. (Ankaŭ tio plaĉis al Rozalia.) – Ho, vi vidis min foje inter la vivaĵoj de la mondo, vi estas ege sentaŭgulino. Mi prenis vin la plej unue, mi eltiris vin el la beko de la cikonio dirante al ĝi, ke tiu ne portu for ĉi infanon, ĉar ŝi estas la nia. Ĉu vi ne ekkonas min? Mi estas sinjorino Marján. Tie estas via paĉjo, via dolĉa paĉjo. Rigardu al li!

La bebo rigardis al la montrita direkto, sed la sinjoro, havante grandan lipharon, ne interesis Rozalian kaj indiferece ŝi rigardis aliloken.

Paŭlo Gőrgy ĝemetis.

– Katarina – li alparolis sian pli aĝan fratinon timeme kaj maltrankvile – diru, al kiu similas ĉi tiu infano?

Sinjorino Darvaŝ kolere respondis, ĉar dume ŝi forgesis pri kio ŝi volis demandi sian bofratinon.

– Mia dolĉa amiko! Rozalia similas al ĉiuj infanoj, kiuj havas du okulojn, du orelojn kaj unu buŝon, escepte vin. Sed vi tion volas, ke mi asimilu ŝin al vi. Ne, ĝuste ŝi ne similas al vi. Sed ŝi pravas, ĉar alie ŝi ne edziniĝos.

La malmolaj trajtoj de Paŭlo Gőrgy faris eldevigitan rideton.

– Ho, ne. Mi nur demandis pro tio, ĉar laŭ mia opinio ŝia vizaĝo estas simila al la vizaĝo de Maria, al tiu de mia bofratino.

Sendube tio estis planita rimarko, sed fiaskis, ĉar subite tra la malfermita pordo envenis la ĉambro kunludanto de Rozalia, la kato, kiu portis en sia buŝo unu garolon. La birdo baraktis per siajflugiloj. La garolo stupide kriĉis: „Ne timu Matiaso! Ne timu Matiaso!” La kato aŭdante homan voĉon antaŭ si, ege konsterniĝis kaj haltis antaŭ la bebo. – Pipi¹⁹! – balbutis Rozalia fortvoĉe kaj volis kapti la garolon.

– Tuj donu ĝin ĉi tien!

Sinjorino Johano Gőrgy ekkriis:

– Ho, ve! Dio mia! Tio estas la garolo de sinjoreto Georgo! Ni devas ekkapti rapide la katon!

¹⁹ Pipi estas la bebolingva nomo de la birdido.

SinJORINO de Johano GÖRGEY kaj sinJORINO MarJák postkuris la katon.

– Donu al mi la birdon! – ordonis la bebo al la kato.

Sed la kato tute ne volinta delasi la garolon kuregis ĝis fino tra la ĉambroj kaj rimarkante dume malfermitan la fenestron, elsaltis tra tiu dum la kuraĝigo de la pia birdo: „Ne timu Matiaso! Ne timu Matiaso!” (Tiujn vortojn la sinJoreto Georgo malfacile instruis al la birdo dum lia ferio.) Fine la kato grimpis sur la bastionon, kie finfine ĝi jam povis ĝui sola la frukton de sia tolero, nome la kapton de sia predo post la longa atendado kaj kaŝrigardado antaŭ la kaĝo por kapti la birdeton.

Ĉi tiu eta dramo kaŭzis grandan eksciton. SinJORINO Johano GÖRGEY faris grandan bruon buŝbatalon: Kiu servist/in/o lasis malferma la pordon de la kaĝo en la ĉambro de sinJoreto Georgo? Sed ĉar ne montriĝis respondeca persono, ŝi ĉiujn pririproĉis. Fine ŝi jam furiozis, ŝi ekstaziĝis. Oni devis ŝin kuŝigi en la liton kaj trinkigi per ĉiuspecaj teoj.

Sekvatage jam tagiĝe por ne vekti la malsanulinon, sinJORINO Darvaŝ jungigis, la infanon ŝi metis inter kusenegojn kaj kune kun Suzana la infanon zorganta servistino, ŝi ekiris al Osgyán. Post ne longa tempo ankaŭ la vicprefekto kaj sinJORINO MarJák preparis sin por ekiri. SinJORINO MarJák sidiĝis apud la koĉero sed kelkfoje turnis sin malantaŭen, kiam Paŭlo GÖRGEY alparolis ŝin. Ili povis priparoli, ja la koĉero komprenis nur la slovakon lingvon, sed sinJORINO MarJák bone parolis hungare.

– Tamen estas stranga – menciis la vicprefekto, pensante pri la okazintaĵoj, – ke pro unu birdo mia bofratino malesperiĝis.

– Ĉu pro unu birdo? – demandis sinJORINO MarJák. – Ĉu vere pro la birdo?

Paŭlo GÖRGEY silentis longtempe, rigardis la pejzaĝon kie ili ĝin preteriris. Li aŭskultis muĝon de la pinarbaroj, li ne fumadis kaj sidis mute. Nur kelkfoje sinJORINO MarJák diris al li ion: „La maizo havas ĉi tie longan tigon.” Aŭ: „Ĉi tie estas belegaj eksvirŝafoj.” Nur ĉe la muelejo de Dravecki li alparolis, montrante, ke li cerbumadis pri la sama temo.

– Diru, sinJORINO MarJák, ĉu vi ne rimarkis tion, ke la bofratino ruĝiĝas kiam mi diris, ke Rozalia similas al ŝi?

– Ĉu ŝi ruĝiĝis? Mi ne vidis, ĉar mi ne rigardis tien, ĉar tiu abomena kato venis en la ĉambron. (Ŝi balancis la kapon, gestadis per la manoj kaj preskaŭ elbatis la vipon el la mano de la koĉero.) Kial ĝi ruĝiĝis? Kial? Ĉu estas honto esti simila al belega anĝeleta? Ŝi ankoraŭ murmuris en si, sed pro la bruego de la radoj de la ĉaro kaj pro la frapado de la ĉevalhufoj tio ne aŭdiĝis.

3-A ĈAPITRO

Ne ĝenu aferojn en la trankvila stato

Paŭlo Görgey atingante hejmen baldaŭe konvinkis sin, ke li ne atingis la celon. Vana estis lia ago, ja li ŝuldis tiun vojaĝon al la diablo. La hungara homo kutimis diri tiun ĉi onidiron, se io ne sukcesas. Kaj vere la diablo incitetis Görgey, nome tiu ne lasis ĉesi la suspekton en lia penso: kelkfoje tio malpliigis, sed post ne longa tempo ĝi denove plifortiĝis.

Li estis retiriĝema homo kaj diris al neniuj siajn dubojn, nur kun si mem diskutis, kvazaŭ du Görgey sidus unu kontraŭ alia. Laŭ iu, Görgey estis pripensema, la alia estis dubanta. Ili paroladis.

„Ne estu freneza, Paŭlo – diris la pripensema Görgey – kial estus mortinta ĝuste via Rozalia? Ja same povis morti la alia infano. La ŝanco estas samforma. Kaj se Johano kaj lia edzino diras, ke la alia mortis, kial vi kredas la kontraŭan? Kion vi farus, se ili dirus, ke via Rozalia mortis? Ĉu vi kredas, ke Rozalia restas vivanta?”

„Mi ne kredus – respondis la dubanta Görgey – ĉar tiuokaze ili ne havus kaŭzon por iluzii min.”

„Bone estas – kontraŭis la sobra Görgey – la kazo estas plenigita per fantazio kaj estus taŭga iluzii vin, sed kial vi havas tiun suspekton? Ĉu ĉefe tial, ĉar Johano kaj lia edzino ne priploras sufiĉe sian mortintan filineton? Sed se Rozalia estus mortinta kaj ili volus trompi vin, tiam ili ruze estus enterigintaj la filineton inter grandaj veadoj tiel, ke via suspekto ne vekiĝus.” Nu, nun la sobra Görgey havis pravon. Kaj la alia Görgey ne dubadis iom da tempen. Li paciĝis. Sed la diskuto tamen poste daŭriĝis kaj la dubanta Görgey venkis, sed tio ne daŭris longtempon. Li argumentis baze de akiro de havaĵo de familio Jekelfalussy. Tiu diskuto daŭris dum multe monatoj, jaroj kaj lia animo baraktis inter du misopinioj kiel la muŝo sur ŝaktabulo pasumanta sur la nigraj kaj blankaj kvadratoj.

Nun estus pli bone, se pruviĝus, ke Rozalia mortis, ĉar tiuokaze li forgesus ŝin, ja la homo akceptas la finitajn aferojn. Sed la diablo dubadis kaj ne lasis lin atingi la veron. Sed li volis atingi la veron. La familio Görgey de Toporc havis iun maljunan slovakon servistinon, laŭnome Verona Gerlin, kiu sciis pri ĉio. Tiel ŝajne ŝi sciis pri ĉi tiuj aferoj. Paŭlo Görgey tiel pensis, ke estus bone por li, priparoli la aferon kun la maljunulino. Povas esti, ke ŝi scias pli multe pri la afero. Tio estas ne facila afero. Tiutempe la geservistoj ne ricevis salajron, li ne povis promesi pli grandan bonstaton al ŝi, ja tiu havis bonstaton en Toporc. Nur unu maniero estis, la ĉiopova amo. Tiu estas efika. Kvankam Verona estas preskaŭ sesdekjara vidvino, tamen la amo ne konas aĝlimojn. Paŭlo Görgey elprovis ĉi tiun eblon. Li

havis iun maljunan hajdukon, laŭnome Preston, same vidvon. Li promesis al tiu du lakton donantajn bovinojn kaj feriojn je unu semajno, se li edzinigos Veronan. Nu, Preston dum tiu unu semajno iris al Toporc, beligis sin kaj svatis Veronan. Verona unue surpriziĝis, poste ŝi ĝustiginte sian hararon por plibeligi sin ankaŭ ekploris. Poste tamen estiĝis la geedziĝa festo. Preston – tage de Ĉiuj Sanktuloj – kunportis ŝin kun ŝiaj dotaĵoj al Görgő. Kiam ŝi al kutimiĝis iom jam al la edza domo, sinjorino Marják pridemandadis ŝin laŭ la ĉe ŝi kutima maniero, sed sensukcese. Sinjorino Marják rakontis, ke tiu certe nenion konas pri la afero, ĉar se tiu scius, ŝi estus jam sciiĝinta pri tio. Ankaŭ la vicprefekto provis kaj afable kaj per minacadoj, krom la esplorjuĝistaj artifiko ekscii la veron, sed li malsukcesis. Paŭlo Görgey jam ne esperis, kiam iuvespere eksentinte doloron li komencis plendi pri satnaŭzo, kontraŭ kio li petis masaĝadon. Verona estis fama masaĝistino, do ŝi bone forte komencis masaĝi per la plej fajna ansergraso la dorson de Paŭlo por forpeli la teruran malsanon. Dum tiu ago oni kutimis paroladi por pasigi la tempon. Ja ankaŭ la vicprefekto estas homo, kun kiu eblas paroladi.

Sinjorino Preston babilaĉis konstante kaj la vicprefekto kuŝanta surventre nur kelkfoje kapbalancis aŭ diris: hm.

– Ĉu povas esti, ke mi enuigas la moŝtan sinjoron?

– Do, mi diras sincere – diris la vicprefekto – ke vi povus paroli ankaŭ pri ceteroj, ĉar certe scias ankaŭ pri alia afero.

– Pri kiu mi parolu? – demandis Verona sufokitvoĉe kaj pli forte masaĝis la spinon de la vicprefekto.

– Pri la domo en Toporc kaj pri la tieaj okazintaĵoj.

– Ja, mi parolis multe pri ĝi ĝis nun.

– Estas bone, maljunulino, sed diru ankaŭ tion, kion vi ne volas diri. Min vi ne volu trompi. – –

– Mi ne scias diri tiajn, tiel helpu min Dio!

– Ne ĵuradu, sinjorino Preston, ĉar mi scias ankaŭ tion, kion vi scias.

– Se la moŝta sinjoro scias ion, tion li scias ne de mi.

– Kiu scias? Povas esti, ke mi scias de vi. En vortoj de la homo kaj malantaŭ vortoj de la homoj estas intelekto, kion la saĝuloj rimarkas. La homo povas paroli sonĝante kaj ne scias pri la eldiritaj aferoj.

La maljunulino ekpremegis la dorson de Paŭlo tiel, ke liaj ostoj krakis. Li sentis nur tion, ke Verona estas ankoraŭ nun ege forta kaj sekvatage pruviĝis, ke la pugnoj de Verona estas pli fortaj.

Okazis matene, kiam Preston iris al la kancelariejo, lia vango estis ungoskrapita.

– Kio okazis pri vi? – demandis la vicprefekto la maljunulon.

Preston ridetis amare.

– La tria bovino piedbatis min.

- Kia tria bovino?
- Do, mia edzino. Ŝi faris tion. Ŝi asertis tion, ke mi diris al la moŝta sinjoro tion, kion ŝi parolis dum ŝia sonĝo. Vi scias plej bone, ke ĝi ne pravas.
- Diable! – ekkriis vigle Görgey. Ĉu ŝi kutimas paroli nokte dum sonĝo?
- Mi ne sciis.
- Ho, ve! Vi estas ege mallerta. Kial vi ne priatentis tion?

Preston tiris ŝultron.

- Ja vi scias, moŝta sinjoro, ke ŝi estas edzino nur tage.

Nun jam Paŭlo Görgey sciis ĉion. Do, estas certe, ke sinjorino Preston havas sekreton, do la infaninterŝanĝo povis okazi. Nome la fidelaj geservistoj devis kaŝi la sekreton, ĉar povas esti, ke ankaŭ tiu/j/ estas kulpa/j/.

Antaŭ Paŭlo klariĝis jam la estonteco kaj li bedaŭris, ke pruviĝis la pravo. Kvankam la sekreto turmentis lin, tamen estis bone. Kontraŭe li pensis, ke eble estus pli bonae lasi la la tuton resti en malhelo, do ne iĝi klara. Nun la mondo iĝis malplena por li. Do, venĝu ni ĝin. Drinku ĝisfunde la glason de la amareco.

Görgey vokigis Veronan kaj serioze alparolis ŝin:

- Sinjorino Preston! Vi konas sekreton kaj mi ordonas al vi diri ĝin al mi.
- Mi scias nenion. – respondis sinjorino Preston aplombe.

La vicprefekto minacis ŝin perfingre:

- Trapensu, malfeliĉa sinjorino. Mi ankaŭ tion scias, kion vi scias.
- Se vi scias, tiam kial vi demandas?
- Mi volas aŭdi de vi.

La sinjorino preĝis en si al si prenante Rozalion, ŝiaj manoj tremis, sed ŝi diris nenion gravan.

- Mi scias nenion, sed se mi scius ion, eĉ tiam mi ne dirus malbonon pri miaj gemastroj. Prefere forigu mian langon, metigu min en punjugon, aŭ senkapigu, sed mi povas diri nenion.

Görgey iĝis furioza. Sed sinjorino Marják kapablis trankviligi lin. Nome ŝi promesis, ke ekscios tiun sekreton. Sekvanokte la vicprefekto iris kun sia hajduko Preston al Lőcse por aranĝi la departementajn aferojn kaj kuracigi sin kontraŭ la stomakmalsanoj. Pro tio Verona dormis sola. Noktomeze ĉe ŝia lito fantomo aperis, portante blankan littukon kaj kapo de la fantomo atingis la plafonon de la ĉambro (aŭ homo estis tiu havante longajn piedojn. Se tiu fantomo estis, tiam en la transmondo okazis ofta pluvo pro kio tiu kreskis jene granda laŭ la onikredo.) Verona ektimis, kaŝis sin inter siajn kusenojn, sed la fantomo sufloradis:

- Verona, faciligu vian kulpan animon, diru ĉiujn viajn sekretojn! Se vi ne faros tion, tiam vi damniĝos kaj mi kunportos vin. Mi venos ankoraŭ du fojojn al vi.

Verona frostotremis kaj tuttage sinjorino Apró per kuracherboj kuracis ŝin. Ŝi iomete pli bone fartis kaj posttagmeze fumis amenton en sia ĉambro. Sed vespere ŝin atingis morta timo. La bienservistoj ŝercadis kaj proponis sin por gardostari (kion dirus Preston. Ŝi petis la maljunan sonorigiston, Jozefon Hamelik de Görgő dormi en la vestiblo. Ŝi donis al li brandon kiel kuraĝigilon. La maljunulo estis pli ol sesdekjara, el kiu jam foriris la satano.

Malfruvespere Hamelik alvenis, kunportis iun ferforkon, kontraŭ fantomo li drinkis brandon. Por Verona la meĉo lumis. Hamelik prenis la ferforkon. Ambaŭ iris en la malgrandan domon. Kiam ili iris tra la vestiblo, subite estiĝis malhelo kaj iu tomba voĉo ekkriis:

– Verona! Plifaciligu vian animon, konfesu ĉion al la sinjoro, ĉar se vi ne faros tion, tiam vi damniĝos kaj mi kunportos vin sekvaokaze.

Verona ŝrikis, forĵetis la ferforkegon kaj elkuregis de la ĉambro, sed pli malfrue ŝi trankviliĝis. La gardostarantan maljunulon oni primokis dirante, ke kontraŭ la fantomo li ne drinkis sufiĉe da brando. Verona fuĝis al sinjorino Marják al la kastelo kaj en la kuirejo svenis. Sed sinjorino Marják ne estis hejme (ŝi estis en la kelo), kaj kiam ŝi hejmenalvenis, ŝi trovis sveninte sinjorinon Preston a planton. Sinjorino Marják estis bonkora, ŝi kuiris kuracteon, kuŝigis ŝin en sian liton inter siajn kusenegojn ŝajne ne kredinte la okazintaĵojn. Al sinjorino Preston, ŝi diris la sekvajn:

– Ho, mia kara kolombino! Kial vi fantazias? Morgaŭ mi iros dormi en via ĉambro. Per balailo mi montros al tiu fantomo la vojon al la tombejo

Sed tion Verona ne atendis, sed matene tuj post vekiĝo prefere piede iris al Lőcse irante al la departementdomo al la vicprefekto. Li surprizate rigardis la palan sinjorinon, kies hararo iĝis ege blanka, kvazaŭ oni estus ŝmirinta tiun per kalko.

– Kion vi serĉas ĉi tie, sinjorino Preston? – demandis ŝin la vicprefekto surprizante.

– Mi venis al vi por konfesi mian sekreton.

Ŝi ĉirkaŭrigardis, ĉu la pordo estas fermita?

– Ĉu vi konfesas tion tamen? – demandis la vicprefekto ŝin kaj lia koro forte batis. – Parolu, ĉi tie neniuj aŭdas la direndaĵojn.

– Ĉu mia edzo?

– Eĉ li ne. Mi sendis al la urbo por kolekti kuracherbojn. Nome mia sanstato malboniĝis kaj ne estas kurachelpisto, ĉar tiu mortis pasintnokte.

(En la urbo Lőcse vivis kuracisto, sed li nur malofte estis tie. Tiutempe nur la grandpotenculoj povis venigi doktoron el Vieno. La pli malriĉuloj sendis helpantojn al la bonstataj sinjorinoj, dirantajn la simptomojn. Tiuj sinjorinoj sendis tinkturojn, tiujn la malsanuloj alprenis kaj la rezulto estis sama kiel nun: la malsanuloj aŭ saniĝis, aŭ mortis. Tio okazis facile en Lőcse. La hajduko iris al la riĉaj familioj. Li

iris al sinjorino Miĥelo Mauks, kiu kuiris grasojn, balzamojn el ranoj, lacertoj, insektoj, el vosto de musoj, per kiuj tiu ŝmirfrotis la korpon ĉirkaŭ la koro. Laŭ tiuj eĉ mortinto reviviĝis. Sed la homoj opinias pri tiu, ke tiu homo estis ŝajnmortinto. Li vizitis Matildan Klöster²⁰, oldan fraŭlinon, la scienculinon, al kiu oni sendis elitajn fraŭlinojn por eduki por konduti elitmaniere. Kaj se iu malsaniĝas, tiam ŝi kuracas per likvaĵo farita el herboj. Li vizitis sinjorinon Karlon Kramler. La edzinon de la juĝisto, kiu estas kuzino de iu doktoro de la urbo Lemberg kaj havas multe da receptoj kontraŭ la malsanoj kaj konas la kuracmetodojn la patrino de la feraĵvendisto Stechlovics²¹ kiu estas naŭdekjara kaj havas recepton kontraŭ la morto.)

– Nu! – La vicprefekto diris malpacience vidanta la tremadon de Verona, mute staranteantaŭ li kaj ĝemanta preminte la randon de sia nigra poŝtuko. – Mi aŭskultas vin.

– Dio ne punu min pro mia voĉo – komencis ŝi kaj poste ekŝanceliĝis – ĉu Vi scias tion?

– Estas kompreneble, mi scias. Mi scias, ke vi nur daŭrigu – diris la vicprefekto malĝoje – rapide daŭrigu.

– Mi ĉiam diris, se la virino alkiutimiĝis al la viro, ties situacio similas al la tabako... estas malfacile dekiutimiĝi de tio, ĉar ĉiuj edzinoj restas edzinoj ankaŭ dum la pseŭdovidvineco.

– Kiajn sensencaĵojn vi parolaĉas?

– Do, pri mia dolĉa grand-sinjorino.

– Kiu ŝi estas?

– La moŝta edzino de Johano Görgey – balbutis Verona duone mirante, duone konfuziĝinte.

Nun jam Paŭlo Görgey miris. Ĉu povas esti, ke ŝi freneziĝis? Li rigardadis la konfesantinon scivoleme. Sub ŝiaj okuloj estis bluaj ringoj, la okuloj estis bluaj, klaraj kaj honoraj.

– Kiun viron vi menciis? Mi ne komprenas.

– Tiun bubaĉan muelistan helpmetiiston.

– Ĉu muelistan helpmetiiston? Kial vi diras tiun?

– Ĉar tiu moŝta sinjorino de sinjoro Johano Görgey kun li ŝanceliĝis.

– Ĉu ŝi ŝanceliĝis? Kiel vi komprenas tion?

– Ŝi estas lia amatino.

La trajtoj de Paŭlo Görgey groteskiĝis dum li batis per pugno sur la tablon.

– Ĉu mia bofratino? – li kriegis kiel vundita tigro.

– Ne tiu, – balbutis Verona tremetante – sed la muelista helpmetiisto.

²⁰ La familio-nomo Klöster esperantolingve elparolendas: klester.

²¹ La familio-nomo Stechlovics elparolendas esperantolingve: ŝtehloviĉ.

– Kiel vi kuraĝas diri tion, bestio? – li alkuregis volante mortbati tiun virinon.

Li subite kolere malfermis la pordon por voki la hajdukon, gardiston kun lanco, sed neniu estis en la koridoro. La malvarma printempa vento freŝigis, trankviligis lin kaj poste li jam pensadis pli trankvile. Li ne volis malbonigi la aferon senpripense. Cetere sinjorino Preston ne estas klaĉantino, ja li volis pridemandi ŝin perforte. Tiel ŝajnas, ke sinjorino Marják donis al sinjorino Preston bonan konsilon. Ne, li ne volis suferigi ŝin, ĉar ŝi ne estas kulpa, kvankam ŝi tre suferas, sed ŝi tute ne klaĉas. Certa estas, ke ŝi ne pravas plie nur fantazias. Ĉu mi ne estas freneza – li trankviligis sin – ĉar mi furioziĝis pro bagatelaĵoj? Ja tio estas neebla. La stelo pli frue povas misiri, ol sinjorino de Johano Görgey. Tio estas frenezaĵo. Li devas pridemandadi la sinjorinon, sed ne ĉesigi ŝian parolon. Certe tio estas iu ŝerca miskompreno kaj kiam evidentiĝos, ke tio estas frenezaĵo, li ridos pro tio.

Li reiris al la ĉambro tute trankvile kaj preskaŭ ĝojis, ke tio estis la sekreto de Verona.

– Ĉu mi teruris vin? – komencis li konsoli ŝin varmvoĉe, ja li kapablis esti varmkora, se li volis esti tia. – Nu, ne gravas, ne timu min, mi ne batigos vin. Diru kuraĝe tion, pro kio vi suferas. Sed vi devas vidi, ke ĉagrenis min tiu kazo, ke mia bona bofratino faras tion....

Sinjorino Preston ege nerviĝis:

– Ja, mi volis kredi, ke tiu kazo ne okazis.

– Kaj ĉu en ŝia aĝo, Verona – diris Paŭlo Görgey trankvile. – Kiomjaraĝa estas mia bofratino?

– Ja ŝi estas infanaĝa edzino. Kiom jaraĝa ŝi estas? Ŝi estis pasintjare kvardekunu-jara. La aĝo signifas nenion, sed mi tion kredis, ke ŝi estas sankta kaj se mi ne estus vidintua la eventon, tiam mi mortbatus tiun, kiu kuraĝus aserti ion alian.

Paŭlo Görgey eksaltis de sia seĝo.

– Ĉu vi vidis la eventon? – li kriis indignante, sed nur momenton li estis ekscitita, sed poste trankviliĝis, fermis la okulojn. – Nu, ne gravas, ĉio estas en ordo. Daŭrigu, eldiru ĉion. Mi ne interparolos plu. (Pli vere li diris tion en si.)

– Tio okazis tiel, kiam sinjoro Johano Görgey iris en la militon, mi dormis en la sama ĉambro kiel sinjorino Görgey, la bofratino. Ĉar vi forportis Rozalian kaj ŝi timis esti sola. Pli frue Suzana Marják dormis en tiu ĉambro. Unue ŝi multe malĝojadis pro la foresto de ŝia edzo kaj Rozalia.

– Ĉu ŝi malĝojis pro Rozalia?

– Jes. Ŝi malĝojis.

– Kial? – murmuradis Paŭlo Görgey.

– Ĉar, ŝi tre ekamis la infanon.

– Kial ŝi amegis la infanon, ja ŝi ne estas ŝia propra infano?

– Tial, ĉar la elitaj sinjoroj havas tempon por ami aliulan infanon, sed mi ne havas tempon por ami la propran.

Ĉi tiu stulta respondo tute konvinkis lin, ke sinjorino Preston ne scias pri la infaninterŝanĝo.

– Daŭrigu, sinjorino Preston, kuraĝe.

– Nu, bone estas. Mi diris, ke ŝi treege malĝojis. Multfoje ŝia edzo skribis al ŝi leteron, sed pli malfrue la leteroj venis malpli ofte. Ŝi malofte malĝojadis, al kutimiĝis al la soleco, aŭtune ŝi hejmenvenis el Osgyán, kie ŝi vizitis Rozalian...

– Ĉu ŝi estis en Osgyán? – maltrankviliĝis Paŭlo Görgey. – Tiu estas suspekta afero.

– Ŝi estis tie kaj post la hejmenveno plurfoje faris viziton en la muelejo. La kazo komenciĝis tie. Kial ŝi iris en la muelejon? Mi ne scias precize, sed povas esti, ke li venis pro la digo. Tio estas certa, ke ŝi estis en la muelejo. Oni diris, ke la muelejo dungis novan muelisthelpiston pro la digo por ripari tion. La moŝta sinjorino renkontiĝis kaj ekkonatiĝis kun tiu muelisthelpisto. Ŝi ĉiutage iris en la muelejon, kaj kiel ni la terkulturistaj jupulinoj kutimas, ŝi same plibeligis sin, kiam la amo ekregis ŝin. Ĝis kiam ĝi daŭris? Mi ne scias. Kiam la vintraj tranĉaj frostoj alvenis, mia kara moŝta sinjorino turnis sin al mi: "Verona, nokte mi ne kapablas dormi, ĉar vi forte ronkas. Pro tio mi aliloke preparigos al vi liton por dormi." Ĉi tio ne plaĉis al mi, ja mi neniam ronkis. Ĉi tion ankaŭ Preston povas pruvi. Ankaŭ la infaneto kapablis dormi apud mi. Nu, mi atendis kio elkoviĝos de tio. Do, tio okazis, ke la muelisthelpisto nokte enŝovis sin en la korton kiam la servistaro dormis. Kaj tiu sankta sinjorino ellitiĝis, surhavis nur subjupon kaj iris al la malvarma koridoro kaj enlasis lin. Jesuo mia, ŝi enlasis ĉi tiun friponon.

Paŭlo Görgey suferis, ŝvitis, indigniĝis lia nobla animo, sed regis sin kaj kunplektis la manojn sur la brusto.

– De kiu vi aŭdis ĉi tion? – li demandis severe.

– La servistaro diradis mallaŭte unu al la alia, unue nur dubante. Tagiĝe ili vidis iun homon kaŝiri al la kastelo. Pli mafrue ili divenis, ke la muelisthelpisto venis ĉiam al la moŝta sinjorino.

– Ili fantaziis, mensogis, – li stertoris.

– Ankaŭ mi diris tion – Verona respondis malĝoje, – Mi promesis al mi mem, ke mi divenos la veron. Iuvespere dum la senfoliigo de la maizo okazis la evento. Apud la manĝejo estis ĉambro de la moŝta sinjorino. Tiu evento estis ĉiujare vera festo. La vilaĝanoj venas por helpi, ĉefe la junuloj. La moŝta sinjorino ĉiam ĉeestas kaj ankaŭ la moŝta sinjoro, se li tempopasigas hejme. Ili buĉas ŝafon kaj ŝi kuirigas papavan maizon por vespermanĝi. Dum la diligenta laboro estas gajeco, kantado, kiu daŭras ĝis noktomezo. Poste oni forportis la spadikojn de la maizoj kaj la maizbastojn el la manĝejo. Poste aperis subite la ŝafisto, kiu prenis sakfluton kaj ekmuzikis. Tiam komenciĝis la danco, kiu daŭris ĝis la nokta dua

horo. Sed nun ĉi-jare je la dudekkvara horo la moŝta sinjorino venis en la kuirejon, kie ni kuiris la porkviandon kaj la maizon. Ŝi ordonis, ke pro kapdoloro ŝi volas ripozi. Do pro tio ŝi ne permesas la noktomezan vespermanĝon en la kastelo, sed la kaldronojn kune kun la manĝaĵoj ni portu al la familio de la prefekto. Ŝi sendis la kaleŝojn por porti la kaldronojn. Do, ŝi ĉesigis la laboron en la ĉambroj. La manĝejo estiĝis silenta ĉar ĉiuj iris al la domo de la prefekto. Sed mi iĝis scivola kaj kuraĝis ne iri al la domo de la prefekto. Mi nerimarkate kaŝis min en la manĝejo inter la maizbastojn. Granda silento regis ĉie, nur la griloj ĉirpis. Mi aŭskultadis, sed brueto ne estis aŭdebla. Post duonhoro la laniarioj kelkfoje bojadis, signante, ke iu estas en la kortego. Poste akra fajfo aŭdiĝis. Efike de tio la moŝta sinjorino aperis, malfermis la pordon. Mi ege surpriziĝis, tre hontis. La lumo de Luno lumigis sur la fenestron. La pordo malfermiĝis grincante kaj iu viro enpaŝis, kiu portis ĉapon havantan larĝan randon kaj botojn. „Atentu, mia animo, ne stumblu!” – flustris la moŝta sinjorino – ĉar maizstakoj estas ĉie en la ejo.” Kaj ŝi evidente prenis lian manon kaj kondukis en sian ĉambron, dum kio bruon kaŭzis la maizbastoj, sur kiuj ili paŝis. Nu, efike de tio ankaŭ mi malkaŝis min kaj tremetante kiel la poplofolio kuregis al la familio de la prefekto, kie la homoj vidantaj mian palan vizaĝon, ektimis. Ĉi tio estis la raporto de Verona, kiu sentis plifaciliĝon, ja liberigis sin de sia danĝera sekreto. Nun iĝis turmenta silento. Ŝi atendis la opinion de la vicprefekto, sed li diris nenion. Li sidis en la brakseĝo duone rigidiĝinte kaj lia vizaĝo estis cindrogriza. Sinjorino Preston rigardis lin timeme, ĉar tiel ŝajnis, ke li ne vivas. Sed li vivis, ja lia adampomo moviĝis, do, li spiradis. Ĉi tiel pasis kelkaj minutoj. Verona kelkfoje tuis por admoni ŝian ĉeeston. Sed lin ne interesis la ĉeesto de sinjorino Preston. Li cerbumis pri diversaĵoj. Li meditis pri enigmoj, kiujn simplaj ĉi teraj estaĵoj ne divenis ĝis tiam. El kio estas farita la sinjorina besto? Ĉu ne estas en tiu malmola materialo? En tiu estas nur mola materialo, certe farungluaĵo kaj tiu gluiĝas al ĉio kaj al ĉiuj. De tiu ĉiuj paroj estas gluiĝantaj. Ĉu Karolina estis sama? (Li flustris forte kaj lia kapo falis sur lian bruston.) Ĉu Dio ne kreis tute bonajn homojn? Ankaŭ la suno havas makulojn. Ankaŭ en la pura fontoakvo estas malkomponaĵoj de bestoj kaj floroj. Ankaŭ la blanka lilio havas ombron.

– Ĉu mi povas foriri? – demandis finfine Verona por atentigi pri sia ĉeesto.

Paŭlo Görgey surpriziĝis kaj rimarkis sinjorinon Preston. Li jesis, sed revokis ŝin, kiu estis jam ĉe la pordo.

– Atendu, sinjorino Preston, mi ankoraŭ demandas ion. Ĉu simila evento okazis ofte?

– La konata fajfo aŭdeblis en ĉiuj duaj vesperoj en la korto.

– Bone estas, sinjorino Preston, vi povas foriri, sed al neniuj rakontu pri la evento.

Li plu ne dubis. Li estis kredulo kaj oni facile povis konvinki lin, dank' al la hieraŭa sceno en la restoracio „Saracena reĝo”, kie la oficiraro manĝis. Dum la vespermanĝo la oficiroj paroladis pri la publikaferoj kaj temis pri la kvartiro de Johano Görgey. Petro Marŝalko komencis diri: „Strangaj famoj alvenis...”, sed Danielo Revicki iomete ebrue interparolis kompletigante la frazon: „pri Toporc.” La moŝtaj lokaj sinjoroj konsterniĝis pro la maldiskreto kaj sinjoro Marŝalko klopodis korekti la eraron: „Ho, ne, la strangaj famoj alvenas el Transilvanio, ja tie estas fino de la revolucio.” La vicprefekto ne komprenis hieraŭ la okazintaĵojn, sed hodiaŭ ĉio klariĝis. La lokaj moŝtaj sinjoroj certe jam informiĝis iomete pri la aventuro de lia bofratino. Ĉi tio estas netolerebla, ĉi tion ni devas ĉesigi en la intereso de la honoro de Johano Görgey.

Ĝuste tiam alvenis sinjoro Preston portante bovlojn, botelojn, plenigitajn per graso, kuracherboj. Paŭlo Görgey tuj vokigis siajn du plej lertajn policistojn: Andreon Göbölýő²² kaj Gregorion Szabó²³ por ekiri nokte al Toporc, priatenti la kastelon de lia frato kie la muelisthelpisto kutimis aperi malicvole. Ili havis la taskon kapti kaj porti senbrue al li tiun.

La menciitaj aferoj okazis merkrede antaŭtagmeze kaj jam vendrede vespere, kiam la vicprefekto jam preparis sin por enlitiĝi, subite sinjoro Preston anoncis:

- Oni portis iun malliberulon el Toporc. Kion mi diru al la du portantoj?
- Mi nun ne havas tempon. Mi volas paroli kun tiu portito nur matene.

Sed baldaŭe revenis lia homo Preston kaj demandis:

- Ĉu la lancistoj ne transdonu la malliberulon al la komandanto de la fortikaĵo?
- Diru al ili, ke tute ne. Unue mi volas paroli kun tiu, nome tiu estas mia propra malliberulo. Ili enkarcerigu tiun en iun malplenan ĉelon.

Sed Preston denove revenis.

- La policistoj mesaĝas tion, ke la malliberulo tuttage manĝis nenion, sed se tiu manĝus iom, ankaŭ tiuokaze li estus malsata.

La vicprefekto jam enlitiĝis kaj respondis incitite:

- Diru al la du bravuloj, ili ne mesaĝadu al mi. Oni povas petegi de mi sed ne mesaĝadi al mi. Se ili mesaĝas ankoraŭ unufoje, tiam mi batigos ilin. La malliberulo malsatu, nun fastu!

Ĉi tiel tiu afero estis solvita. Sed jam matene la vicprefekto havis multe da okupiĝoj, nome delegitoj alvenis, pro kiuj li ekhavis aranĝendajn aferojn, sed krome preparoloj, pritraktadoj atendis lin, pro kiuj dolororis lia kapo kaj li tute forgesis pri la malliberulo. Sekvatage, dimanĉe li hejmeniris al Görgő, kie li devis pritrakti ekonomiajn aferojn. Nome komercistoj de Lemberg atendis lin, kiuj volis aĉeti liajn grasigajn bovojn. Sekvatage ege malbona vetero estiĝis, ĉar forta

²² La nomo Göbölýő esperantolingve elparolendas gebeje.

²³ La familio-nomo Szabó elparolendas sabo.

vento ekblovis, kiu arbojn elŝiris kun la radikoj. Eĉ la hundon oni ne permesas elpeli de la domo. Li ne eliris tuttage el sia ĉambro. La mondo estas bela nun nur de ĉi tiu domo ... la vojoj ... ja blanka estas ĉio ekstere, ... la montoj, la arboj, la domtegmentoj, la vojoj ... En la blanka pejzaĝo videblis nur unu nigra makulo, kiu estis kiel iu eta korniko. La makulo pligrandiĝis de tempo al tempo proksimiĝante al la kastelo. Evidentiĝis, ke la makulo estas kaleŝo, tirata de kvar malhelaj bejaj ĉevaloj. Certe la kaleŝo venas de malproksime. La neĝo dume dense falis, farante por la kaleŝo molan neĝoliton. Atinginte la preĝejon, la kaleŝo inter fortaj klakadoj rapide direktis sin al la sinjora doma aleo situanta antaŭ la kastelo.

– Ni ricevas gastojn! – anoncis sinjorino Marják ĉagrenvoĉe, dum ŝi metis cidoniojn sur la kornicon de la varma forno por bonodori al la moŝta sinjoro. – Nekomprenoble estas, kial la homoj havas ŝaton veturi dum malbona vetero!

La kaleŝo iris sub la pordegvolbaron. Paŭlo Görgey scivoleme paŝis al la fenestro. Li vidis, ke en la korto iu sinjorino alvenis. Elkaleŝiĝinte tiu malkaŝis sin el inter la varmaj kovriloj, kuntiregante la brikon, botelon certigintajn la varmon dum la veturado, de sub la granda kovrilo el la sinjorino videblis nur la du ardantaj okuloj kaj la ruĝa nazo, laŭ kiuj oni ne povis ekkoni ŝin. Ŝi iris en la antaŭĉambron kaj sinjorino Preston helpis depreni la varmajn vestaĵojn, dum kio kelkajn vortojn ili diris unu al la alia. Baze de ĉi tiuj vortoj sinjorino Marják ekkoninte ŝin konstatis:

– Ho, Vi estas la moŝta sinjorino de Toporc – kaj ŝi alkuris la alveninton.

Paŭlo Görgey kunpremiz la lipojn. Kvazaŭ reliefigis liaj angioj sur lia tempio. Li ne iris antaŭ ŝin kiel la ĝentileco estus postulanta tion, sed sidiĝis al la skribotablo kaj komencis skribi, almenaŭ li nur mimis la skribadon.

Vere sinjorino Johano Görgey alvenis en la ĉambron. La jupe de la moŝta sinjorino susuris, sed Paŭlo Görgey skribis daŭre. Ĉar li tute ne turnis sin, li ne vidis ŝian ekscititan vizaĝon estantan ege lacan. Unu momenton la sinjorino haltis en la mezo de la ĉambro, kvazaŭ ŝi estus surpriziĝinta kaj mallaŭte atentigis la skribantan ulon pri sia ĉeesto.

– Estas mi.

Sed eĉ nun li ne turnis sin. Li diligente skribis plu, kaj nur frigide, malestime demandis:

– Kion vi volas ĉi tie?

Povas esti, ke ŝi ne rimarkis la frigidecon, malestimon suferinte pro pli granda doloro. Ŝi falis pro elĉerpiĝo en seĝon kaj apenaŭ havis forton eldiri la depriman sciigon:

– Oni kaptis mian edzon, vian fraton.

Je tiu sciigo li deĵetis la plumon kaj moke diris:

– Kaj vi memkomprenoble malĝojadas pro tio ĉi. Ĉu ne?

– Ho, Dio mia – ŝi kriis sufokiĝante – ja oni portas vian fraton por esti galerulo, aŭ alimaniere ekzekutos.

La vicprefekto paliĝis.

– Kiu kaptigis lin?

– Povas esti, la imperiestro.

– Kie li estas nun?

– Mi ne scias.

– Kie kaj kiam oni kaptis lin?

– Ĉu oni kaptis lin dum batalo, aŭ aliokaze?

– Hejme okazis tio – ŝi respondis kaj ekploris laŭte.

La vicprefekto rigardis ŝin mirante.

– Ĉu li estis hejme? Mi sciis nenion pri tio.

– Ĉar ni devis sekreti. Li kaŝis sin en pseŭdovesto en la muelejo de Toporc.

La vizaĝo de la vicprefekto ruĝiĝis kiel kuirita kankro kaj li ĉesis esti kolera kaj kun kompato rigardis la tremetantan virinon. Li hontis, falis sur la genuon, prenis ŝian nigran antaŭtukon kaj kisis.

– Kion vi faras? – ektimis la moŝta sinjorino kaj eksaltis de la seĝo.

– Mi nu pentofaras, sed mi ne estas inda ricevi pardonon. (Li ekstaris, deskuis la polvon de la genuo kaj vigle daŭrigis.) Maria, mia kara bofratino, tute ne havu malĝojon, koncerne Johanon! Lin ne la imperiestro kaptis, sed tiu, kiu redonas lin al vi.

Sinjorino Johano Görgey prenis longan spiron kaj duone kredante kaj duone malkonfide alrigardis lin.

– Ho, Dio mia, kiu kaptis lin?

– Mi – respondis Paŭlo Görgey – mi kaptigis lin.

Ŝi malesperiĝis, ja tio estas malfeliĉo. Ŝi trompote klinis sian kapon. Dio vere forprenis lian prudenton. Ŝi jam pli frue vidis, ke Paŭlo estas stranga, sed nun jam ŝi konvinkiĝis pri tio.

Paŭlo Görgey eksentis ŝian personon kaj provis ŝin trankviligi.

– Ĉu vi, bofratino, kredas, ke mi freneziĝis? Ne. Mi ne estas freneza, nur malsaĝa. Ĉu vi povas pardoni iam? Oni diris klaĉojn, laŭ kio vi invitas iun muelisthelpiston en vian ĉambron ĉiunokte. Pro tio mi furioziĝis kaj ordonis kapti tiun. Tio estis malnobla afero, ĉar mi kredis tiun klaĉon. Vangofrapu min, ĉar mi meritas. Jen ĉi tie estas mia kapo.

Aŭdante ĉi tiujn, la moŝta sinjorino larmis kaj ridis samtempe.

– Ho, ja, mi ne volas bati vin, ja la klaĉo pravis, – entuziasmiĝis sinjorino Johano Görgey, iomete ruĝiĝinte. Ŝi estis nun pli bela, ol ŝi estis fraŭlinaĝe. – Mi ne neas, ke ĉiujn noktojn mi lasis enveni en mian ĉambron Johanon kiel la sinjorinoj siajn amatojn. Ja ni havis priparolendajn aferojn. Ne pensu ceteron. (Poste ŝi fermis la okulojn pudore.) Sed tiu ago estis nepripensita. Dank’ al Dio,

ke tio ne havis pli malbonan finon. Ĉar la persekutistoj tie rekonus lin, kvankam li kreskigis barbon kaj forrazis siajn lipharojn. ... Sed vi vidis lin.

– Ne, mi ne vidis lin.

La frunto de Maria malsereniĝis.

– Kial? Ĉu li ne estas ĉi tie? Kie li estas nun?

Ŝi rigardis al la vicprefekto maltrankvile, sed Paŭlo Görgey ne povis respondi, ĉar lian langon la teruro senmovigis pro kio li ne ricevis aeron. Li rememoris, ke li ne lasis forporti la malliberulon al la fortikaĵkomandanto kaj li ne ricevis manĝaĵojn. Povas esti, ke li jam malsatmortis.

– Dio, mia! Kio okazis pri vi? Kial vi ne respondas? – Ŝia fajna virina instinkto sufloris al ŝi, ke Johano estas en danĝero.

Paŭlo Görgey alkurante la pordon malfermis ĝin kaj kriis al la servistoj:

– Tuj jungu miajn kvar plej rapidajn ĉevalojn! Portu mian pelton kaj batalhakilon! Tuj!

– Mi mortos pro la malcerteco, se vi ne respondas – ŝi petegis tremetante.

Sinjoro Paŭlo forviŝis la ŝviton de la frunto nun kamparan-maniere per la maniko de sia mantelo.

– Ĝis kiam povas vivi homo vivas – li demandis sufokiĝante – sen manĝo- sen trinko?

– Mi ne scias – ŝi ĝemis neniigant-voĉe.

– Povas esti, ke sinjorino Marják scios. Hej, sinjorino Marják, venu ĉi tien. Kiom longe vivas la homo senmanĝe – sentrinke?

– Mi provis tion neniam – respondis la demandito. Tio dependas de la homo. La katolika homo toleras unu semajnon, ĉar li alkutimiĝis al la fastado, sed la luteranoj nelonge. Kiam mia karmemora edzo tremfebron havis...

– Ne babilaĉu frenezaĵojn! Prefere urĝu la koĉeron!

La edzino de Johano Görgey malesperiĝinte prenis la brakon de sia bofrato:

– Kio okazis pri mia edzo?

– Lia vivo dependas de Dio. – li respondis malespere.

– Tio estas malbona – ekŝrikis la sinjorino.

– Mi forgesis lin – konfesis Paŭlo penteme. – Oni alportis lin nokte, mi transportigis lin en apartan ĉelon, sed ne donis al li manĝaĵon – trinkaĵon. Mi volis pridemandadi lin sekvatage kaj iomete ektimigi, ke oni perforte foreskortos lin de la teritorio de la departemento.

– Ĉu vi ne pensis tion serioze – ŝi vigliĝis – ke pro tio li iĝis malsana, aŭ povas esti, ke....

Paŭlo mansignis neante.

– Tute ne. Dio gardu! (La forta homo tremegis, kvazaŭ febro turmentus.) Ho, tute ne temas pri tio. Mi diras tion je mia honora vorto. Ej, kio povas okazi pri li, ja ekde ĵaŭdo li manĝis nenion. Certe li estas tre-tre malsata. Pro tio faru

bongustan vespermanĝon kaj ni venigos lin el la ĉelo. Estu trankvila, mia bofratino.

– Nu, ankaŭ mi iros kun vi.

– Se ankaŭ vi volas veni, tiam venu, sed ne maltrankviliĝu. Mi ne irus tien, ĉar ege doloras mia kapo... La dumsledada freŝa aero certe ĉesigos la doloron.

Ili rigardadis unu la alian malkonfide.

– Bone – ŝi diris – sed mi tamen iros kun vi por ne enui.

Fine la kvarĉevala sledo estis preta por ekiri. La ĉevaloj maltrankvile saltadis, la sonoriletoj sonoretis. Vesperiĝis, estiĝis bluverda nebulo, la vento ĉesis, iomete neĝetis, kvazaŭ blankaj muŝoj naĝus en malpura likvaĵo.

Paŭlo Görgey helpis sian bofratinon enslediĝi kaj kovradis ŝiajn piedojn.

– Ĉu vi ne hontas iri kun – mi? Sinjorino Marják, ni tuj revenos. Kuiru bonan vespermanĝon por tri personoj. (Poste li rapide enslediĝis kaj sidiĝis apud la bofratinon.) Ni iros al Lőcse, Matej, ne domaĝu la kvar ĉevalojn. Ne bedaŭru ilin!

Matej obeis. La sledo glitis rapidege tra la arbaroj kaj inter la boskoj. El la buŝoj de la ĉevaloj vaporo flugis supren.

Paŭlo bedaŭris, ke li urĝis la koĉeron. Povas esti, ke per tio li teruros la bofratinon. Sufiĉas ke li nek vivas nek mortas pro la timo. Li pensis, alvenis la tempo de dono de la klarigo al la virino:

– Mi ŝatus atingi rapide la urbon Lőcse ĉar mi forgesis mian poŝtranĉilon ĉe la fortikaĵkomandanto. Se tiu iras ien por vespermanĝi, tiam mi ne ricevos mian poŝtranĉilon. Tuttage mi ne povas pintigi kraĵonon.

Ĉi tiujn vortojn li diris indiferece, kvazaŭ li ne havus ceteran malbonon. Sinjorino Johano Görgey same diradis iom post iom, ke ŝi iras kun la bofrato, pro la neŝato de la babilaĉo de sinjorino Marják. Ne temis pri Johano, kvazaŭ li ne ekzistus. Ili trankviligis unu la alian reciproke, kio estis nekomprenebla, ĉar ili sciis unu pri la alia, ke ilia animo estas sur torturbenko. Ili babilaĉis pri ĉio kiel la enuantaj pasaĝeroj por amuzi unu la alian. Ili babilaĉis pri la vetero, kiu estis tre morna. (Ie aŭdiĝis hurlo de lupo.) Je tio la moŝta sinjorino rimarkigis: „Thököly havas feliĉon, ĉar malvenkinte li trankvile povas li sidi en Turkio, kie la vintroj estas pli mildaj, ol ĉe ni.”

Pri ĉio ĉi Paŭlo Görgey sciis nenion, ĉar la siigoj trafikis sur la dorso de helikoj. Pasaĝeroj portis la famojn. Dum la homoj en la forĝistejoj hufferigis siajn ĉevalojn, ili rakontis pri ĉio, ĉiam aldonante ion, kiu ŝanĝis la komprenon de la famo. Cetere la transilvanianoj rare estis en la departemento Sepeŝ kaj ili rare estis en la forĝistejoj, nome ne devis hufferigi la ĉevalojn. Sed kiam ili iris en la forĝistejon kaj rakontis famojn, eĉ tiam oni ne povis diveni, kiu estas la vera famo kaj kiu estas la nevera. Ĉu daŭras ankoraŭ la milito? Tion eblis scii laŭ la kostoj de la aveno kaj la ĉevalo. La ruĝa ĉielsubo ne estas kaŭzo de bruligo de iu transilvania vilaĝo, ja la lumo de la fajro ne videblas tro malproksimen.

Paŭlon Görgey ne interesis ĉi tiu informo, laŭ kiu Thököly malvenkis. Li nur indiferece demandis: Ĉu? Ĉu Emeriko Thököly malvenkis? Denove ekflagris la flamo de la libereco, sed kiel marĉlumo kondukis al tombejo. Tio estas komprenebla, ja pro tio Johano estas ĉi-tie hejme...”

Kaj nun ili denove babilaĉis pri Johano.

La edzino de Johano Görgey informis sian bofraton, ke Transilvanio²⁴ silentiĝis, la imperiestranoj pro enuo ĉesigis la batalon, fideluloj de Thököly forlasis sian estron, la moŝtaj sinjoroj ricevis pardonon en Transilvanio, sed tiuj, kiuj aliĝis al la hungara standardo, iĝis persekutitoj kiel ankaŭ Johano. Li en kamparanvestaĵo kiel liveristo fuĝis ĝis Osgyán, li kaŝis sin ĉe familio de Katarina. Bofrato de Katarina, Darvaŝ, kies fidinda konato de Eszterházy (esterhazi), la palatino, iris al Buda por peti tutan amnestion por Johano. Dio helpu lin. Katarina informis la edzinon de Johano Görgey en Osgyán, ke ŝia edzo estas tie. Ŝi konvinkis lin resti en la muelejo de Toporc, ĉe la muelisto Petro Gal, kiu estas fidela kaj ne perfidos lin. Ĝis tiam li devas resti en Toporc, ĝis Darvaŝ portos por li la tutan amnestion.

Matej turnis sin malantaŭen:

– Ĉu mi enveturu tra la pordego?

Ili estis ĉe la departementdomo.

– Enveturu. Mi ne scias, ĝis kiam ni restos ĉi tie. Li ĝemetis.

La sledo glitis al la kortego kaj la gardisto laŭregule salutis ilin per sia glavo. La vicprefekto alparolis al la gardisto laŭnome:

– Kuru Vlasinko, al la komandanto de la fortikaĵo. Tiu tuj venu ĉi tien!

Dume li desaltis de la sledo kaj helpis al la bofratino elslediĝi kaj ekpemis ŝian manon. „Estu kuraĝa, Marieta” – li flustris raŭkvoĉe, sed tamen afable kaj intime. Maria ne respondis. De la volbaro de la pordego malfortluma lampo lumigis ŝian vizaĝon. Ŝi estis pala kaj malgaje rigardis la vicprefekton.

– Vi tremetas – diris Paŭlo Görgey, ĉar li sentis la tremeton.

– Mi malvarmas, ŝi balbutadis, la vetero estas malvarmeta.

– La komandanto de la fortikaĵo tuj estos ĉi tie.

Vlasinko revenis.

– La komandanto de la fortikaĵo ne estas hejme.

– Vi devas serĉi tiun. Hej gardistoj! Venu ĉi tien!

Kvar gardistoj tuj aperis antaŭ Paŭlon Görgey.

– Serĉu la komandanton de la fortikaĵo. Tiu estu ĉi tie post unu horo. Vlasinko, voku ĉi tien tuj la ĉefprovoson kaj kunportu la ŝlosilojn de la ĉeloj.

Granda irado-venado estiĝis en la grandega konstruaĵo. Aŭdiĝis frapadoj de la pordoj. Ŝanceliĝantaj lumoj aperis en la korto, nome multe da homoj iradis –

²⁴ Pri Transilvanio (la iama parto de Hungarujo) vi povas legi ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Transilvanio>

venadis kun torĉoj. Disvastiĝis la famo, ke la vicprefekto neatendite alvenis kaj ege furiozas. La edzino de la komandanto de la fortikaĵo, sinjorino Grodkovski venis el la kuirejo, ruĝiĝinte, portante blankan antaŭtukon kaj vidante la moŝtan sinjoron stentoris akravoĉe:

– Ho, ve, mi tute ne scias kien iris mia edzo. Li subite malaperis kaj hieraŭ kaj hodiaŭ ne vespermanĝis ĉi-hejme. Mi vidis sur lia vizaĝo ruzecon, kiu ne plaĉis al mi. Sed pli frue li ĉiam diris, kien li iras. Ekzemple hieraŭ iu heroldo serĉis lin ĉie, ankaŭ ni serĉis, sed ne trovis. Kiam li hejmenvenis, mi pridemandadis pri lia foresto, sed li diris nenion. Mi demandis belavoĉe: „Mia dolĉa edzo, kie vi estis? Diru al mi ankaŭ tiam, se vi estis ĉe iu virino. Ĉar ankaŭ tion vi devas konfesi.” Sed mia edzo nur murmuradis ion. Nu, efike de tio ĉi mi demandis pli akre: „Grodkovski, fulmotondro! Mord’ de hundo! Ĉi tio ne okazu denove!” – kaj jen, hodiaŭ vespere li denove malaperis kiel kamforo. Mi povas nenion fari pro la kolero. Tio estas certa, ke li volas fari malbonon kaj estus bono, se vi, la vicprefekto riproĉus lin. Pro tio ĉi li ĉion konfesus.

Dum sinjorino Grodkovski parolis, ankaŭ la ĉefprovoso alvenis malrapide, kunportante torĉon kaj la ŝlosilojn. La vicprefekto jam de malproksimo kriis al li:

– Hej, Baltazaro! Kio okazis pri la malliberuloj?

– Neniu interesa afero.

– Ĉu neniu interesa afero? Tio estas bona. – Paŭlo pli facile ekspiris. – Ĉu estas ĉio en ordo? – Kion vi ordonas, mia sinjoro?

– Iu nova malliberulo estas ĉi tie, kiun mi volas vidi.

Baltazaro pensadis iomete.

– Ĉi tie nun ne estas nova malliberulo. Kiam tiu estis veninta?

– Nun, vendrede vespere.

– Mi ne scias pri tiu. La komandanto de la fortikaĵo ne diris al mi.

Paŭlo Görgey iĝis ekscitita.

– Sed tiu estas ĉi tie. Cerbumu!

– Tio estas neebla, moŝta sinjoro. Mi devus scii tion. Mia edzino faras la manĝaĵojn por la malliberuloj.

Paŭlo Görgey inciteme interparolis:

– Baltazaro! Vi estas stulta. Sendu al mi Gregorion Szabó.

– Tiu persekutas rabistojn. Oni prirabis la preĝejon de Farkaŝfalva.

– Kie estas Göbölý?

– Li malvarmumis en Toporc dum la servado, li ricevis pneŭmonion kaj agonias. Jam li konfesis la pekojn hieraŭ.

– Jes. Tiu scias tion. Kuru al tiu tuj kaj demandu: Kien li enŝlosis tiun malliberulon, kiun vendrede oni kunportis. Li devas diri antaŭ sia morto, eĉ se li mortas.

Baltazaro kuregis spite de sia ventrego, kvankam li manĝis la manĝaĵon de la malliberuloj. Sinjorino Johano Görgey apenaŭ kapablis stari, ŝi apogis sin al la ŝtuparkolono de la konstruaĵo kaj kroĉis sin al la koloneto tenanta la apogrelon. Ŝia pacienco elĉerpiĝis.

– Sendiaj paganoj! – ŝi elverŝis sian ĉagrenon. – Kio okazas ĉi tie? Eĉ hundon la hundkaptisto ne enŝlosas tiel, ke neniuj sciu en kiun bestojn estis ĝi ĵetita. Ĉu ĉi tiu domo estas departementdomo, aŭ krimul-kunvenejo?

Görgey mordetis siajn lipojn. Li sentis, se mem la departementdomo falus sur lin, eĉ tio ne ŝarĝus lin tiom, kiel la vortoj de ĉi tiu virino. Li tiris sian astrakanan ĉapon sur la orelojn por ne aŭdi la sekvajn riproĉojn. Kiome malfortiĝis la korpa forto de la moŝta sinjorino, tiome fortiĝis la kuraĝo de ŝia lango.

Paŭlo Görgey toleris multe, sed ĉi tiujn riproĉojn jam ne. Li klopodis kaŝi sin en la kortego, dirante, ke li havas aferon, sed li estis ege ekscitita.

Estis feliĉo, ke Baltazaro alvenis portante la sciigon, ke la malliberulon de Toporc oni enŝlosis sur la etaĝo. Tiu ejo estis apud la arkivejo, kie iam estis metitaj la iloj de la torturoj.

– Danke al Dio! – ekspiris pli facile la vicprefekto.

Sed oni devis trovi la ŝlosilon de tiu ejo. Pro tio Baltazaro kuris al la edzino de la komandanto de la fortikaĵo por serĉi en iu panpastujo la ŝlosilojn de la ejoj. Dume Baltazaro rakontis, ke li vidis la agoniadon de Andreo Göbölýő. Vane li demandis tiun, li ne respondis, nur lia edzino diris: „Vi povas postkuri lin al la Transmondo.” Sed Baltazaro diris: „Ne tiel estas tio. Ne temas pri mi, sed la vicprefekto ordonis tion.” Efike de tio la agonianto, kvazaŭ la morto estus delasinta lin, subite malfermis la okulojn kaj rakontis la kazon kompreneble. Dio helpu min tiel, ke tiu ne mortos, ĉar la morto je mencio de la vicprefekto forkuris tra la kameno.

La edzino de Johano Görgey nun petis sian bofraton porti trinkeblan akvon kaj iom da salo.

– Kial? – demandis Paŭlo. – Iru, Vlasinko kaj portu akvon kaj salon.

– Mi volas, ke tiuj aĵoj estu ĉi tie – ĝemis sinjorino Johano Görgey raŭke – nome se li ankoraŭ vivas (nun jam ŝi laŭte ekploris), tiam estas plej bona la sala akvo kaj iom da malforta vino.

– Ne ploru, Maria, regu vin – la personaro ne devas ekscii, pri kio temas.

Vlasinko portis la akvon kaj la salon, sed Baltazaro ne trovis la ŝlosilon de la ejo.

– Do, tiuokaze ni enrompos la pordon – ordonis la vicprefekto – kelkaj fortaj homoj venu ĉi tien! Ili kunportu hakilojn kaj levumilon!

Li kaj lia bofratino ekiris sur la ŝtupojn, li apogis sian bofratinon. Baltazaro portis la lampon antaŭ ili kaj bovlon da akvo.

Sur la etaĝo la brikoj frapis sub iliaj piedoj sur la koridoro, kie naŭzaj vespertoj ekflugadis super ilia kapo. Ĉe la loĝejo de la ĉefnotario ili turnis sin al alia koridoro. Ĉie estis odoraĉo de ŝimo. Sur ambaŭ flankoj de la koridoro estis ŝrankoj laŭvice, en kiuj estis dokumentoj, kiuj amuzis la musojn. La dokumentoj gardis la punojn de la homoj dum jarcentoj. El iu ŝranko senespera miaŭo de kato estis aŭdebla. La malfeliĉa kato esperanta agrablam muŝkapton foje eniris la ŝrankon tra la malfermita pordo, sed la pordo fermiĝis kaj la kato ne povis elveni. Tiu malfeliĉa kato estas ien fermita – diris la moŝta sinjorino. Ŝia amanta koro ne kontraŭagis sin mem.

Paŭlo ne respondis, sed mekanike iris post la ĉefprovoso, kiu haltis ĉe la lasta pordo.

– Ĉi tiu estas ĝi. Ĉi tie ni estas ĉe la ĉelo. Ili samtempe haltis. La aliaj antaŭpreparis la ilojn. Iĝis granda silento kiel en kriptoj. Paŭlo Görgey aŭdis la batadon de sia koro. Ĝis nun li rapidis, sed nun dum la decida momento li paliĝis, malkuraĝiĝis... li estis dezirinta forkuri. Ho, ve! Kio okazos nun?

– Ĉu la pordo estas fortika, Baltazaro? – li demandis malkuraĝe kiel infano, kvazaŭ li ne estus vicprefekto.

– Ĝi estis farita el kverkoligno. – respondis la ĉefprovoso simple.

La ĉefprovoso metis la lampon sur la teron, la bovlon Maria transprenis de li. „Nu, rigardu tion” – li alparolis al si mem, ekkuraĝiĝis kaj puŝiĝis grandforte al la pordo.

Paŭlo kaj Maria tre atentis la provadon de la ĉefprovoso. Efike de tio la pordo klakadis kaj ho, ve! Du piedojn ili vidas moviĝi en la aero kaj la korpo malaperis en la ejo, kune kun la pordo. Ĉi tiel la pordo malfermiĝis.

En la ejo videblis taga helo, kaj en la forno fajro zumis amikece. Sur la tablo ridetis ladbotelo da vino, apud ĝi estis plektita kuko kaj unu peco da ŝinkoj. Ĉe alia fino de la tablo du viroj sidis, kiuj ludis societan ludon, sed aŭdante la bruegon, eksaltis ĉagrene. Sinjoron Grodkovski la vicprefekto tuj ekkonis, la alian viron sinjorino J. Görgey same rekonis. La pli lasta estis Johano Görgey.

La aspekto de Johano estis aliigita kaj la vicprefekto gapis, vidante, ke la bofratino trabrakumas la fremdan viron.

– Ĉu vi ne mortis? Ĉu vi vivas ankoraŭ?

Sinjoro Johano gajeme trabrakumis sian karan edzinon kaj ankaŭ levis iomete ŝin supren, kies okuloj estis viglaj kaj iomete moke brilis.

– Ho, mi tute ne mortis – li respondis ŝerceme, iomete plendante – mi vegetas, manĝante panon de la mallibereco. (Li prenis pogaĉon, maĉetadis ĝin kaj drinkis iom da vino el la ladbotelo.) Homo kapabla toleri multon. Kion vi serĉas, mia kolombo, ĉi tie? Ja vi ne estas jam juna por iri post via edzo. Kial vi ĝenas nin?

La vicprefekto estinte kaŝita ne interparolis, nur nun laŭ la voĉo rekonis sian fraton kaj lia psika ekvilibro reskuiĝis:

– Baltazaro! Ekstaru kaj foriru! Mi diris, ke vi estas granda stultulo. Vi puŝiĝis forte al la forta pordo, Pli frue vi estus malferminta ĝin per la klinko. Ja ĝi ne estis fermita per ŝlosilo. Bone estas, ke vi ne rompis kelkajn viajn ripojn.

Kiam la ĉefprovoso malaperis, la vicprefekto paŝis pli proksimen al la lumo kaj diris:

– Donu al vi Dio feliĉan bonan vesperon, mia frato!

Vi povas imagi, kia ĝojo estis post la ektimiĝo kaj ĉiaspecaj klarigoj. Nome nur nun la komandanto de la fortikaĵo atestis la propran enmiksiĝon. Kiam la vicprefekto iris per kaleŝo al Görgő, vokigis lin la malsana hajduko al sia lito, dirante, ke li volas pastron. Li, Grodkovsky²⁵, volis elprovi la hajdukon kaj ĉar la pastro loĝis malproksime kaj ankaŭ la vetero estis ege malbona, demandis tion: „Ĉu ne estus pli bone, se prefere mi sendus iomete da bonaj vinoj?” Sed tiu volis pastron. Li vidis, ke tiu perdas la prudenton. Sed se tiu volas pastron, tiam ĝi estos. Sed li konfesis sekreton, laŭ kiu pasintnokte oni portis iun malliberulon kaj enŝlosis lin en la malnovan ilarejon, kiu dum du tagoj nenion manĝis. Ĉi tiun sekreton li ne povas porti al la transmondo.

– Vi ege bone agis Grodkovsky – laŭdis lin la vicprefekto – Vi bonigis tion, kion mi malbonigis. Nun, mi devas bonigi tion, kion vi malbonigis, sed tion vi ne povas danki. (Li ekridis, ĉar delonge li ne ridis jam.) Sed nun temas pri sinjorino Grodkovsky, kiu volas fari venĝon pro via sekreta foresto. Sed komencu klarigi tion.

Ĉi tio estis milda admono, ĉar la familio volis resti sen atestantoj. Do, la foriron de Grodkovsky tia intima parolado sekvis, kia en la vivo okazas ege rare. Bone estas, ke kvankam okazis iu konfuzo, tamen ties fino kaŭzis bonan senton. Ĉiuj parolis samtempe, teruriĝis kaj respondis, ridegis. „Kial vi kaptigis min, bubo?” Paŭlo rakontis, Johano ege ridis.” Ej, bofrato, vi suspektis min” – incitetis sinjorino Johano Görgey. Johano petoladis „Ĉi tion ricevas la mispaŝemaj junedzinoj.”

La ŝercoj flugadis kiel mielaj sagovergoj, kiuj ne kaŭzas doloron, sed nur tiklas.

Ili forlasis tiun ejon preskaŭ seneme, ĉar tiu estos memoriga kara ejo en ilia tuta vivo. Sinjoro Paŭlo proponis al sia pli aĝa frato, ke li restadu en Görgő ĝis alvenos la amnestio. Nome la imperiestranoj ne supozas tion, ke iu kaŝiĝas ĉe sia frato. Ĉi tio estas la plej granda ruzeco. Nu, nun la plej grava afero estas, ke oni devas rapide hejmenveturi, ĉar la vespermanĝo de sinjorino Marják estas jam preta. Sed al la hejmenveturo ne estas bezonata Matej, la koĉero, ĉar nome tiu

²⁵ La familionomo Grodkowszky elparolendas: grodkovski.

kutimis klaĉi, sed iu bezonas ties pelton. Nome la muelistvestaĵo de Johano, kiun li portis okaze de sia ekkaptiĝo, ne estis taŭga vintra vestaĵo.

La vicprefekto venis sub la pordegvolbaron, forigis la personaron kaj ordonis al Vlasinko:

– Veturigu mian koĉeron al la familio de la fortikaĵkomandanto por doni al li vespermanĝon kaj dormejon. Kaj matene ili donu ĉevalon al li por hejmeniri.

Ĉi tiel la geedzoj Görgey povis enslediĝi sen atestantoj. La vicprefekto surmetis la pelton kaj instigis la ĉevalojn por hejmeniri. Tiu afero plaĉis al Matej, sed li ne komprenis, kial ili deprenis de li la pelton. Pli malfrue ne plaĉis jam al li la afero, ĉar li ne ricevis bonan vespermanĝon kaj el loĝejo de la fortikaĵkomandanto militaj voĉoj aŭdiĝis. Bovloj kaj teleroj klakadis, (povas esti ke ili ĵetadis tiujn unu kontraŭ la alian), la mebloj rompiĝis kaj unu akra virina voĉo aŭdiĝis kompreneble:

– Gardu vin, Grodkovsky, ĉar mi ekscios, kun kiu vi koketas. Mi sentas virinan odoron sur via vestaĵo, vi estas latrono. Ne aludu la vicprefekton, ĉar ankaŭ tiu estas fiulo, kiel vi. Ĉu vi aranĝis lian aferon? Kian aferon vi aranĝis? Diru al mi! Ho, ve! Mi tuj elskrapos viajn okulojn!

– Eniru, Matej! – diris Vlasinko – sed mi ne eniras en la groton de la tigro, tute ne.

Ankaŭ Matej ne kuraĝis eniri en la domon de la ortikaĵkomandanto, sed frostotremis, ĉagreniĝis, malsatis kaj kompatis sin kaj la komandanton sinjoron Grodkovsky. Sed laŭ ni tio estas komprenebla, nome pro la problemoj de la moŝtaj gesinjoroj la subuloj suferas. La destino ordonis malsaton al sinjoro Johano Görgey kaj pro tio la riproĉon al sinjoro Paŭlo Görgey. Sed la malsaton ricevis tamen Matej, la riproĉon Grodkovsky. Tiuj aferoj ĉiam okazis tiel ĉi.

Vlasinko kompatis la koĉeron Matej kaj kiam finiĝis lia servado, tiam ili iris en la drinkejon „Arĝenta cervo”, kie la drinkejestro donis tre bongustan galantinon al ili kontraŭ de kelkaj groŝoj. Matej paciĝis, nur problemon li havis: „Kial ili deprenis de li la pelton?”

– Ne cerbumu, amiĉjo! – instruis Vlasinko – la moŝtaj sinjoroj ne kapablas pensadi.

La nokto de Grodkovski estis pli malbona, ol tiu de Matej. La disputado daŭris ĝis noktomezo kaj poste iĝis silento, nome sinjorino Grodkovsky enlitiĝis. Dume rajdanto alvenis al la kortego de la departementdomo. La rajdanto komencis frapegi sur la pordo de Grodkovski.

Sinjorino Grodkovsky vekigis kaj daŭrigis la disputadon. Sinjoro Grodkovski tiris botojn, vekis la servistinon por rigardi la personon de la rajdanto.

– Letero alvenis el Görgő. – anoncis la rajdanto.

La servistino transprenis la leteron, portis ĝin en la domon. Sur la koverto estis nekonata skribaĵo. La adresato estas la nobla brava Miĥelo Grodkovsky.

Li tuj rompis la koverton kaj legis la tekston ĉe la lumo de la meĉo:

Mia bonvola moŝta sinjoro! Mia nobla komandanto-sinjoro!

Pardonu min, ĉar mi vekas vin, sed mi vidis, ke vi estas honesta animo kaj ŝatas la bestojn. Mi petas vin, ĉar sur la koridoro, kie troveblis la ĉelo de mia edzo, en unu ŝranko restis enŝlosita unu kato, kiu ne kapablas elveni kaj povas esti, ke ĝi malsatmortos. Por ne honti pro tiu kato, do mi petas vin bonvolu liberigi ĝin, kion mi forgesis peti pli frue.

21, novembro, Görgő

Vin mi rekomendas por esti protektata de Dio:

Maria Jánoki sinjorino Johano Görgey

– Nu, Dio batu tiun katon – furiozis sinjoro Grodkovsky kaj disŝiris la leteron, ĉar en la teksto estis la mencio: „ĉelo de mia edzo”, kiu povus esti perfida. Sed tamen li surmetis vestaĵojn, iris al la etaĝo por liberigi la malfeliĉan katon. Dumvoje li pensadis: ja ĉi tio estas sensenca, sed edzinoj kapablas fari tion. Kiu sinjorino estas pli malbona? Ĉu unu intrigulino kiel lia edzino, aŭ bonanima kolombo kiel sinjorino Johano Görgey?

4-A ĈAPITRO

Hasta mencio de kelkaj publikaj aferoj

Imperiestro Leopold ne estis talenta homo, sed tamen li povis forigi sinjoron Thököly el Transilvanio, dank' al sia stilo. Li skribis bontonan proklamon, pro kiu la sekvantoj de Thököly forlasis la reĝon de la kurucoj. Ĉi tio estas malnova historio pri la fuĝantaj ratoj. Ili disiĝis, ĉar ili ne havis perspektivon kaj la proklamo de la imperiestro promesis amnestion: „Ĉiuj ricevos pardonon – se ne intervenos ia eksterordinara kaŭzo.”

Al Johano Görgey ne tre plaĉis ĉi tiu teksto, nome Caraffa, la imperiestra generalo, mesaĝis al li pere de iu eksa malliberulo dum la somero (tiutempe la kurucoj proksimiĝis al malvenko) rigardi sian kapon lastan fojon en la spegulo, ĉar baldaŭ li ne havos tiun.

Li ekkomprenis, ke tiu speciala kaŭzo ĉe li povas ekesti, kaj ankoraŭ antaŭ la plena demoraliziĝo de la armeo, li fuĝis hejmen en alia vestaĵo. Dumvoje li aŭdis, ke li estas sur la nomlisto de la „foriginduloj.” La forigo estis direktita en iun proksiman kazematon, aŭ en iun tre malproksiman landon, kiun promesas la pastroj kaj kiun ankaŭ ni sopiras, – sed ne tuj kaj ne helpe de la imperiestro.

Sinjoro Paŭlo komprenante, la situacion de sia pli aĝa frato, nome tion, ke lia propra stulta ago povus havi konsekvencojn (ja tiu malsatmortus) kaj kiuj kromaj povus esti, se iu estus ekkoninta la malliberulon, kiam oni forportis Johanon el Toporc, aŭ Grodkovsky estus klaĉinta, teruriĝis kaj lia animo rompiĝis. Frakasitan korpon kuracisthelpisto kuracas, la rompita animo serĉas rifuĝejon ĉe Dio. Li profundiĝis en meditado religia. Kial okazis ĉio ĉi? Ĉar li estis sufiĉe malgrandanima kaj malakceptis la suspekton, ja ĝi ŝajnis ne refutebla. La destino kirlis liajn porevitajn paŝojn tiel, ke el ili estiĝis vere grandaj danĝeroj. Ĉu ne estas en ĉio konscia celo, la mano de Dio, kion la destino teksas? Ĉu ĉi tio ne estas averto kontraŭ io, ia atentigo, kvazaŭ dirus la Providenco: „Estu singarda, Paŭlo Görgey! Vi sekvas alian suspekton, do liberigu vin de ambaŭ!”

Ĉi tio ŝajnis al li Dia ordono. Alvenante hejmen li lokis siajn gastojn en neloĝatan apartamenton de la kastelo, kien nur sinjorino Marják havos enpaŝpermeson. Poste li vizitis la ĉambron de sia mortinta edzino. Tiu ĉambro estis gardata en tia stato, kia ĝi estis en la momento de la morto. Li ekhaltis antaŭ la oleoportreto de sia junedzino kaj tiel alparolis tiun solene, sed povas esti, ke li nur pensis la vortojn kaj tiu ne aŭdiĝis:

„Ĉu vi vidas, Karolina, kio okazis pri mi? Mi estas malfeliĉega. Ĉu nia filineto estas ĉe vi, aŭ estas ĉi tie? Mi jam ne volas scii tion. Mi kredas, ke ŝi estas ĉi tie kaj mi plenedukos ŝin. Ne koleru min! Mi jam ne suspektas, Dio helpu min tiel.”

Paŭlo Görgey trankviliĝis kaj iĝis alia homo.

Li sentis, ke li estis maljusta pri Johano kaj lia edzino kaj tion pensis, ke li faru iun bonan agon pri ili, kio kompensos lian pli fruan agadon. (Ja li estis bona kiel peco da pano.) Kvazaŭ li estus sopirinta tion, ke la imperiestranoj serĉu Johanon, sed li ne transdonos lin al ili „eĉ la kaptistojn li mortbatos. Poste li fuĝigos ilin al Pollando. Ĉi tio estis lia plano, ankaŭ tiam, se li mortus.

Sed ĉi tio ne okazis, ĉar dum la tritaga restado de Johano kaj lia edzino en Görgő, dum tiuj tagoj sinjorino Marják kuiris bongustajn tagmanĝojn. kaj dume alvenis la armita akompananto de sinjoro Darvaŝ, kiu vane serĉis la moŝtan sinjorinon en Toporc, do li portis al Görgő por Johano la sigelan paspermeson.

La moŝta sinjorino ĝojegis, sed Johano plurfoje tralegis la tekston serĉante en ĝi ian sekretan kaŝitan penson. Fine li flegme sciigis pri sia liberigo.

– Tio estas granda feliĉo! Kial vi ne ĝojas? – riproĉis la moŝta sinjorino sian edzon.

– Tio estas vere feliĉo! – li diris melankolie – sed similas al tiu kazo, kiam iu alulon batis rompinte ties ĉiun ripon kaj post lia elĵeto, sur la herbejo kie li estas, li trovas kvarfolian trifolion, kaj tiam oni diras: tio estas ega bonŝanco!

– Sed ĉi tio estas pli bona, ol nenio!

– Mi ne scias – respondis Johano pensadante – mi estis ĝis nun kaŝ-vagadanta kuruco kaj sciis, ke mi estas pelata lupo, kiu finfine alkutimiĝas al sia stato. Sed nun....

– Nu, kio do nun?

– Ekde nun mi estos libera hungara nobelo, tamen mi ne scias kio mi estas, ĉar mi timas, ke mi ne kapablas akcepti la nunan situacion. Nome la antaŭa stato estis realaĵo, sed la nuna ne.

– Kion vi volas fari? – demandis Paŭlo.

– Ankoraŭ nenion. Tamen, unue mi demetas la muelist-vestaĵon. Ĉu vi povus doni prunte iun alian vestaĵon?

– Mi ne permesas tion – protestis sinjorino Johano Görgey. – Ne portu alian vestaĵon. Vi hejmenvenos en la muelisvestaĵo, por ke la homoj vidu, kiu estis mia muelisthelpisto.

– La bofratino pravas – diris Paŭlo – mi ne donas alian vestaĵon, sed mi donas konsilon: ne havu similajn aferojn por eviti la malbonon, ĉar longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas.

– Vi pravas, bofrato Paŭlo. Ankaŭ mi opinias same.

– Ĉi tiu nacio ne havas persiston – daŭrigis sinjoro Paŭlo – oni povas komenci kun tiu gravajn aferojn, sed tiujn fini ne eblas. Tiuj estas vanaj fortostreĉoj.

– Mi scias tion ĉi tre bone – ĝemis Johano amare – mi ne havas junaĝajn dentojn, ĉar mi plenkreskiĝis. Plu ne timu min. Eĉ ses bovoj ne povos min eltiri el mia nobela domo.

– No, ne – kontraŭis la vicprefekto – mi tuj respondos tiun ĉi aferon.

Li stariĝis, li trairis en la kancelarion sed post kvaronhoro reveninte kunportis iun dokumenton kaj al Johano transdonis. Johano rigardis ĝin de malproksimo, ĉar li jam estis ambliopulo.

– Sed tiu ĉi estas adresita al grafo Csáky, ĉefprefekto, sed ne al mi. Kion ĝi enhavas?

– Mian rezignon pri la vicprefekta ofico. Mi redonas vian potencon. Tiu devenis de vi, pro kio, tiu koncernas vin.

Johano rapide finlegis la dokumenton, poste disŝiris ĝin.

– Mi dankas al vi, mia pli juna frato, sed mi jam ne okupiĝas pri aferoj de la mondo. Mi ne volas helpi kolekti impostojn kaj okupi luteranajn preĝejojn, ktp...ktp... Mi silente retiriĝas al Toporc, por mi sufiĉis pri la politiko.

Maria kareseme klinis la kapon sur lian ŝultron.

– Dio benu vin, kara mia edzo, ke vi decidis tiel – ŝi diris dankeme kaj piatone.

– Kion vi volas fari en Toporc? – volis timigi lin Paŭlo.

– Mi plantos arbojn.

– Ankaŭ tio estos nur unu tago dum la jaro.

– Mi forprenos la raŭpojn de la arboj.

– Ankaŭ tio bezonos nur du tagojn. Kion vi volas fari dum la aliaj tagoj?

– Mi atendos ĝis la infano estos plenkreskulo.

– Nu, tiu bele kreskas – interparolis sinjorino Johano Görgey – mi ĝuste forgesis diri, ke pasintvendrede mi ricevis leteron de li, kiam vin oni kaptis.

– Ĉu leteron? – miris Johano Görgey – pri kiu infano vi parolas?

– Nu, pri nia filo Georgeto. Li skribas, ke ambaŭ dolmanoj estas jam malgrandaj por li. Li pravas. Nun ni aĉetu kelkajn metrojn da ŝtofoj, dumvoje al Lőcse. Nome ĝi estas pli malmultekosta en Lőcse, ol en Keŝmark.

– Jes, jes – diris Johano kun patra mildo. – Vi pensis je Georgeto. Mi estas stulta. Mi ne je li pensis.

– Pri kia infano vi parolas?

La okuloj de Johano ekbrilis.

– Ej, pri la duonfilo de Thököly, pri la eta Rákóczi²⁶.

Paŭlo Görgey sekrete rigardis sur sian bofratinon.

– Vi estas neplibonigebla – li murmuris inter la dentoj.

Kvankam Johano ne montris, tamen li ĝojis pro la paspermeso, ĉar li volis hejmeniri. Li havis multe da aranĝendajn aferojn hejme. (Ej, ej, – balancis la kapon Paŭlo. – Ĉu vi ne devus resti ĉe mi dum la tuta vintro?) Ĉar ankaŭ la moŝta sinjorino volis hejmeniri, ili havis multe da pretekstoj kaj li ne plu povis retenigi ilin. Do, ili foriris tuj post la tagmanĝo. Kiam ili enkaleŝiĝis, la vicprefekto denove ripetis sian proponon:

²⁶ La familionomo Rákóczi elparolendas rakoci.

– Bonvolu trapensi, mia pli aĝa frato, tion, kion mi diris, ke mi helpos vin esti vicprefekto.

– Lasu min pri tiu plano – kontraŭis Johano kolere kovrante sian emociĝon – ne redonu tion, kion mi transdonis al vi, sed redonu tion, kion vi deprenis de ni, se vi volas fari ion bonan al ni.

– Kion?

– Do, nian etan Rozalian.

– Ĉu vian Rozalian? – Li balbutis faltante la frunton kaj lia koro ekdoloriĝis.

La kaleŝo ekiris, ĝi forlasis la kortegon de Görgő kaj Paŭlo Görgey restis sola, preskaŭ rigidiĝinte, enmane prenante sian ĉapelon por signi adiaŭon, sed poste li ne metis ĝin sur la kapon.

– Do, tamen...

Li memoris siajn vortojn: „El mia animo mi elĵetas la suspekton, kiel sana korpo la dornegon!” Ĉu la malsana animo same elĵetas la malbonon? Ekde tiam la du fratoj renkontiĝis nur malofte. Johano ne partoprenis la kunvenojn de la departemento kaj nur hejme interesiĝis pri la politiko. Tiutempe gazetoj ne estis, sed estis najbaroj en la proksimaj vilaĝoj, do tiuj portadis la informojn.

La informoj ne donis multe da ĝojoj! Pro la okupo de la fortikaĵo de Buda, ĉesis la forto de la turka duonluno. La kristanoj ĝojkriadis. Ili estis stultaj. Ja Hungario estis la plej malfeliĉa lando inter la aliaj, ja ties sola apoganto estis nur tiu malamiko. (Ankaŭ tio ĉi povis okazi nur pri ni.)

Kiam la turkoj estis forpelitaj de Buda, tiam ektimis niaj antaŭuloj:

– Kio okazos pri ni sen la turkoj?

Ĝis nun la kortego de Vieno nur tial kondukis singarde pri la hungaroj, ĉar laŭnecese tiuj povis peti helpon de la turkoj, kiuj povis fari malagrablaĵon al la germanoj, kiam tio estis dezirata.

Nome la turkoj estis tiel bezonataj en nia politiko, kiel la salo en la mastrumado.

Sed, se nur la turkoj estus pereintaj (kvankam, estas bonaj la turkoj ĉe la domo laŭ la tiama onidiro), sed pli malfrue tiu famo komencis disvastiĝi, ke la imperiestro ne volas rekoni la regnestrecon de la filo de Apafy,²⁷ diranta: „Kial bezonas ĉi ludadon Transilvanio?”

Nu, de nun ne estos jam la „pli malgranda patrujo”, kien oni povis fuĝi, se la pli granda patrujo fariĝos malvasta kaj ne sufia por eble de tie reataki. Dio, kiu donis al ni la reĝdomon de la Habsburgoj, tiu donis al ni kontraŭ tiu siajn elitulojn, siajn ĉiam maltrankvilajn reĝojn sur la trono de Transilvanio. Nun jam eĉ Transilvanio ne estos. Leopold scias siajn fendaĵojn, sed ĉu tion, kion ni faru? Tion neniuj scias.

²⁷ Pri Apafy la dua, vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Apafi_la_2-a

Kelkaj nobeloj ankoraŭ kredis la denove aperantan feliĉon de Thököly. Sed ho, ve! La feliĉo ne estas brasiko, kiun oni povas varmigi. Sed sinjoro Thököly fariĝis jam sensukigita citrono, pri kiu eĉ hundo ne zorgas.

La kvereladaj potenculoj estigis la pacon de Karlóca²⁸, la havaĵon ili disdividis, sed pri Thököly ne temis en ĝi.

La grandan potencon havanta Maurocordato (greka soldatoficiro, diplomato), ĉe kiu Thököly servis kaj de kiu li petis siajn privilegiojn ĉe la potenculoj, respondis jene:

– Ne cerbumadu pri la pasinteco, prefere vi mem zorgu pri la aktuala situacio kaj la estontecon konfidu al Dio!

Ĉi tiu respondo disvastiĝis en la nobeldomoj kaj en la kasteloj. Ĉiuj diris la jenon: „Ej, la impertinenta! Li diris tion al sinjoro Thököly, sed lian diraĵon li povus diri ankaŭ al la malfeliĉaj hungaroj,” opiniis ĉiuj komprenintaj la diraĵon tiel, ke ili estas koncernataj.

Ĉi tiel la lando profundigis ĉiam pli kaj pli en senpova orfeco. Ĝi havis konstitucion, sed oni ne aplikis ĝin. Ĝi havis ankaŭ palatinon, sed tiu ne pledis por la nacio kaj la reganto ne konsentis kun tiu. Ĝi havis ankaŭ Parlamenton, sed Vieno decidis memstare agi, ne demandanta ĝin, sen peto de la hungara Parlamento. Ho, ve al tiu malfeliĉa Parlamento! Tiu ne estis pli valora, ol la rolo de ia pupo, kiu enŝaltite ploras.

En Vieno kardinalo Koloniĉ faris la programon: „Por ke la lando iĝu mizera, unue ĝi estu mallibera, almozpetanta kaj poste katolika.” Vieno ne tenis sin pedanta pri tiu ĉi vicordo, nur al la programo. La kortego de Vieno jam ankaŭ pli frue faris katolikojn el la protestantoj, nur poste ĝi faris ilin almozpetantaj mizeruloj, malliberuloj.

Tamen la protestantoj estis en la plej malbonaj cirkonstancoj. Nu, ankaŭ sinjoro Johano Görgey koleradis pro tio ĉi. Nome al li kiel vicprefekta ĉefpatrono ofte venis plendoj, ĉar jen tie kaj jen tie ĉi denove estis forprenita unu templo de la luteranoj. Sed ankaŭ la katolikoj ne havis bonan situacion, kvankam ili ekhavis tiujn forprenitajn templojn, sed la temploj ne estis manĝaĵoj. Krome oni deprenis la pli riĉajn paroĥojn de ili, se ne la fremdulojn ili nomumis episkopoj, abatoj kaj kanonikoj. La protektantoj de la jezuitoj kaj la ambiciulaĉaj pastroj tiel vagadis kaj grakis ĉirkaŭ la Burgo de Vieno kiel la kornikoj, por kiuj oni devis fari oficojn en Hungarujo.

La soldataro, ne ricevinte sufiĉe da soldoj, farinte malgrandajn bandojn sen disciplino, vagis prirabinte la loĝanton. Tiuj bandoj plenumis nur unu parton de la

²⁸ Pri la traktato de Karlovic, bonvolu vidi la artikolon wikipedian:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Traktato_de_Karlovic

programo de Kolonics: „Por ke Hungarujo iĝu lando de mizeruloj!” Ili rekviziciis sen religia diferenco.

La viena kortego sen demando de la Hungara Parlamento ŝerĝis per novaj impostoj la departementojn kaj la nobelojn. Pro tio jam la palatino protestis, sed li ricevis princan titolon por kontentigi lin, kaj plu li ne protestis.

Oni sugestis al la tribunalo, ke la kortego konsideros bona, ke ĝi faru diferencon laŭ religio kaj partianeco de la procesantoj. Sekve de tio la protestantoj gajnis proceson nur tiam, se ili koruptis la juĝiston. Se ili pagis abunde, ankaŭ tiukaze ili gajnis la proceson, se ili ne pravis. El tio sekvis, ke ankaŭ la katolikoj devis korupti en la intereso de sukcesa proceso.

La hungara socio iĝis ĉiam pli kaj pli altgrade senespera. Nuboj de zorgoj kolektiĝis kaj iĝis fulmoj. Tamen el ĉi tiuj naskiĝis nur fluaj: larmoj de la Nacio. La popolo kaj la nobelaro estis esperperdiĝinta. La ĉefnobeloj kaŝis sin en indiferenteco.

La havantoj de potenco iĝis ĉiam pli kaj pli kuraĝaj. Oni lombardis la distrikton de la Jazig-Kumanoj por germana ordeno de kavaliroj. Poste estis lombarditaj la marbordaj bienoj de la familio Frangepan por la Ĉambro de Graz (grac). Nun jam movis sin la ĉefnobeloj. Tio ĉi estas tamen hontinda! Ja ĉi tiuj senmastraj bienoj prefere estas bonaj por donaci al indaj homoj ol por lombardi. Lombardi tiujn ĉi bienojn estas hontinda afero! Tion ĉi ni ne povas toleri!

Nu, ni povus daŭrigi ĉi tiujn kazojn senfine ĝis ankaŭ la elituloj ekkoleris. (Ili sonĝis pri tio, ke ĉi tiuj kazoj estos utilaj, profitdonaj al ili.)

Do la pacienco elĉerpiĝis kaj oni pensis, ke estus bono unu fajrero, kiu eksplodigu la malkontentecon. En nia historio Johano Görgey, la ĉion scianta, estis la saĝulo de la sangvinaj nobeloj, sed li prefere silentigis la homojn.

– Atendu, toleru, ja la knabo estas nur deksesjara.

Ĉe ĉiuj plendoj li diris: „Li komencis nun la deksepan jaron. Nun li jam estas dekokjara... Atendu, toleru! Kaj nun io okazis, kio sur tiu ĉi planedo ankoraŭ ne okazis: nome ĉiuj Hungaroj turnis sin al Vieno kuname kiel la muzulmanoj al Mekko²⁹. De tie venis la nuboj – de tie oni atendis la fulmon. Oni atendis la Mesion el la Infero.

Ĉiuj en la nobeldomoj sonĝadis pri la knabo. Kiel li povas aspekti nun? Certe li estas granda. Kialokolorajn okulojn li havas? Ĉu nigrajn, aŭ bluajn? Maljunaj superaj juĝistoj diskutadis pri tiuj. Ĉu li similas al sia patrino, aŭ patro? Kion li faras nun? Bone estus, se li estus simila al sia patrino. Povas esti, ke li nun rajdas apud Vieno sur senbridaj stalonoj, portante ĉapelon, sur kiu li havas plumon de tartarfalko, kaj portante flavajn botojn el marokeno. Tutcerte estas, ke ankaŭ li pensas sian hejmlandon.

²⁹ Pri Mekko vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Mekko>

Kion faras la maljunuloj? De tempo al tempo alvenas fabelecaj novaĵoj ankaŭ de tiuj. Tiuj vivas en Nikodemio, trans la maroj. Eĉ birdoj ne iras tien nek venas de tie. Sed la informo tamen alvenas ĉi tien. Thököly suferas pro podagro, la regnestrino havas preskaŭ blankhararon pro la jam multaj blankaj kapharoj, sed tamen ŝi estas belulino ankoraŭ nun. Kiuj ne havis sufiĉe da lokoj en dek fortikaĵoj, tiuj nun vivas en modeste eleganta malgranda vilao en Dsidek Majdan. La hungaroj konas tion kiel nomon de agrikultura limtereno, ja ĝia nonsignifo estas „flora kampo”. Ja tio povas esti florphavanta, sed ĝiaj floroj devenus el Azio, ne estas inter ili pelargonio, rozmareno.

Ĉu ili esperas? Ho, verŝajne. Ankaŭ tion ili atendas, ke la knabo plenkresku. Ĉar la regnestro foje diris tion al iu vinkomercisto de Lublo, ke la arĝentan edziĝfeston ili festos en Munkács (munkaĉ, nun Mukaĉeve)³⁰... (Nu, ja, kiam la edziĝfesta jubilo okazos, tiutage mi ebriiĝos – promesis la maljunuloj.)

Bedaŭrinde estas, ke la princo Miĥelo Apafy multe malbonigis ĉi tiujn iluziojn. Lin la Diablo venigis por ĉasi al la departemento Sepeŝ. Vere, ne la Diablo portis lin, sed mia sinjoro Samuelo Roli, rivalanta kontraŭ Petro Luĵenski. Dum ĉi tiuj ĉasadoj partoprenis ankaŭ iu grafo, pro kiu, li devis surpreni elegantan nigran vestaĵon kaj dum la tagmanĝoj kaj dum la vespermanĝoj. Poste la rangameganta sinjoro Roli estante foje vizitanta en Vieno, kaj denove renkontiĝante kun la ekkonita grafo, vestis sin en nigran kompleton. Tiam ankaŭ Luĵenski devis surmeti nigran ĉemizon.) Nome la grafo estis filo de princo Miĥelo Apafy la 2-a, kiun la imperiestro vokis al Vieno. La imperiestro sukcese edukigis tiun, kiu iĝis diboĉanto. Laŭ Telekí ties patro estis nur duonhomo, sed Apafy la 2-a estas tute akceptebla homo. Nome lia patro nur posttagmeze estis ebria, sed la filo ebria estis ankaŭ antaŭtagmeze. Krome la juna Apafy estis morale ne perfekta, li estis pli ĝuste tute malmorala figuro.

Li nenifaris du semajnojn ĉe la familio Roli, finfine ili tute ekabomenis lin. Li kaj la similaj diboĉantoj dissemis la famon, laŭ kiu la malgranda Rákóczi devus esti pastro, kion volis Kollonich,³¹ la kuratoro de Rákóczi. Ankaŭ aliaj famoj disvastiĝis pri Rákóczi, laŭ kiuj la kutimoj, la kondutoj kaj la emoj de Rákóczi estis aliaj kaj tiuj aliigis la esperojn koncerne lin.

Nur Johano Görgey ne ŝanĝis siajn malnovajn opiniojn.

Kio ne povas esti, tio ne povas esti. La patro de Francisko Rákóczi la dua³² estis Francisko Rákóczi la unua, lia patrino estas Helena Zrinyi³³ Lia duonpatro

³⁰ Pri Munkács vi povas legi en la artikolo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Mukaĉeve>

³¹ La familio-nomo Kolonich elparolendas koloniĉ.

³² Pri Francisko Rákóczi la dua, vi povas legi ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Francisko_Rákóczi_la_2-a – pri la familio Rákóczi:

<https://en.wikipedia.org/wiki/Rákóczi>

³³ La familio-nomo: Zrínyi elparolendas: zrinjski, zrinji.

estas Emeriko Thököly. Tio estas neebla, ke lia deveno ne portu sukceson por la patrujo, ja la homa nobla naturo ne povas rezultigi frenezaĵon.

– Ja vi pravas – klarigis sin Adamo Sentivanĵi – sed tamen ĉu vi ne vidis vinon, kiu mucidiĝis en la barelo kaj iĝis maltaŭga por drinki?

Sinjoro Johano Görgey sentis sin malkomforte.

– Hm, nu, nu, ĉu en la barelo...

– Ĉu vi opinias, ke Vieno estas tute senmakula, kie estas ne nur klaraj aferoj?

– Nu, do! – respondis la kurucu pensadante.

Iuprintempe sinjoro Gabrielo Ŝemŝei havis aferon aranĝenda en Vieno. Lia opinio estis simila al la opinio de Johano Görgey. Ili estis bonamikoj kaj kunbatalantoj. Ŝemsei havis elitajn parenkaron en Vieno kaj li povis paroli kun la juna Rakoci. Li povis atenti la imagojn de Rákóczi. Ŝemsei venante hejmen nokte dumvoje haltis en Toporc. Li frapis sur la pordego de la kastelo kaj diris malĝoje al Johano:

– Mi vidis la junulon kaj parolis kun li. Li ne estas taŭga por batali.

Sed Johano Görgey estis obstina. Oni ne povis konvinki lin facile. Poste li incitis sin ĉe ĉiuj maljustaĵoj, sed dume grincigis la dentojn:

Nu, tio estas nenio. Ja la knabo estas jam dudekjara. En marto estos dudekunu-jara.

Dume la maljustaĵoj okazis ĉiam pli kaj pli ofte, la jaroj pasis. La malkontenteco grandiĝis en la lando kaj kreskis ankaŭ Francisko Rákóczi la dua.

5-A ĈAPITRO

Artifikoj de la saksoj

Ekde kiam Galilei konstatis, ke la Tero rotacias, ekde tiam oni povas teni ĝin viva besto sen poeta fantazio. Almenaŭ ĝi akordiĝas kun la ĝenerala leĝo, kiu anoncas: kio moviĝas, tio vivas. Fakte estas, ke la Tero vivas kaj tiel aspektas kiel iu multajn ĝibojn havanta dromedaro, sur kiu sidas kaj moviĝas multe da parazitoj, homoj, bestoj, vermoj ktp. Kia trompa ŝajno estas, ke ĝi ne vivus! Ĉu el mortinto povas estiĝi vivo? Ĝi formiĝas, ŝanĝiĝas, ŝvitas, skuiĝas (dum tertremo), dormas (en profundo de la vulkanaj montoj), ĝi nutriĝas, nutras, kiel alia patrinbesto (manĝanta kion la bestoj kaj plantoj faligas, sed kion la Tero elpuŝas el si mem, tio estas ilia manĝaĵo.) La ripozo donas al ĝi forton, simile al aliaj vivaĵoj, sed la daŭra laboro malfortigas ĝin kaj tamen ni ne kredas, ke ĝi vivas. Sed ĝi ne havas kunulon, masklon, ne plimultiĝas kaj sola rotacias ĉirkaŭ la Suno.

Ja ĝuste pro tio ĝi estas ŝatata, ĉar ĝi ne plimultiĝas. Ĉiuj homoj ŝatas aĉeti unu pecon, aŭ pli multe. Kelkajn el la pecoj oni registrigas al sia propra nomo. Pro tio, tiuj homoj estas perversaj, egoismaj, monavidaj kiam ili ŝatas la Teron. La urso ŝatas la arbarojn, la ĉamo la rokajn montojn, la sovaĝanaro la akvajn teritoriojn, la otidoj la ebenon, sed la monavidaj homoj volas posedi, la tutan Teron, ne nur ĝiajn erojn. Ili taksas la Teron, la Tero-patrinon, laŭ siaj egoismaj intereso.

Ni pensu nur pri niaj antaŭuloj. Unue ili serĉis nur la montojn, kie ili konstruis siajn fortikaĵojn. Poste ili volis okupi la valojn, kie estis verdaj paŝtejoj kaj en la riveroj estis multe da fiŝoj. Poste ili volis posedi la plugkampojn, kie ili ŝatis la cerealon. Sur ĉi tiuj lokoj ili volis posedi, la Kanaanon³⁴, kie regis riĉeco. Krome ili sopiris ankaŭ tion, kion la Tero enhavas kaj ili volis depreni el la tero la ŝtonkarbon. Kaj la homoj reiris al la Altlando. La homoj ĉi tiel migradas tien kaj reen, ili ne kapablas definitive ekloĝi.

Dum nia historio neniu sopiris iri al la Hungara Ebenaĵo. La bona tero de la departementoj Bácska³⁵ kaj Békés³⁶ ne logis la terkulturistojn kaj terbienulojn. Tiu loko estis marĉa, enhavis danĝerajn materialojn kaj la veturantoj mortis pro la tervaporo. Ĝi estis la antaŭĉambro de la tombejo, kiel oni nomis tiun regionon. Nur unu triono de la tramarŝantaj eksterlandaj soldatoj restis viva. Tien ĉi ankaŭ ne venis la malamiko. La marĉo estis perfekta fortreso, ĉar la malamiko ne povis proksimiĝi al ĝi. La itala sciencisto La Cattori skribas: „ĉi tiun landon konkeri

³⁴ Pri la Kanaano, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kanaano>

³⁵ Pri la regiono Bácska, bv. vidi la artikolon: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Bácska>

³⁶ Pri la departemento Békés, bv. vidi la artikolon: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Békés>

estas konsilata al neniu kiu volas pluhavi la vivon. Ĉefe al tiu malkonsilatas, kiu volus eniri ĝian internon, ĉar jam tio miraklo estas, ke la hungaroj ne mortas tie pro la mortigaj miasmoj. Povas esti, ke ili metas ajlon sub la langon tramarŝante ĉi tiun regionon.”

Pro ĉi tiuj kaŭzoj la tiama mastro menciis ne la teron de Torontal³⁷, sed rakontis pri la teroj de Rimaszombat³⁸, kie oni falĉas la herbon trifoje en jaro kaj la brasikkapo kreskas tiom granda kia la sitelo estas ĉe la rivero Rima. Poste ili menciadis la fekundajn terojn (grundojn) en la departemento Nyitra³⁹. Pri vitoj de Tokaj temis legendoj. En la departemento Heveŝ bonega estas la produktado de melonoj. Sed, inter la menciitaj la plej bona estas la tero de urbo Lőcse. Nome ĉi tie la tero donas bonan produkton de pizo. La saksoj de Lőcse kapablas produkti sur malgranda tereno multe da pizoj, kio estas granda havaĵo. Tio estas vera tero! Se iu homo havas tiom grandan terenon, kiom homo ĉirkaŭiras dum duontago, tiam tiu homo estas riĉulo.

La pizo estis grava planto. Tio estis la unua tera planto inter la similaj plantoj. La pizo estis la planto de la malriĉuloj kiel la rizo ĉe la ĉinoj. Se ne estis sufiĉe da vino, tritiko, tiam bona estis la avenpano kaj prunbrando, sed sen pizo la malriĉulo ne havis ĝojon. Tamen poste disvastiĝis la terpomo kaj la pizo senvaloriĝis kaj iĝis plantaĉo vulgara, ĝia sorto fariĝis sama kiel tio de la fagopira kaĉo.

Ne estas miraklo, ke en la florepoko de la pizo en Lőcse, ĉiuj homoj volis posedi ian grandan terenon, grandan aŭ malgrandan. Kiu homo ne havis plugkampon, tiun oni malalte taksis, vane tiu havis multe da oro, arĝento. La magistrato havis tiun politikon ĉiam, ke al tiu, ke Lőcse akiru liberajn terenojn, oni ĉiumaniere devas pliigi la limterenojn. Ĉiuj generacioj ĉi tion volis atingi. Sed akiri terenojn estis ege malfacile, ĉar tiujn havis la moŝtaj sinjoroj ĉirkaŭ Lőcse. Nome kompanse por la ricevita tereno la civitanoj de Lőcse devis servi, sed tio estus por ili humiliga pro ilia orgojlo. Ja ili akiris multe da privilegioj de la reĝoj. Nome Karlo Kramler, la nuna ĉefjuĝisto de Lőcse, anoncis dum iu kunveno (tuteŭrope oni konas la fanfaronadon de la Sunreĝo) en sia parolado: „Post la nobeloj de Venecio la civitanoj de Lőcse sekvas koncerne la rangon.” Pro ĉi tiu eldiro la nobeloj de la departemento koleretis kaj sinjoro Paŭlo Görgey dum la sekva kunveno replikis al la vortoj de la ĉefjuĝisto: „Kial volas la pulo tusi, ja ĝi ne havas pulmojn?”

³⁷ Pri la departemento Torontál, bv. vidi la artikolon:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Torontál>

³⁸ Pri la urbo Rimaszombat, bv. vidi la artikolon:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Rimavská_Sobota

³⁹ Pri la departemento Nyitra, bv. vidi la artikolon:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Nyitra_\(historia_departemento\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Nyitra_(historia_departemento))

La ĉefjuĝisto furiozis kaj mesaĝis al la vicprefekto de la urba hajduko: „Eĉ la hundoledo ne havas pulmojn, kiel ankaŭ sep prunarboj ne estas arbaro.” Sekve de tio ĉi la vicprefekto batigis sur la hajdukon, portanta la mesaĝon, dudek kvar bastonbatojn kiujn poste sekvis kontenteco.

En la 17-a jarcento la du estimindaj viroj estis en hundo-kata amikeco, kiu daŭris ankaŭ en la 18-a jarcento, sed ĉar la pasinta jarcento lasis post si mem malordon, ĉi tio estis bagatelaĵo. La homoj estis bonhumoraj dum la vespero de silvestro kaj en Lőcse kaj en Görgő, kvazaŭ ĉio estus en ordo, oni nur devis ankoraŭ surtabligi la varman, per sukero kaj spicaĵoj miksitajn alkoholan trinkaĵon, la vinon bruligitan antaŭ la gustumo, nomitan „krampampuli”, alinome la trinkaĵon de la diablo.

Kiuj matene ellitiĝis, aŭ kiuj ne ellitiĝis, ĉar ili ne enlitiĝis, tiuj trovis blankan mondon, ĉar tutnokte neĝis. La moŝtaj sinjoroj tiel aranĝis, ke unue la edzino deziru feliĉan novan jaron. Poste ili aŭskultis predikon de la pastro Podolinci. (Hodiaŭ li parolis bele.) Ili manĝis la kutiman rostitan porkidon. Estante ĉasantaj homoj, ili prenis siajn pafilojn kaj iris por mortpafi kelkajn sovaĝbestojn, ja tiuj havos malavantaĝajn situaciojn pro la vetero.

Ĉefe la leporojn trafis granda maljustaĵo. La Providenco donis al ili pelton similkoloran al la tero, pro kio ili povis esti nevideblaj. Ĉi tio estas dispono de Dio defendi la leporojn. Sed la naturo estas ruza! Ĝi faras vintre blankan teron kaj la malfeliĉa leporo fariĝos celtabulo jam de la malproksimo. Ĉu ĉi tio estas justa? Ĉu la diajn leĝojn oni malplenumas ne nur ĉi tie en la malsupro, sed tiu malobeo jam komenciĝas en la supro?

Sed se ŝanĝiĝus nur la vestaĵo de la naturo, sed tio estas la plej granda malbono, ĉar pere de sia kuro lasas spurojn en la neĝo tiu malfeliĉa leporo kaj la ĉasisto aplombe povas sekvi tiujn kaj ektrovi la malfeliĉan beston.

La vicprefekto ne ŝatis la bruajn ĉasadojn, eĉ lia celo ne estis la mortigo de la bestoj ne estis, li ŝatis prefere la vagadon en la naturo. La naturo refreŝigis lin, liaj nervoj trankviliĝis. Li ŝatis la naturon kiel la kredanto la preĝejon. Eĉ pli bone! Kiel iu amas sian amanton/amantinon. Li volis esti sola en la naturo, ĉar nur tiel, ĝenata de nenio, ĝi povis montri siajn ĉarmojn al li.

Tuj posttagmeze li surmetis botojn el jufto kaj sola ekiris al la kamparo. Sed ne tute sola, ĉar du hajdukoj, Preston kaj Steĉjo Kovács, iris kune kun li. Ambaŭ portis kun si pafilojn antaŭpreparitajn, por pafi. Iu pafilo estis taŭga por pafi grandan sovaĝbeston (lupon, apron), la alia estis taŭga por pafi leporon, perdrikon. La pafiloj estis tutmodernaj per radaj kulaŝoj proviziitaj, sed la brulanta meĉo estis elmodiĝinta, ja la fajroŝtono puŝiĝis al la ŝtalo plato estiĝis fajrero, kiu ekbruligis la pulvon. La societon kompletigis unu halthundo nomita Fityke (fitjke), favorata de Paŭlo Görgey.

Ili transiris la kampovojon Harička kaj preteriris la restadejon de la karbigistoj, situanta ĉe la du arbaroj nomitaj Nahore kaj Jazarec al la urbolimo de Lőcse. Ili vidis spurojn, sed ne sovaĝbestojn. Ili povis distingi la spurojn de lupo, leporo kaj cervo, sed Preston konstatis iuloke, ke tiuj estas spuroj de urso. Tiu urso tamen ne estas inda por sekvi, ĉar la vojo kondukas al la monto Tarlik, kie la padon kovras granda neĝtavolo. Dum tio la hundo Fityke⁴⁰ indiferece ambilis apud Paŭlo Görgey, ja ĝi ne sentis odoron de sovaĝbesto.

Paŭlo Görgey kolere diris:

– Tiel ŝajnas, ke neniun beston ni mortpafos hodiaŭ. Nun estas la unua de januaro. Se hodiaŭ mi mortpafos nenion, tiam tutjare mi ne havos feliĉon dum la ĉasadoj.

Sammomente el la arbaro Nahore aperis belega damao, portis la svelta korpa besto riĉegan kornaron. Fityke kuris iom antaŭen, poste haltis, alrigardis sian mastron, kvazaŭ ĝi signis al li per siaj saĝaj brunaj okuloj. La damao estis ekster la trafdistanco kaj kiel sago rapide galopis al la arbaro „Klokoĉ”. Tiu arbaro estis pli ol dek arpentoj meze de la plugkampoj kiel unu veruko sur juna vizaĝo. Tie junaj arboj kreskis dense unu apud alia. Tiu loko taŭgas por fazanoj, sed ne por cervo, ja por la kornaro ne estas sufiĉe da loko.

Paŭlo Görgey subite interŝanĝis sian pafilon kun tiu de Steĉjo, per kiu li povas pafi grandan beston. Li ekiris al „Klokoĉ”. Li iris al la densejo pretigante sin por pafi. Li iris inter la neĝaj arbobranĉoj atentante la spurojn ekscitite. Sed subite du pafoj aŭdiĝis kaj pro homaj voĉoj nuligis la silenton de la arbaro.

Li ektimis. Kio povas esti tio? Li sekvis la spurojn de la cervo, kiuj forlasis la malgrandan arbaron. Aliflanke de „Klokoĉ” li vidis klare, ke tie saksaj ĉasistoj estas kune kun siaj pelistoj, kiuj ĝuste nun deflankiĝis de la vojo por komenci la rondĉasadon.

– Jen! Ili jam mortpafis nian damaon. – kriis Preston.

Ili havas stultan feliĉon – diris la vicprefekto. – Ankoraŭ ili ne komencis la ĉasadon kaj jam mortpafis grandan beston. Mi envias, ke ili havas tiun grandan kornaron.

La belega besto kuŝis senvive ne malproksime de la betotero de Paŭlo Görgey laŭ la rivereto Durst, sed jam ĉe la limo de Görgő. Tiel ŝajnas, ke la organizantoj de la ĉasado estis okupitaj pri la organizado kaj pro la neatendita kaptaĵo konfuziĝis kaj tre ĝoje ili ĉiuj kuregis al la mortinta besto. Nur la fuŝĉasisto kapablas ĝoji pro unu feliĉa pafo.

Ili estis tiom proksime, ke ili estis rekoneblaj. La malgranda maldika homo estis sinjoro Kramler, kiu portis ĉapelon el lutroledo kaj drapovestaĵon. La longan barbon kaj maldikajn ŝultrojn havanta sinjoro estis Trik la urba notario, la dika

⁴⁰ La hundo-nomo Fityke elparolendas: fitjke.

verdmantela sinjoro estis Matiaso Brever, tie estis Jozefo Gigles la apotekisto, Laŭnrenco Gref la oraĵisto kaj sinjoro Andreo Nustkorb la sinjoro senatano.

Paŭlo Görgey rekonis la juĝiston, kiun li koleras, kaj ĝuste volis returni sin, sed Fityke elsaltigis iun leporon el la fluejo de la frostiĝinta rivero Durst. Ĝi pelis la leporon havante bonan flaron kaj trapelis ĝin al tereno de la urbanoj de Lőcse.

Paŭlo Görgey kolere fajfis al la halthundo por revoki, sed la hundo kuris al sia malĝoja destino. En la sekva minuto la juĝisto pafis kaj la malfeliĉa hundo dolore hojlegis kaj senvive terenfalas. (La leporon Matiaso Brever mortpafis.)

Paŭlo Görgey iĝis mortpala pro la vidaĵo, poste li ruĝiĝis pro la liberiĝinta furiozo. Li kuregis antaŭen, sed poste ekhaltis ĉe la rivereto kaj per la pafilo celis al la juĝisto de Lőcse.

– Hundon por hundo! – li stentoris tute tremetante kaj pafis.

La juĝisto vekriis kaj falegis sur la neĝon. Paŭlo Görgey nur tiom vidis el la tuto, kaj dignoplene, aplombe li ekiris hejmen. Li ne parolis dumvoje, nur li rapidis nekutime. La hajdukoj postiris lin malfacile. El la arbaro Nahore sekreta muĝo eliĝis. Ili rapidiris denove ĉe la rivereto Durst, kie la sekaj kanfolioj susuris kaj la sangoruĝa sundisko komencis malsupreniri. Hejmenalvenante Paŭlo Görgey iĝis ĉiam pli kaj pli nerva kaj hejme ordonis al la hajduko Kovács⁴¹:

– Enseliĝu tuj kaj eksciu, kio okazis pri la juĝisto kaj faru raporton.

Tio okazis, ke la kuglo trafis la juĝiston penetrante inter la trian kaj la kvaran ripojn, laŭ la protokolo. La pelantoj kaj la ĉasistoj tuj alkuregis la juĝiston, sed estis nekredebla, ke ili ne klopodis ĉesigi la sangadon kaj bandaĝi la vundon. Anstataŭ tio la sinjoroj komencis konsiladi flustradante. Sinjoro Andreo Nustkorb direktis la interkonsiliĝon. Sed Matiaso Brever ne partoprenis la interparolon, prefere li ekscitis la pelantojn.

– Iru, do! Postiru lin, kaptu la rabmurdiston!

– Ne saĝumu! – admonis Matiason sinjoro Nustkorb. – Ja se ni aŭdacus kapti la vicprefekton, tiam la urbo havus malbonajn ŝancojn.

Ili interparolis kelkajn minutojn, poste subite tri sinjoroj levis la vunditan juĝiston Kramler kaj kuris kun li al la teroj de Paŭlo Görgey. Nustkorb prenis lian kapon, Gyglesz (gigles) lian talion kaj Greff liajn piedojn. La malfeliĉa vundito petpetis por permesi morti neĝenate, sed ili pene portis lin ĝis „Klokoĉ”, tra la betoteroj. Ĉar la sango daŭre gutis, ĉie estiĝis ruĝa linio sur la neĝo. La juĝisto havis fortan doloron kaj la sango fluis el lia buŝo. De tempo al tempo li ekkriegis, pro kio la sango pli forte fluis. Sed la saksaj sinjoroj obstine plu portis lin kuregante ĉirkaŭ „Klokoĉ” kaj iris al la landvojo. Kiam la korpo komencis malvarmiĝi, malpliĝis la sangado, la okuloj komencis fermiĝi, jam malmulte da vivsignoj estis en li.

⁴¹ La familio-nomo Kovács elparolendas: kovaĉ.

– Premadu iom lin, sinjoro Gyglesz – admonis lin la senatano.
– Mi ne estas ekzekutisto – protestis la apotekisto – mi faras ĉion por mia urbo, sed tio estas kruelaĵo.

– Ej, mi ne tiel komprenis, vi ne kaptu la sencon tiel. Ni estas viroj. Li laboris por la urbo kaj la plej bela fino estas se li mortas por la urbo. Nia devo estas helpi lin al la morto.

Kaj li mem fleksiĝis suben kaj premadis la ingvenon de la juĝisto, pro kio la sango komencis pluvece aspergi, sed jam pli malforte ol pli frue. De nun jam nur disŝutitaj ruĝaj makuletoj signis sur la neĝo la specialan vojon de la juĝisto de Lőcse. Post ne longa tempo la sangado tute ĉesis. La juĝisto de Lőcse estis mortinta.

– Li mortis. – ĝemis sinjoro Nustkorb rigardante la mortinton kaj la neĝon. – Lia kariero finiĝis. Ni demetu lin sur la teron.

Li demetis respektplene sian ĉapelon kaj paŝis al la mortinto.

– Pacon al vi! – li diris respektplene. – Bedaŭrinda estas, ke via moŝto ne havis pli multe da sango!

Post tio li vokis la pelantojn kaj sendis la pordeggardiston sinjoron Kadulik en la urbon, ke li venigu sledon por hejmenporti la korpon de la juĝisto. Poste al la aliaj ĉeestantoj li oratoris kiel senatano de Lőcse:

– Ĉeestantaj civitanoj de Lőcse! Mi admonas vin, ke vi mezuru tiun teron per paŝo, aŭ per faldebla mezurilo, kiun la sango de la juĝisto ĉirkaŭbaris. Laŭ mi tiu tereno estas 34 arpentoj.

Se tio estas pli malgranda, eĉ tiam ni povas fari la ceteron, ja li havis malmulte da sango, do per tio ne eblis ĉirkaŭbari pli grandan terenon.

– Vane drinkis tiom multe da ruĝa vino la kompatindulo – interparolis Miĥelo Trik.

– Lia korpo estis troe malgranda – daŭrigis la senatano – sed li havis multe da menso. Bedaŭrinde estas, ke la menso ne estiĝis sango en la lasta momento. Ni faris ĉion eblan. Ni povas reporti lin en la urbon fiere. Sed bone konsideru ĉi tiun lokon, ke dum la inspektado de la okazejo vi atestu la menciitan grandecon de la tereno. Ja la spurojn la pluvo, aŭ neĝo povas malaperigi. Nome ĉi tiu tereno fariĝis tereno de Lőcse akirita per sango. Kaj vi, sinjoro Trik bonvolu fari protokolon pri la okazintaĵoj kaj skribu en ĝin la nomojn de la ĉeestantoj.

Ĉi tiu estis kruela kaj nekredebla afero, sed krome ankaŭ naiva kaj mirinda. De tiam ankaŭ nun Lőcse havas tiun teritorion. Sed se rigardi la historion, Andreo Nustkorb pravus, kiu tre konis la realajn rajtojn de la saksoj kaj kiel urbano de Lőcse kaj senatano ĉiamaniere klopodis pliiĝi la potencon de la urbo.

Estu estimo al la menso de Nustkorb – do, tio okazis tiel: kiam oni signis la limon de Lőcse tempe de la reĝo Károly Róbert (karoj robert)⁴², Lőcse havis pli malgrandan areon, ol nun. La tiama juĝisto de Lőcse, Jobo, filo de Petro, ne estis kontenta pri la grandeco de la areo. Pro tio kun delegitoj li vizitis la reĝon en Visegrád⁴³ kunportante humilan peticion. Laŭ tiu li komunikis, ke ili ricevis la areon etendiĝantan ĝis la granda ŝtono, sed tiun oni devus signi ĝis la parcelo Marovka. Ja ili defendis la areon ĝis Marovka, la transajn la departemento. La infanteriaro de la urbo forpelis la armeojn de la terbienulo Mateo Csáky ĝis Marovka estrita de la ĉefjuĝisto, Jobo, filo de Petro. Li tie vundiĝis kaj Gregorio Trebej, Nikolao Hain kaj Tomaso Zellerberh: soldatoj de la reĝo, alhelpis al tiu, dirante, ke tiu sangas, ja li vidis la sangon sur la tero ĉe la parcelo Marovka, ktp.

Lia moŝto la reĝo laŭŝajne favore akceptis la delegitaron de Lőcse, legante ilian humilan petegon kaj kiel instrukcion subskribis la peticion: *„Effusio sangvinis judicis Lewcho-viae terrae adquisiliones vigorem obtineat.”* / *„Al sango de la ĉefjuĝisto de Lőcse teron akiranta rajto donendu.”*

Jam ekokazis la pligrandigo de la tereno de Lőcse. Instrukcio de la reĝo estos utila, ĉu ne, oni metis ĝin inter la privilegiojn, kiujn donis la reĝo Stefano la kvina. Tiujn privilegiojn la sekvaj reĝoj aprobis, kvankam kelkaj reĝoj sen rimarko subskribis. Tiukaze la afero estis en ordo.

⁴² Pri la hungara kaj kroata reĝo Károly Robert, vi povas legi ĉe:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Karolo_la_1-a_\(Hungario\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Karolo_la_1-a_(Hungario))

⁴³ Pri Visegrád vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Visegrád> – pri la tiea fortikaĵo: https://eo.wikipedia.org/wiki/Fortikaĵo_de_Visegrád

6-A ĈAPITRO

La urbo Lőcse funebras

En la urbo Lőcse kiel fulmo disvastiĝis la famo pri la fama ĉasado, kion la malfruaj generacioj tiel menciadis, ke „dum tio mortpafiĝis unu cervo, unu hundo, unu leporo kaj unu juĝisto“. Kadulik la gardisto de la pordego de la urbo, kiu hejmeniris por porti sledon al la loko de la evento, serĉis la urban mastron de la sledo, en kelkaj drinkejoj por jungigi kaj dume li disvastigis la novaĵon sur la stratoj.

– La juĝisto mortis. La vicprefekto mortigis la juĝiston. Defalis la krono de la urbo! Ploru loĝantoj de Lőcse!

Granda indigno kaj kaoso estiĝis. La homoj elvenis el siaj domoj, iliaj vizaĝoj estis palaj. Kio okazis? Kiu mortigis lin? Kiel oni mortigis la juĝiston? Kiam okazis? Kial okazis? Vortoj de la pordeggardisto estis pli gravaj, ol vorto de iu episkopo. Sed li ne havis tempon por babili, sed kurante serĉis ĉie la urban mastron, Kristoforon Unglad. Finfine li ektrovis tiun en la rinkejo nomita Pacsirta⁴⁴, tiu drinkadis vinon de Serednje kaj diskutadis kun komandanto de la fortikaĵo. Tiu aŭdante la vortojn de Kadulik, ekkriis:

– Kadulik, vi estas ebria! – Li eksaltis kaj levis la manon por vangofrapi, sed li en la sekva momento terenfalas. Montriĝis evidenta, ke ankaŭ Kristoforo estas ebria.

Dume la homamaso sur la strato senkonsile ondiĝis kaj la homoj demandadis unu la alian pri la okazintaĵoj. La ektimigitaj senatanoj, portantaj ornamitan pelton, kaj patricioj klopodis iri al la urbodomo. Sub la arkadoj estis granda tumulto, iun infanon oni preskaŭ mortotretis. Kelkaj, ĉefe la junularo, klopodis eliri tra la pordego de la urbo. Dume unu junulo nur malfacile povis trairi la homamason.

– Baldaŭ mi portos informon – li diris al la konatuloj.

Li estis belega plaĉforma fraŭleto, portanta ondan hararon kaj ĉapelon el mustelkata led, malhelverdaj veŝtoj ĝisfine butonigitaj, streĉaj pantalonon kaj flavajn botojn. Krome li havis germanan mantelon. La homamaso rekonis lin kaj flustradis, ke li estas la juna Fabricio.

– Li rajdas bele – oni diris, kiam li forraĵdis el la homamaso.

Multe da homoj ne kredis la famon. Ili pensis, ke iu bubaĉa nenifarulo volas blagi la urbanojn. Kiu kuraĝus mortigi la juĝiston de Lőcse? Sed jen, iu sledo glitas inter la homamason. Sur tiu sidas du sinjoroj, Grosnovicer kaj Brūneck⁴⁵,

⁴⁴ Pacsirta (paĉirta) estas birdspecio kaj ĝia esperantonomo estas: Alaŭdo.

⁴⁵ La familio-nomo Brūneck elparolendas: brunek, brinek.

konsolistoj. Ankaŭ alia sledo postiris tiun, sur kiu hajdukoj sidis kaj lumigis per torĉoj kaj rapide iris. Ho, ve! Dio mia! Ĉu tio estas tamen prava?

En la gardoturo eksonis tamburado kaj klarionado. Tiuj signas la sunsubiron kaj oni devas fermi la pordegojn de la urbo.

Kelkaj altrovis sinjoron Kadulik, la pordeggardiston, kaj ĉiuj volis aŭdi lin. Multe da homoj kolektiĝis ĉirkaŭ li. El la domo de Thurzo iu portis tablon, sur tiun oni starigis sinjoron Kadulik por rakonti. Sed li jam estante ege raŭka, ne kapablis paroli, eĉ lia patrino estus nekompreninta lin. Li nur gestadis per la manoj, ke la juĝisto mortis kaj montris, ke la kuglo penetris inter la ripojn (kaj li minacis la departementdomon, ĉar la mortiganto venis de tie).

Vesperiĝis. Estis nebulo. De la monto Scheiben⁴⁶ malvarma vento blovis. La famoj ĉiam ŝanĝiĝis, plivastiĝis. La nervoj de la homoj estis streĉitaj. La senatanoj kaj patricioj estis en la urbodomo, sed neniuj sciis diri certajn detalojn.

Finfine novaj ĉevalhufbatoj aŭdiĝis. La juna Fabricio revenis post mallonga tempo. Ne estas miraklo, ja li iris rekte al la celo, ne sur la serpenta landvojo. La homoj estis scivolaj, atendente la junan rajdanton. Finfine li haltigis la ŝvitantan ĉevalon ĉe la homamaso.

– Ni aŭskultu lin!

– La famo estas prava! – kriis Fabricio laŭtege. – Juĝisto de Lőcse estas mortinta!

La homamaso murmuregis, kelkaj ululis apenaŭ kompreneme.

– Nu, ĉi tiu jaro komenciĝas bone!

– La urbo estas profanita!

– Kiu mortigis lin? Kiel okazis la evento? Ni volas aŭskulti!

– Hundo de la vicprefekto kuris al la tereno de Lőcse. La juĝisto mortpafis la haltantan hundon kaj pro tio la vicprefekto mortpafis la juĝiston.

– Kio okazis pri la vicprefekto? – kriis kelkaj.

– La fiulo fuĝis hejmen al Görgő. – respondis Fabricio al la demando.

La homoj indignante kriegis. Tio estas honto kaj malhonoro! Ja ankaŭ la aliaj havis pafilon. Kiuj estis ankoraŭ tie? Kiuj estas tiuj malkuraĝuloj? Bonvolu nomi tiujn, sinjoro Fabricio!

Sed la juna Fabricio ne volis daŭrigi la paroladon. Li instigis per siaj genuoj sian ĉevalon por iri al la urbodomo.

Sed sammomente iu mano ekkaptis la buŝferon de la ĉevalo.

– Kion vi volas? – la junulo draste alkriis surprizite tiun. – Tuj lasu tiun buŝferon!

– Ne, ĝis mi parolas kun vi, bubeto!

⁴⁶ La monto-nomo Scheiben elparolendas ŝajbn.

La alia junulo, la alia juna bubo, portata hungarecan bekeŝon, aglopluman pintan felĉapon kaj glavon, estis ege ekscitita. Fabricio neniam vidis tiun vizaĝon, sed estis evidente, ke tiu estas sinjoreto.

– Kion vi volas de mi? – Fabricio demandis nun hungare. Ĝis nun la parolado okazis germane.)

– Mi volas komuniki al vi, se vi estas nobelo, tiam vi donu kompenson al mi pro tio, ĉar vi nomis fiulo la vicprefekton Paŭlo Görgey. Tion mi ne toleras.

– Ĉu vi ne toleras tion? Kiu vi estas?

La juna bubo orgojle levis la kapon:

– Mi estas Georgo Görgey.

– Ĉit! – Fabricio interparolis rapide – ne diru laŭte vian nomon, ĉar tio nun povus esti danĝera. Kontraŭ tio, ke mi ne estas nobelo, mi estas Fabricio, filo de civitano de Lőcse, sed ni povas skermi unu kontraŭ alia, se vi volas tion. Kie estu la ejo de la skermado?

– En la vepro malantaŭ la ĝardeno de la urbo, matene.

– Je kioma horo?

– Je la sepa.

– Mi estos tie – diris Fabricio.

Poste Fabricio iom levis sian ĉapelon kaj igis sian ĉevalon pluiri. Sed li ne atingis malproksimen, ĉar ĉe la domo de la departemento preskaŭ sieĝanta homamaso haltigis lin. „Pereu Paŭlo Görgey!” – kriadoj aŭdiĝis kaj knarante subfalas kiel rubaĵo la vitroj de la fenestroj de la departementdomo. Grodkovsky fermigis la pordegon, sed dume li portigis du malgrandajn kanonojn (alinome Haken-ojn) sur la balkonon, kiujn kiel timigilojn li direktigis al la homamaso. Baltazaro, aperis apud la du malpezaj kanonoj en kiraso, surkape li portis ŝirmkaskon.

– Kiu volas brui kaj miskonduti, tiu iru hejmen – li kriis al la homamaso – ĉar aliokaze malbono estos. La kaŭzitan damaĝon la urbo pagos.

– Pereu Paŭlo Görgey!

– Sinjoro Paŭlo Görgey, la vicprefekto ne estas ĉi tie, ĉar se li estus ĉi tie, tiam vi jam ne estus ĉi tie.

Grandega ŝtonĵetado sekvis la respondon, sed Baltazaro ridis en la kiraso, kiun el la arsenalo li portis por tiu ĉi celo.

Samtempe la senatano grizharara Ambrozio Moŝtel aperis sur la balkono de la domo. Li estis la plej maljuna konsilanto. Lia longa hararo flirtis fantomeske en la lumo de du torĉoj. Kvazaŭ Barbarossa⁴⁷ estus alveninta, atendita de la germanoj okaze de danĝero. Sed lia barbo griziĝis kaj estis pli mallonga, ol de tiu en la

⁴⁷ Pri Frederiko Barbarossa vi povas legi ĉe:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Frederiko_la_1-a_\(Sankta_Romia_Imperio\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Frederiko_la_1-a_(Sankta_Romia_Imperio))

legendo. Sed ĉar la sonorileto ne estis ĉemane, malplenan glason li batadis laŭ saksa kutimo per sia poŝtranĉilo. Ties sono similis al kulozumego, sed tio havis rezulton.

– La maljuna Moŝtel volas paroli. Estu silento! Aŭskultu la maljunan sinjoron Mostel!

Iĝis templa silento, nur la ventoflago krakis sur la turo de la domo. La maljunulo alparolis lace, malfortvoĉe, ja li havis malmulte da dentoj, sed la homoj transdonis la vortojn unu al alia, se iu ne bone aŭdis, do tiu kompletigis tiujn laŭ sia bontrovo.

– Miaj infanoj! Disiĝu en paco! Fakto estas, oni diras, ke nian urbon trafis maljustaĵo, sed nun ni ne scias kiom granda estas ĝi. Ni ne konas la cirkonstancojn. Fidu je ni kaj ni ektrovos la respondeculojn. La senatoroj de la urbo gardos la indecon de la urbo. Ne faru anstataŭ unu malbono ankaŭ alian malbonon, sed iru pace en viajn domojn kaj prefere kantu psalmojn. Se vi ĉi tie restados plue, tiam Dio min tiel helpu, mi iros inter vin kaj per tiu ĉi kana bastoneto batos vin kaj sur kiun mi batos, sur tiu estos ne nur la spuro de la bato, sed ankaŭ tiu de la honto. Bonan nokton, infanoj!

Nur suvereno povas paroli per la jena superemo kiel la maljuna Moŝtel, kiu poste trankvile turnis sin kaj retiriĝis en la konferencejon. Li sciis, ke liaj vortoj estos bonefikaj. Kaj fakto estas, ke la senbrida homamaso komencis disiĝi, kvazaŭ ili estus elbalaitaj de tie.

En la konferencejo ĉiuj senatanoj ĉeestis. ankaŭ Antonio Bibera, kiu havis podagrajn piedojn, alvenis. La ejo ne estis hejtita, neniuj demetis la pelton, ili ne sidiĝis sed iradis tien- reen grumbladante pro la okazintaĵoj kaj atendis la aŭtentikajn informojn. La juna Fabricio enmesaĝis pere de la hajduko, tiu aliokaze okupiĝanta per la ekbruligo de la fajroj en la fornoj, ke li venas de la scenejo de la okazintaĵo kaj demandas: ĉu li povas enpaŝi en la ĉambron de la senatanoj?

– Jes! Jes! – ili kvarope kriis samtempe kaj Stefano Hulik kuris antaŭ la junulon, sed Moŝtel reordonis lin.

– La senatanoj – diris li dignoplene – neniam povas ektimi, miri, do vi ne estu senpacienca. La mondo povas turniĝi, povas estiĝi okazaĵoj, sed la senatanoj povas agi laŭ la ebloj. Pro tio ĉi vi restu senmova, ja tiu junulo povas enveni ankaŭ sen via kuro antaŭ lin.

Fabricio aperis antaŭ la senatanoj kaj detale raportis pri la viditaĵojn. La patricoj mute aŭskultis lin, nur iliaj vizaĝoj iĝis ĉiam pli kaj pli blankaj, kiom oni povis vidi tion en la lumo de la malfortlumaj vakskandeloj.

– Tio ĉi estas granda plago! – lamentis Miĥelo Pálfalvi. – Ne vane mi sonĝis pri tio, kvazaŭ mi estus en iu marĉo nokte kaj mi estis kaptadinta en ĝi kankrojn.

Bibera nerve per sia lambastono bategis sur la plankon:

- Mi mem mortigos tiun homon, se aliulo ne volos fari tion.
- Ne diru facilanimajn deklarojn – ordonis sinjoro Moŝtel – precipe antaŭ fremduloj. (Poste li turnis sin al Fabricio.) Nun vi povas foriri, mia fraĉjo. Vi bone faris, ke vi anoncis la viditajn. Sinjoro Pálfalvi, bonvolu iri al la sledo portanta la mortinton kaj ordonu porti ĝin ĉi tien.
- Ĉu ĉi tien? Kial? – saltis antaŭen Johano Kripeji. Ja tie ĉi okazos la kunsido de la konsilantaro.
- Ĝuste tial. La kunsidon ni aranĝos en la ĉeesto de la mortinto. Ni devas malfermi la ĥorejojn.
- Sed la konsiliaj kunvenoj ne estas publikaj – kontraŭis sinjoro Hulik.
- Jes, sed nur kaze de ordo. – interdiris la kadukulo, kiu klopodis esti potenculo.
- Sed tio ĉi estas eksterordinara kazo. Nome oni mortpafis la juĝiston de Lőcse kaj ĉiuj Lőcse-anoj havas mortinton kaj ĉiuj homo povas enveni al sia mortinto.
- La senatanoj jesis kapbalance. Ja sinjoro Moŝtel komprenas sian taskon.
- Do, oni malfermis la ĥorejojn. Lia mesaĝo pri tio disvastiĝis kiel fajro en pajo. Pro tio estiĝis granda tumulto. La hajdukoj apenaŭ kapablis reteni la homamason por fari ordon. Ĉiuj klopodis veni en la ĥorejon. Sinjoron Donat Mauks senatanon, la solan nobelon, la aliaj suspekteme rigardis, kiu sekrete apogis la departementdomon, sed por liberigi sin de la suspekto, nun li ordonis al la hajduko, ke gravedajn virinojn kaj nobelojn oni ne lasu iri al la ĥorejoj. Kvankam tio estis superflua dispono, ĉar tiam jam estis tie multe da homoj sidantaj unu sur la alia, kiel abeloj. Bibera okupiĝinta pri la publikmoralo, kuntiris la faltojn de sia frunto, vidante la homamason. Kial oni lasis enveni tiom multe da homoj, ja kiel figoj la kunpremitaj viraj kaj virinaj korpoj, en ĉi tiu stato povas vekti punendajn pensojn en rondo de la loĝantaro kaj neniigeblas la pudorojn, kion li elformis en la homamaso dum sia duonvivo. Kaj vere estis harstariga vidaĵo, ke la malplirangaj junedzinoj kaj fraŭlinoj havas bedaŭrindan situacion (se oni vere devus bedaŭri ilin), ĉar en la homamaso ili estis puŝadantaj tien kaj reen. Ili sidis ofte sur sinoj de viroj, aŭ sur genuoj de tiuj. Kaj ne eblas riproĉi ilin, ja ili ne povus eliri pro la tumulto, vane oni dezirus tion. Kvankam oni ne volonte riproĉas ilin.) Estas fakto, ke la dispono de Moŝtel ne estis racia, ĉar multfoje aŭdiĝis iu virina ŝriko, signante, ke multe da fiuloj kondutas petole kun iu homino maldece, sed multe da kondutoj okazas sen ŝrikoj.
- La senatanoj apenaŭ kapablis admoni la homojn estantajn sur la ĥorejo.
- Estu silento! Ĉu vi ne hontas pro la ridado kiam mortinton havas la urbo? Kiu faras iun delikton, tiun mi sendos en karceron.
- Efike de lia demando iĝis iometa silento, sed ankaŭ pro tio, ĉar alvenis Kristoforo Unglad (li sufiĉe frue iĝis sobra). Li forigis la verdan drapon de la tablo. Baldaŭe venis senatano Pálfalvi kaj anhelante diris:
- Ili alvenis!

La du gardistoj starantaj ĉe la pordego malfermis la pordon dupartan, la malvermega aero fluis en la ĉambregon. Sinjoro Nustkorb enpaŝis, lia ĉasvestaĵo estis sanga kaj malseka. Li portis ĉasbotojn kaj estis ŝvita. Postiris lin Sebastiano Trik, Davido Gosnovicer kaj Mateo Brüneck. Iliaj vizaĝoj estis ruĝaj pro la malvarmega vetero, pro kio ili diferencis de la ĉi-hejme estantaj senatanoj.

Ĉiuj okuloj rigardis fikse al la pordo. Nun en la ĉambrego estis tuta silento, pro kio oni povus aŭdi eĉ la zumadon de muŝo. Ĉiuj frostotremetis, dum kvar hajdukoj enportis sur iu krada portilo la juĝiston, kiu estis kovrita per la verda drapo forigita pli frue de la tablo. Nur lia kapo estis videbla.

– Metu lin ĉi tien! – ordonis sinjoro Moŝtel, montrante iun etan tablon, kiu estis malantaŭ la seĝo de la prezidanto, poste turnis sin al la hajduko.

La hajdukoj metis la mortinton tien.

– Vi rajtas foriri!

La konsilianoj mute, rigidiĝinte rigardis la mortintan juĝiston, sed la neŭrasteniaj homoj forturniĝis. La ventoblovo estingis la kandelojn. Sebastiano Trik klopodis relumigi tiujn. Estis turmenta silento. Nur sur la ĥorejo komenciĝis mallaŭta parolado, ke la karmemora homo estis honestulo kaj lia edzino havis feliĉon, ĉar ŝi ne devis ĝisvivi la morton de sia edzo. Ŝi mortis somere. Ĉu havaĵo restis post la edzo? Kiu havos lian havaĵon? Nome ili ne havis infanon kaj parencaron. Evidente estas, ke la urbo heredos tion.

Sinjoro Ambrozio Moŝtel nun iris al la mortinto, demetis de tiu la kovrilon, unu momenton rigardis tiun, poste denove kovris tiun. Li tuj sidiĝis en la seĝon de la prezidanto kaj mansignis al la aliaj, ke ili sidiĝu en la gotikstilajn seĝojn. Ĉe la fino de la tablo sidis Sebastiano Trik metinta antaŭ sin la inkujon faritan el ligno kaj la skribilojn. Li prenis blankan anserplumon por skribi per tiu, sed poste forĵetis ĝin kaj serĉis nigran skribilon.

La maljuna Moŝtel ekstaris, atendante ĝis Davido Gosnovicer finos la tusadon kaj poste li komencis paroli tremvoĉe:

– Miaj prudentaj sinjoroj, nobla konsilantaro de Lőcse! Ni ĉiuj kunvenis nun, sed bedaŭrinde estas, ke unu homo mankas. Kvankam nur lia korpo estas ĉi tie, ĉar lia animo flugis al la ĉielo pro iu malfeliĉa okazintaĵo.

– Ne preterparolu via moŝto – interparolis la eterne kontraŭanta Mateo Brüneck – diru hungare klare, ke iu mortigis lin.

– Mi decidas mian parolon, kiu devas esti simila al tio de la Biblio – li diris dignoplene. – Ĝis nun mi vidas tion, ke juĝisto de Lőcse ĉeestas, sed lia animo ne estas ĉi tie. Pro tio mi malfermas la hodiaŭan kunvenon anstataŭ li kiel la plej maljuna konsilanto, laŭ niaj leĝoj. Kiel okazis lia morto? Andreo Nustkorb estas kompetentulo kiel atestanto por raportoj aŭtentike. Pro tio ĉi mi transdonas la vorton al li por raportoj pri la okazintaĵoj.

– Ni aŭskultu!

Sinjoro Nustkorb ekstaris kaj detale raportis pri la malfeliĉa kazo. Li tiel komencis la raporton, ke jam antaŭ Kristnasko diskutis la estroj de la urbo kaj la departemento. Kvankam la juĝisto mortpafis la hundon de la vicprefekto, do li komencis, tamen ĉar tiu pafo povis esti ankaŭ trorapidado, povis esti mallerteco, ke li volis pafi al la leporo, kiun la hundo jam preskaŭ atingis.

– Ĉu kaj poste? – interparolis sinjoro Donat Mauks.

– Mi nur tion rimarkis, ke post kelkaj momentoj sinjoro juĝisto vekias kaj falas surteren. Ni kuris tien instinkte, sed ni ne sciis pri pafo de la vicprefekto. Ni konstatis nur pli malfrue, ke la vicprefekto pafis. Iu inter ni proponis, ke ni iru post li kaj mortpafu lin.

– Tio povus esti la plej saĝa afero – opiniis Antonio Bibera, – nun ja, ni estus pli trankvilaj pri la departemento.

Nustkorb skuis la kapon.

– Ni ne povus esti kvitaj kaj tiuokaze la afero ne povus esti plej saĝa. Ĉar se ni estus mortpafintaj la vicprefekton, tiam povus komenciĝi disputo inter la urbo kaj departemento. Nun estas pli malmulte da disputoj, nur la urbo estas malesperiĝinta. Tio ne povus esti la plej saĝa afero, ĉar ne estas permesate kompensi unu satanan faron per alia satana faro, krome...

– Tio povus esti laŭrajta, se oni estus kaptinta lin ĉe la freŝa faro – interparolis grumblante Miĥelo Pálfalvi.

Efike de tio ĉiuj aplaŭdis ĉirkaŭ la tablo kaj ankaŭ sur la ĥorejo.

– Krome – daŭrigis Nustkorb senĝene – en niaj pafiloj estis nur ŝrotoj kaj dum kio ni estus metintaj kuglojn en niajn pafilojn, Paŭlo Görgey jam povus esti malproksime trans la pafdistanco.

– Hm – murmuris Bibera demetante sian pelton, nome en la ĉambrego la aero komencis varmiĝi. – Ĉi tio estas jam konvena kaŭzo, ĉar Via moŝto diris ĉi tion unue.

Sinjoro Davido Gosnovicer komencis tusi spasme, lia vizaĝo iĝis ruĝa, sed li mansignis, ke li volas paroli. Sed tio povis okazi nur tiam, kiam Sebastiano Trik batadis la dorson de la konsilanto.

– Mi ne akuzas sinjoron Nustkorb, ĉar li ne mortpafis la vicprefekton, ja Lőcse estas sufiĉe potenca por puni la plej rangon homon. sed la urbo ne estas taŭga por redoni ties vivon, kiun oni lasis morti facilanime.

Ĉirkaŭ la tablo estiĝis maltrankviliĝo. La senatanoj rigardis unu la alian, ili miris, ĉar ili ne komprenis la aŭditaĵajn.

– Mi nur haste paroladis kun kelkaj pelantoj – daŭrigis Grosnovicer – sed la tempo estis mallonga kaj tiuj estis sufiĉe naivaj. Pro tio ne estis tempo pli bone informiĝi. Sed tio estis evidenta, ke okazis horora procezo pri la vundita juĝisto, ĉar ne estis bandiĝitaj liaj vundoj, la sangadon oni ne klopodis ĉesigi. Plie ili levis

lin kaj kuradis kun li kiel frenezuloj ĝis lia sango forfluis, nome ili memvole mortigis lin.

Ĉi tiam Grosnovicer denove komencis tusi, sed nun jam Sebastiano Trik lasis lin. La senatanoj sidis ĉe la tablo konsternite. La eldirita akuzo estis nova kaj nekomprenebla kaj la situacio estis turmenta... De la ĥorejo murmurado aŭdiĝis kiel tritika kampo susuras okaze de tempesto.

– Mi ne komprenas la aferon – alparolis la prezidanta maljunulo en la silento, rigardante al Nustkorb, kiu indiferece sidis en la seĝo.

– Mi komprenas la ruzulon – interparolis Brüneck (brunek) – kiu atingis pli proksimen al la celo.

– Kio estas via opinio, sinjoro Nustkorb? – demandis Moŝtel – klarigu tion al ni!

– Mi atendas ĝis li finos la tusadon – respondis Nustkorb. – Povas esti, ke li volas diri ion.

– Ĉu ĝi estas prava, aŭ ne? Ĉi tio estas la demando. – diris kolere Donat Mauks kaj frapis perpugne sur la tablo.

Ĉi tio estis la unua nerva movo. Tio liberigis la briditajn ekscitojn kiel fajrero ekbruligas la pulvon. Estiĝis konfuza bruego. Ĉiuj komencis paroli. La manoj gestadis, esprimante koleron. Kelkfoje aŭdiĝis saĝa rimarko:

– Ja ĉi tio estas formala murdo!

– Sed ni aŭdu detale!

– Ho! Jes! Ĉio estas evidenta!

Kiam la astma Grosnovicer spiradis pli facile kiel siluro remetata en la akvon, li konsciiĝis kaj parolis fiere:

– Ne mi estas respondeca, sed sinjoro Nustkorb, ĉar li ĉeestis kiel senatano.

– Ankaŭ Sebastiano Trik ĉeestis – iu diris. Sebastiano Trik paliĝis kiel mortinto kaj la kapon subteris kaj frostotremante plendis, ke li estas febra kaj malsana kaj oni lasu lin hejmeniri por enlitiĝi. Dum tiu peto la aliaj murmuradis, sinjoro Nustkorb malestime ridetis:

– Ĉu vi finis la direndaĵon sinjoro Gosnovicer?

– Ĝi verŝajnas – respondis Gosnovicer simple.

– Nun mi volas paroli.

– Ĉu vi pravas, aŭ ne? – demandis denove Donat Mauks – respondu nur tion.

– Li pravas, ni ne devas lasi lin paroli multe – opiniis Mateo Brüneck, kiu ŝatis la kvereladojn, – nome li kapablas portigi sin al la ĉielregno ankaŭ kiel kulpanto.

Sinjoro Moŝtel kuntiris siajn brovojn kaj riproĉis sinjoron Mateo Brüneck:

– Nu, ĉi tion vi diris tre malbone. Ĉu vi ne hontas? Vi ne lasas paroli tiun homon, kiun oni akuzas. Tio ne estus justa!

Brüneck vere hontis kaj per la harriĉaj manoj kovris sian kapon. Sur la ĥorejo la homoj komencis mallaŭte paroladi, ĉar Nustkorb volis paroli, sed Mostel nur

rigardis al la ĥorejo kaj tuj iĝis silento. Ĉi tie la maljunulo havis prestiĝon kiel Neptuno sur la akvoj.

– Estimata konsilantaro! – komencis paroli Nustkorb – iu diris, ke mi estas kulpanto, ruza vulpo, ĉar mi ne konsideris, ke la juĝisto helpe de la morto atingis pli proksimen al la celo. Nu, bone estas. Mi estas vulpo. Sed tiu vulpo, kiu afektas ŝafidon, tamen estas vulpo.

– Ni ne komprenas – kriis Kripeji.

Sed sur la ĥorejo oni tuj komprenis. Oni klarigis tion, ke tiu diro koncernas sinjoron Davido Gosnovicer, kiu povis havi intereson por kalumnii sinjoron Nustkorb.

– Kio koncernas la akuzon de la sinjoro senatano Grosnovicer...

– Ĉu pravas, aŭ ne – ripetis denove Donat Mauks.

– Do, tio estas prava – respondis Nustkorb fiere, orgojle ne volante timi. – Kiam la kuglo de la vicprefekto trafis la juĝiston kaj mi ekvidis la sangon sur la vestaĵo de la juĝisto, en la sama momento mi rememoris pri iu malnova kaj forgesita saksa privilegio kvazaŭ ankaŭ tio povis esti elpafita de iu pafilo de iu nevidebla mano. Ŝajnis al mi tia, kvazaŭ la Providenco direktus mian volon. Jes, estimata Konsilantaro, pro tio mi ordonis levi la juĝiston kaj ĉirkaŭportadi lin laŭ ebleco ĉirkaŭ la granda tereno de Paŭlo Görgey. Ĉi tion ni faris, signante per la ruĝa strio de la sango de la juĝisto tiun terenon. Ĉi tiel ni volis fari bonon en la intereso de nia urbo.

– Ĉi tio estas harstariga! – interparolis Pálfalvi, kiu havis tiom glatan kranion senhararan, ke oni povus sur tiu glitkuri.

– Vi estas pagano! – siblis Kripeji kaj frapadis la tablon per siaj fingroj.

Kripeji estante oraĵisto, ĉiam portis diversajn orajn fingroringojn sur la fingroj, kiuj aspektis, kiel vitrofenestroj. Nun jam la akuzo direktiĝis evidente kontraŭ Nustkorb. Ĉiuj miris, indignis, konsterniĝis. Sur la ĥorejo la bruego fortiĝis, Donat Mauks flustris ion en la orelon de Mateo Brüneck (de lia orelo elkreskis kelkaj rufaj haroj kiel liliputa sciurvosteto.):

– Mi vidas jam du mortintojn, mia amiketo.

– Nu! – diris Mateo Brüneck.

– Ni aŭskultu!

– Nome laŭ la forgesita saksa privilegio – daŭrigis la akuzita senatano – devenanta de la reĝo Karolo Robert⁴⁸: la sango de la juĝisto de Lőcse havigas rajton pri ter-akiro.

Bibera maltrankvile ekmoviĝis, levis la kapon, kiu kuŝis sur liaj brakoj.

⁴⁸ Pri Karolo Robert la 1-a, hungara reĝo, vi povas legi en la artikolo wikipedia:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Karolo_la_1-a_\(Hungario\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Karolo_la_1-a_(Hungario))

– Li pravas – jesis Donat Mauks, kiu kiel iama arkivisto maljuniĝis inter la dokumentoj. – Ĉi tiu privilegio ekzistas kaj ankaŭ reĝo Matiaso la 1-a aprobis ĝin.

– Jes, li aprobis. – aldiris Nustkorb al la interparolo de sinjoro Mauks, kaj aprobis ĝin ankaŭ la reĝo Ludoviko la 2-a, kiam al la reĝino la delegitaro de Lőcse portis du skatolojn da puntaĵoj. La delegitaron estris sinjoro Kripeji...

Kripeji trankviliĝis, li ruĝiĝis ĝojante pro la laŭdo. Ankaŭ Mauks gapis, ĉar li aŭdis jam pri la puntodonaco:

– Ĉi tiu homo scias ankaŭ pri tio ĉi.

– Do, ne estas miraklo, ke mi rememoris ĉi tiun malnovan privilegion kaj ĝuste en tiu ĉi momento. La okazo alvenis kaj atingis min iu anima devigo elprovi la praan privilegion, ĉar mi ne volis, ke tiu malaperu dum la tempoj, ja ankaŭ la marakvo vaporiĝas ...

– Dio mia, li bele scias paroli – diris iu sur la ĥorejo – dum kio estiĝis tiom granda silento, ke oni povis aŭdi kiel gratis al si la la nukon sinjoro Petraŝ la botisto.

– Min instigis unuparte la rara reĝa rajto, ĉar tiun sole havis en Eŭropo nur la urbo Lőcse, kiun mi devis renovigi, aliparte la akirsopiro inspiris min, ke grandan terenon mi aneksu al la piza tereno de Lőcse el la riĉa bieno de la atencinto...

Bibera kapbalancis, fermis la okulojn, signante, ke li ĉesigas la diskutadon. Sinjoro Brűneck flustris en orelon de Mauks: „Bibera nun pensas, ke la akiritajn terenojn kiel novajn pizoterenojn li luprezos. Mi kuraĝas priveti kvar botelojn da vino.” (Jes, li kapablas fari tion. – diris Mauks.) Sur la ĥorejo la homoj jesis. Moŝtel kolere kriis al la ĥorejo:

– Vi estis enlasitaj nur por aŭskulti, sed ne por paroli.

– Tiun terenon vi ne ricevos – aldiris Davido Gosnovicer.

– Ankaŭ via moŝto, sinjoro Gosnovicer, povus ripozigi sian cerbon dum kio sinjoro Nustkorb konigas la cirkonstancojn – frapis kolere Moŝtel sur la tablon per sia lutroledo-ĉapelo – ne ĝenu lian parolon. Daŭrigu sinjoro Nustkorb.

– Ĉi tiu faro havis ankaŭ du aliajn kaŭzojn – daŭrigis Nustkorb. – Unuparte la vundo tiel ŝajnis, ke ĝi estas mortiga, kaj fakto estis, ke ĝi estis mortiga. Aliparte mi estis konvinkiĝinta, ke la vundito estus konsentinta kun tiu faro.

– Vi estus devinta demandi pri tio la vunditon – interdiris Johano Makuliĉ, la sola katolika senatano, kaponvoĉe, kiu ĝis tiam mute sidis inter la luteranoj.

– Mi estus demandinta tion, sed li jam estis senkonscia, la demando estus superflua. Nome la forpasinto plurfoje diris okaze de sia lasta parolo, ke li estas preta forferi sian lastan sangoguton al prosperigo de sia urbo...

– Jes, la lastan guton, sed ne la pli antaŭan unu glason da vino – diris moke Gosnovicer, volante ŝanĝi la ŝanceliĝantan etoson.

Nustkorb mansignis malestime, kvazaŭ li volus forpeli muŝon.

– La karmemora juĝisto estis viro – li diris trankvile – kiu ne kutimis ludi per la vortoj. Do, estas kruelaĵo, ke...

– Ĉu mi diris, ke ni ne lasu lin paroli? – ridis Mateo Brüneck, kiu jam ne koleriĝis.

– Kruelaĵo estas malpliigi lian karakteron. – daŭrigis Nustkorb. – Li estis viro, kiu parolis ĉiam pripenseme. Li konvene finis sian laboreman vivon, ja ankaŭ agonianta servis sian urbon. Lia morto estis majesta kaj li estis la unua juĝisto de Lócse, kiu havis majestan morton. Nur Leonidaso⁴⁹ kaj Nikolao Zrínyi⁵⁰ estis pli gloraj, ol en la Transmondo, kiun li atingis. Ankaŭ ni estas respondecaj pro la okazintaĵoj. Se mi ricevas punon, tiam mi puniĝos, ĉar mi amas mian urbon, do verdiktu kontraŭ mi. Kaj nun li ekstaris, haste ekiris al la pordo por atendi ekstere la verdikton. Sur la ĥorejo aŭdiĝis malforta vivuado. Iu damo, en kies hararo estis bela ruĝa rozo (kie ŝi povis akiri ĝin meze de vintro?) subite eltiris la rozon kaj ĵetis ĝin al Nustkorb, kiun la konsilanto lerte ekkaptis ridetante, signante, ke li estas ekscitita kaj iĝis vigla. (Sur la ĥorejo oni diris: „Ĉi tiu homo taŭgas por esti juĝisto!”)

La maljuna Moŝtel kriis al li:

– He! Nustkorb! Kien vi kuras? Tuj revenu!

Nustkorb turnis sin, reiris al la ĉambrego, li iris apud la mortintan juĝiston kaj tie ekhaltis kaj la rozon metis sur la bruston de la mortinto. (Ho! ve! Li ne timas stari apud lin. – miris Donat Mauks.) Poste li iris al la longa tablo, sed li ne sidiĝis, prefere li ekhaltis antaŭ Moŝtel kaj klinis la kapon kiel akuzito.

Estimata zorgema konsilantaro – alparolis la maljuna sinjoro – mi tiel ellernis la sciencon de la vivo, ke okaze de malbono, kiam ni havas komunan malamikon, ni estus stultaĵ disputadi unu kontraŭ alia. Ĉe la kazo de sinjoro Nustkorb estas malkorektaĵo kontraŭ leĝoj de Dio. Sed laŭ la urbaj leĝoj li havas ankaŭ meriton. Ĉu iu povas nei?

– Vi pravas! – jesis la plimulto de la senatanoj. (Ili diris unuvoĉe, kiuj ĝoje akceptis la opinion de la maljunulo.)

– Se ni forgesas la malkorektaĵon kaj pro la malkorektaĵo merito ne ekzistas, tiam ne ekzistas pritraktenda afero.

– Vi pravas! – ripetis la senatanoj, kiuj ĉiam klopodis esprimi la opinion de la oratoro.

– Poste nia celo estas reprezenti la urbon kaj ne Dion. Kvankam ni estas religiaj homoj, ni ne povas arogi al inter si ĉi tiun kazon. Kvankam ni havas diversajn opiniojn hejme, aŭ en la templo, tamen ĉi tie ni estas deputitaro de la

⁴⁹ Pri Leonidaso, vi povas legi en la artikolo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Leonidaso_la_1-a

⁵⁰ Pri la du Nikolaoj Zrínyi: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Miklós_Zrínyi_\(poeto\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Miklós_Zrínyi_(poeto)) – [https://eo.wikipedia.org/wiki/Miklós_Zrínyi_\(heroo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Miklós_Zrínyi_(heroo))

urbo. Se sinjoro Nustkorb havas aranĝendan aferon kun Dio, tion ili aranĝu inter si. Dio estas sufiĉe grandpotenca ankaŭ sen ni, povas puni sinjoron Nustkorb kaj ne estas bezonata al Nustkorb la voĉo de Gosnovicer, aŭ Mauks. Sed ni vidas prefere la meriton de sinjoro Nustkorb, kiu nur tion faris malbone, ke li iomete pli entuziasme serĉis la intereson de la urbo, ol li estus devinta serĉi tiun. Nu, kiu diras, ke mi ne pravas?

Liaj belaj okuloj estis severaj kiam li ĉirkaŭrigardis la senatanojn. Neniu moviĝis, ĉiuj mute sidis sur la seĝoj, sed nur Gosnovicer ridegis amare kaj eksaltis.

– La tuto estas stultaĵo – li kriis – nur en Lőcse povas ekzisti tia stultaĵo. Bone estas scii. Ekde nun ni povas elekti sangon kraĉantan juĝiston, kiu laŭ privilegio de Karlo Robert (Karolo la 1-a) ĉirkaŭkraĉas la najbarajn terenojn. Ekestas la panaceo! Lőcse similos al Londono kaj la limo de la terbieno de Lőcse finiĝos ĉe la pordego de Kaŝŝa.

La astmohavanta sinjoro denove forte tuis, li apenaŭ kapablis ĉesigi tion.

Oĉjo Moŝtel ruze vokis al si Kristoforon kaj flustris al li:

– Mia fraĉjeto! Portu ĉi tien la kokinon de la urbo!

Post momento la kokino de la urbo jam estis sur la tablo. Tio estis en Lőcse la plej timiga korta birdo inter la kortaj birdoj. Tiu kokino teruris, mutigis ankaŭ la plej kvereleman homon. Cetere ĝi ne estis besto, sed ĝi estis nigra kesto, kiu enŝlosita estis de tri pendseruroj kaj sur ĝia supro estis malvasta truo. Tio estis monkesteto, en kiun la membroj de la konsilantaro metis la sumojn de la monpunoj. Oni tial nomis ĝin kokino de la urbo, ĉar ĝi bone „ovumis” al la urbo.

Gosnovicer ektimetis. Subite li interrompis la temon, teruriĝante rigardis la keston kaj balbutis raŭke:

– Kio ĝi estas? Ĉu ĝi estas venigita ĉi tien pro mi?

Moŝtel nur kapbalancis, sed ne respondis.

– Kial?

– Tial, kara mia sinjoro Gosnovicer – diris afable la prezidanta veterano, – ĉar vi ne konvene kondukis, vi mallaŭdis la konsilantaron kaj pri la pizoterenoj vi argumentojn faris por la kontraŭulo menciante mokan precedencon de la juĝisto kraĉanta sangon. Pro tiuj pagu al la kokino de la urbo du orajn monerojn.

– Tio estas multe – ĝemis ruĝiĝinte Gosnovicer estanta tre avara, kiu povus esti pelinta kapron ĝis Kaŝŝa⁵¹ por unu groŝo. – Mi ne havas multe da havaĵoj.

– La monpuno ne dependas de la mezuro de la havaĵo, sed prefere de la impertinenta disputemo. Ja vi scias, ke ĉi tio estas kutimo en Lőcse.

Kaj ĉar la senatanoj ne estas ŝtonkoraj, pro tio estis permesita marĉandado por decidi la sumon de la monpuno. Ofte okazis, ke la preskribitaj oraj kaj

⁵¹ Pri la urbo Kaŝŝa, vi povas legi en la artikolo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Košice>

arĝentaj moneroj transformiĝis al likvaĵoj. Pro tio Kripeji nun interĵetis sin petantvoĉe en la intereso de Gosnovicer:

– Ĉu ne sufiĉus, se li pagus kelkajn botelojn da vino?

En la urbo Lőcse ĉiam estis kutimaj malgrandaj drinkfestenoj, kiam oni deklaris la verdiktojn, dirante: „In vino veritas” / en vino estas la vero. La okuloj de Temiso⁵² estis kovritaj sed ŝiaj buŝo kaj gorĝo estis lasitaj liberaj. Pro tio ne estus juste, se la kokino ricevus ĉion.

Moŝtel montris malantaŭen al la kadavro.

– Ĉu nun? Tio estus ofendo de pietato.

– Vi ne pravas. – klopodis defendi Bibera sinjoron Kripeji. – Hungaro drinkas pro malĝojo kaj ni estas hungaroj. Ĉu ne?

(Sed tiuj ne sciis paroli hungare, eĉ ne Pálfalvi, nur Hulik sciis paroli malbone hungare.)

– Jes, ni estas Hungaroj – respondis Moŝtel – ĉar videblas, ke ni volas manĝi unu la alian. Kaj ankaŭ pro tiu ĉi nepripensita risko sinjoro Gosnovicer pagu du orajn monerojn. Mi finis.

Neniu ekskuzo estis, li devis pagi la du orajn monojn. Li serĉis ŝvitante tiom da arĝentmoneroj, kiom estis egalvaloraj al unu ora monero. Poste li diris, ke la alian duonon de la sumo li portos sekvatage. (La partopago estis tiutempe hungara specialaĵo kaj ankaŭ tio, ke li residiĝis al sia loko grumblante.)

– Ĉar nun estantas sankta la paco – diris kontentigita la maljunulo, uzante sian flartabakan skatoleton – ni parolu pri la aferoj de la pizoterenoj. Ni devas fari la inspektadon de la okazejo, poste Nustkorb faru la pluajn taskojn, ja li konas la administradon pri tiuj aferoj.

Nustkorb klinis sin, montrante, ke li plenumos la ordonon.

– Nun jam ni priparolu la plej gravan aferon, ja ni kunvenis pro tio, ke ni donu la lastan honoron al nia estimata juĝisto. Mi proponas, estimata konsilantaro, ke la karmemora juĝisto estu la mortinto de la urbo kaj la kosto de la funebra ceremonio estu kosto de la urbo. (Estis ĝenerala jesado.) Sur ĉiuj publik-konstruaĵoj estu nigraj standardoj. La kadavro estu sur katafalko dum tri tagoj en la granda ĉambro de la urbodomo kaj de la sama loko okazu la entombigo. Apud la katafalko tage-nokte gardostaru kvar hajdukoj tenantaj torĉon kaj kvar hajdukoj tenantaj eltiritan glavon. Dum la tri tagoj po tri horoj oni ektiru la sonorilegŝnuregojn, por ke ĉiuj sonorilegoj de la urbo sonu. Mi proponas krome, ke la kadavron oni entombigu sub la katedralon, kie ripozas la gravuloj de Lőcse.

Tio estas akceptita.

– La ŝtontranĉisto Jozefo Keŝmarki Tomiŝ faru lian tomboŝtonon, sur kiu estu reliefo de lia nobla figuro, kiun li metu sur muron de la katedralo al eterna

⁵² Pri Temiso bv vidi la artikolon: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Temiso>

memoro pri li. Ĝia kosto estu kosto de la urbo. La reliefo estu farita el blanka, aŭ griza marmoro. Dum la entombiga ceremonio la vendejoj estu fermitaj kaj estu fermitaj ĉiuj pordegoj de la urbo por ke oni ne ĝenu la ceremonion. Ĉi tio estas grava.

– Mi kredas – proponis modeste Grosnovicer, kvazaŭ renaskita li estus – ke lian portreton ni devus pentrigi kaj meti en la konferencejon.

– Jes, tio estas memkomprenebla. – diris la aliaj.

– Do, ni decidis tiujn ĉi rezoluciojn – anoncis Moŝtel kaj ekstarante diris: La kunveno finiĝis!...

Sed sinjoro Bibera retiris sian mallongan mantelon kaj alparolis:

– Ho! Ankoraŭ ni ne priparolis pri la plej grava afero. Ni devas trankviligi la ribelantajn loĝantojn. La forpasinto estas jam trankvila ankaŭ sen ni. Sed trankvilo de la vivantoj estas tre grava afero. Ni devas defendi la honoron de la urbo.

– Por aranĝi tion ni ankoraŭ havas tempon. – rifuzis Moŝtel la alparolanton. – Pri tio ni devas pensadi. Nome la kolero estas malbona konsildonanto, la freŝa kolero estas la plej malbona.

Nun Bibera ekstaris kaj kion pli frue li volis dediĉi nur kiel interparolon, nun jam li diris tutan oratoraĵon, pro kiu la homoj emociiĝis.

– Ni tute ne havas tempon. Ni devas paroli pri la venĝo. Se iu la alian homon vangofrapas, unue li ne komencas kompresadi la lokon de la bato, sed li volas redoni la vangofrapon. La loĝantoj de Lőcse suferas de la honto. Tion ni ne povas malatenti! (Estis vivuado sur la ĥorejo.) Kaj por la forpasinto estas honorigo, se almenaŭ korpe li povas partopreni tiun kunvenon, kiam oni decidas pri la venĝo por lia morto kaj ĉiuj pompoj de la ceremonio estas malpli gravaj.

Moŝtel tiris la ŝultrojn kaj respondis:

– Tio ĉi ne estas malgrava afero. Kion ni devus fari? Ne hastu ni por aranĝi la aferon. Ni atendu! En la daŭo ni trovos solvon. Sed se vi scias solvon, kiu trankviligas niajn loĝantojn, tiam mi demandas: Kiam ni okupiĝu pri la demando? Ĉu nun? Ĉu pli malfrue?

– Nun! – proponis la plimulto, nur Makuliĉ diris, ke pli malfrue, ja li ĉiam kontraŭstaris kaj Hulik diris, ke pli malfrue, ĉar li vidis sian junan edzinon flustradi sur la ĥorejo kun la belstatura Nikolao Blom. Li estis fame konata kiel granda bubaĉo, pro kio oni malpermesis lian restadon en la setlejo Béla⁵³ kaj Késmark⁵⁴ pro malbonigoj de la neĝenataj familiaj feliĉoj. Sinjoro Hulik suferis pro ĵaluzo havante inferajn turmentojn apud la tablo dum la kunveno kaj pluse

⁵³ Béla /Szepes Béla/ Spišská Belá /estas urbo en la nuna Slovakio, en regiono de la urbo Eperješ/Prešov/ en la distrikto de Késmárk:

[https://hu.wikipedia.org/wiki/Béla_\(egyértelműsítő_lap\)](https://hu.wikipedia.org/wiki/Béla_(egyértelműsítő_lap))

⁵⁴ Pri Késmárk bonvolu vidi la artikolon: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kežmarok>

ankaŭ tial, ĉar kelkaj petolemaj senatanoj ŝerce diris sed cele pensis siajn atentigojn: „Mia fraĉjeto, Hulik, ĉu kato estas en la kamentubo apud la graso?”

– Bone estas – jesis Moŝtel konsentante. – Se la plimulto volas okupiĝi pri la venĝo, tiam mi konsentas tion. Sed ĉar ni preparolos pri ege grava afero, pro tio en la ĉambrego ne povas partopreni geatestantoj. Pro tio ĉi mi petas foriri la homojn estantaj sur la ĥorejo. Krome mi petas la senatanojn ĵuri je tio, ke ili ne parolu pri la nun preparolitaj aferoj, ĉar tiuj estas sekretaj. Kiu rompos la ĵuron, tiu estos perfidulo, kies puno estos senkapigo, aŭ eterna ekzilo.

La homoj estantaj sur la ĥorejo komencis foriri, dum kio la homoj puŝadis unu la alian, ili ŝrikadis kaj laŭte diskutadis. Kiam la ĥorejo iĝis malplena, tiam la urba mastro kontrolis ĉu iu ne kaŝis sin sub la benkoj. Kiam li konvinkiĝis, ke la ĥorejo malpleniĝis, ankaŭ li foriris el la ĉambrego, sed dume li minacis la du hajdukojn, kiuj gardis la pordon:

– Se vi provos kaŝe aŭskulti ĉe la ŝlosiltruo, tiam viaj oreloj estos tranĉotaj de la ekzekutisto posttagmeze sur la vendoplaco.

Plenuminte siajn taskojn li trankvile iris al la kelo, kiu estis sub la urbodomo. (Tiutempe la keloj estis sub la urbdomoj, kio estas komforta al la soifaj senatanoj.) Nun en la kelo estis multe da gastoj. Eĉ la plej elitaj sinjoroj ne hontis sidaĉi apud glaso da biero, kun streĉita interesiĝo atendente la rezoluciojn de la senatano. La urba mastro rakontis la okazintaĵojn, akuzojn de Grosnovicer, la defendadon de Nustkorb kaj la rezoluciojn pri la entombigo.

– Ĉu la kunveno finiĝis?

– Tute ne. Tio pli ĝuste nun komenciĝas. De la ĥorejo oni forsendis la homojn, ankaŭ mi elvenis. Ĝis nun okazis nur la eksterordinara kunveno. La regula kunveno nun komenciĝos.

La senatanoj surmetis super siaj ĉiutagaj vestoj siajn oficialajn nigrajn mantelojn por iĝi festaj kaj imponaj laŭaspekte.

– Kio estos nun?

– Ili decidis pri Paŭlo Görgey.

– Kion ili povos fari pri li?

– Dio scias tion – respondis la urba mastro kaj rigardis al la ĉielo, sed pli ĝuste al la volbaro de la kelo.

– La grandpotencajn sinjorojn estas malfacile puni. Oni jam antaŭpreparas la rostostangon, kvankam la besto taŭga al la rostaĵo ankoraŭ kuradas en la arbaro.

Similaj demandoj aŭdiĝis sur la strato kaj sur la vendoplaco. Sur la vendoplaco videblis granda tumulto. La ordono de Moŝtel, laŭ kiu la homoj devis hejmeniri, nur dum mallonga tempo estis efika, kiel kinino ĉe malpliigo de la febro. La homoj ne kapablis resti hejme en tiu ĉi historia momento. Sinjoro Samuelo Rafanides, la pastro, malfermis la katedralon, lumigis la kandelojn, ja estis vespero. La aro de

la malaltranguloj iris en la katedralon. Ili kantis la kanton komenciĝantan jene: „Forta fortreso estas nia Dio“. Poste li oratoris pri Sodomo kaj Gomoro, kiujn urbojn Dio tiom severe vizitis⁵⁵ kaj pri tio, ke tiu ĉi situacio al Lőcse estas granda atentiga signo pri la alvenonta dipuno pro ĝia troambicio pleniginta jam ekde kelkaj jaroj la animon de la riĉuloj ĉesintaj esti modestaj simplaj homoj. Ili estas forgesantaj pri siaj civitanaj moraloj. Ili komuniĝas sur la altaro de la superrangeco oferontaj nepre siajn filinojn por akiri nobelajn kontaktojn, kaj tiuj filinoj neas Dion kaj fidelas al la malplenaj, frivolaĵoj.

La homoj apenaŭ atingis sur la straton, jam la ekstere troviĝantoj alkuregis ilin demandante pri ĉio kio okazis sur la ĥorejo: Kio okazis? Pri kio ili konsiladas ankoraŭ? Kiam estos la entombigo? Kio okazos pri Paŭlo Görgey? Ĉu nenio? Mil diabloj kaj infero! – Kial ili ne decidis ĝis nun pri Paŭlo Görgey? Mi estas maljuna fraŭlo, sed mi jam certe estus rajdinta al Görgő, – mi estus kaptinta lin kaj lin katenita mi estus portinta ĉi tien. Dio helpu min tiel! – fanfaronis Tomaso Bobest la iama kapitano de Emeriko Thököly – Mi farus tion, se...

– Se kio?

– Se li estus ne luterana, sed mi ne damaĝas la luteranon.

La lumigitaj fenestroj de la urbodomo tre ekscitis la homojn. Multcentoj da homoj rigardis la fenestrojn scivole. Ili vidis ombrojn sur la kontraŭa muro en la ĉambrego, certe iu disputadas kaj pro la kolero eksaltis. La vespero estis hela, ja lumigis ankaŭ la Luno kaj la neĝo. Sur la strato la alteco de la neĝtavolo atingis preskaŭ la genuon de la homo, sed sub la arkadoj oni forbalais la neĝon kaj oni povis promeni komforte. Nur fabelo estas, kion la romanverkistoj skribaĉas pri la luksaj palacoj de Lőcse. Post la tempo de Thököly tie ne estis palaco, escepte de la domo Thurzó (turzo), la departementdomo kaj la urbodomo. Ĉefe estis gotikstilaj civilaj domoj, havantaj tri fenestrojn sur la strata fronto. Neniu havis kvarfenestran domon. Tio ne estis miraklo, ja ĉiuj terenoj de la urbo estas tre granda valoro kaj ne estas permesite tiujn malŝpari por fari sinjorajn amuzojn.

La urbo defendata per la bastionoj ne volis, ke tio havu belegajn kastelojn, ĝardenojn, sed volis, ke ĝi havu multe da loĝantoj kaj tiuj multobliĝu kaj defendu la urbon. Tempe de nia historio ĉefe estis nur lignodomoj, kies unua parto estis konstruita el ŝtonoj. Sume estis en la urbo tridek ŝtondomoj. Oni ne permesis konstrui ŝtondomojn. Nur la familio Mariaŝi povis konstrui tian en 1860, ĉar al la urbo tre honora estis la ĉeesto de tiu familio. En la domoj de Loĉe sube estis vendejo, aŭ metiejo kaj larĝa pordegvolbaro servanta kiel enveturejo. Supre sur la etaĝo estis tri ejoj: la strata estis la vizitĉambro, la kortega estis loĝĉambro kaj la malantaŭa estis la dormoĉambro. En la urbo la familioj ne havis kvar

⁵⁵ Pri Sodomo kaj Gomoro bonvolu vidi la wikipedian artikolon:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Sodomo_kaj_Gomoro

ĉambrojn. Kiam Gabrielo Bethlen volis ripozi en Lőcse, oni devis aliformi la kvartiron por doni al li ĉambron. Samjare la reĝo Ferdinando la 2-a kaj liaj komisaroj, Johano Biber, episkopo de Várad, kaj Petro Révai la korpgardisto portis la sanktan kronon tra la urbo, kiun li transprenis de Bethlen, ricevis la plej belan ĉambron en la domo de Veissenberger. La episkopo ricevis belan ĉambron, sed Révai (revai) kaj la sankta krono ricevis nur malvastan ejon. Sed ĉi tiuj etaj domoj estis ege belaj kaj karaj. En la fenestroj estis pelargonoj, kaj tage eblis vidi en la fenestroj la kapon de knabinoj, aŭ junedzinoj. Nun ĉiuj fenestroj estis malhelaj, nome ĉiuj homoj estas sur la strato.

Sed la tragedio de la morto de la juĝisto antaŭ ĉiuj piedirantoj jam komencis paliĝi. Ĉiuj povis renkontiĝi kun kunuloj, parencoj. Interese estas, ke la homoj ektrovas tiujn homojn, kun kiuj ili povas paroladi. Al la familioj, kie fraŭlino estas, iras la konataj junuloj por paroladi. La patrino de la fraŭlino paroladas kun siaj malnovaj amikinoj kaj ili pri ĉio informiĝas. La maljunaj fraŭloj rigardadas la junedzinojn, sed ili ne malrespekte kiel la bubaĉa Blom, kiu havas senmoralajn pensojn kaj dirojn. Kelkfoje kiam la senkulpa junedzino aŭdas tiujn, ŝi ruĝiĝas. Ja, se la senatanoj estus pudoraj, tiam ili ekzilus tiun ĉi malagrablan aĉan bubon el Lőcse.

Cetere Blom kaj la similaj voluptuloj ektrovas la ŝatatan amuzon. La metilernantoj ĵetadis neĝbulojn unu kontraŭ alia. La tanistlernantoj batalas feroce kontraŭ la kupristolernantoj kaj ladforĝistlernantoj ĉe la turo Ménhárd⁵⁶ (menhard). La majstroj klopodas informi la hajdukojn ekkapti la metilernantojn, kiuj ne hontas interbatali dum tiu ĉi trista momento. Sed tio nur estis trista, ja ĉiuj forgesis jam la funebran historion. Spite de la funebro, la loĝantoj estas gajaj, ili pompe sin amuzas, babiladas, kvazaŭ ĉiuj estus alvenintaj el maskobalo surstrata. Sed la helaj fenestroj de la urbodomo memorigis la homojn, ke ili venis por aŭdi famojn.

Ja la famoj estiĝas. Multe da homoj havas fantazion. Ĉiuj diras iun novaĵon. Oni diras, ke la urbo dungas soldulojn, kelkcentojn, kaj sieĝas Görgő-n, la truon de la zizelo por ekkapti la zizelon. Ĉefe la malaltrangujoj kredas tion, dirante: Ĉu soldulojn? Nu, tio ne estos malbona.

La pli elitaj homoj nur ridas pro tio. Laŭ ili la tuto estas stulta babilaĉo. Ja sur la stratoj neniu povas scii kio okazas en la kunvenejo, kion rezolucias la senatanoj.

Sed subite ekaperas sinjoro Hulik, la senatano, kiu ĉesigas la klaĉojn. Oni demandas lin: Ĉu vi estas ĉi tie kaj la aliaj ankoraŭ konferencas? Sinjoro Hulik ekskuzis sin, ke subite li tre malbone fartis kaj foriris de la kunveno. Subite

⁵⁶ La turo Ménhárd estis urba konstruaĵo nomita pri la proksima setlejo. Pri la vilaĝo Ménhárd vi legeblas ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Vrbov>

multe da homoj kolektiĝis ĉirkaŭ li. Belaj elitaj edzinoj trapuŝadas sin al li, ĉar ilin turmentas la scivolemo.

– Kio okazis?

– Ĉu vi ne vidis mian edzinon? – demandis Hulik.

– Ŝi promenas ie kune kun la familio Grosnovicer, sed vi diru jam ion, kion ili rezoluciis.

– Mi metis riglilon sur miajn lipojn – kaj li montris siajn lipojn.

– Nu, tamen vi diru ion – petegis la edzinoj – ne estu jam sekretema, sinjoro senatano, ja via vizaĝo montras, ke ili decidis pri ia teruraĵo.

– Jes! Tio ne plaĉos al vi – respondis sinjoro Hulik.

– Mil diabloj! Vi ne scias, kio plaĉas al la edzinoj! Sed almenaŭ diru, kiam estos la entombigo de la juĝisto.

– Postmorgaŭ posttagmeze iam. – diris sinjoro Hulik enigme kaj iris plu.

– Ĉu li estas freneziĝinta? – iu murmuris el inter la sinjorinoj, tiel ŝajne sinjorino Antonio Teóke, la petola. – Li respondas strange. –

Dume sinjoro Hulik renkontiĝis kun Nikolao Blom. Li plifaciliĝis, ĉar la teruran donjuanon li vidis ne kun sia edzino, sed li vidis tiun apud sia kuzo la barono Kopen.

– Ĉu vi ne vidis mian edzinon?

– Mi ne vidis ekde kiam ni foriris de la ĥorejo.

– Kien vi rapidas? – demandis sinjoro Hulik afable.

– Hejmen. Mi enlitiĝos. Mi devos ellitiĝi frue. Tio estas afero de la honoro. Iomete da blua sango. Hm.

– Ne diru! Kiuj kaj kial?

– Nu, ja! Mi estus freneza paroli pri tio antaŭ la magistrato. Ni iru, Konrado!

Dume la famo disvastiĝis, ke la urban mastron, kiu en la kelo de la urbodomo malĝojadis pro la morto de la juĝisto, urĝe vokigis la senatanoj por veni per kaleŝo el la urbo. Kial? Baldaŭe alvenis la kaleŝo, la kvar ĉevaloj baraktadis senpacience. La urba mastro sidis sur la kaleŝo en granda pelto. Tuj ni rapidu tien por ekscii ion.

– Kien vi iras? – la homoj demandis la mastron.

– Mi iras en Rissdorf.⁵⁷ – li respondis malŝate. – Mi portos ĉi tien doktoron Krikner.

La malsana sinjorino Csáky loĝis en Rissdorf⁵⁸, kies doktoro estis Krikner. (La grandpotenculoj havis multe da monoj je stultaĵoj.)

– Ĉu tio estas tiugrade urĝa tage de novjaro? Kiu bezonas la doktoron?

⁵⁷ Rissdorf estis vilaĝo loĝata de germanoj je du mejloj al Keŝmarko.

⁵⁸ Pri tiu teritorio vi legeblas ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ruskinovce>

– La juĝisto – respondis la urba mastro enigme. – Pro tio mi devas ekiri urĝe, ĉar se tiu ne estas hejme, mi devas serĉi ĉie. Ĉi tio estas ordono de la senatanoj.

– Sed la juĝisto jam mortis. La doktoro jam ne povas revivigi tiun.

La urba mastro tiris la ŝultron.

– Mi ne scias tion. Tio ne estas mia afero!

La eksterordinara ordono donis kaŭzon por divenprovadi. Tio estas nekomprenebla. La scivoleco ĉiam pli kaj pli grandiĝis.

– Ĉu oni dissekcios lian korpon? Kial? Ja tio estas sciindaĵo, pro kio li mortis. Ĉu povas esti, ke li reviviĝos? – iu rimarkis. Tio estas stultaĵo, ja ili elfluigis lian sangon.

Oni paroladis pri ĉi kaj superstiĉaj misopinioj ekdisvastiĝis kaj subite eksonis la eta sonorilo de la turo de la urbodomo.

– Ha! La tempo forpasis.

La eta sonorilo signis la vesperan naŭan horon. Tio signifis la fermohoron en Lőcse. Oni devis forlasi la drinkejojn, ĉar tiujn oni devis fermi. Post sonorigado la drinkaĵojn oni devas porti hejmen, sed nur ĝis la dua sonorigado. En mala okazo oni devas pagi punon al la „kokino” de la urbo. Kiuj sencele promenas sur la stratoj, ankaŭ tiuj pagas punon. Kiu bezonas iri sur la strato pro nelasebla afero, tiu devas havi en la mano lanternon. Sed kun lanterno iri surstrate ne de unu flanko al la alia en lumo de Luno estas punenda ago. Tio estas freneza afero, ĉar se la civitanoj tage laboras, nokte ili devas dormi. La konsilantaro determinas tempon de la dormado, sed dum la dormado la civitanoj povas sonĝi kion ajn.

La loĝantoj de la saksaj urboj estis disciplinitaj homoj, ĉar aŭdante la sonorigon, post kvaronhoro ili jam hejmeniris kaj la stratoj iĝis malplenaj. La hajdukoj estis senditaj por porti lanternojn, ĉar ankaŭ la senatanoj prenante la lanternojn iros hejmen post la kunveno. (La resolucioj estos evidentaj nur sekvamatenne.) Fenestroj de la domoj iĝis helaj ĝis la dudekdua horo, poste ili iĝis malhelaj. Sur la majesta firmamento miloj da steloj aperis kaj la urbo iĝis pli silenta, ol la arbaro. Nome en la arbaro la arbobranĉoj bruegas. Ankoraŭ ankaŭ en la vilaĝoj estas pli granda bruoj, ol en Lőcse, ĉar en la vilaĝoj la hundoj bojas, sed en Lőcse estas nek arboj, nek hundoj. Ĉi tie la hundojn anstataŭas la nobla konsilantaro, sed ĝi ne bojas (Dio savu nin pro tiu ĉi diro.), sed gardas la domojn kaj havaĵon helpe de la dek tri bastionoj kaj la fermitaj pordegoj.

Kvankam la saksaj civitanoj ne ŝatis la arbojn en siaj urboj, tio ne estas miraklo, ĉar ili venis al Lőcse por dehaki la arbojn (kun sinjoro Arnold, praulo de Görgey), sed en Lőcse estis belega ĝardeno, en kiu estis ekzotikaj arboj, arbustoj, prizorgitaj vojoj. Tio estas agrabla loko somere, kien en ĉiu dimanĉo la loĝantoj iris promeni. Geamantoj promenis tie kaj sur la benkoj amaj vortoj aŭdeblis. Sur la benkojn ili gravuris multe da komencaj literoj de nomoj, kiuj signis la memoraĵojn. En la mezo de la ĝardeno staris unu blankmura ĝardenista

dometo kaj unu drinkejo. Sur tiu estis pentrita la blazono de la urbo (tri montetoj + duobla kruco kaj du arĝentaj leonoj.) Nome la urbo posedis grandan vitoplantejon, kiun iu Thurzó testamentis al la urbo. Ĉi tie en la ĝardeno somere oni vendas tre bongustajn vinojn de Tokaj, kiujn drinkante la homo povos esti similkonduta al leono – aŭ porko. La patricioj volonte promenas en la ĝardeno ankaŭ labortage. La gildoj ĉi tie organizas siajn amuzaĵojn kaj la junuloj la majfestojn. Sed vintre estas ĉi tie trankvilo. La ĝardenisto kaj drinkejmastro eniras al la urbo, ĉar aliokaze la lupoj manĝus ilin. Ĉi tie persekutitaj ŝtelistoj trovas azilon sur la subtegmentoj, aŭ en la veturilhangaro.

Ĉi tiun lokon signis Georgo Görgey por la juna Fabricio.

La nokto estis ege hela, sed la mateno iĝis nebula.

Kiel unua, Fabricio kaj liaj helpantoj alvenis. Iu helpanto estis Nikolao Blom, kies sledo alvenis, la alia helpanto estis barono Kopen, kiu portis ruĝan kaprobarbon kaj fremdan nigran velurvestaĵon kaj blondan perukon. Li aspektis franco, sed li estis sakso el Dresdeno. Li estis filo de sinjorino Marta Blom, pli aĝa fratino de la maljuna Blom, kiu edziniĝis al iu saksano. La juna Kopen unufoje estis en Hungarujo por viziti siajn parencojn, unu semajnon li pasigis en Lőcse ĉe sia kuzo Nikolao. Li estis orgojla, bombasta aĉulo fanfaronanta pri siaj parencoj.

La nebulo malrapide disiĝis. Fabricio ĉagreniĝadis kaj rimarkiĝis:

– Kiel eblas skermi ĉi tie, mi ja, ne vidas la pinton de mia glavo? Ĉi tio ne estas nebulo, sed saŭco.

Ili iradis tien kaj reen, atendante senpacience la kontraŭulon.

– Povas esti, ke tiu ne venos – ridaĉis la barono.

– Tio estas malebla – interkriis Fabricio – Georgo Görgey estas nobelo.

– Ej, mil diabloj! – la barono plendaĉis mansignante – ne ĉiu estas kavaliro, kiu havas spronojn. La koko havas ergoton, tamen ĝi ne estas kavaliro. Kiu estas nobelo, ne certas, ke li estas ĝentlemano.

– Nu, kara kuzo, pri la hungara nobelo vi povas diri multe da malbonaĵoj – klarigis Blom – sed tion ne, ke tiu ne ĉiam aperus por dueli. (Blom ĉiam ŝatis la troigojn.)

– Sinjoroj! Vi havas malvastan limon de la vivkapablo! Nome la rano vidas la bastoneton kiel iun bastionon. Kiuj estas la hungaraj nobeloj? Ĉu tiuj iradas en societoj? Ĉu tiuj legas librojn? Ĉu tiuj ŝatas la muzikon? Tiuj estas kamparanoj kaj havas nur noblan ĉarton. Tiuj diboĉas, despotadas super kelkaj servutuloj. Tiuj voras ĉion, kion la ŝtato donas al ili, sed nenion donas al la ŝtato. Mi miras pro tio, ke vi alte taksas tiujn (samaj estas la nobeloj de Sepeŝ), sed ili ne havas valoran privilegion.

– Sed tiuj havas privilegiojn, same kiel vi, sur kiuj la pulo saltas per du saltoj.

Sed Konrado Kopen furioziĝis:

– Ĉu tio estas sufiĉa? – li demandis ekscitite – laŭ privilegioj de familio Kopen la edzinoj povas sidiĝi, se la regnestrino sidiĝis kaj daŭre povas sidi, se la regnestrino parolas al ili.

– Mi pensas, ke la baroninoj de familio Kopen kapablas dikiĝi. Ĉu ne?

– Nu, tio estas vera, ke iu nobelo de Sepeŝ ne ricevas permeson iri al la regnestro.

– Ĉu? – interkriis Fabricio ruĝiĝinte. – Ĉu vi ne eraras, estimata sinjoro barono? Jam du nobeloj de Sepeŝ fariĝis reĝo de Hungarujo: Johano Zápolya kaj Emeriko Thököly.

La barono malvolonte ridetis:

– Mi povas diri, ke tio ĉi estas malbela parolo, kiam sian juĝiston iu sovaĝa nobelo mortpafas.

– Tio estas alia afero. Ni venĝos tion.

– Mi ne kredas tion. Jam ankaŭ hodiaŭ estas alia etoso.

Sed vi povas kredi, se mi diras. – komunikis Fabricio aplombe. – Sed jam venas la kontraŭulo. Georgo Görgey alvenis kun siaj du helpantoj.

La kontraŭuloj salutis unu la alian manpreman kaj prezentis sin: Karlo Meĉeri, barono Kopen, pli juna Francisko Mariaŝi kaj Nikolao Blom.

– Nun estas tre malbona vetero.

– Ni iru sub la veturilhangaron por ne stari en la neĝtavolo.

Ambaŭ kontraŭuloj kunportis glavojn. La helpantoj elektis la plej akrajn glavojn.

– Unue ni devas decidi – lanĉis Nikolao Blom, – ke la duelo okazu laŭ saksa, aŭ hungara kutimo.

– Tion decidu la defiita kontraŭulo! – supozis Karlo Meĉeri.

Fabricio tiris ŝultron indifere:

– Por mi tio estas tute egala. Decidu mia kontraŭulo!

Georgo Görgey klinis sin facilmove:

– La duelo okazu laŭ saksa kutimo.

La saksa duelo tial estis pli bona, ol la alispeca, ĉar multe da ceremonioj ne okazis. La kontraŭuloj interbatalis ĝis la unua, aŭ ĝis la lasta sangoguto. Oni ne kunportis doktoron kaj ne faris protokolon. Dum la dueloj ne inko fluis, sed sango. Ankaŭ pro tio estis pli bona la saksa duelo, ol la alia, ĉar se la kontraŭulo rekonis sian eraron, tiam sen prestiĝperdo li povis lasi venki sian kontraŭulon. Ĉe la aliaj dueloj se iu ne rekonis sian eraron, ĉar li estis malkuraĝa pardonpeti, tiu volis ĉiamaniere mortigi sian kontraŭulon. La saksa duelo alie okazis nun. Nikolao Blom derompis rektan maldikan arbobranĉon de kaverna arbo kaj en la kavernon ĵetis tri groŝojn. Nome li ŝatis fanfaronadi, ke li havas monon. Ĉi tio estis la punpago, ĉar li derompis la arbobranĉojn. Per la rekta arbobranĉo li faris du samformajn rondojn sur la tero. Nun jam povis komenciĝi la duelo.

La kontraŭuloj iris en la rondojn kaj povis skermi. Kiu elpaŝis el sia rondo, tiu estis malvenkita. Nu, kiu ne volis vidi sangon, tiu elpaŝis kaj la duelo finiĝis. La malvenkito blasfemis iomete kaj pli malfrue iĝis kuraĝa ĝentlemano.

Cetere la saksa duelo havis malkorektaĵojn, sed estis avantaĝa, se iu kontraŭulo havis longajn manojn, ja ĉiuj batoj estis regulaj, sed la piko ne. Artifiko kaj ruzaĵoj estis permesitaj kaj estis utilaj.

Unu, du, tri! Ek! La kontraŭuloj ekskermis. Ambaŭ glavoj trafis unu la alian, ili fajreris. Baldaŭ evidentiĝis, ke la juna Fabricio, la studento de Dresdeno, bone ellernis la skermadon, precize kaj elegante defendis sin kontraŭ la frapoj. Georgo Görgey skermis laŭ hungara maniero, nur per turnadoj de sia manartiko donis la frapojn, ellerninte tiujn de sia patro. Ĉi tiu skermomaniero ĝenis la kontraŭulon, skermanta nun per malrekta glavo, ĉar li alkutimiĝis al la rektaj germanaj glavoj. Tamen ne forlasis lin la memregado, sed trankvile li plie nur defendis sin anstataŭ la atako, ĉar unue li volis ekkoni la taktikon de sia kontraŭulo, do li ĉiam retiriĝis.

Georgo Görgey komencis la skermadon ludeme, nome por li estis simpatia la juna Fabricio. Li pensis, ke prefere prenu Fabricio rabotilon kaj por li estos sufiĉe vundi lin. Sed poste lin ebriligis la klakado de la glavoj, li iĝis ekscitita, ĉar li atakis kaj la alia defendis sin. Li iĝis sangavida kaj kiel ĉiuj Görgey, ankaŭ li komencis ataki leone. Pro tio li pensis, ke ne la studento de Dresdeno staras antaŭ li, sed la sepkapa drako. Kaj li kredis, ke nun li estas Sankta Georgo, la kavaliro. Kaj forgesante pri la pli frue pensita indulgo, li levis la brakon al grandega bato, kiun rimarkinte Fabricio flanken saltis, sed samtempe li same frapis, antaŭ kiun Georgo saltis flanken sed samtempe li ŝanceliĝis pro la elano kaj tuj maldekstren dorseniris.

Meĉeri rapida estis, li subite metis sian glavon inter ilin.

– Haltu! Fabricio elpaŝis el la rondo.

– La samon faris ankaŭ sinjoro Görgey. – Li klopodis manifesti barono Kopen.

Vere tio okazis tiel, ke ambaŭ samtempe forlasis la signitan rondon. Do, ne estas venkinto, ne estas malvenkinto.

La skermadon ili devas komenci denove laŭ la saksa regulo.

– Sed unue ili ripozu iomete – opiniis Mariaŝi.

– Ne. Tute ne – protestis Blom senpripense. – Mi protestas nome de la pulmoj. Mi ne povas senhavigi la pulmon de siaj rajtoj. Ankaŭ ĝi estas grava faktoro. Mi vidis kelkfoje, ke ĝi kapablas esti heroo. Ĉi tio estis grava argumento. Kial nur la koro povas esti heroo?

Pro tio ĉi ili denove ekstaris en sian rondon kaj daŭrigis la skermadon. Nun Georgo Görgey havis malfacilan situacion, ĉar Fabricio skermis pli trankvile, sed pro la ekscito Georgo Görgey ruĝiĝis, anhelis, ŝvitis kaj ĉiam prefere kaj pli bone retiriĝis. Estus eble veti, ke Fabricio venkos. Sed la junan Fabricion ne direktis la

kolero kaj li sciis, ke Georgeto ne povis agi alie ol hieraŭ. Fabricio ne volis vundi lin kaj aplikis la „Grib-artifikon”, kiu ĉiam sukcesas. Nome li volis elbati la glavon el la mano de Georgeto. (Tiu maniero laŭ la saksoj signifas la venkon.) Ĉi tiel la duelo finiĝus sen sango. La glavlevo montras, kvazaŭ Fabricio volus pikatingi la bruston de la kontraŭulo, do li fulmorapide malsupren batos al la glavo de Georgeto. Li kalkulis tiel, ke la glavo falos el la mano de Georgeto. Sed la glavo ne falis el la mano de Georgeto, sed ĝi saltis super la kapo de Fabricio kaj ĉar Georgeto surpriziĝinte pro la manovro etendis sian brakon, la glavo fortranĉis parteton de la maldekstra orelo de Fabricio, kaj eniĝis la ŝultran vestaĵon de Fabricio, sed vundon ĝi ne povis kaŭzi.

Fabricio ne rimarkis tiun mallongiĝon, sed Mariaŝŝi ekvidis la elfluantan sangon el la orelo.

– Sango! – li kriis stentore.

Ambaŭ ĉesigis la skermadon kaj esploris unu la alian, serĉante la sangon.

– Via orelo sangas, sinjoro Fabricio.

– Ĉu vere? – demandis Fabricio surpriziĝante.

Fabricio tuŝis sian orelon. Li sentis fortan doloron kaj lia mano iĝis sanga.

Görgey paŝis al li:

– Mi tre bedaŭras, ke mi kaŭzis malagrablaĵon.

Fabricio kaj Georgo Görgey amikece premis la manon unu al alia.

– Ne gravas – diris Fabricio gaje. – Estas jam en la urbo lama Fabricio, mia patro estas unuokula Fabricio (tempe de Thököly oni elpikis lian dekstran okulon) kaj nun jam estas ankaŭ stumpa Fabricio.

– Ne malĝoju pro tio – konsolis lin Blom – povas esti, ke ĝi denove elkreskos kiel tiu de la salamandro, je kiam vi edziĝos.

Tiam Meĉeri skrapis kalkon de muro de la ĝardenistdometo kaj ŝmiris per ĝia pulvoro la orelon de Fabricio por ĉesigi la sangadon. Tiutempe la homoj malofte iris en la apotekon.

Ankaŭ tio apartenis al la kutimoj, ke la paciĝintaj kontraŭuloj montru sin kune antaŭ la geloĝantoj. Pro tio ĉi Georgo transsidiĝis sur la sledon de Blom apud la junan Fabricio kaj tiel ili enveturis la urbon.

Dumvoje, kiel ĉiam, oni paroladis pri la duelo. Kopen laŭdis admirante la virecan paciencon de Fabricio spite de sia vundo.

– Tio estas certa, ke la raso de Saksoj estas hardita – diris li – ja dum multe da jaroj ili ne fariĝis moluloj.

– Tio ne estas tiel, mia kuzo, ne estu ridinda antaŭ la sinjoro! – diris Blom ekscitite. – Tio ne estas grava afero. Sed mi vidis pli teruran aferon en mia junaĝo. Caraffa palisumigis kelkajn kurucojn rande de arbaro de Plesnic. Tiuj sidis sur la palisoj trapikite kaj indiferece pipfumis. Mi estu diablo, se tio ne pravas. Ni ne povus moliĝi.

Georgo Görgey ne konis sinjoron Blom kaj demandante rigardis al Fabricio, kiu komprenis lian mirkonsterniĝintan rigardon kaj respondis hungare:

– Mi estu diablo, se tio estas prava. Cetere li estas bona knabo ne mensoganta, li nur similas al lupeo.

Alvenante en la urbon, ili elslediĝis. Georgo manpremis kun ili ĉiuj kaj diris al Fabricio:

– Ni estu bonaj amikoj de nun.

Lia voĉo mildiĝis kaj en liaj juglandobrunaj okuloj videblis la amo pri Fabricio.

– Mi ŝatus – respondis la alia – se Dio lasos.

– Li estas brava knabo – laŭdis lin Blom, kiam li paŝis en la domon de la departemento.

– Vi pravas – jesis Fabricio. – Mi tre ĝojas, ke mi ekkonis lin.

Kopen ekridis moke.

– Vi estus devinta diri: mi estas feliĉa, ĉar mian orelon vi detranĉis.

– Jam vi denove ne komprenas la aferon, kuzo – refutis Blom. – Por Fabricio estis pli grava la oreltranĉo, ol liaj ia ajn lerneja kaj universitata atestilo, ĉar li estas jam sinjoro. – Mi ne komprenas.

– Jes, vi neniam komprenos tion, ĉar vi estas germano kaj pli facile estas ŝanĝi koloron de la oceano, ol kompreni ĉi tiujn aferojn. Sed atentu, oni tamburas, ni rapidu!

Vere, tambursono aŭdiĝis de la ĉefa placo. Ĉiuj piedirantoj ekiris al la tambursono. La komercistoj, metiistoj staris ĉe la pordo de la vendejo, aŭ la metiejo portante antaŭtukon kaj ĉapelon. Ja nun ne pri iu vulgara afero temas, sed pri grava okazintaĵo. La fenestroj de la ĉirkaŭantaj domoj komencis malfermiĝi spite al la malvarma vintra vetero. Ĉe la etaĝa fenestro de la domo de la familio-Teŝke videblas la vizaĝo de la juna petola sinjorino Teŝke, kiu portas blankan, krispan, amelitan kufon kaj ŝia vizaĝo similas al ruĝa rozo.

Blom, la persista fraŭlo, rigardis al tiu fenestro. Li mute klinis la kapon salutante sinjorinon Teŝke. Nome sinjoro Nikolao apartenis al tiuj donĵuanoj, laŭ kiuj la elpensita aventuro, pri kiu oni parolas, estas pli bona, ol pri kiu oni ne parolas, sed kiu okazis. Sed certe li ankaŭ ne estis donĵuano, nur fanfaronulo, eĉ li ne havis aventurojn, plivere li nur fanfaronadis. Li ne havis la admiron de la virinoj, sed li ĝuis la timon de la edzoj kaj enviadojn de la amiĉoj.

La tamburanta hajduko finis la tamburadon kaj en la poste estiĝinta silento li komencis legi al la lin ĉirkaŭanta homamaso la jenon:

„Estimante la mortintan juĝiston la konsilantaro dekretis, ke ĉi-jare malpermesataj estas la aranĝoj de la karnavalo kaj la ceteraj gajaj amuzoj, la gildo-festenoj kaj la muzikadoj per diversaj muzikinstrumentoj.

En la sekvaj ok tagoj ĉiuj klopodu ekhavi nigrajn funebrajn vestaĵojn escepte de la geservistoj. Nome, post paso de ok tagoj por ĉiuj estas devige porti nigran

vestaĵon ĉie. Kiu kulpas kontraŭ ĉi tiu dekreto, tiu devas pagi punmonon, kies sumo estas 10-50 taleroj.

Kaj fine la konsilantaro ĉiujn informas, ke la entombigo de la sinjoro juĝisto estos morgaŭ posttagmeze je la 4-a horo, la ceremonio komenciĝos en la Urbodomo, ĉar la dekstra mano de la juĝisto estas fortranĉita, balzamita kaj estos metita en la konsilejon de la urbo en vitro-fenestro por memorigi ĉiujn ĝis la venĝo okazos. Nun ni metas lian korpon en la teron sen mano. Pli malfrue post la venĝo la dekstra mano okaze de la dua entombigo estos metita apud lian korpon.” Iu sinjorino kolere enfermis la fenestron, kiam la hajduko finis la legadon kaj pluiris en alian straton por anonci ankaŭ tie la menciitajn informojn. Ŝi jam komencis kompreni la hieraŭajn vortojn de sinjoro Hulik. Fabricio jesis: „Ĉi tion la konsilantaro bone faris!”

Sed Blom fariĝis furioza:

– Mil diabloj! Jam el la tria urbo oni forigas min! Nome mi fuĝas ankaŭ de tie ĉi. Ho, ve! Ĉi tiu urbo estos enua urbo! Nu, mia amiko Konrado, ni povas iri por paki kaj transloĝiĝi ien. Kien?

– Ni iru al setlejo la Béla, ĉar mi pli volonte vidus tiujn belajn, polajn edzinojn – lanĉis la barono.

– Ne volu fari tion, mia kuzo, ja estis sufiĉe. – Li respondis melankolie. – Prefere ni iru hejmen al Leibitz al mia patro!

7-A ĈAPITRO

Fraŭlinoj taŭgaj junedzinoj

Ĉi tiu ordono sopiranta venĝon, kiel dekreto ege pliigis la reputacion de la senatanaro, sed ĝi efikis negative la komercon kaj la fremdultrafikon.

La sola fojo estis ĉi tiu, ke la konsilantaro de Lőcse malatentis la financajn interesojn de la civitanoj. Pli frue ĝi subordigis ĉion sub tiun. Povas esti, ke ĝuste pro tio prosperis ĝi tiom bone, kiam samtempe la lando falis en malriĉecon.

Ĉu la urbo floris eluzante la monon de la lando? Ne. Ĝi evoluis helpe de sia havaĵo, pri kiu la magistrato disponis.

Nome la magistrato ĉion kolektis por siaj celoj, kiujn niaj prauloj ne elspezis (tial oni diris: "Nur tio estas la nia, kion ni konsumas!") Sed la magistratoj de la saksaj urboj de Sepeŝ nenion kolektis de la loĝantoj kaj ne permesis malŝpari la havaĵon. Iliaj leĝoj estis bonaj kaj laŭ tiuj ili agis. Ankaŭ Lőcse havis kelkfoje bonajn leĝojn, sed ĝi ne plenumis la preskribon de la leĝoj.

En Lőcse al plenumado de la leĝoj estis bezonata porkokoro kaj ege granda disciplino, kiu intervenis en la privatan vivon. La saksajn civitanojn direktas la ŝtato kaj la polico de la naskiĝo ĝis la morto. Iliaj leĝoj decidas pri ĉiuj aferoj. Ili decidas ĉiujn paŝojn de la saksoj, ekzemple por esti ŝparemuloj kaj riĉuloj.

Ili zorgas jam pri la gravedulinoj kaj kiam la eta saksa bebo naskiĝas, ili ĉion faras, ke por ĝi estu ĝustaj cirkonstancoj. Kiam la eta saksa infano naskiĝis, ekde tiam regulo determinas lian vivon laŭ la havaĵo de la familio, kiom da gastoj povas partopreni la baptofeston krom la gebaptopatroj. Krome ili determinas la manĝaĵojn donendajn al la gastoj, ke ne okazu malŝparado. Kaj ĉar ankaŭ la saksoj estas homoj (bravaj homoj), ili provadis trompi la leĝon. Kvankam ili invitis gastojn, tamen ili invitis krome 20-30 baptopatrojn kaj unu grupon de baptopatrinoj. Pro tio ĉi la magistrato determinis ankaŭ la nombrojn de la gebaptopatroj kaj maksimume tri baptanojn ĝi permesis, aŭ baptaninojn laŭ la havaĵa situacio.

Pro tio ĉi post laŭ la rango disvastiĝis la sopirado. La familio, kiu havis unu baptanon, estis ambicia kaj deziris havi du baptanojn. La familio, kiu havis tri baptanojn, estis oligarko. La tri baptanoj pli bone montris la havaĵan staton, ol nun la katastro. Ankaŭ sinjoron Quendel⁵⁹ oni taksis laŭ tio en Lőcse, aŭ en Kéŝmark, ke „li povas inviti eĉ cent baptanojn.”

Tiu ĉi kvalifikado estis grava signo. Se la reĝoj ne malbonigus siajn popolojn donante diversajn titolojn, ordenojn, ankaŭ tiam la popolo povus trovi frenezigan trompilon.

⁵⁹ La familio-nomo Quendel elparolendas: kvendel.

De la baptifesteno ĝis la entombigo ĉio estis reguligita: la edukigaj kostoj, kostoj de la geedziĝoj, kostoj de la nuptoj kaj kostoj de la muzikistoj. Ĉi tiujn kostojn la senatanoj fiksis. Kartludi, kubludi estis malpermesate, la civitanoj ne povis havi kaleŝojn. Pro la enuo la homoj laboris kaj la mono kolektiĝis.

Je kio povis elspezi monon la saksoj? Ili ne povis havi amat(in)on, ĉar la magistrato estus forpelinta ambaŭ el la urbo. Sed, se iu estus havanta amat(in)on /sekrete, ties kosto estus malmulte da mono. El inter la juveloj, la diamantojn, perlojn, smeraldojn, rubinojn porti por la urbanoj, estis malpermesate. Nur la ametisto kaj la ĉeĥa grenato estis trezoro. La saksaj edzinoj la brelokon ne konis. Ili portis senvalorajn arĝentajn kaj orjuvelaĵojn. Tre multe da vestaĵoj estis malpermesataj. La pli malriĉaj hominoj povis porti nur la moravan drapon, la turkan buntan koloran longan jupon, turkajn botojn kaj la persian „mohar“-on. Tiu lasta estis ŝtofo teksita el specia kapro lano kaj taŭgis por vintraj vestaĵoj. Sed ili estis nomitaj simple: moharo. Ĉe la knabinoj, fraŭlinoj estas sufiĉa lukso, se sur la festa antaŭtuko kudrita estis ilia nomo per silka fadeno. (Tio ne estis malbona kutimo, ĉar la fraŭloj povis vidi jam antaŭ la templo la nomojn de la fraŭlinoj.) Servistinaj fraŭlinoj devis porti nur senvalorajn ŝtofojn, sed ili ŝatis fuĝi al regionaj familioj por servi. Sed la sinjorinoj de la pli riĉaj metiistoj, komercistoj jam povis porti belegajn anglajn, nederlandajn drapojn, taftojn, se ili estis vantaj kaj ili havis eblon aĉeti belegajn jupetojn. Nur la edzinoj de la patricioj povis aĉeti silkaĵojn, brokaĵojn kaj veluraĵojn. Sed honesta virino kaj ŝia filino ne portis tiujn, krome la punto de Bruselo estas malpermesata.

La fraŭlinoj povis porti virgulinkufojn, sed diversajn multekostajn mineralojn ne. Ja ilia hararo estas la plej granda valoro. La fraŭlinoj povis porti vestaĵon kun granda dekoltaĵo (ja tio estis senpaga), sed la belulinoj ne aplikis tion, ĉar ili havis platajn mamojn.

Tiun facilaniman vivmanieron, laŭ kiu „ni estas malriĉaj, sed bone vivas“, oni povis ŝanĝi en la saksaj urboj de Sepeŝ, laŭ kiu „ni estas riĉaj, sed malbone vivas.“

Kaj tamen estas laŭdindaj la senatanoj, ja ili kapablis ordoni al la geloĝantoj, kiuj obeis la ordonojn. Nome la registaro estis saĝa kaj pripensema. La juĝisto de Lőcse estis sama kiel la doĝo de Venecio, kiu kune kun la senatanoj aŭtokrate akceptigis la leĝojn kaj malhelpis la infektan lukson, ĉar li bone sciis, ke la nobelaro de la vilaĝo disvastigas la lukson, de kiu pereus la urbo, kies prestiĝo baziĝas sur la havaĵo de la urba civitanaro.

Baze de tio ĉi, la altlandaj saksaj urboj povis prosperi en la 16-a jarcento, kie svarmas la riĉaj civitanoj, kiuj gardas la oron, talerojn en kestoj de siaj keloj, aŭ ili komercadis per vinoj, feloj kaj nun akumulas grandan kapitalon. La nobeloj ĝenerale alterne batalas kontraŭ la turkoj kaj la germanoj, aŭ kontraŭ la imperiestrianoj.

La riĉiĝo havis ceterajn kaŭzojn. Ekzemple la diligento, la ŝparemo, la lerteco de la metiisto kaj la komerco, sed ĉi tiujn nur tiuj mencias, kiuj kredas vidi en la pasinteco, pri devenoj de la grandaj urbaj havaĵoj, sed ili scias nur la ĝenerale uzatan frazon. Sendube, ke la statutoj de la urbo estis bonaj (ankoraŭ ne estis judoj), la komerco evoluis, sed havaĵon ne eblis kolekti helpe de normala ĉiutaga laboro. Multaj homoj diris: „Malgranda fiŝo estas bona fiŝo.” Ĉiuj klopodis akiri havaĵon batalante unu kontraŭ alia. Feliĉe, ĉiam estiĝis novaj valoradoj, kiujn per novaj metodoj oni povis akiri. Aperis la tiel nomataj „feliĉaj buboj”, kiuj konis la manieron kiel akiri la havaĵojn.

Antaŭlonge, kiam la altlandaj saksaj urboj estis malriĉaj, pro unu lerte fortranĉita kapo (se la batalestro vidis), oni donis 4-5 vilaĝojn kiel enspezojn de la batalo. Sed nun, kiam denove estas malriĉaj la altlandaj urboj, povas riĉiĝi iu loka estro, aŭ iu protektita persono de la hungara registaro, se la registaro ne estas konsiderema.

En la menciita epoko estiĝis speciala valorado. Tiu konsistis el la multaj turkaj militkaptitoj. La batalantaj nobeloj – el la militoj – portis multajn turkajn militkaptitojn, ĉefe antaŭ la tempo de Thököly. (Ĉar de tiam estis pli malmulte da turkoj, nome ili malofitiĝis kiel la arboj en la arbaro.) En ĉiuj elitaj domoj nenifaradis la militkaptitoj, kiuj apartenis al la pompo kiel la cervokornaro, aŭ felo de urso.

Tiuj estis samaj trofeoj. La posedanto fanfaronadis al siaj gastoj, kiel li akiris la cervokornaron. Tiu ĝuis la fanfaronadon. La cervo estis pli valora, ol la militkaptito, ĉar la cervo estis manĝaĵo, sed la turko manĝis multe kaj ne volis labori, nur taŭgis por lulado de la infano, por sarki en la ĝardeno kaj porti akvon de la putro.

Do, pro tio la Hungaroj enuis pri la militkaptitoj kaj murmuradis:

Ili donacis kelkajn el ili al la bofratoj, al baptanoj, sed la aliaj restis ĉe ili. La restantaj kaptitoj konstante sopiradis al Mekko. Pro tio la edzino de la posedanto kompatis la kaptitojn kaj instigis sian edzon:

– Ni lasu ilin iri hejmen, certe Dio kompensas nin.

Kiam okazis tiuj ĉi aferoj, agentoj de Quendel de la urbo Béla, aŭ sinjoro Miĥelo Blom el Lőcse aperis en la kastelo kaj proponis, ke li aĉetos kaptitojn por multe da mono, aŭ por bovinoj. Tiuj sinjoroj unue protestis, hontis, sed fine konsentis, pensante, ke tio ĉi estas pli bona, ol proponoj de la edzinoj, laŭ kiuj pagu Dio por la kaptitoj. Fine la hungaroj taksis la sumon kiel honestan salajron.

Ja tio estis fia afero, kiun faris Blom kaj siaj kamaradoj, ĉar la hungaroj simple nur volis liberiĝi de la kaptitoj. Tio estas prava, ke ili ricevis monon por la kaptitoj, sed aliulo donas la monon. Kial ili ne akceptus tion? Ja ili bezonas la monon, ĉiu apenaŭ havas monon. Ĉi tio ne estas malbona afero. Dio mia! Alia maniero ne okazas, ol la kaptitoj iras de iu homo al la alia. „Sinjoroj Quendel,

Blom kaj la fratoj Ŝpic portas hejmen ilin kaj puŝas al la kaptitoj iun sinjoran vorton. Oni estas ne homŝakristoj, ja la spekulantoj faras alie. Tiuj kolektas la kaptitojn, kiujn ili poste bagatelkoste aĉetas kaj vendas altkoste aŭ al la poloj, aŭ al la hungaraj spekulantoj, al sinjoroj Blom, aŭ al Quendel. Blom estas komercisto pri porkoj kaj Quendel estas komercisto pri vino. Cetere ambaŭ estas uzuristoj.

Kelkaj kontoroj okupiĝas pri la kaptitoj, kie la oficistoj kaj agentoj aranĝas la aferojn de la kaptitoj. Ili registras la kaptitojn, priskribas ilian vivohistorion, loĝlokojn, gepatrojn, geparencojn, havaĵajn statojn. Tiujn datumojn ili sendas al Turkio, kie oni kontrolas la datumojn. Dume ili donas la kaptitojn al urbaj civitanoj kontraŭ lubileta pago por labori kiel masonisto, aŭ al ceteraj laboroj. Ĉi tio estis lerte aranĝita. Poste la definitivaj datumoj alvenas el Turkio karakterizante la kaptitojn. Baze de tio oni konstatas la elaĉetpagon, dependantan de la fortostato de la kaptitoj. Samtempe kun la liveraĵo de la kaptitoj alvenas la agentoj de la firmao kaj portas vinon de sinjoro Quendel ⁶⁰ al Oriento. Venante reen oni portas porkojn por sinjoro Blom el Serbio. Tio estas simpla afero kiel la displekto de la harplektaĵo de iu virino.

La historioj de la grandaj havaĵoj havas samajn trukojn. La groŝoj el kupro estas rezultoj de la homa laboro, sed la ormonerojn akiras la eltrovemaj homoj.

Ĉar la mono ĉiam enigis sin en la urbojn, la nobeloj en siaj kasteloj neniam malhavis alian gravaĵon ol monon. Ili povis ricevi nur por la lano, aŭ por la vendataj gebovoj kaj ŝafoj, sed tiujn laŭkutime ĉiam post la sunsubiro forrabis la dise vagantaj grupoj da rabistoj. Ili havis multe da arboj, sed tiutempe oni ne komercis pri la arboj. Ili havis multe da terbienoj, sed ne estis kreditinstitutoj pri bieno. Kiu volis akiri monon pere de sia terbieno, tiu estis mallerta homo. Sinjoro Gruzman antaŭlonge aĉetis la vilaĝon Stojanfalva kontraŭ dek ok markoj kiel porĉiama prezo. Sed post cent jaroj, ĉar la loĝantoj mortis pro pesto, la tiama posedantino, iu nobela fraŭlino vendis la saman vilaĝon kontraŭ unu para flavaj botoj. Ho, ankaŭ la garantiaĵo estis ridinda afero, ja, la bieno restis malmultekosta ĉe la kreditoro.

Unuvorte la nobeloj de neniŭ ricevis monon. Tial sinjoroj Bebek kaj Balaŝŝa devis farigi monon el la fando de la sonorilegoj. La imperiestro ne havas monon, la trezorejo ne havas monon. (Pro tio oni devas transdoni la tutan departementon Békés⁶¹ al la bakisto Harukern por pagi la kelkmil-forintan ŝuldon.)

Sed ie tamen estas mono. Ni diris jam, ke en la urboj ĝi estas. Tion ni devas serĉi tie. Kaj la tiel nomata ĉasado komenciĝis. La filoj de la nobelaj familioj komencis viziti la fraŭlinojn de Lőcse. La „ĉasadon „komencis la sinjoretoj de la

⁶⁰ La familia nomo elparolendas kvendl.

⁶¹ Pri la departemento Békés, bv. vidi la artikolon: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Békés>

departamento Sároš⁶² kaj junuloj de la departementoj Gömör kaj Nógrad⁶³. La famo disvastiĝis plu al la Transdanubo. Miĥeeto Bezerédi de tie portis sian junedzinon nomatan Nina Korb. La maljuna sinjoro Korb donis kvindek mil forintojn. Emeriko Beberci ricevis domon en Vieno de Johanna Gavrín.

Samtempe pligrandiĝis la fremdultrafiko kaj ekvivis sian florepokon en Loĉe (loeĉe). En la urbo trafikis la sinjoraj kaleŝoj, en tiuj sinjoretoj veturadis pri kiuj zorgis sinjoraj koĉeroj. Junaj husaroj akompanis la sinjoretojn volantajn edziĝi.

Ĉi tiel agis la mirinda Providenco, tiu enigma supernatura forto, kiu instigas la kokojn kokeriki tagiĝe, la ĉielvolbon ruĝigas kaj la nokton lumigas. Nu, la patricioj komencis pensadi, kiel ili edzinigu siajn filinojn kaj al kiu filo de la nobeloj. Ĉi tion ĉiuj patricioj deziris fari. Ĉefe la panjoj! Estis alloga la serĉado de kontaktoj al la regantaj klasanoj. Kiom bela afero estis, kiam ies nepo nomiĝis Prónai, aŭ Jekelfaluŝi, kaj ankaŭ la saksoj ne ĉagreniĝis pro tio, ke iliaj bofratoj estu membroj de la hungara elito. En ĉi tiu sopiro naskiĝis iu stranga stultaĵo. Nome en la urbo ne estis gastejoj. Drinkejoj estis, kiujn signis ŝildoj. La civitanoj havis unu ĉambreton, stalon por kvartiri gaston okaze de foiroj. Cetere neniu fremdulo restadis longtempe en la urbo. Kiu estus kredinta pli frue, ke venos la mondo jena?

Se hoteloj ekzistus en la urboj, tiuj akceptus la hungarajn kavalirojn por ekkoni la fraŭlinojn, pro kiuj ili alvenis en la urbon. Ankaŭ publikaj baloj ne okazis. Kvankam la gildoj aranĝis bankedojn, drinkfestojn kiujn la filinoj de la patricioj ne partoprenis. Kvankam la familioj de la patricioj vizitis unu la alian okaze de la nomtagoj kaj ceteraj aranĝoj, tamen tiuj estis izolitaj de la fremduloj. Al la renkonto de la fraŭlinoj kaj fraŭloj estis bezonate tamen, ke ili longtempe vivu en la sama urbo dum sia junaĝo.

Oni devis establi lokon kaj manieron por konatigi kaj eduki la gejunulojn. Ĉi tiel povis estiĝi foj-foje okazis ia stultaĵo ĉe la afero de la perado de la geedziĝontoj. Sed tio ne estis malĝentila kiel nuntempe, sed estis diskreta. Tiu ĉi penso iris en la cerbon de Matilda Klöster, kiu estis klerigita kaj havis severan moralon. Ŝi ankaŭ ĝis nun akceptis knabinojn por eduki, sed ŝi nun luis tri domojn, kiujn ŝi aliformigis dunginte servistojn (kuiriston, lakeon, helpkuiristojn). Vintre ŝi aranĝis kursojn por eduki la fraŭlinojn kiel kondukti laŭ elita sinteno. Oni ne sciis kian efikon havos ĉi tiu ago, ja tiel ŝajnis, ke la riĉaj edziniĝontaj fraŭlinoj estos en vitra fenestro. La nobelaj sinjoretoj komforte povis rigardi la fraŭlinojn kaj dume ili sciiĝis pri la havaĵoj, kiom ricevos la edziniĝonto.

⁶² Pri la Departamento Sároš bv. vidi la artikolon:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Sáros_\(historia_departemento\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Sáros_(historia_departemento))

⁶³ Pri la hungaraj departementoj: Gömör kaj Nógrád, vi povas legi la artikolon:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Gömör_kaj_Kis-Hont

Matilda Klöster, la maljuna fraŭlino, estis filino de la imperiestra kolonelo (ŝia patrino estis filino de la elita sinjoro Loŝonci). Ŝiaj parencoj devenis el multaj elitaj familioj, ŝi korespondadis kun elitaj sinjorinoj sendantaj al ŝi diversajn pork-viandaĵojn. Laŭvorte ŝi estis populara. Ankaŭ tiu anonco servis kiel reklamo al ŝia instituto ke filinoj de la du misfamaj nababoj Quendel kaj Blom: Maria Quendel kaj Klara Blom (la pli juna estis la fratino de Nikolao) samtempe – dum la nuna printempo – fariĝis junedzinoj. Nu, fulmotondro, tio ĉi estas granda afero! Certe en Lőcse nun jam la vivo vigliĝos kaj dum la karnavalo multe da riĉaj kavaliroj venos en la urbon kaj ĉio estos pli multekosta... asertis ŝi.

La nuna Blom de la setlejo Leibic kaj Quendel de la setlejo Béla estas nepoj de tiuj, kiuj pliriĉiĝis pere de la turkaj militkaptitoj. Iliaj prauloj estis negocpartneroj, sed ili jam estas kontraŭuloj. Nur la havaĵo estas malnova. Kiom da havaĵoj estas tie? Neniu scias, ja neniu kalkulas tiujn.

La tuta departemento provis diveni kia estos la doto, kiun la gepatroj volos doni okaze de la geedziĝo, ĉar unu el la du gepatroj estas pli avara, ol la alia. Sinjoro Blom tuj aŭtune sendis sian karan Klaran en la instituton. (Ŝi estis ĉarma adoleskantino.) Sed Quendel sendis sian filinon, Maria – nur en novembro, kiam perslede ili ekskursis al Lőcse. Tiam oni preparolis jam la doton de Klara, sed Quendel parolis kun neni, estante strangulo. Quendel tuj iris al sia filino en la instituton (Maria estis pli bela, ol Klara), li senvorte pagis la koston de la edukado ja li certigis al sia filino la plej bonan edukadon, ĉar kiu povas scii... Quendel ne finis sian direndaĵon, ĉar li havis kutimon lasi enigmon pri sia direndaĵo.

Sed fraŭlino Klöster kapbalancis ekkomprenante la direndaĵojn kaj demandis plu sinjoron Quendel pri la mezuro de la doto de Maria, se povus okazi... Ŝi same ne finis la direndaĵon, ja ŝi estis ĝentila.

– Hm – respondis Quendel – pri kiom da mono regalis Blom?

– Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis ion pri tio en la urbo?

– Ĉu oni jam scias tion?

– Memkompreneble – respondis la maljuna fraŭlino flegme. – Ja tio estas taŭga por disvastiĝo. – Mi parolis kun neni.

Je tio fraŭlino Klöster malfermis la grandan libron en kiu estis registritaj la edukatoj. Ŝi legis la sekvajn vortojn:

– Klara Blom ricevos kvar domojn. El la kvar: du domojn en Kaŝša⁶⁴, unu domon en Buda, unu domon en Eperjeŝ⁶⁵. Krome ŝi ricevos de la saksoj la laŭkutimajn du bovinajn.

⁶⁴ Pri la urbo Kaŝša bv. rigardi la artikolon: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Košice>

⁶⁵ Pri la urbo Eperjeŝ bv. rigardi la artikolon: Eperjeŝ (slovake Prešov) estas urbo en la nuna Slovakio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Prešov>

– Ĉu nur tiom? – demandis Quendel subtaksante la doton. – Kial oni devas tion disfamigi? Nu, tio disfamiĝu! Bonvolu enskribi por Maria ok domojn, el inter tiuj: du domojn en Vieno!

Ĉi tiel Quendel orgojle hejmeniris al sia vilaĝo Béla, kaj li estis feliĉa, ĉar koncerne la dotodonon li superis sinjoron Blom. Sed hejme lia edzino volis esprimi sian miron pro la granda doto de Maria, sed ankaŭ pro tio, ĉar ankaŭ ŝia filo Nikolao tie sin amuzas. Kial ŝi ne povis aŭdi pri la doto? Ŝi persvadis sian edzon por pasigi kelkajn tagojn en Lócse. Kion valoras tiu granda doto, tiu ofero al la filinjo, se ĉi hejme en Bela, ŝi povas aŭdi pri tiu de neniuj? Ja ĉiuj dotoj estiĝas pro la eniando inter la filinhavaj gepatroj. Do, ili veturis al Lócse, sed tie trompo atendis ilin. En la urbo disvastiĝis la famo, laŭ kiu sinjoro Blom vizitis la urbon kaj aŭdinte antaŭhieraŭ la proponon de Quendel, li pliigis la doton de Klara. Anstataŭ kvar domoj, dek ses domojn li donis. Super tiom restis la kroma donaco: la du bovinoj de la saksoj.

Mokaj ridetoj, ridoj akceptis la orgojlajn geedzojn Quendel.

– Ĉu vi aŭdis pri la novaĵo? La pigo piku ĝin! Kiu povus kredi tion? Ja Blom estas ege galanta pri la dotodono!

La sango fluis al la kapo de Quendel, sed lia edzino ekploris: „Mi ne transvivos ĉi tiun malbonon. Gasparo, faru ion!”

– Li estas rabisto! – ekkoleregiĝinte sangoruĝa estiĝis Quendel. – Li volas nin bankrotigi (li furioze ĵetis sian astrakanan felĉapon sur la tablon de la biertrinkejo.)

– Mi timas tion, ke mi faros ian frenezaĵon.

Liaj ĉeestantaj kunuloj – Grosnovicer, Donat Mauks kaj aliaj – silentigis lin:

– Ne ĉagreniĝu, ne kriegu, via moŝto! Blom estas malfacile eltenebla homo. Li ankaŭ diris al ni, ke tio ne estas lia lasta vorto, sed la cirkonstancoj postulis ĝin.

Sed ĉi tiuj vortoj pli forte nervozigis sinjoron Quendel kiu havis al hamstro similan naturon.

– Ĉu? Ĉu tio ne estas lia lasta vorto? Ĉu tion li diris? Kiu diris tion? Ĉu lia filo diris tion? – kriadis li per brilantaj okuloj. – Nu, mi tion diras, – Dio helpu min tiel – ke tio estis la plej lasta. Mi batos sur lian buŝon tiel, ke li povos diri plu eĉ ne unu vorton.

Poste li al si prenis la felĉapon, en la drinkejo postlasante sian edzinon, la bierojn, amikojn, li kuregis al la domo de fraŭlino Klöster. Tie la maljuna damo ĝuste tiam instruis la edukatojn, klini antaŭ la kavaliroj. La fraŭlinoj kiuj anstataŭis la surgenuantajn kavalirojn, helpis ekstari ilin, kiam sinjoro Quendel malfermegis la pordon.

– Por Dio! – ektimis fraŭlino Klöster, rigardante la ekscititan sinjoron. – Kio okazis?

– Tion vi scias plej bone! – furioziĝis la maljunulo. – Tiu fihoma Blom volas bankrotigi min, ĉar dek ses domojn li donas kiel doton. Ĉu tio estas justa?

– Sed tio estas laŭdinda afero – opiniis la fraŭlino severe, indignante, ĉar ne ĝuste kaj ne sur taŭga loko okazis la mencio pri la afero. – Kion mi povas fari kontraŭ tio?

– Sed mi povas fari kaj ankaŭ faros – kriis li minacante kaj gestante, kvazaŭ li per klabo volus bati iun. – Enskribu, fraŭlino, ke Gasparo Quendel donas dek ses urbojn kiel doton de Maria.

La brunaj okuloj de la fraŭlino Klöster fariĝis similgrandaj kiel la prunoj de Duranc⁶⁶.

– Ĉu dek ses urbojn? – ŝi konsterniĝadis, rigardante la okulojn de sinjoro Quendel kaj ŝi forte anhelis. Ĉu tio eblas?

– La dek ses urbojn de Sepeŝ – li aldiris plurfoje anhelante.

– Ĉu vi kapablas fari tion?

Quendel ridetis.

– Kion Quendel eldiris, tio estas sankta kiel la Biblio. Sed povas esti, ke pli multe.

Poste li kisis Marian alkurintan lin, kaj post kiam li promesis, ke ankaŭ ŝia panjo vizitos ŝin, li dignoplene foriris. Fraŭlino Klöster estis fascinita kaj ŝi akompanis la „oran homon” eĉ sur la ŝtupoj. Ĉe la lasta ŝtupo ĉesis lia kolero kaj li jene adiaŭis fraŭlinon Klöster:

– Ho, tiu Blom ege kolerigis min. Ĉefe, ĉar tiu menciis la du bovinojn. Estas bone, ke mi diris mian opinion, ĉar preskaŭ estus frapinta min apopleksio. Ĉar mi, kiel tenera homo bedaŭrus, se mi dirus ian nenecesan vorton, pro kiu la filino de Blom ekkolerus, kiu estas... aĵo... tiu tria bovineto. Dio mia! Bagatela afero estas la afero de la bovinetoj. Kiu scias? Nu, atentu nur! Ankaŭ mi egaligas la proponon. Bonvolu enskribi, ke ankaŭ mi donas unu azenon krom la dek ses urboj. Mia estonta bofilo divenos, kiu estos la azeno...

Li ridegis dolĉe, irante sur la longa korto kaj sur la strato, li batis la bruston kaj konstante ridegis kaj paroladis en si mem.

– Mi estas la azeno... Gasparo Quendel estas azeno.

La piedirantoj mirante rigardis post li, pensante, ke li eble freneziĝis. Sed ne! La maltrankvila hometo iris ankoraŭ dum la monato sur sia sledo al Krakovo, al la pola kortego. Tie li sukcese pritraktis siajn komercajn aferojn kaj poste iris al la kortego en Vieno, kie la kamero estis lia ŝuldanto. Tie li petis akcepton ĉe la imperiestro, kie (tiu persone konis la specialan bankiston de la Supralando de Hungarujo) en humila peticio kaj ankaŭ en vera parolo li prezentis sian ofertan,

⁶⁶ La pruno nomita laŭ Duranco, en la hungara lingvoteritorio nomata Duránc-a estas frukto drupa, kies frukt-karno surkreskas al la kerna semo, la frukto ne estas facile disigebla de ĝi. La nomo de la prunospecio devenas el la mezepoka hungara nomo de la albana urbo Durrës (itale *Durazzo*) – noto de la tradukanto laŭ siaj proprafakaj konoj.

ke li elaĉetos el propra poŝo tiujn dek ses urbojn de la departemento Sepeŝ estante ĝis nun en pola lombardaĵo, por aparteni de nun al Hungarujo, ĉar tiujn li volas certigi kiel doton de sia filino. Tiuj urboj povus aparteni nun jam al la landkorpo de Hungarujo samjure kaj sammaniere kiel ĝis nun al Pollando. Ili pagus la laŭŝan parencan imposton al Hungarujo, ĉar la imposton ne bezonas lia filino Maria.

Al la imperiestro plaĉis la plano kaj oni ekpropagandis. Antaŭ kristnasko la ĉefinspektoro parolis pri tio al la patricioj, sed la departementdomo oponis la aferon. Ŝajnas esti, ke la afero ne realiĝos.

Kial? Dio scias. Ja ĉiam oni veis pro tio, ke la foririntajn urbojn oni devas reaneksi. Pro Quendel oni oponis tion. Sed pro kio ajn oni oponis tion, la lombarditaj urboj povas esti dankemaj. Nome tiuj urboj estas pli feliĉaj en la posedo de la fremda Pollando, ol en Hungarujo, ja ili povas vivi hungaran vivon. Nome la registaro devige instruigas la hungaran lingvon en la lernejoj, sed en la aliaj Sepeŝ-aj urboj apartenantaj al Hungarujo oni ne instruas la hungaran lingvon.

Ĉio ĉi karakterizis la rilatojn en Lőcse, kie komenciĝos la karnavalo. Revoj formiĝis malantaŭ la pelargoniaj fenestroj, kiam eksonis la malbonan famon portanta tamburado por dispeli la revojn.

La ridetanta blua ĉielo iĝis dum momentoj nigre nuba.

La severaj rezolucioj de la senatanaro naskis ĝeneralan malkontenton. Oni diras, ke fraŭlino Matilda Klöster ricevis kardio-spasmojn dum ŝi kriis: „Kio estos nun pri ni?” La komercistoj kaj metiistoj akre kritikis la magistraton.

Tio ne estas bona. Kvankam oni mortigis la juĝiston, tamen la urbon oni ne devus entombigi ĝuste nun, kiam ĝi iĝis vigla. Hieraŭ estis nur mortinta juĝisto, sed hodiaŭ estas mortinta urbo. Ĉi tie eĉ herboj ne kreskos, ĉar la cirkonstancoj estas frenezaj!

Donat Mauks paŝadis al la foiro, li kondukis sian infaneton al la lernejo kaj li devis pene tiri tiun, kiel oni tiras bovon portatan al la buĉejo. La komercistoj vidis lin sur la strato, elvenante el la vendejoj ili ĉirkaŭis lin. Ili demandadis lin kaj riproĉis lin. Kial ili devis bankrotigi la urbon? Kial ili decidis ĉi tiel?

Sinjoro Mauks balbutis, pensadis iom kaj poste respondis la sekvajn vortojn:

– Mi ne tial asertis tion tiel, ja vi povus kredi, ke tion mi tial diris tiel, ĉar mi ne volis diri tion alimaniere.

Pro la respondo ili ne iĝis pli saĝaj, nur la infaneto, kiu fine sukcesis liberigi sin el la mano de sia patro kaj kuris al iu flankostrato, kie eĉ ne tatara trovos lin ĝis tagmezo.

Cerbumis pro la malfeliĉaj okazintaĵoj ankaŭ aliuloj, kiuj ne volis fari venĝon, sed pensis pri saĝaj aferoj.

Nome al la magistrato ne plaĉis, ke la hungaraj sinjoroj venas ĉi tien por pliriĉiĝi pere de la nuptoj. Sed ĉar tio ne estis kontraŭregula, la potenculoj akceptis la intermiksiĝon inter la saksoj kaj hungaroj. Se oni povis kontraŭi tion laŭleĝe, la magistrato ruze, artifice malhelpis la intermiksiĝon, farante el Lőcse funebrantan nigran urbon, kie oni ne povas havi okazon por amuziĝi, muziki kaj vivi kaj oni ne povis deŝiri florojn por iu fraŭlino, ĉar tiuj taŭgas nur por la katafalko.

... Sed ja en la konsilantaro de Lőcse estas tiom multe da saĝo, ke tiom estus sufiĉa eĉ por tri landoj.

8-A ĈAPITRO

Ni donas nian vivon kaj sangon por nia vicprefekto

La urbaj nobeloj ne fartis bone en la urbo, kiel la ornamaj pinarboj ne kapablas miksite vivi en la kverkoarbaroj. La nobeloj havis nur la civitanajn rajtojn, sed kromajn ne, la statuto de la urbo estis deviga ankaŭ al ili. La nobeloj havis pli malgrandan potencon, ol la civitanoj. Laŭvorte la civitanoj regis ankaŭ ilin. Kaj ĉi tion la orgojlaj nobeloj ne kapablis elteni.

Do pro la menciitaĵoj la nobeloj preferis vivi ekster la muroj de la urbo, kie estis pli granda la danĝero ol inter ĝi, sed estis pli granda la libereco. Abunde prezentiĝis militaj aventuroj. La grandpotenculoj – enuante – ofte faris tiajn aferojn, al kiaj estis bezonataj la glavoj de la etnobelaro. Ĉi tiuj etnobeloj ŝatis loĝi prefere sur sia tereno de siaj sep prunarboj en la vilaĝoj inter la kamparanoj, ĉar tie ili estis sinjoroj. Fakte, ke ankaŭ iu grandsinjoro loĝis tie, kiel ekzemple Paŭlo Görgey en Görgő, kiu ne ĝenis ilin, prefere li instigis ilin, ja ankaŭ la granda sinjoro estis membro de la Sankta Krono⁶⁷ kiel ili. Ja la perlo estas ankaŭ tiam perlo, se ĝi estas malgranda kiel la avelo, aŭ unu ero de milio.

En Görgő pri la familioj – Bibók, Fehér, Vállai – oni longe rememoris, ĉar tiuj havis bienojn ĉirkaŭ la setlejo. Iliaj domoj estis preskaŭ tute similaj kiel domoj de la kamparanoj. Ĉar al iliaj domoj apartenis verandoj, kie la etnobeloj kutimis pipfumi, kiu kutimo estis la karakteriza trajto de la etnobelaro.

La domo de familianoj Bibók staris vid' al vide al la suda bastiono de la kastelo de Paŭlo Görgey. Tempe de danĝero, se oni estus bombardataj tra la pafaperturoj, ĉar tiu domo staris rekte antaŭ la kanonoj, unu momento estus sufiĉa por tute detrui ĝin. Jes, estis granda sensenciaĵo konstrui tie tiun domon. Aliuloj jam multfoje parolis pri tio al sinjoro Bibók, sed la familianoj havis je tio bonan respondon montrante al sia blazono, sur kiu estis videblaj krona sciuro sur arbon grimpanta kaj surskribo: „Tiuokaze ankaŭ mi estos sur la transa flanko.” (Nome malantaŭ la embrazuro.) Ĉi tiu diro esprimis milde la eternan fidelecon al la oligarkia familio Görgey, transdonante sur la sigelringo kaj sur la blazono por la idoj la sanktan voton de la aparteno kaj la sindonemo al la familio Görgey.

Tiutage, kiam oni metis la korpon de la juĝisto sur la katafalkon, tagmeze en la korto – Bibók, du junaj aduleskulaĉoj (la du fratoj Bibók) baraktis kun nigra obstina ĉevaleto, kiun ili volis dresi por rajdi. La maljuna Bibók promesis doni ĝin al tiu, kiu kapablos mildigi la ĉevaleton. Sed Horka (nomo de ĉevalino) estis malobeema besto. Ĝi hufbatis, mordis, prancis kaj plej ofte ĝi falis surdorsen. La knaboj vane provis mildigi tiun, ili defalis de ĝi sur la molan neĝkovrilon de la tero. Ĉe la pordego multaj scivolemaj homoj gapis al la amuzo de la knaboj. Puf!

⁶⁷ La estinta hungara reĝlando kutime estis nomata ankaŭ Sankta Krono.

Miĥeieto denove defalis de ĝi. Nun Joĉjo enseliĝis. Haltu! Ĝi tuj kuros en la stalon.

La ĉe pordego starantaj gapantoj faris diversajn rimarkojn:

- Tiel ŝajnas, milito okazos – opiniis iu kamparano.
- Tio ne estus bona.
- De kie la familio Bibók sciis la eksplodon de milito?
- De kie? – murmuris iu maljuna bienservisto ferminte sian pipon, – ili sentas tion instinkte. Ankaŭ mi sentas tion tuj.

- Nu, mia baptano, se tiam estos milito, kiam tiu ĉevalo portos iun knabon tien, tiuokaze milito estos nur post multaj jaroj.

- Sed tio estas prava, ke tiu ĉevalo estas senbrida, sed kiam ĝi estas ĉe la manĝotrogo, tamen estas milda kiel nun naskita ŝafido.

En tiu ĉi momento strangaspekta migranto proksimiĝis al la pordego de la kastelo deflankiĝinte de la landvojo de Lőcse apud la forĝejo. Tiu portis virinan vestaĵon, kiun vestaĵon rimeno kuntenis ĉe la talio. Surkape estis kalpako farita el ŝafidpelto. Li havis hirtan longan hararon kovranta la ŝultrojn. De lia ŝultro pendis stria pano-sako. Unu lia botoplendo estis ligita al la kruringo per ŝnureto. Li estis proksimume kvindekjara grandstatura viro, surkape ĉie estis haroj, barbo, lipharoj kaj brovoj. El inter la haroj brilis du nigraj okuloj similaj al tiuj de hieno. Sur la frunto videblis longa cikatro ĝis la dekstra orelo. Ĉe la talio pendis larĝklinga sabro el kupro, alligita per vulgara ŝnurego, kiu dum la paŝado alterne batadis liajn piedojn.

La fremdulo ne rigardis la gapantojn, sed li enpaŝis tra la pordego en la nobeldomon Bibók.

- Bonan tagon, miaj karaj fraĉjetoj – li salutis ilin, ne levinte la kalpakon.

Iu filo de Bibók ĝuste tiam ĝustigadis la selon flankenglitantan sur la dorso de Horka. Li surpriziĝis pro la alparolo „miaj karaj fraĉjetoj”, li rigardis supren kolere. Sed la alvenanto ne atendinta respondon ekiris al la verando kaj al la vestiblo, de kie inundis laodoro de la kuiriĝantaj manĝaĵoj. Unu filo de Bibók alkriis lin severe:

- Kion vi volas fari tie?

La alveninto ekridegis patose akcentante:

- Mi nenion volas fari, miaj karaj fraĉjetoj, filo de mia edzino, mi nur volas vidi mian patron.

La pli aĝa filo de sinjoro Bibók antaŭsentis iun strangecon kaj postkuris la fremdulon en la ĉambron, dum la gapantoj kaj la nenifaranta servistaro, aŭdante la vortojn de la fremdulo, komencis klaĉadi: Ĉu li diris, ke ili „estas liaj fraĉjetoj”? Ĉu Bibók havis ankaŭ pli aĝan filon de la unua edzino? (Kvazaŭ ili estus aŭdintaj pri li.) Sed la fremdulo ankaŭ tion diris: „Filoj de mia edzino.” Tio estis enigmo, nekomprenebla por la simpla homo.

La gapantoj staraĉis iomete ĉe la pordego, ĉar ili sentis, ke okazas nekutima, speciala afero. Povas esti, ke li estas eksa soldato, aŭ spiono, kiu evidente iras al la familio per iaj mensogaj pretekstoj. Nu, sinjoro Bibók certe forpelos lin per la skurĝo. Sed la fremdulo ne elvenis, oni vane atendis, pro kio Joĉjo kondukis Horka-n en la stalon kaj poste eniris la domon. Post tio Miĥeeto elvenis kunportante kruĉon kaj ŝlosilojn de la kelo. Do, tamen eble ia gravulo trankvile alvenis, ja oni portos vinon por regali lin.

Nun tiel ŝajnis, ke pli interesa fariĝis la apero de la fremdulo, ja malmulte da famaj okazaĵoj okazis en la vilaĝo kaj hejmenirante la gapantoj provis diveni la enigmon. Ili renkontiĝis antaŭ la domo de Matiaso Kramaĉko kun la edzino de Marteno Vojka, kiu rakontis al ŝi la okazaĵojn kaj poste ŝi rakontis al ili la tutan teruran historion.

– Sankta bona Dio! – ŝi kriis kunfrapinte siajn manojn. – Ja, tiu povas esti Sigmundo Bibók, kiu mortfalis en la milito de Thököly.

– Sed se li mortfalis, tiam tiu ne povas esti li.

– Se li mortfalis, do li tamen ekstaris – interdiris sinjorino Vojka – ne ĝenu min! Multfoje okazas, ke iu estas malliberulo ĉe la malamiko, dum ĉiuj kredis lian morton kaj poste subite li aperis kiel vivulo. Tiu estas certe Sigmundo Bibók, kiu edziĝis, lin oni atendis hejmen, sed vane. Poste la maljuna Bibók ekamis sinjorinon Bibók naskitnome Suzana Valai Feher. Nu, oni tiam diris: „Ankaŭ la maljuna kapro ŝatas salon.”⁶⁸ Kiam la atestantoj atestis, ke Sigmundo, filo de Bibók, mortfalis, la maljuna Bibók edzinigis sinjorinon Suzanan.

Ili ekhavis du filojn. Nun Sigmundo diris la sekvajn vortojn: „Miaj karaj fraĉjetoj! Filoj de mia edzino! Ĉu vivas ankoraŭ nia patro?” „Sankta Dio! Ho, ve! Kio estos ankoraŭ el tio ĉi? Sigmundo hejmenvenis. Ho, ve!”

Poste ŝi haste ekiris al la domo de Bibók. Sinjorino Marják (nome Dio direktas la paŝojn de siaj elektitoj) ĝuste tiam finis la bakadon de la plektaĵa bakaĵo kaj volis porti el ĝi parton por gustumi al sia baptonimo, la edzino de la forĝisto. En la sama momento ŝi renkontiĝis ĉe la pordego de la kastelo kun sinjorino Vojka.

– Ĉu vi scias, kio okazis? – demandis anhelante sinjorino Vojka, sed ŝi tuj ankaŭ respondis. – Imagu, mia kara animo, hejmenvenis sinjoro Sigmundo Bibók, la edzo de sinjorino Vincento Bibók.

Sinjorino Marják unue ne perceptis tion, nur rigardis sinjorinon Vojka.

– Ĉu vi ne komprenas tion? – kriis sinjorino Vojka. – Ŝi havas nun jam du edzojn.

Sed sinjorino Marják tre bone komprenis tion. Ŝi estis genio pri ĉi tiuj aferoj, sed ŝi volis ĝui iom post iom la klaĉojn.

⁶⁸ Tiu frazo estas hungara proverbo – rimarko de la tradukanto.

– Ĉu ŝi havas du edzojn? Nome sian duonfilon kaj sian unuan edzon, nome de sia nuna edzo, al kiu ŝi estas la tiama bofilino. Ĉu tio estas ĉi tiel? Tio estas terura. Ĉu ĝi pravas? Ĉu iu vidis lin jam?

– Neniu vidis lin. Sed mi iras tien, ĉar mi volas vidi lin, ja treege scivola mi estas.

Ankaŭ sinjorino Marják pensadis same kaj tiel pensis, ke la bakaĵon ŝi portos al sinjorino Bibók. La baptanino atendu ĝis posttagmeze.

– Kvazaŭ ni estus priparolintaj la renkontadon – respondis sinjorino Marják – ankaŭ mi iras tien, portas fajnan bakaĵon al sinjorino Bibók. Mia Dio, la malfeliĉulino, kion ŝi faru? Dum kristnasko ŝi sendis al nia mastro vinberojn, kiuj estis ankaŭ tiam ege freŝaj. Kelkaj edzinoj kapablas konservi la vinberon. Mi pensis tion, ke mi portos al ŝi iun bakaĵon.

Nun jam ili kuniris al geedzoj Bibók, sed ili levis la subon de siaj jupoj, ĉar en la korto estis koto. Nome el la stalo fluis la sterkosuko kaj en la korto degelis la neĝo. Sinjorino Vojka dumvoje diris la detalojn kaj admonis sinjorinon Marják en la vestiblo:

– Ni faru tiel, kvazaŭ nenion ni scius.

– Ĉu ni scias ion? – demandis sinjorino Marják. – Ja ni scias nenion. Nur ni paroladis senkulpe.

Dume ili enpaŝis en la malantaŭan ĉambron (nur tiun ili hejtis vintre) kaj vidis la atenditan scenon. La fremdulo sidis ĉe la ĉefloko de la tablo, disbutoninte sian mantelon. Li manĝis rizkaĉon kun anseraĵo bonguste, de sia frunto la ŝvito fluetis. Li estis kontenta, sur sia barbo estis ruĝa strio, devenanta de la tomatosupo. Apud li sidis ambaŭflanke la filoj de Bibók. Ĉe la tablo sidis la maljuna Vincenzo Bibók portanta neĝblankan hararon. Li ne manĝis, nur gapis sian teleron kaj frapetis sur la tablo tremetante. Sinjorino Bibók estis nek vivanta nek mortinta. Ŝi viŝadis la telerojn kaj estis pala, kvazaŭ ŝi estus veninta el la tombo. Cetere iam ŝi estis ĉarma edzino. Oni diras, ke la floro velkas, se oni ligas ĝin al ŝima paliso.

En la ĉambro regis prema silento. Ĉiuj konsterniĝis. Ankaŭ la hundo kuŝis malbonhumore sub la tablo kaj ne manĝis la ostojn de ansero.

Sinjorino Bibók tuŝis malagrabla la vizito de la du virinoj. Sed ŝi devis esti fortanima. Ŝi devis paroladi kun ili. Sinjorino Vojka petis prunte iun kribrilon kaj sinjorino Marják transdonis la restaĵon de la bakaĵo, kiun la vicprefekto ne manĝis.

– Mi dankas humile – respondis sinjorino Bibók kaj metis la bakaĵojn sur sian teleron.

– Mi tre ĝojas, ke vi akceptas kuname ĉi tiun bagatelaĵon – komencis konversacii la ruza sinjorino Marják – kiam vi havas gaston.

Kaj ŝi provis rigardi la fremdulon. Sed sinjorino Bibók ne respondis. Ŝi, tiel ŝajnis, ne volonte vidis la vizitantojn.

„Nu, tio ĉi estos malfacila afero” – pensis sinjorino Marják, sed ŝi ankoraŭ esperadis. Ŝi diris al la maljuna Bibók:

– La sinjoro vicprefekto sendas sian bonvolan saluton.

La kadukulo ion balbutis nekompreneble, sed okazis io, kio ŝajnis kiel sukceso. La fremdulo drinkis multe el la kruĉo kaj rigardis kolere sinjorinon Marják:

– Nu, mi ne dezirus esti en lia haŭto!

– Ĉu vi komprenas, pri la haŭto de la sinjoro vicprefekto?

– Jes, en haŭton de la sinjoro vicprefekto Paŭlo Görgey.

– Sed li estas treege fama homo.

– Aliokaze povas esti, sed nun ne. Oni tre koleras lin. Mi alvenis tien ĉi de Lőcse, kie oni rezoluciis kontraŭ li, tre ege severe.

– Sankta Dio! – teruriĝis sinjorino Marják. – Ĉu oni treege koleras lin? Kial?

– Ĉu vi ne scias, kio okazis tage de novjaro dum la ĉasado? – miris la fremdulo kaj drinkis el la kruĉo pro la mirado, poste donis la kruĉon al la maljuna Bibók gaje:

– Drinku, mia patro. Certe okazos io. Ne indas malĝojadi, ĉar mi vivas.

Sed sinjorino Marják volis ekscii pli multe.

– Mi aŭdis pri tio, sed kion vi diras...

– Mi nur tion diras, ke li faris malbonon.

– Li nur incitetis iomete kun ili – plibeligis la aferon sinjorino Marják.

– Tio ne estis ŝerco, ja li mortpafis la juĝiston.

– Ja tiu estis sesdekkvarjara. Ĉu li volis vivi eterne?

La fremdulo ridegis.

– Vi povus esti bona Dio, onjo, – li diris kaj denove drinkis el la kruĉo, el kiu la maljuna Bibók ne drinkis. – Vi facile povus aranĝi la krimojn.

– Ho, mi estas fidela kristano. Kvankam mi ne vizitas la templon, ĉar mi devas kuiri la tagmanĝon. Nome la vicprefekto ne povas manĝi manĝaĵojn de aliaj. Sed mi ĉiuvespere preĝas. Mia animo similas al iu blanka kolombo, pro tio oni ne protektas la krimojn. Sed mi povus doni mian sangon por mia mastro. Do, kion vi volas fari?

– Tion mi volas diri nur al la sinjoro vicprefekto – respondis Sigmundo Bibók (ĉar vere li estis) – posttagmeze mi iros al li. Ĉu li ne volas iri ien posttagmeze?

– Mi pensas, ke li estos hejme.

Sinjorino Marják ne daŭrigis la paroladon. Ŝi adiaŭis kaj hastis hejmen. Sed sur la strato antaŭ sinjorino Vojka faris grandan riproĉon al la hejmenalvenanta sinjoro Bibók:

– Li estas abomena homo. Li tiel aspektas, kiel iu stultulaĉo. Ankaŭ la fama Jánošík estis pli honesta, ol li. Kaj li nomis min onjo. Li estas impertinenta! Ho, ve! Malfeliĉa sinjorino Bibók! Sed li estas pli aĝa, ol mi.

Ŝi adiaŭis sinjorinon Vojka kaj anhelante hastis hejmen por sciigi la vicprefekton pri la fama okazintaĵo kaj pri la malbonaĵoj, kiujn Sigmundo Bibók portis de Lőcse. Sed ŝi jam malfruis, ĉar samtempe alvenis sur la dorso de ĉevalo la juna Georgo Görgey kaj detale raportis pri la okazintaĵoj de Lőcse kaj pri la severaj resolucioj de la senatanoj.

La vicprefekto estis pala kiel la muro kaj laca kaj elĉerpita. Li atenteme aŭskultis Georgon Görgey kaj pro la aŭdaĵoj li iomete vigliĝis.

– Ĉu vi pensas, ke ili volas mortigi?

– Mi ne kredas tion, ja vi estas vicprefekto de Sepeŝ, ili ne kuraĝos bati vin. Sed tamen estu singarda, ĉar se la saksoj freneziĝas, tiukaze ili estas danĝeraj.

– Vi pravas – respondis la vicprefekto. – Mi ne havigos ĝojon al ili, ĉar tiukaze mi estus freneza. Prefere ili freneziĝu.

– Tio estus plej bona, se vi forirus de tie ĉi al Toporc al mia patro. Tie vi pasigu proksimume duonjaron ĝis la kolero de la saksoj ĉesos.

– Ĉu mi forfuĝu? Ne, tion mi ne povas fari, ĉar unuparte mi estas Görgey, aliparte, ĉar mia brutaro restus sen mastro kaj mian kastelon oni prirabus kaj bankrotigus min.

– Ĉu vi ne timas ĉi tie?

– Vi pravas. Mi timas, sed ne la urbon Lőcse. La muroj de tiu ĉi kastelo estas sufiĉe fortaj kaj se miajn servutulojn mi ekzercigos iomete kaj dungos soldulojn, tiam ili povos defendi min kontraŭ kiuj ajn. Sed mi timas...

– Ĉu la imperiestron?

– Ne, sed la vilaĝan pedelon, mian pli junan fraton, kiu punis ankaŭ Kainon tiutempe kaj de tiam ĉiujn li punis, mi kulpis same. Tiu regas super mi, pro kio mi ne havas apetiton, trankvilon, dormon. Jam mia vivo ne estas valora.

– Mi pensas, vi, onklo Paŭlĉjo, konsideras la aferojn tro pesimisme.

– Estu tiel kiel la sorto volas – respondis la vicprefekto rezignante. – Mi sentis, ke estos fino de mia senmezura impetado kaj mi suferos pro tio. Mi vane batalis kontraŭ ĝi.

Estas fakto, ke Paŭlo Görgey jam hieraŭ estis ege teruriĝinta, kiam la hajduko portis la famon, laŭ kiu la juĝisto de Lőcse mortis. Li iĝis tre-tre maltrankvila. Li aŭdis sekretajn voĉojn el inter la muroj. Vespere ŝajnis tiel, kvazaŭ Kramler, la juĝisto, estus elpaŝinta el angulo de la ĉambro. Nokte la juĝisto sidiĝis sur la randon de la lito. Paŭlo prefere ellitiĝis, li iradis tien kaj reen en la ĉambro ĝis noktomezo pripensante la konsekvencojn. Poste li sidiĝis ĉe la tablo kaj skribis

leterojn. Li skribis unu leteron al Karlo Dessewffy⁶⁹ en Vieno, la alian al Miĥelo Just en Buda, en kiuj li priskribis la disputon okazintan inter li kaj la juĝisto de Lőcse, kaj ties sekvo, la tragedion de la juĝisto. Li petis tiujn, ke pere de la kortego kaj la palatinĵupano ili reprezentu la malfeliĉan okazintaĵon tiel, ke ĝin oni ne pritaksu kiel kapokostan krimon pripensitan de li.

– Ja, se mi ne havus orfan filineton, tiam mi ne timus la morton. Sed mi devas pripledi mian aferon. Mi ne kapablas klarigi mian faron ĉe Dio, pro tio almenaŭ vi helpu min.

La juĝisto Kramler ne estis nobelo.

Kun ambaŭ leteroj Preston ekvojaĝis la sekvan matenon, pro kio la vicprefekto iomete trankviliĝis. Li kredis, ke la leĝa parto de la afero estas aranĝita. Li ne pensis, ke Lőcse taksis la aferon grava kaj tial trostreĉis la aferon. „La kato timas la urbon, sed ne mi” – li pensis en si mem. Li supozis, ke en la urbodomo impetaĵoj, akraj diskutoj kaj paroloj okazos kaj delegitaro iros al la ĉefprefekto, antaŭ kiu li, la vicprefekto, faros bedaŭran deklaron, kiu plaĉos al la civitanoj, kaj li donos cent forintojn por la urba hospitalo, kio kontentigos la monavidon de la civitanoj. Ĉi tiel la kolero de la urbo ĉesos. Sed li tre konsterniĝis pro la rezolucio, laŭ kiu la urbo funebros ĝis la morto-venĝo krome la balzamitan manon de la juĝisto oni enterigos nur post la venĝo. En la sekretaj aferoj estas granda forto, kiu imponis ankaŭ al li. Ĉi tion li ne diris al Georgeto, sed tamen ili ege igis lin pensadi. Li iĝis iom pli vigla kaj decidis defendi sin. Li batalis prefere kontraŭ la saksoj, ol kontraŭ la fantomoj.

– Ĉu vi ne konas iliajn planojn?

– Mi ne konas tiujn, onklo Paŭlĉjo. La saksoj ne klaĉas, la departementanoj same ne parolas al ni pri siaj planoj. Ni eksciis nur tion, kion ili komunikis al la publiko.

– Estus bone, se vi informiĝus pri kelkaj aferoj. Parolu intime kun Grodkovski, kiu estas mia fidelulo. Promesu al li en mia nomo, ke li estos antaŭanto de juĝisto de la servutularo, se li ekscios ion, krome li amindumas al la edzino de Pálfalvi. Pálfalvi ĉion klaĉas pri la okazintaĵoj. Se vi ekscios ian famon, tiam vi tuj mesaĝu! Nu, kial vi ekstremis? Ĉu ankaŭ vi, mia filo, Brutus?...⁷⁰: Ĉu povas esti, ke ankaŭ vi estas mia kontraŭulo?

– Mi ne, onklo Paŭlĉjo. Mi provos ekscii ion.

– Nu, iru al sinjorino Marják kaj petu ŝin por fari vian ŝatatan manĝaĵon.

Restinte sola li denove trapensadis la okazintaĵojn. Ne estas maleble, ke armeo atakos lin, aŭ oni ekbruligos la kastelon. Pro la fajro li devas eskapi. La

⁶⁹ La nomo Karlo Dessewffy elparolendas: deĵefi, laŭ la elparola regulo de Esperanto.

⁷⁰ La frazo estas romepoka mallonga diro – rimarko de la tradukanto.

urbo havas bonajn kanonojn kaj gardistaron. La homoj bone lerte uzas la armilojn. Povas esti, ke iunokte ili alvenos ĉi tien.

Pri ĉio ĉi li meditadis, kiam Georgeto revenis.

- Nu, jam estas iu, onklo Paŭlĉjo, kiu pli multe scias la okazintaĵojn, ol mi.
- Kiu estas tiu? Kie estas tiu?
- Sinjorino Marják parolis kun iu, kiu nun alvenis de Lőcse.
- Tiu sinjorino estas grava homo. – diris la vicprefekto – ŝi envenu tuj!
- Mi parolis kun ŝi, sed ŝi knedis ion kaj faris fritfarunaĵon.
- La diablo portu la fritfarunaĵon.

Post ne longa tempo sinjorino Marják envenis kaj anoncis pri la alveno de Sigmundo Bibók, pri kiu oni kredis, ke li mortis. Li pasigis la pasintan nokton en Lőcse, kie li eksciis terurajn novaĵojn. Li diris, la kapo de la vicprefekto valoras neniom. Sinjorino Marják diris ankaŭ tion, ke Sigmundo faros viziton ĉe la kastelo-loĝantoj en Görgő kaj persone rakontos pri ĉio.

– Ja vi havos sufiĉe da malbonaĵoj, moŝta sinjoro – finis sinjorino Marják. – Mi ne scias, kiel vivos unu apud alia unu edzino kaj la du leĝaj edzoj. Iu edzo estas la filo, la alia estas la patro. Vi certe ne havis ankoraŭ saman proceson.

– En mia junaĝo mi konis tiun Sigmundon Bibók. Li estis ankaŭ tiam ruza homo. Li varbis soldatan taĉmenton el kanajlaroj. Tiuj batalis aŭ apud Thököly, aŭ apud la imperiestro, laŭ la soldo. Tio estas stranga, ke post multe da jaroj li aperis. (Ĝuste nun – li pensis – ĉar li tutcerte estas tiu homo.) Ĉu li estas ankoraŭ vivoforta?

– Li estas kiel fortikulo. Sur la vizaĝo estas cikatroj, do povas esti, ke li pendis jam ie sur pendumilo.

– Sendu al li la hajdukon por konduki lin ĉi tien, ĉar post la tagmanĝo mi volas paroli kun li. Nun tuj surtabligu la tagmanĝon.

La tagmanĝo baldaŭ finiĝis. Paŭlo kaj Georgeto sidis ĉetable. Nuntempe por la advokatkandidatoj oni surtabligas en la manĝejo. La vicprefekto iĝis pli gaja, lia kuzo sidis kontraŭ li ĉe la tablo. Antaŭ ili estis zorgon pelanta vino de Tokaj. Li parolis pri ĉio, sed pri la „kazo” ne, kvazaŭ ili estus forgesintaj tion. Li menciadis, ke li volas iri dum la paskofestoj al Osgyán (oŝdjan) por viziti Rozalian. Ŝi estas jam granda knabino kaj skribas karajn leterojn. Posttagmeze, mi laŭtlegos al vi unu leteron” – promesis sinjoro vicprefekto. Poste li silentiĝis kaj iom post iom malsereniĝis, poste tamen li neatendite alparolis Georgeton:

- Kion vi konsilas al mi pri tiu ĉi afero?
- Ĉu mi? Pri kiu afero?
- Pro tiu ĉi homomortiga afero.

Georgeto ekridetis.

- Ho, ve! Dio mia! Ĉu mi konsilu ion al iu grava homo de la departemento?
- Mia dolĉa kuzo, ĉiuj estas azenoj pri siaj aferoj. Do, tamen...

- Sed mi estas azeno ankaŭ pri aferoj de la aliaj, onklo Paŭlĉjo.
- Nu, tio estas tute egala. Sed tamen diru, kion mi faru nun?
- Ĉu mi diru tion?
- Mi petas vin.

– Do, mi abdikus la oficon de la vicprefekto.

La vicprefekto iĝis maltrankvila.

– Vi pravas. Mi nun jam vidas, ke vi estas azeno. Estus stultaĵo demeti la plej fortan kirason kiam la plej multe da kugloj flugas al mia brusto.

Georgeto Görgey ruĝiĝis. Li hontis, ĉar lia onklo malaprobe superkriadis lin.

– Nu, mi tiel komprenis – li defendis sin – ke la ofico de la vicprefekto ne estas kiraso, sed estas belega kaftano, kiun tiuj havas, kiuj donis porti tiun por tri jaroj. Se oni pafus al mia korpo kaj truus la kaftanon ne estanta la mia, tiam mi simple demetus tiun.

Paŭlo Görgey konsterniĝis. La opinio de Georgeto surprizis lin. Subite li etendis sian manon al sia kuzo.

– Vi estas sinjoro pensadanta sinjormaniere. Vi konvinkis min, bubo. Mi abdikos pri la ofico de vicprefekto.

Post la tagmanĝo li tuj hastis al la manĝejo de la advokatkandidatoj, kie kelkaj sinjoretoj gastis brue diskutante. Iu maljuna skribisto sidis ĉe la fino de la tablo, nomata Muki Morton, kiu plenigadis ĉies glasojn. La vicprefekto nur malofte deziris tagmanĝi kun la sama societo. Li preskaŭ ĉiam tagmanĝis sola.

Li ordonis kunvoki la nobelaron de la departemento al Görgő por kunveni. Tri paĝioj portu la kunvokantajn leterojn al la regionoj. Dume li tuŝis la ŝultron de la maljuna skribisto.

- Mi volas paroli kun vi, sinjoro Morton.
- Bonvolu diri, moŝta sinjoro.
- Venu en mian ĉambron.

La maljuna skribisto paliĝis. Ĝis tiam ankoraŭ ne okazis, ke la vicprefekto volis konsiliĝi kun li.

– Unue gravas, ke ili tagmanĝu trankvile.

La maljuna sinjoro Morton estis talenta homo, kiel skribisto maljuniĝis apud ĵupanoj de Sepeŝ. Li estis saĝa kanoniko de Roĵnjo⁷¹. Li tre detale konis la tutan ŝtataadministradan sciencan kaj krome havis grandan memorkapablon, pro kio la homoj gapis al lia sciaro. Li estis fidelulo, fidindulo, ne kartludanto kaj li ne estis diboĉulo. Li havis nur unu eraron, pro kiu li ne povis prosperi, sed tiun li ne konis, ĉar tiam li estus ĉesiginta tiun eraron. Nome li kapablis skribi tiom belege, ke oni menciadis tion tutmonde. Oni diris, ke la palatinĵupano, kiu ofte ricevis leterojn de la vicprefekto, tiujn en sia poŝo portadis kaj al ĉiuj montradis, ke iu

⁷¹ Pri la urbo Roĵnjo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Rožňava>

lerta homa mano reprezentas la arton de la skribo. Nome la literoj de Muki Morton vivis, ridis kaj brilis sur la bela papiruso de Diósgyőr⁷².⁷³ La vicprefekto de Sepeș ne povis nei la sukceson de Morton kaj ĉiuj homoj sciis, ke la manuskriptoj de la vicprefekto de Sepeș estas la plej bonaj, la katedralo de Kaŝša⁷⁴ estas la plej bela, la Sankta Stefano-turo de Vieno estas la plej alta kaj la peklita ŝinko de Miŝkolc⁷⁵ estas la plej bongusta. La ofico de Muki Morton estis dumviva ofico kaj li restis skribisto de la departementdomo. Sed li estis meritinda esti konsiliano. Tamen konsiliano povas esti multe da homoj, sed Morton estas unika skribisto. Mi ne scias, kio okazos, se lia mano komencos tremeti.

Li viŝis la buŝon post la tagmanĝo kaj timeme frapis sur la pordo de la vicprefekto.

La vicprefekto ciumis lin, kiam ankoraŭ ankaŭ la vicprefekto estis advokatkandidato, kio ne ofendis la dignon. Ankaŭ nun li ciumis la maljunulon.

– Ĉu ci ne aŭdis iam pri iu Sigmundo Bibók?

– Sed jes – respondis la skribisto tuj. – Tiu estas nobelo de Görgő, li estas la filo de la maljuna Vincenzo Bibók.

– Kio okazis pri tiu?

– Tiu mortis iam en la tempo de bataloj de Thököly.

– Ĉu vi scias tion certe?

– Mi ne scias certe, ĉar mi ne estis sur la loko de la morto. Tamen mi scias, ke al sia sekva edzino tion asertis la tiama vicprefekta ofico, ke li mortis. Tiutempe Johano Görgey estis la vicprefekto.

– Ĉu vere? Sed vi jam ne memoras tiun, kiu estis lia edzino?

– Sed jes! Ja mi skribis la skribaĵon. Ŝi estis sinjorino el Krakovo. Kiel oni nomis ŝin? Oni nomis ŝin Jasenskaja Vanda.

– Hej, se tiu skribaĵo ankoraŭ ekzistus. Certe tiu ekestas en la arkivejo de la departemento. Mi bone rememoras, ke de la urbestro de Krakovo venis la peto, kvazaŭ ankaŭ nun mi vidus la stampon.

– Ĉu ĝi estis antaŭlonge?

– Jes. Minime antaŭ dek sep jaroj. Tiutempe mi estis en Toporc apud la vicprefekto kaj ni demandis pri Sigmundo Bibók la juĝiston de la servutularo, kiu respondis tion, ke li mortis kaj lia edzino edziniĝis poste al aliulo.

– Hm. Tiu juĝisto de la servutularo eble estis mi.

⁷² Pri la paperfabriko de Diósgyőr: https://hu.wikipedia.org/wiki/Diósgyőri_Papírgyár

⁷³ Pri la setlejo Diósgyőr: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Diósgyőr>

⁷⁴ Pri la urbo Kaŝša: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Košice>

⁷⁵ Pri la urbo Miŝkolc: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Miskolc> – pri la historio de la urbo: https://hu.wikipedia.org/wiki/Miskolc_története

– Por mi estis tio suspektinda – daŭrigis la maljuna skribisto – ja kial povas informiĝi la edzino pri sia edzo, se ŝi scias, ke tiu mortis kaj kial ŝi ne scias, ke tiu mortis, se ŝi edziniĝis al aliulo? Pro tio ĉi mi rememoras ĉi tion.

– Ĉu vi ne menciadis antaŭ mi ĉi tion iam? – demandis la vicprefekto.

– Mi menciis tion, unu fojon, kiam mi venis ĉi tien kaj mi ekkonis la eksan sinjorinon de Sigmundo Bibók.

– Nu, jen! Mi jam rememoras malklare, ke ci rakontis al mi pri ĉi tiu fihoma Bibók. Se tio ĉi estas prava...

– Tiam tio estas bigamio – kompletigis la frazon sinjoro Morton. – Mi tuj vidis, sed nur diskutadi kun la mortinto ne estas inde. Simple mi diris al la urbestro de Krakovo, ke Sigmundo mortis.

– Nu, ci respondis malbone, ĉar mi aŭdis, ke tiu vivas.

– Ĉu tiu vivas? Tio estas malebla!

– Sed tiu ne nur vivas, sed ankaŭ alvenis al la vilaĝo. Ankaŭ tion mi aŭdis, ke li ĝuste nun estas ĉi tie.

La husaro enpaŝis por anonci, ke sinjoro Vincento Bibók kaj lia edzino petas permeson por viziti la sinjoron vicprefekto.

– Ĉu ili estas duope?

– Ankaŭ tria persono venis kun ili.

– Ĉu mi rajtas foriri? – demandis la skribisto sian mastron.

– Atendu iomete. Mi volas admoni, se ci pli frue ne parolis pri tio ĉi, tiam eĉ nun pli malfrue ci ne parolu pri la afero. Mi havas planojn pri tiu ĉi Bibók. Se ci dissendis la invitilojn, oni iru al Lőcse kaj serĉu tiun skribaĵon el Krakovo en la arkivejo. Mi esperas, ke ci trovos tiun.

Post la foriro de Morton modesta frapado aŭdiĝis sur la pordo kaj post krakado kaj je la diro „estas permesate” la tri personoj paŝis en la ĉambron. Kiel unua enpaŝis la kaduka Bibók, kiu havis grizan hararon kaj artefaritajn piedojn. Li portis bekeŝon el ŝafidfelo, ĉirkaŭ lia maldika kolo estis ruĝa-blanka-verda kolora brodita tuko. Post li la komuna edzino paŝetadis, sur ŝia kapo estis ruĝstria tuko kaj sur ŝiaj okuloj videblis la ektimiĝo. En ŝia mano estis poŝtuko, per kiu ŝi viŝadis ŝiajn nazon kaj okulojn. Poste sinjoro Sigmundo sekvis portante la jam mencitan vestaĵon sed la sabro ne estis ĉe li. Li paŝadis senĝene, hejmece en la ornama ĉambrego, kvazaŭ ĉiam li estus tie. Kiam li atingis la skribotablon kie Görgey sidis, li supereme etendis manon al la vicprefekto:

– Mi estas Sigmundo Bibók.

Sed ambaŭ manoj de la vicprefekto estis okupitaj, ĉar parte ĝi kubutinte subtenis lian kapon, aliparte li prenis la pipon. Ĉi tiu frigideco ĝenis sinjoron Sigmundo pro kio li mute alrigardis la vicprefekton. La kapo de la vicprefekto estis tre impona, ja li estis la korpiĝinta potenco. La maljuna sinjoro Vincento tremetis. La vicprefekto rimarkis tion kaj li alparolis:

– Bonvolu sidiĝi, onklo Bibók. Ankaŭ vi povas sidiĝi, junedzino.

Tio signifis, ke Sigmundo devis resti staranta. La kadukulo tre tuis, pro kio li falis sur iun seĝon. Estiĝis turmenta silento. Poste la vicprefekto rigardadis ilin.

– Nu, pri kio temas? – finfine li demandis.

Je tio sinjoro Sigmundo Bibók fiere levis la kapon kaj latine komencis diri la kazon. Sed Paŭlo Görgey interrompis:

– Tritikon de la maljunuloj oni muelas kiel unuan en la muelejo. Via Moŝto, Vincento Bibók, diru unue la celon de via alveno al mi.

La kadukulo kolektis sian restantan forton, li ĝustigis sian vestaĵaron, poste li viŝis la buŝon per la maniko de sia bekeŝo. Poste ĝemetante kiel la zumado de vespo, li latine komencis diri sian vivon, kiu proksimiĝas al la fino, en kiu lin atingis nun neatendita granda danĝero kaj plago.

– Kia plago atingis vin? – demandis la vicprefekto mekanike.

– Mia filo hejmenvenis – li ĝemis doloreme – pri kiu mi kredis, ke li estas mortinto, kies edzino iĝis mia edzino kaj naskis de mi du filojn por la patrujo kaj glora nobelaro. Mi tiun ĉi sinjorinon edzinigis laŭ la patrujaj leĝoj.

– Jes, tio estas malbono – murmuris la vicprefekto – kial vi ne parolas hungare, ja temas pri la juna edzino? Sed unue diru al mi, kial vi venis al mi?

– Mi venis pro tio, ke vi bonvolu fari ordon inter ni – balbutis la kadukulo hungare kaj la manojn li kunmetis por petpetegi.

– Ni venis pro tio, ĉar ni scias, ke via moŝto estas saĝa. – Interparolis sinjoro Sigmundo mielaĉe.

– Nome ĉi tiel ni tute ne povas vivi kune – daŭrigis sinjoro Vincento, la hararon ĝustigante, – ja ni ne scias kiuj havas la filojn.

La vicprefekto kompatis la tremetantan kadukulon, kiu, kvankam li malesperiĝis, tamen ruze demandis:

– Ĉu ĉi tiu sinjoro estas via filo? – kaj li montris al Sigmundo. Ĉu vere li estas via filo? Observu lin bone!

– Mian filon mi ne povas nei! – respondis la kadukulo.

– Ĉu li estas via iama edzo? – demandis la vicprefekto la junedzinon.

– Mi rekonis lin – ŝi diris fermante la okulojn.

La vicprefekto ĉagreniĝis, tordadante sian liphararon li turnis sin al Sigmundo Bibók.

– Kie vi estis ĝis nun? Kial vi ne donis vivisignon pri vi?

Sinjoro Sigmundo nur atendis tiun demandon por rakonti sian pasintecon, aventurojn, bravajn agojn apud Thököly sur la batalkampo de Eperjeŝ. El inter la konataj nobeloj multe da homoj vidis lin mortfali, kiel ekzemple Frici Valai, Karlo Feher kaj Gabrielo Ĉemicki de Farkaŝfalva. Tio ne estas miraklo, ke ili anoncis lian morton. La milita purigada trupo metis lin sur iun puŝĉaron, poste oni metis lin en iun tombofoson. Sed al iu germano liaj botoj aspektis tre dezirindaj, do tiu

provis tiujn demeti. La botojn faris Mikučka el Lőcse, do ĉar la botojn depreni ne estis simpla ago, ilin la germano komencis tiregadi. Tiuj movoj kaŭzis doloregon al lia portanto. Tiel okazis, ke sinjoro Sigmundo vekriis pro doloro kaj ĉi tiel oni sciiĝis, ke li vivas. Ĉi tiel li atingis en hospitalon kaj pli malfrue al la imperiestra armeo. Tie li devis militservi multajn jarojn. Finfine li forfuĝis al Polujo.

Tiutempe Thőkőly invadis Transilvanion, pri kio li informiĝis de la polaj nobeloj. Poste li kunkolektis fortikajn kamparanfraŭlojn kaj kvankam li eniĝis al Transilvanio, sed ne la kuruoj kaptis lin, sed Sigbert Heister, imperiestra militestro. Li pasigis multajn jarojn en la fortikaĵo de Olmütz,⁷⁶ kie li estis malliberulo. Ĝis nun li estis tie, de kie li ne povis mesaĝi, eĉ ne per helpo de iu birdeto, nur se la ratoj povus esti birdetoj kaj ili estus forflugontaj tra la fenestro rekte al Görgő.

La „kapitano” tre detale rakontis ĉion ĉi, la vicprefekto kaj aŭskultis kaj ne, sciante, ke la diritaĵo enhavas fabelojn. Plie la esenco interesis lin kaj kiam Sigmundo finis la rakonton, li silente demetis la pipon.

– La kazo estas tre simpla – konstatis la vicprefekto milde kaj la tri personoj scivoleme atentis. – Laŭ Sigmundo mi povas konstati, ke neniuj estas peka, vi estas gebonfidaj, do ne estas gekulpantoj. Mi finis.

– Sed mia patro deziras – diris kapitano Bibók – ke vi decidu: Kiu havu la edzinon? Ni ambaŭ volas ŝin!

La vicprefekto skuis la kapon.

– Pri tio mi ne povas diri verdikton. Nome la geedzeco ligiĝas en la ĉielo kaj mi estas nur vicprefekto de Sepeŝ, sed en la ĉielo mi estas neniuj. Servistoj de Dio povas fari ŝanĝon, sed okaze de alia kaŭzo. La leĝo ordonas, ke la edzinon tiu viro havu, kun kiu ŝi pli frue geedziĝis.

– Nu, ankaŭ mi diris tion! – diris sinjoro Sigmundo triumfe.

La maljuna Bibók eklarmiĝis.

– Sigmundo, ne forprenu de mi Suzanetan. Ja vi jam dekutimiĝis de ŝi – li ĝemetadis mallerte. – Ne foriru, Suzana, ŝi ne forlasu min! Kio estos pri mi sen ŝi? Ho, ve! Moŝta sinjoro! Mi petpetegas, ke vi ne lasu forpreni Suzanan de mi ... Mi petas vin vidi mian kadukecon, senhelpecon kaj tion, ke la familio Bibók ĉiam estis fidela al la familio Görgey. Mi transdonas mian tutan havaĵon. (Li rompadis siajn manojn.) Kien mi iru por fari plendon, mia Dio?

La vicprefekto forte emociiĝis pri la plendo de la kadukulo.

– Prefere konsoliĝu, mia pli aĝa fratsinjoro, sed la leĝo estas leĝo ...

– Ho, ve! Kia leĝo estas tio? – eksplodis la maljunulo. – Via leĝo ordonas, ke mia filo havu mian edzinon, kvankam nur la matrikulo pruvas la fakton de la geedzeco. Sed ŝi naskis al mi du filojn kaj mi estas ilia patro. Mi vivis kun ŝi

⁷⁶ Pri Olmütz: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Olomouc>

multajn jarojn. Se ŝi restas ĉe mi, tiam mia filo perdas sian edzinon, sed li estas ankoraŭ juna, li povas trovi alian edzinon. Kontraŭe mi perdas mian edzinon kaj samtempe la patrinon de miaj filoj. Ĉar mi jam ne povos longe vivi, sed li ankoraŭ povos ricevi ŝin, por li restas la espero, sed por mi ne.

– Ho, mia patro, ankaŭ mi amas mian edzinon – kontraŭis flegme sinjoro Sigmundo. – Mia koro ne estas farita el ŝtono, sed mi dezirus esti ankaŭ plue via obeema filo. Mi freneziĝas. Kion fari?

– Vi estis ĉiam mia bona filo – ... ekploris la maljunulo kiel infano. – Deziru kion ajn, sed Suzanan ne.

La amata edzino, por kiu daŭris la diskuto, staris mute, tremetante, preskaŭ terenfalante kiel folio de la poploarbo kaj ŝi fikse rigardis sur la planko dancantan lumon de la vintra sunlumo.

– Nu povas esti, ke ni povas serĉi pacan solvon – diris la vicprefekto – sed tion ne la vicprefekto de Sepeŝ konsilas, sed Paŭlo Görgey. Oni ne devas raporti al la pastoroj pri ĉio. Nome la kazo estas eksterordinara, ne eblas solvi ĝin vulgare. Vi vivos tiel de nun kiel vi volas. Sed ĉi tio dependas de tio, kion volas la junedzino. Mi ankoraŭ ne aŭdis ŝian voĉon. Pro tio ĉi ŝi parolu! Ni aŭskultu!

Sur la pala vizaĝo de la edzino aperis nuanco da ruĝiĝo pro kiu ŝi tiris la tukon antaŭ sian vizaĝon.

– Tio estos la plej bona, se via moŝto portigos min al la korto kaj senkapigos min kaj ili ambaŭ estos vidvaj.

– Tio estas stulta virina parolo – ĉagreniĝis Paŭlo Görgey – diru al mi laŭ via koro, kiun vi elektus kiel vian edzon, se la leĝo lasus tion? Nu, kial vi ne respondas?

Ŝi hezitis kaj iĝis ekscitita.

– Mi ne kuraĝas diri tion – ŝi anhelis.

– Ĉu ne? Vi pravas. Venu kun mi en la alian ĉambron por konfesi al mi kiel al pastoro.

Ili iris en la alian ĉambron, kie li pridemandis ŝin pri ŝiaj veraj opinioj.

– Mi jam alkutimiĝis al mia nuna edzo kaj mi hontiĝus antaŭ miaj filoj se mi reirus al la pli frua edzo.

La vicprefekto surpriziĝis, kvankam plaĉis al li la decido de la edzino.

– Mi estus neniam kredinta tion. Ĉu la maljunuleto ankoraŭ ...?

Ŝi mansignis rezigne, kvazaŭ ŝi estus diveninta la personon de la vicprefekto.

– Mi jam ne volas esti edzino de aliulo – ŝi diris ruĝiĝinte. Ŝi iĝis ĉarma. – Mi restas kun la patro de miaj filoj.

Paŭlo Görgey iomete emociiĝis. Tio estas fakto, ke ŝi estas honesta edzino. Ŝi aspektis honesta.

– Nu, ni provas solvi iel la aferon – li kuraĝigis ŝin nekutime delikate. Poste li sendis ŝin al la alia ĉambro kaj vokis Sigmundon kaj la maljunan Bibók.

Li havis grandan persvadan talenton, ja li sciis klarigi la aferojn, ne vane estis li la plej saĝa homo de Sepeŝ.

– Miaj nobelaj samvilaĝanoj! – li komencis paroli amikece – mi konsilas, se la sorto volis fari tion ĉi, vi ne disputu unu kontraŭ alia kaj ne disvastigu ĉi tiujn aferojn en la vilaĝo. Foje la sorto estas kruela juĝisto kaj kapablas rebati. Suzana konfesis, ŝi volonte restus apud sia maljuna edzo. Nun tuj interkonsentu! Poste mi volas paroli kun vi, kapitano Bibók.

Sinjoro Bibók, la kapitano klinis sin kaj ĝemetis, dum li rigardis la ĉielon.

– Sed mi tre, tre amas ĉi tiun edzinon!

– Sed vi aŭdis, ke ŝi volas resti kun mi – diris la maljunulo infane kaj liaj okuloj brilis.

– Tamen ŝi estas mia rajta propraĵo – diskutis la kapitano, batante sur la bruston.

– Nu, tion ne eblas diri tiel ĉi – interparolis Paŭlo Görgey – ja, se la edzino volas fari, tiam ŝi povos iniciati ankaŭ la eksedziĝon kontraŭ vi, se ŝi havas ĝustajn kaŭzojn. Sed eĉ vi ne vivis en klostro dum vi estis fore. Ankaŭ ŝi povas akuzi vin ruze pri iaj okazintaĵoj en Lemberg, aŭ en Krakovo.

Sinjoro Sigmundo aŭdinte la loknomojn el sia pasinto terurigis, pro kio li pli milde daŭrigis:

– Do, diru al mi, mia patro, kion mi faru?

– Mi diris jam, Suzana restu kun mi.

– Sed mi hejmenvenis pro ŝi – diris sinjoro Sigmundo.

– Dio benos vin, kara mia filo – respondis la maljunulo piatone – se vi vian malfeliĉan patron ne senhavigos de sia sola apoganto.

– Bona estos la beno de la Dio, mia patro, sed kun ĝi mi ne povas vivi. Ja mi hejmenvenis en ĉifona vestaĵo, miaj poŝoj estas tute malplenaj. Mi ne havas monon.

– Kion vi deziras ankoraŭ?

– Se vi volas resti kun Suzana, tiam portu ŝin en la pli malgrandan domon.

La maljunulo fariĝis malĝoja kaj turnis sin al sia filo riproĉe:

– Sigmundo, ja vi volas tion, ke mi estu maljuna sakso.

Nome tiu kutimo regis ĉe la saksoj, ke ili en unu areo konstruis du domojn. La maljuna mastro loĝis en la pli malgranda domo, kiun oni nomis: „domo por tusantoj” kaj la mastrumadon li transdonis al la pli aĝa filo. Do, sinjoro Sigmundo tion volis, ke li mem estu la mastro kaj la maljunulo stagnu en la ĝardeno dometo, kiun la avo Gabrielo Bibók konstruigis al sia bela amatino Agnesa Kádár, kiu ĉi tie somerumis kiel civitanino de Lőcse. Gabrielo Bibók estis vicjuĝisto de la servutularo.

Tute ne plaĉis al la maljuna Vincenzo Bibók fordoni la bienon al sia filo. Li tre protestis kontraŭ tio kaj komencis diskutadi. Sed la vicprefekto denove komencis pritrakti kun ili:

– Ne volu akiri ĉion, mia pli aĝa frato. Vi bezonas varman fornon, panon, kiuj sufiĉos por vi dum via mallonga tempo. Petu de via filo varman lokon kaj panon, sed surpaperigitaj kaj subskribitaj la traktaton kaj la konsenton. Mi scias, ke vi dezirus resti juna sakso, sed se via filo lasis, ke Suzana restu ĉe vi, tiam vi transdonu al li la bienon kaj postulu nur vian nutradon, la zorgadon pri vi ĝis via morto kaj poste viaj du filoj disdividos la havaĵon inter si.

Sinjoro Vincenzo Bibók gratis la kapon.

– Tio ne povas esti, moŝta sinjoro, ke mi estu neniu. Mi ne povus al tiu stato al kutimiĝi.

Sigmundo ridetis.

– Vi estos edzo de Suzana. Ĉu tio ne estos bona?

– Ja tio estas prava, mi amas ŝin kaj ne povas vivi sen ŝi, sed...

– Sed mi donos por ŝi nenion – interparolis ironie la kapitano. – Nu, tio estas bona tiel ĉi (li skuis la ŝultrojn kaj ŝajnigis, kvazaŭ li ekiros eksteren). – Malfeliĉa Suzaneta! Oni ne amas vin ĉi tie. Mi ne lasas vin ĉi tie. Mi kunportos vin. Iel ni povos vivteni nin.

La maljunulo emociiĝis kaj ekploris, sur lia frunto aperis ŝvitogutoj.

– Ĉu vi ne kapablos konsenti? – demandis la vicprefekto senpacience. – Vi povas foriri.

Efike de tio ĉi la kadukulo submetis sin kaj etendis sian manon al sia filo.

– Nu, estu tio laŭ via volo, estu vi la mastro de nun.

Poste ili iris al la laborĉambro, kie la edzino atendadis angore. Ŝi rigardis kaj la maljunulon kaj la junulon. Ambaŭ ŝiaj homoj estis tre gajaj. Sigmundo klinis sin antaŭ ŝi ĝentile:

– Ni interkonsentis, panjo.

El tiu diro ŝi sciiĝis kies edzino ŝi estos. Sed ŝi volis scii pli detale pri tio. Tamen, la vicprefekto ordonis alimaniere.

– Vi, junedzino iru hejmen kaj ĉio estos tiel, kiel vi volis. Sed unue vi devas fari dokumenton pri la afero.

Kiam la advokat-kandidatoj faris la dokumenton, la vicprefekto pridemandadis la kapitanon Bibók pri la aferoj de Lőcse. Li eksciis, kiel ĉirkaŭbaris peze Nustkorb, la senatano, helpe de la sango de la juĝisto unu terenon el lia bieno, ĉar tiun ili volis forpreni pere de la saksa privilegio kiel de sango akiritan bienon. (Mi transdonos al ili – pensis li en si.) Sinjoro Sigmundo estis eltrovema homo, kiu rakontis ankaŭ tion, ke Nustkorb pretendas la bienon laŭ reĝaj deklaroj. Sinjoro Sigmundo ĉeestis en la ĥorejo kaj ekatentis la devenon de la kvereloj. Sigmundo ĝuste tiam preterlasis la bienon de Görgey, kiam la Lőcse-anoj aperis

por signi per palisoj la per sango signitan bienparton. Preskaŭ laŭvorte li rakontis la ŝercan manieron de la bienakiro kaj ankaŭ tion, kiel pene Nustkorb portis la vunditan juĝiston ĉirkaŭ la tereno por elfluigi la sangon de la juĝisto, ĝis fine la malfelfeliĉulo forpasis.

– Povas esti, ke cetere li ne mortus – kriis la vicprefekto senŝarĝiĝinte.

– Tio estas verŝajna – opiniis Sigmundo. Ja, ankaŭ la senatanoj opiniis unue same, sed pli malfrue ŝanĝiĝis ilia opinio pro la monavideco.

Dume la vicprefekto trankviliĝis kaj preskaŭ gaje prezentis seĝon al Sigmundo por sidiĝi.

– Sidiĝu, kapitano, ekfumu. Certe vi pipfumas. Poste diru al mi vian opinion pri la situacio. Vi estas spertulo, vi povas juĝi laŭ la signoj, pri la etoso.

Sinjoro Sigmundo ne tre lasis sin peti, ja pli vere li estis impertinenta. Li deprenis pipon el inter la pipoj, li metis en ĝin tabakon kaj ekbruligis tiun. Poste li sidante komforte sur la seĝo puŝblovis la fumon. Li ne parolis.

– Strange estas, – li diris fine – ke la koko ekdormas, se oni balancas ĝin, sed la fajro ekbrulas.

– Mi demandis ne pri tio – diris senpacience la vicprefekto, al kiu ne plaĉis la konduto de Sigmundo.

– Ĝuste pri tio mi parolas, mia sinjoro. Nome mi ne kapablas diveni, ĉu la konduto de la Lócse-anoj estas nur koka spitetado, aŭ ĉu vera fajro.

– Nu, jes – balbutis la vicprefekto kaj mirante gapis Sigmundon.

– Nome se tio estas nur simpla „koka-spitetado kontraŭ vi”, tiam oni devas lasi ĝin estingiĝi. Sed se tio estas vera fajro, tiam ni devas moviĝi laŭ la onidiro: „Se vi volas pacon, tiam preparu vin por milito!”

– Kapitano, tiel ŝajnas, ke vi estas saĝa homo.

La kapitano palpebrumis per la maldekstra okulo, kiu estis pli malgranda, ol la dekstra pro ia kuntiriĝo de la faciaj muskoltendenoj.

– Mi scias kelkajn aferojn – li modestiĝis tirante la ŝultrojn kaj dume puŝblovis fumnubojn kiel la kameno de fabriko.

– Ĝuste pro tio mi estas scivola pri via opinio.

– Laŭ mi la konduto de la Lócse-anoj estas forte danĝera. Ĉio dependas de tio, kiu estos la nova juĝisto. Tio estus bona, se iu pacemulo, malfortvola homo estus la nova juĝisto.

– Hm. Tio pravas – pensadis la vicprefekto en si kaj pli intense interesiĝante aŭskultis la hejmenalvenintan aventuriston.

– Se Gosnovicer estos la juĝisto, tiam okazos aŭdacaj krimoj, ĉar tiu estas kruela kaj sangosoifa. Se Nustkorb venkas, kiu estas avara, ruza, agema, li dungos sikariojn por mortigi vin. Se Moŝtel estos la juĝisto, estanta trankvila kaj saĝa homo, li estus la plej bona por vi. Li volas fari pacon.

La vicprefekto plu pensis. Povas esti, ke Csáky (Ĉaki) la ĉefprefekto, aŭ la trezoristo povus helpi. Poste li alparolis:

- Ĉu vi ne pensas, ke ili ekatakos min en Görgő? Ĉu vi ne aŭdis pri tia plano?
- Mi aŭdis nenion, sed ĉio povas okazi, ja la homoj estas incititaj.
- Ĉu vi scias, kapitano, kion mi pensis?
- Mi ekscios, se vi volos tion.
- Mi havas kelkajn kanonojn kaj multe da fortikaj servutuloj. Mi planas fortigi mian kastelon ĝis la afero aranĝiĝos. Mi havas planon pri vi. Ĉu vi ne volas organizi el nenifarantaj nobeloj, soldatoj (multaj estas en la regiono) unu teamon, kiu min servante sub via gvido al miaj servutuloj povus instrui la militajn manovrojn?
- Tion mi tre volonte farus – ekkriis la kapitano ĝojegante. Ja, tio estas mia profesio.
- Ĉu tio estas laŭcela?
- Via Moŝto estos ĉi tie en sekureco kiel infano en la sino de la Virgulino Maria. Kaj ni reatakos, se ili ekatakos nin.
- Ĉu? Mi atakos la tutan urbon Lőcse.
- Kapitano, kiajn kondiĉojn vi havas? – demandis la vicprefekto. – Ĉar klara interkonsento certigas la bonan amikecon.
- Estu la kutima soldo, ja ĉiuj scias, ke Paŭlo Görgey estas ĝentlemano. Mi petas por mi promocion kaj mi estos kolonelo anstataŭ kapitano.
- Estas en ordo, kara Bibók, ĉi tion ni priparolis.
- Krome mi dezirus belegan ekipaĵon por mi kaj por miaj soldatoj, nome la vestaĵo prezentas la soldaton.
- Multspecaj vestaĵoj estas en la vestovendejo, elektu por vi kaj viaj soldatoj. Se vi volas tion, tiam iu mia homo kondukos vin tien.
- Tio estus laŭcela, ja mi hejmenvenis en ĉifonaj vestaĵoj, kaj ankaŭ la hundoj ekbojus, vidante min, kvazaŭ ili ankoraŭ ne vidintus erudiciulon.
- Ĉu ni interkonsentis?
- Jes! Ni interkonsentis. Kiam mi surmetos la vestaĵon, tiam tio estos sama kiel la ĵuro de la solduloj. Sed mi povas fari ankaŭ ĵuron. Kies vestaĵon mi portas, tiu havas miajn nokton kaj tagon, miajn sangon kaj vivon tiel longe kiel ties vestaĵo estas sur mi.
- Poste Paŭlo Görgey vokigis sian fidelulon sinjoron Samuelo Valkanji, kiu envenis tre humile.
- Akompanu mian kolonelon en la vestaĵvendejon, kie li elektos soldat-vestaĵojn.

La vendejo estis en la malantaŭa parto de la konstruaĵo kaj oni devis trairi multe da labirintoj, tra diversajn ejojn, sed povas esti, ke sinjoro Valkanji intence

akompanis la sinjoron Bibók ĉirkaŭvoje, li neniam trovu tiun lokon sola, ĉar por Valkanji ne aspektis fidinda tiu ĉifona Bibók.

En la vendejo estis du ampleksaj ĉambroj kie videblis la historio de kvar jarcentoj. Tie estis malnovaj seloj, arkoj, ŝimaj lancoj, glavoj, vestaĵoj, glavegoj, fibuloj, katenoj, torturiloj, kiuj estis dise ĵetitaj, soldatvestaĵoj kaj por festi kaj por batali. Estis tie vestaĵoj de la familio Görgey kaj ceteraj malnovaj vestaĵoj kaj kelkaj akiritaj flagoj. Valkanji diris, ke pli valoraj aĵoj estas en Toporc ĉe Johano Görgey, sed en tiu ĉi vendejo estas valoraĵoj, kiujn Valkanji devis gardi forte. Ekzemple estis ĉi tie piedingo el arĝento kaj batalfrapilo, sur tiuj rubenŝtono. La pli lastan uzis iu praulo de Görgey tempe de la regnestra familio Arpad. Poste estis tie selokovriloj, bridoj kun arĝentaĵoj, hufferoj el oro, kiuj brilis sur la piedoj de ĉevalo de Miĥelo Görgey dum la nuptofesto de Johano Szapolyai kaj Izabela Jogajlido (nomita: Izabela Pola). Bedaŭrinde estas, ke nur unu hufofero troviĝas, ĉar tri hufoferoj perdiĝis. Sed unu estas ĉe sinjorino Darvaŝ, unu estas ĉe sinjoro Johano Görgey kaj la tria defalis de la piedo de la ĉevalo dum la tago de la menciita nuptofesto. Iu nekonata persono trovis tion kaj havis feliĉon laŭ la tiama superstiĉo.

Sinjoro Valkanji ĉie atentis la kolonelon, kiu kaptuniĝis pro la vidaĵoj, ĉar li kredis, ke en la edeno bursoj, seloj, glavoj pendas de la arboj.

Ĉi tie la soldatvestaĵoj pendis de la vesthokaroj kaj ankaŭ la ŝrankoj estis surŝutitaj per kamforpulvoro kontraŭ la musoj kaj tineoj, krome ili estis kovritaj per tabakfolioj. La ŝrankojn Valkanji enorde malfermis, dirante: „Bonvolu elekti, sinjoro kolonelo.” Tie estis ĉiuspecaj iamaj vestaĵoj el la epokoj de la regnestroj Bocskay, Bethlen⁷⁷ pintaj felĉapoj, bravaj dolmanoj, papavkolora mallonga pelta supra mantelo por viroj sur duonŝultron metebla. Nome la soldato jam sciis, ke la potenculoj malfacile povas vidi la hel-papavokoloran vestaĵon el pli granda distanco, se ili estas starantaj en la gardoturo, ĉar tiu koloro kunfluas kun la senkolorco de la aero.

Sinjoro Sigmundo forte hezitante pasigis multe da tempo por elekti la ĝustajn vestaĵojn. Ĝuste li faris tiel, kiel la franca reĝo (nomita Sunoreĝo), kiu ĝis tagmezo ne kapablis survesti sin pro la sendecideco, ĉar la lakeo multajn vestaĵojn montris al tiu. Sigmundo elektis sturnokoloran dolmanon el fajna drapo, vulpopeltan bekeŝon kun ruĝa pantalono per flavaj pasamentoj sur tiu. Li deziris survesti sin ĉi tie sola. Sed sinjoro Valkanji anoncis, ke li ne rajtas foriri, sed Sigmundo vestu sin en lia ĉeesto.

Sinjoro Sigmundo iĝis nerva:

– Nu! Do! Forportu vin la Diablo! Kion vi pensas? Kiu mi estas? Kiel vi kuraĝas paroli kun mi tiel ĉi? Vi havas feliĉon, ke mia glavo ne estas ĉe mi!

⁷⁷ La famaj nomoj Bocskai, Bethlen elparolendas: boĉkai, betlen.

TiamValkanji deprenis de la muro du akrajn glavajn kaj unu transdonis al Sigmundo.

– Se vi volas skermi, do ek, sed sciu, ankaŭ mi estis soldato.

Kolonelo Bibók mansignis malestime.

– Nu, ne saĝumu! Mi ne volas tuj masakradi.

Li ne transprenis la glavon, sed komencis forigi de si siajn ĉifonajn vestaĵojn kaj tiujn ĵeti surteron de si malproksimen. Sed Valkanji la ĉifonojn kunkolektis kaj ilin per lancopinte ĵetis en la fornon por forbruli. Li ne volis lasi, ke iliaj „loĝantoj” intermiksiĝu kun la aliaj vestaĵoj, tamen li diris, ke pro la odoraĉo li agas tiel.

Dum sinjoro Sigmundo surmetis la elektitajn vestaĵojn, li tre suferis pro la flavaj botoj, kiuj havis spronojn. Nome la botoj estis tro sekiĝintaj. Finfine li sukcesis tiri ilin al siaj piedoj, dum kio li blasfemis: „Krevu ĉi ties pli frua mastro en la Purgatorio!”

– Ĉu mi estas bela?

– Via Moŝto iĝis tute alia homo – respondis Valkanji indiferece – eĉ la Diablo ne rekonas vin.

– Ankaŭ mi kredas tion – li respondis afekte, – sed estus bone, se iu povus ordigi ankaŭ mian hararon kaj barbon.

– Mi konas iun. La maljunan Joĉjon.

– Nu, bonvolu sendi al mi tiun barbiron, se ni eliros el tiu ĉi labirinto.

– Tiu ne barbiro estas sed ŝafisto.

– Kie li ellernis sian metion?

– Ja tiu tondas konstante la ŝafojn.

– Oĉjo Valkanji, mi tiel pensas, ke vi estas impertinenta homo!

Sigmundo, subite imaginte sin kiel junulon kaj havante belstaturan vestaĵaron, nomis „oĉjo” la pli junan sinjoron Valkanji, kies kruda sinteno estis ĝena por li, sed li pensis, ke ne estas inde por kolerigi tiun homon. Poste Valkanji akompanis lin al la domo de la ŝafisto. Tie la maljuna Joĉjo komencis tondi la hararon kaj la barbon de Sigmundo per la tondilo pri ŝafoj.

– Pripensu vian agon, ĉar vi estos filo de la morto, se mi ne estos kontenta. La ŝafisto ege ektimis kaj atenteme faris la laboron. Poste ankaŭ tiu plezuris vidante la kapon de Sigmundo.

– Nu, tiun ĉi kapon kiu ajn povas rigardi!

La kolonelo estis kontenta kaj serĉis la monon en la poŝoj de la vestaĵo dirante, ke la pli frua posedanto forgesis en la poŝoj kelkajn groŝojn. Sed la poŝoj estis tute malplenaj. Laŭŝajne li tamen ne ĉagreniĝis sed subite ekkriis, kvazaŭ nur nun li divenus la enigmon:

– Nu, ja, la diablon! En mia alia vestaĵo mi forgesis mian monon! Do, ankaŭ ĝis tiam Dio benu vin!

– Tio estas nevidebla groŝo – murmuris la ŝafisto malbonhumore.

Sinjoron Bibók, kiam li reiris al la ĉambro de la vicprefekto, eĉ propra patro ne rekonis lin, kiu atendis senpacience lin kun la preta dokumento.

Kiam la kavaliraspekta kolonelo kun glavo surflanke paŝis antaŭ la maljunulon, tiu ekstaris kiam Sigmundo demandis: „Ĉu estas preta la dokumento, mia sinjoro patro?” La kadukulo perokule serĉis ĉie la voĉposedanton, ĉar krom la kavaliro neniu li vidis, pro kio superstiĉe li komencis tremeti. Ili estus subskribintaj la dokumenton antaŭ la vicprefekto pri la transdono de la bieno kontraŭ la pagenda vivtenado de la familio, sed la maljunulo enskribigis en la dokumenton ankaŭ tion, ke la eksedzino de Sigmundo Bibók: Suzana Flat, kiu estas nun edzino de Vincento Bibók, havas nenian pretendon. Leginte tiun skribaĵon la vicprefekto disŝiris la dokumenton dirante, ke kontraŭ la leĝoj kaj sociaj moraloj ne eblas decidi jene, ja la virino ne estas varo, oni ne povas ŝin aĉeti – vendi. Pro tio ili devis atendi, ĝis la advokat-kandidatoj pretigos denove la dokumenton, en kiu ne estos mencio pri la edzino. Ĉi tiun aferon oni devas alie aranĝi. Kial Dio kreis moveblajn palpebrojn por la homoj? Ĉu ne nur pro tio, ke la homoj estu kapablaj malfermi, aŭ fermi siajn okulojn? Se iu faras laŭ sia volo, tiam ne okazos ofendo de rajtoj. Se Sigmundo ne pretendas la edzinon, la edzino ne pretendas Sigmundon, sed la kadukulo ne kapablas vivi sen la edzino, kaj ankaŭ la edzino pli volonte restos apud la kadukulo, kial oni devus malfeliĉigi tri homojn nur tial, ke la Leĝo havu pravon?

La malnovaj hungaraj potenculoj ankoraŭ alie kaptis la sencon de la jurisdikcio. Ili serĉis la juston ne en la libroj, sed ili esploris la vivrilatojn de tiuj, kiuj petis helpon pri siaj aferoj. Tiutempe advokatoj ankoraŭ ne estis, la ŝtata providenco ne estis tiom mania, ke ĝi estus kreinta instruitajn majstrojn, kiuj ĉesigus la diskutojn inter la homoj kaj estus same plimultigantaj tiujn. Tiutempe ĉio ĉi okazis alie. La juĝisto estis iu patriarko, kiu kiel saĝulo konsideris ĉion kaj ne estis sklavo de la paragrafoj. Cetere la leĝo estis erarema kaj ĝiaj sciantoj estis pripensemaj prestiĝon havantaj homoj. Kial ni estimus la erareman leĝon? Pli frue la juĝistoj estis pli bonaj ol la leĝoj, do, la juĝistoj prijuĝis kaj ne la reĝo, ĉar estis ili pli saĝaj. Sed ekde tiam, kiam la leĝoj estis pli bonaj ol la juĝistoj, multaj aferoj ŝanĝiĝis. Sed nun Paŭlo Görgey la vicprefekto estis konvinkiĝinta, ke lia ago estas Dia, ĉar li savis la trankvilon de la kadukulo, li indulgis unu simpatian edzinon de iu kanajlo, ĉar li ne dubis, sed sciis, ke Sigmundo estas rafinita fiulo. Kaj li ĝojis ankaŭ pro tio, ĉar ĉi tiun fihomon li uzos por organizi soldulojn. Ja la bona registaro dungas kaj bonajn kaj malbonajn homojn al realigo de siaj celoj. Nome la akridoj estas plago de Dio, sed ili povas esti ankaŭ utilaj, ja ili kolektite kaj sekigite povas esti bonega nutraĵo por la kortbirdoj. Ĉi tiel la nutraĵojn pereiginta akrido povas esti utiligebla nutraĵo.

Sed Paŭlo Görgey povis trompiĝi, se li kredis, ke la aferon pri la edzino li povis aranĝi. La tago pasis feliĉe. Kolonelo Bibók vizitis la familiojn Fejer kaj Valai. Li afekte paŝadis sur la strato. Li demandis iun maljunan kamparano Gabrielo Kercel, kie estas la paroĥejo, ĉar li volas viziti la paroĥestron. La kamparano respondis humile:

- Ĝi estas tie, kie ĝi estis ĉiam. Vi certe memoras tion, sinjoro Sigmundo.
- Portu la diablo! Mi ne kapablas rememori ĉiujn etajn ejojn. – diris li orgojlege.

En la vilaĝo okazis konfuzo, oni parolis pri diversaĵoj. Kio okazis? Kiel okazos? Estiĝis granda kaoso. Kelkaj tion konstatis, ke la ĉifona Sigmundo Bibók hejmenvenis, aliuloj diris, ke li hejmenvenis elegante en pompa vestaĵo. Kelkaj diris, ke li estas terura homo, sur la vizaĝo estas cikatro, laŭ aliuloj li estas belega brava homo kun viraj cikatroj. Ĉiuj opinioj pravis baze de la viditaĵoj. Sed la veran aspekton nur Suzana vidis, lia edzino. La lokaj nobeloj redonis la vizitadon de Sigmundo, ĉar ili volis vidi sinjoron Bibók hejme. La kaduka Vincento Bibók estis gaja, feliĉa, li invitis la gastojn vespermanĝi kaj menciadis konstante:

- Alvenis mia perdita filo. Ni drinku je lia sano!

Do, pro tio la gastoj miris. Nu, Suzana devis komenci kuiri la vespermanĝon. Dum la vespermanĝo okazis (laŭ sinjorino Paŭlo Fejer), ke Sigmundo forte premadis la piedojn de Estera Valai (vidvino de Paŭlo Perle), kiu reciprokis tion, ja ĉiuj drinkadis sufiĉe. Efike de tio iu filo de Bibók kuregis al la korto de Görgey, al la maljuna ŝafisto por inviti lin kaj kunporti sian fluton. Nu, venis Joĉjo la ŝafisto kaj estiĝis granda amuzo, kiu daŭris ĝis tagiĝo. Sigmundo ekstaze dancis kun la vidvina junedzino de la familio Valai. Li tre dancigis ankaŭ sian edzinon. Tio estis stranga. Filoj de Bibók rigardis lin kiel koleraĵoj... kaj la kaduka Vincento ridis kaj permane batis la takton sur la tablo al la sono de la fluto. Videblis, ke la maljunulo estas ebria kaj li ne sciis, kion li faras. Ĉi tiujn detalojn sinjorino Marják rakontis ĉe la matenmanĝo, kiam la husaro, kiu portis freŝan trinkakvon anoncis:

- Sinjorino Bibók estas en la antaŭĉambro.
- Kiu estas kun ŝi? – demandis la vicprefekto surprizate.
- Ŝi estas sola.
- Enlasu ŝin.

Sinjorino Bibók enpaŝis. Ŝi nun estis alia edzino. Ŝi estis bele survestita kaj tre siblis ŝiaj multaj amelitaj juvoj. Ŝi portis malhelbluan mantelon kun sur ĝi miniaturaj agrafoj kaj ĉirkaŭ la kolo estis ursopelto. Sur ŝia kapo estis papilia kufo, en la oreloj estis orelopendaĵoj. Ŝi ne tremetis kiel hieraŭ. Ŝi staris fiere, junece, ŝian vizaĝon kovris ruĝeco. (Povas esti, ke ŝi estis ŝminkita.) Ŝiaj okuloj

jam ne estis malĝojaj. Ŝi paŝadis junece kaj la vizaĝon ne kovris tuko kaj ŝia rigardo estis iomete meditanta.

– Kio estas la novaĵo, junedzino? – demandis la vicprefekto, dum li rigardis ŝtele tiun hieraŭan martiron, al kiu li imagis ŝin. Nun nekomprenebla estas ŝia apero ĉi-tiea.

– Neniu bonaĵo estas, sinjoro vicprefekto, mi estas seniluziigita, trompita.

– Nu, ne diru! Prefere diru, ke vi estas renaskiĝinta. Vi estas nun dek jarojn pli juna, ol hieraŭ.

– Tio estas nur la ŝajno. Mi iomete ruĝigis min – ŝi respondis nerve, mordetante sian puntan poŝtukon kiel la ĉevalo la buŝferon. – Nome mi treege koleras.

– Kiun vi koleras nun, mia animo?

– Ĉiujn mi koleras: Dion, homojn, min, ankaŭ vin.

Ŝiaj okuloj estis revemaj, bluaj, konfuzaj, histeriaj, sed ankaŭ saĝaj, kiuj koketante rigardis la vicprefekton.

– Pri kio vi parolas? Mi ne komprenas – li diris konfuzite, mirante. Li ne komprenis la aŭdacan voĉon, kiun li kutimis aŭdi el la buŝo de neniu, eĉ tute ne de la hieraŭ ploranta virino.

– Oni senhavigis, trompis, malfeliĉigis, oni deprenis min de mia edzo. Sciu, ke la kontrakto ne realiĝos – ŝi plendadis ekscitite.

Paŭlo Görgey kapbalancis.

– Ej, junedzino! Kion vi babilaĉas ĉi tie? Ja hieraŭ vi ploris pro tio, ke mi savu vin de via edzo. Mi komprenas jam Sigmundon Bibók.

– Se mi estus sciinta pli frue, ke li, la senanima homhundaĉo trompos min kun sinjorino vidvino Estera Valai, mi estus aginta alie. Ja vi konas ŝin. Ŝi tute ne estas pudora. Se vi estus vidinta kiel ŝi dancis balancante sian kokson, kiome ŝi premetis sin ekscitite al Sigmundo! Kaj mi devis vidi ilin kaj mi ne havis rajton por tirŝiri ŝian grizan harnodon. (Ŝi faris senbridan movon por tirŝiri, dum ŝi kunpremis siajn lipojn kaj grincigis siajn dentojn.) Ĉi tion mi ne toleras plu!

– Strangaj kreaĵoj de Dio estas la edzinoj! Hieraŭ vi ne akceptis sinjoron Sigmundon Bibók, kiu estis fidela, sed nun, kiam alia virino koketadis, vi volas, ke Sigmundo estu via edzo. Kiel mi estu saĝa koncerne vian konduton?

Sinjorino Bibók skuis la kapon ĉe kio tintis ŝiaj oreldringoj.

– Hieraŭ mi estis amariĝinta kaj nun estas senespera. Nome mi ne povas vivi en la malgranda domo kiel senbiena servutulino. Mi pli prave ploris hieraŭ, ol Magdalena ĉe la tombo de Jesuo Kristo. Mi iĝis malbonhumora kiel forpelita birdo, kiam mi ekkonis la kontrakton.

Paŭlo Görgey tiradis la ŝultron.

– Mi nenion povas fari pri tio.

– Sed jes, Via Moŝto povas fari ĉion, ja vi estas potenculo.

– Ne estas eblo pri tio.

– Sed estas. Bonvolu vokigi Sigmundon por konstati, ke la edzino kaj la bieno apartenas unu al alia, ja la bienon havas Sigmundo, laŭ la kontrakto Sigmundo havas...

– Tio ne estas tiel, mia kara animo! La bieno kaj la edzino ne apartenas unu al alia. Tion mi ne povas konstati.

– Sed mi ne estos edzino de senbiena servutulo – kontraŭis la edzino flegme, metante la manon sur la kokson – mi volas resti edzino de nobelo havanta la bienon.

– Vi iĝis simple la edzino de Sigmundo Bibók, sed Sigmundo ne havis la bienon tiam, ĉar la bienon havis lia patro.

– Sed li estis la sola filo de sia patro – spitparolis la edzino – sed nun li havas tri filojn.

– Vi pravas – incitetis ŝin la vicprefekto, kiu amuziĝis pro la situacio. – Sed ne forgesu, ke la aliajn du vi naskis, kiuj estas preskaŭ viaj bofratoj.

– Nu, mi ne bedaŭras kiel ajn estas – ŝi diris honteme. – La infanojn donis Dio, mi ne kulpas, sed ankaŭ ne freneza mi estas por ne serĉi la bienon.

– Ĝuste tion vi ne povas fari – diris la vicprefekto – ĉar se mi juĝus tiel – se mi havus la rajton, sed tiun mi ne havas – ke la edzinon tiu havu, kiu havas la bienon, tiam estus pli malbone por vi. Nome la bienon Sigmundo havas, sed se vi volas iri al Sigmundo – kion vi povas fari – tiam la maljuna Vincenzo postulos la bienon al si kaj poste Sigmundo postulos sian leĝan edzinon.

– La skribaĵo estas neŝanĝebla – ŝi defendis sian vidpunkton – laŭ ĝi Sigmundo aranĝos la bienon, ĉar lia patro transdonis al li.

– Jes, sed tio estis la kondiĉo, ke vi restas ĉe la kadukulo.

– Pri tio la dokumento nenion scias – ŝi diris kontraŭante cinike.

Ĉi tio estis malagrabla por Paŭlo Görgey.

– Sed mi scias pri tiu, – li respondis dum li kuntiris la brovojn – kaj tre ege mi miras, ke vi forlasus la senhelpan kadukulon kaj malhelpus lin esti mastro. Mi trompiĝis pri vi. Hieraŭ vi kondukis alie. Tiel ŝajnas, ke vi estas tia sinjorino kiel la aliaj virinoj. Nu, iru hejmen ordigi la aferon kune kun ambaŭ edzoj laŭ via scio. Mi jam ne aranĝos plu viajn aferojn.

Sinjorino Bibók paliĝis, ŝi volis diri ion, sed Paŭlo Görgey interparolis ne tolerante kontraŭdiron:

– Foriru! Adiaŭ!

Sinjorino Marják kaŝaŭskultadis ĉe la ŝlosiltruo, sed poste ŝi nur tion diris al ĉiuj, ke la vicprefekto estis ekscitita kaj sinjorino Bibók foriris tre larmante. Sed por la Görgő-anoj ankaŭ ĉi tio estis bona delikataĵo, ĉar ĉi tiu sensacio forgesigis la ĉiutagajn aferojn. En Görgő ankoraŭ ne okazis same amuza vintro! Kaj ankoraŭ okazis ankaŭ aliaj aferoj. Kolonelo Bibók varbis kelkajn sentaŭgajn

bubaĉojn, kiuj surmetis livreon kaj ekscitis la junedzinojn kaj fraŭlinojn de Lőcse. Inter ili estis la du pli junaj duonfratoj de la kolonelo, kiujn li nomumis kiel leŭtenantojn. Ĉi tiuj faktoj vigligis la vivon de Görgő, ĉar la bravuloj vizitis ĉiuvespere la ŝpinejon kaj volonte helpis por doni en la manojn de la hominoj la defalintajn bobenojn. La aferoj komenciĝis ĉiam ĉi tiel kaj okazis ĝis edziniĝo de la fraŭlino.

Ĉiujn dimanĉe servutuloj de Paŭlo Görgey partoprenis militmanovrojn, kiuj estis tre bonaj amuzoj. Tio okazis sur la korto de la kastelo, la komandvortoj okazis slovakingve. La homoj, ĉefe la hominoj volis vidi la okazaĵojn. Ankaŭ loĝantoj de la najbaraj farmoj venis por rigardi la okazaĵojn: el Braŝnjik, Odorica, Piŝaroc, sed ankaŭ la Lőcse-anoj, la memfidaj saksoj babilaĉis aŭdante la militajn antaŭpreparojn. Ili diradis kaj demandadis: „Görgey gardigas sin? Solduloj defendos lin. Li estas malfeliĉa homo. Paŭlo Görgey ĉasadas nur kun siaj armitaj soldatoj.” Ankaŭ pro tio la saksoj ridetis kaj ili diris: „Ni tamen kaptos lin, ja foje li certe venos al la departementdomo, ĉar li devos veni ĉi tien.”

Proksimiĝis la 20-a de januaro, la tago de la kunveno kaj unu post alia alvenis la nobeloj sur kaleŝoj aŭ surĉevale. La maljuna Adamo Tarnocki alvenis sur bovĉaro pro la kota vojo. Alvenis Dravecki, Kolaĉkovski, Jekelfaluŝi, Kiŝek el Felsőoroszlány (felŝooroslanj), Luĵenski, Mataŝovski, la fratoj Abortis, Emeriko Mariaŝi kaj Jobo Andrianski ĉevaldorse. Apenaŭ eblis nombri tiujn. La vilaĝo pleniĝis de la gastoj, estis sarmado kiel en abelujo. La elituloj ricevis kvartiron en la kastelo, sed la husaroj, koĉeroj ricevis kvartirojn en staloj de la servutuloj. La nutradon certigis la Moŝta sinjoro, tagmeze kaj vespere okazis rostado de bovo subĉiele en la domejo de Strelnjik. Tie la maljunaj edzinoj kuiris kaĉon kun ŝafviando. La Moŝta sinjoro portigis unu barelon el inter la kelaj vinaj. Kolonelo Bibók vigle tenis la ordon inter la geservistoj de la gastoj.

Ĉar sur la landvojoj estis malhelpaĵoj pro la koto, nur malfacile oni povis trafiki, estis kutimo atendi la pli malfrue alvenintojn. La atendado ne estis enua, nur oni devis certigi vinon kaj la kartojn. Ambaŭ estis en Görgő. La vicprefekto havis tri vitoplantejojn sur la montosubo de Tokaj kaj ĉiuj homoj havis kartojn. Sed malmulte da kartoj estis, pro kio Georgeto Görgey estis sendita al Lőcse por porti kelkajn pakaĵojn da karto. La tiel nomata „ferbli-a” (kartoludo per hungaraj karto de ludospeco) ne estis eltrovita, sed la „fara-a” (kartoludo per francaj karto) kaj la „bakarato” (hazarda kartoludo) jam estis konataj. Modestaj maljunuloj ludis la t.n. „biribi-an” kartoludon. La saksoj ludis „la kartludon Trente” per karto de la hazarda ludo. Ŝvabi, la neplibonigebla trompludisto ĉiusomere veturis al Italio kaj kiel gajnojn li portis hejmen multe da taleroj kaj novan kartludon. Kie li povas esti nun?

Sed sekvatage ankaŭ Ŝvabi alvenis kaj ankaŭ la aliaj. Oni atendis Johanon Görgey, sed tiu ne venis. Oni atendis ankoraŭ sinjoron Quendel, kiu ricevis kiel

kompenson la nobelan titolon dum la pasinta monato, ĉar li kontraŭis la elaĉeton de la urboj de la departemento Sepeŝ. Ankaŭ li alvenis sur grincanta ĉaro portante kamparanan pelton. Lin neniu vokis.

La hungara nobelaro ne estis ekskluziva instituto. Ne estas miraklo de Dio, ke nia patrujo ankoraŭ ekzistas, sed dankeblas al ĉi tiu instituto. Niaj prauloj bone aranĝis tion. La nobelaro akiris intelektulan forton kaj finanĉan fonton. La saĝuloj kaj riĉuloj atingis la kadrojn de la konstitucio, ekster tiu restis la malriĉuloj kaj la malfortuloj.

La nobelaro ne koleris ĉar ĝi havis novan membron, kiel ankaŭ la araneo ne koleras, se ĝi englutas dikan muŝon. Sed Quendel estis malsimpatia inter la nobeloj pro sia personeco kaj pro la deveno de sia havaĵo, ĉar lia nobeligo signifis vangofrapon por la nobelaro el la departemento Sepeŝ.

Do, la alveno de sinjoro Quendel kaŭzis malbonhumoron kaj la dommastro ekskuzis sin antaŭ siaj intimaj gastoj, ke li ne invitis tiun, sed ĉar tiu estas ĉi tie, tiu havas la samajn gastorajtojn. La dommastro ne volas, ke iu ajn ofendu tiun en lia domo. Cetere sinjoro Quendel tute ne sekretigis tion, ke li ne ricevis invitilon, sed alvenante humile li klinis sin kaj diris:

– Kvankam mi ne ricevis invitilon, tamen kiel nobelo mi tiel pensis, ke ankaŭ mi havas la rajton partopreni ĉi tiun kunvenon.

Paŭlo Görgey ĝentile ekskuzis sin:

– Memkompreneble. Miaj skribistoj estas kulpaj, kiuj laŭ la malnova listo faris la invitleterojn. Bonvenon!

– Ankaŭ mi rapidis – li diris, rapide klinante sin – kvankam mi estas pli ol sesdek-jaraĝa, sed mi estas freŝe akirinte la nobelan dokumenton kaj fartas kiel iu infano ricevinta novan poŝtranĉilon kaj li nun atendas, ke li skulptu ion.

– Nu, ĉi tie estos malmulte da skulptendaj aferoj – ridetis Paŭlo Görgey.

Paŭlo Görgey nenion malkaŝis por la kolektiĝantoj antaŭe pri la temo de la kunveno, vane oni pridemandadis lin.

Paĉjo Quendel malemis de la kartludado. La aliaj vokis lin kartludi por malpliigi la monon de la maljunulo. Sed li rifuzis la kartludon. Kion dirus la mondo, se li, Quendel, kiu havas kontakton kun la reĝo, nun kartludus por mono? Pro tiu orgojla rimarko, la nobeloj pli kolorigis, sed pli malfrue al kelkaj malvenkantoj li pruntedonis la petitajn monsumojn el la kesto estanta sur lia ĉaro, nome servanta kiel sidejo. En la kesto estis bona burso. Li pruntedonis la monsumojn sen obligacio kaj garantio. Efike de tio li iĝis grava homo. Sed ĉar li devis kuri al sia ĉaro ofte, por enporti la ĉiam pli novan monsumon, la juna Mariaŝi konsilis al li:

– Estus bone portigi la keston, paĉjo Quendel.

– Tio estus vere bona – jesis sinjoro Quendel – kaj por vi kaj por mi, do ni sendu iun por tiu.

Baldaŭ kolonelo Bibók portigis la keston per iu sia forta soldato, kiu metis ĝin kiel Torao-keston sur la longan verda-drapan tablon kiu staris en la mezo de la ĉambrego.

Ĉiuj miris kaj ne komprenis kial estos por ĉiuj pli bone, se la kesto estos sur la tablo. Sinjoro Quendel iĝis dormema post la vespermanĝo, la ŝlosilon de la kesto li metis en la seruron de la kesto dirante:

– Nu, mi iras enlitiĝi. Sed neniuj veku min, ĉar tion mi ne ŝatas. La ŝlosilo estas en la seruro. Kiu bezonas monon, tiu elprenu kaj skribu la monsumon sur papereton kune kun sia nomo por ke poste li ne redonu pli grandan monsumon. Neniuj veku min, ĉar kiel nobelo pro tio mi volus mortigi tiun.

Pro tiu ĉi memironio la aliaj ridetis kaj ĉar la maljunulo lasis tie la keston kaj la ŝlosilon ĉe la aliaj, ŝanĝiĝis la opinio pri li: „Rigardu la novan nobelon, Quendel! Ja, li vere estas nobelo! Eblas ekami lin!” Ladislao Kolaĉkovski klarigis laŭ la biontologio, ke la nobeligo havas magioforton, ja ankaŭ el la abomena raŭpo estos admirinda papilio.

Jes. Tie okazis ĝis mateno la kartludado kaj sekvatage post la matenmanĝo interŝanĝado de la ĉevaloj sekvis. Tio estas granda ĝuo, kiam oni esplorkontrolas la ĉevalojn kaj elektas la plej ĝustan ĉevalon, la plej necesan laŭ la haŭtkoloro, galopmaniero. La venkanto akiros de la kartludo pli novajn kaj pli bonajn bestojn. La malvenkanto povis mensogi al sia edzino, ke li malvenkis. Ĉar la aliaj pli lerte kartludis. Do, estis marĉandado ĉe kiu oni laŭdis siajn ĉevalojn kaj mallaŭdis tiujn de la aliaj:

„Tiu ĉi ĉevalo faras ĉion, nur paroli ĝi ne povas.”

„Tiu ĉevalo faras ĉion sen devo de uzo de vipo.”

„Tiu ĉevalo ne manĝas avenon, tamen ĝi ne estas laca.”

„Ĝia irado similas al muziko.”

„Ĝi iras tiel fiere, kiel iu damo.”

„Ĝi estas tiom milda, ke oni povus kuiri marmeladon sur ĝia dorso.”

Ĉi tiaĵojn oni diris pri tiuj ĉevaloj, kiujn la mastro jam tediĝis kaj kiujn li ne volis posedi plu. Sed okazis marĉandado alie, pri tiuj bestoj, kiujn oni volis vendi:

„Ĝi havas tiom da eraroj, kiom da jaroj ĝi havas.”

„Iu piedo de ĝi doloras.”

„Iu okulo de ĝi estas tute blinda.”

„Ĝi tenas la kapon kiel mulo.”

Oni jungis, maljungis, kio estas belegaj vidaĵoj por la husaroj, koĉeroj, ja en Hungarujo la rajdado estis ŝatata okupiĝo. Ĝis kiam povus daŭri ĉi tiu improvizita foiro, ĉu ĝis la dommastro vokos la ĉeestantojn por pritrakti la publikaferojn? Kiu scias?

Ĝis nun Paŭlo Görgey atendis sian pli aĝan fraton Johano, sed tiu ne alvenis, do ĉar Paŭlo Görgey ne volis prokrasti plu sian paroladon, do antaŭ la tagmanĝo

li volis pritrakti la aferojn. (Nome ĉar nun la homoj ne estas ebriaj.) Dume la grandan ĉambregon oni reordigis portante eksteren la tablojn pri kartludo kaj enportis la benkojn. Nur la longa tablo kaj kun ĝi la verda drapo restis sur sia loko. Ĉirkaŭ ĝi la elitaj (kvar ĉevalajn kaleŝojn havantaj) familianoj sidiĝis. La aliaj sidiĝis sur la benkoj. Paŭlo Görgey salutis per kelkaj vortoj la ĉeestantojn, kiuj aperis kontraŭ la frosta vintro, je lia peto, kiujn oni akceptis kuname. Sed nun li petis ilin ne rigardi lin kiel sian dommaston sed pensu, ke ili kunvenis en neŭtrala loko kaj ne kiel liaj gastoj.

– Al diablo! – Sinjoro Abhortis⁷⁸ diris surprizite. – Nu, tio ne eblas!

– Ho! – murmuris Francisko Monoki.

– Nur por la duonhoro dum la daŭro de la konferenco – diris la vicprefekto, per kiuj vortoj li vekis ĝeneralan bonhumoron.

– Tiel estas jam alie.

Samtempe la vicprefekto lanĉis, ke prezidantu la kunvenon sinjoro Petro Luĵenski.

– Kial ne la vicprefekto? – kelkaj demandis. – Ja li estas la ĉefo en la departemento.

La vicprefekto interparolis, kvankam li ridetis, sed tio, kion li diris, tio estis malbonaŭgura:

– Mi akceptas la kontraŭdiron, sed tamen prezidu nun sinjoro Luĵenski, ĉar pli bone estas ŝanĝi la personon, ol la ĉevalon, aŭ ceteron. Bonvolu sidiĝi sur la seĝon de la prezidanto, mia sinjoro pli aĝa frato. Laŭ mi vi estas la plej maljuna.

La okdekjara Luĵenski jesis per sia griza kapo.

– Mi ankoraŭ ne estas maljuna – aldonis li gaje – sed nur tio pravas, ke mi longtempe vivas jam sur ĉi tiu malbona planedo, do, mi obeas.

Poste li sidiĝis en la ornaman brakseĝon, el kies apogiloj etendiĝis du orumitpintaj lancoj. Li ne povus esti hungara homo, se sen oratorado li sidus, ja sur li estis dudek vundoj. Do, li komencis diri la prezidan malferman parolon:

– Miaj nobelaj kunuloj! Vi estas la lasta defendanta armeo de Eŭropo! Tempe de la militoj de Thököly mi servis kune kontraŭ la paganaro, kiuj estis bravaj malamikoj, sed bedaŭrinde jam ne ekzistas. Inter la paganoj estis mia brava amiko, la bejo Hamen, kiun mi amis kiel mian fraton. Tiu diris al mi dum parolado: „Vi, Hungaroj kaj kristanoj, diris, ke vi estas pli saĝaj, ol ni, sed vi estas la plej stultaj homoj.” Mi demandis: „Kial?” „Ĉar, – li diris – se vi volas regali, honorigi iun kun drinkfesteno, tiam vi sidigas lin apud la plej malbonan, maljunan virinon ne honorigante lin per la sidigo al la plej bela junulino, kie estas la plej bona loko.” (Estis en la ĉambro vigliĝo, bona humoro.) Bejo Hamen pravis, kies diron mi rememoris kaj pro kiu mi rememoris nian strangan kutimon, laŭ kiu ni sidigas

⁷⁸ La nomo elparolendas abortis.

la plej seriozan, sed plej sentaŭgan kadukan homon en la seĝon de la prezidanto. (Okazis bruaj kontraŭdiroj.) Mi ne scias, pri kio temos la hodiaŭa kunveno, sed mi pensas, ke la sinjoro vicprefekto havis sufiĉe da kaŭzoj por elvoki nin dum la frosta vetero el nia silenta hejmo. Kvankam mi estas modestulo al tiu ĉi ofico, sed ĉar tio ĉi estas la nacia kutimo, mi entreprenas ĉi tiun taskon, kiun mi ricevis ne pro miaj meritoj, sed pro mia maljuneco.

La ĉeestantoj unuvoĉe kriis „Vivu“! Iu advokat-kandidato portis tamen la glavon de la vicprefekto kaj iun lignokesteton. La pli lastan li metis sur la tablon kaj la glavon resendis. Poste la vicprefekto ekstaris kaj trankvile prelegis laŭ kronologio, kiel estiĝis la disputoj inter la departemento de Sepeŝ kaj la Konsilantaro de Lőcse, el kio iĝis malamo inter la nobeloj kaj la civitanoj. Li detalis sian disputon kontraŭ la juĝisto de Lőcse, kio pli malfrue pro lia kolero kaŭzis la bedaŭrindan faron dum la unua tago de ĉi tiu jaro, pri kiu la famo disvastiĝis.

– Mi aŭdis pri tio – ĉiuj respondis.

– Mi ne volas senkulpigi min antaŭ vi – li daŭrigis la parolon – ĉar vi ne estas miaj juĝistoj. Ĉefe mi diras mian aferon al Dio, ĉar antaŭ Dio mi povas senkulpigi min; ja Dio donis mian incitiĝeman naturon. Simple mi diras la faktojn por konkludi. Lőcse, kiel estis evidente, ne taksis indiferece la malfeliĉecon, kion mi bedaŭras, sed ĝi tiome kortuŝiĝis, ke ĝi estas eksterordinara. La Konsilantaro ne faris akuzon, sed sole volis juĝadi. Mi faris krimfaron pro la subita ekscitiĝo kaj la konsilantaro akuzas min pro tio. La Konsilantaro volas fari venĝon kaj pro tio oni detranĉigis la manon de la juĝisto kaj volas enterigi ĝin apud la korpon de la juĝisto post la ekzekuto. Ĝis plenumo de la venĝo la balzamita mano estos elmetita por la publiko rigardata de ĉiuj. Ĉi tiel la mano portas la famon por la polviĝanta korpo pri la venĝo...

Liaj vortoj estis efikaj, liaj okuloj estis ekscititaj, lia vizaĝo paliĝis. La ĉeestantoj maltrankviliĝis. Davido Horanski ekkriis:

– Eĉ hundo ne timas de la saksoj!

La Konsilantaro estas ege singardema, ja ĝi incitetis la loĝantaron por venĝi kaj ordonis porti funebrajn vestaĵojn...

Tio estas vera nigra urbo kiel en la fabeloj – nazvoĉis Jobo Kiŝ – hieraŭ mi estis tie dum elektado de juĝisto kaj la homoj estis sur la stratoj, portante funebrajn vestaĵojn.

– Baldaŭ la funebraj vestaĵoj foruziĝas – opiniis sinjoro Ŝvabi. – Mi deziras vidi tion.

Aleksandro Abhortis skuis la pugnon minacante:

– Mi faros el la nigra urbo ruĝan urbon, se en la saksoj fluas sango kaj ne acida lakto.

La prezidanta Luĝenski malkontente kapbalancis kaj postulis silenton.

– Nu, miaj sinjoroj! Ni aŭskultu la vicprefekton. Ne diru viajn opiniojn, ĉar li baldaŭ diros la farenadojn.

– Efike de tio la ĉeestantoj hontis kaj Paŭlo Görgey povis daŭrigi:

– Ĉar mi konas la cirkonstancojn, facile povas okazi, ke min atingos eksterordinara akcidento.

– Nu, tion ni ŝatus vidi – siblis iu akra voĉo.

– Ĝuste pro tio ĉi – daŭrigis Paŭlo Görgey – mi decidis jene: Nome, se Lőcse venĝos la ofendon, kiu atingis la juĝiston de la urbo, tiam ankaŭ la Departemento ne estas pli malnobela kaj ĝi certe venĝos la ofendon, kiu atingis la vicprefekton de la departemento. Kion tio povas rezultigi, estimata kunveno? Ja, la revivigitaj fajroj de ekscitoj pli facile ĉesos, ol la malgrandaj. Mi konas laŭ la familiaj kronikoj la disputojn inter la familioj Berzevici kaj Görgey, pro kiuj ambaŭ familioj malfortiĝis. Kio okazos, se kverelos Lőcse kaj la Departemento? Kvazaŭ en tiu ĉi malfeliĉa lando ne estus tre multe da suferoj kaj detruoj. Ĉe ĉi tiuj okazintaĵoj ni devas havi klaran racion. Mi volas savi la departementon, ke por mi ĝi ne havu problemon. Nome mi eksiĝos el mia vicprefekta ofico kaj transdonos la stampilon de la Departemento al sinjoro Luĵenski por havi tiun plu.

Neklarigebla kaoso estiĝis. Kelkaj homoj eksaltis. Sur ĉiuj vizaĝoj ekaperis furiozo, incititeco, maltrankvilo, emocio kaj medito. Luĵenski redonis la kesteton, en kiu estis la stampilo de la departemento. La nobelaro estis unueca, ĝi protestis kontraŭ la anonco de Paŭlo Görgey kaj ne akceptis tion.

Efike de tio ĉi, eksaltis subite Emeriko Dravecki kiel vundita tigro dum kio iĝis silento. Li diris la sekvajn vortojn:

– Mi ne akceptas la anoncon de la estimata vicprefekto, ĉar mia koro kaj kavalira sento ne permesas tion. Kvankam Lia Moŝto agas en la intereso de la nobelaro, sed pro ni, li agas senpripense, kaj nun li deziras, ke ni ne helpu lin, kiam danĝero minacas. Miaj Moŝtaj sinjoroj! La vicprefekto estas nobelo kaj ne volas helpi sin. Sed ankaŭ ni estas nobeloj kaj ni helpos lin. Kiel senglore estus, se ni ne helpus lin, ĉar li ne plaĉas al la Lőcse-anoj. Mi ne akceptas la eksiĝon de Paŭlo Görgey, Dio helpu min tiel! Se vi akceptas tion, tiam mi transloĝiĝos de tie ĉi, mi portigos de tie ĉi miajn praulojn, kiuj ne povus ripozi tie ĉi.

Ĉi tiujn vortojn sekvis entuziasma vivuado. Vivu Dravecki kaj vivu Paŭlo Görgey!

– Ni havas unu vivon kaj morton kaj unu vicprefekton! – ekkriis Monoki. Efike de tio iĝis nova vivuado laŭkutime.

La duraj trajtoj de Paŭlo Görgey moliĝis, li ofte palpebrumis kaj rapidis malhelpi la larmadon.

– Mi dankas al vi pro via fidela, sincera kroĉiĝo al mi – li diris mallaŭte, tremetante. – Sed mi petas vin akcepti mian eksiĝon. Nome mi ne povas regi la departementon de Sepeŝ, ĉar pro tio mi devus loĝi en Lőcse, kie estas la domo

de la Departemento. Sed tion mi povus fari nur per armeo, sed al tio bezonatas la permeso de la reĝo.

La ĉeestantoj iĝis malbonhumoraj. Estis silento. Ĉiuj sidis ĉirkaŭ la tablo, rigardis unu la alian senkonsile kaj pensis la saman: la vicprefekto pravas. Nome la Lőcse-anoj ekkaptus lin, batus lin, enprizonigus lin. (Ja ili estas impertinentaj.) La nobelaro devus neniigi la urbon Lőcse per la armeo kaj reakiri sian prestiĝon. Sed tiuokaze ankaŭ la imperiestro intervenus kaj estiĝus granda milito.

Estiĝis turmenta silento. Subite sinjoro Quendel ekstaris, sed ĉar li estis malalta, lia najbaro, Francisko Lanci diris al li, por ke oni vidu lin, li ekstaru sur iun benkon, se li havas direndaĵon. Li vigle eksaltis tien glatigadante sian kaprobarbon, tenante en la mano sian ĉapelon el ŝafidfelo kaj per tiu gestadante komencis paroli:

– Mi enuas jam pro la multe da paroloj, miaj sinjoroj! Mia stomako signis la tagmezon kaj mi deziras tagmanĝi...

La ĉeestantoj indignis, sinjoro Quendel forgesis la pripensitajn belajn frazojn kaj labortaglingve daŭrigis sian parolon en la lingvoj pola kaj germana tekstite, tradukite:

– Nu, bonvolu ne priridi min. Mi ne estas malnova oratoro, sed estas nova nobelo kaj „nova balailo bone balaas.” Mi elpensas iun bonon kaj diras malbone. Vi elpensas iun malbonon kaj vi diras bone. En ĉi tio estas la esenco de la afero. Mi diras proponon, finante la diskuton: La vicprefekto restu vicprefekto kaj ni iru tagmanĝi. Mi, Gasparo Quendel (li batis fiere sur sian bruston) konstruigos propramone departementodomon similan al tiu de Lőcse, tiom similan kiel similas unu ovo al alia, kaj mi donacos ĝin por eterne al Görgő. Mi finis.

Nun jam Quendel ne estis ridinda figuro. Grava afero estas la elokventeco, sed ankaŭ la mono estas ne frenezaĵo. (Ĉefe tiam, se la monsumon oni utiligas bone.) Tio estas simila al la potenco kaj genio, kiuj faras gloron ĉirkaŭ la kapo. Ses homoj saltis al Quendel, levis lin sur la ŝultrojn kaj portis ĉirkaŭe en la ĉambrego. Li baraktadis kaj tre ŝvitis.

Mi neniam veturis sur sama jungaĵo. Ne saĝumu! Ho, ve! Kiel tikle estas!

Nur iu kontraŭdiris:

– Tio estas nepripensita parolo! Ne ni portas for nian departementdomon, sed ili forportu sian urbon.

Oni malakceptus tiun ĉi interparolon, se tion ne dirus la juna Paloĉai, la barono.

Nome la baronon ĉagreniĝis, ke la komercisto de la setlejo Béla tuj akiris grandan prestiĝon ĉe la nobelaro de Sepeŝ.

Sed tie estis – feliĉe – Georgo Mariaŝi, kiu ne estanta barono kritikis la vantaĉon de la aristokratoj. Li ekstaris kaj ĉagreniĝis pro la pli lasta interparolo. Li ne konis la interparolanton, sed la diro estis sendankaĵo pri la brava viro kies

oferdono meritas laŭrokronon kaj ne malhelpon. (Vivu Quendel – aŭdiĝis la vivuoj). Sed ankaŭ Mariaŝi ne akceptis la oferdonon de Quendel dirante, kial ni devas konstrui por ni novan departemento-domon, ja baldaŭ ĉesos la kolero de la Lőcse-anoj kiel ankaŭ la maro malrapide forvaporigās. Sed tamen estis plaĉa la propono de Quendel – diris Mariaŝi – pro tio decidu, ke oni nenion konstruu, ja ĉi tie estas ĉi tiu gastamanta kastelo kaj ni aranĝu niajn kunvenojn ĉi tie, en Görgő. Tio ĉi estas simpla afero, kiel la ovo de Kolumbo. Ĝi havas precedencon, ja ankaŭ la Pešt-anoj aranĝas la kunvenojn en Füleke, en la departemento Nograd.

– Tio estas ĝusta! Vi pravas! Estas akceptite!

Luĵenski demandis:

– Kiu akceptis tion, tiuj levu sian manon!

La manoj leviĝis supren, nur Paŭlo Görgey frapis permane nerve sur la tablo:

– Ni aŭdu sinjoron Paŭlo Görgey!

Görgey ekstaris kaj penteme klinis sin kaj obtuzvoĉe, kvazaŭ li parolus el iu kelo, alparolis:

– Mi trudiĝas akcepti la volon de Dio kaj la ordonon de la nobelaro. Nome mi restas vicprefekto, se eĉ unu sola animo ne ĉeestas kiu deziras mian foriron.

Finfine la grava vorto „restas” estis eldirite. Je tio iĝis grandioza vivuado, kiu vibrigis la murojn. Nome post la eldiro de la grava vorto „restas” la murbildo per oleofarbo pentrita, unu klafton longa, kiu figuras la patrinon de Paŭlo Görgey, Elizabetan Palaŝti en verda velurmantelo, surkape kun strutoplumo – defalis de la muro kaj bruegante ĝia kadro frakasiĝis sur la planko.

– Tio ĉi estas malbona omeno – flustris David Horanski al Jekelfaluŝi. – Onjo Elizabeta moviĝis sur la muro. Paŭlĉjon ŝi amis kaj plej ofte karesnomis lin el inter siaj infanoj.

Ankaŭ Paŭlo Görgey paliĝis pro la vidaĵo kaj frostotreme daŭrigis:

– Mi restas vicprefekto, sed mia deziro estas, ke estu farita protokolo pri tiu ĉi kunveno kaj ĉiuj ĉeestantoj subskribu tiun.

Li ĉirkaŭrigardis kun akraj okuloj kiel tiuj de aglo. Sed tie ne estis kontraŭdira homo! Kiu scias? Povas esti, ke iu estis tie senkorpe flirtanta en la ĉambro kaj aŭdis la decidon pri la sorto de sia filo. Iu homo diris al la muro: „Lasu tiun najlon, lasu tiun bildon sur kiu mi estis por doni signon.”

Ĉi tiel la afero aranĝiĝis kaj aliaj detaloj estis skribitaj en la protokolo dum gaja drinkado ĉe la blanka tablo. La tagmanĝo pretiĝis, la kuiristinoj, kuiristhelpistoj, primetantaj husaroj iradis – venadis, direktate de sinjorino Marják. Sed ili ne povis surtabligi ĝin, ĉar oni devis aerumi en la ĉambrego pli frue por akiri freŝan aeron. Nur poste oni povis prepari la tablon por manĝo. Ĉio okazis rapidege, kaj dume alvenis Grodkovsky la fortikaĵkapitano de Lőcse, portante freŝajn informojn. Li diris, ke hieraŭ oni elektis juĝiston. La elektado daŭris ĝis malfrua vespero

inter Gosnovicer kaj Nustkorb kaj post longa diskuto sinjoro Andreo Nustkorb iĝis la juĝisto de Lőcse. Li faris pacan dankan parolon, en kiu li ne menciis la venĝon kontraŭ Paŭlo Görgey.

Ĉi tiuj informoj faris gajan etoson inter la sinjoroj de la departemento. Ankaŭ la malserena vicprefekto estis gaja, kiu sidis ĉe la ĉefloko inter barono Paloĉai kaj Luĵenski. Kiam oni portis la tre bongustan supon el anserlaringoj, li serĉis por diri al la servanta husaro:

– Portu li unue la supon al sinjoro Quendel, ĉar tiu estas pli malsata, ol ni kaj tiu proponis unue, ke Paŭlo Görgey estu ankaŭ plu vicprefekto.

Poste la vicprefekto tuttage estis serena, dume li diradis adiaŭan paroladon al la forirantaj gastoj. Dum la forirado sinjoro Quendel diris al la vicprefekto, – kiel li jam pli frue diris – li dezirus konstrui iun aĵon por helpi la bonan aferon kaj ĉagreniĝus, se oni dirus, ke li nur parolaĉis. Pro tio sinjoro Quendel petis la vicprefekton vendi al li unu parcelon ne tro malproksime de la kastelo, kie li povos konstrui gastejon, remizon, stalon por la nobeloj, kiuj venos por partopreni la kunvenojn. Ĉi tiel oni povus certigi apartan komfortan kvartiron por la nobeloj. Cetere la nobeloj ŝatas restadi en la gastejoj, kie ili povas amuziĝi laŭ siaj gustoj, ĉefe se tie estas tre bongustaj vinoj kaj tre belaj fraŭlinoj kaj ĉambristinoj.

Paŭlo Görgey ekskuzis sin dirante, ke por multe da homoj sufiĉas eta loko por pasigi kelkajn tagojn en Görgő kaj li ne povas akcepti tiun ofer-proponon. Pro tio Quendel ne faru superfluan elspezon.

– Sed mi pensis tiel, ke mi havus la gastejon kaj mi ludonus ĝin al la nobelaro kaj tio servus tiel mian ŝaton.

La vicprefekto tiradis la ŝultrojn.

– Se vi ĉielmaniere volas forĵeti propran monon superflue, mi permesas konstrui la gastejon.

Finfine la domo iĝis senpopola, sed Paŭlo Görgey ankaŭ plu restis komunikema, afabla kaj vespere agrable drinkadis vinon kune kun Grodkovski, kiun li petis pasigi la vesperon kaj nokton en Görgő. (Nu, pro tio estos buŝbatalo.)

Grodkovski noktomeze iris al sia dormoĉambro. Sed dume li ekvidis sur la teraso sinjoron Bibók, kiu ŝanĝis la armilajn gardistojn antaŭ la dormoĉambro. Poste Paŭlo Görgey vokis sinjoron Bibók por preparoli la manieron de la defendo de la kastelo. Dume Preston helpis al li malvesti sin kaj grati liajn piedojn (liaj piedoj jukis pro la frostado okazinta iam dum vintra tendumado). Post foriro de Preston ili preparolis, ke ili devas porti printempe el Toporc al Görgő tri kanonojn de Johano Görgey:

– Ĉu vi konas iun, kiu konas la funkciigon de la kanonoj?

– Jes. Miaj du pli junaj fratoj konas tiujn. Ili estas lertaj buboj.

La Bibók-oj estas naskitaj soldatoj.

- Mi pensas tion – respondis Görgey kurte, orgojle.
 - Kiel fartas kune la familianoj? – la vicprefekto demandis scivole.
 - Nun estas paco.
 - Mi miras pro la okazintaĵoj – murmuris la vicprefekto.
 - Ĝi havas sian sekreton...
 - Kio estas ĝia sekreto?
 - Nome la kadukulo scias nenion, li suspektas nenion. Kaj la edzino jam nenion malhavas kaj nenion elklaĉas...
 - Diable! – Paŭlo Görgey kapbalancis. – Kiel vi kondutas, kolonelo?
 - Mi aprobas, mi helpas al ĉiuj kaj neniom enuas. – diris Bibók.
 - Laŭvorte vi estas perfekta homo – finis Paŭlo Görgey la paroladon, oscedante.
 - Tiel ŝajnas, ke hodiaŭ mi dormos. La gardistoj iru, frapadu per la tenilo de la lanco la ŝtonojn de la strato.
- Tio estis ordonita, ĉar la bruo certigis la sekurecon, trankviligis liajn nervojn, sed se la frapado ĉesis, ĝuste tiam tuj pro la morta silento li vekigis.



Nobeloj en la 17a jarcento

<https://dka.oszk.hu/046400/046470>

9-A ĈAPITRO

La sorto de la malgranda Rozalia ŝanĝiĝas

La tagoj pasis silente kaj trankvile kaj samforme. Sed nur la vintro estis kaj pli varma kaj pli malvarma. En Lőcse la karnavalo estis enuiga, la edzinoj grumblis, sinjoro Nustkorb iĝis la juĝisto. Al la senatanaro ne plaĉis lia paca sinteno, pro kiu ili komencis la proceson por trankviligo de la popolo al la akiro de la areo signitan per sango. Paŭlo Gőrgėy ricevis alvokon por aperi antaŭ la juĝistaro. Sed ĉar tiu opiniis laŭcele ne aperi tie, li malgajnis la proceson dum sia foresto, ĉar li estis obstina. Estis dirite, ke oni devas ĵeti hundfrandaĵon al la dentojn grinciganta hundo!

Vere la proceson Paŭlo Gőrgėy malgajnis kaj la posedaĵo de Gőrgėy iĝis havaĵo de Lőcse feste, kiun ĝi rekviziciis ruze. Ĉi tiun rezulton oni festis dum la festeno en la kelo de Lőcse. Sed al la gajnantoj ne sufiĉis ĉi tiu triumfo, la malobeemo de Paŭlo Gőrgėy ne estis bona taktiko, ĉar dum la festeno okazis paroloj ribeligaj, kiuj revivigis la venĝemon. Dum la festeno oni decidis ankaŭ pri tio, ke la postenon konsilantan, kiu restis malplena pro la elekto de Nustkorb, ricevu la juna Fabricio, kies orelon vundis alia Gőrgėy en duelo. Pli malfrue post sia edukado li estu la juĝisto de Lőcse. Li estas kuraĝa, ne kiel sinjoro Nustkorb. Li kapablas oferi sian vivon por la urbo. Li iĝis vera heroo, kvankam nuntempe li studas eksterlande, estante pli juna ol dudekkvarjara. Pro tio oni sendos delegitaron al Vieno al la reĝo Leopold por peti emancipon kaj poste oni vokos lin hejmen.

Ĉi tiel pasis la vintro, en majo malaperis la neĝo sur la montoj kaj en la valoj. La arbaroj kreskigis verdan foliaron kaj la akvo de la riveroj kaj riveretoj fluis en siaj fluejoj. Ĉio havis novan vestaĵon, sed la loĝantoj de Lőcse portis nigran vestaĵon...

La parceloj ĉirkaŭ la urbo havis gajan etoson, ja la pizo jam floris, sur tiu estis ruĝaj floroj. Se iu edzino estus alveninta al la urbo portante surkape ruĝan tukon, tiam la magistrato indignus kaj la urbaj reprezentantoj konfiskus la ruĝan tukon kaj tiu estus demandita:

– Ĉu vi ne scias, sendia ulino, ke en tiu ĉi urbo la homoj funebras?

Sed en Gőrgő la vicprefekto gajan vivon estigis, pro la inter la vicprefekto kaj la urbo estiĝinta milito. Al Gőrgő alvenis gastoj, elitaj interparolantaj sinjoroj. Ĉiutage okazis iu fama okazaĵo.

Fine de junio dum lunluma vespero iu kariolo alvenis al la domejo de Paŭlo Gőrgėy. La kariolon tri ŝarĝĉaroj sekvis, sur kiuj estis grandegaj kestoj, en kiuj oni kutimis porti varojn al la foiro.

Paŭlo Görgey ankoraŭ ne enlitiĝis, sed legadis verkojn de siaj ŝatataj verkistoj. Sed Bibók amuziĝis kontraŭ la kastelo sub iu improvize kunmetita tendo. Nome oni nun faris tegmenton sur la murojn de la gastejo, kiun sinjoro Quendel farigis. Oni ornamis la ĉevronojn per floroj de robinioarboj kaj alteo. La ĉarpentistoj kaj masonistoj drinkfestenis. Ankaŭ la ĉefo festis kun siaj homoj. Oni metis kranon en iun barelon por elfluigi la vinon. Kaj estis ankaŭ muziko. La junedzinoj kaj fraŭlinoj atendadis, ke la fraŭloj akompanu ilin por danci. Kelkfoje sur la polva vojo kelkaj masonistoj dancis kun la hominoj, sed tiuj homoj ne estis taŭgaj por danci, ĉar tiuj estis fuŝpaŝaj kaj ne komprenis la dancon kun la junedzinoj. Kaj se iu ĉaro venis sur la vojo, tiam ili devis ĉesigi la dancon, kiel nun, kiam la ŝargĉaroj alvenis.

Sinjoro Bibók rimarkis, ke la ĉaroj iras al la korto de la kastelo. Li tuj ĉesigis la amuziĝon kaj maltrankvile kuris post la veturiloj.

Kiu alvenas nun? Kio estas en tiuj grandegaj kestoj? Ĉu oni kontrabandas soldatojn en tiuj? Ja, la loĝantoj de la urbo Lőcse estas ruzaj. Li rememoris iun historion, laŭ kiu en la ventro de iu ĉevalo oni kontrabandis soldatojn.

Iu maljunulo havanta lipharojn kaj ordonantan voĉon elĉariĝis saltante vigle:

– Ĉu la mastro estas ĉi-hejme? – li demandis.

– Kiu serĉas lin?

– Ĉu?

– Kiu estas Vi? – demandis Bibók.

– Tio ne estas via afero. Ni estas gastoj. Akompanu nin al la mastro.

Sed Bibók ne cedis al la maljunulo.

– Tio eblas, ke vi estas gastoj, sed mi estas nobelo kaj ne estas por vi iu ajn. Vi ne povas iri al la mastro ĝis vi montras la enhavon de la kestego. He! Soldatoj! – kriis Bibók al siaj soldatoj, sur la teraso dormetantaj – portu kelkajn lampojn.

La grandliphara maljunulo konsterniĝis, sed iu alia viro alparolis lin pli amikece, ol la antaŭa.

– Kiu vi estas, se mi demandebblas?

– Mi estas kolonelo Bibók, sed tion pli prave mi povus demandi.

La pli laste parolinta viro subite el la ĉaro elprenis karabenon, kies arĝenta kolbo estis minaca. Tiel ŝajnis, ke la viron trafis malagrabla la diritaj nomo kaj rango. La viro iĝis suspekta por Bibók kaj li malpacience demandis:

– Ĉu tamen vi ne diros viajn nomojn?

– Ni estas amikoj de la mastro – respondis la armita homo – anoncu nin al la mastro – diris la grandliphara homo.

– Ne ŝercadu – atakis Bibók severe – ĉar mi ne ŝatas tion. Se vi estas bonaj homoj, tiam diru viajn nomojn, sed se ne, tiukaze foriru.

– Mi jam diris tion – ridis la grandliphara ulo – voku la mastron Paŭlo Görgey, kiu konas nin.

– Ne. Ne movu vin ĝis mi vidos la enhavon de la kestegoj.

Nun subite sinjorino Marják rigardis tra la fenestro.

– Ej, no, sinjoro Bibók – ŝi riproĉis lin – ĉu vi volas forpeli la fraton de la mastro? Tuj mi eliras. He, Suzana, Marinja, Anja! Kie vi estas? Sinjoro Bibók, diru al ili veni ĉi tien!

Certe ili petolas senhonte kun la soldatoj. Ili faru fajron. Ĉu vi ne vespermanĝis ankoraŭ? Ĉu vi ne volas vespermanĝi? Tio ne eblas. La karaj gastoj devas vespermanĝi ĉi tie. Nia mastro tre ĝojos.

Dum la soldatoj portis la lampojn sinjoro Bibók ekskuzis sin pro la malbona ago. Li diris, ke li ne konis tiujn ĉi homojn. Li havas tiun taskon, ke li gardu la vivon de la vicprefekto kaj tiuj homoj kaŭzis malagrablaĵon, ja ili ne diris siajn nomojn.

– Mi diris, – ridis la grandliphara ulo – ke alvenis Esze, ĉar mi estas Tomaso Esze⁷⁹.

Bibók aŭdante la konatan nomon, deprenis la ĉapon kaj kunfrapis siajn spronojn kiel honorsaluto:

– Bonvenon ĉe ni!

– Kaj mi ne diris la nomon pro tio – ekskuzis sin Johano Görgey – ĉar mi kredis vin iu imperiestrano kaj por tiuj mia nomo estas ruĝa drapo.

La vicprefekto tre ĝojis ekvidante sian pli aĝan fraton, kiun li delonge ne vidis, kaj la faman kurucan estron Tomaso Esze (ese), kiu ridigis la homojn, aŭ mortigis tiujn. Sed la vicprefekto tre surpriziĝis pro la vizitado: „Kio povis okazi pri la ermito de Toporc?” Ĉar tiu subite venis al Görgő. Ja sinjoro Tomaso ĉiam planas ion. Sinjoro Johano Görgey preterparolante respondis. Ja li ne vidis longtempe sian pli junan fraton kaj dezirus kun tiu paroladi. Esze diris haste, ke en la grandegaj kestoj estas dota ekipaĵo de iu parenca vidvino, kiu ŝatus edziniĝi. De kie la gastoj alvenis? La respondo ne estis tute klara, sed ili estis gajaj. Okazis amaraj esprimoj dum la drinkado, sed la vicprefekto ne suspektadis:

– Ofendoj al la eminenta hungara nacio iĝas evidentaj. (Tiu ĉi frazo estas ĉe la antaŭo de la proklamo de Francisko Rákóczi la dua,⁸⁰ kiun komence de 1704 li sendis al la nobelaro de la lando kaj al la eksterlandaj landoj, en kiu li informis pri la kaŭzoj de la liberecbatalo.)

Esze batis la tablon perpugne, efike de tio, kaj en okuloj de Johano Görgey juneca entuziasmo ekaperis.

⁷⁹ Pri Tomaso Esze, vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Tomaso_Esze

⁸⁰ Pri Francisko Rákóczi la dua: https://eo.wikipedia.org/wiki/Francisko_Rákóczi_la_2-a

La vicprefekto restis trankvila, sed laŭ ambaŭ gastoj tio estis cinismo.

– Kiu ploras por la popolo, tiu ne havos okulojn.

La gastoj du tagojn pasigis en Görgő, kie ili ricevis tutan provizon. Estis strange, ke Tomaso Esze diradis, ke nur hazarde li venis al Görgő. Sed dum la du tagoj multe da homoj vizitis ambaŭ virojn, ekzemple Freĉjo Petroci, Blazio Suedji⁸¹, Farkaŝ Horvát. Kun ili ambaŭ viroj paroladis inter kvar okuloj, do sen ĉeesto de aliaj.

Por la vicprefekto estis stranga la afero kaj li demandis sian pli aĝan fraton:

– De kie ili sciis, ke vi estas ĉi tie?

– Tion scias la gnometoj, flustris – tirante la ŝultron Johano Görgey ŝerce respondante.

Li ridetis enigme kaj movis siajn fingrojn, kion faris li infane, se li bone fartis. Li donis mallongajn respondojn, se Paŭlo interesiĝis pri liaj aferoj, sed vigle interesiĝis pri okazintaĵoj de Lőcse kaj pri la doma taĉmento de kolonelo Bibók. Li demandis, kia homo estas sinjoro Bibók kaj kiom da personoj havas la taĉmento de Bibók kiom estas tiuj ekzercitaj soldatoj.

– Li estas lerta, artifika, aventura homo, kiu timas neniun. – respondis la vicprefekto.

– Kie li estis pli frue?

– Mi donacis al li la kolonelan titolon.

– Mi tre ektimis de li. Tion mi kredis, ke li estas imperiestrano kaj lia taĉmento estas imperiestra armeo.

– Kial vi timas la imperiestran taĉmenton? Mi ne scias. Pro la kutimo. Mi ne ŝatas la malamikon, se mi ne preparas min por batali kontraŭ tiu.

– Sed nun estas paco inter ni kaj la imperiestro.

– Ĉu vi pensas tion? Ĉu Bibók estas fidinda homo?

– Mi konas ankaŭ liajn malbonajn aferojn kaj scias direkti lin.

– Ĉu tio estas iu krimo? – demandis Johano konsterniĝinte.

La vicprefekto volis plibeligi la aferon, ĉar li ne volis fari al si malbonon.

– Tio estas virina afero. La virino estas mia amiketo! Jes. Ili formas la okazaĵojn de la mondo.

Por la vicprefekto kelkaj aferoj ŝajnis strangaj. Tio ne estas stranga, ke Johano vizitas sian fraton kaj alvenas kun sinjoro Esze, la malnova soldatkamarado. Sed tio ŝajnas esti stranga, ke li alvenis ne de Toporc kaj li ne diris de kie li venis.

Ankaŭ tio estas stranga, ke ilin serĉis fremduloj, kun kiuj ili pritraktis ion. Sed ĉefe tio estis stranga, ke alitage Paŭlo proponis sendi rajdanton al Lőcse por Georgeto, ke eble Johano ĝojos por li. Sed lia frato ne lasis fari tion kaj diris kolere:

⁸¹ La nomoriginalo estas hungare skribite: Szügyi.

- Lasu la infanon en Lőcse en la lernejo.
- Kiam vi vidis lin lastfoje?
- Dum pasko.
- Ĉu mi ne voku lin ĉi tien?
- Ne. Mi ne volas, ke Tomaso Esze vidu lin.

La vicprefekto pensis, ke ili planas ion, sed finfine pensis, ke tio estas nur senkulpa amuzo kaj li nur ridetis. Certe ili havas nostalgion, ne forgesante la sukcesojn, kaj ili nun nur esperadas. Sed ili jam faras malbonon al neniu.

Sed la sagaca kolonelo Bibók simple estis scivola kaj volis ekscii la enhavon de la grandaj kestoj. Li aŭdis, ke estas en ĝi dota ekipaĵo de iu vidvino, sed tamen li suspektadis. Sed li pensis, ke ankaŭ aliaĵo enestas: belaj oraĵoj kaj arĝentaĵoj, brelokoj, pladoj, pokaloj. Se iu estas artisto, tiu povas ĝui tiujn aĵojn.

Vespere li zorgis, ke la slovakaj liveristoj ebriiĝu. Kiam li konvinkiĝis pri tio, ke ili estas ege ebriaj, li iris en la remizon sekrete. Poste lumante per meĉo li iun keston lerte malfermis per diversaj ŝlosiloj kaj iloj, kiujn dumtage li akiris kiel iu rompŝtelisto. Li levis la meĉon, lumis en la keston rigardante la enhavon de la kesto sen singardo. Sed subite li teruriĝis pro la vidaĵo. Nome la enhavo de la kesto estis pulvo. Ĝi estis plenplenigita de pulvo.

Bibók nun jam komencis ekscii, kiu estas tiu vidvino, por kiu dotan ekipaĵon portas ambaŭ kurucoj. Sed li ne sciis, al kiu ligis ŝin la sorto. Sed nun jam ankaŭ tion li volis ekscii.

Denove li fermis la keston, hejmeniris, enlitiĝis. Matene li estis tre bonhumora. Sinjorino Bibók lavis la vestaĵojn kaj tiujn metis sur la sekigo-ŝnuregon kaj arbustojn. La kolonelo iris al ŝi kaj pikadis ŝian ŝultron.

- Kiel vi dormis, panjeto?

La sinjorino ruĝiĝis.

- Ne saĝumu! Oni povas ekvidi.
- Tio ne estas problemo, panjeto.
- Vi ne diris, ke vi hejmenvenis. - Ŝi riproĉis lin.
- Mi estis tre laca.

- Vi estas ĉiam laca. Ĉu oni hakigas arbon en la korto de la kastelo?

- Nun vere mi havis gravan taskon, panjeto. Mi petas vin paki en iun tukon iun eluzitan vestaĵon, kiun mi reportos vespere. Demandu nenion. Iu mantelo estus la plej bona, kiun mi povos meti sur la ŝultrojn.

- Vi planas ian aventuron.
- Ne diru, ne estu ridinda.
- Ĵuru je tio, ke vi ne volas amindumi al ia edzino!
- Tia ne bezonatas por mi, al mi sufiĉas duono de tiu, kiu...
- Ĉit! Mi batas sur vian buŝon.

La junedzino kuris al la dometo kaj portis pakaĵon, kiun la kolonelo kunportis al la kastelo. Sur la korto li kaŝis tiun sub siringarbuston. Poste li ekzercigis la soldatojn sur la korto kaj vokis la gastojn por fari la paradon.

La parado plaĉis al la gastoj, ĉefe al Tomaso. Ili laŭdis la militekzercadon. Bibók fanfaronadis, sed pro la multe da laŭdadoj subite li iĝis modesta.

– Ili devas ekzerci la militmanovrojn.

– Ili estas veraj soldatoj. Ili ne bezonas ion alian, nur la benon de Dio – diris Tomaso – kaj multe da germanoj, kiujn ili povas glavfalĉi. Kaj tio povas okazi baldaŭ.

Ambaŭ gastoj komplace ridis sekrete.

Efike de tio oni paradis heroeske. Antaŭ tagmezo la gastoj devis rigardi batalojn de la soldataro per glavoj, li farigis kelkajn luktojn po paroj. Ankaŭ luktis unu kontraŭ alia, kies lerteco estis vera vidaĵo. Uzado de la armiloj estas simpla metio, sed kelkfoje okazis, ke la batalanton trafis glavo de la malamiko, sed ĉe la lukto estis avantaĝaj la muskolo kaj lerteco.

Tomaso Esze estis ekscitita, ĉar la soldatoj batalis tre bele. Li diris konstante la laŭdantajn esprimojn, dum premiis per aplaŭdo la luktantajn soldatojn.

– Tio estis pompa, premu tiun. Ne lasu vin, prenu lin alie. Vi estas heroa.

Kiam la parado finiĝis, Tomaso demandis sinjoron Bibók:

– Kiu fraŭlo luktas plej lerte?

Bibók montris iun dikan fraŭlon, Paŭlĉjon Ŝoltes,⁸² devenante el Farkaŝfalva.

– Tiu variolmarka fraŭlo estas la plej lerta.

– Nu, venu ĉi tien, kara mia fileto!

Paŭlĉjo Ŝoltes paŝis pli proksimen al Tomaso. Li kredis, ke li ricevos taleron, aŭ oran moneron de la maljuna Tomaso. Sed Tomaso ne serĉis ormonerojn en la poŝo, sed li komencis demeti la dolmanon.

La du fratoj Görgey samtempe forte alkriis Tomason:

– Kion vi volas fari, Tomaso? Ĉu vi freneziĝis?

– Ne saĝumu! Mi devas lukti kontraŭ la plej lerta batalanto.

Poste li transdonis la dolmanon al Preston kaj diris al la fraŭlo:

– Venu por lukti unu kontraŭ alia. Ne indulgu min, sed mian lipharon ne trafu. Se vi ĵetos min surteren, vi ricevos unu barelon da vino.

La fraŭlo ekrigardis la maljunulon. Kaj la fraŭlo, Paŭlĉjo metis sian manon al kokco moke, kio signifis, ke eĉ per unu mano li ĵetos surteren la maljunulon. Kaj li per unu mano ekkaptis la ŝultron de Tomaso por ĵeti lin surteren. La maljunulo ridetis, Paŭlĉjo konvinkiĝis, ke ĉi tiel li ne atingas la celon. La maljunulo ne moviĝis, nur elstreĉis sian bruston. Paŭlĉjo ĉirkaŭprenis la talion de la maljunulo.

⁸² La nomoriginalo estas Soltész.

Poste sinjoro Esze premis forte la ŝultrojn de la fraŭlo, kio kaŭzis akran doloron. Efike de tio Paŭlĉjo plu ne premis Tomason.

Poste jam sinjoro Esze komencis ataki, en unu momento li ĉirkaŭprenis la talion de Paŭlĉjo kaj kiel serpento ĉirkaŭprenis la korpon de la fraŭlo. Ĉi tiel ili moviĝis unu ĉirkaŭ la alia. La luktantoj movis unu la alian sencele. La spektantoj ne kuraĝis spiradi. Sinjorino Marják kuris nerve el la kuirejo:

– Sankta Dio, la maljunulon frapos apopleksio. La fraŭlon mi ne bedaŭras, ja tiu impertinente kuraĝas lukti kontraŭ la Moŝta sinjoro.

Vera estas tio, ke ambaŭ estis ruĝaj kiel ruĝa rozo.

Je tio Paŭlo Görgey interkriis:

– Sufiĉe. Ripozu iomete.

La fraŭlo delasis la maljunulon kaj alparolis lin anhelante kiel laca viransero:

– Ĉu la korpo de sinjoro Esze estas el fero?

La fraŭlo diris tion hontante, pro tio Esze kompatis lin estante tre bonanima.

– Kara mia fileto, ne ĉiam tiu estas la heroo, kiu batas, sed tiu estas brava, kiu toleras la baton. Nu, ni faru pacon, ĉar mia korpo ne estas el fero, nome mi iĝis tre laca. Vi tre forte ekpremadis min. Sed mi tiel taksas, ke vi ĵetis min surteren. Mi donas al vi la barelon da vino. – (Li turnis sin al la vicprefekto.) – Kiom kostas ĉe vi unu barelo da vino?

– Mi ne vendas vinon – respondis la vicprefekto. – Sed ĉar en Görgő la gasto ordonas, mi donas la vinon.

Sekve de tio la bienvokto ricevis ordonon porti el la kelo unu barelon da vino por la soldatoj. Iĝis granda amuzfesteno. Sed Bibók tion ne partoprenis dirante, ke doloras lia kapo. Sed la vera kaŭzo de lia foresto estis, ke dum la gastoj tagmanĝis, du senbienaj malriĉaj nobeloj alvenis: Stefano Piri el Kolcsó (kolĉo) kaj la aventura Johano Liskai el Loŝonc. Johano Liskai kunvivis en Dolyan⁸³ kun iu maljunulino en ne laŭleĝa kunvivo. (Li estis tiu kaduka fripono, kiu revivigis baronon Steĉjon Károlyi⁸⁴, la mortinton. Sed tio estas jam alia historio, kiun post tiu ĉi historio mi rakontos.)

Poste Bibók surmetis la eluzitajn vestaĵojn, kiujn li kaŝis sub la siringarbusto. Li ŝtelis sin al la koridoro de la kastelo, kie estis la gastoĉambroj. Tie li kaŝis sin en la fulgan fornotruon. Nome tie ĉi estis unu apud alia du ĉambroj de la gastoj. La ĉambrojn hejtis unu forno. Li faris sur du flankoj de la forno truojn, per cizilo forigante du kahelojn por aŭdi la paroladojn de la gastoj. Li estis scivola, pri kio la gastoj paroladas kun la du senbienaj malriĉaj nobeloj. En la fornotruo li ricevis sufiĉe da aero, la situacio estis tolerebla, kvankam ĝi ne estis komforta, ĉar en la forno ne estis hejtado kaj en ĝi restadis unu hundino kun siaj idoj. La idoj estis

⁸³ La familia nomo Dolyan elparolendas: dojan.

⁸⁴ La familia nomo Károlyi elparolendas karoji.

ankoraŭ blindaj, kaj ili eble povus pensi, ke Bibók estas ilia panjo, sed se la vera hundino povus veni, tiu tiel murmurus se ŝi vidus lin, ke, oni tuj divenus lian deziron por spionadi. Do, la situacio ne estis sendanĝera. Sed li riskis tion, ke jene li eksciis ian valoran sekreton. Li devis atendi longtempon pro la longa tagmanĝo de sinjorino Marják.

Sed finfine la sinjoroj alvenis. Li malpeziĝis kaj mallaŭte remetis la kahelojn, tiel, ke nur etaj ne rimarkeblaj truoj restis. La gastoj kaj iu senbiena nobelo iris en la ĉambron, la alia promenis sur la koridoro. En la ĉambro ili paroladis mallaŭte, en la fornotruo apenaŭ aŭdiĝis la parolado. Bibók ĉagreniĝis kaj estus volonte foririnta, sed tiu nobelo staris sur la koridoro. Sed subite Tomaso Esze komencis paroli pli laŭte:

– Mi, Stefano Piri...

Tiel ŝajnis, ke Tomaso antaŭlegis iun tekston.

Iu malalta voĉo postdiris la tekston:

– Mi, Stefano Piri ĵuras je la vivanta Dio, ke mi rekonas kiel mastron Franciskon Rákóczi de la vilaĝo Felsővadász⁸⁵ kaj liajn ordonojn mi plenumos. Lian standardon, kiun li levis por la hungara patrujo, mi neniam forlasos kaj ne obeos al allogoj de la germanoj kaj la diablo. Tiel min helpu Dio!

Nun jam sinjoro Bibók ĉion sciis, kion li volis. La gastoj dum frua vespero preparis sin foriri, spite de la instigoj por resti. Li tre ĝojis pro la aŭditaĵoj kaj volis diri tiujn al ĉiuj. Li iris al la ĝardeno por renkonti neniun. Li kiel frenezulo kuradis tien kaj reen. Estis feliĉo, ke li ne vidis sinjoron Apro, aŭ iun serviston, ĉar li estus dirinta al ili la aŭditaĵojn. Iom post iom li trankviliĝis kaj la sekreton diris al neniuj. Pro tio li silentis. Tiu sekreto estas valora dum li diras al neniuj. Do, mi diras al neniuj. Sed ankaŭ tiam oni ekscios tion. Nome la pulvon oni portas ne por papavaj nudeloj. Tio estas komprenebla, ke mi devas diri la sekreton al aliaj.

Nu, jes – Bibók pensadis plu – mi devas diri ĉi tion al iu. Al kiu? Ĉar mi vane diras al mia patro. Tio estas superflua. Ankaŭ la edzino ne komprenus tion. Estus bone rakonti al la malproksime estanta imperiestro. Tiu donus kiel premion unu sakon da ormoneroj, ankaŭ unu fortikaĵon kaj generalan rangon.

Li iĝis tre ekscitita kaj ĝis vespero cerbumadis en si. Dum la enlitiĝo de la vicprefekto Bibók ŝanĝis la gardistojn kaj anoncis al la mastro, ke la pordegoj de la kastelo de Görgő estas fermitaj. En Görgő estis silento, ankaŭ la suspektaj aĵoj ĉesis. Ankaŭ la gardistoj, kiuj iradis en la setlejo, ne rimarkis suspektajn aĵojn. „Se estis suspektaj aĵoj, tiuj jam ĉesis.” Bibók diris hazarde ĉi frazon. Pro tio la vicprefekto konsterniĝe rigardis lin.

– Kion vi parolaĉas? – la vicprefekto demandis kurte.

⁸⁵ Pri la vilaĝo Felsővadász: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Felsővadász> – pri la kastelo Rákóczi: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Kastelo_Rákóczi_\(Felsővadász\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Kastelo_Rákóczi_(Felsővadász))

Bibók konfuziĝis. Unue li volis halanĝi ... sed tamen eldiris la sekreton:

- Ĉu vi scias, kion kunportis viaj kunuloj en la grandegaj kestoj?
- Ian dotaĵon de iu junedzino.
- Povas esti, sed tiu edzino jam havas edzon.
- Ĉu vi konas ŝin?
- Mi jam multfoje seksumis kun ŝi.
- Bibók, ne estu impertinenta!
- Ankaŭ tion mi povas diri, ke kaj mi kaj vi atingos ŝian sinon...
- Ej, Bibók, vi estas ege ebria - ridetis la vicprefekto. - Mi sciis, ke mi donis multe da vinoj. - Ĉu tiu edzino estas bela?
- Tiu plaĉas al ni. Tiu estas la bela granda Hungarujo.
- Vi ja ne volas diri tion...
- Sed jes, ja ili kunportis dotaĵon de Hungarujo. Mi rigardis tion en la kestoj. En la kestoj estis pulvo kaj pafiloj.

La vicprefekto, kiu detiris siajn botojn ekteruriĝis kaj foriris al la transa angulo de la ĉambro.

- Tio ne eblas! - li kriis. - Al kiu ili portis tiujn?
- Al Francisko Rákóczi, filo de la grandsinjorino Thököly.
- Ne diru! De kie vi scias tion?
- Mi aŭdis tion, kiam la sinjoroj ĵurigis la regionajn homojn, kiuj vizitis ilin. Paŭlo Görgey eksaltis furioze, la sango fluis en lian vizaĝon.
- Ĉu ili ĵurigis? Ĉu ĉi tie ĉe mi? Kial vi ne rakontis pri tio tuj al mi?
- Ĉar mi ne estas spiono. Pli frue mi ne faris denuncon, sed nun jam mi malkovris la sekreton.

- Nu, vi faris grandan frenezaĵon - diris la vicprefekto iomete pli milde, - sed povas esti, ke vi pravas, sed nun jam ne estas ripozo, nenifarado, sed ĉiuj homoj enseliĝu kaj devas postatingi ilin. Ankoraŭ ili ne povas esti tro malproksime.

Sed Bibók estis senkonsila.

- Ho, diable! Miaj fraŭloj en la setlejo estas dise, ja hodiaŭ estas sabato.

(La popolo de Görgő defendas la bonan virton de la fraŭlinoj ĉar nur sabate eblas vizitadi la domojn de la fraŭlinoj. Sed tiam la fraŭloj ĝis mateniĝo povis resti ĉe la fraŭlinoj. Fraŭlo kaj fraŭlino povis sidi unu apud alia sur la rando de la lito flustradante amvortojn per malrapida flustrado, kiuj estis tre granda delogaĵo apud la milda muziko de la ronkado de la gemaljunuloj enuantaj pro la silento.)

- Vi devas blovigi la klarionon, aŭ sonorigi en la turo.

Sufiĉis la klarionado. Oni ne devis longtempe klarionadi. La plej dormemaj hundoj vekiĝis abrupte, kiuj komencis boji kaj la gefraŭloj atentis la sonon de la klariono kaj aŭdis la tekston de la gardisto de la turo:

„Vekiĝu soldato
surmetu dolmanon,

ligu vian glavon
ligu karabenon,
portu trink-botelon
sekvu kapitanon
en ĉiun militon.”

Bibók bone disciplinis siajn soldatojn. Paŭlo Görgey vestis sin malfacile, li iris al la teraso por konvinkiĝi pri la ordo. Li spertis kontente, ke la soldatoj kolektiĝas. Kiel unuaj la du junaj Bibók alvenis. La vicprefekto laŭdis ilin. Gregorio Holub jam de malproksimo kriegis: „Mi estas ĉi tie, sinjoro kolonelo.”

Ĉiuj solduloj estis en la korto, escepte de Joĉjo Hantoŝ, kiu kuŝis ebria sub la garbejo sur iu pelto.

– Enseliĝu, enseliĝu! – ordonis Bibók.

La lumoj de la lanternoj aperis ĉirkaŭ la ĉevaloj. Oni venigis la stalonon de Bibók, kies nomo estis Gúnár⁸⁶. Sed li rememoris, ke ili ja ne konas la ordonon de la mastro.

– Ja mi ne konas vian ordonon.

– Ĉu mi ne diris tion? – miris Paŭlo Görgey. – Ankaŭ mi estas konfuzita, ĉar la afero estas tre grava. Estu singarda kaj diskreta. Se vi postatingas sinjoron Esze kaj liajn kunulojn, tiam iru nur ĝis la vojkruciĝo. Se ili iras en du direktoj, tiam diru mian ordonon al viaj soldatoj, kion ili faru. Kunportu mian virĉevalon, nomata Kuvik⁸⁷. Ekkaptu mian pli aĝan fraton kaj reportu, sed nur indulge. Sed ne batu lin. Sidigu lin sur la ĉevalon nomata „Kuvik” kaj venu hejmen.

– Kion ni faru pri sinjoro Esze kaj la ŝargĉaro? – demandis Bibók.

– Nenion. Ili iru plu kaj havu helpon de Dio. Ili ne interesas min. Ĉu vi komprenas min?

– Jes. Mi komprenas ĉion – respondis Bibók, sed tiel ŝajnis, ke li tute ne komprenas la ordonon.

Ne plaĉis al li, ke li ne povas agi tute memstare.

– Laŭvorte vi ne volas tute interveni la aferojn.

– Jes. Vi pravas.

– Sed ja la ordono ne estas bone pripensita. Nome Johano Görgey ne obeos al mia ordono lasi kunligi la manojn kaj veni kun mi hejmen. Vivanta – mortinta ni ekkaptas lin, sed vivanta ankaŭ la muson estas malfacile ekkapti. Tio estas malfacila ankaŭ por la kato. Kaj Johano Görgey havas kaj glavon kaj karabenon. Se li atakas min, mi ne lasas min. Bonvolu skribi la ordonon por ke legu tion ankaŭ li.

– Vi pravas – diris la vicprefekto kaj skribis la aresto-ordonon.

⁸⁶ La ĉevalnomo estas Gúnár, elparolendas gunar, la nomsignifo: viransero.

⁸⁷ Same ĉevalnomo estas la nomo: Kuvik, nomsignifo: strigo, noktuo.

Dum Paŭlo Görgey portis la skribaĵon, la soldatoj jam sidis sur ĉevaloj. Li vokis sinjoron Bibók:

– Ĉi tie estas la skribaĵo, kolonelo. Estu saĝa kaj diskreta. Nur ni ambaŭ konas tiun sekreton kaj parolu pri tio al neniu.

Poste li donis al Bibók sakon da taleroj, dirante:

– Ankaŭ mono necesas al la militado.

La luno jam aperis ĉe la monteto malantaŭ la sekigejo de maizo de la familio Valai, pli malproksime iu botaŭro ĝenis la silenton. Granda pordego farita el kverkoligno grincante malfermiĝis kaj la rajdantoj forgalopis.

Paŭlo Görgey trankvile aliris sian dormoĉambron kaj komencis senvestiĝi. Sed subite la pordego de la kastelo denove malfermiĝis kaj li aŭdis ĉevalhufbruojn.

– Preston, iru eksteren kaj rigardu, kio okazis.

Preston longe ne revenis kaj pro tio Paŭlo ĉagreniĝis kaj volis sendi post tiu gardiston, sed dume li tamen alvenis.

– Vi estas malrapida kiel heliko – diris la vicprefekto kolere. – Kio okazis?

– Stafeto alvenis el Osgyán.

Paŭlo Görgey iĝis ekscitita.

– Kion tiu volas?

– Tiu portis leteron – respondis Preston.

– Nu, donu al mi tiun – li diris nerve.

– Mi ne povis kunporti tiun, ĉar unue ĝin oni devas trafumi.

– Kie estas tiu homo?

– Ankaŭ tiun homon oni devas ĉirkaŭfumi.

– Ĉu vi ne povas rakonti ĉion samtempe? Kial oni devas fumi tiun homon?

– Ĉar, do ... tiu diras, ke en Osgyán la pesto infektas.

La vicprefekto teruriĝis. Li paliĝis.

– Kaj sinjorinon Darvaŝ jam forportis la pesto. Ripozu ŝi en paco.

Kvazaŭ per hakilego oni estus batinta la kapon de Paŭlo Görgey, li terenfalas kaj eklarmiĝis. Lia plorado daŭris nur kelkajn momentojn, dum li memoris la infanaĝajn travivaĵojn de Katarina. Ili kuradis post papilioj sur la kampoj. Ili havis azenidon, sur kiu sidis ambaŭ kaj kune kun sia eta fratino galopis. Li metis fajran tindron en la orelon de la azenido por iri pli rapide. Sekve de tio la azenido tre rapide galopis en la rivereton Durst kaj metis la orelon en la akvon por malvarmigi. Pro tio ambaŭ ili defaletis de la azenido. (Jen, la homoj estas malsaĝaj kredante, ke la azenoj estas malsaĝaj.) Katarina poste ploris pro la aventuro. Poste li sekigis la akvan kotan vestaĵon, jupon. Ŝi estis bela infano, kuŝante en malseka vestaĵo kaj ŝi kuŝas nun mortinte. Sed li subite iĝis maltrankvila, ĉar li rememoris Rozalian. Kio okazis pri ŝi?

– Portu tuj tiun leteron! – li stentoris.

Preston kuris, sed sinjorino Marják jam portis la leteron tenante de si malproksime kaj portis tiun tuj en la dormoĉambron de la vicprefekto.

– Estas bone, ke mi vidas vin ĉi tie – diris sinjorino Marják al Preston. – Iru al la kompetentuloj pri skribo kaj skribaĵlegado kaj veku iun el tiuj nenifarantoj por legi tiun ĉi leteron, ĉar la vicprefekto ne povas preni tiun en la manon.

– Kiun kompetentulon mi veku? Ĉu sinjoron Dravecki?

– Ne. Li estas riĉa fraŭlo, ne batu lin, ne mortu li pro la pesto. Prefere veku tiun mizeraĉan Paleĵnai. Sed atendu! Lia patrino priplorus lin. Plie bone veku Francisketon Bánó. Nome li diris hieraŭ ĉe tagmanĝo, ke mi ne kapablas baki tavolokukojn. Ĉu li jam kapablas legi?

Sed ĉiuj ĉi estis superfluj aferoj, ĉar dume ŝi malfermis la pordon de la ĉambro de la vicprefekto kaj per la oblatobaka fero enŝovis la leteron.

Paŭlo Görgey kaptis tiun kaj legis la leteron spite de protesto de sinjorino Marják:

– „Kara bofrato! Kiam mi skribas ĉi tiun leteron mian malfeliĉan Katarinon jam vokis al si laŭ sia volo la sankta Dio pro la terura malsano, la pesto. Ankaŭ mi sentas jam la alvenon de la pesto, jam aŭdas hufbruon de la ĉevalo de Sankta Miĥelo. Mi ordonis, ke oni entombigu min apud mian amatan Katarinan. Same mi sendis testamenton al la kanonikaro de la urbo Roĵnjo⁸⁸, en kiu temas pri Rozalio. Bone estus, se ni kune festus ŝian geedziĝfeston. La peston portis iu glavon akriĝanta majstro, kiu irante al Krasnohorka noktumis en Osgyán kaj tie mortis. Tion ĉi aŭdante ni sendis Rozalian al la edzino de Johano Varga, arbargardisto, kiu estis iu ŝia vartistineto, nomita Suzaneta Marják. Ŝi tre amas Rozalian kaj tre kroĉiĝas al ŝi. Li loĝas en arbaro de la urbo Sabadka, kaŝite inter la arboj, kie la aero estas pura, kio estas granda feliĉo nuntempe. La arbaron havas ia turka paŝao, kiu restis en Hungarujo kaj vivas feliĉe kun siaj multaj edzinoj. Paŭlo, ne koleru min pro mia cinismo, ne enviante la feliĉojn de aliaj homoj. Mi havas ĉiam pli malmulte da sopiroj kaj malĝojoj, ja post ne longe mi atingos mian Dion. Mi ne malbenadas, ne ĉagreniĝadas, ĉar mi scias, ke mi renkontiĝos kun Katarinjo. Venu por via filino. Vi trovos ŝin ĉe sinjoro Varga, kiu estas tre honesta, kristana homo, kvankam ĉe turka ĉefsinjoro li laboras. Al Osgyán ne venu, ĉar estas danĝere esti tie. Ĉar vi ne atingos mian entombigon, ja tio okazos ege rapide sen predikoj. Sed mi scias, ke Danielo Pohanka la pastro diros belan predikon.

Li iĝis pastro predikanta el bienservanta infano kaj mi edukigis lin en eksterlandaj akademioj. Povas esti, ke Dio rekonos mian agon, sed dum mia vivo mi ne havis ĝian utilon. Vi povas lasi Rozalian ĉe Varga, ĉar tie ŝi estas en bona loko, sed ĉe vi certe ne. Antaŭ ne longe mi ricevis leteron de Johano Görgey, en

⁸⁸ La loknom-originalo hungarlingve estas Rozsnyó.

kiu li instigas min armi min sekrete kaj aliĝi al li. Nome princo Francisko Rákóczi la dua marŝas al Hungarujo kaj li atendis ilin apud Lawocsne (lavoĉne) ĉe la pola landlimo. Mi ne respondis al Johano Görgey, ĉar mi estis survoje. Sed se vi renkontiĝus kun li, tiam diru al li, ke ili agu pli saĝe, ol mi. Nome mi jam ne povas iri tien, ĉar min atendas Dio kaj lia armeo por ripozi eterne.

Memoru min, mia kara bofrato. Mi ne scias ĉu mi povos rememori vin.

9. junio 1703. Osgyán
Darvaŝ.

En mia kelo estas 234 bareloj da vino, kiu estas tre bongusta ruĝa vino, devenante el mia vitejo en Otrokoĉ. Inter la bareloj estas 20 bareloj da Gönc, la plej multaj estas portablaj blankaj vinoj. Tri bareletojn ne vendu. Tiujn Katarina signis per kredo: „Gardu ĝin.” En tiuj estas la vinspecio; asuo de Tokaj el la fama 1663-a jaro, kiam la varma somero daŭris ĝis la tago de „Ĉiuj Sanktuloj” (ĝis komenco de novembro). Sed el tiuj bareloj mi jam ne trinkos vinon. Ameno.”

Paŭlo Görgey finlegis la leteron. Lia animo fortiĝis, tamen malgaje li pensis, ke lia bofrato, Darvaŝ amikiĝas kun la morto. Ĉi tiel nur hungara homo kapablas morti. Li tuj volis ekiri nokte, sed pensis pri Johano Görgey. Kio okazos pri li, se la solduloj kunportos lin kiel kaptiton. Johanon li povas konfidi al neniuj, ĉar li forfuĝos. Li kunportos Johanon. Almenaŭ ĉi tiun solan fraton li savos.

Ĉi tiel decidinte li atendis la matenon pipfumante kaj ne enlitiĝis. La okazintaĵoj akriĝis lian menson, li estis konscia, kiel la birdo dum fulmadoj. Li volis atendi Johanon kaj kun li unue iri al la arbaro de Szabadka por sia filineto kaj kunporti sinjorinon Marják. Kien li loku la filineton? En la arbaro li ne povas lasi ŝin (tio estas malsaĝa penso de la bofrato). Ja ŝi estas 14-jaraĝa kaj svatebla fraŭlino. Dum la sekvaj du jaroj oni devas eduki ŝin esti damo. Aŭ nun, aŭ neniam. Li ne povas porti ŝin al Toporc. Tion li tute ne volis fari. Cetere en Toporc ne estus sekuro, ja tiun la imperiestranoj detruos. Eĉ ne al Görgő li volis porti ŝin. Kion li faru pri ŝi? Li havis iun aŭdacan planon, laŭ kiu li povus porti ŝin en iun izolitan urbon, kiel la persekutata reĝidino Klodwig⁸⁹ luis loĝejon en la domo de la ekzekutisto de Londono, kie neniuj serĉis. Pro tio ĉi li pensis, ke li kunportos sian filineton al Lőcse, kie lin oni mortigus, sed ne estus suspektata resti tie. Tiu ago estas simpla kiel la ovo de Kolombo, li nur devis diveni. Tie oni ne trovos la filineton, ĉar tie estas la edukejo de Matildaa Klöster, kie la adoleskantineteto estos kortega damo.

Nur la detalojn li ne konis. Nome la sekretoj ne povas esti evidentaj. Li devas aranĝi la aferon, ke la sekreto ne estu malkovrita. Pro tio li decidis tiel, ĉar sinjorinon Marják ili ne kunportos, nek Matilda Klöster povas scii, nek aliuloj, ke ŝi edukos la filinon de Paŭlo Görgey.

⁸⁹ La nomo de la reĝidino Klodwig, elparolendas klodvig.

Li tiel pensadante spertis la alvenon de la mateno. La suno jam aperis sur la firmamento. Bibók kaj liaj solduloj ankoraŭ ne alvenis hejmen. Paŭlo Görgey iĝis nerva. Post la matenmanĝo li iris en la gardoturon por vidi la ĉirkaŭaĵon. Nenie estis videbla armeo, aŭ polvonubo. Kien ili iris? Tio estis netolerebla. Finfine tagmeze sur anhelanta ĉevalo Paŭlĉjo Ŝoltes alvenis. Paŭlo Görgey iris antaŭ lin.

– Kie estas la aliaj?

Ŝoltes ne respondis. Li nur demetis la ĉapon kaj deviŝis la frunton de la ŝvito.

– Ĉu ili venas? – demandis denove la vicprefekto*⁹⁰.

– Ili restis tie. Esze kaj via pli maljuna frato, kiun ni volis ekkapti, parolis bele al ni kaj efike de tio ili restis tie, ĉar ili faris ĵuron kaj iris al Rákóczi.

La vicprefekto klinis sin, nenion diris, li nur murmuradis inter la dentoj: „Estu laŭ la volo de Dio!” (Sed laŭ sinjorino Marják liaj dentoj grincadis.)

– Ĉu ankaŭ Bibók?

– Ĉu li ne estas ĉi-hejme? – miris Ŝoltes – en la vilaĝo Stojance li dividis duonen la taĉmenton, dirante, ke en la valo de la rivero Dolhica ni renkontiĝos. La juna Bibók estis la estro. Tie ni renkontiĝis tagiĝe, sed la pli maljuna Bibók, oni diras, reiris al Görgő dirante, ke li malbone fartas.

La vicprefekto furiozis, sed tamen li milde respondis anstataŭ blasfemo:

– Ĉi tie estas strangaj aferoj! Sed bone estas, ke vi revenis.

Sed Ŝoltes skuis la kapon.

– Do, mi anoncas respektplene, ke ankaŭ mi ne restas ĉi tie. (Por la vicprefekto estis suspekta, ke la fraŭlo ne deĉevaliĝis.) Nome mi portis nur la mesaĝon de la sinjoroj. Via pli aĝa frato diris al ni: „Nu, fraŭloj, kiu volas anonci al mia pli juna frato la kaŭzon de nia restado ĉi tie? Kiu havas kuraĝon fari tion ĉi?” Mi havas kuraĝon – mi diris al ili. Kaj mi rajdis ĉi tien por diri la mesaĝon kaj por transdoni salutojn de Tomaso Esze kaj Johano Görgey. La sinjoroj tre hontas, ĉar la ĉevalojn ili ne sendas reen, nome la homoj ne volas piediri, dirante, ke nur hundo piediras, kurucoj ne. La sinjoroj tion mesaĝas, ke vi estu tolerema, pacienca, ili pagos la kostojn de la ĉevaloj.

Finante la eldiron de la mesaĝo, Ŝoltes spronis sian ĉevalon kaj forgalopis el la korto de la kastelo.

Paŭlo Görgey mute gapis post la forgalopanto ĝis kovris lin polvo de la vojo. Prefere li miregis pri la okazintaĵoj sed ne koleris. Li trankviliĝis kaj akceptis la fakton, ja ankaŭ li havis hungaran koron. Li rekonis la situacion. Tio estas bona, ke oni forportis liajn soldatojn, ja estas utile por lia afero. Ankaŭ tio estas utila, ke sen lia volo oni forportis la soldatojn, ĉar la imperiestro havos bonan opinion

⁹⁰ Prefekto estas altranga ŝtata funkciulo la plej ofte etnobelo, kiu gvidas la administracion de iu teritorio. Tiu administras parton de iu regno aŭ plenumas alian simile gravan taskon ĉe la prefektujo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Prefekto>

pri li. Kaj krome li tre ĝojis pro tio, ke Francisko Rákóczi la dua havos bonan opinion pri li.

SinJORINO MarjÁk – poste li diris – metu iun manĝaĵon en la pansakon, ĉar mi iros al entombigo. Ĝis oni antaŭpreparas la kaleŝon por ekiri, vi sendu iun al la familio-Bibók por informiĝi. Li estas scivola: ĉu la kolonelo estas hejme, aŭ li denove planas iun ĥaosajn?...

– Tiu ne venis hejmen – diris sinJORINO MarjÁk. – Lia edzino estis nun ĉi tie por informpeti pri li. Oni diris al ŝi: „Ej, al kiu li mankas? „Efike de tio ŝi iĝis ruĝa kiel kuirita kankro. Nu, ja, mi tiel pensas, ke estus bone, se lia kapo ruĝiĝus kaj kuirigĝus en kaldrono de la diabloj.

– Kial vi koleras lin?

– Mi tre koleras lin, ĉar li forportis la soldulojn. Tiuj nenifaris tie ĉi, nur manĝis sen laboro. – - La armeo nun estus bezonata por akompani vian kaleŝon.

– Tio ne estas bezonata.

– Sed povas esti, ke rabistoj, aŭ la Lőcse-anoj atakos vin.

– Ni ĉiuj estas sub la regado de la Dio.

– Vi pravas, sed multe da homoj estas sub la regado de Dio kaj bone estus, se vin akompanus kelkaj ĉi tie estantaj rajdantoj.

Sed Paŭlo Görgey ne obeis al sinJORINO MarjÁk. Li ekiris kun Preston portante nur ĉemizon kiel la kamparanoj, sidante nur sur simpla ĉaro. La ĉaron tiris du tirĉevaloj. Neniu suspektadis, ke la grandpotenca vicprefekto pipfumas en la ĉarkrado sur la pajlo.

La veturado ne estis enua, nur ege longa. Oni prirabis en ĉiuj jaroj Hungarujon, sed en ĉiuj jaroj ĝi renoviĝas. En majo oni ĉion denove reproduktas kion la germanoj forportis. En la valoj la kampo ankaŭ nun estis bela, la herbo estas densa, sur la herbaro blankaj dikaj ŝafoj paŝtiĝis. Por pluen iranto videblas parceloj de aveno, fagopiro kaj trifolio, poste parceloj de sekalo kaj papavo. Ĉe alveno al Gömör videblis parceloj de tritiko. La vojo serpentumas inter interesaj formaj rokoj, tra arbaroj kaj en valoj. Videblas plaŭdantaj riveretoj kaj malnovaj fortikaĵoj rigardas mute la veturanton. Ĉirkaŭ tiuj cirkuladas malnovaj legendoj. Kelkloke videblas ruiniĝantaj moskeoj, kiuj anoncas, ke la fremdan Dion oni sukcesis forpeli, sed ĝiajn domojn oni ne detruis. Kontraŭ tiuj estas la kristanaj temploj, sur kies turoj pli fue estis koko, sed nun estas sur tiuj krucoj. Tio estas signo de tio, ke Dion de la kristanoj oni gloras, sed konstante disputas por posedi la templojn. La templojn posedas la katolikoj aŭ la kalvinanaj kaj ili kredas, ke ili estas servistoj de la Dio.

Dumvoje estis ankaŭ drinkejoj por manĝigi la ĉevalojn kaj manĝigi homojn, aŭ drinki ion kaj ripozi. La drinkejmastro kaj la gastoj multon rakontis pri aferoj de la mondo, kvazaŭ la veturanto legus ĵurnalon pri la ĉiutagaj okazintaĵoj.

La aero estis sufoka, pleniĝinte de maltrankvilo. La homoj estis senpaciencaj, kvazaŭ ili atendus iun, aŭ ion...

Nu, ja, la piedoj de liaj ĉevaloj frapas ĉe montpasejo de Verecka!⁹¹

Tutnokte kaj sekvatage posttagmeze paŝadis ambaŭ ĉevaletoj. Finfine la ĉaro atingis la belan valon Hont-departementan kaj malfermiĝis la urbo Batyi (batji) estanta tuj apud la rivero Rima en la valo. (Iam ĝi estis nomita Iŝtvánfalva, kiu estis fama pri sia mola pano.) Ĝi havis du templojn, sur la turoj ŝtalkokoj brilis en la malfru-posttagmeza sunbrilo.

Pli malfrue Iŝtvánfalva iĝis Rimasombat. Tie estis iu fortikaĵo, kaj tial tie oni devis fondi urbon, ja la loĝantoj pretendis multon. Ĉefe la posedanto de la fortikaĵo estis grandpotenca, riĉa, la familio Rákóczi. Pro tio la metiistoj venis tien, ja la posedanto vivis lukse. Tiutempe la sinjoran pompon ne la nombro de la staloj determinis, sed la nombro de la fonditaj urboj. Ĉi tiel estiĝis la setlejoj Homonna laŭ la familio Homonnay, Kiŝmarton, Pápa aŭ Tataóváros (tataovaroŝ) laŭ la familio Eszterházy⁹², Nagykároly⁹³ laŭ la familio Károlyi ktp.

Sed Rimaszombat⁹⁴ havis pli grandan feliĉon, ol la aliaj urboj. Nome Szabadka,⁹⁵ Rimaszombat estis posedaĵoj de la familio Rákóczi. Ili estis moviĝemaj kaj ne kapablis loĝi en unu loko.

Kvankam nuntempe tiu lasta aspektis pli granda vilaĝo, do ne granda setlejo ĉar ĝi konsistis el malaltaj domoj, kiuj havis du fenestrojn kaj estis kovritaj per kano, pajlo. Tamen en tiuj multe da metiistoj loĝis kiel ŝuistoj, botistoj, faristoj de ŝafpeltoj, faristoj de pipfumoj kaj ceteraj. Tiutempe tiu urbo ne estis rekonebla helpe de okuloj, ĉar ne estis firmoŝildoj kaj montrofenestroj. La urbo estis rekonebla nur helpe de la nazo.

Paŭlo Görgy traveturante la urbon, tuj rimarkis la tanaĵo-odoraĉon kaj sciis, ke tie loĝas la botisto laboranta per tanilo. Poste li flaris la odoron de la ajlo, kiu devenas de la kolbaso kaj galantino. Li sciis, ke ili veturas antaŭ la domo de la buĉisto. Sed tuj li preskaŭ svenis pro la terura odoraĉo, nome la ĉaro atingis la domon de la kandelfaristo. Kvazaŭ li estus plifaciliĝinta atinginte la domon de la ŝuisto, kie la metilernantoj gluis la ledon per farungluaĵo. Sur la tuta strato li sentis la diversajn odorojn kaj laŭ la odoroj ekkonis la metiojn de la urbo. Sur granda kvarangula vendoplaco oni vendas multe da ŝuoj kaj ĉerizoj. Paŭlo Görgy elĉariĝis por aĉeti ĉerizojn por Rozalia. Poste li rimarkis la mielkukan tendon. Li eniris en ĝin. Tie estis multe da donacaĵoj. La mielkuko farado estas la

⁹¹ Pri la Verecka-montpasejo bv. vidi la wikipedian artikolon:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Verecka_montpasejo

⁹² La familian nomon Eszterházy elparolu: esterhazi.

⁹³ La loknomo Nagykároly elparolendas nadjkaroj.

⁹⁴ La loknomo Rimaszombat elparolendas: rimasombat.

⁹⁵ La loknomo Szabadka elparolendas sabadka.

plej spirita metio. Tiun protektas la Dio de Amoro. Tiu vekas amon kaj ampetoladon. Tiu homo, kiu faras la mielkukon, tiu ne estas metiisto, sed poeto. Per la kukoj tiu vekas etoson, kiu ridetigas kaj ruĝigas la vizaĝojn. Tiu diras ideojn al la aĉetantoj, kiel oni petoladu ĉirkaŭ la hominoj. Ekzemple:

- Mielkukokoro estas ioma aludo al ekzerco de amoraj agoj.
- Mielkukorajdanto estas iomete da aŭguro.
- Mielkukosuĉinfano estas iomete da impertinento.
- Mielkukolulilo iomete similas al la impertinento.

Sed se la patro aĉetas tion, tiam la mielkukoj estas delikataĵoj, frandaĵoj. Do, Paŭlo Görgy aĉetis multe da mielkukoj kaj iris plu al Osgyán.

Trans la ponto de Sabadka staris kelkaj armitaj homoj havante ferforkegon kaj lancon. – Ho, haltu! – la homoj kriis ekstarante antaŭ la ĉevalojn.

- Kien vi volas iri?
- Al Osgyán – respondis Paŭlo Görgy sidante kaj pipfumante en la ĉarkrado. La respondo surprizis la armitan homon.
- Ĉu vi ne scias, ke en Osgyán la pesto infektas?
- Sed mi scias.
- Hm. Ĉu vi tamen volas iri tien? Al kiu vi volas iri?
- Darvaŝni. – respondis Paŭlo Görgy simple.

Apud la ponto estis iu drinkejo. Ĉe ties pordo staris iu malgrandkapa maljunulo, havante grizhararon kaj li demandis scivole:

- Kion vi diris? Kien?
- Al Darvaŝ – respondis la armita homo (laŭ lia parolo oni tuj povis scii, ke tiu devenas el Batyi (batji), kie oni uzas anstataŭ la: „al”, la finaĵon: „ni”). Poste tiu homo turnis sin al Paŭlo Görgy – se vi volas iri al Darvaŝ – li daŭrigis ridaĉante – vi devas iri sur alia vojo.
- Je kiu direkto?
- Je tiu direkto – kaj montris per fingro al la ĉielo.
- Vi ja ne volas diri – interparolis Paŭlo Görgy – ke ...
- Sed jes. Ili jam ne manĝas.
- Ĉu ankaŭ sinjoro Darvaŝ ne? – balbutis sinjoro Paŭlo Görgy paliĝante.
- Ambaŭ forpasis. Hieraŭ oni entombigis la edzinon, hodiaŭ la edzon. Sed estu trankvila, ĉar vi povu iri al ili ankaŭ ne tiam, se ili vivus. Nome ni estas komisiitaj, ke pro la pesto neniun ni lasu iri al Osgyán.

Doloro premis la koron de Paŭlo Görgy. Li nur gapis kaj la pipo elfalis de la buŝo.

– Iru reen – urĝis ilin la armita homo. Kial vi staras tie ĉi? La dekreto estas dekreto. Punkto.

Preston turnis sin kaj demande rigardis sian mastron.

– Ĉu mi turnu min?

Paŭlo Görgey surpriziĝis pro la demando.

– Ho, ne. Ni iru plu, Preston. Se ni ne povas iri al Osgyán, tiam ni iras al la arbaro de Sabadka, ĉar mi havas tie aferon. Lasu nin plu iri, bona homo!

– Tio ne povas esti! – obstinis la armita homo. – Mi ne povas permesi.

– Do, kiu vi estas? – demandis Paŭlo Görgey.

– Mi estas Klemento Piĵera, ĉefprovoso en la urba malliberejo. Sinjoro juĝisto komisiis min lasi neniun iri al Osgyán kaj de tie neniun veni. La peston oni devas izoli.

– Sed mi jam volas iri ne al Osgyán, sed en la arbaron de Sabadka al la arbaristo.

– Ankaŭ tion ĉiuj povas diri. Kiu vi estas?

Paŭlo Görgey hezitis respondi, ĉar li pensis ne malkaŝi sian inkogniton.

– Li estas vicprefekto de departemento de Sepeŝ – diris senvole Preston.

– Ho, tion jam ne ĉiuj povas diri, sed ĉiuj ne havas kredition. – kriis Klemento kaj suspekteme rigardis la malriĉan jungaĵon.

Poste Paŭlo Görgey elprenis el la poŝo unu taleron kaj metis ĝin en la manplaton de Piĵera.

– Nu mi kredas vin, ĉar mi vidas vin – daŭrigis Klemento soldatsalutante per la lanco – sed ne estus bone iri en la arbaron, aŭ plu. Ja mi lasus vin iri tien, ĉar kiu volas morti, tiu povas morti. Se vi volas iri nur al la arbaristo, tie ne estas mortodanĝero. Sed ĝuste tio ĉi estas la malbono ...

– Ĉu? – Paŭlo Görgey estis scivola.

– Nome kiu mortas tie, tiu restas tie kaj ne portas tien ĉi la peston. Sed kiu ne mortas tie, tiu ne povas veni al Batyi por ne porti al Batyi la malsanon. Eĉ la reĝon oni ne lasas veni al Batyi. Ĉu vi volas reveni, aŭ ne?

– Hm. Vi pravas. – respondis Paŭlo Görgey. – Sed povas esti, ke mi povus reveni.

Piĵera pensadis.

– Estas tamen iu eblo. – Diris la ĉefprovoso. – Se vere vi iras al sinjoro Varga.

– Ĉu? Mi vere iras tien. Tiel aspektas, ke vi konas sinjoron Varga.

– Jes, mi konas lin.

– Oni diras, ke li estas brava homo. – informiĝis Paŭlo Görgey.

– Jes. Li estas brava homo. En la „Tri sciuretoj” dum kugluludo hodiaŭ naŭ keglojn li surbatis, (Ĉi tio estis la nomo de la drinkejo de Szabadka.)

– Kio estas tiu eblo?

– Du ŝtataj oficialaj personoj akompanos vin al sinjoro Varga kaj ankaŭ reakompanos vin. Ili povas atesti, ke vi ne estis aliloke.

Ĉi tiu saĝa parolo plaĉis al Paŭlo Görgey kaj li pritraktis kun Piĵera.

– Bone estas – diris Paŭlo Görgey – do, ni povas trairi tamen.

– Iri tien estas pli facile, ol reveni. Nome hodiaŭ matene ni lasis trairi iun rajdanton, laŭ kiu li estas via homo kaj iris al Buda. Li tion diris, ke li ne revenos. Kiel li iris plu el Osgyán? Tio estas lia afero. Nome ankaŭ trans Osgyán estas komisiitaj soldatoj. Oni diris, ke tiu certe mortis pro la pesto.

– Ĉu vi diris, ke iu rajdanto iris ĉi tie?

– Jes, iu soldato.

– Ĉu li diris tion, ke li estas mia homo?

– Tion li diris, ke li estas homo de la Departamento de Sepeŝ, li portas informon al la palatino de Buda. Li volis murdi nin ĉiujn, se ni ne lasas lin plu iri. Li diris, ke la palatino bruldifektos la tutan urbon, se li ricevos la mesaĝon malfrue. Sinjoro Fürmender kontrolis lian dokumenton kaj lasis lin plu iri.

– Kiel li aspektis?

Piĵera karakterizis lian figuron, vestaĵon, ĉevalon. Ĉe la lasta estis iu lanterno sur ĝia frunto.

– Tiu ĉevalo estis „Gúnár” – ekkriis Preston.

– Tiu homo estis Bibók, la pendumindulo – murmuris Paŭlo Görgey, kiu jam sciis, ke Bibók portis la sekreton por eldiri en Buda al la palatino, ĉar Tomaso Esze kaj kunuloj diris, ke la palatino restadas en Buda.

Cetere la vicprefektoro pro la bagatelaĵoj iĝis ekscitita, sed la gravaj aferoj tute ne interesis lin kaj la domo estus forbrulinta.

– Nu, ĉefprovoso, diru al mi, ĉu mi povas ricevi du fidindajn homojn.

– Nur sinjoro juĝisto povas doni tiujn.

– Kiu estas nun la juĝisto?

– Sinjoro Danielo Katai.

– Ĉu sinjoro Danielo Katai? Ja mi konas lin. Li estas blonda, alta homo, iomete lametas.

– Sed li estas honesta homo.

– Ĉu li estis asizano en la Departamento Gömör?

– Jes.

– Ni renkontiĝis en la departementdomo antaŭ kvar jaroj.

– Tiukaze vi povus iri al li.

– Kie li loĝas?

– En la strato Rima.

– Mi ne dezirus returni min, nome mi estas superstiĉa. Ĉu mi povas skribi leteron al li?

– Tio estas solvebla – opiniis sinjoro Piĵera. – Sed pli bone estus iri per ĉaro al la drinkejo skribi la leteron kaj tiun iu portos ĉevaldorse.

Paŭlo Görgey elĉariĝis, dum Preston furaĝumis la ĉevalojn. En la drinkejo Paŭlo Görgey preparis sin por skribi la leteron. Sed unue li devis akiri paperon, kio estis malfacila afero. Nome sinjoro Kelence, la drinkejmajstro, kiu havante ventregon kaj estis nomata „Kvara sciuro”, nur el la Biblio povis elŝiri paperfolion kaj alian plenan folion. Sur la lastan oni skribis la nomojn de la naskiĝintaj infanoj, jarojn, tagojn de la naskiĝo kaj morto kaj la planedon, kie ili naskiĝis. Sed ĉar iu folio jam estis plenplene skribita kaj Kelence ne povis havi alian infanon, la alian malplenan folion donis al Paŭlo Görgey. Poste Kelence ordonis al la infanoj ekkapti anseron elŝiri plumon kaj tiun akriĝi. Ĉi tiu tasko tre plaĉis al la infanoj. La infanoj donis al Paŭlo Görgey la plej longan plumon kaj la sinjoro vicprefekto povis komenci skribi sen malhelpo la leteron, kiu estas la sekva:

„Sinjoro mia juĝisto!

Mi deziras, ke Dio donu al vi bonan vivon. Akceptu mian servadon kaj vivu longan tempon!

Mi, Paŭlo Görgey, vicprefekto de Sepeŝ, veturas pro iu afero al sinjoro Varga, arbaristo, sed mi ne povas iri al la arbaro de Szabadka pro iu nigra malsano. Sed ĉar la loĝejo de sinjoro Varga ne estas en la danĝera teritorio kaj mia alveno tien kaj mia realveno ne estas danĝera por vi, pro tio mi petas vian ekscelencon permesi mian pluiron al sinjoro Varga kaj poste iri hejmen. Ĉi tie, en la drinkejo de Szabadka mi atendas vian respondon.

Szabadka en junio, 1703

Paŭlo Görgey”

Poste li pudrumis per kalkopulvoro la skribaĵon, skrapite la kalkopulvoron de la muro. Li volvis la paperon, kiu iĝis flutforma. La leteron sinjoro Piĵera transprenis kaj demandis:

– Kiu volus porti en la urbon la leteron de la vicprefekto de Sepeŝ?
– Ĉu? – eksaltis iu birdovizaĝa homo, sinjoro Fürmender, kiu staris ĉe la pordo de la drinkejo la alveno de Paŭlo Görgey – ĉu li estas la vicprefekto de Sepeŝ, la fama Paŭlo Görgey, kiu murdis la juĝiston de Lőcse? Mi portas tiun leteron, ĉar li meritas tion. (La entuziasmo videblis sur lia vizaĝo.) Mi murdis ok ursojn kaj dek tri virapojn dum mia vivo, sed se mi povus murdi unu sakson de Lőcse, tio estus pli granda merito. Kie estas tiu letero? Donu al mi!

Piĵera transdonis al li la leteron. Fürmender apenaŭ kapablis moviĝi pro la multe da drinkitaj vinoj, sed de oni metite sur la ĉevalon, li sidis sur tiu ege rekte kaj forgalopis al la urbo.

– Tiel ŝajnas, ke li ne ŝatas la saksojn – rimarkis Matiaso Kelence, karesadante sian ventregon.

– Tio estas certa – ridaĉis Piĵera – li estis fraŭlo en Lócse, sed oni forpelis lin el la urbo kaj la urba konsilantaro ordonis al la ekzekutisto detranĉi lian oreleon pro malĉasteco.

– Nu, jen, tiu estas la maljuna friponeto – teruriĝis la drinkejmajstro, – pro tio tiu babilaĉas tiom pri la moralo kaj la hararon portas nobelamaniere, kovrita sian oreleon kaj la lokon de sia iama orelo.



Francisko Rákóczi la dua, pentrita de Ádám Mányoki
(https://eo.wikipedia.org/wiki/Ádám_Mányoki)
<https://dka.oszk.hu/007900/007904>

Kolomano Mikszáth

La nigra urbo

Historia romano

– Dua volumo –

10-A ĈAPITRO

„Nia paŝao” kaj aliaj okazintaĵoj

Sinjoro la juĝisto Katai ĝuste verdiktis en la urbodomo. Li okupiĝis pri tre grava afero, pri sendankego de la hominoj, kiujn pekojn oni devas puni kiel fortimiga ekzemplo.

La edzino de la honesta Stefano Perek, sinjorino Borbalo, iris tagiĝe, dum la loĝantoj de la urbo dormas, en la ĝardenon de Doboŝ, buĉisto, por kolekti freŝan verdan cepon. La ĝardeno estis sur la bordo de la rivero Rima⁹⁶. Tiu kazo malkaŝiĝis kaj sinjoro la juĝisto punis sinjorinon Borbalo. Ŝi devis sidi unu tagon en pilorio. La sinjorino tre ploris, dirante, prefere ŝi mortas, ĉar tiun infamion ŝi ne transvivos, prefere ŝi ĵetos sin en la riveron Rima. Ŝia edzo, Stefano Perek, kompatis ŝin kaj petegis antaŭ la juĝisto ke li sidu en la pilario. Kvankam la juĝisto estis reputacion havanta orgojla homo, havis bonan koron kaj sciis, ke Stefano Perek estas brava, religiema homo, kiu en ĉiu dimanĉo bele kantas la psalmojn. Pro tio li akceptis tamen la petegon de Perek kaj sidigis lin en la pilarion anstataŭ la edzino. Pro tio la tuta urbo mallaŭdis la edzinon kaj priridis la edzon.

Post unu-du semajnoj la edzino disputis kun sia edzo pro iu bagatelaĵo (ĝuste apud la domejo de la sinjoro juĝisto). Vorto sekvis vorton, riproĉoj okazis unu post alia kaj ŝi kriis al sia edzo: „Silentu, mi ne sidis en pilario kiel vi.” Nu, tiam ŝi ĵetis iun terpoton al la kapo de la edzo, kiu vundis lian kapon. La juĝisto aŭdis la kazon kaj vidis la okazintaĵojn kaj alkondukigis ŝin de sia hajduko kaj verdiktis. Laŭ la verdikto la juĝisto donigis al ŝi ses batojn per vergo, ĉar ŝi vundis lian kapon, krome dek du batojn per vergo, ĉar ŝi humiligis lin per riproĉoj, spite de tio, ke li surprenis la pilarion anstataŭ ŝi. Tiu kazo estis eternigita en la kronikoj de la urbo por ekscio de la generacioj kaj la malsaĝaj edzoj kaj la edziĝemaj fraŭloj saĝiĝu de la spertoj.

Tuj la juĝisto komencis dikti al la studento la verdikton. kion li tre ŝatis fari, ĉar li havis rakontan talenton. Dume sinjoro Fürmender iris en la ĉambron de la juĝisto, kunportante la leteron de Paŭlo Görgey.

Li finlegis la leteron kaj ĉesigis ĉion kaj lasis por ekzekuciigi la batojn per vergoj al sinjoro Jozefo Putnoki la vicjuĝisto, kvankam ankaŭ li ŝatis tiujn vidaĵojn, estante fraŭlo, eĉ multfoje lasis la batojn per vergoj, vidante la belegan formon de la edzino kaj ŝiajn larmojn.

⁹⁶ La rivernomo Rima estas latindevena el la Romepoko, ĝia signifo estas fendo. Ties plej granda flankrivero estas Ŝajo, kiu apudfluas la urbon Miŝkolco. La rivero estas granda akvoŭfluaĵo de la nuna Slovakio: <https://en.wikipedia.org/wiki/Rimava>

Ne nur la aliulaj malfortaĵoj emociis lin, sed ankaŭ la propra malfortaĵo multfoje direktis lin. Li ŝatis flati – inter aliaj – la grandpotenculojn (pro tio li iĝis juĝisto). Tuj li jungigis kaj ekiris por akcepti Paŭlon Görgey. Paŭlo Görgey jam estis tre senpacienca, ja la suno subiris super la arbaro de Szabadka (sabadka), kiam en la malhela arbaro antaŭvenis la juĝisto.

La juĝisto ekkomprenis la situacion, kaj antaŭ ol li laŭdis sinjoron Paŭlo Görgey, kiel bone li aspektas, preskaŭ juna estas, je demando de Görgey li respondis laŭ sia maniero.

– Nome nia vicprefekto, Nikolao Palaŝti decidis pri la reguloj kaj donis ordonon al mi. Se iu volas iri al la feinkastelo, tiun oni devas lasi iri tien. Sed oni devas registri ties nomon, postenon kaj alvenon al la kastelo. La alvenon kaj foriron la paŝao devas atesti. Se tio evidentiĝas, ke la persono ne iris preter la kastelon de la paŝao, tiam la persono povas reveni. Pro tio ĉi mi petas vin humile, ne iru tien, ĉar por la morto ni estas samaj kaj ni ĉiuj staras apud la abismo de la morto.

– Kiu estas tiu ĉi paŝao? – demandis Paŭlo Görgey.

– Do, tiu estas nia paŝao nomita Hilil – respondis sinjoro Katai simple.

– Do, ja oni forpelis jam la turkojn de ni kaj ankaŭ el Hont.

– Vi pravas, sed ni havas tiun – diris la juĝisto orgojle.

– Kiel tiu povis resti ĉi tie? – meditis Paŭlo Görgey.

– Ho, ve! Tiu ne estas restaĵo. Tiu venis ĉi tien sen armeo pli malfrue. Tiu estas ĉi tiea posedanto kiel la aliaj eksterlandanoj kaj aĉetis la bienon. Tiu havas la arbaron de Szabadka, kiun li aĉetis de la familio Balaŝa. Tiu ŝatas tiun lokon kaj konstruigis belegan kastelon. Ĉirkaŭ la kastelo li farigis grandegan ŝtonmuron. En la kastelo tiu vivas kun siaj ok edzinoj.

– Ĉu ĉi tio ne estas malbona ekzemplo por la popolo?

– Ho, ne. La popolo ne sekvas tiun modelon. La homoj estas kontentaj ankaŭ kun unu edzino.

Ĝuste nun okazis iu terura kazo, sed mi ne rakontas tion, ĉar vi povas ekabomeni la virinojn. Sed ĉe ni la homoj tre ŝatas la paŝaon, ĉar li estas bona hometo. Tiu havas multe da mono kaj elspezas tion kiel la soldatoficiroj. Komercistoj, juvelistoj portas aĵojn por la edzinoj de la paŝao. La paŝao apenaŭ restadas en la kastelo. Kelkfoje tiu alvenas tien nokte. Li pasigas ĉi tie kelkajn tagojn, poste li denove malaperas. Kien? Dio scias! Liaj edzinoj aĉetas multe da silkoj, drapoj kaj miniaturaĵoj. Li mem, la grandpotenculo, estas bonkora. Se ies domo forbruliĝas, tiam li donas lignon senpage el sia arbaro por renovigi tiun. Li lasis al sinjoro Varga, la arbaristo, ke la pli malriĉaj homoj peletu la porkojn en sian kverkoarbaron manĝi senpage la glanojn, kvankam la porkoj estas malpuraj bestoj laŭ la mahomedanoj (kion interesas ilia scienco?). Krome li ĉiam volonte

donas monon al tiu, kiu petas lian monhelpon. Ankaŭ nun li fandverŝigis sonorilegon en Besztercebánya⁹⁷ por la kalvinana eklezio.

– Li certe estas brava homo. Ĉu li konas la ordonojn de la ĉi-tiea vicprefekto?

– Ho, certe. Sinjoro vicprefekto tiam vizitas la paŝaon, se li estas hejme. Antaŭ kvar tagoj ili tagmanĝis kune kaj paroladis pri la vivrimedo.

Dum Preston demetis la sakojn por la aveno de la kapo de la ĉevaloj kaj sinjoro Katai registris, ke sinjoro Paŭlo Görgey je la 20-a horo ekiris de la drinkejo de Szabadka al Osgyán kaj promesis, ke li iros ĝis la arbara kastelo, kion atestos la paŝao per subskribo kaj sigelo.

– Mi dankas al vi – dankadis Paŭlo Görgey manpremante kun la juĝisto – kaj vian helpon.

Poste li enĉariĝis, sed li ankoraŭ demandis la juĝiston:

– Viaj homoj diris tion al mi, ke sinjoro Darvaŝ mortis. Kiel vi informiĝas pri la mortfamoj?

– Ni faras vivantan ĉenon. Po cent metroj staras unu homo ĝis Osgyán. Tie la doktoro de Loŝonc, Jozefo Makujik (li estas demona bubo, ĉar li estas kuraĝa por esti tie), havante voĉon saman al la botaŭro kaj la famojn li krias al la plej proksima homo, tiu krias al la sekva, ktp... ktp... fine al la komisiono. Ni ĉi tiel ricevas ankaŭ la dekretojn de la departemento. Sed la doktoro matene ne kriis. Certe ankaŭ li mortis.

– Nu, Dio benu vin, sinjoro juĝisto!

– Ankaŭ vin Dio benu kaj Dio reportu vin sana!

Ĉi tiel ili deziris unu al alia ĉion bonan kaj Paŭlo Görgey ekiris en la malhelan arbaron. Preskaŭ malĝoja estis la arbaro, ne pepetis gaje la birdoj, nur kelkloke pego bekofrapis kaj iu sciuro faris bruon. Inter la herboj, arbustoj multe da skaraboj svarmis, ĉirpis. Sono de sonorilego aŭdiĝis. Kio ĝi estas? Ĉu povas esti ke en la kastelo de la paŝao la vespermanĝo komenciĝas? Dum la kastelo estas maldekstre, la sonorilegado aŭdeblas dekstre. Ĉu povas esti, ke en Osgyán oni sonorilegas por la mortintoj? Kvazaŭ li sentus la odoron de la incenso kaj mortinto de trans la arbofolioj. Paŭlo Görgey ekstremitis.

– Kiom malĝoja vespero estas nun, Preston.

La voĉo de la sonorilego aŭdiĝis nun de maldekstro, feste.

– Dio portu min – ekkriis Preston – certe iu saĝa kaduka strigo petoladas kun ni.

– Ne diru!

– La strigoj kapablas imiti la sonon de sonorilego. Kiam mi estis bubo, la sono de la sonorilego devenanta de iu strigo, erarigis nin, nome mi kredis, ke mi

⁹⁷ La loknomo Besztercebánya elparolu: besztercebanja.

atingos iun vilaĝon. Mi iris en montaron – Bakony⁹⁸ kaj, dum pli ol du tagoj malsata-soifa, mi povis iri el ĝi. La arbaro de Bakony estas tre granda.

Sed ankaŭ la arbaro de Szabadka estas tre granda. Ĝi estas inter Szabadka kaj Osgyán sur glata ebenaĵo. Ĝia tereno estas virga tereno, sur kiu homo ne faris laboron. Ĝia tereno neniam vidis plugilon, kovras ĝin densa kaj alta herbaro kaj estas tie grandegaj arboj, sur kiuj lianoj kreskas kunplektante la foliarojn de la praaj arboj. La fama slovaka betjaro, Janošik ĉi tie vendas la drapojn de la urboj forrabitajn al la migrantaj studentoj. Lia mezuro estas distanco de du fagoarboj. Tio estas lia ulno. En la malhelo malfacile oni povas distingi la objektojn. Ankaŭ la loko de la fajroj de la paŝtistoj nigraj estas ankaŭ la arbotrunkoj, kiujn la fulmo forbruligis. Sur la arbustoj estas brilaj steloj: lampiroj. Sur la arbora senarbejo videblas kuranta rivereto, kvazaŭ iu arĝenta tolo estus disfaldiĝinta. Sed neatendite iĝis bruo! Kio ĝi estas? La bruo de la ĉaro ektimegis trinkantan cervaron kaj nun rompante ĉion per la kornaroj ili rapidegis al la mezo de la arbaro. La birdoj pro tio forflugis, la strigo ĉesigis la sonorigadon, la sciuro ektimante vekiĝis, la turfalko cirkulas en la alto kaj kiam ĝi konvinkiĝis, ke la danĝero pasis, ĝi alflugas sur sian neston al siaj birdidoj. Nur iu skarabo luliĝadas indiferece sur la tigo de aveno kiel sur iu lifto.

– Ĉu la farmo estas ankoraŭ malproksime? Ĉu vi konas la vojon, Preston?

– Ĝi jam ne povas esti malproksime, ĉar la turfalko faras la neston proksime al la kokinfarmo.

Oni diras, ke tie estas iu blanka kolono, kiun oni starigis je estimo de iu mortfalinta turka princo. Ĉe tiu blanka kolono ni devas aliri la alian vojeton kondukantan al nia celo. Sed mi ne scias certe. Nu, baldaŭe estos evidente, ĉar mi aŭdas bojadon.

Post ne longe ili ekvidis la blankan kolonon kvazaŭ fantomon. Preston direktis la ĉevalojn de la landvojo kaj baldaŭ du fenestroj montris la ĝustan direkton. Ili iris sur ombra vojo, kie estis pli malvarmeta la aero. Paŭlo Görgey demetis la ĉapelon ventumante sian kapon. Dume li konstante rigardis la lumigitajn fenestrojn: certe la eta Rozalia sidas ĉe la fenestro kaj trikadas aŭ legadas ĉe lumo de la meĉo. Ili malrapide proksimiĝis al la fenestro kaj iĝis ekscititaj kaj senpaciencaj. Li vidis inter la arboj kapricajn ombrojn kaj el inter la ombroj elpaŝis la mortinta juĝisto de Lőcse kun pafilo enmane kaj kvazaŭ li estus celanta al la fenestro... Malvarma vetero estas Preston, mi malvarmas.

– Mi estas tute malseka pro la ŝvitado – respondis Preston. – Ha! ho! Mi tiel vidas, ke tiu ĉi domo estas la domo de la arbaristo.

Iu erca voĉo admonis ilin en la malhelo.

⁹⁸ Pri la montaro Bakony: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Bakony>

– Ne venu pli proksimen, ĉar inter la arboj estas plektita drato kaj tiu vundos vin. Kion vi volas fari tie ĉi? Ĉu vi devojiĝis?

– Ne – respondis Paŭlo Görgey. – Ni serĉas sinjoron Varga.

– Mi estas sinjoro Varga – respondis la pli frua voĉo. – De kiu direkto vi venis? Ĉu de Szabadka, aŭ Osgyán?

– De Szabadka – respondis Paŭlo Görgey kaj elĉariĝis saltante.

– Kiel vi povis veni de Szabadka?

– La juĝisto Katai permesis tion.

– Ĉu? – respondis la arbaristo. – Tuj mi faros lumon, sed unue mi ŝatus demandi ion. Ne koleru min, ja la mizero ne konas leĝon kaj ankaŭ la gastamo ĉesas. En Osgyán estas terura epidemio, pro kiu ni devas esti tre singardaj.

– Demandu!

– Kion vi volas fari? Ĉu vi kunportas iun?

– Pli ĝuste ni volas kunporti iun.

– Kiun?

– Iun knabinon.

– Vi serĉas tiun en malbona loko. La knabino jam ne estas ĉe mi.

La koro de Paŭlo Görgey kunpremiĝis.

– Kie ŝi estas? – li demandis angorante.

– Ŝi estas servistino en Batyi ĉe Johano Ŝooŝ.

– Povas esti, ke ne pri tiu knabino temas. – respondis Paŭlo Görgey.

– Alia svatebla knabino ne estas ĉe mi. Mia filino ankoraŭ kuŝas en lulilo. Sed estas ĉe mi iu knabineto, sed vi certe ne ŝin serĉas.

– Povas esti, ke tamen mi serĉas ŝin. – respondis Paŭlo Görgey.

– Nu, tiokaze vi turnu vin reen, nome mi promesis, ke mi donos ŝin al neniu kaj mi ŝirmos ŝin ankaŭ de la vento. Kion mi promesis, tion mi plenumas.

– Ĉu eĉ ne ŝia patro povas vidi ŝin? – demandis Paŭlo Görgey emociite.

– Ĉu vi estas la Moŝta vicprefekto?

– Mi estas tiu. Mi estas la patro de Rozalia.

– Ĉi tiel estas jam pli bone! Bonvenon! He! Suzaneta! Portu tuj iun lanternon!

Post ne longa tempo iu svelta, vigla sinjorino aperis ĉe la pordo de la vestiblo. Sinjoro Varga prenis la lanternon kaj iris antaŭ la gastojn por montri kiel veni tra la drato, kiu estis farita kontraŭ la rajdantoj kaj vagabondoj. La fino de la drato estis ligita al klinko de la pordo de la arbaristo, ke ties vibrado atentigu la mastron al la ĉeestoj de la rabistoj.

– Jes, ni vivas ĉi tiel. Bonvolu veni tra la drato. Bonvenon!

Paŭlo Görgey manpremis kun sinjoro Varga, amikece.

– Kiel fartas mia filineto?

– Danke al Dio, ŝi estas sana, kiel la glano kaj saĝa kiel la filozofo. Kie vi estas, Suzaneta? Ĉu vi konas tiun ĉi sinjoron?

– Sankta Dio! Ĉu Vi estas tiu, sinjoro vicprefekto? Ĉu vere vi estas? Ho, ve! Vi iĝis tre maljuna.

– Ĉit! Kial vi diras tion? – riproĉis ŝin la mastro, sed sen kolero. – Iru en la kuirejon! Donu al la koĉero kaj al la ĉevaloj ripozejon kaj nutraĵon! Bonvolu veni, Moŝta sinjoro, post mi!

Li ne devis malfermi la pordon, ĉar la aperturo estis kovrita de iu tolaĵo por malhelpi la muŝojn kaj insektojn flugi en la ĉambron. Sinjorino Suzana klopodis flankentiri la tolaĵon, ĉar ŝi volis unue iri en la ĉambron por anonci la okazintaĵon al fraŭlino Rozalia.

Sur la tablo estis glaso plenigita per oleo. Sur la nivelo de la oleo estis lignoringo, en kiu estis iu meĉo, kies flamo lumigis la ĉambron. Apud la lito estis lulilo, en kiu suĉinfano dormis, ĝia buŝeto kare movis, kvazaŭ ŝi estus dum sia sonĝo ĉe Dio.

Apud la lulilo sidis Rozalia Görgy zumkantante iun melodion. Ŝi portis ŝprucmakulitan jupeton kaj per unu sia piedo lulis la lulilon. Ŝiaj piedoj estis tre belformaj, kiuj certe logos la okulojn de la viroj. Ankaŭ ŝiaj okuloj estis belegaj, kiuj memorigis la violon. Ŝia vizaĝo ne estis regula, tamen videblis sur ĝi dolĉa harmonio, la frunto estis mallarĝa, pro kio ĉiuj admiris ŝin. Kial ŝi estis bela? Oni ne povas scii tion. Tamen ŝi estis bela. Ĉi tio estis sufiĉa tamen por plezuriĝi. Ĉefe ŝia nazo estis unu el la plej adorindaj kuspitaj nazoj.

Sinjorino Suzana ŝteliradis al Rozalia kaj subite kovris per siaj manoj la okulojn de Rozalia. Ĉi tiel la ĉambro iĝis malhela por Rozalia.

– Vi estas Suzaneta – divenis ridante Rozalia – mi sentas la odoron de la ajlo, ĉar vi tranĉis tiun.

– Jes, sed ne min vi devas diveni, sed la alvenanton. – petoladis sinjorino Varga.

– Ĉu iu venis al ni?

– Ĉu vi aŭdis la bruon de la ĉaro? Ankaŭ la hundoj bojis.

Dume jam ankaŭ Paŭlo Görgy paŝis en la ĉambron, sed li estis pacienca ne volante malbonigi la ŝercon de sinjorino Suzana.

– Ĉu via koreto ne sentas la alvenanton? – pridemandis ŝin sinjorino Varga.

– Ĉu vi parolas pri bojado de hundo? Ĉu la hundon Vistula sendis al mi onjo Katarineta?

– Ho, ne! Vistula estas hundaĉo kaj ne meritas laŭdon. Nun iu venis, kiun vi tre amas. Kiun vi amas plej bone?

– Ah! Malkovru miajn okulojn! Mi divenis. Onjo Maria alvenis el Toporc.

– Kvazaŭ oni estus puŝinta ponardon en la koron de Paŭlo Görgy. Li estus dezirinta paroli, sed liaj piedoj kaj lango senmoviĝis kaj li mutiĝis.

– Ne tiu alvenis – ridetis sinjorino Varga kaj petolante diris: – Vi povus diveni facile. Pensu iomete kaj esploru inter viaj memoroj.

Rozalia pensadis. Paŭlo Görgey estiĝis nerva. Li atendis kapklinante kiel velka floro sub la pluvogutoj.

– Mi ne scias diveni – respondis Rozalia rezignante, skuante la kapon kaj la lankolora hararo flugadis ĉirkaŭ la kapo.

Kaj ŝi liberigis sin el la manoj de sinjorino Suzana kaj ekvidis sian patron kaj surprizate kuregis al li.

– Ĉu vi estas, paĉjo? Kial vi venis ĉi tien, kie eĉ birdo ne estas?

Paŭlo Görgey iĝis konfuzita, li surpriziĝis pro la senĝena alparolo, kiu ne estis ravita kaj frigida. Rozalia mankisis kaj Paŭlo Görgey kisis la buŝon de Rozalia. Li ne devis klini sin suben, ja Rozalia iĝis alta kiel cervo. Paŭlo Görgey rigardis la karan vizaĝon kaj belan figuron de Rozalia longtempe kaj vidis, ke ŝi viŝas la lokon de la patra kiso – povas esti, ke ĝi estis malseka, aŭ la lipharoj pikis tiun kaj jukis. Sed pro tiu movo Paŭlo Görgey ĝemetis, ĉar tio vekis malĝojajn memorojn kaj li turnis sin al sinjoro Varga:

– Ĉu mi povas paroli nun kun la paŝao?

– Ĉu nun? Ĉu kun nia paŝao? – demandis li surprizita. – Ĉu tio ne estus bona matene?

– Ne. Mi povis veni ĉi tien kaj povas iri reen, se la paŝao atestas skribe, sigele pri tio, kiam mi alvenis kaj kiam mi foriris.

– Mi komprenas. – diris la mastro afable – do, restu ĝis ĉesas la pesto ĉi-tiea. La ĉi-tiea restado ne estos enuiga. Ĝuste nun niaj homoj rimarkis iun urson. Ni ĉaspelos tiun.

– Ankaŭ mi estas persekutata urso hejme – murmuris la vicprefekto. Mi devas rapidegi hejmen matene.

Sinjoro Varga skrapis la kapon. Li estis dika, simpatia homo. Li parolis malmulte kiel inter amikoj de la arbaro. Nome amikoj de la arbaro devas scii silenti.

– Ej, nu! Tio estas malbono, sed ni devas provi.

Li petis pardonon por iri ŝanĝi vestaĵojn, poste li kondukos ilin al la kastelo de la paŝao. Li iris al la alia ĉambro, kiu estis sur la alia flanko de la vestiblo. Paŭlo Görgey kaj sinjorino Suzana restis en la ĉambro. Suzana demandis multe de Paŭlo Görgey. Kio estas novaĵo en Görgő? Ĉu la fraŭlinoj Palavec ne edziniĝis? Ĉu mia patrino nenion mesaĝis?

– Ŝi nenion mesaĝis – ekskuzis sin Paŭlo Görgey. – Sed tio estas mia kulpo, ĉar mi ne diris ĉe ŝi, ke mi iras por Rozalia.

– Ĉu Rozalion? – demandis la junedzino malĝojiĝante.

– Ĉu vi volas forporti ŝin?

– Jes.

Rozalia, kiu denove residiĝis al la sonĝanta bebo kaj rigardadis ĝiajn rondajn vangojn inter la kusenoj de la lulilo. Nun subite levis sian kapon.

– Ĉu vi ŝercas? – kaj ŝi petole alokulumis sian patron.

Li tuj iĝis ridetanta maljunulo. Tiel malaperis la amareco el lia animo, kiel la nebulo de la maljuna monto, la efiko de la sunradio al ĝi surridanta.

– Mi ne ŝercas. Mi kunportos vin. – Li diris pli gaje. – Vi estas jam fraŭlino kaj mi volas vin instruigi kaj edukigi.

Rozalia eksaltis de la seĝo kaj levis sian longan jupon por ŝajni pli mallonga kaj rondiris ĉirkaŭ sia patro afable kiel iu dorlotita infano.

– Ej, paĉjo, ĉu vi rigardis min bone? Ja mi estas ankoraŭ knabineto kaj per via permeso mi restos en Osgyán.

– Hm, en Osgyán...

Paŭlo Görgey ne finis la frazon, ĉar li ne volis malĝojigi ŝin per la funebrofamo.

– Kion vi volas fari en Osgyán? – li finis la frazon. – Vi devas veni kun mi, ĉar mi tion volas!

– Sed mi ne volas foriri – kaj ŝi faris tiel, kvazaŭ ŝi plankon frapus perpiede.

Ĉi tiu spitparolado plaĉis al la vicprefekto kaj ankaŭ li spitparolis.

– Kies volo estas pli forta? – li ŝin demandis petole.

– Via volo estas pli forta – ŝi anoncis rapide kaj kapklinis pro kio ŝia orhararo kovris ŝian vizaĝon. – Jes, via volo estas pli forta. Kion ĝi signifas? La ordono ĉiuokaze estas ordono, se iu timas sian ordonanton. Sed mi tute ne timas vin, paĉjo.

Ŝi ĵetis malantaŭen la orkoloran hararon kaj faldis sian frunton kiel avinjo, kiu cerbumadas.

– Kial?

– Ĉar, mia karuleto, vi amas min – diris la vicprefekto milde. – Venu pli proksimen al mi!

La adoleskantineto iris pli proksimen al li kaj skuis la kapon nee.

– Ne tial.

– Ĉu vi ne amas min?

– Mi estimas vin.

– Kial vi ne amas?

– Mi ne scias. – Ŝi flustradis malgaje.

– Ĉar la dekalogo enhavas tion. Ĉu la dekalogo estas ordono laŭ vi?

– Ĉar tio devenas de Dio kaj mi timas Dion.

– Ĉu vi amas Dion?

– Mi ne amas tion.

SinJORINO Varga klopodis silentigi ŝin, sian manon metante sur ŝian buŝon.

– Ho, ve! Mia malfeliĉa paganeto! Kial vi diras tion?

Rozalia kare faris grimacon kaj sur ŝia vizaĝo estiĝis faldoj.

– Ho, ve! Ne tuŝu mian vizaĝon per via manplato, ĉar tiu estas ajlo-odora.

Al Paŭlo Görgey plaĉis ŝia infana babilaĉo, kiu estis naiva. Sinjoro Varga pravis, kiu diris, ke ŝi estas vera filozofino. Li prenis ŝiajn manojn, kiuj estis varmaj kiel iu birdonesto. Li tiris pli proksimen al si kaj starigis ŝin inter siajn genuojn.

– Venu ĉi tien, eta deliktulino – diris li karesante ŝian hararon. – Diru, fraŭlino, kial vi ne amas Dion?

– Ĉar ankaŭ Dio ne amas min. – ŝi respondis spiteme.

– Kial vi pensas tion, fraŭlino?

– Se Dio amus min, tiam Li ne estus forrabinta mian panjon.

Paŭlo Görgey turnis sin, liaj okuloj iĝis malsekaj. Poste li ekstaris, li iris tien-reen en la ĉambro kaj rigardis tra la fenestro eksteren. La arbaro muĝis. Poste li ekhaltis antaŭ la knabineto kaj rigardis la paroleman vizaĝeton, kvazaŭ li legus iun malĝojan libron.

– Ĉu vi vidas vian malbonan edukadon? Malfeliĉa Katarina estis bona edzino, sed... kion mi parolas? Via onklino, Katarina ne edukis vin laŭanime, vi iĝis plenkreskulino kiel iu buksoarbeto, kiun neniuj tondas por la necesaj figuron doni al tiu. Nu, ne faru grimacon, ĉar mi pravas. Vi estas ankoraŭ troe infaneca, sed samtempe estas frue matura. Mi tion volas, ke vi estu vera fraŭlino. Vi ne havas animan bazon kaj ne parolas ĝentile. Tio estas konsterna, ke vi parolas pri Dio strange. Sed Dio kreis nin ĉiujn kaj agojn de Dio nek la homo povas kritiki, nek la filozofoj. Dio donis al ĉiuj menson, sed ne tro multe. Ne oscedu, ĉar mi batas vian dorson...

– Bonvolu ne koleri min – skrupulaĉis sinjorino Varga, – mi tre ŝatas, se Rozalia oscedas, ĉar tiuokaze mi vidas ŝiajn belajn dentojn.

Paŭlo Görgey ridetis, sed senĝene daŭrigis la temon.

– Sed via opinio pri Dio ne estas racia, ne estas logika, se vi diras, ke vi ne amas Dion, ĉar ankaŭ ne Dio amas vin. sed mi amas vin spite de tio, ke vi ne amas min. Nu. Kio estas via opinio pri tio ĉi, vi diableto?

– Se vi amus min, paĉjo, – respondis la knabineto denove infanece, tiam vi estus portinta ion al mi.

– Jes, mi portis ion – li memorigis sin kaj kriis al la korto, – hej, Preston, enportu la pakaĵon aĉetitan en Rimaszombat.

Sinjoro Varga ankoraŭ ne revenis. Paŭlo Görgey maltrankvile rigardis la pordon, sed nur Preston alvenis, portante la pakaĵon, kiun Rozalia avide disvolvis, poste ŝi trompiĝante metis flanken ĝin.

– Ho, ve, ŝercema paĉjo! – ŝi kriis infanece kapbalancante. – Ja mi jam ne estas dolĉaĵon ŝatanta knabineto.

– Nu, kion vi dezirus ricevi?

Ŝi tiris supren la ŝultrojn pucparade:

– Do, drapon, silkon, rubandon kaj ceteraĵojn.

Sed dume ŝin logis la ĉerizoj kune kun la tigoj, kiujn la patro metis sur ŝiajn orelojn. Tiuj plaĉis al ŝi.

– Ho, Rozalieta – li diris montrante konsterniĝon – se mi diras, ke vi estu fraŭlino, tiam vi diras, ke vi estas knabineto. Sed aliokaze vi volas esti fraŭlino. Ĉi tiel ni ne marĉandados, eta vulpo!

– Ne batu ŝin – sinjorino Suzana ekskuzis ŝin, – ne koleru ŝin. Ja ankaŭ la rozo povas esti ankoraŭ burĝono, se ĝi ne dehiskis, sed la burĝono povas esti rozo, se ĝi jam dehiskis.

Sed tiun ĉi belan komparon oni ne povis akcepti, ĉar aŭdiĝis vorto de la mastro de ekstero.

– Mi jam estas preta. Ni povas iri, se vi ordonas.

Paŭlo Görgey prenis la ĉapon por eliri de la ĉambro, sed li tuj repuŝiĝis. Nome en la vestiblo, kiu estis lumigite de la fajrejo, li vidis iun turkan homon portantan turbanon kaj hepatkoloran kaftanon. Tiu demetis la ĉapon, kaj tuj li alparolis ridetante.

– Mi estas Johano Varga.

– Ĉu vi estas Johano Varga? Mi ne estus pensinta tion. Kial ĉi tio estas bona?

– Tial estas bona, ke la paŝao ne frenezigu la profeton Mohamedo kontraŭ mi. Nome la Korano malpermesas la fremdan religian medion ĉe la piaj Muzulmanoj. La paŝao kredas tion, se mi iras en turka vestaĵo en la kastelon, tiam Mohamed ne sentas, ke mi estas kalvinana.

– Tio ne povas estis prava. – rimarkigis Paŭlo Görgey. – Kial oni toleras la ĉeeston de la kristanaj fraŭlinoj en lia haremo?

– Ja la edzino ne havas animon ĉe ili.

Ili ekiris el la domo sur iu bona vojeto kaj post ne longa tempo iu zumado aŭdiĝis. (Certe en iu kavarbo loĝis nebreditaj abeloj.) Kompreneble ili paroladis pri la paŝao.

Tiu estas certe religia homo – diris Paŭlo Görgey, – ke li okupiĝas pri similaj bagatelaĵoj.

Tiu ne estas troa bigoto, nome li drinkas vinon – ekskuzis tiun sinjoro Varga. – Krome li estas iomete strangulo, sed li estas gajema, ne orgojla. Tiu ne similas al niaj grandpotenculoj.

– Kiom da jaroj vi pasigis ĉe tiu?

– Jam kvar jarojn.

– Oni diras, ke tiu venas tien ĉi nur rare.

– Ĉiujare unufoje-dufoje kaj mallongan tempon li pasigas tie ĉi.

– Kie li loĝas, se li ne estas ĉi tie?

Sinjoro Varga tiris la ŝultron.

– La diablo scias tion.

– Ĉu oni neniam sendas al li leteron, aŭ mesaĝon?

- Ne.
- Ĉu ankaŭ tiu ne?
- Eĉ ne tiu.
- Kial? Ja povas aperi iu kazo, pro kiu oni devus informi lin.
- Tion ankaŭ mi diris al li unufoje, sed li krude-trude silentigis min: „Ne deziru de mi superfluan aferon, mia dolĉa filo. Se la homo dormas, tiam la animo forlasas lin, poste ĝi aŭ revenas, aŭ ne. Sed ni ne devas interesiĝi pri ĝi. Alahoe ne deziras tion. Ĉu vi volas informiĝi? Kial tio estas bona? Se vi diras al mi ion bonan, tiam ni renkontiĝos. La malbonan famon diru al mi nur tre tre malfrue, ĉar tiel la problemojn nur malfrue ni devas solvi.”
- Mi envas tiun ĉi filozofion – rimarkis Paŭlo Görgey meditante. – Nur la paŝao povas diveni ĉi tion. Sed tio estas stranga, ke ties koĉero, aŭ lakeo ne babilaĉas ion.
- Ĉiam li venas nokte sola per la jungaĵo. Li foriras ĉiam nokte. Li neniam adiaŭas kaj sen saluto alvenas kaj eĉ iu eta flago ne signas lian alvenon kaj foriron sur supro de la minareto.
- Ĉi tio estas simila al iu sekreto – diris la vicprefekto interesiĝante. Dum lia ĉeesto tiu ne foriras el la kastelo.
- Ho, ne. Tiu ŝatas promeni en la arbaro, kelkfoje li venas al mi. Nuntempe ĉiutage li vizitas min, petas tason de lakto de mia edzino kaj ŝercadas kun fraŭlino Rozalia.
- Ĉu tiu scias paroli hungarlingve?
- Tiu torturas la hungaran lingvon, sed ni paroladas germanlingve.
- Tiukaze ni ne parolu laŭte hungare – konsilis Paŭlo Görgey – ĉar tiu povas aŭdi, ke ni riproĉas lin.
- Ne timu tion, ĉar nun la Luno jam lumigas, liaj konkubinoj banas sin en la ĝardeno lago kaj ilin rigardas li plezuriĝante. Ĉi tio estas ties plej ŝatata amuzo.
- La pigo ĝin piku! – petolis Paŭlo Görgey.
- Ja ĉi tio estas la problemo. Ĉe ĉi tiu okazo nenio kaj neniu interesas lin, li ne volas paroladi kun ni. Pro tio ni estos sentaŭgaj. Nu, tio estas egala!
- Kiom jaraĝa li estas?
- Li estas sendentara kapro.
- Dum la parolado ili ne rimarkis la atingon de iu grandega ŝtonmuro blanka, kiu ĉirkaŭbaris la plezurpalacon de la paŝao. La muro estis tre alta kaj de supro de la plej alta arbo oni povus vidi la konkubinojn en la ĝardeno de la palaco. Inter la junuloj de Rimaszombat estis kelkaj, kiuj ne hontis grimpi sur la proksiman karpenon por vidi la konkubinojn de la paŝao. Antaŭ cent jaroj la paŝao estus senkapiginta la junulojn pro tio. Nun jam paŝao Hilil elhakigis nur la senpudoran arbon.

Tie en la muro estis iu dika grandega fer-pordego. Nu, tiun eĉ Botond ne kapablis rompi. Ĉe la pordego pendis sur forta ĉeno iu grandega martelo. Tiu martelo estis signilo por signi, se iu dezirus eniri en ĉi tiun paradizon. Sinjoro Varga batis trifoje sur la pordegon, sed neniu anonciĝis ĉe la pordego. Poste li prenis iun fajfilon kaj enblovis. Ĝia sono estis eksterordinare akra, kio preskaŭ al duono fendis la arbojn kaj murojn. Tio estis kune turdofajfado, bovoblekado kaj serpentosiblo.

– Kio ĝi estas? – surpriziĝis Paŭlo Görgey kovrante la orelojn.

– Ĉi tio estas la doma signado, kiun aŭdante, iu venas al la pordego kaj tiu aŭ lasas eniri la alveninton, aŭ ne.

– Ĉu ankaŭ mi devas eniri?

– Mi ne scias. Povas esti, ke la paŝao ankaŭ sen vi subskribos la dokumenton.

Post momenteto unu parto de la ferpordego malfermiĝis kaj ĉe la aperturo aperis unu kapo portanta turbanon.

– Ĉu vi estas sinjoro Varga? demandis iu kaponvoĉo. – Kion vi volas?

– Mi ŝatus paroli kun nia mastro, la paŝao. Jusuf, helpu por akcepti min.

– Se la paŝao riproĉos min, tiam vi estos kulpa. Mi diros, ke vi minacis min.

– Bone estas. Sed iru kaj vi ne estos kulpa.

Jusuf fermis la pordegon kaj foriris tren-paŝe.

– Kiu estis ĉi tiu? – demandis Paŭlo Görgey, kiu jam interesiĝis pri la orienta romantiko.

Kvazaŭ li estus sentinta la odoron de ambro.

– Tiu estas eŭnuko.

– Ĉu tiu estas vera eŭnuko?

– Kompreneble.

– Pro diablo! – miris la vicprefekto. Mi tre ŝatus ĉirkaŭrigardi en la ĝardeno.

– Povas esti, ke vi povos eniri tien kaj povos partopreni tion.

Sed ni povas eniri sen permeso de la paŝao, tien, kien estas malpermesate eniri. Ni prezentas al la leganto la imperion de la paŝao. Antaŭ ĉio estas admirinda la kastelo, havanta etan balkonon, kupolan antaŭhalon kaj sveltan minareton. La kastelo ne estis lumigita, lumigis unu eta lampo, kiu donis mistikan ruĝan lumon. La Lunarko lumigis la tuton per siecaj koloroj kaj la kastelo aspektis brunblanka, kvazaŭ ĝin estus konstruita fantomoj de la miraklo-lampo de Aladino. En la fantasta lunlumo (ŝatata astro de la turkoj) la ĝardeno malantaŭkastela estis pli bela, ol la kastelo, kiun oni konstruis laŭŝajne el salokuboj. La plantaro de la ĝardeno estis abundkreska, la vespero estis varmeta, la plantoj videblis kiel malhelaj ombroj. Inter la trunkoj de la arboj estis hamakoj kaj balanciloj. Sur iu balancilo altstatura damo sidis, portante al korpo alteniĝantan blankan vestaĵon, kvazaŭ sinjorin-forma ciruso naĝus en la malhelo. Apud la balancilo iu eŭnuko

staris kaj kelkfoje puŝis la balancilon kaj la blanka vestaĵo flugis super la malhelaj plantoj.

Malproksime videblis inter la foliaroj de la arboj lago al spegulo simila. Ĉirkaŭ ĝi estas ringoj kiel klingoj de glavoj kaj sur tiuj brilas la stelo kiel blankaj lilioj ... Kiu estas tiuj moviĝantaj blankaĵoj?

... Simplaanima leganto! Malfermu la okulojn, aŭ fermu tiujn pia mortemulo, se vi volas dormi trankvile. Nome tiuj estas odaliskoj de la paŝao, kiuj malvestiĝis por baniĝi ...

Apud la lago iu eta fajrero ruĝiĝas. Kie estas la fajrero, tie estas ĉibuko de la paŝao kaj tie estas ankaŭ li mem. Tiu sidas en iu brakseĝo lokita komforte. Tiu metis la turbanon sur iun arbobranĉon kaj rigardas sub la foliaroj de la arboj la ebriigan scenon. Tiu portas flavajn babuŝojn. Dume tiu viŝas la ŝvitantan frunton kaj lace rigardas la lagon, sed pensadas pri alia afero.

Vane, la homo pri ĉio enuas. Ankaŭ la paradizo nur dum mallonga tempo estas paradizo, pli malfrue estas nur vulgara ĝardeno, fine estas nur novalo. La paŝao Hilil havis novajn sopirojn, kio ne estas miraklo. La plenaĝo meritas ĝustan aprecon. Iun saĝan maljunulon interesas ne nur iu altiriĝo. Tiu jam estas filozofo, kiu serĉas ne nur la ĝuadojn, sed la spertojn, laŭvorte la scion. Tiu ne malŝparas la tempon por fari bagatelaĵojn, ĉar li havas malmulte da tempo.

La paŝao ekvidis apud la arbaristo iun adoleskantinon, iun naivan infanon, kiu ankoraŭ nenion scias pri la vivo, kiu vekis lian atenton. Kelkfoje li parolis kun ŝi kaj ekde tiam tiu pensis pri ŝi. Tiu planis favorigi ŝin. De kie ŝi devenas? Nome se ŝia familio estas tre riĉa, tiam la maljunulo povas akiri malfacile. Ĉu povas esti, ke ŝiaj prauloj estas malriĉaj, aŭ malpli riĉaj? Tiukaze la maljunulo povas akiri ŝin. Tiu povus peti informon de sinjoro Varga pri ŝi. (Sed sinjoro Varga estas honesta kaj krude malĝentila.) Li ne povas paroli kun Varga, ĉar tio estus suspekta kaj forigus ŝin. Ĉu povas esti, ke li povas paroli kun sinjorino Varga pli sukcese? Ĉu ŝiaj gepatroj estas malriĉaj kaj facilanimaj? Ĉu tiukaze li povus proponi por edukigi ŝin kiel faras la mecenatoj. Ĉu li povus dungi kaj povus doni al ŝi salajron? Nome la mono estas alloga. Kvankam ŝi estas ankoraŭ infano, tamen povas esti, ke tio estas natura, se iu maljunulo plezurigas sin, rigardante ŝin. Dum sia junaĝo la tridekjaraĝaj junedzinoj allogis tiun, kaj nun dum la maljunaĝo tiu altiriĝas al la adoleskantinoj. Ĉiuj honestaj homoj faras ĉi tiel.

La honesta paŝao Hilil ĉi tiel meditis, li miris la saĝecon de Alaho kiu tiel aranĝis, ke neniu perdiĝu en la naturo kaj ne perdiĝu la sopirado pri la adoleskantinoj. Dum li ĉi tiel meditis la eŭnuko ĝenis lin anoncante, ke aŭdiĝis de ekstero la fajfilo de sinjoro Varga.

- Kion li volas? – murmuris la paŝao.
- Li volas veni antaŭ vin tuj kaj minacis min, se mi ne anoncas lian deziron.
- Iru kaj demandu lin, pri kio temas.

Baldaŭ la eŭnuko revenis:

– Sinjoro Varga kunportis iun fremdulon, kiu nur tiam povas iri al Szabadka⁹⁹, se vi atestas skribe, ke li venis al la arbaristo kaj li ne estis en Osgyán. Ĉi tion ordonis la pesto-komisiono.

– Iru, kaj diru al li, ke mi ne havas tempon por skribaĉi. Kial li ĉagrenas min per bagatelaĵoj?

– Li diris, ke la fremdulo estas patro de tiu knabineto, al kiu mi portis floron kaj daktilon hieraŭ laŭ via ordono.

– Ĉu jes? – ekkriis la paŝao vigle kaj eksaltis de la seĝo. – Iru kaj lasu veni la fremdulon kaj konduku lin en la bluan ĉambron.

La eŭnuko klinis sin ĝistere.

– Jes, mia sinjoro. Ĉu ankaŭ sinjoron Varga mi povas enlasi?

– Ne. Li atendu ekstere. Sed se la fremdulo ne kuraĝas veni sola, tiam ankaŭ li povas enveni.

La eŭnuko haste foriris.

La paŝao Hilil ĝustigis sian vestaĵaron, metis sur la kapon sian turbanon, el la ĉibuko forigis la cindron kaj ŝutis tiun inter la petalojn de tulipo. Li iomete promenis sur la grua pado, dum li faris planon por ĉagreni la fremdulon. Li forlasis la ĝardenon pland-ŝove sur la ŝtupoj de la kastelo kaj iris al la blua ĉambro. Tie jam la fremdulo atendadis, dum li rigardis iun murpentraĵon.

– Estu salutata en mia domo – diris la paŝao sian manon metante sur sian bruston.

Paŭlo Görgey turnis sin kaj surpriziĝante komencis diri la elpensitan parolon:

– Alaho pliigu vian feliĉon grandpotenca sinjoro kaj viro kaj vi estu...

Sed subite la vorto ekhaltis en lia gorĝo, ja li ekrigardis la paŝaon, kiu retroiris konsternita. Paŭlo Görgey senvole ekkriis:

– Jen! Kion vi faras ĉi tie, paĉjo Quendel?

Paĉjo Quendel (nome Quendel estis la paŝao) paliĝis subite, ĉar ankaŭ li ekkonis la vicprefekton de Sepeŝ. Ĉi tio estas la fato. Ĉu li faris iun malbonon al la diablo, ke tiu kunportis la vicprefekton ĉi tien? Ja li kredis ĝuste, ke li faris bonon al la diablo. Ho! La gasto estas patro de la knabineto, ĉar li havis sendiajn pekajn pensojn pri la adoleskantino, kaj nun postatingis lin la puniĝo. Sinjoro Quendel kaj hontis kaj ĉagreniĝis pro la rompo de la inkognito kaj ankaŭ timis kiel iu superstiĉa homo.

Li vidis ne nur la grandpotencan vicprefekton, sed ankaŭ la venĝeman fatalon en la persono de la patro de la knabineto. Li volus morti pro la honto, sed subite komencis ŝercadi.

⁹⁹ Ĉi tie temas pri la iama Supra-hungaria setlejo, sed pri la iama Sud-hungaria setlejo Szabadka, bv. vidi la artikolon: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Subotica>

– He, he, he, – li komencis ridi. – Nu, tio ĉi estas vere tre bona afero. Kiu diras tion, ke ne estas feliĉo? Bonvolu sidiĝi! Nu, tio estas eksterordinara feliĉo, ke mian domon atingis ĉi tiu honoro. (Li povis esti malbona aktoro, ĉar li faris acidan mienon, kvazaŭ li manĝus tro acidan manĝaĵon.) Ja mi tuj eliĝas el mia haŭto pro la ĝojo. (Kaj vere li komencis saltadi, danci, kiel iu dika infano.) Kion mi faras ĉi tie? Mi ripozas. Ja mi laboris multe. Ja ankaŭ por mi mortis Jesuo.

Paŭlo Görgey ridetis kaj senvole petoladis kun li:

– Jes, Jesuo mortis ankaŭ por vi, sed ankaŭ helpe de Mohamedo vi iĝis riĉa.

– Do, kion fari? – ekskuzis sin paĉjo Quendel plorante, sed iomete li ankaŭ ruĝiĝis kaj ankaŭ lia kolo similis al la koloro de briko. – Oni faras por mi malbonajn negocojn, la homoj ne estas fidindaj.

– Pri kiaj malbonaj negocoj vi parolas?

– Do, pri la aferoj de la paŝao de Beogrado temas. Mi pruntedonis al li multe da mono kaj li ne kapablas repagi. La sultano forportis lin al Anatolio kaj mi aŭdas, ke li preparas sin por foriri. Li diris nenion al mi. Mi postulis mian monon, kaj li batigis sur miajn plandojn dudek batojn per bastoneto. Tio estis tre granda perforto. Tiutempe mi ne estis nobelo, sed la batoj pli forte doloris al mi, kvazaŭ mi estus ricevinta la batojn kiel nobelo. Nu, mi promesis pro tio venĝon. Mi subaĉetis la grandveziron, kiu ordonis la repagon. Sed la paŝao de Beogrado ne havis monon. Tiu havis nur haremon, eŭnukojn, multe da orientaj tapiŝoj kaj ceteraĵoj. Neniu volis aĉeti tiujn. Mi devis reteni ĉion por mi mem, ĉiujn objektojn, sklavojn kaj odaliskojn. Mi devis ekhavi ankaŭ la ĉibukojn. Ej, ej, ĉu vi ne volas pipfumi, sinjoro prefekto? Mi aĉetis ankaŭ tabakon en ses bareloj, nome la turkoj gardas la tabakon en barelo sed ili drinkas la vinon el ĉibukformaj bovloj, tasoj.

– Ja vi estas malica homo, kiu kion ajn esprimas – ridis la vicprefekto.

Je tio jam ankaŭ paĉjo Quendel komencis ridaĉi, havante nerazitan vizaĝon.

– Ha, ha, ha! Tio okazis ĉi tiel pro la cirkonstancoj. Ĉio kaj ĉiuj restis ĉe mi. Al kiu mi donu tiujn? Mi havas ĉi tie malgrandan arbaron, mi portis tiujn ĉi tien, por ke neniu vidu tiujn. Nome mi estas morala homo, kion ajn Vi pensas pri mi. Mi ne deziras indignigi la homojn. Ekde kiam tiuj estas ĉi tie, iom post iom ties valoroj ĉiam malpliĝas. Ja, la klimato ne estas bona, ĉefe vintre. Iu knabino tusadas de Kristnasko, kiu estis la plej bela. Sed tiel ŝajnas, ke aŭtune ŝi forpasos. Hejme la ŝafoj mortas pro la fasciozo. Alaho pereas ĉi tie, Jehova tie, nome el ledoj de la ŝafoj oni faras peltojn al la judoj. Krome ankaŭ nia Dio pereigas ion. Pasintsemajne mia farmo de Putzdorf forbruliĝis kune kun la staloj kaj domoj de la servistoj. Vi ankaŭ ne scias, ke mi havas multe da problemoj. Estus pli bone, se mi havus nenion. Sed mi devas administri kontrolante la havaĵon, ke mi vidu kiom estas, ĉar mi ŝatas la havaĵon. Pro tio mi venas ĉi tien por rigardi la knabinetojn.

- Tio estas bona, sed kio estas la opinio de sinjorino Quendel?
- Paĉjo Quendel konsterniĝis kvazaŭ serpento estus tuŝinta lian korpon.
- Ej - li diris poste kolektante kuraĝon - la edzino ne kapablas fari negocon. Ŝia opinio ne interesas min. Ja la saĝulo ne diras ĉion al sia edzino.
- Sed povas esti, ke mi diros viajn aferojn al ŝi.
- Sinjoro Quendel konsterniĝis pro ĉi tiuj vortoj kaj suspektante maltrankvile rigardis la vizaĝon de la vicprefekto.
- Kion vi povus diri kiel fakton al ŝi? Ĉu tion, ke vi trovis min en la arbaro en mia paca domo?
- Kaj vi portis vestaĵon kiel iu turka paŝao - daŭrigis Paŭlo Görgey.
- Ĉar mi ne volis trivi superflue miajn vestaĵojn. Kial tio ĉi estas problemo?
- Sed vi vivas meze de via haremo, kiun simile...
- Sinjoro Quendel protestis kaj per manoj kaj per piedoj kaj haroj liaj krute leviĝis al la ĉielo.
- Ho, ve! Ne diru plu! Ne teruru min, mia bona patrono! Ja mi estis ĉiam via fidela, entuzisma kredanto! Ne molestu min! Ja vi konas mian edzinon. Pensu pri mia edzino, ke ankaŭ vi estos edziĝinta (sed mi deziras tion) kaj pensu ankaŭ pri tio, ke ne la infero estas la plej malbona ejo, kie en kaldrono la diabloj kuiras nin (kvankam tiuj ne kuraĝos kuiri vin), sed lango de Ĵofka estas pli malbona, ol la infero. Kiun tiu lango atingas, tiu estas forpasinta.
- Paŭlo Görgey preskaŭ falis teren pro la ridego, li sidiĝis sur iun kanapon, kiu estis kovrita per persa tapiŝo. En la tapiŝo estis teksitaj frazoj de la Korano.
- Ej - ja mi nur ŝercis. - diris Paŭlo Görgey. - Mi ne volas perfidi vin. Sed mi tre ĝojas, ke la Providenco ekkonigis vian sekreton al mi, ja tiel vi gardos la mian. Vi gardos mian sekreton, mi gardos vian sekreton kaj ni gardos sekreton unu de la alia. Ĉi tiel estos certigita la diskreteco. Sidiĝu ĉi tien kontraŭ mi, sed unue donu al mi iun ĉibukon.
- Quendel nun jam iĝis tre vigla, ridetema kaj kuris kiel sciuro al la fenestro porti iun ĉibukon por la prefekto. Quendel portis ardaĵon de iu fertelero.
- Dum ĉibukumado paĉjo Quendel montris al la malfermita fenestro kaj diris intime:
- Ĉu vi ne volas rigardi al la ĝardeno?
- Kial? Mi vidas ankaŭ ĉi tiel la stelojn, la ĉielvolbaro estas sennuba kaj ne pluvos.
- Hm. Sed la lunlumo estas belega kaj la nokta aero estas pura... kaj la knabinetoj plezurbaniĝas en la lago. (Paĉjo Quendel petole palpebrumis.) Kelkaj belaj knabinetoj estas inter ili.
- Vi estas neplibonigebla friponeto!
- Rigardu kaj vi ĝojos pro la vidaĵo - ridaĉis sinjoro Quendel.

– Foriru de mi, Satano! Ne tentu min! – minacadis Paŭlo Görgey ŝerce kaj poste diris serioze:

– Nun mi estas patro kaj ne interesas min alia sento.

– Ej! Tio estas frenezaĵo! Ja ankaŭ mi estas patro, ankaŭ mi havas filinon kaj mi amas mian filinon, sed plurfoje mi povas esti patro kaj ricevas malmulte da ĝojoj. Krome mi estos patro post la morto kaj tiam la ĝojoj finiĝas.

Sed la paŝao ne kapablis delogi la prefekton. Tiu ne fidis la komunan diskretecon, kvankam povas esti, ke tio estos taŭga.

– Do, vi estas tre ege fortvola homo! En la tabako estas iom da opio, ĉar tiu estas utila. Pro la opio oni povas vidi pli multe, ol sen ĝi. Sidiĝu komforte, metu la piedojn sur ĉi tiun piedbenkon. Mi jam aŭskultos vin.

– Nun temas pri mia filino – komencis diri Paŭlo Görgey. – Mi volas konfidi ŝin al vi, kvazaŭ ŝi ne estus mia filino.

Paĉjo Quendel ekremetis. Ĉu li sonĝas aŭdante pri mirindaj aferoj? Ĉu la vicprefekto divenis lian sekreton, li primokadas, poste ĵetas tiun en la manĝrestaĵan kuvon?

– Mi ne komprenas vin – li balbutis tremetante, fermante la okulojn.

– Sed tio estas tre simpla. Ja vi tre bone scias, ke mia domo de Görgő estas senanima, malvarmhumora ursogroto. Pro tio mi sendis mian filineton al Osgyán (oŝdjan), al mia pli aĝa fratino, al sinjorino Darvaŝ. Sed la geedzoj Darvaŝ mortis hieraŭ pro la pesto kaj hodiaŭ estis la entombigo. La geedzoj Darvaŝ sendis la filineton antaŭ la pesto al sinjorino Varga, al ŝia malnova vartistineto ĉi tien al la arbaro de Szabadka. De ĉi tie mi devas forporti ŝin ien. Mi ne povas porti ŝin al Görgő, ĉar mia domo ne estas taŭga por, ke la filineto fariĝu klera fraŭlino, sed estas ankaŭ danĝera, ja la Lőcse-anoj tuj atakus mian domon. Mi povus porti ŝin al Toporc, ja sinjoro Johano Görgey amas mian filineton, sed Toporc estas pli danĝera loko, ol Görgő. Nome mia pli aĝa frato ribelis kontraŭ la imperiestro.

Paĉjo Quendel vigle moviĝis kaj iĝis ekscitita.

– Ĉu li ribelis?

– Laŭ mi post du semajnoj la tuta Hungarujo armos sin.

Paĉjo Quendel eksaltis de la seĝo kaj kuradis en la ĉambro tien kaj reen kaj vortrapidis multe da demandoj.

– Kie? De kiu? Kiel? Kiam? Kien? Kiu estris ilin?

Nome de kiu li aŭdis ĉi tiujn aferojn. Princo Francisko Rákóczi la dua marŝas kune kun la armeo el Polujo ĉe la intermonto Verecke kaj Tomaso Esze (ese) kaj mia pli aĝa frato Johano atendas ilin por aliĝi al la armeo.

– Ĉu tio estas certa? – anhelis paĉjo Quendel.

– Tio estas tute certa. – Ĉu vi fartas malbone? Sidiĝu trankvile!

– Tute ne, mi sidas bone – diris la paĉjo ekscitite, forgesante ĉiujn estimojn. –

– Ĉu mi estu trankvila nun kiel la fungo en la arbaro, kiam oni povas akiri havaĵon? Mi akiros multe da oro. Mi devas foriri. Mi estas ekscitita. Mi aĉetos bovojn, furaĝon ĝis neniu informiĝos pri la famo de la milito. Hura! Venas Rákóczi! Bonvenas la princo. Ho, ve! La malfeliĉa imperiestro havos multe da malbonaĵoj!

Li ridaĉante pensis pri multe da militkostoj kaj tuj volis jungigi. Sed Paŭlo Görgey retenis lin.

– Ho, ne! Mia amiko! Oni ne tiel batas la ciganon. Unue vi havos alian aferon – diris Paŭlo Görgey severe. – Sed nun vi nenien povas foriri. Sidiĝu trankvile!

Paŭlo Görgey diris tion ordonante kaj Quendel nevolante, tamen obeis, li falis sur la kanapon kaj aŭskultis plu la prefekton, dum liaj lipoj skuiĝadis pro la malpacienco.

– Mi ne povas porti al Toporc mian filineton, ĉar tiun la imperiestra armeo forbruligos kaj la generalo anoncos al Vieno: „La fortikaĵon de la ribelanta Johano Görgey mi okupis kaj lian familion malliberigis. „Kvankam tiu estas simpla nobel-domo, tamen en la anonco estos nomata fortikaĵo. Ĉu vi scias jam mian decidon?

– Mi scias nenion – stertoris Quendel kolere.

Sed li tuj ekkomprenis, ke li forgesis pri tio, kun kiu li parolas. Li klopodis afable plibonigi sian rimarkon:

– Kio estas en via saĝa kapo? Mi ne scias.

– Mi tiel decidis, ke vi portos mian filineton al Lőcse al la instituto de sinjorino Matilda Klöster.

– Ĉu tiel? – interdiris Quendel surpriziĝante.

– Sed jes. Nome iu ĉirkaŭbarita urbo estas pli sekura, ol iu pinarbaro.

– Hm. Ankaŭ mia filineto estas tie, sed mi estas malgrava homo. Sed vi estas malamiko, kiun oni koleras. Kio okazu?

– Oni ne scios, kies filino ŝi estas.

– Tio ne estas tiel. Oni ne povas trompi la saksulojn. Nome ili havas multe da observantoj, nu multajn okulojn kaj orelojn kaj illi ĉion kapablas diveni.

Paŭlo Görgey minacis per fingro paĉjon Quendel.

– Tiukaze ankaŭ mi perfidos al sinjorino Quendel, ke vi estas paŝao Hilil. Ĉar mian sekreton ĉiuj povas ekscii nur pere de vi.

– Prefere mi mortos, sed vian sekreton al neniu mi diros.

– Tiukaze ankaŭ mi ne perfidos vian sekreton.

– Kion mi faru? Bonvolu klarigi, kaj mi ĉion faros por vi. Mi estos pli saĝa, ol la reĝo Salomono.

– Tio estas bona. La filineton portu al fraŭlino Klöster kaj registrigu ŝin en ŝian institucion sub la nomo Rozalia Otrokóczy¹⁰⁰.

¹⁰⁰ La familia nomo Otrokóczy elparolendas: otrokoci.

- Jes, bone. Mi komencas kompreni la aferon.
- Pagu por ŝi la alimenton po duonjaroj kaj aĉetu por ŝi ĉiujn bezonaĵojn. La kostojn memkompreneble mi kompensos. Kaj se la fraŭlino dezirus scii pli multe pri Rozalia...
- La mensogadojn mi faros, ja ankaŭ mi volas ian ĝuon. Kiam mi povas ekiri? Ĉu tuj?
- Mi pensas, ke morgaŭ matene.
- Ho, ve! Tio estas malbona tempo, ĉar mi devas aĉeti avenon; sed tio estas tamen ne problemo. Do, mi ekiros morgaŭ matene, tre frue, kiam ankoraŭ ĉiuj dormas. Mi kutimis foriri frumatene, aŭ hejmenveni malfruvespere. (Sed sinjoro Quendel subite rememoris iun teruran malbonon). Mi memoris iun teruran malbonon.
- Ĉu la aveno?
- Ne. Sed mia edzino, Ĵofka, kiu samas kiel la aspido kaj estas intrigulino. La fraŭlineto scias, ke mi estas paŝao Hilil. Ŝi perfidos al mia filino kaj tiu diros al mia edzino. Pro tio mi estas en embaraso.
- Paŭlo Görgey cerbumadis.
- Ĉu ne sinjoro Varga kunportu Rozalian? Li estas honesta.
- Ne - skuis la kapon Quendel. - Li estas honesta, sed tiun ĉi aferon nobelo devas aranĝi.
- Ankaŭ tiel povas esti - cerbumadis plu Paŭlo Görgey - ke vi kunportu Rozalian al Lőcse kaj tie kunportus ŝin al iu honesta homo kaj ne al fraŭlino Kleöter. Ĉi tiel Rozalis povus paroli pri paŝao Hilil kaj la sekreton la fremdulo ne povas koni.
- Jes, sed en Lőcse neniu ŝatas min.
- Ĉu vi ne konas Petron Salitius, kiu vintre transloĝiĝis al Lőcse? Li estas advokato. Li aranĝas procesajn aferojn de la homoj. Jam li estis en Görğő ĉe mi.
- Mi konas lin, la sentaŭgulon, - diris kolere paĉjo Quendel. - Mi komisiis al li akiri mian postulon de Konrad Krumholc), 128 orajn forintojn. Li ne sciis akiri tiun. Do, mi diris al li, ke li almenaŭ akiru la duonon de la monsumo kaj donu al li novan kontrakton. Pentekoste mi renkontiĝis kun li kaj mi demandis: „Ĉu vi aranĝis mian aferon?” Kaj la impertinenta tion diris: „Mi akiris la duonon de la mono, la mian, sed la vian ne.” Nu, mi ne okupiĝas plu kun tiu homo. Sed mi havas fratinon, Anĉura, kiu estas vidvino en Gorafalva. Mi kunportos la fraŭlinon al ŝi. Mi diros al ŝi, ke ĉi tiun fraŭlineton, Rozalian Otrokoczy, ŝi portu al Lőcse al fraŭlino Klöster kaj pagu la sumon, kiun fraŭlino Klöster diros. Anĉura ne ŝatas mian edzinon kaj ne klaĉas. Ĉu tio estos bona?
- Paŭlo Görgey kun ĝojo premis la manojn de la paĉjo hungarmaniere kun forta manpremo.

– Tio estos tre bona. Cetere mi klarigos al Rozalia esti saĝa, ĉar la malsaĝo povas fari danĝeron. Ŝi estas saĝa infano kaj komprenos la situacion. Kaj vi faros al mi bonon, kiun pro tio mi nun tuj povas danki.

– Vi nun tuj povas danki tion.

– Ĉu mi? Kiel? Kion mi povas doni, ja ĉion vi havas.

– Tamen, vi povas doni ion, kion mi tre ŝatus havi longtempe.

– Kion? – demandis Paŭlo Görgey scivole.

– Cidiru ni unu la alian – diris Quendel silente, senteme. – Ĉu vi permesas tion?

Paŭlo Görgey ridetis subtaksante, sed liaj okuloj estis orgojlaj. Tamen li denove manpremis kun li.

Tio estas memkomprenebla – li respondis intime. – Ja, ĉiuj homoj faras oferon por sia infano. (Veras tamen, ke ĉi tiun oferon li ne volonte faris.)

Sed ĉi tiu afero ne malbonigis la bonhumoron de Quendel. Tiu ŝatis la sukceson, sed li ne okupiĝis pri tio, kiel formiĝis la sukceso. Nome eĉ la planto ne okupiĝas pri tio, pro kio ĝi kreskas: pro la sunlumo, aŭ pro la varmo. Tiu diris gaje, kiam li batis sur la ŝultron de Paŭlo Görgey:

– Saluton! Vicprefekto! Ci estas petola kaj mi esperas, ke ci restas ĉe ni por partopreni iun modestan vespermanĝon. Kaj li trabrakumis senvorte la vicprefekton kaj kisis ambaŭ vangojn.

Paŭlo Görgey surpriziĝis kaj retiriĝis serĉante pretekstojn por rifuzi la invitadon.

– Tion mi ne povas fari, ĉar mi ne povas ofendi la geedzojn Varga, ja sinjorino Varga jam faras la vespermanĝon. Nome ili estas bonaj homoj, krome mi devas priparoli kun mia filino kelkajn aferojn.

– Ej, tio estas frenezaĵo! Restu! Ni amuziĝos tre bone. (Li petole palpebrumis, liaj okuloj similis al la okuloj de linko.) Mi vokos ilin, mia frateto!

– Kiujn?

– Do, la odaliskojn, ili dancos la bajader-dancon. Tio estos belega.

Sed Paŭlo Görgey ne lasis sin delogi, subskribigis la pesto-slipon, kiun li ricevis de la juĝisto de Rimaszombat. Pri kelkaj aferoj ili interkonsentis. Poste la vicprefekto forlasis la plezurdometon. Li donis unu taleran drinkmonon al la eŭnuko, kiu staris ĉe la pordego por lasi eliri el la kastelo.

Laŭ ordono de Alaho vi povos iri en la paradizon sur la dorso de dromedaro – dankegadis la eŭnuko.

Sinjoro Varga klarigis la diron de la eŭnuko: „La vojaĝo en la paradizon estas plurtaga. Apud la vojo estas altaj fruktoarboj, sur kiuj estas multe da fruktoj. La arboj donas ombron, sed la fruktoj estas atingeblaj nur tiam, se la veturanto sidas sur dorso de dromedaro. La piedirantojn turmentas malsato. Pro tio la turko iranta eĉ ne en la paradizon ŝatas iri perpiede.

11-A ĈAPITRO

Rozalia Otrókóczy estos svatebla fraŭlino

Paŭlo Görgey estis singarda kaj ĉirkaŭrigardanta dum la antaŭpreparo de ilia forveturo. Li sendis antaŭen sinjoron Preston per la ĉaro al la drinkejo de Szabadka, dirante, ke li promenas ĝis la drinkejo, ĉar la promeno bonefikas por la ostoj. Post la matenmaĝo – kuminsupo kaj ŝinko – Rozalia plorante adiaŭis la gesinjorojn Varga kaj ekiris perpiede al la landvojo sur la pado. Multe da birdoj pepis, la herbaro estis rosa kaj aperis la ruĝa disko de la suno, kies lumo videblis inter la arboj. Sinjoro Varga kriis al ili kaj postkuris. Li havis iun raran piroforman ŝtoneton, kiu troviĝis en iu minejo. Tiu estis kvazaŭ figurinta Sanktan Virgulinan Marian kun la infano. Li aĉetis tiun en Selmecebánya¹⁰¹ kontraŭ kelkaj groŝoj, kiam tie li lernis la arbarkulturon. Li ĝis nun gardis tiun zorgeme en iu kesto. Kaj li tiel decidis, ke tiun li donacos al la fraŭlineto, ĉar ĉi tiu rememorigos ilin, kiuj ŝin tre ege amis. Similan donacon ŝi certe ne ricevos en Görgő.

Dum sinjoro Varga transdonis al ŝi la ŝtoneton, sinjorino Varga gestadis per sia tuko starante ĉe la pordo de la vestiblo kaj komencis kriadi:

– Bonvolu skribi, mia karulino. Kvankam mi ne scias legi, sinjoro Varga legos tion. Sinjorino Varga diris tion plurfoje, sed la foririntoj ne povis aŭdi, ĉar la arboj sorbis la vortojn.

Poste ili disiĝis unu de alia, sed ili iris nur ĝis la turka kolono. Paŭlo Görgey sidis sur la piedestalon de la kolono. Rozalia kolektis florojn, kamomilojn, nigelojn kaj faris el tiuj florbukedon. Ŝi trovis ankaŭ boletojn. Fine paĉjo Quendel alvenis per la ĉaro tirate du ĉevaloj. La maljunulo portis vestaĵon faritan el veltolo kaj sur la kapo estis pajloĉapelo de la setlejo Klenóc.

Li haltigis la ĉevalojn ĉe la kolono.

– Bonan matenon, vicprefekto! Kiel ci dormis? Mi tion kredis, ke vi estas ankoraŭ en la lito. Sidiĝu sur la ĉaron. Kaj ankaŭ vi, mia fraŭlineto, sidiĝu!

Quendel vigle desaltis de la ĉaro kaj ekkaptis la talion de la fraŭlino kaj levis ŝin sur la ĉaron. Li sentis la rosan korpon, bonodoran hararon, sed la erotikaj ekscitoj ĉesis kaj restis en li la karesemo. Pri la fraŭlino li jam ne sentis eksciton. Eĉ ne la alkoholistoj estas soifa, se la altara sankta kaliko estas en lia mano kaj en la kaliko estas bonodora vino.

Paŭlo Görgey sidiĝis sur la ĉaro apud sian filinon kaj paroladis pri indiferentaj aferoj. Rozalia estis informita pri ĉio. Ŝi kondukis kiel iu saĝa fraŭlino, kiu nun

¹⁰¹ Pri Selmecebánya, vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Banská_Štiavnica

komencas la mondan vivon. Proksimiĝante al la drinkejo de Szabadka¹⁰², la vicprefekto diris adiaŭon kaj al sia filino kaj al sinjoro Quendel.

– Kiam mi vidos vin?...

– Mi ne scias – diris li al sia filino. – Sed mi pensos ĉiam pri vi. Mi neniam forgesos vin.

– Estu bona kaj fortkaraktera kaj nun donu al mi tiun florbukedon.

Rozalia eklarmis. Ŝi transdonis la florbukedon, la kapon de sia patro ŝi tiris al si kaj flustris:

– Mi pensis ion. Bonvolu porti tiun ĉi florbukedon sur la tombon de la juĝisto, kiun vi mortpafis, pro kiu vi kaj mi devas sekretadi kaj kaŝvagadi. Tiu vojo pardonos vin kaj ĉio estos en ordo. Mi donas al vi ankaŭ la fungojn.

Paŭlo Görgey treege emociiĝis. Li ne sciis respondi, nur transprenis la florbukedon kaj la fungojn. Poste li igis ekhalti la ĉaron de Quendel kaj hastis al la drinkejo de Szabadka, kie Preston atendis lin. Nun jam oni lasis lin foriri laŭ la atestilo de paŝao Hilil.

– Sed nun jam pelu la ĉevalojn kaj ni iru hejmen!

Sed jam antaŭ la limo de Rimaszombat¹⁰³ la alia ĉaro postlasis ilin.

– Mi estu diablo – diris Preston – ekkonante la mastron – se tiu ne estas sinjoro Quendel.

– Ĉu jes? – ruzadis Paŭlo Görgey – vi havas bonajn okulojn. Kiu sidas apud li?

– Povas esti, ke ŝi estas lia edzino.

– Hm. Vere vi havas bonajn okulojn.

Quendel estis vera komercisto. Li tre ŝparis, sed multe da mono malŝparis. Liaj malŝparadoj estis enspezo-riĉaj. Li facile sciis akiri multe da monoj, ĉar li konis la manieron por akiri ĝin. Li kelkajn horojn restadis en Rimaszombat kaj aĉetis avenon por siaj ĉevaloj kaj aĉetis bovojn de la komercisto kaj marĉandis por novaj bovoj. Poste li plu iris al la sekva urbo. Same li faris dumvoje novajn kontraktojn kaj nun jam, kiam li preskaŭ alvenis al sia pli aĝa fratino kun sia bela protektato, en la arbaro de Ljeŝkova du sovaĝaspektaj slovakoj subite haltigas ilin. Ili portis malpurajn rimensuojn kaj larĝajn ĉapelojn. Ilia ventro estis nuda kaj ili havis pistolojn kaj tranĉilojn.

– Haltu! – ili kriis minacante.

Unu homo ekkaptis la bridon de unu ĉevalo kaj la alia detranĉis la rimenojn de la tirrimenoj. Paĉjo Quendel ne perdis sian animregadon, sed afable komencis konvinke trakti kun ili.

– Kion vi volas fari, miaj karaj filoj? Ja mi havas nenion, mi savas mian filineton de la pesto. Kion vi faras? Ne tranĉu la tirrimenojn! Ne faru malbonon al

¹⁰² Tiu loko Szabadka estas parto de la urbo Rimaszombat, laŭ la hungara Vikipedio: <https://hu.wikipedia.org/wiki/Rimaszombat>

¹⁰³ Pri Rimaszombat, vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Rimavská_Sobota

mi. Ĉu vi havas animon? Mi ne volas forfuĝi. Mi ekhaltis laŭ via ordono. Ni parolu saĝe! Ni komprenu unu la alian.

Poste li turnis sin al la filineto, kiu estis pala. Li tremante diris hungare: „Ne timu, mia filineto!” Kaj poste li slovake diris: „Ili estas bonaj homoj kaj ne batos nin!” Poste, li diris al la slovakoj: „Mi ne havas multe da mono, nur sume kvar forintojn, mi donas tiujn al vi. Ĉu mi prenu mian pistolon?”

– Estu en silentu! Ne provu moviĝi! Ni volas forporti nur viajn ĉevalojn! Nome la soldatoj persekutas nin – diris la pli dika betjaro.

– Ho, ve! Mia Dio! Ne lasu nin solaj ĉi tie sur la landvojo! Mi estas maljuna kaj la filineto estas malsana. Pripensu tion, ja ankaŭ vin patrino naskis.

– Ne babilaĉu multe! Mi menciis, ke por ni estas bezonataj viaj ĉevaloj.

Kaj la betjaroj saltis en la selojn kaj forgalopis, lasantaj ilin solaj la plorantan paĉjon Quendel, kiu minacadis.

Quendel furioziĝis, blasfemis, ŝiris sian hararon, desaltis de la ĉaro, volis ĵeti ŝtonojn al la betjaroj, sed li ne povis levi tiujn, ĉar tiuj estis tre pezaj. Tial li senpove grincigis siajn dentojn.

Rozalia, vidante la foriron de la betjaroj, iĝis kuraĝa kaj tuj iĝis ankaŭ scivola.

– Oĉjeto, ĉu ili estis rabistoj?

– Jes. La korvo piku iliajn okulojn.

– Ĉu ili estas veraj rabistoj?

– Jes. Certe ili apartenas al la bando de la misfama Ŝafranĵik. Ho, ve!

– Sed ili ne mortigis nin.

– Sed tio estas tre malbona, ke ili forportis miajn ĉevalojn.

– Ĉu ili mortigos la ĉevalojn?

– Tio ne interesas min – li respondis kolere pro la naiva parolo. – Tio estas malbono, ke ni ne povas pluiri per la ĉaro kaj tio estas fakto, ke ni estas en terura situacio.

Ili vere estis en malagrabra stato. Ili estis meze de iu arbaro, la vilaĝoj estis tre malproksime kaj tuj venos la sunsubiro. Sinjoro Quendel rigardis ĉirkaŭen maltrankvile. En la profunda arbaro estis solena silento. Bruoj de la forrabitaj ĉevaloj jam ne estis aŭdeblaj. Nur sur la ĉielo estis kelkaj nigraj nuboj, sur kiuj fulmoj videblis. Post la fulmoj sekvis tondro. Granda tempesto preparis sin.

– Ankaŭ Dio agas kontraŭ ni – murmuris Quendel. Ĉu mi ne preĝu al Dio? – demandis la filineto, kunpremante la manojn.

Quendel ne respondis. Li provis tiri la ĉaron, sed ĝi ne moviĝis.

– Mi ne kapablas tiri ĝin, ja mi estas tre maljuna – li ĝemis rezigne.

– Ĉu ni iru plu perpiede? – proponis Rozalia. – Mi ŝatas perpiedi.

– Mi ne povas iri perpiede – stertoris Quendel. – Nome miaj dokumentoj pri miaj aĉetadoj de bovoj kaj miaj oraj – kaj arĝentaj havaĵoj estas en kesto de la ĉaro. Mi havas mil bovojn laŭ la dokumentoj, sed nun bone estus havi mur unu

bovidon, kiu tirus la ĉaron. Mi ne kapablas kunporti la keston, sed tiun mi ne povas lasi ĉi tie. Mi esperas, ke oni vere persekutas la betjarojn, pro kio ili devis forporti la ĉevalojn. Nome se oni ne estus persekutinta ilin, tiam ni estus trankvile kunportintaj la enhavon de la kesto. Do, prefere ni atendu iomete anstataŭ preĝado. Ni komencu kriadi. Povas esti, ke la persekutantoj ekaŭdas tion. Bedaŭrinde mi ne kapablas krei, ĉar mi estas raŭka.

– Helpon! Helpon! – kriis Rozalia obeeme, sed la malforta voĉo ne ĝenis la silenton de la arbaro.

Ankaŭ la turdo fajfis plu.

Ili tre aŭskultadis, sed la arbaro estis silenta.

– Mia edzino estus kapabla bone kriaĉi – diris sinjoro Quendel al si – via voĉo estas malforta.

Ĉu vi ne havas pistolon? – demandis Rozalia.

– Mi havas tiun.

– Do, ekpafu! Tiu donas fortan sonon.

– Vi pravas. Sed mi diras sincere, ke tiun pistolon mi ekuzis neniam. Mi hontas.

– Ĉu vi ne havas kuraĝon ekpafi tiun? (Ŝi ridetis nun unuafoje dumvoje.) – Donu al mi kaj mi ekpafos per ĝi!

Quendel prenis la pistolon singarde kaj transdonis tiun al la fraŭlino.

– Sed estu singarda por ne vundi vin. Kion mi povus diri al via paĉjeto, al mia kara bona amiko? Ho, ve! Kion li dirus, se li sciis nian danĝeran situacion.

Rozalia prenis kuraĝe la ornamitan pistolon, kiu havis arĝentgarnaĵon, sur kiu estis araba skribaĵo. Ŝi ekstaris sur la ĉaro kaj pafis al la arbaro, kie tri arboj estis unu apud alia. La pafo havis fortan sonon kaj la kuglo penetris en la mezan arbon. Ili rimarkis, ke en la mezan arbon estas farita kavo kaj en tiu estas iu fertabulo, sur kiu estas bildo de la Virgulino Maria. Sub la bildo estas iu meĉo. La popolo signas ĉi tiel tiun lokon, kie iu malfeliĉaĵo okazis. Ĉi tie oni mortigis iun riĉan ĝiban ŝafiston pro venĝo antaŭ unu jardeko. Sur lian ĝibon la nekonata mortiganto metis liajn sesdek arĝentajn talerojn, dirante, ke li nur murdi volis, la mono ne estas bezonata. Certe la familianoj metis tien la sanktan bildon kaj la meĉon kaj ili vizitas ĉi tien Tage de Ĉiuj Sanktuloj.

Quendel nun rememoris la okazintaĵon kaj hastis al la arbo. Li malbonhumore kapbalancis.

– Cent Dioj! – Quendel blasfemis slovake – ĉu vi scias, fraŭlineto, ke vi trafis la koron de la Virgulino Maria?

Rozalia terurigis, ŝi rigardis la arbon, kvazaŭ ŝi estus farinta pekon.

– Ho, ve! – Ŝi balbutis kaj tremetis. Ĉu tio signifas malbonon?

– Mi ne estas superstiĉa. Tio signifas nur tion, mia karulino, ke la kuglo ne havas cerbon. Pli ĝuste ĝi signifas bonon, ĉar mi rememoras iun malfeliĉaĵon, kiu

okazis sub ĉi tiu arbo pri iu ŝafisto. Kaj mi scias, ke ĉi tie en la proksimo estas la ŝafejo de la familio-Szirmay (sirmai). Tie la ŝafisto certe havas azenojn. Nu, mi iros tien, por aĉeti azenojn, aŭ mi portos helpantojn. Bonvolu resti ĉi tie kaj gardi la ĉaron, vi estu sub la ĉaro kaj ne iru sub la arbon, ĉar la arbon povas trafi fulmobato.

Poste la maljunulo tute juniĝis pro la penso kaj ekiris al la monteto. Li nur kelkfoje haltis por ripozi, ĉar li havis pulman emfizemon. Li faris bastonon el avelbranĉo por si helpi la iradon. Kiam li rerigardis, li vidis la fraŭlineton genuante preĝi antaŭ la sankta bildo. La subiranta suno faris brilan glor-kronon ĉirkaŭ la kapon de la fraŭlineto. Ŝia hararo iĝis orkolora.

– Vi povas preĝi, eta naiva knabineto, – murmuris moke la maljunulo – ja la Virgulino Maria iĝis via malamiko. Ŝia helpo ne estos bona. Sed la preĝantino kredis la bonon de la preĝo. Ŝiaj violkoloraj okuloj estis piaj kaj ridetis sur la pupeton, kiu estis sur ŝiaj brakoj.

– Ho, ve! Sankta Panjeto, Virgulino Maria! Pardonu mian kulpon, ĉar mi trafis per pistolkuglo vian sanktan korpon. Mi ne volis bati vin. Ne batu min, ja mi estas malfeliĉulino. Mi ne havas patrinon kaj ankaŭ mia patro estas malfeliĉulo. Mi scias, ke vi sidas apud la trono de Dio kaj kune kun li vi aranĝas nian sorton. Mi scias, ke via filo mortis por ni. La doloro de via filo estas tre granda, ankaŭ la mondo sentis tiun doloron kaj sentis ankaŭ mi tiun, kiu estas orfa. Akceptu ankaŭ min kaj demandu Dion pri mi, laŭ kiu mi estas bona. Mi petas vin savi min, ĉar mi estas sola en ĉi tiu arbaro. Sendu por mi helpon...

Ŝi mute balbutis ĉi tiujn vortojn, sed povas esti, ke ŝi nur pensis tiujn. Sed dume sonorileto aŭdiĝis, kvazaŭ ŝi estus en la templo de Osgyán kaj la messervantoj skuus la sonoriletojn ĉirkaŭ la pastoro.

Rozalia alarmiĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Quendel ne estis videbla. Kie tiu estas? Dio scias. Sed la sonoriletoj aŭdiĝis ĉiam pli akre. Poste sur la montoflanko videblis du nigraj ĉevalkapoj. La ĉevaloj tiris iun matokovritan ĉaron. En samaj ĉaroj oni portas la tolojn, punktojn al la provinco de Danubo el la Departemento Sepeŝ. Oni nomis tiujn: ĉaroj Molitoris. Tiuj estas konataj tutlande. Krome la vendantoj de vakso kaj la potistoj faras samajn longajn rondveturojn por vendi la varojn. Sinjoro Molitoris sendas ĉi tiujn ĉarojn ĝis Beogrado, Vieno, Buda, portante ankaŭ studentojn kaj ceterajn veturantojn kaj somere kaj aŭtune. Tio estas granda entrepreno. Ĉiutage kvar ĉaroj ekiras de Lőcse. Planitaj estas la haltejoj, kie okazas manĝadoj, ripozoj de la ĉevaloj kaj la geveturantoj kaj la informado de la pasaĝeroj. La veturkoston la entrepreno certigas kaj la hejmanoj repagas la kostojn. La konsilantaro de Lőcse prizorgas la vivkapablon de la entrepreno kaj determinas la nombron de la geveturantoj. Se estas bezonate, tiam pluse unu veturanto estas portebla. Sed ĉar la entrepreno protektas ankaŭ la ĉevalojn, pro tio ĝi ordonas, ke la geveturantoj alterne perpiedu apud la ĉaro,

sed la distanco dependas de la persono. (Tio ĉi ne estas iluzio, ja la libereco igas la homon feliĉa.)

Nun ĝuste apud la tenda ĉaro iu diktrunka homo perpiedis, portante iam elegantan sed nun jam foruzitan vestaĵon. La ĉaro iris pli rapide de la monto kaj la ŝvitintaj ĉevaloj devis iri pli rapide. La sonoriletoj ĉirkaŭ la kolo de la ĉevaloj sonis pli gaje. La piediranta homo nur pli malrapide povis iri, flanke de ĉapo estis metita iu verda ŝoso. Sed la piediranto tute ne malĝojadis, eĉ kantis. La kanton la arbara eĥo volis ripeti.

„Kara Sepeŝ, dum vi prosperis,
en histori' multe skribitis.”

La vidaĵo de la ĉaro aspektis antaŭ Rozalia kiel miraklo. Certe la Virgulino Maria sendis la helpon. Nu, nun tuj ĝi malaperas. Ŝi fermis la okulojn, sed la sonorileton kaj la hufobatojn de la ĉevaloj ŝi aŭdis. Ĉu tio estas tamen realaĵo? Ho, ve! Ĉio mutiĝis, la miraklo havis finon.

Ŝi malfermis la okulojn. La sonoriloj de la tenda matokovrita ĉaro ekhaltis apud la ĉaro kaj iu blonda junulo tuj malkaŝis sin de sub la tendo kaj desaltis de la ĉaro.

– Kio okazis ĉi tie, fraŭlino? – li demandis junvoĉe.

Rozalia surpriziĝis, emociiĝis kaj apenaŭ povis respondi.

– Rabistoj atakis nin!

– Tuj mi pensis. La tirrimenoj estas fortranĉitaj. Ili forportis la ĉevalojn. (Li ĉirkaŭrigardis maltrankvile) Kio okazis pri viaj kunuloj? Ja vi estas tute sola.

– Amiko de mia patro estas mia kunulo, kiu iris al iu proksima ŝafejo por akiri ĉevalojn.

– Kie estas la koĉero?

– Li estas la koĉero.

La junulo rimarkis la sinjorinan vestaĵon de la fraŭlino. Ĉu li estas amiko de via patro? ... Kiu vi estas?

Rozalia hezitis diri ŝian nomon, kaj ruĝiĝis. Ŝi devis mensogi unuafoje dum sia vivo.

– Ne timu min, mi kompatas vin kaj volus helpi.

– Mi estas Rozalia Otrokóczy – ŝi diris mallaŭte, ŝi klinis sin kiel ŝi lernis de onklino Katarina.

– Mia nomo estas Fabricio – diris la junulo kaj klinis sin.

Dume ĉiuj desaltis de la ĉaro kaj estis gajaj. Ili ĝuis la veturadon pli bone, ol en la nuna vagonaro. Tropko, la koĉero, ĉion rakontis pri la regiono, ekde tiu, de kie li portis la geveturantojn. Li rakontis pri iu granda arbo, pri malnovaj kasteloj, pri Paŭlĉjo Umrik, kiu pendigis sin, pri Gabrielo Andraŝŝi kaj Petro Balaŝŝa, kiuj amis la edzinon de la juĝisto de Putnok kaj unu el inter kiuj devis morti. Li

rakontis pri iu junpaŝtisto, kiu serĉis fungojn antaŭ kvindek jaroj. Li ne trovis fungon, sed li trovis iun kaldronon, en kiu estis multe da ormoneroj. Li fariĝis la unua Szerencsy¹⁰⁴, kies filo iĝis vicprefekto de la departemento Torna.

La pasaĝeroj de la tenda ĉaro treege al kutimiĝis unu al alia dum la longa veturado. Kelkfoje ili diskutadis malagrabla, sed almenaŭ ne enuis. Apud Tropko, kiu bone konis la regionon, sinjoro Klebe, la kontrolisto, estis la ĉion sciinto de la societo, kiu prezentis siajn geografiajn konojn: vidindaĵojn de la valoj. Li rakontis, ke en Ĵaluĵanj estas bona vino, la homo estos ebria de la efiko de unu glaso da vino kaj ekdancas. Li diris, ke en Livénj estas belaj fraŭlinoj, kiujn la turka sultano aĉetas pere de sia agento. Oĉjo Klebe bone konas la riveretojn. Li scias, ke en la riveretoj estas trutoj, kankroj, karpoj. Li rakontis, ke en iu rivereto apud Majca oni trovis orpolvon, sed la germanoj, portu ilin la Diablo, (li diris tion, sed ankaŭ li estis germano) ĝin same malkovris, kaj malpermesis la serĉon de la orpolvo. Nun la germanoj serĉas minejon pri oro en tiu ĉi regiono.

La ekhalto de la ĉaro Molitoris kaŭzis multe da demandoj. Kio ĝi estas? Kio okazis? Ĉu rabado okazis? Iu ĉambristino svenis, kiu estis ĉambristino ĉe sinjorino Csáky kaj nun iras servi aliulon. Oni vekis ankaŭ la horloĝiston, kiu nokte riparigis multe da horloĝoj kaj nun dormis: „Vekiĝu, sinjoro Kindronai, okazis rabado!” Li eksaltas, prenas sian lignokeston, en kiu estas la iloj.

Iu dika, aĝa sinjorino, kiu jam desaltis de la ĉaro, kunfrapas siajn mankavojn ektimante:

– Ho, ve! Jam duafoje ĉi tio okazas pri mi. Kie ni estas?

Neniu okupiĝas pri ŝi spite de tio, ke ŝi estas grava persono. Nome ŝi estas la fama sinjorino Vilner, sciencistino de Lőcse, kiu helpis ĉe la nasko de ĉiu nobeldomo. Subite la geveturantoj de la tenda ĉaro demandas multon de Rozalia. Ŝi vidis, ke ankaŭ nun la geveturantoj desaltas de la ĉaro. Iu bonaspekta komercisto de Korpona rapide deprenas pistolon el la poŝo. Iu muskolhava fraŭlo, kupristo, preparas sin lukti kontraŭ la rabistoj.

– Kie estas la rabistoj? Kiom da personoj estis? Ĉu ili ne revenos? Mil diabloj! Estus bone, se ili revenus!

– Du personoj estis – respondis Rozalia.

– Ĉu nur? – diris la kupristo, deprime. – Ili ne kuraĝas reveni. Metu en la poŝon la pistolon!

– Ni iru enlitiĝi – diris la horloĝisto.

– Vi povas reiri – diris la muskolhava kupristo moke – sed ni ambaŭ, la komercisto kaj mi, ni povas defendi la fraŭlineton.

Ĉi tiu rimarko ĉagrenis tiun viron, kiu kantis apud la ĉaro. Li estis Danielo Molička, la kantoro de Rozsnyó. Li klopodis atingi la urbon Lőcse dume

¹⁰⁴ La familio-nomo Szerencsy elparolendas: serenĉi.

ekzercante sin pri la kantado. Nome la pli frua kantoro de Lócse pro iu inflamo mortis, sed ĝi sekretigis la kaŭzon de tiu, nome la brando ekbrulis en li. Nome li ne havis renomalsanon, encefalopation kaj pulmiton.

– Nu, ne fanfaronadu sinjoroj! Ankaŭ mi havas bonan ilon kontraŭ la rabistoj.

– Ĉu vian ruĝan nazon? – spritis la muskolhava kuprista fraŭlo. – La betjaro ne timas ruĝan nazon.

– Mia psalmo estas, la „Nia dio estas nia forta fortikaĵo“. Se mi kantas tiun, tiam la betjaroj ne batas nin. Tio estas elprovita!

La komercisto ridetis, dum sinjorino Vilner kaj Klebe demandadis Rozalian. Kien ili kuris, la rabistoj? Kion ili diris? Kion ili forportis? Kia estis ilia vestaĵo? Ĉu ili estis junaj, aŭ maljunaj? Kiam foriris oĉjo Quendel? Kion li volas fari?

– Ŝi diris, ke li volas aĉeti ĉevalojn, aŭ azenojn.

– Do, li havas monon. Ĉu la monon ili ne forportis?

– Ne. Sed tiu proponis al ili.

– Ĉu la mono ne necesis al ili? Tio estas stranga.

– Jes.

– Jes. Li diris, ke li havas kvar forintojn.

– Kvar forintojn – kriis la horloĝisto. – Tio estas malmulte da mono. Mi komprenas. La buboj estis memkonsciaj. Por tiom mi ne riparas malnovajn horloĝojn.

– Mi tre miras, ke ili ne forrabis vin. – diris sinjorino Vilner subtakse al Rozalia.

– Nome la banditoj tre ŝatas fraŭlinojn. Sed la gustoj de la homoj estas diversaj. Sed dum mia junaĝo...

Fabricio kolere diris al sinjorino Vilner:

– Ej, sinjorino Vilner! Ĉu vi ne vidas, ke ŝi estas elita fraŭlino?

– Mi vidas nur tion, ke oni forlasis ŝin ĉi tie – replikis sinjorino Vilner. – Kaj mi scias, ke dum mia fraŭlinaĝo la studentoj ne estis orgojlaj. Ankaŭ mi estis juna fraŭlino, kiam sur la vendoplaco de Lócse heltage iu juna imperiestra kapitano levis min en la selon kaj kungalopis. Tio okazis antaŭ la domo de Teóke. Estis feliĉo (aŭ malfeliĉo), ke mia karmemora patro faris grandan bruon, je kio la urbaj hajdukoj saltis en la selon kaj persekutis nin. La kapitano, vidante la persekutadojn, kisis miajn buŝon kaj vangon kaj ĝemetante mallevigis min sur la vojon. Ej, nu, la fraŭlino vane ridaĉas... (sinjorino Vilner turnis sin al la ĉambristino de sinjorino Csáky, ridetante) nome tio okazis kiel mi diris.

Oĉjo Klebe, la ĉefo de la ĉaro Molitoris, mishumore maĉadis siajn lipharojn.

– Via oĉjo ne povos aĉeti azenojn, se li havas nur kvar forintojn. Tio estas tre malfacila situacio.

– Kion ni povas fari pri ili? – cerbumadis la muskolhava kuprista fraŭlo. – Mi kompatas tiun ĉi fraŭlineton.

– Ni kolektu monon por ili. iniciatis la bonhumora komercisto. – Mi donas unun taleron.

– Tio ne helpas. – diris Fabricio, – ja ne estas certe, ke iu havas kvar forintojn, kiam ni estas en la mezo de la arbaro de Ljeskova. Male estus pli bone, kunporti ŝin kaj la maljunulon ĝis la unua vilaĝo, kie ili trovos azilon.

– Mi protestas, – diris la kantoro, – nome la ĉaro tute plenpleniĝis, eĉ unu homo devas perpiedi. Kiu volas piediri anstataŭ la fraŭlineto? Mi volas piediri – respondis Fabricio.

– Hm. – murmuris sinjorino Vilner – Li ekamis la kateton.

Rozalia dankeme rigardis al Fabricio. Nun ŝi rimarkis unue, ke tiu fraŭlo estas belega. Ŝi iĝis kuraĝa kaj timis neniun.

Ĉiuj rigardis al Klebe, kiu tiris la ŝultron. La ordo estas ordo, sed se ĉiuj volas ĉi tiel... – Ni voĉdonu – urĝis la bonkora komercisto.

– Mi kontraŭas tion – protestis la kantoro.

– Nu, ne saĝumu – trankviligis la komercisto la kantoron kaj proponis fumi al li tabakon. Estu bonanima.

La kantoro indignante rifuzis la regalon de la tabako.

– Neniu povas korupti min.

Poste la komercisto donis al la kantoro sian ladbotelon.

– Ĉi tiun gustumu kaj estu amikeca kaj bonanima.

La kantoro ekridetis, ekskuis la ladbotelon kaj sentis, ke en ĝi estas multe da vino.

– Do, en ĝi estas vino – diris la kantoro kaj komencis drinki la vinon el la ladbotelo kaj drinkis ĝis li sentis la vinon. Lia adampomo signis la glutojn. Poste la malplenan ladbotelon li redonis al la komercisto.

– Kion vi opinias pri ĝi?

– Tio estas bona vivo.

– Mi ne tion demandis, sed vin. Ĉu ni povas kunporti la fraŭlineton?

– Ankaŭ tio estas bona.

Oĉjo Klebe iomete freŝigis sian nazon per naztabako kaj komencis saĝumadi.

Ja la fraŭlineto havus lokon en la ĉaro, sed ŝi ne povas foriri sen oĉjo Quendel. Sed tiu ne estas ĉi tie... (Paĉjo Klebe suĉis naztabakon en la nazon kaj iĝis pli saĝa.)

– Ni devas atendi oĉjon Quendel. Ĉu estas inda atendi tiun, ja baldaŭ estos tempesto?

Sed oĉjo Quendel volus kunporti sian ĉaron. Do, kion fari? Mi kompatas ilin, sed nenion ni povas fari.

– Vi pravas! Ni ekiru! – la akuŝistino urĝis la koĉeron Tropkó.

Oĉjo Klebe konvinkis la aliajn, tiuj ne kontraŭis kaj ne povis kontraŭi.

– Enĉariĝu! – ordonis Klebe.

Rozalia timeme rigardis al Fabricio.

Konsideru la aferon, oĉjo Klebe! – li turnis sin al la posedanto de la ĉaro.

– Mi decidis: Ni ekiros. Enĉariĝu!

La koĉero prenis la vipon. Kelkaj pluvogutoj falis sur la ĉaron.

Fabricio levis la kapon kaj diris severe:

– Mi nun ordonas al vi, sinjoro Klebe, atendu pacience. Mi decidis pri la ekiro. Ĉu vi komprenis?

La pasaĝeroj surpriziĝis. Ili pensis, ke la studento freneziĝis. Li ekamis la fraŭlineton.

– Vi povas ordoni al la kato – murmuris Klebe la kapon balancante. – tio ĉi estas nekredebla.

Fabricio prenis iun dokumenton el la poŝo kaj transdonis al oĉjo Klebe.

Legu ĝin! Oĉjo Klebe finlegis la dokumenton ankaŭ dufoje kaj poste redonis al Fabricio, levante sian ĉapon:

– Mi obeas al vi ĝismorte.

La dokumenton la imperiestro subskribis kaj temis pri tio, ke Antonio Fabricio iĝis plenaĝa kaj de la imperiestro iĝis senatano de Lőcse.

La kantoro kaj la aliaj, ankaŭ sinjorino Vilner, la sciencistino miris pri humiliĝo de Klebe, kiu ŝatis la tiranan sintenon. Sed povas esti, ke sinjoreto Fabricio estas diabla migranta studento – diris sinjorino Vilner moke, – ĉar vi humiliĝis antaŭ li. Oĉjo Klebe ankoraŭ ne rekonsciiĝis kaj nur dupis-gapis. Ja se tiu ĉi studento estus diabla migranta studento, tiam li direktus nur la venton kaj la nubojn. Sed li ordonas al unu tuta urbo, ja li estas senatano de Lőcse (leĉe).

– Kiu diras tiun ĉi frenezaĵon? – ridegis sinjorino Vilner.

– Tion diras Leopoldo, la imperiestro de Romo.

Sinjorino Vilner paliĝis kaj la kantoro iĝis senkonsila. La aliaj surpriziĝis kaj interesiĝis. Rozalia tre ĝojis. La kupristo miris pro tio, ke al iu malfortika homo iu dokumento povas doni grandan potencon. Oĉjo Klebe estis kontenta kaj karesis sian submentonon kiel iun drapon por determini ties kvaliton.

– Hm, hm – diris oĉjo Klebe – sed tamen estas strange, ke vi ne diris al ni, ke vi iĝis senatano, kvankam vi veturis kun ni. Ni estimus vin pli bone.

Fabricio modeste ridetis.

– Vi ne devus estimi min, paĉjo Klebe. Mi pagis saman monsumon kiel la aliaj por la veturado. Mi havas saman rajton kiel la aliaj kaj mi ne volas pli multe da komforto, ol la aliaj. Sed kiam mi vidis, ke iu societo de Lőcse rifuzas la helpopeton de malfeliĉaj veturantoj, tiam mi kiel senatano mi devis aranĝi ĉi tiun aferon. Pro tio ĉi mi decidis tiel, ke ni devas atendi oĉjon Quendel, ĉar la deco postulas tion ĉi.

– Mi faros laŭ tio, laŭ kio la sinjoro senatano ordonas.

– Cetere mi vidas jam oĉjon Quendel veni. Rigardu, fraŭlineto, ĉu li estas tiu?

– Jes. – diris Rozalia. – Tiu estas oĉjo Quendel, sed li revenis senrezulte.

La sinjoroj elĉariĝis kaj rigardis atenteme.

– Ho, ve! – kriis Klebe. – Tiu estas vere Gasparo Quendel kaj ne estas la diablo.

Ankaŭ Quendel ekkonis sinjoron Klebe.

– Hola! Hola! – kriis Quendel – Klebe tiu estas, la maljuna bubo. Povas esti, ke vi povas helpi.

Quendel anhelante, ruĝiĝinte alvenis de la monteto kaj per la bastono gestadis. La komercisto de Korpona demandis honteme:

– Ĉu vi estas la fama Quendel el la setlejo Béla?

– Mi estas tiu.

Efike de tio la komercisto ridegis, moviĝis lia ventro kaj li ankaŭ larmiĝis pro la rido.

– Kaj mi volis kolekti por la plej riĉa homo de la mondo. Se oni ekscias en Korpona, tiam ankaŭ la suĉinfanoj priridas min. Bonvolu al neniuj diri mian eraron, ĉar mi formigros en la plej densan praarbaron pro la honto.

Kiam paĉjo Quendel atingis oĉjon Klebe, amikece ili manpremis.

– Do, mia amiko Klebe, oni prirabis min. Nome aĉaj betjaroj forportis miajn du ĉevalojn kaj mi havas malfeliĉan situacion, kaj ĉi tie estas ambaŭ ni, mi kaj mia moŝta fraŭlineto. Kaj tuj alvenos la tempesto, pluvegos.

– Mi trompiĝis en mia espero. Bonaj estus la azenoj, ja se ne estas ĉevaloj, tiam bona estas ankaŭ la azeno. Mi tre ĝojis, ekvidante vin mian bonan amikon, Klebe...

– Dankon – diris oĉjo Klebe koleretante – do, ĉu mi estas la azeno, kiu estas bona, se ne estas ĉevalo?

– Ho, ne! Mi komprenis ne vin, sed la azenojn de la ŝafisto. Sed la edzinon de la ŝafisto iu betjaro fuĝigis, nome ŝi fuĝis post la betjaro. La ŝafisto havis feliĉon. Mi volis aĉeti azenojn, de la ŝafisto, dirante, se ne estas ĉevalo, tiam bona estos la azeno. Sed la ŝafisto ne havis azenon. Pro tio mi ĝojis, ekvidante vin. Pro tio mi estas feliĉa homo. Mi estas dankema.

– La danko ne decas al mi protestis sinjoro Klebe, montrante al Fabricio, – sed danku al li.

– Ha! Nini! Ja vi estas la eta Fabricio! Mi salutas vin, frato! Nu, tio ĉi estas brava afero. Ĉu ankaŭ vi venis hejmen? Ja la lernado estas finita! Vivu la ferioj! Diable! Vi iĝis bela adoleskanto.

(Paĉjo Quendel denove turnis sin al paĉjo Klebe.) Kio okazos nun?

Klebe rigardis al Fabricio, atendente la ordonon.

– Ĉu vi, oĉjo Quendel – komencis diri Fabricio – ne volus lasi ĉi tie vian ĉaron ĝis el la proksima vilaĝo mi sendas ĉevalojn por la ĉaron?

Tio ne povas esti – protestis sinjoro Quendel – Kiel vi pensas tion?

Tiuokaze ni kunligu la ĉarojn.

– Tio estos bona. Ĉi tiel la pasaĝeroj havos sufiĉe da lokoj.

Sed por la malfeliĉaj ĉevaloj la ŝarĝo pliiĝos kaj pluse ili devas tiri la ĉarojn supren.

– Mi havas iom da avenoj – diris Quendel gaje – kaj kompensas ilin, sed ankaŭ la pasaĝeroj povas helpi ilin, se iomete perpiedas, ja la perpiedo estas sana.

Sed ankaŭ tiam estas pezaj la ĉaroj kaj la piedoj de la ĉevaloj estas malfortaj, ja ili piedirade estas maljunaj ĉevaloj. – diris Klebe maltrankvile.

Klebe, Fabricio kaj la komercisto de Korpona atentigis paĉjon Quendel, ke ĉiuj estas kontraŭ tiu, nome la pasaĝeroj pagis la koston tiel, ke de tempo al tempo nur unu persono prefere perpiedas. Tiu ne kolerigu la pasaĝerojn, ĉar povas okazi ribelo.

Sed Quendel grumblante en si mem respondis hungare:

– Vi ne estas kapablaj direkti la kanajlaron. Se io ne plaĉas al ili, tiam oni devas proponi pli malbonan aĵon. Tiuokaze ĝi elektos la malpli malbonan aferon. Pro tio ni ordonas, ke kvar personoj ŝovu la ĉarojn. Tion ili ne volas fari, perpiedas.

Tio estis saĝa konsilo kaj neniu kontraŭdiris. Oni kunligis la ĉarojn. Ĉiuj serĉis lokon sur iu ĉaro. Rozalia per helpo de Quendel eksidis sur la malantaŭan sidejon, sed li sidiĝis sur sidejon de la koĉero kaj prenis la vipon, kvazaŭ li instigus la ĉevalojn. La komercisto de Korpona proponis sian lokon sub la tegmento por sinjoro Klebe, li invitis la fraŭlineton sub la tegmenton kontraŭ la pluvo. Sed nek la fraŭlineto, nek Quendel akceptis la volontecon. Do, ambaŭ ĉaroj ekiris malrapide kiel iu galero, kiu tiras iun flosan. La ĉevaloj nur pene tiris la ŝarĝojn kaj videblis, ke ne plaĉas al ili ĉi tiu laboro. Dume tondris kaj fulmis, sed nur iomete pluvetis. Ĉiuj pasaĝeroj sidis sub la tegmento, nur Fabricio perpiedis prenante la apogstangon de la ĉaro de Quendel. Komence la ĉaro iris facile suben, ja la vojo estis nek dekliva nek supreniranta. Fabricio estis juna kaj perpiedis facile kaj havis tempon kun paĉjo Quendel, kiu pridemandadis la junulon pri ties studadoj.

– Mi konis vian patron. Tiu estis brava homo, bedaŭrinde estas, ke li mortis. Tiu amis vian patrinon. Tiu estis unika genio. Tiu konis senlibre la kalendaron, antaŭnomojn de la nobelaj familioj. Tiu konis la nomojn de la astroj: Marŝo, Jupitero. De kie li povis scii nomojn de la astroj? Kiel oni nomis la hundojn de la unuokula bakisto? Jes. Ĝi estis Kastor kaj la alia estis Bundaŝ. Mi ĉiam intermiksas iliajn nomojn. Jes. Kastor estis nomo de la astro. Via patro instruis min. Li sciis ĉion, kio interrilatas pri Dio. Li sciis tempon de la suneklipso kaj de la plenluno. Li sciis kaŭzojn de la tempesto ka la hajlo. Li desegnis la lokojn de la astroj dum via naskiĝo sur la firmamento. (Ankaŭ mi vidis tiun desegnaĵon.) Sed

li ne kapablis distingi la avenon kaj la pizon. Sed nun venis en mian kapon pri la aveno! Ĉu ĉi tie oni ne vendas avenon?

Fabricio skuis la kapon neante kaj Quendel daŭrigis la babilaĉon.

– Kie vi finis la universitaton? Ĉu en Padova? Ĉu poste en Heidelberg kaj en ceteraj germanaj urboj? Kian metion vi havas? Ĉu vi volas okupiĝi pri la publikaj aferoj? Tio estas bela afero, sed vi, hungaroj, luteranoj estas frenezaj, ĉar vi iras eksterlanden, Anglujon, kaj poste havas tiun scion, laŭ kiu oni diras, ke en Anglujo la sinjorinoj havas platajn mamojn.

– Ej, ej, oĉjo Quendel...

Sinjoro Quendel batis sian buŝon.

– Ho, ve! Mi tute forgesis, ke la fraŭlineto sidas malantaŭ mi. Sed tio estas vera. Ĉu tio estas grava, kiujn vi studis eksterlande? Ĉu tiuj estas utilaj, ke vi renkontas eksterlandanojn kaj vidas multe da institutoj? Vi havas neniun komunan kun tiuj. Vi ekkonas tiujn lokojn, kie Marteno Lutero instruis. Vi estis sur tiu loko, kie Lutero ĵetis la inkujon al la diablo. La diablo forkuris. Kial vi iras al loko de Lutero? Prefere iru, vi, Hungaroj al Vieno aranĝi la publikajn aferojn. Ne iru al Berlino, Bologna, ĉar tio estas stulta modo. Preskaŭ post kvindek jaroj la junularo iros al Vieno, kie oni aranĝas sorton de Hungarujo. Tie atentu, kiel okazas la aranĝo de aferoj de Hungarujo. Tie atentu, kiu homo agas bone kaj agas malbone. La pli lastajn prirespondigu.

– Jes, mia pli aĝa fratosinjoro havas pravon.

– Mi tiel vidas, ke viaj eksterlandaj studadoj estas similaj al tiu, kvazaŭ vi volus ellerni la flikadon de via ĉifona mantelo.

– Jes – diris Fabricio distrite – sed la ĝenerala klereco postulas la pli larĝan horizonton.

– Sed ĉion ne eblas scii – interdiris Quendel.

– Tio dependas de multo. – argumentis Fabricio – ĉion ne eblas scii, sed tio ne estas bezonata. Se ni scias tion, kion aliaj ne scias, aŭ ne povas scii, tiam ni havas la ĝeneralan klercon.

– Kion vi diras, amiĉjo?

– Mi diras tion, ke multe da sekretoj, specialaĵoj estas super la tero, sub la firmamento. Tiuj estas imagitaj aĵoj. Kelkajn la Scio ekkonis, aliajn oni nur ŝajne scias, sed kelkojn oni ne konas. Tion ni devas ekkoni, kio estas mia tasko.

Paĉjo Quendel ne sciis respondi, sed la respondo ne estis bezonata, ĉar la ĉevaloj tiris la ĉaron sur monton supren. Ankaŭ Tropko elĉariĝis kaj instigis la pasaĝerojn:

– Elĉariĝu! La ĉevaloj (nomitaj Pavo kaj Cerambiko) estas ege lacaj, ĉar la ŝarĝo estas tro peza. Helpu al la ĉevaloj!

Multaj homoj elĉariĝis: la ĉambristino, la komercisto de Korpona kaj la kupristo. La pli lasta kuraĝe diris:

– Jes! Tio estus bona, se ankaŭ sinjoro Quendel elĉariĝus, ja ni, la aliaj perpiedas por tiu.

– Kion vi parolas? – demandis sinjoro Quendel orelon pintiginte.

– Ankaŭ vi povus elĉariĝi.

– Kiu diris tion?

– Miĥelo Brám, la brava muskolhava kupristo.

– Ej! Vi estas impertinenta! Rozalia, klarigu al li, – diris al ŝi regnestrovoĉe, – ke Quendel estas nobelo, kiu servas ankaŭ la reĝon nur surĉevale.

Rozalia tuj rapide elĉariĝis kiel iu vigla sciureto kaj dume ŝiaj jupoj susuris kiel flugiloj de iu birdeto.

– Mi deziras perpiedi anstataŭ la oĉjo, ja tio estas bona amuzo.

– Ho, ne – ĉar tuj viaj ŝuetoj estos malsekaj pro la pluvo – kontraŭis Fabricio.

(La vojo ne estis arte farita, ĝin signis nur la radspuroj, en kiuj kreskis atriploj kaj portulakoj.)

Apud la ĉaroj povis trafiki nur unu post alia. La vojo estis mallarĝa kaj Fabricio lasis por paŝadi Rozalian antaŭ li, ĉar li volis vidi ŝin. Ŝi estis kara fenomeno, paŝadante laŭ ritmo kaj ŝia silka tuko flirtetis efike de la vento kiel floro de iu papaveto. Cetere la perpiedado estis tre laciga. Multe da arbobranĉoj malhelpis la perpiedadon. Multe da rubusoj kaj rozujoj estis apud la vojo, kiuj alkroĉiĝas al la jupo de la fraŭlineto per la dornoj. Ŝi sciis, ke ŝi estas mallerta kaj hontis.

Ŝi kaŭzis malagrablaĵon al Fabricio, sed baldaŭ alkutimiĝis unu al alia, kvazaŭ ili estus gekamaradoj. Dume iu rozujbranĉo kroĉiĝis al ŝia jupo kaj la junulo komencis petoladi.

– Nu, ĉi tio estas malbono. Estu singarda, gardu viajn okulojn! Nun mi devas detranĉi, aŭ la rozujbranĉon, aŭ vian hararon. Kiun mi detranĉu?

– Ho, ve! Ne frenezetumu! Mi koleras min sufiĉe, mi estas mallerta. Forigu jam la rozujbranĉon el mia hararo!

Sed la rozujbranĉo, sur kiu estis rozfloro, estis tre bela en ŝia hararo. Li singarde detranĉis la branĉon, sed la verdaj folioj restis en ŝia hararo. Tiuj folioj faris tre belan florkronon ĉirkaŭ la kapo de la fraŭlineto. Fabricio plezuriĝis, vidante Rozalian portante la florkronon. Li sopiradis post ŝi. La detranĉitan rozujbranĉon li gardis metante en iun libron inter lavendojn de sia patrino. Li volis gardi odoron de la hararo de Rozalia.

Fabricio iris post ŝi kaj denove io okazis. Ŝi paŝadis sur la malsekva tero, sed subite ŝi ekhaltis terurigaŭte kaj instinkte tiriĝis al Fabricio.

– Kio ĝi estas? Kial vi ekhaltis?

Rozalia terurante rigardas iun aĵon sur la tero.

– Ĉu vi ne vidas tiun? – ŝi flustradis tremetante, dume montras ion per mano. Fabricio ekridegis.

– Tiu estas bufo. Mi tuj forpelas tiun.

Li depuŝis la bufon per sia kana bastoneto kaj la bufo tuj forsaltis ŝmacadante. Nun jam ankaŭ Rozalia ridis, sed ŝi rigardis lin kiel heroon, kiu liberigis ŝin de iu monstro, kiu estis cetere iu sorĉinta sorĉistino. ... Ja la fabeloj komenciĝas same.

– Ej! Ĝi estas tre ege timema.

– Sed ĝi rigardis min strange. – ŝi ekskuzis sin malĝojiĝinte.

– Mi diris tion pro tio, – diris Fabricio petegante, – ĉar vi ne estos soldato, pli ĝustavorte dirante edzino de soldato.

– Kial tio estas malbona? – ŝi diris kaprice. – Ĉu vi estas soldato?

Ŝi tuj ruĝiĝis kiel kuirita kankro. Ŝi sciis, ke la dirita frazo estis freneza, ĉar ne estas malbono, se ŝi ne estos edzino de soldato, ja ankaŭ Fabricio ne estas soldato.

Sed Fabricio daŭrigis la temon:

– Mi diris tion pro tio, ĉar vi estas kuraĝa uzi la karabenon. Ankaŭ mi aŭdis la pafon.

– Ĉu vi scias?

Oĉjo Quendel rakontis tion.

– Ĉu la oĉjon oni nomas Quendel?

Fabricio surpriziĝis.

– Ĉu vi ne scias? – li demandis gapmirante.

Rozalia estis en embaraso. Ŝi ne respondis sed paŝadis pli rapide, ke la junulo ne postiru ŝin. Ŝi estis saĝa kaj kritikis sian konduton kaj vortojn, sed nur pli malfrue.

Sed Fabricio suspektadis kaj sentis iun sekreton. Kiu konfidis la fraŭlineton al Quendel? Kien ili iras nun? Kion li volas fari pri ŝi? Li devas diveni tiujn. Li pensadis forte por diveni la sekreton. Ĉu povas esti, ke, ŝi estis en edukejo kaj Quendel portas ŝin al ŝiaj gepatroj? Kiel ŝi povis sidi sur ĉaron de Quendel, se ŝi ne konas lin? Ĉu povas esti, ke Quendel estas intima amiko de la gepatroj? Kial ŝi demandis nomon de Quendel? Ŝi nomis sin al Rozalia Otrokóczy. Tio estas konata hungara nomo, sed en nia regiono estas nekonata. Ej, tio estas simpla vulgara historio. Estus pli bona demandi sinjoron Quendel.

– Kie vi trovis ĉi tiun fraŭlineton, oĉjo Quendel? – demandis Fabricio indifere.

La maljunulo ruze palpebrumis.

– Ĉu ŝi estas ĉarma? Ĉu ŝi plaĉas ankaŭ al vi?

– Jes, ŝi estas vere ĉarma fraŭlineto Kie vi trovis ŝin?

Quendel tiradis la ŝultrojn kaj ŝerce respondis:

– Eĉ ne la reĝo perfidas la devenon de la fortikaĵo.

Sed vi ne estas reĝo.

– Dio gardu min, mia fraĉjeto! Paĉjo Quendel havas sian metion kaj estas kontenta. Povas esti, ke ankaŭ la reĝo estas kontenta.

– Jes, vi pravas, sed vi ne estos malsana, se vi diras al mi la celon de la veturado. Kiu estas la fraŭlino kaj kien vi portas ŝin?

Quendel ekparolis serioze:

– Pri tio mi ne povas paroli, sed mi diras al vi ion. La fraŭlino devenas el elita familio kaj vi ne povas akiri ŝin. Pro tio ne pensu pri ŝi.

Fabricio svingbatis kelkfoje sian kanobastoneton en la aero.

– La pensoj estas liberaj – diris Fabricio mallaŭte meditante.

Li nun jam pli bone sciis, ke tutcerte ekzistas iu sekreto. Povas esti, ke tio estas politika sekreto. Nome Emerigo Thököly havas duonfilinon, Julianan Rákóczi. Ĉu povas esti, ke oni portas ŝin de ie? Sed tamen ne. Ja ŝi estas jam pli aĝa, ol tiu ĉi fraŭlino. Li paŝadis meditante, aŭskultis parolon de Klebe, kiu same elĉariĝis. Nome la ĉevaloj ne volonte trentiris la ĉarojn. Ili ĉevalblekis volontaj ripozi en la stalo. Sed ankaŭ la tempesto proksimiĝis. Dume Klebe rakontis siajn junaĝojn travivaĵojn. Li rakontis interaliaj, ke unufoje el la densa arbaro iu granda urso proksimiĝis al li:

– Vi povas imagi mian teruron. Mia koro batis laŭte. La urso kuris al mi, poste ekhaltis, gratis sin kaj oscedis. Mi ekkuris kaj la urso postiris min. La urso proksimiĝis al mi, mi tre ege kuregis kaj subite la urso preterkuris min...

– Kio okazis poste? – la pasaĝeroj demandis terurante.

– Ĝi foriris kaj kaj ne formanĝis min – diris Klebe simple.

– Kion vi faris, sinjoro Klebe? – kriis la kantoro.

– Do, ankaŭ mi ne manĝis ĝin.

Ha! (La pasaĝeroj ne estis kontentaj pri la fino de la historio.)

– Simple ni nur renkontiĝis. – Klebe finis la historion – kaj ni ne suferigis unu la alian.

Fabricio serĉis Rozalian, kiu ĝuste estis malantaŭ li. Sur la vojo estis marĉetoj, ĉar la pluvo kaj de la monto fluantaj akvoj malsekigis la vojon. Rozalia ne kapablis trairi iun marĉeton, ŝi ne kuraĝis trasalti tiun kaj rigardis al Fabricio petegante helpon. Fabricio ĝojis, ke li povas helpi al la ĉarma fraŭlino, ja tre ege bela afero estas la helpo al ĉi tiu admirinda feino. Li ridetis petole kaj subite kliniĝis kaj trabrakumis ŝian sveltan talion kaj tiel li portis la fraŭlineton sur la alian flankon de la marĉeto. Dume li sentis baton de la koro de la fraŭlino.

Li emociiĝis pro tio.

– Ho, ve! – ŝrikis Rozalia.

– Studento, ne petolu! – diris kolere Quendel, kiam la pipon li batadis al la apogstango de la ĉaro.

– Ĉu vi koleras, Rozalia? – demandis Fabricio.

– Ne, ne! Ĉar mi ektimis – balbutis ŝi, – ke mi falos surteren kaj havos ian malbonon.

– Kia malbono povus okazi?

– Ĉar tion diris mia onklino ... ĉiam ŝi diris – ŝi balbutis, – ke la junulo ne povas tuŝi la fraŭlinojn, ĉar ili rompiĝas... Ĉi tio estis la diraĵo de mia onklino.

– Hm. Kiu estas tiu onklino?

– Mia onklino estas tre saĝa.

– Kiu estas tiu? Kiel oni nomas tiun?

– Mi ne povas diri. – Ŝi diris malĝoje, kapon skuinte.

– Ĉu vi ne povas diri? Tio estas stranga. Kial?

– Ĉar mi promesis al mia patro. Rompu la promeson.

– Mi ne rompos tion. – Rozalia respondis simple sed decide.

– Tiukaze ni ne povas babiladi, ĉar vi ne povas respondi. – diris Fabricio mokadante.

– Ho, ne! Nur kelkajn aferojn mi ne povas diri ĝis mia patro ĉesigas la malpermeson.

– Dum la paroladoj estas multe da malpermesoj, kiujn mi ne povas rompi.

– Certe eblas tiujn rompi. – diris Rozalia.

– Ekzemple mi havas iun indiferentan demandon – ruzadis Fabricio. – Ĉu vi povas respondi tiun?

– Tio dependas de la demando – diris la fraŭlino mishumore.

– Ĉu via patro scias pri tio, ke vi veturas kun sinjoro Quendel?

– Mia patro ordonis tion.

– Tio estas bone. Sed mi havas alian demandon: Kien vi iras?

– Tion mi ne povas diri.

– Kie vi loĝas?

– Eĉ tion mi ne povas diri.

Ili paŝadis kelkajn minutojn unu apud alia silente. Ankaŭ la aliuloj perpiedis senvorte nur la ronkado de la horloĝisto estis aŭdebla sur la ĉaro. La vojo iĝis larĝa kaj pro tio Fabricio povis iri apud la fraŭlineto. Mi ne komprenis la tutan aferon. – li diris denove.

– Prefere deŝiru tiun floron de ciklameno.

Fabricio deŝiris tiun, sed li daŭrigis la temon.

– Tio estas certa, ke viajn familiajn cirkonstancojn neniuj povas scii. Ĉu ne?

Rozalia silente kapbalancis.

– Do, mi konas samajn kazojn – daŭrigis la „infansenatano” – kaj estimas la deskretecon....

Rozalia skuis la kapon pro kio falis la rozpetalo el sia hararo surteren.

– Tio ne estas la sama kazo – diris Rozalia mallaŭte.

– Tial ne estas la sama kazo, ĉar mi kiel studento serĉas la logikon en ĉio – diris Fabricio ekscitite.

Rozalia pro ektimiĝo ne rigardis al Fabricio, ja ŝi ne povis diri la veron, ĉar ŝi eksentis la incitecon de la junulo. Ŝi ne komprenis lian incitecon. Ŝi ne sciis ankoraŭ, ke la inciteco devenas el la amo.

– Mi ne komprenas – ŝi balbutis.

– Mi, ne komprenis vin, fraŭlino. Vi ne diras al mi vian nomon, loĝejon kaj vojcelon.

– Nu! Ĉu mi ne havas rajton al ĝi? – ŝi diris orgojle levante la kapon. (Ŝi havis tre belegan kolon.)

– Vi havas rajton al ĝi – respondis la junulo, – sed viaj respondoj estas ofendaj, sed mi ne ofendis vin.

– Ĉu mi ofendis vin? Ja vi protektis min kontraŭ de la societo. Ho, ve! Certe mi havas ege malbonan konduton.

– Rozalia Otrokóczy! – diris Fabricio preskaŭ febre, deklamante – Vi unue diris vian nomon kaj pli malfrue klopodas kovri vian personecon. Kial vi faras tion?

Rozalia embarasiĝis. Ĉi tiu argumento estis trafa. Li lerte trafis. Ŝi ruĝiĝis, ŝia vizaĝo estis varmega kiel la fero de la gladilo. Ŝi mensogis. Kion ŝi diru al li nun? Ĉu ŝi diru, ke diris malbonan nomon? ... Sed tiuokaze ŝi perfidus ĉion.

Ŝi estis en silento nur kelkajn minutojn, poste milde, dolĉe, malgaje rigardis la junulon kaj alparolis lin:

– Kial vi volas kaŭzi al mi triston?

– Ĉu mi kaŭzis triston al vi?

Neion demandu, ĉar se mi dirus al vi la sekreton, tiam mi estus malfeliĉa. Kial vi volas tion, ke mi perfidu iun sekreton?

Fabricio emociiĝis. La diro de la fraŭlineto emociis la junan senatanon. Li ekkomprenis kaj ekkompatis la fraŭlineton pro la boneco, aŭ vanteco, sed sentis tion, ke ŝi venkis kaj plu li ne suferigis ŝin. Kiu scias, kio povus okazi, se tiam paĉjo Klebe ne ekkriintus forte?

– Danke al Dio! Finfine ni atingis la supron de la monto. Kiu iĝis laca, tiu povas enĉariĝi!

Bela, rara panoramo videblis en la valo. Tio estis la valokaldrono de Travnik, kiu sama estas kiel smeraldo. Sube en la valo fluas la rivero Ruska, kiu rapide fluas malsupren kaj funkciigas la akvomuelejojn.

Dum la Providenco atendis, ke la ĉaro-Molitoris atingu la supron de la monto, nun forta vento ekskuas la arbojn, pelas la nubojn. Dume uragano estiĝis, pli forte skuante la branĉaron de la arboj. La rivero Ruska pli forte fluegas inter la rokoj kaj herboj. Kaj nun el la firmamento glacigloboj falas, kiuj estas samgrandaj kiel aveloj.

Ĉiuj vivaĵoj ektimegas. La rabobestoj klopodas iri al siaj grotoj, la strigo hastas en sian kavaĵon, la papilio klopodas flugi sub arbofolion. Unu abelo kaŝas sin por

ripozi inter flor-petaloj de iu floro. Klebe ŝatus porti la ĉaron-Molitoris sub iun tegmenton.

– Ĉi tie ne malproksime estas akvomuelejo – diras sinjoro Klebe. – Ni iru tien!

Ili malfacile povis atingi la muelejon, kvankam Pavo ne estis obstina, ja ĝi estis blinda, sed la alia ĉevalo henis, ne volante ekirigi la ĉarojn. Pro tio Tropko devis konduki tiun ĉevalon per kondukilo.

Ili malfacile atingis la muelejon. Tio estis kaduka konstruaĵo, kovrita per pajlotegmento. El la domo multloke fumo flugis, kvazaŭ ĝi brulus. Sed tie oni kuiris, bakis, rostis kaj oni povis flari la odoron de rostaĵo. La horloĝisto jam tre ĝojis, dirante: „Tiel ŝajnas, ke la Providenco pelis nin al bona loko. La kuprista fraŭlo rimarkis iun ĝardenon malantaŭ la muelejo, en kiu estis helianto kaj rozalteo. „Ankaŭ knabinoj estas.” – li diris. Iu maljunulino kuris el la domo, el la vestiblo, prenante kuirkuleron.

– Dio portis vin! – ŝi kriis gaje, kvazaŭ ŝi jam estus atendinta ilin. – Bonvolu elĉariĝi! Ankaŭ la estiminda pastoro jam estas ĉi tie kaj ankaŭ la vespermanĝo estas preta!

Sed vidinte, ke multe da homoj alvenis kaj terure kuras en la domon, ŝi diris: „Sankta Dio, kia homamaso alvenis ĉi tien?”

Nome tio okazis, ke sinjorino Georgo Djurdjik post dekdu-jara ripozo naskis filon ĝuste hodiaŭ, tagiĝe. La geedzoj Djurdjik¹⁰⁵ ĝis nun havis nur du adoleskantinojn kaj la muelisto tre ĝojis, ja estos heredanto de lia nomo. Samtempe li malĝojadis, ĉar la aliaj sinjorinoj opiniis, ke la fileto estas tre malforta. Do povas esti, ke li mortos post kelkaj horoj, pro kio baptofesteno ili devas aranĝi. Nome, sen nomo tiu fileto longtempe vagadus en la Purgatorio.

Georgo Djurdjik ne estis pia homo, li estis superstiĉa kaj blasfemis, protestante kontraŭ la morto de sia fileto. Ja ekzistas multaj infanoj, kiujn iliaj gepatroj ne konas, aŭ ne volas eduki kaj kial lian filon volas forporti la Kreanto. Tamen li konsentis pri la baptofesteno en la intereso de sia filo. Li tuj ordonis al la domanoj baki, kuiri. Li ordonis al la muelist-metia helpisto galopi al Stradovac kaj porti pastoron. Li ordonis al la alia fraŭlo galopi al Madraska porti la gebaptopatrojn. (Liaj baptanoj estis la tieaj buĉistoj kaj iliaj edzinoj.)

La pastoro jam alvenis antaŭ unu horo, la gebuĉistoj mesaĝis, ke ili tuj ekiras, sed timis, ke pro la tempesto ili ne povas veni. Ja la vojo de Madraska estas tre malbona kaj ankaŭ sur la pontoj la trafikoj estas neeblaj.

Dume Djurdjik kaj la pastoro lamentadis, ĉar ne venas la gebuĉistoj, drinkante unurangan drinkaĵon en la gastoĉambro, kie la knabinoj de Djurdjik primetis tablon por la gastoj kaj pro tio oni iradis – venadis, kaj ĉar la pasaĝeroj de la ĉaro-Molitoris saviĝis de antaŭ la tempesto kaj petis pardonon pro la enveno.

¹⁰⁵ La originalo hungare de la nomo Djurdjik estas: Gyurgyik.

– Bonvolu enveni – diris Djurdjik bonhumore – vi estas sur bona loko. Dio donis al ni filon kaj donis ankaŭ gebaptopatrojn. Ĉu ne? Dio amas min. Ĉu ne? Dio ne batas la infanojn. Ĉu ne?

La alvenantoj kapjesis malcerte kaj Djurdjik rigardis la gastojn. Kaj li ekvidis la plej junajn kaj plej elitajn gastojn. Li klarigis al ili, ke li estus dankema, se ili estus la gebaptopatroj de la plej juna Djurdjik, kies karesnomo estos Valentino. La du elektitaj gastoj estis Fabricio kaj Rozalia.

– Sed atentu – diris Djurdjik – la eta baptopatrino estas tute malseka. Magdalena, iru kun la fraŭlineto (Magdalena estis lia filino) kaj donu al ŝi sekan vestaĵon kaj ŝiajn vestaĵojn sekigu.

Iu ĉarma, bluokula, malgranda knabino iris al Rozalia kaj ambaŭ iris al iu kamero, kie okazis la ŝanĝo de la vestaĵo.

Post tri minutoj ili reiris en la gasteĉambron mano en mano. Tiuj knabinoj, kiuj malvestis sin unu antaŭ alia, jam estas amikinoj. Kvazaŭ ili dirus siajn sekretojn unu al alia.

Rozalia estis ĉarma, kiam ŝi enpaŝis parte en la vestaĵo kamparana, aliparte tiu de metiisto.

– Ej, ej! Kiom belega estas la fraŭlineto! – kriis la komercisto de Korpon, ja la lilio ne estus pli bela, se ĝi aperus el inter la folioj, de la vulgara pelargonio.

Kvankam la jupo estis iomete mallonga kaj la botoj estis tro grandaj, tamen ŝi paŝadis belege. La korsaĵo estis strikta ĉe la ŝultroj kaj ĉe la mamoj streĉiĝis. Tio ĉi estis blindiga. (Kial? Mi ne malkaŝas tion.) La virina korsaĵo atingis la koksojn, pro kio videblis la maldika talio simila al vespo.

La estiminda pastro, kvankam li havis malgrandajn okulojn, tamen rimarkis la tro grandajn botojn kaj diris:

– Diable! Oni devus meti en la botojn iom da pajlo, sed vi estas ankaŭ tiel ĉarma, ĉar Dio volis ĉi tiel, mia filineto, ĉar Dio kreis vin belege. La malsaĝaj edzinoj povus ellerni, ke la malbone kudritaj vestaĵoj ne povas malbeligi la belecon. Nome la edzinoj trivas multe da silkoj, punktoj, sed tiuj silkoj, punktoj malbeligas la edzinojn.

– Sed ni nun jam komencu la ceremonion de la baptado – diris la pastoro. – Portu la ŝafideton, kiu atendas ĉe la pordo de la ŝafstalo. Portu la bebon. Venu ĉi tien la gebaptopatroj. Kiun religion vi havas, junulo?

– Mi estas luterana – diris Fabricio fiere.

– Kiun religion vi havas, mia filino?

Fabricio rigardis la ekscititan Rozalian.

– Ŝi estas luterana – respondis Quendel.

Fabricio ege ĝojis pro tio.

– Tio estas bedaŭrinda afero. – Rimarkigis la pastoro pie. – Ili ambaŭ estas aberaciintaj animoj. – Sinjoro Djurdjik – bonvolu elekti aliajn gebaptopatrojn.

– Kial vi ridas, fraĉjeto, kvazaŭ vi estus trovinta kvarfolian trifolion? – demandis Quendel la junan senatanon.

– Nu, kiuj estas ĉi tie kristanaj katolikaj homoj? – demandis kolere Djurdjik, la muelisto.

– Inter la pasaĝeroj de la ĉaro-Molitoris estas tiuj – fanfaronis sinjoro Klebe – ekzemple sinjorino Vilner, la saĝa sciencista sinjorino de Lőcse, kiu helpis ĉe iu nasko de gebaronoj Nyári¹⁰⁶. Ĉu mi pravas, sinjorino Vilner?

Sinjorino Vilner klinis sin kaj kapjesis.

– Jes, mi venas de tie.

– Mi havas feliĉon. – ĝojis Djurdjik. – Do, ĉi tie estas la vera akuŝistino. Ekzameni la bebon, sed nun ni serĉu la baptopatron.

– Ĉi tie mi estas – diris la horloĝisto.

– Kiu vi estas, oĉjo?

– Mi estas Johano Kindronai kaj estas horloĝisto. Mi riparas la horloĝojn en la departementoj Sepeŝ, Gömör kaj Kiŝhont.

Djurdjik saltis al la horloĝisto kaj manpremis:

– Vi estos mia baptano. Ni ĉiuj estas samformaj antaŭ Dio, kiuj estas katolikaj. Ĉio estas en ordo.

Nun jam oni portis la bebon en vindotuko. Sinjorino Vilner prenis tiun en sia brako kaj diris, ke la fileto estas sana, sed li estu multfoje sub la libera ĉielo kaj manĝu bonajn manĝaĵojn kaj trinku multe da lakto. La pastoro baptis la fileton. Poste oni metis la bebon en iun kribrilon, la gebaptopatroj skuis la kribrilon por faligi la malbonajn ecojn. Poste oni pulvorigis spikon de tritiko super la kapo de la bebo. (Freŝa spiko ne estis, pro tio oni uzis pasintjaran spikon.) La spiko simbolas la forton. La infano estu forta kiel la tritiko. Al kamparano estas bezonata la forto. La kamparano diras al la doktoro, kiam li estas malsana, ke li ne havas forton. Li ne scias pri doloro, sed ne havas forton. Se la morto venas en la domon, la forto foriras. Kaj tio estas la fino.

Kiam la baptada ceremonio okazis, sinjoro Quendel singarde kaŝiris el la gastoĉambro por meti siajn ĉarojn kaj keston sur sekuran lokon. Glacio jam ne falis, sed la tempesto ne silentiĝis kaj skuis la tegmenton de la muelejo. Li serĉis vestiblon por la ĉaro. Li ekvidis veturilejon. Singarde li rigardis ties pordon havantan du partojn. Li provis malfermi la pordon. Tio sukcesis. Ĉu tiu ĉi ejo povus esti malplena kaj taŭgus por la ĉaro? En la veturilejo estis malhelo. Sed iu nigra aĵo movis sin en la malhelo. Subite varma vaporo de iu lango tuŝis lian manon kaj aŭdiĝis konata akra ĉevalbleko.

Ho! Ja ĉi tio estas lia ĉevalo, Ŝarmami! Li ekkonis ĝin laŭ la voĉo. Li tuj kuris por porti lanternon kaj poste li rigardis ĉe la lumo de la lanterno ambaŭ ĉevalojn

¹⁰⁶ La nomo Nyári, elparolendas njari.

manĝantaj iom da herbaĵo. Ja tiuj estas liaj ĉevaloj. Bonan vesperon, miaj ĉevaletoj! Finfine ni renkontiĝis.

Kiam paĉjo Quendel reiris al la gastoĉambron, tiam la gastoj jam sidis ĉe la tablo kaj oni komencis porti la manĝaĵojn por la gastoj. Kiel unuan oni portis la gratenitan kokidaĵon. Rozalia kaj Fabricio sidis unu apud alia. Fabricio havis grandan estimon, ja ĉiuj sciis, ke li estas senatano de la urbo Lőcse. La komercisto de Korpona rimarkis, ke sinjoro Quendel ne ĉeestas. Efiĝe de tio Djurdjik kaj la pastoro surpriziĝis:

– Ĉu Quendel ne estas ĉi tie?

– Diable! Tio estas malbono. – Djurdjik eksaltis kaj foriris por serĉi lin.

Sed en la sekva momento Quendel paŝis en la gastoĉambron. Oni sidigis lin ĉe la ĉefa loko kaj donis al li servicon. Djurdjik viŝis lian teleron per sia mankavo, montrante la estimon al sinjoro Quendel.

– Nu, tiujestas multaj feliĉaĵoj, kiuj okazis pri mi hodiaŭ!

La muskolhava kuprista fraŭlo (helpisto) bonguste manĝis, li ŝvitis, la kantoro kaj la ĉambristino de Csáky provis rompi ergotoston por decidi, kiu havos pli longan vivon. La akuŝistino sidis apud la pastoro kiel iu damo kaj nur traktis subtakse la manĝaĵon. Ŝi diris, ke ĉe la geedzoj Nyáry ŝi manĝis facile digesteblajn manĝaĵojn kaj ŝi ne ŝatas la malfacile digesteblajn manĝaĵojn. Ho! Kara mia! Ĉe la magnatoj ankaŭ la ovoj estas ali-formaj! La komercisto de Korpona plenplenigis sian glason de vino kaj per ĝi salutis sinjoron Quendel, sed tiu ne rimarkis. La plej kontenta estis sinjoro Klebe kaj plaĉis al li la horloĝisto, tiu ŝmacante manĝis. Klebe estis fieraj kaj kvazaŭ li estus leginta monologon, li diris:

– Ĉu mi diris al vi, ke la ĉaro Molitoris havas reputacion kaj enlande kaj eksterlande. Tio estas grava firmao kaj ĉie oni akceptas ĝin kun gastoamo. Ĝi donas festemon al siaj pasaĝeroj. Se Staloviĉ ekscias la hodiaŭan okazaĵon, tiam li estos tre envia. (Stalovic estis posedanto de la simila firmao de la urbo Kaŝŝa.)

Poste la edzino de la muelisto kaj la patrino de la muelisto portis vicorde la manĝaĵojn: la bele ruĝiĝintan porkidon, la trutojn, ekskuzante sin pro la multe da gastoj. Ili petis pardonon, se iu restis malsata. Ili diris, ke ili havas ankoraŭ iom el la por tagmanĝo restinta: farĉitaj brasikoj, kaj galantino estanta en la kelo.

Dume Magdalena kaj Estera Djurdjik portis senĉese la vinon en kruĉoj, nome ili ne sidis al la tablo. Magdalena absinton portis al la edzinoj, sed unue donis el ĝi al Rozalia, ĉar ŝi estis la distingita gasto. La etoso estis familia. Djurdjik senĉese diradis, ke li havas feliĉan tagon, Dio lin ŝatas plej bone. Li rakontis vicorde la okazintaĵojn de la hodiaŭa tago inter tintadoj de la glasoj. Li bedaŭris, ke liaj baptanoj de Madraska ne povis veni pro la tempesto. Tiu rakonto estis jam enua, kies finon ĉiuj konis parkere: kiel alvenis la ĉaro Molitoris en ĝusta tempo portante gebaptopatrojn. Ĉi tiel alvenis la Reĝoj de Orientoj al Betlehemo, kiam

Jesuo naskiĝis. La pasaĝerojn de la ĉaro Molitoris kondukis al ili de antaŭ la tempesto, ne la fulmo, sed kiel la reĝojn, la Stelo. Ĉi tien nur unu reĝo venis, la reĝo de monto de la setlejo Béla, por kiu Dio donu ĉion bonan ĉiam kaj ĉie.

– Sufiĉos, se Dio nur ĉi tie donas ĉion bonan, – diris la estimata pastoro, je kies sano ĉiuj malplenigis ĝisfunde sian glason.

– Kaj ankaŭ tio estas diferenco – daŭrigis Djurdjik orgojle, – ke Jesuo estis filo de iu ĉarpentisto kaj naskiĝis en stalo, sed la infano Valentino devenas el la familio Djurdjik, kiu estas nobela familio kiu kaj en Sepeŝ kaj en Abaúj havis nobelan bienon.

La pastoro levis la manon admonante:

– Kion vi parolaĉas, Djurdjik, por la Dio?

– Ej, ĉu mi ne havas pravon? Ĉu vi diras tion, ke Jesuo devenis el nobela familio?

– Jesuo estis filo de Dio – respondis la pastoro pie.

– Nu, ja. Ankaŭ tio estas io. – Ne kontraŭis Djurdjik.

– La idoj de Djurdjik estis ĉiam muelistoj. Sed tiutempe la muelistoj estis militestroj de la reĝoj. Ankaŭ Kinizsi¹⁰⁷ estis muelisto – metihelpisto. Li laboris en nia muelejo. Mi diras pravon.

Sinjoro Quendel malpacience sidis sur la seĝo. Li nerve frapadis per la fingroj sur la tablo kaj tiel ŝajnis, ke li volas fari iun maĥinacion.

Kiam Djurdjik finis la direndaĵon, li volis paroli. Li levis sian glason estantan el argilo. Ĝi estis bela bovlo. Li elverŝis la vinon sur la teron signante, ke li ne drinkas je la sano de Djurdjik, ĉar tiu ne meritas.

– Mia sinjoro Djurdjik! – komencis diri Quendel – Vi rakontis vian feliĉon, naskiĝon de via filo, baptadon de via filo, historion de la hodiaŭa tago, sed ion vi ne diris...

– Kio ĝi estas? – kriis la komercisto de Korpona.

– Ni petas silenton. Diru, sinjoro Quendel!

– Estas ankoraŭ ne diritaj antaŭaĵoj! – daŭrigis Quendel.

– Memkompreneble! – ridegis Djurdjik. – Se bebo naskiĝas, tiam tio havas antaŭaĵojn! Ha-ha-ha-!

– Mi, nur al la historio de la hodiaŭa tago, volas diri ne diritajn aferojn. – klopodis klarigi Quendel, dum li montris pian vizaĝon, afektante la naivegulon. – Tiuj estas antaŭaĵoj, kiuj havos konsekvencojn. (Li forte kriaĉis.) La Dioj amas sinjoron Djurdjik, sed hodiaŭ ankaŭ al mi ili estis gracemaj. (Ĉit! Ni aŭdu sinjoron Quendel.) Nome io okazis pri mi en la arbaro de Ljeskova proksime de la ruĝtegmenta ŝafostalo. Du bubaĉaj fraŭloj kuregis al mi el la arbaro, miajn

¹⁰⁷ La familio-nomo Kinizsi elparolendas: kiniĵi.

ĉevalojn ekkaptis, ili senvorte detranĉis la tirrimenojn, poste forgalopis kun la ĉevaloj.

– Ni scias! Ili kaŭzis grandan malbonon al ni! – murmuris la muskolhava kupristo.

– Mi estis malesperiĝinta, ĉar mi kaj mia fraŭlineto restis solaj en la arbaro – diris Quendel.

– Sed venis la ĉaro Molitoris – diris kompletigante la frazon sinjoro Klebe fierege, – ĉar la Molitorisfirmao estas honora, humana, helpas la gemalfeliĉulojn kaj ankaŭ la ĉaron de Quendel pene kunportis kune kun la sia.

Nun jam ankaŭ sinjoro Djurdjik sentis sin malkomforte.

– Nu, tio estas nenio! – li interparolis. – Ni drinku! Plenigu la bovlojn! Sed ne per la maldekstra mano faru tion, vi estas mallerta. Ni ne parolu pri la ĉevaloj kaj la zorgoj. Ĉu ni ne faru dolĉan spican brandon? (krampampuli).

– Ho! Tio ne estas tiel! – protestis sinjoro Quendel. kiun la aliaj aŭskultis tre interesiĝante, ĉar li la vinon elverŝis. Tio estis signo de disputo.

– Diru, sinjoro Quendel!

– Prefere donu al mi tiun pladon – diris la kantoro al la horloĝisto, puŝante lian kubuton. – Sur tiu mi vidas la kapon de la porkido. Kial vi ne manĝas tiun? Tio estas tre emocia, mi ne povas rigardi plu, prefere mi manĝas tiun.

– Mi aŭskultu sinjoron Quendel! – interparolis la pastoro. – Kial estis bona al vi la Dio hodiaŭ?

– Ĝuste mi volas diri tion! – daŭrigis paĉjo Quendel. – Kiam la ceremonio de la baptado daŭris, mi tiel pensis, ke mian ĉaron mi metos sur iu seka loko. Almenaŭ nokte mi povas dormi en ĝi. Do, mi iris eksteren por serĉi taŭgan lokon.

Nun la okuloj de Djurdjik malheliĝis.

– Mi rigardadis la konstruaĵojn – daŭrigis Quendel – kaj mi ekvidis la veturilejon apud la kelo...

Djurdjik eksaltis maltrankvile kaj subite senkaŭze sidiĝis kaj arogante rigardis sinjoron Quendel kiel la dresisto rigardas la rabobeston.

– Kial tio estas malbona? – stertoris Djurdjik.

Stranga estis por ĉiuj la ekscitita konduto de sinjoro Djurdjik. Ankaŭ Rozalia rimarkis. Ŝi timeme atentigis la senatanon Fabricio, ke Djurdjik koleras oĉjon Quendel. Ĉiuj rigardis sinjoron Djurdjik. Nur Quendel faris tiel, kvazaŭ li ne rimarkus la konfuzon kaj lian pugnon, sed naive daŭrigis:

– Mi iris al la veturilejo kaj provis malfermi la pordon. La pordo malfermiĝis. Mi eniris tien kaj do, kiujn mi vidis?

Kompreneble neniuj provis respondi, nur scivole rigardis sinjorojn Djurdjik kaj Quendel.

Sed la societon surprizis, ke Quendel estas serioza kaj Djurdjik estas afabla.

– Do, imagu – diris finfine Quendel – mi trovis tie en la veturilejo miajn ruĝabrunajn ĉevalojn.

Ĉiuj surpriziĝis, miris, sed Djurdjik ridegis kaj per la grandegaj mankavoj bategis sur la tablon kaj liaj larmoj komencis flueti.

– Kie vi vidis? Ĉu viajn ĉevalojn? Hi-hi-hi! Nu, tio povis esti sentema sceno. Sed bone estas, ke vi ekvidis ilin, la ĉevaloj ne estus povintaj vidi vin, ja tiuj estas blindaj. He-he-he!

Djurdjik senĉese ridegis, ŝvitis, drinkegaĉis la vinon. Sed Quendel alparolis kolere.

– Ĉi tio ne estas ŝerco, mia sinjoro. Kiu portis miajn ĉevalojn en vian stalon? Respondu, ĉar mi diras, ke vi estas ŝtelisto.

– Nu, tio ne pravas – indignis Djurdjik. – ja mi estis tuttage en mia domejo. Estu saĝa, sinjoro Quendel. Mi ŝatas la ŝercon, sed ĉi tiu estas multe.

– Ej, Infero kaj diablo! – kriis Quendel. – Ĉu vi neas la ŝteladon? Mi portas mil atestantojn, kiuj pravas, ke tiuj ĉevaloj estas la miaj.

– Mi tute ne neas. – kaj nun li denove diable ridegis – sed mi jam diris, ke iu fraŭlo galopis al Starovac, la alia apartenas al miaj gebaptanoj.

– Jes, ili galopis sur miaj ĉevaloj – kriis Quendel.

– Ankaŭ ne sur miaj ĉevaloj, incitetis Djurdjik. – Mi ne havas al ĉevaloj similajn muelist-helpistojn.

– Sed vi sendis ilin.

– Jes. Mi diris al ili iri sur ĉevaldorso. Ili survestis sin en kamparanvestaĵon. Kiel ili akiris la ĉevalojn? Mi ne scias. Mi havas nenion komunan pri tiu afero. Tiu estis iu bona aventuro. Kial vi koleras min? Kaj ĝuste nun dum festo. Dume ni bone fartis. Jam vi retrovis la ĉevalojn. – diris Djurdjik.

– Jes, ja la ĉevaloj jam ekestas, – eĥis la kantoro kaj ternis.

– Paciĝu! – iniciatis la horloĝisto, ĉar li volis helpi sian baptonon.

Sed sinjoro Quendel ruĝiĝis kaj furioziĝis.

– Mi ne paciĝas kun iu ŝtelkomercisto! Neniam!

La vizaĝo de la muelisto iĝis ruĝa kiel la papriko kaj li fariĝis furioza.

– Vi havas multe da mono! Nazplugadu en tio, sed ne ofendu mian honoron. Nome mi estas ano de la Sankta Krono. Se vi estus nobelo, tiam ni povus dueli.

– Quendel indignis pro la diro de Djurdjik kaj fiere diris:

– Mi estas nobelo. Mi estas dubiena nobelo de Pászta (pasta). De kie vi akiris la titolon de nobelo?

– Ĉu? De kie mi akiris tiun? Tuj mi diras – diris la muelisto, kiu eksaltis, kuregis al la kaŝangulo kaj du rustajn glavojn eltiris el la kavo de iu pistujo. Nu, montru al mi, ke vi estas nobelo – kriegis Djurdjik mortpala. – Ni iru eksteren sur la gazonon! Prenu tiun ĉi glavon!

Kelkaj viroj eksaltis por silentigi la mueliston.

– Sinjoro Djurdjik! Estu saĝa! – diris sinjoro Klebe.

Quendel instinkte paŝis malantaŭ la pastoron, sed li vidante, ke la muskolhava kupristo kaj la komercisto de Korpona volus depreni la glavon de la mano de la muelisto, li kuraĝe antaŭen paŝante vigle kriis:

– Volonte mi duelus kontraŭ vi, sed la afero ne povas aranĝiĝi pere de duelo, ja ĉi tio ne estas kavalireca afero.

La filinoj de Djurdjik ŝrikadis, la maljunuloj malesperiĝis. La muelist-helpistoj aŭdante la bruon en la ĉambro, kuregis por helpi al la muelisto. La kupristo-helpisto ne kapablis depreni la glavon de la mano de Djurdjik. Pro tio li ĉirkaŭprenis per siaj muskolhavaj brakoj la talion de la muelisto kaj kunpremis, pro kio tiu ne povis moviĝi.

– Ĉu tio ne estas kavalireca afero? – blagadis la muelisto siajn dentojn grincante pro la senpovo. – Ĉu vi aŭdas la voĉon de la malkuraĝulo? Decidu, ĉu ĉi tiu afero estas kavalireca, aŭ ne.

– Tio estas kavalireca afero – opiniadis la horloĝisto – ja tio okazas inter du kavaliroj kaj temas pri du ĉevaloj. Se tio ĉi ne estas kavalireca afero, tiam tutmonde ne estas kavalireca afero. Ĉu mi pravas?

Ĉi tiun demandon la horloĝisto direktis al sinjoro Klebe.

– Ĝi ne pravas. – refutis sinjoro Klebe – ĉar temas pri tri ĉevaloj.

– Kial?

– Ĉar vi estas la tria ĉevalo.

– Mi rifuzas ĉi tiun opinion.

– Vi meritas tion, ĉar vi ne silentigas la ekscititajn homojn, krome instigas ilin dueli. Mia Dio! Mi hontas, se la famo disvastiĝus, ke inter veturantoj de la ĉaro Molitoris estiĝis kverelado. Pro tio ĉi tiu afero ne estas kavalireca. Ĉu mi pravas, sinjoro senatano Fabricio?

– Kompreneble tio ne estas kavalireca afero – respondis Fabricio – sinjoro Quendel ĉi tie trovis siajn forrabitajn ĉevalojn, do li havas kaŭzon por indigni. Per glavoj ne eblas decidi la pravecon. Tion nur la juĝisto povas decidi, kiu estas la kulpa. Ankaŭ cetere tiu forta homo povas mortbati la malfortan kadukulon kaj oni verdiktas tion al torturo ĝismorte. Plej bone estus, se ili, la kontraŭuloj, interkonsentus.

Sinjoro Klebe akceptis ĉi tiun opinion kaj murmuris mallaŭte sub la lipharoj sian opinion. Saman opinion havis ankaŭ la pastoro kaj ambaŭ komencis silentigi la kolerantojn. Fabricio komencis pacigi sinjoron Djurdjik per saĝaj vortoj kaj la pastoro parolis al Quendel pri pacienco prenante lian mantelon. Quendel klopodis foriri de la pastoro, dirante, ke la pastoroj ne komprenas similajn aferojn.

La Providenco certigis la sukceson por ambaŭ protektantoj. Nome ambaŭ furiozaj leonoj paciĝis, nome sinjoro Djurdjik petis pardonon pro la nepermesebla ŝerco (la pli du lastaj vortoj estas gravaj) kaj efike de tio sinjoro Quendel

manpremis kun Djurdjik . (tio estas grava, ke Quendel manpremis kun sinjoro Djurdjik.) Ĉio estas en ordo.

Ĉio okazis tiel ĉi. Ili premis sinjoron Djurdjik antaŭ sinjoron Quendel, kaj li mallaŭte diris: „Mi petas pardonon.” Quendel etendis la manon por manpremi kun Djurdjik. Djurdjik ekskuis la manon de Quendel tre forte. La vizaĝo de Djurdjik iĝis pala, kiam Quendel flustris al li:

– Mi vidis viajn belajn bovinojn en la gregejo sub la kverkoarboj. Sendu al mi du bovinojn al Béla, krome du jungilarojn por miaj ĉevaloj. La jungilarojn aĉetu en la vendejo de Petz, rimenfaristo. Se vi ne faros ĝin, tiam mi anoncos la aferon al la vicprefekto Paŭlo Görgey.

Kvankam la diraĵoj de Quendel ne estas inter la pacopunktoj, tamen ankaŭ ne aŭdis fremduloj, nur Djurdjik, por li tiuj restis neforgeseblaj. La aliaj kriis „hura!”-n. Simbolon de la paco, la branĉon de la oleoarbo oni devis akvumi. Pro tio ili portigis vinon kaj ili daŭrigis la drinkadon. La bonhumoro pliiĝis, Djurdjik portigis la plej bonan vinon. Ĉiuj estis bonhumoraj, nur sinjoro Djurdjik ĉagreniĝis pro la deziro de Quendel, kiu ofendis lian memrespekton (pro kio li devus mortbati lin.). Li hontis, ĉar la kupristo-metihelpisto trabrakumis lian talion kaj pro tio li ne povis movi sin. Li ne bedaŭris la bovinojn kaj la jungilarojn, sed tiu honto akompanos lin ĝis morto. Kiel ĝi povis okazi? Li ne komprenis tion.

Sed Djurdjik konstante provokis la kupriston.

– Se vi estas homo, venu kun mi drinki vinon per kulero.

– Nu, mi estas ĉi tie, ja mi timas neniun. – diris la muskolhava fraŭlo.

Do, poste Djurdjik verŝigis vinon en du pladojn, li metigis en la pladojn du kulerojn kaj ili komencis ĉerpadi la vinon per la kuleroj kiel la supon. Kiam Djurdjik finis la ĉerpadon, tiam la plado de la fraŭlo jam estis malplena kaj li ĝuste viŝadis sian buŝon.

– Ĉu tiu estis bona, amiĉjo?

– Ĝi povus esti ankaŭ pli malbona.

Laŭ lertaj diboĉuloj, se la vinon oni ĉerpas, tiam la homo pli frue estos ebria. Pro tiu natura miraklo oni drinkas la vinon el glasoj. Sed ambaŭ homoj iĝis nur iomete ebrietaj, nur ilia vizaĝo estis malhelruĝa kaj iliaj okuloj aspektis iomete strange.

– Mi konvinkiĝis, ke vi estas brava homo – diris Djurdjik. – Ĉu vi estas kapabla por elĵeti unu malplenan ovon de la mezo de la ĉambro tra la fenestron?

– Kie estas tiu ovo? – demandis la fraŭlo.

Djurdjik portis el la kuirejo kelkajn malplenajn ovojn, poste li malfermis la fenestron. Nu, tio ĉi estos bona amuzo. La fraŭlo provis elĵeti la ovon, sed tiu ne atingis la fenestron. La aliaj ridaĉis. La fraŭlo iĝis furioza kaj provis elĵeti alian ovon, sed ankaŭ tiu falis sur la kapon de sinjorino Vilner, (bedaŭrinde estas, ke en la ovo estis nenio), sed la ovo restis en la ĉambro.

Tiun necesas ĵeti pli forte – diris Djurdjik subtakse kaj li facile elĵetis la ovon el la ĉambro.

La fraŭlo blasfemis kaj laŭte meditis:

– Kiel vi povis fari tion?

Djurdjik sekrete knedpaston gluis al la ovo, pro kio la ovo iĝis pli peza kaj tiel jam eblis elĵeti ĝin tra la fenestro.

Al la fraŭlo ŝajnis, ke Djurdjik faris iun ruzaĵon. Pro tio ankaŭ li divenis ian insidan ludon. Li portigis unu pladon da farunaĵoj. Poste li petis orfingroringon de sinjorino Vilner. Sed ŝi ne kapablis detiri de sia fingro la fingroringon, pro tio la gefianĉiĝan fingroringon ŝi donis al la fraŭlo.

– Tiu devenas de la karmemora sinjoro Vilner, kiu ne estis forta homo, sed ege ĝentila kaj ege estimis min.

La kupristo metis tiun fingroringon sur la supron de la faruno. Duono de la fingroringo libere videblis.

– Nu! – li diris – iu faru tion, ke per la lango li elprenu la fingroringon el la faruno.

Djurdjik bagatelumante la aferon, diris:

– Mi ne estas pajaco!

La kantoro volis fari la taskon, ĉar instigis lin iu vekiĝanta amo pri la vidvino Vilner, kio movas ĉion. La vidvino havas multe da mono, pro io ŝi koleris la kantoron, sed la kantoro klopodis pruvi sian amon. Pro tio ĉi li anoncis sin por fari la taskon.

Nu, bone estas, la kupristo-metihelpisto permesis, ke la kantoro faru la taskon, ĉar Djurdjik ne volis fari tiun. Ĉiuj rigardis la kantoron. La kantoro klinis sian kapon super la farunon, la kapo proksimiĝis al la faruno, la faruneroj jam moviĝis pro la spiro. Li klopodis levi per lango la fingroringon, sed la kupristo metis la manon sur la nukon de la kantoro kaj la kapo enfalis en la farunon. La fingroringo defalis de lia lango en la farunon. La kantoro iĝis furioza, ternis, liaj barbo, liphararo, hararo, brovoj iĝis farunaj. Ĉiuj ridis dolĉe kaj la vizaĝo de Fabricio sereniĝis, ankaŭ la eta Rozalia dolĉe ridis, kio tre plaĉis al Fabricio, kvankam kaj ekstere kaj en la ĉambro estis jam malhele.

– Tio estas kamparana faro – stertoris la kantoro, – kio deziras venĝon.

Li ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis sur la solivo la frizilon por baki la kukon, li ekkaptis tiun kaj komencis braksvingi per tiu. Sed Djurdjik elprenis tiun el lia mano.

– Ej, do, tio estis nur ŝerco. Vi ne devus akcepti tiun. Pli prave mi povus koleri vin, ĉar via barbo surhavas mian farunon.

– Sed tio estas bona barbo – diris la komercisto de Korpona, – ĉar ĝi estas tute nigra, pro kio oni elektos lin ĝuste tute tial, en la nigra urbo.

– Ne saĝumu, Ŝafranjik – petis lin ankaŭ sinjorino Vilner – prefere kantu ion.

Sed tio ne estus silentiginta la kantoron, se post la ŝerco la kupristo-metihelpisto ne estus kurinta el la ĉambro. Nome ekstere inter la muelilo helpistoj li ne estus ekvidinta iun maljunan ŝafiston, kiu havis fluton. Tuj li diris al la maljunulo: „Ho, mia centjaraĝa maljuna patro, ĝuste mi serĉas vin.” Li trabrakumis, kisadis la maljunulon. La maljunulo sentis la vinodoron de la kupristo, sed tio ne ĝenis lin, ĉar la fraŭlo plaĉis al la maljunulo.

– Venu kun mi kaj kunportu la fluton, ja mi venigas vin al bona loko – diris la fraŭlo.

La maljuna ŝafisto meditis en si:

– Tion ankaŭ mi scias. Sed mi devas atendi mian filon, kiu per ĉarumo portos mian sakon. Ja mi ne povas lasi ĉi tie tiun kiel iun malpuraĵon – li montris al la muelisto-metihelpistoj, kiuj ĉe la muelo-faŭko fervoris.

– Ej, mi portos tiun sakon en la ĉambron kaj tion neniuj forportos.

Kaj la muskolhava fraŭlo ĵetis la sakon (en kiu estis okdek kilogramoj da faruno) sur sian ŝultron facile, kvazaŭ plumo estus en ĝi.

– Hm. Li havis bravan patrinon, kiu suĉigis lin – murmuris la ŝafisto kaj lasis sin akompani en la ĉambron.

Tie oni akceptis la maljunulon ĝoje. Djurdjik ekkriis: „Dio amas min, ĉar li sendis al mi fluton.” – Ĉiuj ĝojis. La meblaron oni portis el la ĉambro dum unu momento. (Nur kelkaj junedzinoj mankis.) La flutisto komencis ŝalmi kaj la kupristo ekdancis la faman dancon „Pozabuiĉki”. Li dancis pli bele, ol okazis en la kortego de la reĝo Svatopluk¹⁰⁸. Poste – ĉar li ne estis laca – li ekkaptis Magdalenan Djurdjik kaj ili dancis la ĉardaŝon, dume foj-foje batadante siajn botojn. Dum la danco li laŭte ĝojkriadis. Eĉ ne la kantoro estis pigra, li klopodis prui sian amon pri sinjorino Vilner, li vokis ŝin danci. Ŝi iomete protestis dirante, ke ŝi manĝis multe, sed poste tamen ŝi iris danci. Nome la kantoro memorigis ŝin al iu el ŝia infanaĝo. Ŝi poste eldiris, ke la kantoro memorigas ŝin al iu kara besto kaj evidentiĝis, ke barono Fehtig havis iun nigran ĉevalon kaj la kantoro similas tiun.

Dume jam ankaŭ Rozalia dancis kun Fabricio laŭ rapida ritmo. Ŝi dancis kiel iu facila papilio. Fabricio kaj ekkaptis ŝin kaj delasis, dume ŝi petole forsaltis de Fabricio. Ŝiaj grandaj botoj klakadis, ŝia ruĝa tuko defalis de sia kolo. Sed ŝia longa hararo tamen kovris ŝian kolon. La tukon oni piedpremis, la botoj vundofrotis ŝiajn piedojn, sed ŝi ne plendaĉis. Sed dume sinjoro Djurdjik faris iun strangan aferon. Ankaŭ li volis danci, kaj pro tio li portis la suĉinfanon en la dancoĉambron kaj bonhumore ekdancis kun li, prenante la bebon. Ambaŭ avinjoj petegis lin ne ĝeni la infanon, ĉar tiu estas ankoraŭ malforta. Sed Djurdjik estis sovaĝiĝinta kaj skuis sian bebon. Li diris:” Ĉi tiel amuziĝas ambaŭ Djurdjik!” La

¹⁰⁸ Pri la reĝo Svatopluk, vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Svatopluk_la_1-a

avinjoj volis depreni de li la infanon, sed li senĉese movis sin rond-irante kiel la turbo de la diablo. Kaj la avinjoj rondiris kun li. Similan paradon neniu vidis ankoraŭ.

Estis ĝenerala bonhumoro. Ankaŭ Quendel ekvidis ĉe la fenestero ekstere iun kaŝrigardantan kamparanan junedzinon, kiu havis dentaron similan al la alabastro. Ŝi havis belegajn nigrajn okulojn kaj ridaĉis. Ŝiajn manojn ŝi metis sur la koksojn kaj movis sin kaj dancis laŭ sono de la fluto. La maljuna donjuano tuj iris al ŝi kaj portis tiun en la ĉambron inter la dancantajn parojn. La komercisto de Korpona, ĉar kun neniu li povis paroladi, sidiĝis sur la supron de la bakforno por dormeti. La horloĝisto vokis danci la etan Esteran.

Ĉiuj dancis, escepte de la ĉambristino, kiun neniu dancigis, kvankam ŝi estis bela virino spite de la lentugoj kaj ankaŭ sinjoro Klebe pasumis tien kaj reen.

La komercisto de Korpona volis gajigi lin kaj dancante alparolis lin:

– Nu! Sinjoro Klebe! Venu inter nin! Voku por danci tiun, kiu ne dancas! – kaj li montris al la ĉambristino.

Ŝi lipumis paŭtante malestime, mordetante la lipojn, kiel ekscitita ĉevalo mordas la buŝferon. Same sinjoro Klebe indignis kaj protestis:

– Kion vi pensas? Mi ne povas danci ĉi tie pro mia posteno.

– Ej, nu! Ankaŭ senatano de Lőcse dancas.

– Tio estas prava! – respondis Klebe orgojle. – ĉar se la senatano kion ajn faras, ankaŭ tiam Lőcse ekzistos. Sed la entrepreno-Molitoris kapitulacus, se la dungitoj ne kondukis serioze, dignoplene.

Ĉi tiu laŭta dialogo ne suferigis la memrespekton de Klebe, sed la kupristo-metihelpisto rimarkis la ĉambristinon, kiu ne dancis. Li delasis Magdalenan kaj iris al la ĉambristino.

– Nu, mi estas ĉi tie – li kriis al ŝi.

– Sed mi ne estas ĉi tie – respondis la ĉambristino morne. Dume ŝi maĉis sian ungon. Tio signifis, laŭ la kamparanoj, ke ŝi rifuzas lin por danci kaj ŝi diris:

– Reiru al via dancantino!

Estis evidente, ke la ĉambristino koleriĝis, sed ŝi estis dezirinda. La kupristo-metihelpisto kaptuniĝis pro la rifuzo kaj sentis sin kiel la taŭro antaŭ la hakilego. Pro tio li trabrakumis la farunan sakon kaj kun ĝi dancis. Jene li faris ĉirkaŭ si grandan polvonubon de la faruno.

Pro tio Fabricio tre ĉagreniĝis, sed li volis diri nenion al la ebria homo, prefere li finis la dancon kaj kun Rozalia li iris al la benko staranta ĉe la forno kaj ili sidiĝis unu apud alia.

– Ĉu vi ne estas laca? – demandis ŝin Fabricio.

– Ne, nur miaj piedoj doloras.

– Sed tamen vi lacas.

– Ne. Ja ne estas sama la doloro de la piedoj kaj la doloro de la animo. Miajn piedojn la botoj vundofrotis, sed mia animo deziras la dancon.

Estis fakto, ke ŝi bone amuziĝis, ja ŝia vizaĝo estis ekscitita kaj ŝiaj okuloj montris la elformiĝintan amon.

– Ĉu ni dancu ankoraŭ? – demandis Fabricio, kiam ili meditis.

– Mi tion volas, ke ni dancu. – respondis Rozalia – sed miaj piedoj doloras.

– Ĉu vi volas forigi min?

– Mi ŝatus akiri ĝojon al Magdalena, ja ŝi ne dancas.

– Ĉu ŝi ĝojus?

– Mi pensas.

– Nu, mi dancos kun ŝi, se oni finas tiun stultaĵon.

Sed li vane atendis tion, pli forte ili daŭrigis. La horloĝisto vekigis kaj komencis estingadi la meĉujojn kaj subite iĝis malhelo en la ĉambro. Poste oni kriis la praan ŝercon: „Permesata estas la kiso!”

Ĉiuj ridis kaj ŝrikis. Fabricio rimarkis, ke en la proksimo iu jupo siblas kaj Rozalia malproksimiĝas de li. Li klopodis ekkapti ŝian manon, sed subite li trovis du streĉitajn manojn defendantaj kontraŭ la kiso. Fabricio ekkaptis ŝian manon. Ŝi vane klopodis eltiri sian manon.

– Hop! Mi ekkaptis vin. Vi kondiĉis, ke mi kisos vin.

– Lasu mian manon! Ja vi rompas tiun.

– Mi ankoraŭ ne vidis knabinojn havantajn rompitaĵajn manojn. Konfesu, ke vi pensis, ke mi kisos vin. Pro tio vi metis viajn manojn al mi.

– Do, mi konfesas tion.

– Ankaŭ ĉi tion mi ne meritis. – diris Fabricio ĉagrene kaj riproĉe.

– Ĉu mi denove ofendis vin?

– Do, jes, ĉar...

– Nu, ne estu infano... (estas strange, ke ŝi atentigas la senatanon, ke li ne estu infano, kio ne plaĉis al li, sed tiu diro estis ege kara.)

– ... vi diris tion, ke mi estas impertinenta kaj malestima – diris la junulo.

– Tio estas frenezaĵo – skuis la kapon Rozalia kaj dum la diskuto lasis sian manon en la mano de Fabricio. – Ja, se ni konsideras ĉion, tiam vi ofendis min.

– Kiel mi ofendis vin?

– Mi diros tion, kiam la meĉujoj lumos.

La pastoro kaj Klebe klopodis fari helecon. Finfine ili sukcesis. La mano de Rozalia ankaŭ nun estis en la mano de Fabricio.

– Nu, mi diras tion. Vi ofendis min, ĉar vi ne volis ekkisi min. Kial? Ĉu mi ne estas sufiĉe bela? (Ŝi sulkis la frunton por esti moroza kaj per lipoj grimacis). Mi koleras vin, mi estas ofendita, sinjoro senatano.

Kaj ŝi tiel gramacadis, ke la senatano emociiĝis.

La flamoj de la meĉujoj ne flagris, kvankam iu fenestro estis malfermita, tra kiu oni ĵetadis eksteren la ovojn. Sinjoro Klebe elrigardis tra la fenestro kaj ekkriis:

– La vento ĉesis! Nubo estas nenie kaj la nokto fariĝis milda. Tuj ekaperos la Luno. La steloj jam videblas.

Ĉiuj rigardis al la fenestro.

– Ĉi tie estas la adiaŭo – flustris Fabricio lace.

Rozalia ne respondis, nur ĝemetis. Fabricio komprenis ankaŭ ĉi tion:

– Pro la adiaŭo mi estas malĝoja kaj maltrankvila. Ni nun disiĝos kaj neniam ni vidos unu la alian kaj mi ne aŭdos informon pri vi. Mi ne povas forgesi vin, nur rememoras vin kiel iun vidaĵon. Kaj tio estas malgaja, ke ĉi tiun vidaĵon mi ne povas ekkapti, mi ne povos postatingi, nur povos memori ĝin. Ĉi tio estas trankviliga. KREDU min, ke pro la scivolo mi demandis multon, sed ne vian sekreton volis ekscii, sed mian sekreton volis dorlotadi.

– Ĉu vian sekreton? – balbutis Rozalia distrita.

– Jes. Mian sekreton. Ĉu vi miras? Ĉu vi volas, ke mi komuniku tiun?

– Ne – ŝi protestis. – Mi ne volas ekscii. Ŝi ruĝiĝis tute. Ŝi konis tion.

– Ej! Vi estas tirano! – Fabricio petoladis kun ŝi amare. – Ĝis nun vi estis muta, sed nun ne lasas min paroli.

– Mia sekretado ne estas kaprico, ĝi estas nur malgaja devigo. Se vi konus min, tiam vi kompatus min. Ne koleru min. Ni ludu kaŝludon. Mi kaŝiĝas kaj vi serĉu min.

– Ĉu estas permesate serĉi vin? – demandis avide Fabricio.

– Jes.

– Kio okazos, se mi ektrovos vin?

Rozalia klinis sin.

– Nu, ni ridos kune... laŭkutime.

– Ĉu poste – demandis Fabricio... ĉu poste? – demandis denove Fabricio, ĉar li ne ricevis respondon.

– Poste – ekparolis Rozalia, sed ŝi ne kapablis daŭrigi – poste... poste... bona estas Dio – ŝi alparolis mallaŭte fermante la okulojn.

Ŝi sentis sur siaj ŝultroj iun brakon. Ŝi ektimeĝis. La brako de Klebe estis sur ŝiaj ŝultroj.

– Vestu vin, mia karulino – diris Klebe komplezante – certe viaj vestaĵoj jam estas sekaj kaj jam sennubiĝis. La pastoro jam antaŭpreparas la jungaĵon kaj ni ekiros nome de Dio.

Fabricio deziris sinjoron Klebe en la inferon, ja tiu konfuzis ilian intiman paroladon. Li diris al sinjoro Klebe:

– Vi povas iri sen la fraŭlino. Quendel povas iri laŭ sia volo, ja jam havas ĉevalojn. Ĉu vi ne aŭdis tion?

– Sed mi aŭdis pri tio – diris Klebe – sed ĉu vi, sinjoro senatano ne aŭdis, ke la buboj distranĉadis la jungilaron de la ĉevaloj kaj disĵetadis la pecojn en la arbaro?

– Hm. Tio pravas. Mi tute forgesis pri tio ĉi. – diris Fabricio, ne hontante. Li komencis ĝoji, ke li povos veturi sur la ĉaro de Quendel kun Rozalia.

Dume Rozalia plenumante la peton de Klebe iris kun Magdalena por vesti sin.

Post pli ol unu horo ili povis ekiri. Jam mateniĝis, blovadis freŝa venteto. La loĝantoj de la arbaro vekiĝadis.

Sen grava incidento ili alvenis al la vilaĝo Jablonka. La pasaĝeroj ankoraŭ dormetis. Ambaŭ ĉaroj estis kunligitaj kaj post la ĉaro de Quendel estis ligitaj la ĉevaloj de Quendel. Tiu longa ĉararo estis eksterordinara vidaĵo kaj la hundoj de Jablonka bojis vidante tiun. En Jablonka Quendel aĉetis jungilaron kaj nun jam ili povis disiĝi de la aliaj, kio ne okazis facile.

Sinjoro Klebe postulis la tarifon de la veturprezo de la du personoj, nome Quendel kaj Rozalia pagu la veturprezon. Sed Quendel diris, ke ili ne sidis en la droŝko kaj ili ne devas pagi la tarifon. – Sed vian ĉaron la droŝko tiris – kontraŭdiris Klebe.

– Sed la droŝko havis tutan pasaĝernombron – diskutis Quendel – pro tio vi nek gajnis nek malgajnis.

– Sed la pasaĝeroj de la droŝko devis piediri kaj dume vi pipfumadis en via ĉaro kiel iu turka paŝao.

Quendel teruriĝis, ĉar li ricevis la titolon turka paŝao, sed li ne lasis sin. Li estis ruza.

– Jes, sed la respondeco estas la mia – ridaĉis Quendel – ĉu mi suferu la malamon kaj la droŝko havu la profiton. Tio ne eblas!

Laŭvorte sinjoro Quendel molestegis sinjoron Klebe kaj nenion pagis. Quendel sidigis Rozalian sur la malantaŭan sidejon kaj instigis per la vipo siajn ĉevalojn kaj la eta ĉaro ekiris sur la serpentuma vojo. La pasaĝeroj de la droŝko gapis mirante la misfaman nababon. Rozalia rigardis malantaŭen, ŝi preninte sian tukon gestadis kun ĝi, poste lasis tiun terenfali sur la vojon.

Fabricio postkuris, ja la tukon ŝi sendis al li. Li levis la tukon, metis sur sian bruston. La ĉaro de Quendel jam malproksimiĝis kaj sen malhelpaĵoj alvenis al Lőcse.

Quendel ne volis porti Rozalian al sia pli aĝa fratino, ja multe da homoj vidis ilin kaj ankaŭ Rozalia scias, ke lia nomo estas Quendel.

Jam samtage li portis Rozalian en la instituton de Matilda Klöster. Vespere ŝi jam vespermanĝis en la instituto kun la aliaj disĉiplinoj. La nova hejmo ne ŝajnis al ŝi agrabla. Ŝi sentis, ke la aliaj rigardas malame kaj moke. Ŝi ne konis la kaŭzon, pro kio estis la tuto deprima. La aliaj rigardis malame, ĉar ŝi estis pli bela ol la aliaj, kaj ili ridis moke tial, ĉar ŝia vestaĵo similis al tio de malriĉulino.

Sed ĉi tiun problemon oni povis solvi facile. Quendel donis multe da mono al fraŭlino Klöster por Rozalia. Li diris al Klöster, ke ili ne povis kunporti vestaĵojn pro diversaj sekretoj. (Li metis la fingron al la buŝo, signante la sekreton. Nome la fraŭlineto estas filino de Miĥelo de Otrókóczy (otrokoci), amiko de Quendel kaj tiu ne volas sciigi sian restadejon. Quendel denove atentigis Matildan Klöster gardi la sekreton. Klöster ekkomprenis la atentigon kaj Quendel petis Matildaan, ke se estus bezonata monsumo por la fraŭlino, tiam ŝi petu nur de li kaj ŝi prizorgu ŝian elitan provizadon. Ŝi gardu la fraŭlineton, kvazaŭ tiu estus propra filineto. Nome ŝia patro estas bonhava, riĉa, grandpotenca homo. Sed bedaŭrinde Matildaa ne havas sian filinon. (Dume la maljuna fraŭlino ekskuzis sin ruĝiĝinte. – Dio gardu min!) Laŭvorte li petis la maljunan fraŭlinon gardi kaj eduki konvene ŝin.

Klöster estus dezirinta ekscii ĉion, sed almenaŭ por konjekti. Ŝi ŝatis la konjektojn, kiuj konstante ekscitis ŝin. Ŝi sentis, ke ŝi havas feliĉon kaj tuj estis favorkora al Rozalia, kvazaŭ ŝi havus kvindek blankajn ŝafidojn kaj inter la ŝafidojn venus iu bunta ŝafido. Ŝi komencis okupiĝi nur pri la bunta ŝafido, sed nun pri la aliaj ŝi ne interesiĝis.

Laŭ ordonoj de sinjoro Quendel jam sekvatage oni venis iris ĉirkaŭ Rozalia. Vendistoj venis, kunportante ŝtofojn, tolojn, punktojn, rubandojn. La kudristinoj mezuris la talion de Rozalia. Matildaa elektis la plej belajn materialojn, el kiuj la kudristinoj kudris la diversajn vestaĵojn. Venado-irado, svarmado estis en la domo. Matildaa serĉis la diversajn butonojn. Laŭvorte ĉiuj moviĝis ĉirkaŭ Rozalia. La disĉiplinoj enrigardis sekrete en la ĉambrojn, kie oni volis fari modan fraŭlinon el Rozalia kaj nun jam pli amikece ridetis.

– Ŝi estas belforma – diradis Klöster, – kaj bela laboro estas kudri ŝiajn vestaĵojn. Karaj miaj! Klopodu fari, bele kudri ŝiajn vestaĵojn kaj utiligi la materialojn laŭ eblo plej utile! Ĉi tio estas la regulo en la instituto-Klöster!

Rozalia imagis sin en la ĉielregno. Pro la ĝojo ŝi eksaltadis kaj dum kelkaj horoj alkutimiĝis al la nova hejmo, kvazaŭ ŝi estus vivinta ĉiam tie. Ja ŝi estis ankoraŭ infano kaj multe da miniaturaĵoj ŝi havos. Ŝi rigardis, karesis la ŝtofojn, punktojn kaj ĝemetis, ĉar tiuj ankoraŭ ne iĝis vestaĵoj.

Fraŭlino Klöster ankaŭ kvarfoje demandis ŝin:

– Ĉu vi estas kontenta? Ĉu vi volas havi ankoraŭ ion?

Rozalia konstante diris:

– Mi estas feliĉa, mi kisas vian manon, ĉio estas tre bela.

Ŝi iĝis ĉiam pli kuraĝa pro la multe da amo kaj pli malfrue tion respondis: (prefere ŝi ne respondintus tion)

– La koloroj de la vestaĵoj ne plaĉas al mi. Oni diras, ke por mi la blukoloro estas pli taŭga, sed blua materialo ne estas inter la materialoj. Ĉiuj materialoj estas nigraj, sed mi ne havas mortinton.) Tiel ŝajnas, ke oni sekretigis la morton de sinjorino Darvaŝ.)

– Vi pravas – diris fraŭlino Klöster tirante la ŝultron, – sed en Lócse ĉiuj devas porti nur nigrajn vestaĵojn. Se iu volas ŝanĝi vestaĵon, tiu devas ŝanĝi urbon.

La aliaj fraŭlinoj (kelkaj estis ŝiaj amikinoj), ja la junulinoj rapide amikiĝas, ili ĉirkaŭis ŝin, ĉar ili sopiris la novajn sekretojn. La aliaj informis ŝin:

– Rigardu nin, ankaŭ ni portas nigran vestaĵon, sed ankaŭ ni ne havas mortinton. Sed tiel ŝajnas, ke iu devas morti, ke mi demetu la nigran vestaĵon.

– Ĉi tio estas stranga – diris Rozalia pensadante. – Kiu devas morti?

– Sinjoro Paŭlo Görgey devus morti, ĉar li mortigis la juĝiston de Lócse. Pro tio la urbo koleras lin kaj ĝia ĉefo ordonis, ke ĉiuj homoj devas porti nigran vestaĵon ĝis oni faros la venĝon. Bone estus, se tiun la diablo forportus kaj finiĝus la sufero. Ĉar vi estas blonda kaj la nigra koloro konvenas al la blondulino. Sed mia hararo estas bruna kaj mi ne fartas bone en la nigra vestaĵo. Kio estas via malbono? Ĉu vi ploras?

– Io falis en mian okulon. – ŝi balbutis mallaŭte.

Ŝi senvole volis elpreni la poŝtukon, sed tiu ne estis en la poŝo. Ŝi memoris tion, ke tiu falis sur la vojon, kiam ili ekiris al Jablonka. Neniiginte ŝi falis en iun brakseĝon. Ŝi jam sciis, ke oni persekutas ŝian patron, sed ŝi ne estis kapabla finaŭskulti la historion, ĉar ŝia koro kunpremiĝis, ŝiaj korpopartoj estis torporaj kaj ŝi ne estis kapabla movi sin.

– Ho, ve! Mia Dio! – ŝi pensis – bone estus, se mi havus la balzamogutojn de onklino Katarina, kiuj estis medikamentoj kontraŭ la doloroj.

En la sama momento iu ĉambristino paŝis en la ĉambron, portante iun falditan tukon.

– Ĉi tiun tukon, kiun vi perdis, sinjoro Fabricio sendas al fraŭlino Otrokóczy.

Ŝi freŝe eksaltis, ŝia sango refreŝiĝis.

– Jes, ĉi tiu estas mia poŝtuko – ŝi diris raŭke kaj avide ekkaptis tiun. – Kiu portis tiun?

– Iu hajduko.

– Mi dankas. Ĉio estas en ordo.

Ŝiaj okuloj estis entuziasmaj kaj estis larĝe malfermitaj:

– Li ektrovis min. La Virgulino Maria sendis lin al mi.

Ŝi gaje dancis en la ĉambro kaj la balkono. Sur la balkono estis rozuoj en lignotinoj, sur kiuj estis multe da floroj. Ŝi sciis paroli al la rozuoj, tiuj ekkomprenis, ke okazis miraklo.

Sed tio ne estis miraklo. Nome fraŭlino Klöster ĉiutage faris vizition ĉe la sinjorino Fabricio, kiu ne malproksime loĝis en sia domo. Ili estis malnovaj amikinoj kaj ŝatis la paroladojn pri la okazintaĵoj. Fraŭlino Klöster ankaŭ hieraŭ estis en la domo de Fabricio kaj rakontis, ke paĉjo Quendel portis novan disĉiplinon. Fabricio, la senatano eksciis ĉi tiun fakton kaj klopodis sendi la poŝtukon kaj anoncis, ke la kaŝludo estas malkovrita kaj nun jam sekvos la interrido.

12-A ĈAPITRO

Maltrankvilaj jaroj

Maltrankvilaj kaj malbonaj jaroj sekvis unu la alian ne nur en la urbo Lőcse, sed ankaŭ al la tuta nacio – laŭ la kronikisto. Tiujn malbonajn jarojn oni devis transvivi, ĉar oni esperis la venon de la ankaŭ bonaj jaroj, ja la tempoj similas al la sinjorinoj, sed inverse. La belaj sinjorinoj preskaŭ ĉiam malplibeliĝas, ofte, sed la malbelaj plibeliĝas malofte. La malbonaj jaroj plibeliĝas kvankam ne ĉiam, sed tre ofte. La sinjorinoj de tempo al tempo portas belan vestaĵon kaj neatendite, senrimarke ili brilas, kiel antaŭ la tempoj de la kurucoj. Niaj animaj kaj korpaj vundoj estos fortontoj kaj estiĝos rozoj. Dio saĝe ordonis, ke la detranĉita mano, kiu batalis por la pravo, denove estu mano kiel la detranĉita korpoparto de la salamandro.

Nun ankoraŭ ĉio estas silenta. La princo, Paŭlo Esterházy (esterhazi), kiu nomis sin Esterhaŝ', la palatino, trankvile sidis en sia fortkaĵo de Frakno inter siaj pentraĵoj kaj artobjektoj. Li estis bonkora, maljuna homo, havanta kamparancarbon kaj modernajn konojn. Li estis grandpotenca, sed ne orgojla, iomete perfortema, sed ne maljusta, kaprica, sed ĉiam saĝa. Lia slogeno estis: „Ĉion fari en la intereso de la celo!” (Sed la celo estis lia propra egoo). Li manĝas akvomelonon, ĉar ĝi purigas la renojn, kukumon pro tio li manĝas, ĉar la acida kukumo plimultigas la acidenhaston de la stomako. Li rajdas, ĉar tio plimalmultigas la grasenhaston de lia koro kaj li dormas, ĉar tiel li fortiĝas, kaj ne dormas, ĉar la nedormado trejnas lian korpon, li jene hardas sin. Laŭvorte li estas enradikiĝinta ŝtatviro, kiu ĉion faras, kio por li estas bona kaj li nur tion faras, kion li pensas bone prezentinta la motivojn.

Ankaŭ la malfeliĉan priheredan leĝon li sciis motivi, kiu ĉiam favoris al la Habsburgoj.¹⁰⁹ „La Habsburgoj ĉiam ekspluatigis niajn bienojn kiel la luantoj la fremdan bienon. Se ni donas tiujn ĝiseterne, tiam ili plibonigas la grundon. Sed se ni ne donas al ili, eĉ tiam ni ricevos tiun. Do, prefere ni donas al ili.”

Paŭlo Esterházy simile pensadis, ja li estis saĝa, sed ne pensis pri tio, ke la Habsburgoj ne estas saĝaj. Nome ili tiel okupiĝas pri Hungarujo, kvazaŭ ili estus farmantoj de la lando, ekspluatigas tiun, sed en la grundon oni ne metas sterkon. Nome la du kapojn havanta aglo nur manĝas, sed manĝaĵon ne donas. Iom ĝi donis, sed nur al Esterházy: la princon titolon kaj dominion de Kapuvár – estanta parto de la havaĵo de la familio Esterházy.

¹⁰⁹ Pri la Habsburgoj, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Habsburgoj> – pri la imperio de Habsburgoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Habsburga_monarkio

Ĝuste li verkis sian libron, temantan pri la trofeo de la familio de Eszterházy (esterhazi)¹¹⁰, dum lia ĉefsekretario, Georgo Inkey, iris al Esterházy. Nome nur tiu povis iri al la princo. Inkey anoncis patosvoĉe:

– La milito eksplodis, mia ekscelenca sinjoro, ĉi tie estas la malamiko. La palatino finis la skribon de la frazo, la inkon forigis el la plumo, metis la plumon al sia orelo kaj turnis sin.

– Kie ĝi estas?

– Iu Bibók, nobelo de Sepeš venis anhelante, kiu estas kapitano de armeo de la tiea prefekto.

– Jam ankaŭ en Buda tiu serĉis vian ekscelencon, dirante, ke Rákóczi estas jam ĉe la limo de Hungario kaj Polujo antaŭe de sia armeo. Sed jam certe li estas en la lando. Johano Görgey kaj Tomaso Esze (ese), kiuj promesis fidelecon al Rákóczi, volas aliĝi al Rákóczi.

– Diable! – diris la palatino – Ĉu tio ĉi ne estas blagado?

– Tio ne estas duba, ke Rákóczi venis en la landon.

– Nu, ne gravas. Li ankaŭ povas foriri – diris la palatino bonhumore – skribu anoncon al lia sinjora Moŝto, kiun mi subskribas kaj portu heroldo la anoncon.

Poste li turnis sin kaj daŭrigis trankvile la skribadon de sia libro.

Kaj Inkey rapide faris la anoncon, en kiu detale li priskribis la tutan historion, kiun rajdanta fraŭlo portis al Vieno. En la anoncon li metis humilan peton de Sigmundo Bibók kaj arestoordonon de la prefekto Paŭlo Görgey. Li petpetegis al lia sankta moŝto rekrutigi, ja li ne konis lacecon por servi Lian moŝton.

La respondo rapide alvenis. Tiun portis kortega kuriero ĉevalpelante ĝismorte. Kiam la kuriero deĉevaliĝis, tiam la ĉevalo terenfalas.

La reganto urĝe vokigis la palatinon al Vieno. Tiu ordonis al la palatino, ke la denunciinto ricevu la senditan sakon da oro, krome li donu al tiu taŭgan postenon.

La princo estis ĉagrena, ĉar li devas iri al Vieno, ĉar li ne ŝatis partopreni enuigajn interkonsiladojn. Sed li ordonis fari antaŭpreparojn por veturi kaj pro tio estiĝis grandaj iradoj-venadoj en la fortikaĵo. Li konis la aferon de Bibók kaj la arestadan ordonon skribitan de Paŭlo Görgey. Poste li vokigis Bibókon, kiu restadis en la fortikaĵo de Frakno. Li demandis Bibókon pri ĉio raporti al Lia Moŝto.

Bibók raportis pri ĉio, pri sia malkovro, laŭ kiu Esze kaj liaj kunuloj havas pulvon kaj pafilojn. Li diris, ke li devis ekkapti Johanon Görgey, la pli aĝan fraton de Paŭlo Görgey.

– Kial vi ne ekkaptis Johanon Görgey laŭ la ordono?

¹¹⁰ Pri la familio Esterházy, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Esterházy>

– Ĉar mi pensis tion, ke mi povas esti pli utila por Lia Moŝto, se mi portas al vi la famon.

– Diable! Kiel vi memoris Lian Moŝton? – demandis la princo.

Moko aperis sur la vizaĝo de la princo, kiu tute ne plaĉis al Bibók.

– Ĉar mi treege ŝatas Lian Moŝton. – li respondis, dum li rigardis al la plafono, sur kiu estis freskoj.

– Ĉu? Nu, ĉio estas en ordo. Lia Moŝto sendas al vi saketon da oro kaj viajn dokumentojn.

La dokumentojn kaj la sakon li donis al iu halebardon havanta gardisto, pro la honoro de la palatina digno tenanta la laŭrangon distancon inter ili, kiu donis tiujn al Bibók.

Bibók transpreninte tiujn aĵojn, rigardadis tiujn kaj estis sufiĉe malkontenta pro la enhavo de la sako.

– Ekscelenca Princo – li diris aŭdace antaŭpaŝante – mi petis ankaŭ ceteraĵojn. Mi perdis mian postenon, ĉar lin mi servis.

– Jes. Lia Moŝto ordonis ankaŭ ceteron kaj mi diras tiun. – Bibók tre ĝojis, liaj okuloj larĝe malfermiĝis.

– Nun mi nomumas vin al la kancelario kiel fornhejtiston – diris la palatino – kaj nun vi komencas vian karieron ĉe iu forno.

– Via ekscelenco ŝercas pri mi!

– Diable! Mi neniam kutimis ŝerci kun similaj homoj kiel ci. Sed vi ricevos ankaŭ dekdu bastonbatojn, ĉar laŭ la ordono vi ne ekkaptis Johanon Görgey.

Bibók eksiblis kiel serpento, se iu surpaŝas ĝin.

– Mi protestas, sinjoro mia! Mi estas nobelo.

– Tiukaze ci ricevos ankoraŭ ses bastonbatojn. La nobelo ne frakasas kestegojn kaj ne iras en fornotruon por spionadi. Gardistoj! Voku la juĝiston!

– Mi iras al la reĝo por diri mian plendon.

– Ci ricevos ankoraŭ ses bastonbatojn. Mi timas tion, ke ci ricevos tro multe da bastonbatojn.

– Pro tio ĉi, ci nun jam foriru!

Sinjoro Bibók ne havis senkulpigon. En la mezo de la fortikaĵo de Frakno oni batis sur lin la dudek kvar bastonbatojn. Li tre furioziĝis kaj promesis venĝon kontraŭ la palatino. (La lakeoj priridis lin dirante, ke li estas superflua paroli.) Sed li decidis atingi la imperiestron kaj venĝi sian ofendon.

Nu, jes. Li vane iris al Vieno, oni ne lasis lin iri al Lipót. Sed tamen estis bone, ke li estis en Vieno. Nome li ekkonatiĝis kun Ljubomirsky pola gubernatoro, kiu restadis en la imperiestra urbo. En iu drinkejo de Vieno interbatado estiĝis dum amuzo inter tri drinkadantaj ĉeĥaj sinjoroj kaj la gubernatoro. Bibók apenaŭ konis la gubernatoron, sed sciis, ke tiu devenas el Béla kaj li helpis forpeli la tri ĉeĥojn. Pro tio la gubernatoro estis dankema kaj akceptis Bibók-kon kiel serviston

kaj helpis lin. La gubernatoro petis aŭdiencon por aperi ĉe la reĝo. Sed ĉe la reĝo li ne sukcesis peti aŭdiencon, sed la ĉiopova kanceliero akceptis Bibókon por aŭskulti.

La kanceliero ekkomprenis la cirkonstancojn, sed kun bedaŭro diris:

– Kara mia! Mi ne povas helpi vin. Mi ne povas senkulpigi vin, sed ankaŭ ne Lia Moŝto. La palatino estas grandpotenculo, kontraŭ kiu ni nenion povas fari. Krome tiu iomete havas pravon kaj ankaŭ Lia Moŝto havas saman opinion. Nome vi estus devinta ekkapti tiun Johanon Görgey.

– Sed tiuokaze mi ne estus povinta anonci al Lia Moŝto la danĝeron de la atako.

– Tio ne estus granda malbono – diris la kanceliero lace ridetante, – Rákóczi estus enveninta ĉiamaniere. Kial ni devus scii tion? Ja, ni ne povus malhelpi tion. Sed se vi ekkaptintus Johanon Görgey, tiam Rákóczi venus sen tiu.

Ĉi tio estis ege simpla kaj prava, tiel ke la aventuristo konfuziĝis.

– Jes, vi havas pravon – murmuris li apenaŭ aŭdeble. – sed nobelon bastonbatigi estas terura afero. Ĉi tio deziras venĝon.

La kanceliero tiradis la ŝultron kaj nerve karesis sian barbon. (Ĝi estis simila al la barbo de reĝo Ludoviko, la 14a) Nome ĉiuj sciis kaj sciis ankaŭ Bibók, ke la karesado de la barbo signifas la finon de la aŭdienco.

– Cetere – daŭrigis Bibók fanfaronante – ni ekkaptos Johanon Görgey, se mi havos ŝaton por fari tion.

– Nu, ĉi tio estas ĝusta parolo. – ekkriis la kanceliero vigle, – do, ekkaptu Johanon Görgey kaj mi garantias la kompensaĵon por la insultaĵoj.

Ĉi tiel Bibók foriris havante malmulte da rezultoj el Vieno kune kun sia nova mastro, la gubernatoro, al Béla kaj restis tie kiel „polano.” Bibók estis kelkfoje kamarado de la gubernatoro, alifoje servisto de tiu. Li ĉiam riproĉis sian mastron antaŭ la geservistoj. Li ne havis konstantan salajron: hodiaŭ festeno, morgaŭ malpleno. Li trejnadis la ĉevalojn de la mastro, interbatadis por tiu. Li akiris junedzinojn al tiu. Li purigis la pafilojn, pipojn de la mastro. Li ebriigis kaj distris gastojn de la mastro kaj por tiuj aferoj li povis ciumi la mastron. Nur ĉi tiel li povis toleri la kapricojn de Ljubomirsky (Ljubomirski).

Sed Bibók ne estis trankvila. Li estis nerva. Pro la batalbruo li estis maltrankvila. Laŭ la famoj Rákóczi venkis kontraŭ la germanoj, li okupis Transilvanion kaj ekhavis ankaŭ Transdanubon. La milito ekscitis lin. La militado estis tiutempe travivaĵo kiel la ĉasado, fiŝkaptado, aŭ sporto. Maljunaj hungaraj sinjoroj ne estis kapablaj interbatadi, sed aliĝis al Rákóczi, ĉar ili ĝuis la aventurojn. Sed ili estis maltaŭgaj por batali, nur babilaĉis, saĝumis kaj malbonigis la disciplinon. Ne eblis liberiĝi de ili kaj ili ĝuis la aventurojn. Nome ĉe la bivakfajroj okazintaj okazaĵoj – manĝado, drinkado – estis plezuroj de la nobela vivo.

Do, tio ne estas miraklo, se Bibók, kiu tre ŝatis la aventurojn, sopiris al tiuj lokoj, kie eblas akiri kaptaĵojn, eblas pavi kaj perforti. Kiel li povas iri tien? La imperiestranoj, kie eblas ricevi veran soldatan rangon, bastonbatigis lin. Ankaŭ nun li koleris la palatinon, kiu dungis lin fornohejtisto. Pro tio li grincigis la dentojn kaj hontis kaj ne diris al Ljubomirsky. Do, li ne povas iri al la imperiestranoj, eĉ ne al la kurucoj kaj nek al Görgő, Ja en Görgő tuj ekkaptus lin Paŭlo Görgey. Ĉe la kurucoj ĉiuj scias, ke li konas la enhavon de la kestoj de Tomaso Esze kaj en la forntruo li priaŭskultis la planojn de la kurucoj kaj tiun perfidis al Paŭlo Görgey, vicprefekto kaj ĉion ĉi li diris al la palatino.

Unuvorte li nenien povis iri kaj en la setlejo Béla li sentis torturon de Tantalo.¹¹¹ (Tantalus estis greka reĝo, kiu forŝtelis – laŭ la mitologio – manĝaĵon, trinkaĵon de la Dioj. Pro tio li estis punita en Hadeso¹¹²: Tiu devis malsati, soifi ĝis la mentono en akvo inter fruktoj. De tie devenas la onidiro: torturoj de Tantalo.) Li ne volis aŭdi pri bataloj, sed ĉi tie ĉiuj parolis pri tiuj. Komercistoj venis – iris, multe da homoj fuĝis, kies domojn forbruligis la imperiestranoj, aŭ la kurucoj. Béla kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ŝajnis sekura loko. Bubaĵon farantaj soldatoj fuĝis ĉi tien de antaŭ la puno. Ĉi tien ĉiuj informoj alvenis: kaj la gravaj kaj la bagatelaj. Ĉiumonate unufoje ĉi tie tranoktis la ĉaro-entrepreno de Molitoris kaj ĝiaj pasaĝeroj en la tranoktejo „Al la luno bojanta hundo.” Ili rakontis la gravajn okazintaĵojn. Ankaŭ Bibók tie estis kaj pridemandadis ilin, ĉefe paĉjon Klebe: „Kio estas novaĵo en Lőcse? Kiu mortis? Kiu edziniĝis? Kiu estas helpanto de la urbo? „Klebe estis saĝa, kiu ĉion sciis pri la urbo, pri la afero de la urbo, departemento.

- Ĉu la homoj portas ankoraŭ nigrajn vestaĵojn?
- Jes.
- Kiu estas nun la juĝisto de Lőcse?
- Sinjoro Nustkorb.
- Tiu estas frivola homo, ja nenion volas fari.
- Tiu farus, sed ne povas fari.
- Paŭlo Görgey certe ne havas malbonon.
- Tiu havas neniun malbonon.
- Ĉu tiu ankoraŭ ne estis en Lőcse post la murdo?

– Tiu estis tie kiel fantomo – ridis Klebe. – Tio estas freneza kazo. La karmemora Kramler, la eksjuĝisto, ripozu en paco, estas entombigita ĉe la muro de la preĝejo. Paĉjo Pleck, la sakristiano, promenadis iunokte apud la preĝejo kaj rimarkis ĉe la Lunlumo, ke la tombo de Kramler apertiĝas kaj iu figuro paŝis el la tombo. Li rigardas la figuron kaj vidis, ke ne la juĝisto paŝis el la tombo, sed tiu

¹¹¹ Pri Tantalo, vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Tantalo_\(mitologio\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Tantalo_(mitologio))

¹¹² Pri Hadeso vidu la artikolon ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Hadeso>

simila estas al Paŭlo Görgey. Efike de tio paĉjo Plech forkuris siajn dentojn klakigante.

– Tiu maljunulo certe sonĝis.

– Ankaŭ laŭ mi, sed Zernjecki, la noktogardisto, rekonis Paŭlon Görgey, kiu venis de la katedralo kaj postiris lin. La fantomo iris al la strato Só (salo). La fantomo kuris, la gardisto postkuris. La gardisto povis ekkapti, sed nur lia mantelo restis en lia mano...

– Tio estas frenezaĵo.

– Jes, sed tre komplikita frenezo estas tiu. Nome sinjoro Grodkovsky, la fortikaĵkomandanto diris, ke la mantelon havis Paŭlo Görgey, ja Ŝtefeci, la tajloro, kudris ĝin por Paŭlo Görgey. Bonvolu diveni tion ĉi!

– Ĉu la tombon vi ne rigardis?

– Sed jes. ĝi ne estis apertiĝinta. Sur ĝi estis bela gazono kaj kelkaj sekigitaj arbaraj floroj.

– Kiam okazis tiu kazo?

– Proksimume antaŭ unu jaro.

En la urbo Béla la gubernatoro estis nur simpla oficisto, kiu estis grandpotenca kaj havis grandan prestiĝon. Sed en la urbo estis ankaŭ vera grandsinjoro, la barono Paloĉay. Ĉion li posedis en la granda regiono. Li estis bofrato de Aleksandro Károlyi (karoĵi)¹¹³, kuruca generalo. Li estis parenco de la iama pola reĝo Stefano. La familio Paloĉai ankaŭ nun ricevas reĝan rezidejon. Tie la maljuna reĝo kaj la idoj de la reĝo kare, bonvole akceptas la baronon Paloĉai.

Sed li neniam iris en reĝajn rezidejojn, ĉar li ne havas monon. Kie li povus akiri tion? Nur la diboĉanta homo havas monon, sed tiu malŝparas tiun, anstataŭ tio, ke li donus al la geservistoj, aŭ la fripono havas monon, kiun li diversmaniere forprenas el la poŝoj de la honestaj homoj.

Paloĉai neniam ion ajn vendis. Se la komercistoj volis aĉeti liajn grenon, lanon, tiam ili unue marĉandadis, sed ili ne sciis interkonsenti, kvankam kelkfoje ili pagis al li la petitan koston, tamen en la lasta momento li rifuzis la interkonsenton. Tiukaze li diris: "Se por li estas bona la kosto, tiam ankaŭ por mi bona estas la varo." Pro tio la greno restis en la grenejo, kie la kalandrao manĝas la grenon. Liaj brutoj mortas pro marasmo kaj iliaj ledoj ŝimas sur la subtegmento, nome ankaŭ tiujn li ne vendis.

Li estis cinika hungara homo, kiu pri nenio okupiĝis. Liajn latifundiojn liaj ekonomiaj oficistoj aranĝis vole-nevole, liajn blankajn vestaĵojn purigis sinjorino Vitnjedi, lia malproksima parenco. Por tagmanĝi, vespermanĝi li iris al la restoracio „Al la luno bojanta hundo.” Ĉar tiun ĉi drinkejon li havis kaj la

¹¹³ Pri la militestro Aleksandro Károlyi, vi povas legi ĉe:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Sándor_Károlyi_\(militestro\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Sándor_Károlyi_(militestro)) – pri kurucoj:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Kuruco>

hungaraj pasaĝeroj venis en tiun drinkejon, pro tio tiu estis lia hejmo, kie li fartis bone inter siaj hungaraj parencoj. Ĉi tie li vivis sian magnatan vivon kaj kantis hungarajn kantojn kune kun la ciganorkestro. Dume li ŝmace sorbis la kuminsupon, ja li estis tre maljuna. Plurfoje li manĝis- drinkis je kredito en la restoracio, nome en la kastelo de Paloĉai la kuiristoj kuiris nur por li mem. Li iris en la kastelon nur por dormi. Alitempe li ne estis en la kastelo.

Sed tio estis bona, ke la grenejoj de Paloĉai estis plenplenaj. Estis en tiuj aveno, sekalo, ĉar speciala mastrumado komenciĝis en Hungarujo dum la kolero de la nacio vigliĝis. La sonorilego ĝis nun plorigis la mortintojn, sed nun oni faris el ĝi kanonojn por plimultigi la mortintojn. La plugantasemanta homo deĵetas la blankan antaŭtukon kaj faras milittendon. Oni faras el la falĉiloj glavojn. Nome ni semas ne sekalon, tritikon, sed sangon, nome oni volas rikolti liberecon. Pri la senato de Lőcse ni ĝojis aŭdi la sciigojn kaj tuj sendis Antonion Fabricio kaj sinjoron Moŝtel al la urbo Béla por preparoli la aĉetadon de greno-sendkvanto de Paloĉai. Ĉi tiel volis pretigi sin Lőcse al la vintra sieĝo. Kaj tio sekvos pli malfrue, ke la greno estos pli valora por Lőcse, ol por la barono Paloĉai.

La delegitoj alvenis al Béla, sed Paloĉai ne volis aŭdi pri la vendo de la greno kaj pro tio li riproĉis la grizhararan oĉjon Moŝtel.

– Ĉu vi pensas, ke mi ŝtelis la grenon por malŝpari tiun tiam, kiam neniu havas tiun? La greno restu plu ĉe mi. Povas esti, ke venos ankoraŭ mizeraj jaroj. Ankaŭ por mi la greno valoras tiom, kiom ĝi valoras por vi.

– Mi protestas, ĉar tio ne veras – kriis la juna senatano vigle, pro kio Paloĉai surpriziĝis. – Ĝis sinjoro barono kreskigas sian ventron, ni volas nutri dum la vintro armeojn de Francisko Rákóczi, kiujn ni lasis enveni en la landon la 16-an de novembro. Ili preparas sin por morti por la komuna patrujo, kiu helpis vin plej bone pligrandigi vian havaĵon, sinjoro barono.

Fabricio diris ĉi tiujn vortojn ekscitite, sed ankaŭ riproĉis Moŝtel la junan senatanon: „Ej, Antoneto!” Sed Paloĉai nur ridis kaj vokis al si sinjoron Ferenĉik, la drinkejmastron:

– Ĉu vi aŭdis, Ferenĉik? Ĉi tiu juna sinjoro tion diris, ke mi nur pligrandigas mian ventron. Povas esti, ke li pravas. Li estas krudulo, sed kuraĝis diri tion al mi. Kiel oni nomas vin, sinjoro?

– Fabricio.

– Kiom da mono vi povas doni al mi por mia greno?

– Diru la unuan vorton, sinjoro barono.

– Ĉio estas en ordo – diris la maljunulo – Mi donas la grenon al Lőcse kontraŭ greno de la sama kvanto kaj kvalita.

– En ordo estas – diris la pli juna senatano manpremante kun la barono.

– Sed atentu min – diris la barono. – En la malantaŭa kastelo estantaj ses grenejoj havas la plej bonvalitan tritikon. Tiu devenas el la Hungara Ebenaĵo. Sur ĉiuj tritiksemoj estas bildo de Maria! Samajn semojn bonvolu redoni.

– Kio ĝi estas? – demandis Fabricio cerbumante kaj rigardis sinjoron Moŝtel.

– Ĉu vi ankoraŭ ne vidis la tritikon sur ĝi la bildon de Maria? Ferenĉik, portu al mi unu mankavon de tiuj. Sed treege rapidu!

La Lócseanoj rigardis unu la alian, iliaj okuloj mute paroladis kaj ili konstatis, ke ne estas inde marĉandadi kun la barono, ĉar li postulos reen katolikan tritikon.

Fabricio la vortojn „katolika tritiko” mallaŭte flustris, sed tuj ekaŭdis la barono kaj plaĉis al li.

– Ĉu katolika tritiko? Tion mi ne aŭdis. Ĉar vi timas tiun, pro tio ni ne nomu „bildo de Maria”, sed diru, ke sur la tritiksemoj estas iu signo... Tuj vi ekvidos tiun. Laŭ ni, maljunaj bienmastroj, nur tiuj ĉi semoj estas taŭgaj semgrenoj.

– Tio estas ĝusta, sinjoro barono, – sed la plej bona situacio estas la plej klara situacio. – diris Moŝtel. – Mi tion lernis, ke la plej bona estas la konstanta mono. „Mi portas la varon kaj donas la monon.”

– Estas memkompreneble – diskutadis la barono, – sed mi ellernis ankaŭ la malbonon. Nome mi estas avara kaj envia. Se mi vendus mian grenon por iom da mono, tiam tiu penso suferigus min, ke aliaj donintus pli multe da mono. Kaj pro tio mi ne scius dormi. Krome mi estus envia, ĉar la konstantan monon Quendel pruntedonus al Lócse. Kial mia tritiko dikigu la monujon de Quendel?

Dume Ferenĉik portis la mankavon da tritiko. Ambaŭ senatanoj interesiĝante rigardadis la semojn, sur kiuj ĉe iu fino videblis la bildo de Maria.

– Kiel ni entreprenu tiun kondiĉon, ke nur la samajn semojn ni redonu?

– Ĉu ne estas la signo sur ĉiuj semoj?

– Sed jes, sed...

– Tiukaze tiujn vi kapablas redoni facile – instigis ilin la barono.

– Sed povas esti, ke vi, sinjoro barono, postulus, ke po semoj ni redonu la tritikon rigardante la signojn.

– Vere, tio estus longa laboro, kaj mi ne povus ricevi la tutan kvanton, ĉar la transpreno de la semoj daŭrus cent jarojn.

La maljuna barono estis obstina. Ambaŭ senatanoj provis persvadi lin diversmaniere, sed li ne volis vendi la grenon. Sed ĉar la Lócseanoj devis aĉeti la grenon, ili tamen interkonsentis tiel, ke Lócse devos redoni la saman kvanton kaj kvaliton el la tritiko al Paloĉai.

Ĉi tio estis la politiko de la barono. Nome pli bone estas vendi la varon sen mono por la sama kvalita kaj kvanta varo.

La menciita restoracio vintre havis gajajn tagojn. Sinjoro Ferenĉik komencis konstrui la fundamenton de sia etaĝa domo. Ankaŭ Bibók multfoje amuziĝis.

Ĉiam estis dek, aŭ dudek Lócse-anoj en la drinkejo, kiuj volonte paroladis kun li pri la hejmaj aferoj dum drinkado.

– Ĉu la urbo Lócse ankoraŭ nun estas nigra urbo? Sed jam ĝi lasis enveni la husarojn portantajn ruĝan pantalonon.

– Nome ili devis lasi enveni tiujn.

– Sed la virinoj portas ankoraŭ nigran vestaĵon. Ĉu ne?

– Hm. Ne gravas, la kurucoj ektrovas la hominon sub la nigra vestaĵo.

– Kio okazis pri la afero de Paŭlo Görgey?

– Nuntempe oni ne parolas pri tio.

– Ĉu la kunvenoj de la departemento estas ankaŭ nun en Görgő?

– Tie.

– La homoj estas frenezaj, ĉar tie oni defendas Paŭlon Görgey.

Sed oni kontraŭis ĉi tiun rimarkon. Ĉar la homoj ne estas frenezaj. Ja estas inde iri al Görgő, ĉar tie la gastamo de Quendel estas unika. Ankaŭ la saksaj sinjoroj tien iras por amuziĝi ĉar tie ne devigas ilin la malpermeso de Lócse.

Bibók kaj liaj kunuloj pri ĉi tiuj aferoj paroladis vintre ĉiuvespere. Sed la fantazio de la liveristoj ne interesis lin. La liveristoj miris pri la feliĉo de Quendel, kiu faris la restoracion en Görgő, ke la vicprefekto ĝoju. Ja se li ĵetas en marĉon unu ormoneron, tiam aperos tie unu kaldrono plenplena de oraj moneroj.

Dum la senatanoj ĉi tie restadis, ili ne paroladis pri politiko de la urbo kun Bibók, sed ankaŭ ne kun la liveristoj. Sed dum la karnavala edeno iĝis la restoracio la „Al luno bojanta hundo” de Quendel. Sinjoro Klebe alvenante okupis sian lokon en iu angulo ĉe tablo. Nome la ĉaro Molitoris iris en iun kavon pro la neĝblovado kaj rompiĝis. Tri tagojn daŭris ĝia riparo.

Dum tiuj tri tagoj ili ĝuis la politikajn okazintaĵojn, pri kiuj ili paroladis dum la vespermanĝoj. Ĉefe sinjoro Klebe adoris la gloron de la saksoj. Jam post la konsumo de la kvara glaso da vino, li larmiĝis.

– La infektadon ni jam havas. Ĉi tie estas jam nenio. Nustkorb, la juĝisto estas azeno, sed al neniŭ diru, ĉar mi ne volas, ke li sciu mian opinion pri li. Li sentis, ke li devus ion fari sed li nenion faras. La loĝantoj ribelas, ĉar ili devas porti la nigran vestaĵon kaj ankaŭ la urbo faras nenion.

– Sed pro tio la magistrato ne havos prestiĝon – diris sinjoro Bibók.

– La prestiĝo jam malaperis.

– Ĉu ili vere faras nenion?

– Ili faras ĉion nerve dise-mise. Talentulo ne estas inter ili.

– Ili laŭdas la junan senatanon, kiu estis aŭtune ĉe Paloĉai.

Klebe nur mansignis pripaŭtante.

– Tiu ne estos estro.

– Kial?

– Ĉar tiu enamiĝis al hungara fraŭlino.

– De kie vi scias tion?

– Ĉar mi portis la adoleskantineton sur la Molitoris. Sur la vojo de Buda du bubaĉoj forŝtelis liajn ĉevalojn kaj mi portis ŝin plu. Hm. Sed baldaŭ mi rakontos la faman vespermanĝon ĉe la muelisto de Ljeŝkova. Tie sur tiu vojo estiĝis la interrilato inter ili. De tiam ili renkontiĝis en ĝardeno de la urbo, sed ĉie ili promenis. Nu, mi ne bedaŭras tion, sed mi maltrankviliĝas pro la sorto de la urbo. Kvankam Dio ne lasas dikti la farendajn aferojn, tamen io devus okazi. Aŭ la loĝantoj eksigu la magistraton, aŭ la magistrato kondamnu sinjoron Paŭlon Görgey. Sed tio ne povus okazi, ke nun jam ne nur la sinjoroj vizitas la restoracion de Quendel en Görgő, sed jam ĉiudimanĉe ankaŭ la loĝantoj ekskursas al Görgő kaj ĉe la urbolimo ili demetas la superan nigran vestaĵon kaj en buntaj koloraj vestaĵoj paradas, pavas. Mi pensas, ke Paŭlo Görgey ridas pro tio, ja li bone vidas tiujn el la fenestro de la kastelo, kie estas la restoracio de Quendel.

Tempe de noktomezo oni paroladis pli vigle, ja la ĉefa demando de la Lőcseanoj estas la afero de Görgey. La singarda Klebe iĝis ribelanta kaj ankaŭ minacadis, se la homoj ne akceptas lian konsilon, kiuj teruraĵoj okazos. Kvankam ankaŭ li ne sciis eldiri la farendaĵojn. Nustkorb estas honto de Lőcse. Bibók faris mistrafan parolon kaj ne neis, ke li konas iun sekretan ilon, kiu helpus la saksojn senriske.

Kiam la lango de Bibók ellasis la mistrafan parolon, Klebe iĝis atentema kaj komencis pridemandadi sinjoron Bibók.

– Pri kia sekreta ilo vi parolas?

– Tiun mi scias.

– En kiu apoteko oni vendas tiun?

– Oni vendas tiun nenie. Min ne interesas la saksoj de Lőcse kaj Nustkorb.

– Ĉiuj honestaj homoj helpas la honestajn homojn.

Efike de tio ĉi Bibók tiradis la ŝultrojn kaj iĝis ĉiam pli kaj pli diskreta. Pro tio Klebe iĝis pli scivola. Pro la scivoleco Klebe ekkomencis plori kaj diris, ke li ne povus transvivi, ke li ne havos la tutan konfidon de sia kara amiko Bibók el Béla, kiun li tre amas kaj honoras.

Pro tio Bibók emociiĝis kaj etendis siajn manojn al Klebe.

– Klebe, mia maljuna amiko, ne estu infano. Mi ne volis diri bagatelaĵojn, kiuj premus vian animon.

– Sed vi ne priparolis al mi tiun sekretan ilon.

– Tiu ilo por iu homo estas medikamento, por la alia homo estas veneno.

– Mi ne komprenas tion klare.

– Ja ni nur paroladas – diris Bibók gaje.

– La homo parolas multe kaj malmulte diras. La multajn parolojn kaŭzas la drinkado de vino.

– Nur la tempo pasas, kaj la aferoj estas ne solveblaj.

– Tio estas malgaja afero.

– Kio okazus, se ne ĉi tiel estus? – saĝumis Bibók. – Tiam mi nun rapidegus por helpi la Lőcse-anojn, ĉar mi konas iun metodon, kiel ili povus venki. Sed aliulo rapidegus por helpi sinjoron Paŭlo Görgey, ĉar ankaŭ tiu havas iun metodon. Kaj tiam nenio ŝanĝiĝus. Ne estas bono korekti aferojn de la Providenco.

– Nome ĝi estas evidenta – diris Klebe riproĉe iom ŝovante sian glason, – ke vi diras al mi nenion. Ni iru for por dormi. Sinjoro Ferenĉik, mi pagas.

– Ankoraŭ estas frua tempo por dormi – diris sinjoro Ferenĉik.

– La dormo estas pli bona, ol la superflua babilaĉo. – diris Klebe.

– La ebrio estas pli bona, ol la frua sonĝo – kontraŭis Bibók.

– Sed mi jam iras enlitiĝi – oponis Klebe.

– Ej, restu ni ankoraŭ! He, kelnero!

Hans, la nova kelnero de Vieno, rapidegis al ili kaj demandis:

– Kion vi petas? Ĉu vinon? Ĉu bieron?

– Vinon – respondis Bibók – nu, bonvolu sidiĝi, mia pli maljuna frato. – Prefere mi diras la sekreton, se vi tenas ĝin. Kial vi staras tie ĉi, Vi, mallerta? – li demandis la kelneron.

– Ĉu en botelo, aŭ en glaso?

– Portu tiujn en glasoj.

– Ĉu ok decilitrojn, aŭ du decilitrojn?

– Memkompreneble ok decilitrojn.

– Ĉu novan, aŭ malnovan vinon?

– Malnovan.

– Ĉu blankan vinon, aŭ ruĝan?

– Mi vangofrapos vin post la sekva demando, ke vi kredas, ke la ĉielo estas kontrabaso.

Hans portis la vinon kaj ili eksidis strikte unu apud alian.

Paŭlo Görgey ne estas fidinda homo – flustris Bibók, – kaj mi konas liajn multajn kulpojn. Li taŭgas nek al la kurucoj nek al la imperiestranoj. Li servas la diablon. Kiam Johano Görgey volis aliĝi al Francisko Rákóczi, Paŭlo Görgey tuj ordonis por ekkapti sian fraton.

– Tio estas terura, – siblis Klebe.

– Ĉu? Kion dirus Francisko Rákóczi, se li scius tion?

– Certe li senkapigus tiun.

– Kion dirus la Lőcseanoj?

– Ili ekspirus kaj demetus la nigrajn vestaĵojn.

– Mi parolas pri tio ĉi, kara Klebe. La urbo Lőcse finus la proceson kaj povus daŭrigi siajn aferojn.

– Vi pravas, – diris Klebe raŭke, – sed estus bone, se ni havus tiun arestigan ordonon.

– Tiu ordono ekzistas.

– Kie?

– Mi konas ĝian lokon.

– Kiel eblas akiri tiun?

Bibók kubutumis sur la tablon, la kapon metis sur siajn dikajn mankavojn kaj rigardis ridaĉante la honestan vizaĝon de Klebe.

– Tiun ni devus aĉeti kiel la Lócsanoj aĉetis la grenon de Paloĉai, se ni volis vivi.

– Nun ni aĉetus la morton de tiu homo, kiu gardas la ordonon en iu skatolo. Bone estus, se Nustkorb estus pli saĝa.

Klebe rigardis malespere la fumon en la ĉambro kaj cerbumadis. Tuj li metis sian vilan manon sur la brakon de Bibók kaj raŭke flustris:

– Ĉe kiu estas tiu ordono pri arestado?

– Divenu, paĉjo Klebe!

– Ĉu povas esti, ke...

Bibók ridetis.

– Tiu estas ĉe malbona homo.

– Kial ĝi estas ĉe malbona homo?

– Ĉar ĝi estas pli proksime al Görgey, ol al Nustkorb.

– Ĉi tio estas malbono.

– Ĉiuj malbonoj estas solveblaj. Ĉu tiu ordono pri la arestado estas legitima? Ĝi havas subskribon de Paŭlo Görgey?

– Tiu estas tute aŭtenta.

Paĉjo Klebe ekoscendis, membrostreĉis, pene parolis, sed tamen eldiris siajn pensojn.

– Ĉi tio estas interesa afero. La homoj estas strangaj. Multe da aferoj okazas en la mondo ekstere de la entrepreno-Molitoris. Ĉi tio estas grava informo. Ni devas informi sinjoron Nustkorb.

– Ĉu tio estas grava informo? – ridis Bibók.

– Tio valoras ege.

Ili ne paroladis plu dum tiu vespero kaj ne pli malfrue, sed paĉjo Klebe ne kapablis liberiĝi de tiu temo. Alitage ili paroladis kun la forĝisto kaj veturilfaristo, kiuj riparis la ĉaron-Molitoris. Dum la tria tago la ĉaro Molitoris ekiris kaj Klebe adiaŭis sinjoron Bibók:

– Mi ne volas diri ion alian al vi, sed vi aŭdos pri mi post nelonge.

Bibók pro ĝojo frotadis siajn manojn, sur kiuj estis nuntempe multaj fingroringoj.

– Mi ĉiam ege ĝojas, se mi aŭdas pri io.

- Mi parolis ne pri mi mem, sed pri tiu ĉi afero. Pri tiu afero vi aŭdos. Bibók tiris la ŝultron.
 - Tio dependas de ni ambaŭ.
 - Ĉu? – demandis Klebe mallaŭte. – Ĉu tio dependas ankaŭ ĉe Ekscelenco?
 - Kelkfoje mi aŭdas malfacile – diris Bibók orgojle.
 - Nome tio signifas, ke tiuokaze vi devas pli forte ekkrii – ridaĉis Bibók.
- Hm. Mi komprenas vin.

Poste Klebe forveturis kaj ĝis printempo oni nenion aŭdis pri li. Sed Bibók ne estis scivola pri li. Bibók havis bonan vivon, ja en Béla apud la frivola gubernatoro li preskaŭ regis tiun, ekkonis ties sekretojn, pere de kiuj li bridis tiun kiel la araneo la kulon. Béla iĝis vera paradizo. La viroj formis grupojn kaj iom post iom aliĝis al Francisko Rákóczi por defendi Hungarojn. La sango ne estos akvo, la infano kroĉiĝas al sia patrino. La reĝo Sigmundo nur la teritorion povis doni al la poloj kiel garantiaĵon, sed la aero restis hungara. La viroj foriris, sed la edzinoj restis ĉi tie kaj restis la belaj edzinoj de Béla. Krome ĉiuj belaj edzinoj fuĝis ĉi tien, ĉar ĉi tie ne estis milito. Ili portis la valoraĵojn ĉi tien. Kiu povis fari tion, tiu faris ĉi tiel. Tiel okazis kiel en la urbo Esztergom¹¹⁴ antaŭ cent jaroj, kiam la urbanoj fuĝis de antaŭ la turkoj al Komárom¹¹⁵. Tie estis du juĝistoj, du eklezioj, sed estis nur unu tombejo.

Nu, ĉi tie estis multe da edzinoj kiel en tri urboj, sed viro tute ne estis. Tombejo ne estis bezonata, sed la virojn oni estimis. Pro tio Bibók havis multe da fingroringoj.

La homamaso portis ankaŭ profiton. Ljubomirsky, la gubernatoro, sciis okupiĝi, pri la rifuĝintoj. La rifuĝintoj volonte donis ion el siaj havaĵoj al la gubernatoro, kiu eltrovemo devenis el la kapo de Bibók.

Kvankam Bibók lasis, ke la gubernatoro kolektu la profiton, ankaŭ li akiris specialan salajron, ja li komencis esti influhava homo en la urbo. Ĉi tion ankaŭ la loĝantoj rimarkis kaj unue Bibók-on subaĉetis, kiam ili volis peti ion de la gubernatoro. La popolkredo faris karikaturon pri Ljubomirsky¹¹⁶, kiun ĝi figuris kiel mulon, sur kiu Bibók rajdas. En la restoracio „Al la luno bojanta hundo” estis videbla tiu ĉi karikaturo. Ekvidante, pro la bildo la gubernatoro tre koleriĝis kaj li ordonis neniigi tiun kaj la drinkejmastron Ferencsik (ferenĉik) li devigis pagi kvindek polajn forintojn kiel monpunon. Oni diris, ke Bibók ricevis el tiu monsumo dekkvin forintojn.

¹¹⁴ Pri Esztergom, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Esztergom>

¹¹⁵ Pri Komárom, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Komárom> – pri la slovakioflanka Komárom: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Komárno>

¹¹⁶ La pola nomo Ljubomirsky elparolendas ljubomirski.

Bibók estis grandpotenca. Li kaj la gubernatoro promenadis dum iu bela printempa tago, kiam iu maljunulino alparolis lin en la vendoplaco. Ŝi diris al li, ke ŝi portis mesaĝon por li.

- De kiu vi portis mesaĝon, panjeto?
- De sinjoro Klebe.
- Kion mesaĝas mia amiko Klebe?
- Tiu diris, ke la sonorilego eksonos en la turo de la urbodomo post nelonge.
- Ĉu li ne mesaĝis ceteron?
- Ne, sed li petas ankaŭ vin mesaĝi.

Bibók kolere maĉadis la lipojn.

– Diru al li, ke Lőcse estas malproksime, la voĉo de la sonorilego ne aŭdiĝas ĝis la urbo Béla. Nome miaj oreloj estas ŝtopitaj.

Li donis al la maljunulino unu taleron.

Ljubomirsky, kiu ne ŝatis la similajn aferojn, diris kolereme:

- Bibók, vi intencas fari iun malbonan aferon.
- Ĉu mi? El kio vi tion pensas?
- Tiu ne povas esti honesta homo, kiu donas mesaĝojn malhoneste.
- Mi ne komprenas vin, mia sinjoro.

– Ĉu vi ne komprenas min? Sed mi devas kompreni vin. Kial estas fermitaj viaj okuloj, kiam vi scias ĉion kaj aŭdas la okazintaĵojn de Eŭropo.

– Ja ĉe ni Hungaroj estas vortofloroj. La lango de la hungaro similas al tiu de abelo, ĝia anteno ĉion eksentas.

Ljubomirsky spite de tio grumblis, ĉar li havis tre malbonan humoron. Nome li hejmenalvenis el Krakovo¹¹⁷ hieraŭ kaj plendadis, ĉar li kartludis kaj perdis multan monon. Li estis pro tio moroza. Bibók ne bedaŭris, prefere konsolis lin:

- Baldaŭ ni akiros monon ĉi-hejme. Ankoraŭ ne mortis la patrino de la mono.

Sed pli malfrue ĉiam pli kaj pli viglaj onidiroj ekdisvastiĝis inter la homoj. Komercistoj kaj la Krakov-anoj asertis, ke Ljubomirsky perdis multegan monon en Krakovo. Eĉ Bibók pro tio maltrankviliĝis. Ne povus esti malbono, se la reĝo ne informiĝus pri tiu monperdo. Sed la reĝo aŭdante pri tio, tuj sendis al Béla iun ĉefoficiston por kontroli la kason. Sed eĉ tio ne estus malbono, nome tiu ĉefoficisto – nomita grafo Stramonsky – same estis pasia kartludisto. Ili ambaŭ komencis ankaŭ kartludi kaj Ŝtramonsky (ŝtramonski) monperdis multe. Ljubomirsky ĝojis, ĉar se la grafo gajnis monon, tiuokaze Ljubomirsky ne kapablus pagi. La grafo koleris, sed sciis, ke ĉi tio estas nacia kutimo, ĉar ĉe la monregado li devas gajni monon. Nome la ĉefkontrolisto jam ne la kason kontrolis, ĉar tie li trovis nur la profiton de la kartludo. Li kontrolis la

¹¹⁷ Pri Krakovo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Krakovo>

librotenadon, dum kio li divenis, ke Ljubomirsky trompis la ŝtaton kaj la reĝon dum la pasintaj dek kvin jaroj.

Efike de tio la grafo ĉesigante la postenon de Ljubomirsky ekzekuciis. Liajn aĵojn, dokumentojn li forsendis kune kun liaj korteganoj, inter ili ankaŭ Bibók-on, kiu devis elloĝiĝi el la oficejo en la gubernia konstruaĵo. La grafo komisiis iun provizoran ĉefon anstataŭ la gubernatoro kaj sinjoron Ljubomirsky transportis kiel malliberulon al Krakovo, kie ĉiuj surpriziĝis, ke la trompo iĝis evidenta.

Poste la sorto de Bibók iĝis malbona. Li nur stagnis en la restoracio nomita „Al la luno bojanta hundo,” li ne havis protektanton, havaĵon, la fingroringojn li devis vendi kaj ankaŭ lia potenco iom post iom elĉerpiĝis.

Ljubomirsky post duonjaro denove okupis sian oficon, senkulpiginte sin. (Oni diris, ke la tuto estis nur komedio farita inter la grafo kaj la gubernatoro por liberiĝi de Bibók.) Tute estas egale, ĉu tio estas prava, sed tio estas fakto, ke Bibók ne kapablis atingi sian mastron, dum malmulte da tempo li vivis ĉe Ferenik el la ricevita kredito – finfine ne havante fingroringojn kaj ne havante krediton li perdis la vatojn el siaj oreloj, pro kio li aŭdis jam la sonorilegon de Lőcse.

Sed Bibók ne submetiĝis al sia sorto, ja li estis obstina homo.

Li decidis, ke li akiros monon kaj memstare faros ion. Li pensis, ke li iros al siaj pli junaj fratoj, poste organizos iun apartan grupon por patroli. Kial la homo ne estu memstara? Ankaŭ la lasta larvo havas rajton al tio. Okaze de tio estiĝas la havaĵoj, la aventuroj kaj la estraj rangoj.

Sed unue li devas serĉi paĉjon Klebe por paroli pri la ordono pri arestiĝo. Nome tio estas grava afero. (Li estis freneza, ke li rifuzis tiun.)

Li ĉion ekplanis. Li estis saĝa talento. Li havis iun gubernian vestaĵon, kiun oni ne ekzekuciis. Tiu estis eluzita, sed tiun uniformon portis la polaj oficistoj. Tiu estis neutrala vestaĵo, kiun li povis porti en la tuta Sepeŝ. Oni konis lin kaj nenie suferigis. Oni kompatis lin, donis al li manĝaĵon – drinkaĵon. Ĉiuj sciis pri la polaj oficistoj, ke tiom da havaĵo ili havas, kiom ili ŝtelas, sed – kiel ŝtelu ili dumvoje?

Bibók devis iri al Lőcse. Sed nun ne estus bone iri tien, ja tie la kurucoj regas kaj eble povus rekonii lin iu danĝera konato, kiu povus perfidi lin. Krome estus malbone marĉandadi vendante la ordonon pri la arestiĝo, ĉar oni forprenus tiun perforte.

Do! Li ne iros al Lőcse, nome li ne iros al la urbo trans la pordego de la urbo. Kien li povas iri? Nome ekster Lőcse Paŭlo Görgey havas potencon. Do, ankaŭ Görgő estas danĝera teritorio, sed almenaŭ estas pli sekura. Li same ne povas iri al la aŭstraj imperiestraj soldatoj. Nur pri la kurucoj li ne povas diri, ke tiuj ne okupiĝus pri li pro lia perfido.

Li decidis iri en la urban drinkejon estantan en la urba ĝardeno. Li sciis de Klebe, ke tiun luas Petro Kárász, buĉisto de la urbo Kaŝŝa, kiu havis en Görgő restoracion de Quendel, sed nun ĝin havas iu slovaka drinkejmastro. Nu, Bibók

volis iri al sinjoro Kárász. Nome li povas kaŝi sin, ĝis li aranĝos la aferon. La drinkejmastro havas kelkajn ĉambrojn sur la etaĝo. Li konatiĝos kun tiu, kaj parolados pri la Görgő-anoj, ja li preskaŭ nenion scias pri sia patro kaj pri sia edzino.

Li planis jene kaj okazis preskaŭ tiel.

Dum iu frua tagiĝo li iris al sinjoro Kárász kaj petis ĉambron por kvartiri.

La drinkejmastro estis hungara homo havanta pinte torditajn lipharojn kaj dikstaturon. Li ĝuste rigardis en la koridoro la leviĝantan sunon kaj grandbuŝe oscedis, kvazaŭ li volus forgluti tiun.

– Donu Dio bonan matenon!

– Donu tiun! – balbutis sinjoro Kárász mekanike. – Kion vi volas?

– Mi petas ĉambron.

– Ĉu ĉambron? – miris Kárász. – Kial?

– Ĉar mi estas ege laca.

Sinjoro Kárász ne respondis, nur montris sur la ĝardenajn benkojn.

– Jes, sed mi ŝatus dormi.

Sinjoro Kárász montris per la longa ĉibuko al la smeraldverda gazono, kie estis iu fojnostako disvastiganta balzaman odoron. Tie ankaŭ la reĝo povus dormi komforte.

– Sed mi ŝatus dormi en lito.

– Hm – murmuris sinjoro Kárász.

– Ĉu vi estas farita el sukero?

– Mi piediris tutnokte.

Sinjoro Kárász konsideris lin bone, la veturanton, kaj pridemandadis lin.

– Kiu vi estas?

– Mi estas polo.

– Ĉu nur?

– Nur mi estas tia, alia ne.

– Kial vi ne iras en la urbon?

– Ĉar mi ne volas iri tien.

– Kial ne?

– Tio ne estas via afero.

– Nu, vi pravus – diris Kárász – kaj fariĝis pli cedema, ol antaŭe. – Kiom da tagoj vi volas esti en la ĉambro?

– Du, aŭ tri tagojn.

– Ĉu vi volas resti 2-3 tagojn?

– Sed jes.

– Ĉu vi havas aranĝendan aferon tie ĉi?

– Mi havas tion.

– Ĉu ĉi tie ĉe mi?

- Ĉi tie.
- Kion vi volas fari?
- Mi serĉas la feliĉon.
- Diru al mi, se vi ektrovis tion. Ĉu vi venis perpiede?
- Perpiede.

- Nu, mi ne havas ĉambron por dormi, sed mi povas doni iomete da matenmanĝo – kaj Kárász ekkriis al la vestiblo: – Eva, mia karulino, faru iun matenmanĝon.

Bibók iĝis mishumora, sed li akceptis la matenmanĝon. La malsato superis la lacecon kaj li tre ĝojis.

Efike de la vortoj de sinjoro Kárász la domanoj vekiĝis, la drinkejmastro malaperis kaj poste aperis portante sur la brako iun fileton.

- La tuta personaro dormas – li diris. – Kurucaj oficiroj amuziĝas tie ĉi, estis la tago de Petro – Paŭlo. Eva, mia edzino faras la matenmanĝon kaj dume mi estas la vartisto.

- Ĉu ĉi tiu estas la plej juna?
- Ĉi tiu estas la sola, nenie estas alia.
- Nu, Dio vivigu tiun. Sed tiu estas sufiĉe pala.
- Pro tio ĉi mi estas malgaja. Nome tiu estas ĉiam pli kaj pli maldika. Povas esti, ke iu satana homo malbenis lin.
- Ĉu vi faras nenion por kuraci tiun?
- Sed jes. Ni fumas tiun kaj portas ĉien al la ĉarlataninoj. Ni portas tiun al Sepeŝ kaj reen hejmen.
- Donu al mi la infanon.

Bibók transprenis la infanon, esploradis, rigardis la langon, fingrumis la arterion.

- Ĉi tiu infano havas neniun malbonon. Tiu estas sana kiel la glano. – diris Bibók.

- Estus bone, se la ĉiela orakolo dirus tion ĉi. Sed tiu havas iun malbonon.
- Povas esti, se tiu havas iun malbonon, sed tiu ne devenas de la infano.
- Kiel vi komprenas tion?
- La ĉi tie estanta folio de rosmareno havas odoraĉon de cimo. Cimo estas sur la folio de la rosmareno.

- Vi pravas, – diris Kárász – rekonante la saĝecon de Bibók, li iris en la kelon por porti tre bongustan vinon al la saĝa gasto. Dume Bibók distris la infanon, li faris al la infano malgrandan muelejon. Kiam Kárász revenis el la kelo, tiam li miris, ke la infano jam ankaŭ ridas kaj havas sur la vizaĝo ruĝan koloron. (Nome Bibók ekpinĉadis la vizaĝon de la infano.)

- Nu, rigardu ĉi tiun infanon. Tiu fartas pli bone, ol pli frue.
- Vere, tio estis miraklo. La infano aplaŭdis, ridis kaj plaĉis al li la muelejeto.

Dume la matenmaĝo pretiĝis: la fama supo de ŝafisto, en kiu kuirita estis ŝafkazeo. Iu maldika, malgrandmama sinjorino portis la supon kaj poste portis malvarman rostaĵon. Fine ŝi foriris. Bibók kaj Kárász tintis per la glasoj kaj poste Bibók demandis:

– Ĉu ŝi estas la patrino de la infano?

– Jes.

– Ĉu la infano dormas kun ŝi?

– Jes.

– Tio estas la malbono. Ŝi ne estas sana. La infano dormu sola, aŭ kun sana, dika servistino. Nome malgranda korpo ricevas energion de dika sana korpo. La koloro de la leporo samas kiel la terbulo, sur kiu ĝi dormas. La hilo estas verda kiel la folio de la plantaĵo. Ĉiuj buĉistoj estas dikaj, fortaj, ruĝaj ĉar kaŭzas tion la varmo de la korpoj de la bestoj.

Ĉi tiu lasta argumento konvinkis sinjoron Kárász.

– Vi pravas. (li etendis la manon al Bibók.) Mi povas diri, ke mi iĝis pli saĝa. Sed la edzino estas malgaja, kvankam ŝi estis bela knabino. (li rememoris la junajn jarojn.) Kaj nun la infano ankaŭ tudas. Do, ni elprovos vian konsilon. Iu fraŭlino de Keŝmark estas ĉi tie, kiu estas dika, sangvina, sed estas ĉi tie alia ĉambristino svelta kiel la cervo. La infano kun tiuj dormu alterne, kiel iu turka paŝao. (li bonguste ridis.) La infano iomete frue komencas ĉi tiun vivon. Ĉu ne? Nu mi montros tiujn virinojn kaj konstatu: kiu estu la kundormanto de la infano.

– Kion mi volis demandi ankoraŭ? Kiel oni nomas vin?

– Antonio Tropszky¹¹⁸.

– Mi estas Benjamino Kárász – prezentis sin la drinkejmastro kaj ili denove premis la manojn unu de alia. – Ĉu vi kutimis ronki?

– Ne.

– Ĉu vi ne kutimis tusi?

– Ne.

– Ĉu vere ne?

– Ne.

– Nu, nun mi montros al vi vian ĉambron.

– Mi ne pensis tion, ke vi estas ŝerca homo – ridis bonguste Bibók. – Mi kredis, ke vi ne havas ĉambron.

– Ĝustadire mi ne havas tiun, sed vi faris por mi bonon kaj mi esperadis, vidante rideti la infanon. Do, sinjoro Tropszky, dormu bone kaj ripozu.

En la mezo de la restoracio estis konstruita etaĝo, kien kondukis eskalo. Sur la etaĝo estas du ĉambroj. En la ĉambroj loĝis la drinkejmastro, sed ĝin luis kelkfoje ankaŭ la Polico. Multfoje la ĉambroj estis renkontejoj de la civitanoj.

¹¹⁸ La nomo Tropszky elparolendas tropski.

Viroj kaj virinoj renkontiĝis ĉi tie. Multe da amaj historioj eblis aŭdi ĉi tie. Pro tio oni volis detrui la ĉambrojn, sed la maljuna Moŝtel ne lasis detrui, dirante: „Tiuokaze forbruligu ĉiujn litojn, kusenojn, ĉar ankaŭ en tiuj okazis malmoraleco!” Pro tio la senato nur ordonis, ke en la rangaj ĉambroj de la restoracio malmoralaĵoj aferoj ne okazu.

Ĉu Moŝtel pravis? Nur Dio scias. Nome la vojoj de la amo ne estas neireblaj, Ŝajne ne tiam, se la hipokrato farus sur tiuj vojkavojn. Amoron ne eblas transloki, se la domojn oni detruas. Sed tio estas senduba, ke tiuj ĉambroj kaj la pikantaj historioj ne estis belaj vidaĵoj por la junaj fraŭlinoj. Tiuj junaj adoleskantinetoj ĉi tie kutimas promenadi dum multaj posttagmezoj. Tiuj fraŭlinoj estas saĝaj, ĉion aŭdas hejme. Ili vidas la eskalon malantaŭ la domo, kie estas densa arbustejo. Tie multe da arbustoj ĉion kovras. La fenestroj estas kovritaj per kurtenoj, kiuj esprimas iun senhontemon kaj la blua floro de la robinio havas ekscitan odoron, – Povas esti, ke tio estas nur freneza imagado.

Tio estas certa, ke Bibók ĵetis sin sur iun liton, ne demetante la botojn, vestaĵojn kaj ĝis tagmezo dormis. La ĝardeno estis ankaŭ nun senhoma (la vivo komenciĝas ĉi tie posttagmeze.) Unue li faris grandan promenon, pensante, kiel li povus mesaĝi al Klebe. Li decidis tiel, ke same kiel Klebe ankaŭ li serĉas iun maljunulinon por mesaĝi.

Li ankaŭ trovis iun maljunulinon, kiu anoncis sin por viziti sinjoron Klebe. Ŝi kolektis kuracherbojn kaj estis inklinata por kelkaj arĝentmoneroj viziti sinjoron Klebe, kiun ŝi konas persone kaj ŝi transdonos al tiu la mesaĝon, ke li venu vespere en la urban ĝardenon, kie atendos lin lia amiko de la urbo Béla, kiu venis pro tio, ke li aŭdu la sonorilegon de Lőcse.

– Tiu sonas bele. – diris la maljunulino estime rigardante Bibókon, kiu pro tio pilgrimis al Lőcse.

La maljunulino emociiĝis kaj ĉiujn homojn informis dumvoje, ke ŝi vidis iun bravan homon kaj tion, ke ekzistas ankoraŭ piaj homoj tutmonde. Sed pro tio Bibók ektimis, kaj klarigis, ke li estas majstro faranta sonorilegon kiu devas fari sonorilegon por la turo de la preĝejo Sankta Stefano de Vieno. Ĝia sono estu simila kiel tiu de la sonorilo de la preĝejo de Lőcse. Sed Bibók timis ankaŭ tion, ke la maljunulino embarasiĝos kaj la mesaĝon ne kapablos transdoni klare. Pro tio ili interkonsentis, ke duonon de la mono ŝi ricevos, se ŝi revenos por anonci la transdonon de la mesaĝo.

Tio estas bona penso, ĉar la alian duonon de la mono Bibók ne havis kaj pensadis, kie li povos tagmanĝi. En la restoracio oni ne povas scii, ke li ne havas monon. Kvankam ekstere de la urbo estis dometoj havantaj fumadantajn tegmentojn (kamentuboj tiutempe ne estis), kiuj estas dometoj de la geservistoj de la riĉaj bienuloj, tamen ili ne donas manĝaĵon senpage. Spite de tio li ne tro ĉagreniĝis. Li al kutimiĝis al tiuj ĉi aferoj kiel la arbaraj sovaĝbestoj. Tiuj estas

kontentaj, se ili hazarde akiras manĝaĵon. La dombestoj ne scias tion, kiuj ricevas ĉiutage manĝaĵon kaj akvon, ke tiuj estas feliĉaj...

Tamen li ekpromenis al la ĝardeno drinkejo kaj ekvidis dumvoje iun erinacon.
– Hop! – li diris – ekestas la tagmanĝo! Bona ĝi estos por la infano kiel donaco. Tiu ridetos kaj la domanoj regalos lin per fajna manĝaĵo.

Li ridetante levis la erinacon kaj metis en sian poŝon.

Li bone pensadis, ĉar la infano akceptis pie la erinacon. Poste Bibók demandis sinjoron Kárász pri la tagmanĝo. Sed Kárász diris, ke ili ne faras tagmanĝon, ĉar ili nur havas posttagmezajn kaj vesperajn gastojn, sed el la propra manĝaĵo li volonte donos al la gasto. Eĉ la maldika vigla edzino donis al li ankaŭ lumbaĵon.

Poste dum la tagmanĝo komenciĝis la intima parolado. Bibók demandadis. Kio estas la novaĵo en la urbo? Kial portas la homoj nigrajn vestaĵojn? Kiel kondukas la kurucaj oficiroj? Ĉu ekzistas vigla komercado? Ĉu vi, sinjoro Kárász, estis en Görgő?

Kárász respondis kaj malkaŝe kaj kaŝe, sed la lastan demandon li ne volis respondi.

– Ĉu vi luas la restoracion de Quendel?

– Jes.

– Mi aŭdis, ke ĝi estas enspezoriĉa.

– Ne tro multe.

– Kia homo estas Paŭlo Görgey?

Kárász iĝis maltrankvila.

– Ĉu vi konas la Görgő-anojn?

– Ne. Mi neniam estis tie. Iu mia kamarado devenis de Görgő, kiu parolis pri la urbo.

– Ĉu?

– Oni nomas tiun Sigmundo Bibók – daŭrigis la gasto – ĉu tiu ne loĝas tie?

– Ne, sed mi aŭdis, ke tiu estas fihomo, se ni pensas pri la sama homo.

– Mi miras – diris la gasto serioziĝinte – kiun mi konas, tiu estas kara homo.

– Tiu fuĝis de la hejmo – diris Kárász indifere.

– Kaj nun oni atendas lin por hejmeniri – diris la veturanto.

– La kornikoj – diris Kárász.

– Kial la kornikoj?

– Ĉar por tiuj li estas bona.

– Kial?

– Ĉar hejmenalvenante oni pendumos lin.

Bibók toleris tiun orakolon sen palpebrumado, sed iomete paliĝis.

– Li certe havas nepardoneblan pekon – li diris malesperiĝinte, kvazaŭ la gorĝon premus iu nevidebla mano.

– Male. Pli ĝuste li ekzercis sin pri la sakramentoj, kio ne estas malbono, sed ankoraŭ vivis lia edzino, kiam li edzinigis alian virinon kaj nun aperis ambaŭ – ŝercadis la drinkejmastro.

– Mi ne komprenas vin, sinjoro Kárász! – diris la gasto.

– Li duoble edziĝis, kio ne estus malbona, sed tio estas la malbona, ke iu edzino ankoraŭ vivis, kiam la alian edzinon li edzinigis kaj nun aperis ambaŭ edzinoj.

Sur la vizaĝo de la gasto ŝvitogutoj aperis.

– Tio estas malebla – li balbutis, sed regis sin – kiu povus pensi tion, pri tiu edzino kaj pri mia amiko Sigmundo? Ej, ej!

– Nu, tiu havas finon! (Kaj Kárász montris sur sia kolo la atendeblan manovron.) La sinjoro vicprefekto malkaŝe eldiris, ke li pendumigos Bibókon.

– Tio estas frenezaĵo, – diris mallaŭte Bibók kaj drinkis el la kruĉo, sed ne bongustis al li la vino.

Sur lia dorso frostotremeto sentebliĝis.

– Kio estas prava, tio estas prava – murmuris Kárász. – Kio estas la rezulto? La leĝo prefere helpus la malfeliĉajn edzinojn, sed nur plimultigas la malbonojn. Nun du edzinoj havas unu edzon. Iu edzino ne havas edzon kaj la leĝo pereigas la edzon de la alia. Resume estas du senedzaj edzinoj.

Ĉar Kárász rimarkis, ke la gasto ege malĝojiĝis, li rapide komencis paroli pri alia temo por indulgi lin, sed Bibók ne iĝis bonhumora. Li diris, ke doloras lia kapo kaj li iras en sian ĉambron. Kárász ege laŭdis lin antaŭ sia edzino: „Tropszky estas tute bonkora homo. Mi hontas, ĉar mi malĝojigis lin, kiam mi rakontis al li la kazon de Sigmundo Bibók.”

Ĝis vespero li estis en la ĉambro kaj estis trankvila. Kiun li timu? Ja ĉi tie Paŭlo Görgey ne povas ekkapti. Sed estus bone, se li estus iomete pli singarda. Ne estus bone, se oni rekonus lin. Ĉe Kárász li ne povas restadi plu.

En la ĉambro estis sufoka varmego, la fenestro estis malheligita per la persienoj, sed tamen venis la varmego de la somera Suno. Pro la varmego li ne kapablis dormeti kaj dum la malfrua posttagmezo aŭdiĝis el la restoracio bruego, tintado de teleroj, drinkekscesa kantado. Pro ĉio ĉi li povis plani la bezonajn farenadaĵojn. Oni portis seĝojn kaj tablojn en la restoracion el la veturilejo. Ĉiam pli kaj pli da gastoj estis en la restoracio kaj sinjoro Kárász kaj la kelneroj ŝvitante portis la bieron kaj vinon al la gastoj. Ambaŭ ĉambristinoj portis la ripstekojn, kies fajna ajloodoro atingis la nazon de Bibók. Bibók kaŝobservis inter la aperturoj de la persieno la diversajn gastojn. Inter la gastoj estis bone nutritaj saksaj civitanoj, kiuj kegloludis. Iu sakso batis naŭ keglojn, kaj li portigis unu barelon da biero. Ĝuste nun ili elkranis la barelon ĝojkriante. Bravaj kuruchusaroj avide drinkis la vinon. Ĉeestis ankaŭ la generalo Andrassy¹¹⁹ (kiun Bibók konis.)

¹¹⁹ La familio-nomo Andrassy elparolendas: andraŝi.

kaj multe da ĉefoficiroj. Tiuj estis ruĝaj pro la drinkado kiel la ruĝa drapo. La drinkejo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo elmontris viglan gajan bildon. Ĉe kelkaj tabloj okazis salutoj, kiujn diris superaj juĝistoj en soldatvestaĵoj. Sur la strato la homoj plezurante rigardadis la amuziĝantajn bravulojn. Inter la promenantoj estis elitaj edzinoj, fraŭlinoj portantaj funebrajn vestaĵojn, industriaj lernantoj, helpmetiistoj kaj avaraj patricioj. La lastaj ne iras en la drinkejon, ja ili portigas hejmen la drinkaĵon, ĉar tio estas pli malmultekosta, ol drinki en la drinkejo. Ili iras al la urba ĝardeno por aerumiĝi.

La restoracio de Kárász havis oran epokon. Ĉiuvespere tie estis multe da gastoj. Modo estis pasigi la vesperojn tie. Tion profetis Tomaso Mulzinger, la pli frua urba ĝardenisto, kiun riproĉis la urba konsilantaro, ĉar li plantis menton, rosmarinon kaj alteon, kiuj estas vulgaraj plantoj. Prefere tiu estis plantinta florbulojn de Homonna, aŭ el Nederlando, kiuj pliigintus la vizitadon de la ĝardeno. La urbo certigintus la bezonatan monsumon. (40 forintojn.) Sed Tomaso Mulzinger skuis la kapon kaj diris sur sia morta lito delirante: Tio estas senvalida afero. La tempo alvenos, kiam la hungaraj husaroj „dehiskos” sur ĉi tiu loko!

Ĉi tiu diro aspektis tiam sensencaĵo, sed nun videblas, ke Mulzinger pravis. Jen, tio estas nun klarigita. Ja li estas inteligenta homo!

Lócsé treege ŝatis la kurucajn oficirojn, ja ili batalis por la libereco kaj kultlibereco. La lastan la saksoj deziris realigi. La edzinoj ŝatis ilin, ĉar la oficiroj estis belaj kaj la edzinoj tre deziris ilin pro la kazo de Kramler-Görgey. La edzinojn tre tedis la funebraj vestaĵoj kaj pro tio la nigra koloro kaj ne estas miraklo, ke ili ekvidante la ruĝajn pantalonojn kaj la flavajn botojn, havis specialan senton.

Sed tio nenion signifis, ke tiuj soldatoj estis drinkemuloj. Dum la militaj tempoj la manĝado ne estis certigita, pro tio la alkoholo fortigis la animon de la soldatoj. Tio karakterizis la vivon de la hungaroj. En la montoj estis la fero, sur la monto oni produktas la vinberujon kaj el la vinbero oni faras la vinon. En la valoj sur la kampoj vivas la bestoj. En tiu ĉi tempo ĉiuj estas drinkemuloj. Ekzemple Emeriko Thököly drinkis dum unu festo unu barelon da vino. Sinjoro Miĥelo Apaffy famiĝis, ke liajn posttagmezajn disponojn oni rigardis, kvazaŭ ne okazintus. Apud la lito de Esterházy palatinĵupano estis antaŭpreparita unu pokalo da vino por drinki nokte. La generalo Andrásŝy invitis la drinkemulojn por drinki kaj li superis ilin. Ĉi tiu epoko estis la epoko de la soifeco, kiu daŭris kelkcentojn da jaroj. Ĉiuj aferoj pasis, nur la ŝato de la vino restis eterna. La poetoj, liutistoj laŭdas la vinon. Oni kuracis la malsanojn kun asuo de Tokaj, aŭ malbonkvalita vino. La herooj drinkas kaj antaŭ la batalo kaj post la batalo, eĉ dum batalo. Oni gustumadis la diversajn vinojn: sambukvinon, turkan vinon, asuon (altkvalitan vinon de la setlejo Tokaj), vinon pri meso. Kompreneble la gustumadoj okazis dum festoj, ceremonioj, nomtagoj. Kaj tio okazis dum pli

malgrandaj kaj pli grandaj disputadoj. Same plimultiĝis tiuj ceremonioj, kiuj instigis al vindrinkadon. Laŭ tio ŝanĝiĝis la nomoj de la glasoj estantaj: saluta, gustuma, instiga, kunula. Ĉiu ĉi servis tion, ke la homo ĉiam drinku vinon, sed neniam tediĝu pro la drinkado.

Ankaŭ Bibók estis diboĉulo kaj enviadis rigardante la amuzantajn bravulojn, kiuj zumadis, singultis, diskutadis kaj ŝanceliĝadis. Li pensis, ke bone estus tie amuziĝi! Ĉar tio estas la bona vivo!

Li ne esperis tie ekvidi sinjoron Klebe, sed tamen li ekiris sur la ŝtupoj. Sube de la ŝtuparo la vartistino sidis apud la pala infano kaj rakontis al tiu. Estis ankaŭ tie la erinaco, kiun la knabeto pikadis per vergo de saliko kaj dume aŭskultis la fabelon:

Es war einmal eine Henne und ein Hahn	„Estis kokin' kaj ĝia koko',
Fängt mein Märchen an;	Jene ekiras mia fabelet',
Dann war eine Kuh und ein Kalb,	Poste la bovin' kaj bovido,
Ist mein Märchen halb;	Jen duono de fabelet',
Es war einmal eine Katz und eine Maus,	Estis unu kato kaj muso,
Ist mein Märchen aus.	Jen fino de mia fabelet'."

La vartistino estis belforma, simpatia knabineto havanta kuspitan nazon, mildajn okulojn, larĝan frunton kaj linokoloran hararon.

Laŭ Bibók ŝi estis kara kaj havis polan dialekton. Li demandis pollingve la knabineton:

- Kial vi ne fabelas hungare al la infano?
- Ĉar mi ne scias paroli hungare. – Ŝi respondis, rigardante Bibókon, kiu tagmanĝis kun ŝia mastro.
- De kie vi devenas, adoleskantineto?
- De Görgő – ŝi diris ridetante.
- Ĉu de Görgő? – diris Bibók mirante. – Kiel oni nomas vian patron?
- Li estas Sigmundo Bibók. – diris la vartistino malgaje.

Kvazaŭ iu grandega pugno batis la koron de Bibók, ĉar li ekŝanceliĝis kaj apenaŭ kapablis iri plu. Li volis foriri, ĉar se ili rigardus unu la alian, tiam nur Dio scias, kio okazus. Li apenaŭ kapablis spiri. Li sentis akran doloron. Li facile divenis la enigmon. Ĉi tiun adoleskantinon, kiu estas vartistino de infano de Kárász, lia edzino de Krakovo kunportis kaj ŝi estas lia infano. Pli malfrue li aŭdis, ke naskiĝis ĝemeloj, sed li neniam vidis ilin. La edzino sendis la knabinon por servi kiel servistino, do, estas evidente, ke ŝi mizeras. Bibók ne freneziĝis, nur estis malgaja kaj malbonhumore promenis sur la promenejo, serĉis la senhomajn lokojn. Li planis tion, ke la monsumon ricevotan por la dokumento – ĝian pli grandan parton – li utiligos en la intereso de la knabino. Ĉi tiel li dormigis sian konsciencon.

Sur la promenejo estis metitaj por la lacaj promenantoj benkoj skulptitaj el ŝtono. La benkoj estis sub la tilioarboj kaj platanarboj. Sur la benkoj estis diversaj germanaj surskribaĵoj, kiuj montris saĝaĵojn. La benkoj estis ofte famaj. Ekzemple estis benko de gestudentoj, sur kiu estis skribite: „Malfermu vian libreton, ĉi tie ellernu vian lecionon.” Sur benko de la kadukuloj estis: „Ĉi tiu estas benko de la lacaj kadukuloj, kiuj havas multe da mono, kiun ili donas al la urbo.” Tie estas la benko de la geamantoj, sur kiu estas skribine: „Dio ĉion vidas, panjo ĉion ekscias.”

Bibók sidiĝis ĉe la enirejo de la urbo sur iu senhoma loko, kie la foliaro de la arboj kovris lin, sed li vidis la homojn. Li pensis, ke sinjoron Klebe li rimarkos. Ĉi tie estis ankaŭ iu ŝtonbenko, kiu estis benko de la civitanoj, sur kiu estis skribita la slogano:

„Pli bone estas stari, ol iradi kaj pli bone estas sidi, ol stari.” Ĉi tiuj infanaĵoj tute ne interesis lin. Li sidis senvorte, atendis la sunsubiron, ĉar Klebe venos nur post malheliĝo. Li klopodis fiksi la vizaĝeton de la vartistino, sed en la lasta momento malaperis la vizaĝeto.

Li ne povis sidi sola longtempe, ĉar iu babilaĉanta maljunulo sidiĝis apud lin, kaj provis komenci paroladi. Tiu parolis pri sensencaĵoj.

– Havas ni belegan someron, sed ni povus havi eĉ pli bonan. Nome konstante pluvas, la soldatoj konstante malsekiĝas en la tendaroj. La homo ne estas zizelo. Ĉu ne? Sed la grundo estas tute seka. Hieraŭ mi elfosis kavon ĉe mia domo de strato Cserepes,¹²⁰ Imagu! En profundo de la ŝtontavolo kaj kelkaj centimetroj la grundo estas tute seka.

Nun tuj iĝis granda tumulto. La homamaso tumultiĝis tien, kie Bibók sidis. Kial? Post nelonge ĉio iĝis evidenta. Ĉar Matildaa Klöster venis kun siaj edukatoj, kun la fraŭlinoj. Tio estis sensacio. La belegaj elitaj fraŭlinoj estis rigardindaj. Ankaŭ la maljunuloj iĝis viglaj.

– Ĉu vi ne estas samloka homo?

– Ne.

– Mi pensis, ĉar vi ne portas nigran vestaĵon. Tio estas nia malbono, ĉar la urba estraro estas maltrovema. Sed nun vi vidos ion saman kiel en la ĉiellando. Vi kredos tion, ke vi estas tie.

Kaj nun iĝis juposiblado kvazaŭ birdaroj flugus. Malforta vento estis, kiu movis la foliaron de la tiliarboj. Tamen en la estiĝinta silento la duonŝuetoj de la fraŭlinoj klakbruis sur la gruzeroj. Sed tio estis belega muziko.

Sed silento ne estis, nome antaŭ la drinkejo la homoj bruis, ne estisodoro de pelargonio, sed la kantaridoj disvastigis abemenan odoraĉon. Sed neniu atentis la odoraĉon kaj la bruegon nur rigardis la homoj la fraŭlinojn de Matilda Klöster.

¹²⁰ La familio-nomo Cserepes elparolendas: ĉerepeŝ.

La maljunulo petole palpebrumis al Bibók.

– Kion vi opinias pri tiu ĉi? Samaj belegaj fenomenoj ne estas aliloke, nur en Lócse. Mi jam estas maljuna al tio ĉi.

La marŝantaj fraŭlinoj estis rigardindaj. Ili estas feinaro. Multe da feinoj estas en Hungarujo. Sed unu feino ne estas vidindaĵo. Sed la feinaro estas rigardinda. Unu ĉevalaro estas pli bela, ol unu ĉevalo. La fraŭlinoj estus pli belegaj, se ili ne estus portintaj nigran vestaĵon. Ĉi tiu marŝado estis simila al iu funebra marŝado. Pro tio regis melankolia etoso.

– Ili estas belegaj. – diris mallaŭte Bibók, kvazaŭ li estus farinta gravan laboron.

Nome Bibók devis fari gravan kaj rapidan laboron. Nome li en imago vestis la vartistinon en nigran vestaĵon kaj kiam la fraŭlinoj promenis apud la vartistino, li komparis ilin kaj okazis miraklo, ĉar la vartistino estis pli bela, ol la fraŭlinoj. Li konstatis, ke la vartistino estas la plej bela. Dume la babilaĉanta maljunulo montris iun fraŭlinon.

– Tiu estas la ege riĉa Katarinjo Blum.

Bibók tuj konstatis en penso, ke la vartistino pli bela estas, ol Klara Blum. Kaj poste avide li demandis:

– Kiu estas la fraŭlino Quendel?

– Tiu jam edziniĝis – respondis la ĉion scianta kadukulo de Lócse.

Bibók iĝis malĝoja pro tio. Li komparis la vartistinon kaj la fraŭlino-Quendel. Sed li tuj surpriziĝis. Nome nun venis la plej bela fraŭlino. Ŝi paroladis kun iu leŭtenanto. La fraŭlino kaj la oficiro estis same altaj. La oficiro estis rektapozicia, kiel al cervo, la fraŭlino estis fleksiĝema kiel al lacerto kaj estis freŝvizaĝa kiel al dehiskanta rozo dum tagiĝo. Ŝi jam ne estis knabino, sed iu fenomeno.

– Ho, ve! – eksiblis Bibók. – Sed li ne diris pli multe, sed tio signifis surprizon, malesperiĝon kaj retiriĝon.)

– Ŝi estas Rozalia Otrókóczy – klarigis la maljunulo. – Ŝi estas belega kato. Ĉu ne?

Bibók rigardis la oficiron kaj rekonis lin.

– Ĉu la oficiro estas fianĉo de la fraŭlino?

– Ne. Li nur amindumas. Li estas filo de Johano Görgey. Ties onklo faris al ni malbonon. Sed ĉi ties patro estas honesta homo. Ankaŭ ĉi tiu knabo estas bona. Oni laŭdas tiun. Tiu estas bela, sed ne plaĉas al Rozalia. Oni diras, ke ŝi estos edzino de la juna Fabricio. Tio estas interesa, ke tiu fortranĉis parteton de la orelo de Fabricio dum duelo. Ili ambaŭ amindumas Rozalian.

– Mi aŭdis, la Lócseanoj amas sinjoron Fabricio.

– Fabricio estas nia favorato, mia sinjoro.

– Kion oni deziras de li?

– Ĉion. Li estas lerta fraŭlo kaj brava homo. Li ĉion scias kaj estas honesta, agema homo.

– Sed lia orelo estas difektita, – ridis Bibók, ĉar tedis lian troan laŭdadon.

– Ĝuste la manka orelo estas lia populareco. Pro tio ni elektis lin senatano, ĉar ĉi tiel lia malamo estas pli granda kontraŭ Paŭlo Görgey, ol tiu de la aliaj.

Bibók ridetis.

– Nu, ne fanfaronadu, mia sinjoro. Ja vi volas fari nenion kontraŭ Paŭlo Görgey. Vi nenion kapablas fari. Vi atendas la morton de Paŭlo Görgey kaj poste diras: „Nia dio estas forta fortreso, ĉar li neniigis nian senindulgan malamikon.”

La maljunulo volis respondi, sed denove aperis la marŝantaro de Klöster. Tiu iradis apud la lago, kie estis plantitaj maloftaj floroj, kiuj nun hiskis, kiel ekzemple violoj, kamomiloj kaj tulipoj. La lastaj devenas el la belega ĝardeno de la ĉefepiskopo Lippai. Ĉi tiujn florojn rigardadas ankaŭ Fabricio apud fraŭlino Otrokóczy. La maljunulo ne respondis al Bibók, sed mallaŭte atentigis lin:

– Pst! Estu silento! Li alvenis.

Bibók ĉirkaŭrigardis kaj ankaŭ li ekvidis la junan Fabricion, sed ekvidis ankaŭ sinjoron Klebe, kiu anhelante alvenis. Klebe rigardis terurate la maljunulon.

– De kie vi scias? – li balbutis neniiginte.

– Ja mi vidas lin! – diris la ĉion scianta maljunulo.

Feliĉo estas, ke denove aperis la fraŭlinoj kaj Bibók vidis Rozalian inter Georgeto Görgey kaj Fabricio. Li rekonis la pli lastan.

Li ekkomprenante la situacion kaj ege ĝojis kaj salutis sinjoron Klebe. Li trabrakumis sinjoron Klebe, kiu ĉagreniĝis pro la malpura vestaĵo de Bibók, ĉar li malpurigas lian puran nigran vestaĵon.

– Hej! Ne brakumu min tiom forte, ja vi sufokas min. Kaj mia vestaĵo estos malpura.

– Tiu ĉi vesto estas pseŭdovesto – Bibók ekskuzis sin.

– Vi vokis kaj mi venis.

– Mi tre ĝojas, sed ni iru al la kampo, ĉar mi havas multe da direndaĵoj. Tie ni povas paroladi trankvile.

Ili foriris el la urba ĝardeno apud la pizo bieno de Johano Flanger, al la kanabo-trempadaj kuvegoj. Sinjoro Klebe komencis paroli.

– Ĉu vi decidis pri la aferoj?

Bibók silentis unu momenton, poste alparolis:

– La malriĉeco estas donanta malbonan konsilon, sed mi decidis. Mi deprenos viajn nigrajn vestaĵojn, ... se honore oni pagos.

– Ĉu vi portis la dokumenton?

– Tiu estas ĉi tie, (Bibók batis sur la bruston.)

– Ĉu vi ne volas montri tiun?

– Sed jes.

Bibók eltiris el sia poŝo iun falditan vaksotolon kaj el tiu iun flaviĝintan akton. Klebe kontrolis la sigelon, poste redonis la dokumenton al Bibók.

– Tiu estas en ordo. Kiom da mono vi petas por tiu?

– Mi petas kvarcent orajn monerojn.

– Tiu estas multe da monero.

– La kapo de iu vicprefektone estas vulgara kukurbito – diris Bibók. – Mi ne donas tiun pli malmultekoste. Mi ne estas freneza.

– Nuntempe la kapo de prefektoj riceveblas ankaŭ pli malmultekoste. – opiniis Klebe.

– Sed nun priemas ankaŭ pri la honoro de Lőcse – diskutadis Bibók.

– Sed 400 ormoneroj estas multe da moneroj kaj ne ĉiuj havas tiun.

– Tio estas tute egala, mi ne donas tiun pli malmultekoste – diris Bibók. – La kapo de Paŭlo Görgey estas altvalora. Li estis mia bona amiko. Li helpis min kaj mi iĝis de li kolonelo. Ĉi tiun homon ni devas estimi. Pro tio mi ne povas doni la dokumenton pli malmultekoste.

Sinjoro Klebe ne akceptis la klarigon de Bibók. Li nur tiradis la ŝultron.

– Ja tio ne interesas min. Tio ne estas mia mono. Mi nur volis malpliigi la sumon, ke oni vidu mian funkciadon en la intereso de la afero. Mi deziras, ke oni povas diri dum mia entombigo: „Klebe estas bravulo, ja li savis la urbon Lőcse.” Certe oni entombigos min apud la muron de la katedralo. De kie akiru la magistrato 400 ormonerojn. Kvankam la kokino de la urbo bone ovas, tamen tiu monsumo estas tro multe da moneroj. Sed mi diras al la juĝisto, kio ajn okazu.

Ili ankoraŭ longtempe pritraktis apud la kanabotrempadaj kuvegoj, sidante sur iu roko. Bibók faris iun sufiĉan grandan malbonon: li petis tri talerojn kiel antaŭpagon. Li diris, ke iu forŝtelis lian monujon, kiam li post tagmanĝo iomete ekdormetis.

– Ĉu? – eksaltis sinjoro Klebe indignante, kolere. – Ĉu vi havas neniom da mono kaj ne donas pli malmultekoste tiun dokumenton? Tio estas granda facilanimaĵo. Ĉu vi volas malsatmorti? Sed vi postulas multegan oron. Laŭvorte vi ne havas monon. Ĉu vi donas la dokumenton por 300 ormoneroj?

– Tio estas malebla.

– Tiukaze vi ne ricevos la tri talerojn kiel antaŭpagon. Dio benu vin...

– Estu la kosto de la dokumento 300 ormoneroj! – stertoris Bibók.

– Nun jam ĉio estas en ordo – frotis la manojn Klebe kontente.

(Li kredigis, ke li donis al la urbo 100 ormonerojn, pro kio li estas inda igi entombigi sin apud la muron de la katedralo.)

Nun jam ili rapide preparolis la pluajn farenaĵojn. Klebe promesis, ke hodiaŭ vespere li parolos kun la juĝisto kaj ĝis morgaŭ petos respondon de tiu.

– Kiel mi ekscios la rezulton? – demandis Bibók.

– Kien mi iru por diri ĝin?

– Mia dormejo estas en la ĝardena restoracio, mia pseŭdonomo estas Antonio Tropszky (tropski). Ne forgesu ĉi tiun nomon.

Ili disiĝis. Bibók ĉagreniĝis pro la perditaj cent ormoneroj, ja tio estis la parto de la vartistino. Poste li iris al la restoracio en sian ĉambron. Li diris al Kárász, ke doloras lia kapo. Pro tio tiu sendu malmulte da vespermanĝoj en la ĉambron. Nome li ne volis iri inter la homojn. Li timis, ke iu rekonos lin.

Do, la eta vartistino portis la vespermanĝon: rizkaĉon kun anseraĵo, kapon de porkido kaj vinon.

Bibók kondukis afable kun la knabineto kaj demandis ŝian nomon.

– Mia nomo estas Mili.

– Nu, venu ĉi tien al mi, kara Mili. Ĉu vi timas min, Mili? – li ekkaresis la koloran hararon de la knabineto... Li sentis specialan ŝajnon. – Via hararo estas bela. Ĉu vi havas gefratojn?

– Mi havas unu fratinon.

– Kie ŝi estas?

– En Görgő.

– Ĉu ankaŭ ŝi servas?

– Ne. Nur mi estas servistino. Ŝin iu bona homo dungis kiel servistinon kaj dorlotas kiel iun fraŭlinon. Oni diras, ke tiu homo havas unu filinon, kies ĉambristino estos mia fratino.

– Kiel oni nomas vian fratinon?

– Ŝia nomo estas Vanda.

– Ĉu ŝi estas same belega kiel vi?

– Ŝi estas pli belega, ol mi, ĉar tiu homo ŝin elektis el inter ni ambaŭ.

– Kiel oni nomas tiun homon?

– Lia nomo estas Paŭlo Görgey.

Bibók serioziĝis. Li sentis rimorson. Sed tio pasis tuj, ĉar li drinkis vinon. Dume li ĉagreniĝis denove pro la cent ormoneroj. Estis frenezo malpliigi la koston de la dokumento. Tiun bonan homon li ne povas denunci por 300 ormoneroj. Neniam! Prefere li malsatmortas! (Li komencis kuradi en la ĉambro tien kaj reen kiel furioza virapro.) Sed Paŭlo Görgey volas pendumigi min. Sed tamen mi ne devis doni la cent monerojn, kiujn havintus la vartistino.

Bibók ne kapablis ekdormi ĝis noktomezo. La gastoj foriris je la 22-a horo, sed Bibók ankoraŭ kuradis en la ĉambro.

Sekvaposttagmeze Klebe vizitis lin. Li tagmanĝis sub la hipokaŝtanarbo ĉe iu tablo. Klebe eksidis al lia tablo kaj ili paroladis flustre. Kárász rimarkis ilin kaj estis diskreta kaj ne sidis apud ilin.

– Ĉu jes, aŭ ne?

– Ankoraŭ estas nenio. La afero plaĉas al sinjoro Nustkorb. Li vokis por paroli kun kelkaj senatanoj kaj informis ilin pri la plano. Nustkorb scias, ke li devas fari

ion, ĉar la publika opinio instigas lin. Ankaŭ la senatanoj havas tiun opinion, ke ili devas aĉeti la dokumenton. Nur unu kontraŭas tion: Fabricio!

– Tiu estas stulta bubeto!

– Fabricio povas rompi la planon. Tion li diras, ke tiu metodo ne estas inda al Lőcse. Lőcse venĝos laŭ sia forto.

– Tiu estas bovo.

– Sed tiu ne estas denunciato. Kiu ne pereas pro la humiligo, tiu pereas, se li demetas sian dignon.

– Ĉu oni ne kapablis elĵeti lin?

– Sed li bele argumentis. Kvankam li ankaŭ ne lasis sin persvadi. Tiu homo estas saĝa. Li asertis, ke tio estas bona metodo por privatulo, sed havaĵojn de iu urbo estas malpermesate malŝpari. Laŭ li la venĝo estas komuna bezono, kiun oni devas kontentigi malmultekoste. Sed oni povas fari ankaŭ intrigon. Nome la gloro estas bela afero, sed la sorto de la urbo dependas de la magistrato kaj la gloro ne estu entombiga sonorizado... Tiu bele diris tiujn vortojn.

– Ej, ne uzu tiujn esprimojn, – interrompis Bibók senpacience. – diru finfine, kio estis la rezulto.

– Hodiaŭ vespere post la deka horo Nustkorb venos al vi kaj se la dokumento estas ĝusta, tiam li pagos la 300 ormonerojn al vi.

Bibók ege ĝojis.

– Tio estas bona kiel la juglando. – li diris ŝerce premante la manojn de paĉjo Klebe.

Ne necesas diri, ke Bibók atendis la vesperon senpacience. La tempo pasis ege malrapide. Li iris en la arbaron por pasigi la tempon. Dume li teksis planojn. Nur post malheliĝo li iris hejmen. En la drinkejo estis multe da ekskursantoj kaj la gastigantoj portis bieron al la gastoj. Ankaŭ la vartistino portadis bierojn. Bibók nun ne petis vespermanĝon, ĉar li estis ekscitita, ke li havos morgaŭ 300 ormonojn. Li iris en sian luitan ĉambron, sidiĝis sur iu benko kaj dum pipfumado revadis. Kvankam oni diras, ke la pipfumado en malhelo estas ne vera ĝuo.

Li ne sciis, ĝis kiam li revadis. Subite li rimarkis, ke iu malfermas per ŝlosilo la pordon de la alia ĉambro. Poste iu enpaŝis en la alian ĉambron kaj tie restis. Tiu iradis tie tien kaj reen. Bibók iĝis iomete maltrankvila. Kiu estas tie kaj kial? Certe tiu senbruite venis sur la ŝtupoj, ĉar nur la bruon de la ŝlosilo li rimarkis. Bibók devis esti ege singarda. La afero estis iomete suspekta. Ĉu la juĝisto planas iun insidon? Ĉu povas esti, ke tiu sendas hajdukojn en la alian ĉambron kaj kiam oni transprenas la dokumenton, la hajdukoj premos teren lin kaj perforte forprenos de li la dokumenton. Kaj li nenie povos plendi.

La homo, se li havas multe da tempo kaj fantazioj, povas imagi. La gastoj jam disiĝis, ja estis malfrua vespero. Bibók vidis, ke ankaŭ la gasto foriris, nur Kárász sidis apud iu tablo kaj kalkuladis la ormonerojn kaj metis tiujn en iun tornistran.

Estis silenta somera nokto. Tiu estis la plej longa somera nokto. Bibók subaŭskultadis, sed nur la ranoj kvakis en la kanabotrempadaj kuvoj. Li jam tre atendis la juĝiston kaj iĝis ĉiam pli kaj pli nerva.

Li iris al la pordo, kiun li iomete malfermis. Li pensis, ke li ekaŭdos la paŝojn de la juĝisto. Sur la ŝtupoj estiĝis helo kaj la juĝisto pli rapide ektrivos lian luitan ĉambron.

Ĉar ankaŭ la fenestro estis malfermita, estiĝis trablovo. Pro tio la kandelo ĉesis lumi.

Ĝuste li volis turni sin por ekbruligi la kandelon, kio estis malfacila tasko. Kiam virina jupo siblis en la malhelo. (Li pensis, ke la vartistino venas al li.) Poste aŭdiĝis iu mallaŭta voĉo:

Malrapide iru sur la ŝtupoj, mia fraŭlineto, estu singarda.

(Sed ne la vartistino venis.) Bibók bone vidis la okazaĵojn. Li havis bonajn, akrajn okulojn kiel aglo.

Sed nun li ne volis kredi la vidaĵojn. La hieraŭa fraŭlino paŝetis sur la ŝtupoj, pri kiu Klebe diris, ke ŝi estas Rozalia Otrokóczy. Ŝi ĉi tie renkontiĝis kun iu. Videblis, ke iu maljuna metiisto akompanas la fraŭlinon. „Abomena seksperisto – murmuris Bibók, – ŝi ne hontas porti tien ĉi tiun ĉi fraŭlinon.” Bibók iĝis furioza kaj flustradis, kiom estas malbona la mondo. Sed nun jam pli trankvile komencis ekbruligi la kandelon. Li pensis pri tio, ke lia entrepreno ne interrompiĝis.

Malfacile komencis lumi la kandelo. Dume li aŭdis denove paŝojn sur la ŝtupoj. Li kuris al la pordo kaj pli bone malfermis tiun por fari lumon al la alvenanto.

Tiu estas la juĝisto – pensis Bibók, kaj vidis, ke iu dika figuro paŝadas sur la ŝtupoj. La malnova ŝtuparo forte krakis.

La dika figuro forte anhelis dum li atingis la pordon. Levinte la ĉapon tiu salutis lin.

– Mi serĉas sinjoron Tropszky.

– Mi estas tiu – respondis Bibók – bonvolu enveni.

La alvenanto venis en la ĉambron kaj demetis la grizkoloran longan senmanikan mantelon.

– Mi estas la juĝisto de Lőcse.

– Ĉu persone?

– Persone.

– Bonvenas ĉe mi via ekscelenco. – Bonvolu sidiĝi!

– Mi sidis sufiĉe da tempo – tiu diris senĝene – krome mi dezirus aranĝi la aferon rapide.

– Nome la horoj de la kanonoj finiĝis kaj mi dezirus iomete dormi.

– Sed mi esperas, ke vi honoras min kaj sidiĝas – instigis tiun Bibók, – por ne porti mian sonĝon.

– Sed mi venis por forporti sonĝon, sed ne la vian, sed la mian.

– Mi esperas, ke mi pensas saman.

Nustkorb finfine sidiĝis sur la benko. Li ĝustigis sian pistolingon kaj dume li aŭskultadis, ĉar li aŭdis voĉojn el la najbara ĉambro.

– Kia ejo estas tie?

– Certe ĝi estas la simila dormejo – respondis Bibók.

– En tiu ĉambro estas homoj.

– Tie estas ama randevuo – ridetis Bibók.

La juĝisto iĝis severa.

– Sed tio estas malpermesata por Kárász.

– Ne Kárász estas la rolanto de la randevuo.

– Kiu?

– Mi vidis nur iun hominon iri sur la ŝtupoj.

– Tio estas tamen skandalo – grumblis la juĝisto – tio estas netolerebla!

– Juneco estas freneza – pacigis tiun Bibók, dirante, ke li konas la lingvon de la studentoj.

– Oni devas fermi la okulojn antaŭ tio.

– Mi ŝatus ekkoni ties nomon.

– Kion vi donos al mi, se mi diros la nomon? – ŝercadis Bibók.

– Vi ege devontigus min, mia amiko-sinjoro.

– Sed promesu ne puni tiun, ja tiu estas belega.

– Sed mi volas puni tiun.

Bibók tiris la ŝultron.

– Do, tiuokaze mi ne perfidas mian sekreton.

Poste ili pritraktis pri la afero, pro kiu la juĝisto venis ĉi tien. Nustkorb volis vidi la dokumenton. Kiam tiu atente konsideris tiun kaj trompante diris, ke tio estas sensignifa kaj li donas por tiu nur 250 ormonerojn kaj Bibók ne pensu, ke li superflue havas tiun dokumenton.

– Prefere mi manĝas tiun – diris Bibók klare.

– Tiu estu je via sano. – mokis la juĝisto.

– Nu, tio ne okazos – taktikadis Bibók. – Sed nun jam mi petas por la dokumento 350 ormonerojn.

Ĉi tiu respondo konfuzis la juĝiston. Laŭ tiu Bibók havas fincan embarason. Io devis okazi. Pro io via varo iĝis pli grava – tiu diris moke.

– Mi povus doni la dokumenton al Paŭlo Görgey.

Nustkorb pro tio ĉi komencis pensadi kaj iĝis pli kara.

– Nu, tio ne estas malbona. 300 oraj moneroj estu la kosto, kiun sinjoro Klebe diris.

La juĝisto tro frue ekkonsentis. Nome Bibók ne lasis sin persvadi.

– Mi ege bedaŭras, sinjoro juĝisto, sed mi estas superstiĉa homo kaj ne reiras al la pli frua konsento.

Bibók diris pravon. Vere li neniam faris tion, sed tio efikos male.

– Nome ĉu vi ne donas la dokumenton por 300 oraj moneroj?

– Ne.

Nustkorb divenis, ke li fiaskis, kaj ĉagreniĝis, ĉar li ne sukcesis pri la ŝparado. Li provis akceptigi sian opinion. Li kare alparolis:

– Mia sinjoro Tropszky, nome sinjoro Bibók, mia kara amiko! (Tiu ekstaris kaj sian manon metis sur la ŝultron de Bibók.) Pensadu! 300 oraj moneroj estas multe da mono! La reĝo Sigmundo metis kiel garantiaĵon 16 urbojn kontraŭe de 37 000 oraj groŝoj. Kiom da stratoj vi povus ricevi por 300 oraj moneroj?...

Ili forte diskutadis, preskaŭ duelis, argumentis unu kontraŭ alia. Ili nomis unu la alian avara, mizerulo, dume ilia prestiĝo elĉerpiĝis, fine ili interamikiĝis. La juĝisto surmetis la mantelon kaj denove demetis, kaj ankoraŭ denove surmetis, dume proponis sume 20 orajn monerojn kaj ankoraŭ Bibók petis 5 ormonerojn.

– Donu ankoraŭ 5 orajn monerojn kaj tio estos preta.

– Jes. – diris la juĝisto. – Ĉio estas en ordo. – Do, estu la sumo 325 oraj moneroj.

La juĝisto transprenis la dokumenton kaj metis tiun en sian aktujon. „Finfine ĝi estas ĉe mi.” – tiu murmuradis kaj pli facile ekspiris, sed li ne pensis pri la dokumento.

– Atendu iomete. – diris la juĝisto – mi tuj portos la monon.

Bibók surpriziĝis.

– Kie estas la mono?

– La mono estas ĉe la hajduko, kiu atendas ĉe la enirejo.

– Tio ne estas bona. Donu reen la dokumenton.

– Sed mi lasas ĉi tie mian mantelon.

– Kion mi faru per via mantelo?

– Ĉu vi ĉi tiel estimas la juĝiston de Lócse?

– Ĉu vi vere estas la juĝisto de Lócse? Sed certe vi timis tion, ke vi venas en la groton de forrabisto kaj ne kuraĝis porti tien ĉi la monon.

– Vi pravas. – diris rekonante la juĝisto kaj volis redoni la dokumenton.

– Ne redonu tiun, ja mi estas sinjoro kaj kuniras por indulgi vin de la superflua irado sur la ŝtupoj.

Nustkorb jesis. Bibók malfermis la pordon kaj li lasis antaŭeniri la juĝiston, atentante la paŝojn de la juĝisto, dirante, ke li singarde paŝu sur la ŝtupoj. Subite Bibók puŝis la flankon de la juĝisto. – Rigardu tien! – flustris Bibók.

Nustkorb rigardis en la dirita direkto, kvankam iomete malfrue, sed li vidis iun virinon malaperi malantaŭ iu konstruaĵo. Ŝi malaperis kiel la nebulo. Tiu estis virino, nome ŝia jupo siblis atingante la arbustojn. Ŝia figuro ombris sur la muron de la kokinejo kaj la gazonon.

– Ĉu ŝi estas tiu? – demandis vigle Nustkorb.

- Jes.
- Kie estas la aliulo?
- Li iris - diris Bibók - apud la muro, sed la paŝoj ankaŭ nun aŭdiĝas. Pst!

Ili ekstaris sur la etaĝa verando, kiu estis plie skafaldo sen apogrelo. Kaj al skafaldo estis apogita iu eskalo.

Ili subaŭskultadis iomete, vere aŭdiĝis mallaŭtaj bruetoj de paŝoj, kvazaŭ rano saltadus, aŭ kato kurus, aŭ vesperto puŝiĝus al la muro. Kelkfoje iu sprono, aŭ glavo tintis atingante gruzerojn. (Certas - pensis Bibók, ke - tiu estas la hieraŭa soldato.)

- „La birdoj” forflugis. - diris Bibók - ni iru, sinjoro juĝisto.
- Ĉu vi konas la virinon?
- Jes. Kaj la urbaj maljunulinoj ege dezirus koni ŝin.

La juĝisto bone fartis, ĉar la dokumenton li havis kaj havis ŝercan humoron.

- Mia kara sinjoro! Ankaŭ mi havas hejme iun maljunulinon, al kiu mi ne povas klarigi ĉi tiun noktan aventuron. Mi dezirus porti al ŝi iun interesan klaĉon.

- Sed promesu, ke kiel juĝisto vi ne interesiĝas pri ŝi.
- Tio estas en ordo. Mi ne diras, ke tio estas puninda ago.

Poste Bibók flustris en la orelon de Nustkorb.

- Ŝi estas fraŭlino de la edukejo.
- Tio estas senprecedenca! - li balancis la kapon.
- Tiu estas Rozalia Otrókóczy.

Nustkorb ekridis, ĉar li ne volis kredi tion.

- Ne diru tion! Vi estas maljuna bubo. Kion vi pensas?
- Tio pravus. Helpu min Dio tiel!

Dume ili atingis la subon de la eskalo kaj irante plu Bibók rigardis sur la gazonon kaj rimarkis iun strangan molan aĵon. Li levis tiun.

- Kio ĝi estas? - demandis Nustkorb.
- Tiu estas iu speciala floro. Certe la fraŭlino faligis tiun.
- Montru tiun. La diablon! - murmuris en si mem Nustkorb. - Ja ĉi tiu estas iu Georgina-rozo.

Ĉi tiuj rozoj tiutempe estis novaĵoj. Tiuj troveblas nur en la ĝardeno de la maljuna sinjorino Fabricio kaj al la urbanoj ege plaĉas.

Nustkorb jam sciis, pri kio temas.

Fabricio portis, aŭ sendis tiun al la fraŭlino kaj ŝi faligis tiun. La rozo estis en ŝia hararo. Tio estas terura. La juĝisto paliĝis. Ne. Tio estas neebila. Estus bone postatingi ilin.

La juĝisto hastis al la elirejo de la ĝardeno, kie staris iu urba hajduko. La juĝisto petis de la hajduko la monon, poste li forsendis tiun kaj transdonis al Bibók la monon, kiu metis ĝin en saketon.

- Kalkulu tiujn. Enestas 300 ormoneroj.

Bibók displektis la saketon, enmetis sian manon kaj sentis la metalgarnaĵojn, tiklis lian sangon la ormoneroj. Li elmetis unu pecon kaj konsideris per la fingro ĝian senvundecon. Li kalkulis la monerojn ĝis 74, sed ekenuis kaj li remetis la monerojn en la saketon.

– Certe haviĝas tiu monsumo.

– Mi konstatas, ke vi ne estas komercisto. Etendu vian mankavon – diris Nustkorb kaj metis en ĝin 25 orajn monerojn.

– Tio estas stranga, – diris Bibók montrante al la fenestro de la etaĝo – ke en la ĉambro, kie okazis la rendevuo, tie ankoraŭ nun estas heleco.

– Povas esti, ke ili ne malŝaltis la lumilon.

– Ne. Iu estas tie. – diris Bibók. – Ombro de tiu videblas. Nun tiu malŝaltis la lumilon kaj iĝis malhele en la ĉambro. Nun tiu forlasas la ĉambron. Ni iru for!

– Ne. Mi atendas tiun – diris subite Nustkorb. – Mi volas rigardi en la okulojn de tiu.

– La kuraĝulo fajfas ankaŭ en la preĝejo. Kial tio estas bona?

La juĝisto ne respondis. Nur liaj okuloj brilis, sed Bibók ne povis vidi tion.

– Tiuj homoj estas danĝeraj kaj vi povus havi malbonon.

– Ej! Kiu havus la kuraĝon por bati la juĝiston de Lócse?

Subite paŝoj aŭdiĝis. Nustkorb iris apud la trunkon de kverkoarbo kaj atentis. Sed Bibók iris apud la muron de la domo. Iu altstatura muskola viro proksimiĝis sur la vojo portante botojn por rajdi kaj lia vizaĝo estis kaŝita, la mantelo ĝisduone metite sur la ŝultron. Tiu homo ĉe la angulo de la domo ekhaltis, ĉirkaŭrigardis kaj ekiris al la elirejo. Nustkorb apenaŭ spiris.

Sed kiam la muskola viro atingis la kverkoarbon, tiam Nustkorb haltigis tiun.

– Bonan vesperon, mia sinjoro, haltu momenton.

– Kion vi deziras? – demandis la muskola viro surpriziĝante.

– Kiu vi estas? Kial vi estas ĉi tie?

Kaj Nustkorb metis la manon aŭdace sur la ŝultron de la muskola viro.

– Malaperu! Vi estas impertinenta! – kaj per la pugno li forte ekfrapis sinjoron Nustkorb, ĝuste al la koro de tiu, kiu ŝanceliĝis, malbonfarton eksentis kaj komencis kapturniĝi.

– Matias, Bibók! Venu tuj! – kriis la juĝisto.

Bibók hezitis, momente ne sciante kien kaŝi la ormonerojn. Fine li ĵetis tiujn en iun buksoarbuston. Matiaso, la hajduko malfacile alvenis stumbladante inter la arbustoj.

La muskola homo vidante la danĝeron deĵetis sian mantelon. La luno ĝuste lumigis lian vizaĝon.

– Ja tiu ĉi estas Paŭlo Görgey – surpriziĝis Nustkorb kaj lia koro batis laŭte.

Bibók teruriĝis, ŝvitis kaj ne kapablis moviĝi. Pro la neatendita feliĉo ankaŭ Nustkorb estis ne kapabla moviĝi kaj agi sobre.

– Nu, estas bone, ke mi ekvidis vian ekscelencon – kapitulacu!
– Ankoraŭ ne! – diris Paŭlo Görgey mallaŭte kaj fajfis per iu fajfilo, kiu estis ĉirkaŭ lia kolo.

Nustkorb tuj ekkomprenis la celon de la fajfado kaj ĵetis sin sur sinjoron Görgey kaj komencis tiun gorgopremi. Görgey defendis sin per siaj grandegaj pugnoj, sed li sukcesis ekblovi la fajfilon, kiu donis akran voĉon, kiam duone li estis jam senpova, inertia, ĉar dume alvenis Matiaso, la hajduko. Tiu kunpremis lin de malantaŭe kaj perpiede provis tiu krurfalĉi, por ke ili povu kune teren ĵeti lin.

– Ni devus porti vivanta tiun al Lőcse, – anhelis Nustkorb, kies okuloj brilis pro la sukceso kiel la lampiro.

– Nu, Bibók, – instigis Nustkorb la paralizitan aventuriston, – helpu, via ekscelenco.

Sed jam ili malfruis. Nome dum la forta batalo ili ne rimarkis, ke efike de la fajfado la husaroj kaj solduloj de Paŭlo Görgey rajdas por helpi la prefekton. Bibók ekkuris, li provis savi sin, sed ĉie oni haltigis lin. Preston eltiris la glavon kaj kuris al sia mastro por defendi lin. Ankaŭ la aliaj faris same. Nustkorb provis pafi per sia pistolo, sed la solduloj elprenis perforte la pistolon el lia mano. Preston levis la glavon kaj demandis:

– Ĉu mi senkapigu lin?

Paŭlo Görgey volis jesi, ĉar li estis ege nerva, furioza, sed memoris sian destinon kaj prefere stentoris:

– Ankoraŭ ne! Lasu lin, Preston! Pri la juĝisto prefere malfrue mi decidus, sed tiun fihomon, Bibók kaptu vivanta, aŭ mortinta!

Poste li tuj surseliĝis kaj diris:

– Portu mian mantelon, la juĝiston kaj la hajdukon! La vicprefekto galopis for. La freŝa nokta aero trankviligis lin kaj liberigis lin de la satanaj ekscitiĝoj.

Nun jam li ĝojis, ke li ne murdigis la juĝiston. Ja Nustkorb estis ŝatata homo de la kurucoj, de la kurucaj oficiroj. Ankaŭ la generalo Andrásy ŝatis la juĝiston, povas esti, ke li venĝintus la morton de la antaŭa juĝisto. Estintus frenezaĵo verŝi oleon sur la fajron. (Nome plue eksciti la homojn.)

Paŭlo Görgey pensis, ke li faros ŝercon pri la magistrato de Lőcse. (Oni ridu en la urbo.) Li planis, ke la juĝiston li survestos en jupon, sur la kapon metos virinkufon kaj tiel tiun portos al la vendoplaco de Lőcse. (Ĉi tio estis tiutempe la plej granda hontaĵo.)

Sed tion ĉi li ankaŭ ne volis fari. Nome serioza homo ne faras ĉi tiajn aferojn. Kial li koleru sinjoron Nustkorb? Ja li nur volis ekkapti lin. Ĉiuj juĝistoj tion volas fari. Nustkorb ne povas havi malbonon. Tio estus granda frenezaĵo. Kaj ankaŭ sinjorino Marják povas ricevi la jupon kaj la virinkufon.

Ĉar jam li galopis troe antaŭen, li regalopis al sia grupo.

Oni akompanis la juĝiston kaj lian hajdukon perpiede. La juĝisto malesperiĝinte senvorte perpiedis. La manoj de Bibók estis kunligitaj. Per ŝnurego kondukis lin Johano Ŝari, la la armita akompano, kiu sidis sur ĉevalo. Kelkfoje la armita akompananto galopis, do Bibók devis kuri pro kio li anhelis. Johano Sári ridaĉis. Kiam Bibók ne devis kuri, tiam li veadis dirante, ke ĉiun sian havaĵon li lasis en la ĝardeno, kie estas multe da oroj. Li petpetegis povi reiri pro kio li riĉe pagos.

La soldatoj ridis, sed ne kredis lin.

– Kial vi bezonas, oĉjo, multe da oro? Ja vi havos manĝaĵon ĝis via morto.

Paŭlo Görgey atingante la grupon tuj riproĉis siajn homojn:

– Kial vi akompanas la juĝiston sinjoron Nustkorb piediranta? Diablo portu vin! Mi ne estus kredinta Preston, ke vi estas stulta. Ĉu vi ne sciis, ke la sinjoro ankaŭ en ĉiu stato en la infero estas sinjoro? Kiu havas malbonan ĉevalon?

– Ankaŭ mi! Ankaŭ mi!

Ankaŭ kvin homoj anoncis sin. Fine donis Paŭlo Görgey la ĉevalon de Francisko Kiŝŝ al la juĝisto.

– Francisko Kiŝŝ, elseliĝu kaj donu vian ĉevalon al la sinjoro juĝisto. Mi donus al vi la plej bonan ĉevalon, sed timas, ke vi forfuĝas de ni, kion mi tre bedaŭrus.

Dume oni anoncis al Paŭlo Görgey, ke Bibók petpetegas reiron en la ĝardenon por siaj oraj moneroj.

– De kie li estus akirinta tiujn orajn monerojn? La fiulo mensogas kiel ĉiam.

– Li diris, ke la juĝisto povas atesti tion.

La juĝisto neante skuis la kapon.

– Certe li volas forfuĝi. Li estas ruza vulpo. Li ne povas iri tien – decidis Paŭlo Görgey – Sed Plichta, Rajnald kaj Kapánczy¹²¹, informiĝu pri la loko kaj sen ĉevaloj iru al la menciita loko kaj serĉu la ormonerojn.

(Paŭlo Görgey estis saĝa. Pro tio li lasis reiri perpiede la plej malbonajn soldatojn, ĉar perpiede ili reportos la orajn monerojn, sed rajdante ili forportus la ormonerojn kaj ili povus malaperi ĝiseterne.) Poste Paŭlo Görgey forgalopis al Görgő kaj kiam la grupo alvenis al Görgő, li jam ŝanĝinte vestaĵon akceptis la juĝiston sinjoron Nustkorb.

– Bonvenon! – juĝisto sinjoro! Bonvolu enveni!

En la manĝejo estis antaŭpreparita la tablo por vespermanĝi. Sinjorino Marják rapide faris regnestran festenon. Paŭlo Görgey vokigis kelkajn studentojn (kandidatoj pri advokato) por amuzi la gastojn. Ili prezentis gajajn anekdotojn. Li portigis el la kelo tre bongustajn vinojn, vinon de Tokaj el 1682, kiu jaro estas la naskiĝjaro de la juĝisto Nustkorb. Ĉi tiu gesto la juĝiston repacigis, ĉar li preĝis al Dio kaj diris, ke „estu la volo de Dio.” Dume ili drinkadis la fajnan vinon.

¹²¹ La familio-nomo Kapánczy elparolendas: kapanci.

Ili paroladis pri indiferentaj aferoj: pri la vetero, pri la milito, pri agrikulturo kaj pri specialaj kazoj. Ekzemple sur la kanonon de Stefano Berthoti abelaro flugis en Érsekújvár; en Sárospatak iu studento havis ege longan sonĝon kaj nur dormas. Se iu demandas lin, kie estas Heister, tiam li diras: en sia tendo de Pozsony¹²². Kaj kion li faras? Li respondas: razas sin. La studento scias multon. Pro tio Bercsényi¹²³ kunportas li al sia tendaro kaj dungas en la intereso de la militaj celoj...

Mi ne ŝatas tion, se la hungaro fidas la abelaron kaj la dormantajn studentojn.

Laŭvorte ili paroladis pri multo dum la vindrinkado, sed pri la nuna kazo ili ne parolis. Kvazaŭ fremduloj estus vespermanĝantaj hazarde, kiuj nenion sciis diri unu al alia. Pro tio nur pri neutralaj klaĉoj temis. Jam mateniĝis kaj Nustkorb komencis esti dormema. Per siaj okuloj li dormeme palpebrumis.

Paŭlo Görgey ĝentile atentigis lin:

– Se vi enuas, tiam vi povas foriri. En la korto estas antaŭpreparita la kaleŝo. Mi ne volas teruri sinjorinon Nustkorb, ĉar vi longtempe estas malproksime.

– Ĉu mi povas iri hejmen? – li balbutis mirante.

– Kion vi pensis, via ekscelenco? Ja mia celo estis drinkadi, tinti per glaso okaze de la nuna neatendita renkontiĝo.

Nustkorb konfuziĝis, gratis sian barbon kaj ŝvitis.

Nustkorb ekstaris, adiaŭis la domposedanton kaj la studentojn kaj poste elŝanceliĝadis el la manĝejo. Paŭlo Görgey akompanis lin al la kaleŝo. Kvar belegaj ĉevaloj estis jungitaj al la kaleŝo. Hajduko de Paŭlo Görgey sidis sur la unua sidejo kaj apud tiu sidis Matiaso, la hajduko de la juĝisto. Paŭlo Görgey etendis la manon al Nustkorb:

– Bonan nokton, mia sinjoro, kaj mi esperas, ke mi denove ekkaptos vin.

– Bonan nokton – diris ankaŭ la juĝisto, – estu singarda prefekto, nome se mi ekkaptos vin, tiam ĝi finiĝos alie.

Iĝis mateno. La ruĝa disko de la suno komencis aperi super la montoj.

– Ko – ke –ri –ko kriis akre iu koko en la kokinejo.

¹²² La loknomo Pozsony elparolendas: poĵonj.

¹²³ La familio-nomo Bercsényi, elparolendas: berĉenji.

13-A ĈAPITRO

La mortinta juĝisto lastfoje movas sin

La aventuro de Paŭlo Görgey estis aŭdaca, kiam li aperis en la ĝardeno domo de la urbo. Tio okazis ne unufoje, sed li devis fari tion devige. La karmemoraj geedzoj Darvaŝ de Osgyán¹²⁴ sian tutan havaĵon postlasis al la infanaĝa Rozalia Görgey. Sed la familio Darvaŝ de Abaúj kaj la familianoj de Kiŝhont apelaciis la testamenton. Ili iĝis perdantoj de la proceso, sed sciis, ke Paŭlo Görgey ie kaŝadas sian filineton. La ruza advokato, ĉar li volis ĉikani sed ankaŭ kredi tion, komencis novan proceson kaj disvastigi tion, ke Rozalia ne ekzistas, sed ankaŭ tiam ne ekzistis, kiam la geedzoj Darvaŝ mortis. Do, Rozalia ne povas heredi havaĵon de tiuj. Kie ŝi estas? Ĉu ŝi mortis? La advokato asertis, ke ŝi malaperis el Osgyán antaŭ la morto de la geedzoj Darvaŝ.

Supoze, sed ne akceptebla, se la filino vivas, ankaŭ tiam multaj argumentoj asertas, ke Rozalia ne povas heredi. Inter aliaj de la familio Darvaŝ de la departemento Abaúj, nome la impertinenta prokuratoro asertis, ke Rozalian mamnutris la edzino de Johano Görgey kun sia filineto kaj ĉar unu filineto mortis, la identeco de Rozalia estis duba. (Iu diablo sufloradis ĉi tion al la impertinenta advokato.) Jam tiam povis okazi eraro.

Laŭ ĉiuj saĝaj homoj ĉi tio estis obstina skrupulaĉo, sed Paŭlon Görgey kortuŝis. La tribunalo nur tion demandis: Ĉu Rozalia vivas, aŭ ne? Do, Rozalia devis aperi antaŭ la tribunalo kune kun la atestantoj.

Sed tio estas tikla afero tiutempe, tamen la havaĵon Paŭlo Görgey ne volis lasi perdiĝi, ja li bezonis la havaĵon, ĉar la disputado kun la Lőcseanoj elĉerpis lian monfonton.

Kiam Paŭlo Görgey informiĝis pri la tribunala verdikto, tiam li tuj vokigis Georgeton Görgey.

– Ĉu vi konas Rozalian Otrókóczy?

Georgeto ruĝiĝis.

– Kial vi demandas, mia pli maljuna onklo?

– Tuj estos evidente. Ĉu vi konas ŝin?

– Mi jam vidis ŝin.

– Kia fraŭlino ŝi estas? – demandis la vicprefekto indifere.

– Ŝi estas la plej bela fraŭlino de Lőcse.

La vicprefekto rigardis lin forte suspekteme, pensante, ke li scias ion. Sed lia vizaĝo estis honesta kaj ne videblis sur ĝi ruzeco.

¹²⁴ Bildoj pri la fortikaĵo de Osgyán troveblas ĉi tie:

<https://deneverszabo.blogspot.com/2015/07/osgyan-varkastelya.html>

– Ĉu povas esti, ke ŝi plaĉas al vi? (Georgeto pli forte ruĝiĝis.) Kia familio estas la familio Otrokoczy?

– Mi ne scias. – respondis Georgeto.

– Nu, mi scias. Tiu fraŭlino estas via malpli aĝa kuzino.

– Ĉu mia malpli aĝa kuzino?

– Rozalia estas mia filino.

Georgeto ege surpriziĝis pro tio. Sed Paŭlo Görgey klarigis, kial li sendis ŝin al Klöster sub pseŭdonomo kaj kial oni devas gardi ankaŭ plu la sekreton. Li klarigis al Georgeto la komplikitan proceson kaj tion, ke Rozalia devas aperi antaŭ la tribunalo. Li diris al Georgeto, ke li iru al Rozalia por transdoni lian leteron kaj antaŭpreparu ŝin al la veturado. La maljuna Quendel portos ŝin el la instituto, dirante, ke li akompanas ŝin al ŝiaj gepatroj. Sed Quendel portos ŝin al Kaŝŝa.

– Mi estus tre dankema – diris la prefekto, – se ankaŭ vi veturus al Kaŝŝa sur aparta veturilo kaj helpus ilin en tiu urbo.

Georgeto klinis sin.

– Mi faras tiel, kiel mia onklo ordonas.

Ĉi tiel okazis. Paĉjo Quendel kun permeso de fraŭlino Klöster portis Rozalian Otrokoczy el la instituto kune kun la atestantoj de Osgyán, inter ili estis sinjoro Varga kaj lia edzino, kaj atestigis antaŭ la tribunalo, ke Rozalia Görgey vivas kaj akceptas la heredaĵon.

Sed Görgey sciis, ke ĝis la fino de la proceso estas bezonataj multe da konsiladoj, subskriboj. Pro tio li persvadis sinjoron Kárász luigi la ĝardenan restoracion de Lőcse al iu bona amiko. Tiel li povis renkontiĝi plurfoje kun sia filino. Tiun renkontiĝon helpis ankaŭ paĉjo Quendel, kiu povis kunporti Rozalian el la instituto.

Ĉi tiel okazis la renkontiĝo; Sinjoro Quendel akompanis al la restoracio la fraŭlinon, poste ankaŭ Georgeto Görgey aperis kaj kune ili akompanis ŝin hejmen, post tio la subskriboj ekk okazis kaj la plurajn farenadojn ili priparolis.

Samtempe Paŭlo Görgey demandis pinĉetante la mentonon de la filino:

– Nu, kiam vi venos hejmen, fraŭlino?

– Tio dependas de vi, mia patro. – ŝi diris la kapon klinante.

– Nu, tiuokaze mi kunportos vin tuj.

Rozalia paliĝis.

– Ĉu vi ektimis? Certe vi havas iun.

Rozalia ruĝiĝis, rigardis flanken, sed ne respondis.

– Ne timu, mi nur ŝercis. – daŭrigis la vicprefekto serioziĝinte. – Restu tie ankoraŭ, sed mi esperas, ke baldaŭ vi povos veni hejmen.

Ĉio ĉi ne havis gravecon, ĉefe antaŭ la ĉeestantoj. Sed Paŭlo Görgey longtempe rigardadis sian filinon kaj diris al Quendel:

– Ho, rigardu, ke tre ege similas unu al alia ambaŭ gekuzoj. Ĉu ne?

Paĉjo Quendel rigardis atenteme la kurucan oficiron kaj skuis la kapon:

– Mi ne vidas similecon.

– Kiu atentis tion? Kvazaŭ multfoje iu vorto estus nur babilaĉo, sed multfoje ĝi estas peza ŝtono, kiun iu suferanta animo klopodas forŝovi.

Ĉi tiel okazis la renkontiĝo en la restoracio kaj finiĝis gaje. Nur por Bibók tio ne estis gaja. Paŭlo Görgey estis kontenta, ĉar li venkis kontraŭ si mem. La juĝisto liberiĝis malmultekoste kaj la solduloj certe trovis la ormonerojn kaj oni ne povis vidi ilin en Görgő.

Sed ankaŭ tio estas vera, ke Nustkorb ne povus ricevi pli danĝeran punon, ol en la infero. Nome la tuta urbo iĝis lia malamiko. Disvastiĝis la famo ege rapide (certe helpe de la studentoj), ke la juĝisto de Lőcse vespermanĝis en Görgő kun la prefekto. Ĝis mateniĝo ili diboĉis kaj paroladis. La tuta urbo iĝis ekscitita kiel iu abelujo. Kiel tio povis okazi? Ĉu Dio permesas tion? La plej sobraj saksoj skuis la pugnojn. La sinjorinoj volis disŝiri la nigrajn vestaĵojn. Tiu maljuna fihomo jarojn funebrigas nin kaj li sekrete parolas kun Paŭlo Görgey. Oni rompis la fenestrojn de la domo de Nustkorb, ĉiuvespere la homamasoj katmuzikon improvizis. Inter la kanajlaro estis ankaŭ prestiĝon havantaj maljunaj homoj kaj la homamasoj skandis en la vendoplaco: „Nustkorb eksiĝu! Li iru al Görgő!”

La publikopinio devigis la senaton kaj la juĝiston kunvoki la senatanojn. La juĝisto ne kuraĝis forlasi sian hejmon. La senatanoj volis ekkoni la pravon pri la famo. Ĉu povas esti, ke la juĝisto vespermanĝis ĉe Paŭlo Görgey?

Sinjoro Nustkorb konfesis, ke tio okazis tie, sed pro perforto.

Sinjoro Bibera eksaltis kolere kiel la hamstro:

– Kiel eblas vespermanĝi pro perforto? Mi vidis tion nur tiam, kiam oni engorĝigas la anseron.

– Sed mi vespermanĝis tie kiel malliberulo de Paŭlo Görgey.

Pro tio iĝis granda mirkonsterniĝo.

– Kion tio signifas? Kion parolas via ekscelenco? Ja tio estas malebla.

Poste li rakontis, ke li iris en la ĝardenan restoracion por aranĝi gravan aferon de la urbo dum la noktaj horoj. Sed li diris, ke nun li ne volas detali la aferon. (Kriadoj estis aŭdeblaj: Ni scias!) Li rakontis tion, ke forirante de tiu loko li renkontiĝis kun Paŭlo Görgey. (La aliaj maltrankviliĝis kaj Bibera ekkriis: Kion tiu serĉis tie?)

– Tion mi ne scias. – diris la juĝisto nerve – li ne diris al mi. Iru, povas esti, ke al vi li diros tion.

La juĝisto sinjoro nun jam senĝene detalis la okazintaĵojn. Li rakontis, ke li volis ekkapti la prefekton, sed ĝis Matiaso, la hajduko, atingis lin, Paŭlo Görgey fajfis kaj aperis ties satelitoj kaj kiel malliberulon al Görgő oni transportis lin. Sed tie oni portis li ne en karceron, sed en elegantan manĝejon. Tie li ricevis abundan

vespermanĝon. Poste Paŭlo Görgey portigis lin hejmen per eleganta kaleŝo. Pro tio li ne estas kulpa.

– Tio estis ĝentlemana ago – diris mallaŭte Donat Mauks.

– Do, la juĝisto vere ne estas kulpa – konstatis la senatanoj – sed vi devas fari ion, ĉar la publiko estas ege furioza.

– Mi havas la panaceon por rekompenci ties agon – diris la juĝisto kaj batis sur sian poŝon.

– Vere ni devas fari ion urĝe – opiniis la saĝa Moŝtel.

Sed en la urba kelo, kie ĉiam oni drinkis dum la drinkfesteno post la senatanaj kunsidoj, la juna Fabricio tute ne sekretis, ke la situacio ne estas klara kaj diris, ke la juĝisto ne imitu la aglojn, sed la helikojn, kiuj entiras siajn molajn kornojn. Nome la juna kuraĝulo aludis pri la ekŝiĝo de la juĝisto. Tio estis estro de la nepacigeblaj homoj kaj timis, ke ĉesos la kolero de la urbanoj pri Paŭlo Görgey kaj la krimon oni ne venĝos. Ja li sciis, ke la ago de Paŭlo Görgey estis tro frue aganta kaj la nobeloj nur bagateligis la aferon.

Sinjoro Kripeji, kiu trinkis jam la kvarajn pokalojn da vino, aprobis la opinion de Fabricio.

– Vi pravas, mia sinjoro. Nun ne la saĝaj homoj direktu la urbon, sed la furiozaj homoj.

Sed sinjoro Nustkorb nun estis furioza, koleris sinjorojn Kripély kaj Fabricio.

– Nenion eblas fari sen pensado. Ĉu la homamaso muĝas? Mi faras mian aferon laŭ mia konscienco kaj ne okupiĝas pri ĝi. Kion signifas la muĝo de la homamaso? Viaj oreloj estas kulpaj, ne la homamaso. Ankaŭ muĝas la telefonaŭdilo. Kio muĝas en ĝi? Ja, tiu estas tute malplena.

Fabricio skuis la kapon.

– Pri la vereco ĉiuj metaforoj lamas, mia sinjoro.

– Sed ne lamas pli bone, ol via vereco. – kontraŭis ankaŭ Nustkorb, nome ankaŭ li sciis diskutadi.

– Kiel? – demandis Fabricio moke.

– Ĉar pro vi mi ne estus luktinta kontraŭ Paŭlo Görgey.

– Ĉu pro mi?

– Pro iu, kiu kara estas al vi.

Fabricio pensadis.

– Kial vi diris tion ĉi? – li demandis konfuzite. – Pri kiu temas?

– Pri iu bela fraŭlino, he-he-he!

Nun jam Nustkorb ridis moke kaj Fabricio iĝis incitĝema kaj la pokalon ĵetis sur la tablon. – Sufiĉas. Via stultaĵeto nervozigas min.

– Mia sinjoro, kondutu honeste – Nustkorb admonis la junulon dignoplene – ja vi parolas kun juĝisto de Lőcse.

Fabricio trankviliĝis, klinis sian kapon humile kaj sian bruston batis per la mano.

– Mi estas kulpa. Pardonu min, sinjoro juĝisto, mi ekscitiĝis. ...

Nustkorb metis sian manon sur la kapon de Fabricio kaj meditante diris:

– Tion kaŭzas la amo. Mi scias tion. Ja, ankaŭ mi estis juna... Mi ne diskutadas. Prefere ni drinku malmulte da ruĝa vino. Sed antaŭ ĉio ni manĝu ion. (Kaj li alparolis la drinkejmastro.) Portu al ni malgrandan graspoton da kazeoj de Sepeŝ.

Ili manĝis la kazeon kaj poste drinkis ruĝan vinon, paroladis pri ĉio, sed Fabricio iĝis muta. Li nur tiam alparolis, kiam alvenis la servistino de la familio Nustkorb portante mesaĝon al juĝisto Nustkorb, laŭ kiu li venu tuj por tagmanĝi, ĉar se li ne venos, tiam li povas iri tagmanĝi al Görgő. Cetere tiu urbo havos malbonon, kies aferojn oni aranĝas en iu vinkelo.

Nustkorb ĉagreniĝis, sed ekstaris kaj hejmeniris. Pro tio neniu suferigis, ja ĉiuj senatanoj same kutimis foriri el la vinkelo.

Sed nun li tamen furiozis, koleris sinjorinon Nustkorb pro ŝia diro: ke li iru tagmanĝi al Görgő!" Pro kio la aliaj kaŝe ridetis. Li havus ŝaton vangofrapi la servistinon, sed nur ĝemetis amare kaj ekiris hejmen. Sed dume la promenbastonon li sibligis en la aero kolere. Li ege koleris sian edzinon kaj planis riproĉi ŝin.

Li ne rimarkis, ke Fabricio iras apud li, kiu alparolis lin:

– Nun ni estas jam solaj, mia sinjoro, diru al mi, kion vi diris en la kelo.

– Hm. – Nustkorb diris maleme. – Ĉu mi diru tion? Estus pli bone ne diri. Tio estus pli saĝa. Se tamen mi dirus ion, tiam mi konsilus al vi ne geedziĝi. Mi ne estas malbona homo, ne donas al vi malbonan konsilon.

Fabricio kaptis lian manon, premis ĝin tiom forte, preskaŭ eliris el tiu la sango.

– Ĉu vi aŭdis ion?

– Jes. Ion. Sed lasu mian manon.

– Ĉu pri Rozalia? – li demandis tremetante.

– Jes. Pri ŝi.

– Ne ekscitu min, diru tuj.

– Kiam mi renkontiĝis kun tiu homo en la ĝardeno restoracio por marĉandadi pri tiu dokumento, mi aŭdis paŝojn en la najbara ĉambro. Mi interesiĝis pri la tieaj okazintaĵoj. Tiu homo diris, ke tie estas ama rendevuo. Sed ĉar mi sciis, ke tie ne estebas aranĝi rendevuojn, ja sinjoro Kárász ne povas permesi tian laŭ nia interkonsento. Mi demandis tiun homon pri tiuj personoj. Tiu diris, ke la viron li ne konas, sed la virinon li rekonis. Ŝi estis Rozalia Otrokozy.

La juna, kvazaŭ infanaĝa senatano paliĝis.

– Tio estas hontinda kalumnio. – li stertoris ekscitite.

– Ankaŭ mi kredis tion – diris Nustkorb malrapide – ankaŭ nun mi kredas tion, sed...

– Diru nur, ĉar mi volas diri al iu miajn blasfemojn. (Fabricio iĝis ekscitita, liaj okuloj iĝis sangaj pro la ekscito. Liaj manoj tremetis kvazaŭ li skuus iun kribrilon.)

– Ankaŭ mi vidis eliri la virinfiguron, sed mi ne rekonis ŝin, sed...

– Ĉu ankoraŭ okazis io? – li eksiblis.

– Mi trovis iun rozon sur la tero, kiu certe defalis de ŝia hararo. Tiu estis Georgina-rozo.

– Kiam ĉi tio okazis? – demandis Fabricio moroze.

– Marde, malfrue vespere. Ĉar min la afero interesis pro vi, mi atendis iomete apud la elirejo por rigardi la viron. Kaj en tiu momento mi ekvidis sinjoron Paŭlo Görgy, kiu samtempe estis en la konstruaĵo. Certe li pritraktis kun Kárász, la penduminda fripono. Mi ankaŭ diris al la senatanoj, ke ili ne donu al li la restoracion, ĉar li estas amiko de la Görgő-anoj. Nu, ni alvenis. Rigardu mian domon. Oni malbeligis tiun.

Kaj vere la vitroj de la fenestroj de la domo estis rompinte kaj sur la muroj estis desegninte malbelaj figuroj, surskriboj. La plej netolerebla figuro estis la kapo de sinjorino Nustkorb, kiu ĉe la fenestro kaŝrigardis la straton. Sur ŝia kapo estis blanka kufo. Ŝi estis miopa kaj ne rimarkis sian edzon. Sed Nustkorb rimarkis ŝin kaj li klopodis adiaŭi sinjoron Fabricio, ke li ne estu atestanto de ŝiaj blasfemadoj. Li etendis la manon al Fabricio.

– Nu, ni nun disiĝos, mia sinjoro.

– Sed unue vi devas diri la restadejon de tiu homo. – anhelis Fabricio kaj prenis forte manon de Nustkorb, kiu estis varmega kiel iu gladilo.

– Kiun homon?

– Tiun homon de Béla, kiu vidis Rozalian iri tien.

– Tiun homon eblos malfacile ektrovi.

– Mi serĉos tiun homon ankaŭ sub la Tero – diris Fabricio firme decidiĝinte.

– Ja ĝuste tie estas tiu homo. Tiu estas en Görgő en la kastelo en iu karcero.

– Nu, mi atingos ankaŭ tiun. – diris Fabricio kaj grandan bategon faris sur iun piedon de la domo de Nustkorb. (Estas piedo de la domo: kolono de la domo.) Pro la batego la mortero defalis de la kolono.

Poste la junulo turnis sin kaj forkuregis apud tendoj de la trogon farantaj homoj. Li estis furioza. Li kuregis kiel la tempesto. Nustkorb postrigardis lin meditante: „Mi timas, ke mi ege ekscitis la junulon” – li murmuris kaj postkriis: – Ne faru nepripensitan aferon!”

Fabricio faris tiel, kvazaŭ li ne aŭdintus tion. La piedirantoj salutis lin, sed li ne reciprokis la salutojn. Li paroladis kun si mem. Li gestadis per la manoj. La piedirantoj diris:

– Ĉi tiu homo havis malbonhumoron jam post la ellitiĝo. Certe estas, ke hodiaŭ io okazis dum la urba kunveno.

Sed nur la homa fantazio funkciis. Tiun fakton, ke ĉe la vespermanĝo Nustkorb estis malliberulo de Paŭlo Görgey, li prezentis kiel la alian flankon de la kazo. En la tuta urbo oni demandadis:

– Kial la vicprefekto estis en la urba ĝardeno? Ĉu li volis ekkapti la sinjoron Nustkorb? Kial li lasis lin foriri? Ĉi tio estis mistero. Kial li iris nokte en la urban ĝardenon, ja li kutimis enlitiĝi ege frue kiel la kokinoj? Ĉu li volis kaptigi sin? Nur kelkaj senatanoj sciis la kaŭzon de la sekreta vizito de Nustkorb, sed ankaŭ tiuj suspektis iun spionon, kiu mesaĝis al Paŭlo Görgey, kiu portis armeon. Kiu estas la spiono? Ĉu la spiono estas tiu homo, de kiu Nustkorb aĉetis la dokumenton? Tio estus granda ruzeco. Tiu homo vendis tiun al Nustkorb, kaj Nustkorb vendis al Paŭlo Görgey. Ĉi tiel Paŭlo Görgey ricevis la dokumenton. Sed ankaŭ tio ĉi estas bona. Ja sinjoron Nustkorb Paŭlo Görgey lasis hejmeniri kaj li havas la dokumenton. Ĉi tion ne eblas diveni.

Sed la faro de Paŭlo Görgey plaĉis al la loĝantoj. Oni diris, ke Paŭlo Görgey estas ĝentlemeno. Unue li kaptis la juĝiston kaj poste kiel gaston li invitis vespermanĝi, drinkadi kaj per kaleŝo portigis hejmen. Laŭvorte li honoras la urbon. Ja li ne estas malbona homo. Nur la Fabricio-partianoj argumentis kontraŭ li dirante, ke li malestimas la urbon, kvazaŭ dirus:

– „Jen, via juĝisto estis mia malliberulo, kiun ajn mi povintus fari kontraŭ li, sed mi resendis al vi, faru tion, kion volas, mi ne timas vin kaj lin.”

Tute egala estas, kion parolas la homoj, oni ekŝatis la vicprefekton kaj la malamo malpliigis pri Paŭlo Görgey. Efike de tio Grodkovsky sendis oficialan anoncon al la vicprefekto:

„La gastigado de la juĝisto kaj lia sendo hejmen estis bonefika, kvankam mi ne estas profeto, sed mi vidas tiel, ke la kolero de via ekscelenco forvaporigis kiel la akvo. Certe vi post malmulte da tempo vi povos marŝi sen danĝeroj inter vivuadoj en la domon de la departemento. Vi ne pro timo foriris, sed pro saĝeco. Sed la saĝuloj jam havas podegrajn piedojn.”

Ĉi tiuj pensoj ĉeestis ankaŭ en la cerbo de Nustkorb. Li sentis, ke li devas fari ion.

Li iris rekte al Sárospatak, al la kortego de la regnestro. Sed al ĉiuj li diris, ke li iras tranĉi la vitojn de la urbo en Tokaj.

Li kunportis la dokumenton, kiun li aĉetis de Bibók kaj iun orsopronon, kiun iu porko nazplugis el la tero kaj la pordisto portis al la domo de la urbo. Oni nomis tiun sprono de la reĝo de Svatopluok.

Nustkorb bezonas la spronon, ĉar li volis esti diplomato. Li ne tre volis, sed ankaŭ ne kapablis atingi la regnestron, kiu ne ŝatis la ĉi tiajn aferojn.

– Oni ne devas artefarite fari perfidulojn, ĉar cetere tiuj estiĝas ankaŭ memstare – diris li al la akuzantaj delegitoj.

Ili ne estis kapablaj influi la regnestron. Do, Nustkorb serĉis influhavan homon kaj tiu homo estis Georgo Ottlyk¹²⁵. Li portis al tiu la spronon kaj la dokumenton kontraŭ Paŭlo Görgey, kio prezentas la malbonan situacion de Lőcse. Ottlyk estis ĝentlemana homo, ĉiuj ŝatis lin pro lia rideto kaj pro tio, ĉar li estis pasia kolektanto de la raraĵoj. Tiu kare akceptis la spronon kaj la dokumenton. En la pli lasta estis skribite, ke la vicprefekto estigis malfacilan situacion por Lőcse, ja li murdis la juĝiston de la urbo. De tiam la urbo ne havas pacon kaj vere ne la senato direktas la urbon, sed la loĝantoj volas fari venĝon pro kio la senato ne povas fari bonan laboron. La urbo ne povas fari venĝon, sed la krimon ĝi ne povas forgesi. Do, la urbo petpetegas la moŝtan regnestron, bonvolu helpi. Cetere la menciita vicprefekto ne estas bona homo kaj estas almetite la aresto ordono, kiun Paŭlo Görgey sendis kontraŭ sia frato, laŭ kio Johano Görgey rapidis kun armeo kaj armiloj al la pola limo.

Sinjoro Ottlyk vagpense aŭskultis la petpetegon, sed li prefere rigardadis la ricevitan spronon. Li dubis, ke Svatopluko estis havinta spronojn, nome tiu povis havi plie rimenŝuojn. Li ordonis fari pli novajn fosadojn, ja certe estas en la tero ankaŭ la alia sprono, ja la homo havas du piedojn. Pri kia ajn trovaĵo oni devas informi la regnestron. Kaj deziron de Lőcse li protektos ĉe la regnestro. Poste li forsendis la juĝiston.

Alvenante hejmen Nuskorb fanfaronadis, ke li ordigis la plantejon de la urbo kaj li plenespere atendas la vinberrikolton.

Do, alvenis la letero de la regnestro post kelkaj semajnoj. Li malfermis la leteron per tremetantaj manoj. En la koverto estis la petskribo de la juĝisto, la dokumento kaj la teksteto de la regnestro:

„Mi tiel pensas, dum mi pensadis pri la afero, ke Paŭlo Görgey la arestoordonon eldonis pro frata amo kaj ne pro malama pasio. Nome Paŭlo Görgey ne haltigis sinjoron Tomaso Esze, siajn ĉevalojn kaj hajdukojn li lasis iri en la tendaron. Mi ordonis, ke oni sendu kiel donacon rajdĉevalon al Paŭlo Görgey kune kun ornama jungilaro. Krome oni diru al loĝantoj de Lőcse por paciĝi kaj ili ne serĉu malamikojn, ja tiuj estas abunde.”

18 junio 1707

Francisko Rákóczi”

La regnestro rapide skribis tiun ĉi leteron kaj la kancelaro estis pigra ĝuste ordigi la vicojn de la letero de la regnestro kaj rapide sendis ĝin al la juĝisto de Lőcse.

¹²⁵ La Ottlyk familio-nomo elparolendas otlik.

La sama ĉevalisto portis la leteron, kiu portis la rajdĉevalon al Görgő. Ho, mia Dio, ĝi estis belega ĉevalo kaj estis senmakula, nigra kiel la veluro. Ĝiaj piedoj estis maldikaj kiel iu elita fraŭlino kaj ĝi estis varmegsanga kiel drako.

Sinjoro Nustkorb ege koleris, li estiĝis ekscitita kaj kapturniĝis pro la enhavo de la letero. Li ricevis preskaŭ korparalizon. Estis feliĉo, ke la letero atingis lin hejme. Oni sendis rapide la servistaron por porti doktoron, kiu tuj faris flebotomion, dum lia edzino malsekajn tukojn metis sur liajn tempiojn.

Oni enlitigis lin. Li malrapide rekonsciiĝis kaj malbenis sin pro la vojo al Sárospatak (ŝaroŝpatak)¹²⁶, ĉar Paŭlo Görgey ricevis rajdĉevalon. Sankta Dio! Oni priridos lin la Lőcse-anon, se ili ekscios tiun okazintaĵon.

Sed oni ne ekscios. Li tute ne perfidos, ke la nigra ĉevalo estas respondo por la Lőcse-anoj, aŭ ili ekscios nur pli malfrue. Ja la Nemezo ne dormas kaj sinjoron Görgey devas postatingi iam pli-malpli frue. Do, la sprono ne havis sukceson. Sed kion la porko nazplugas, tio portas feliĉon. Kvankam ĝi portis feliĉon al Paŭlo Görgey. Cetere tio eblas malsukceso, se li prezentos al la imperiestranoj. Tio estas certa, ke li prezentos. tion. Ja la regnestro kancelario pro eraro, aŭ pro malzorgemo resendis la arestordonon, kiu eble portos sukceson en Vieno.

La edzino de Nustkorb devenis el la fama familio Student. La anojn de la familio oni nomis Protmow¹²⁷, sed tiun nomon apenaŭ oni konis en la urbo. La familio estis iam grandprestiĝa kaj ankaŭ nun estus tia, se ĝi ne lernintus. Sed la scienco neniigis la familion. Jakab Protmow vivis fine de la 16. jarcento, akirante grandegan havaĵon kiel bovokomercisto faris fondaĵon, el kies enspezoj ĉiuj idoj de Protmow dum la studentjaroj ĉiujare ricevis dumil orforintojn kiel rentojn. Ĉiuj infanoj de Protmow jam en la infanaĝo heredis ŝaton de la bonŝanco kaj jam komencis lerni. En multe da urboj, landoj en universitatoj ili daŭrigis la lernadon ĝismorte kaj disŝutadante mortis ili maljune, sterile en Padua, Bologna, Göttingen, Leipzig, Halle. Kaj la Diablo scias kie.

Nuntempe nur tri familianoj de Protmow vivas. Iu ano studis ĝis freneziĝo. La alia studas en universitatoj (ja dumil forintoj estas multe da mono), la tria, Stefano estas oficisto de Lőcse, kiu studas la ŝtatan administradon ĉe la urbodomo (ankaŭ nun tiu ricevas la dumil forintojn.) Cetere tiu estas ege klerita, multon scias kaj estas ruza homo. Ĉar tiu estas la bofrato de Nustkorb (lia edzino estas Borbalo Student), multe da tempo li pasigis dum sia kvardek jaraĝo en lernejoj de Vieno, kie li estis konata homo. Pro tio ĉi Nustkorb petis lin iri al Vieno kaj helpe de siaj kontaktoj transdonu lian modestan petskribon al Lia Moŝto ĵus prezentokaze. Li petis tiun, ke li rakontu al Lia Sankta Moŝto, ke Tomaso Esze kaj Johano Görgey liveris pulvon kaj armilojn al Rákóczi, sed la prefekto, Paŭlo

¹²⁶ Pri Sárospatak, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Sárospatak>

¹²⁷ La familio-nomo Protmow elparolendas protmov.

Görgey ne konfiskis la liveraĵon kaj ne ekkaptis Tomason Esze kaj ne sendis anoncon al la reganto. Sed tiu ricevis donacon de Rákóczi: belegan nigran ĉevalon kaj belegan jungilaron.

La tasko plaĉis al Stefano Student kaj konstante menciadis, ke komprenas la diplomation. Post kelkaj tagoj tiu ekiris kun la ĉaro Molitoris post tio akiris sufiĉe da monoj. Sinjoro Klebe speciale zorgadis pri tiu. Tiu alvenante al Vieno iris en gastejon „Ĉe la du anseroj”. Kaj tiu komencis sian laboron similan al la araneo. Tiu skribis post du semajnoj, ke li ekkonis la ĉambriston de la reĝo. Meze de septembro tiu skribis, ke la dokumento kaj la petskribo estas sur la tablo de la imperiestro. Sed ĉar la imperiestro malofte laboris, tiu petis la bofraton, li estu pacienca.

La bofrato atendis pacience, dume li ricevis trankviligajn mesaĝojn de homoj de Lőcse, kiuj restadis de tempo al tempo en Vieno. La mesaĝoj estis sekretaj, kiuj tion signifis, ke la edzinoj, fraŭlinoj baldaŭ povos demeti la nigrajn jupojn.

Ĉi tiujn mesaĝojn Nustkorb komprenis kaj ankaŭ li sendis samajn helpe de la komercistoj. Nome ankaŭ li sendis sekretajn mesaĝojn, kiuj signifis tion, ke la publikopinio ankoraŭ estas malkontenta, sed Paŭlo Görgey estas troe memfida. Fakte estas, ke kelkuloj komencis ekscitigi Paŭlon Görgey por voki la kunvenon de la departemento al Lőcse, aŭ por paciĝi kun siaj malamikoj, aŭ por forlasi siajn amikojn. Nenio povas daŭri ĝiseterne. La departementa domo ne estu imperio de la ratoj.

La interbatalo proksimiĝis. Ĉie estis malkontenteco. Ankaŭ blindulo povis vidi, ke io devos okazi. Estis sekreta silento kiel la silento antaŭtempe. Tiel ŝajnis, ke nevideblaj fortoj persvadas la homojn decidi la aferojn.

Kial ĝuste tion ĉi oni devas solvi? Ja estas ankaŭ pli grandaj problemoj, ol tio ĉi. Ja bataloj okazas en la tuta lando. La akvo de la riveretoj estas ruĝa pro la sango kaj la trutoj ludadas en sanga akvo. Kaj tamen la afero de Görgey dominas super la aliaj aferoj de Lőcse. Kiel ĝi povas esti? Dio scias. Povas esti, ke tiu terura monstro, la Modo intervenis, kontraŭ kiu neniuj kuraĝis batali. La Modo devigis la homojn porti nigrajn vestaĵojn kaj dume ĝi skuis sin, disordigis la urbon kaj la departementon.

Dum ĉiuj estis ekscititaj, komence de la oktobro hejmenvenis Stefano Student el Vieno neatendite. Tiu havis senesperan mienon.

– Ĉu bono aŭ malbono estas? – demandis Nustkorb.

– Malbono estas.

Nustkorb gapis sian bofraton kun vitrecaj okuloj.

– Kio okazis?

– Laŭ opinio de la imperiestro Paŭlo Görgey volis kapti sian fraton por pruvi sian fidelecon al la imperiestro kaj tiu ĉi fakto indas honorigon.

– Ĉu vi ne diris tion serioze?

– Ankaŭ mi surpriziĝis, sed tiu ĉi estas la fakto. Grafo Trautmansdorf, kortega sekretario sendas al li konsulan diplomon. Tiu alvenos hodiaŭ, aŭ morgaŭ.

Sinjoro Nustkorb klinis la kapon.

– Tiukaze mi povas eksiĝi – li diris kaj ekkaptis lin la apatio.

Li sidis hejme kubutumante sur la tablo multajn horojn, la kapon metante sur siajn mankavojn. Tiel li sidis silente, mute, al neniu li respondis. Sed li ne estis malgaja. Sed li ne uzis la flartabakon, li ne deziris la vinon. Sed li laŭte kaj en si murmuris: „Tiukaze mi povas foriri!”

Kien li volas iri? Lia edzino malesperiĝis, sed ankaŭ la bofrato surpriziĝis, ĉar li kredis, ke li volas fari ian malbonon. Ili kaŝis ĉiujn armilojn, ilojn, per kiuj li povus damaĝi al si. Tio estas fakto, ke Belzebub, la diablo kaŝis sin en li. Tiun oni devas forpeli de li, kion la edzino ankaŭ provis. Ŝi faris por li fumon de timiano kaj faris teon el koroj de homoj. (Tiu estas planto, kies floro similas al koro de homo.)

Tiel ŝajnis, ke vere li havis denove vivemon kaj pretigis sin veturi, sed ne sur la ĉevalo de Sankta Miĥelo. Li prenis la pansakon, metis en ĝin pogaĉon, fumitan lardon kaj ajlan bovidan femuraĵon. La juĝisto sinjoro tion diris, ke proksimiĝante la tago de Ĉiuj Sanktuloj, li iros al Késmárk hemenporti la epitafon de la juĝisto Kramler, kiun nur je nun pretigis la maldiligenta skulptisto, sed ĝi jam estis mendite antaŭ kvin jaroj. Li diris, ke li devas fari ion por trankviligi la mondon. Kvankam la epitafon estus povinta porti hejmen la urbastro, sed Nustkorb mem volis porti hejmen tion.

– Ĉu mi pravis kaj estis utila la teo – ĝojkriis sinjorino Nustkorb.

Tio estas fakto, ke la teo estis utila, ĉar la apation havanta juĝisto entreprenis la veturadon kaj ĝojis, ke li liberiĝis de la fumado.

Sed li ankaŭ nun ne havis feliĉon.

Kvankam la epitafon Jozefo Tomiŝ, la skulptisto lerte lokumis en la ruĝan marmoran muron de la preĝejo, figurante laŭvive la figuron de Miĥelo Kramler kun la talaro, la ĉapo kaj la malgrandaj ŝultroj, ekvidante tiun epitafon la koĉero Jozefo Kuptor, nevole demetis la ĉapon kaj balbutis: „Laŭdatu Jesuo Kristo!” Nome tiu estis katolika. Dum oni metis la epitafon sur la ĉaron, li zorge kovris ĝin per veltolo por la liverado, la koĉero sidiĝis apud la epitafon kun sinjoro Nustkorb kaj li fierege diris, ke li ege ĝojas, ĉar samtempe li povas porti ambaŭ juĝistojn de Lőcse. Simila okazaĵo ankoraŭ ne aperis en la tuta mondo.

Oni portis ambaŭ juĝistojn dum du tagoj. Tiutempe multfoje pluvis kaj sur la vojo estis amasa koto. Ili iris malrapide tamen vespere ili devis haltigi la ĉaron. Jam preskaŭ ili atingis la urbon Lőcse, tuj apud la vilaĝo Dravec okazis, ke unu ĉevalo paŝis malbone kaj glitis la malantaŭa korpoparte en iun fendegon. Kuptor desaltis de la ĉaro por eltiri la ĉevalon, sed estis malfruo, vesperiĝis, la ĉevalo

malsupren glitiĝante kun si tiregis la ĉaron. La ligna balustrado krakante rompiĝis, Nustkorb falis en la fendegon, post li falis la epitafo kaj la peza ŝtono mortpremis la juĝiston. Al la helpokrioj de la koĉero la Dravec-loĝanoj komencis eltiri la juĝiston de sub la ŝtonego, sed nur la kadavron de Nustkorb ili kapablis eltiri. La ĉevalo, ĉaro, koĉero kaj la epitafo suferis neniujn damaĝojn.

Kuptor nun jam kovris la kadavron per la veltolo kaj teruriĝante galopis al Lőcse kie pro la dimanĉo multe da homoj promenis sur la stratoj en nigraj vestaĵoj. La blanka veltolo kaj la vestaĵo de la koĉero estis tute sanga.

– Kio okazis?

– La juĝisto mortis. Juĝisto Kramler mortigis sinjoron Nustkorb.

Kiel la fajro kutimas, tiel disvastiĝis la novaĵo kaj plimultiĝis la detaloj de la famo.

– La antaŭa juĝisto mortigis la nunan juĝiston, ĉar la nuna juĝisto mortigis la antaŭan juĝiston.

La bona Dio forigu de Lőcse la pezajn frapojn!



Kuruca antaŭgardio. Pentrita de László Pataky

<https://dka.oszk.hu/106100/106190>

14-A ĈAPITRO

Kelkaj rimarkoj pri la forto de la okuloj de la patrino kaj pri la ekscitado de la amaj sentoj

La nuna homo, se li havas aman malĝojon, tiam volas morti, aŭ serĉas iun muzon kaj verkas versojn, kiuj esprimas la aman malĝojon de la homo, aŭ serĉas sekundantojn.

Fabricio, dum informiĝis pri la rendezuo de Rozalia, ne agis laŭ la menciitaĵoj, kvankam li estis ege malesperiĝinta. Se la Suno falus en koton, eĉ tiam li ne mirus. Sed li perdis sian memon kaj trovis sin en iu fremda planedo kaj fartis malfeliĉa. Li sentis la senton de la senceleco kaj malpleneco, liaj piedoj estis lacaj kaj doloris lia kapo. Li kapturniĝis kaj vidis, kvazaŭ la domoj ekirus malantaŭen. La radoj de la furaĝon liverantaj ĉaroj kvazaŭ diras laŭritme: Ro-za-li-a, Ro-za-li-a. Ĉe la fenestroj de la domoj la kapoj de kelkaj fraŭlinoj aperis, ridetis al li kare, konate. Pro tio li iĝis pli malĝoja, ol antaŭe. Li sentis, kvazaŭ iu nevidebla mano skuus la arteriojn de la tempioj kaj premus lian koron.

Li rekte iris hejmen kiel somnambulo, senkonscie. Ĉe stratangulo li renkontiĝis kun Nikolao Blom, kiu sidis sur ĉevalo kaj portis vestaĵon por balo. Tiu kriis jam de malproksimo:

– Kiel vi fartas, Rici? Mi salutas vin, Rici! (Rici estas la karesnomo de Fabricio.) Mi ekskursas al la ferfandejo. Venu ankaŭ vi! Ni faras majan feston kun la regionaj belaj virinoj. Nu! Mi salutas vin, Rici!

– Vi estas abomena hundaĉo! – postsiblis Fabricio.

Li jam alvenis hejmen kaj piedbatis la pordon de la pordego, kiu preskaŭ diskrevis.

La maljuna sinjorino Fabricio jam atendis lin por tagmanĝi. Ŝi portis liajn plej ŝatatajn mangaĵojn, kokidon kun kaĉo. Sed li nenion manĝis, kvankam ŝi bakis panon en la bakforno. Li estis pala kaj incitita.

– Ĉu vi ne estas malsana? – ŝi maltrankviliĝis.

– Nur mia kapo doloras iomete.

– Ĉu mi ne metu folion de kreno sur vian frunton? Povas esti, ke tiu ĉesigos la doloron.

– Eĉ ses bovoj ne ĉesigos tiun.

Posttagmeze li ne iris al la urbodomo, sed li sidis en sia ĉambro ĉe la fenestro kaj rigardis la nubojn flosantajn tien-reen. Tiuj estis kaj lozaj kaj densaj. La nuboj estis forte nigraj, ŝajnis, ke venos pluvego. Kaj tuj vespere iĝis tempesto, fulmis kaj tondris. Sama tempesto estis en la animo de Fabricio. Li deziris, ke tiu tempesto ĉion neniigu.

Li ne surmetis mantelon kaj eliris dum la tempesto el la urbo al la arbaro. La gardistoj miris pro tio. La kolera naturo estis lia kamarado. Ambaŭ kolerigis sin sufiĉe kaj Fabricio iĝis pli trankvila, ol antaŭe.

Post longa vagado malfrue vespere li atingis la hejmon, lia patrino jam enlitiĝis. Ŝi sciis, ke li estas ĉe Klöster inter la fraŭlinoj, aŭ estas en la urba kelo kun la senatanoj.

La servistino regalis lin per vespermanĝo, sed li nenion petis. Longtempe li promenis en sia ĉambro tien kaj reen, aŭskultis la pluvon, poste iris en la ĉambron de sia patrino.

– Ĉu vi dormas, mia patrino?

– Ne. Ĉu vi volas diri ion?

– Mi volis deziri al vi bonan nokton kiel kutime.

Li paŝis al ŝia lito, sidiĝis sur la rando de la lito kaj prenis ŝian manon senvorte. Li kisis ŝian manon. Ŝi senvorte glitis al la muro kaj la senatano metis la kapon sur la kusenon. Poste ŝian kapon premis al la koro de sia patrino kiel en sia infanaĝo.

– Ho, ve, ne premu min.

– Sed panjo, pro tio ĉi ne doloras mia kapo.

– Iru jam, vi estas flatulo. Ĉu vi kredas, se ses bovoj ne ĉesigas la kapdoloron, tiam la varmo de la korpo de la patrino povas ĉesigi tion?

– Mi ne nur kredas tion, sed ankaŭ scias.

Kaj li kisadis la karan saĝan kapon de la matrono.

Sed la matrono ŝajnigante ĉagrenon ĝustigadis la virinkufon por dormi kaj gaje ekridegis.

– Nu, vi estas ege „belega” senatano kaj dormas kun via patrino. Se la urbanoj ekscius tion ĉi. Kion ili dirus? (Kaj ŝi ĝemetis.) Ja tiuj tempoj estis belaj, kiam vi dormis apud mi. Mi diris al vi rakontojn kaj ankaŭ vi ĉion babiletis al mi. Sed vi estis ruza. Vi ne volis, ke mi iru al la lito de via pli aĝa frato kaj vi ligis mian piedon al butono de via ĉemizo. Sed mi displektis la ŝnureton post via ekdormo kaj iris al via frato.

– Laŭvorte vi trompis min, panjeto.

– Kiel ankaŭ vi trompis min. – kriis la patrino ektime. – Sankta Dio! Kio okazis pri vi, Antonio? Ja vi ploras!

– Mi venis al vi diri mian malĝojon. Vi povas helpi min, mia patrino, nome mi ne estas kapabla helpi min. Mi estas malforta. Pro tio mi petas vian helpon. Mi estas superstiĉa kaj mi kredas, ke mia malforteco ĉesas pere de la patrina amo.

– Bone estas, nur parolu. Metu ĉi tien vian kapon. (Ŝi karesis lian hararon.) Kiu turmentas vin? Kio doloras? Timu nenion! Mi ne lasas suferigi vin.

Efike de tio li diris ĉiun malĝojon de sia koro kaj diris, ke li tre ege amas Rozalian Otrókóczy. (Mi sciis – ŝi interparolis.) Li dum la unua renkontiĝo ekamis

ŝin kaj nun amas ŝin plej forte. Li ĝis nun kredis, ke Rozalia amas lin. Sed nun, kiam Nustkorb sciigis la rendevuon, ĉiuj belaj memoroj paliĝis.

Lia patrino pli vigle komencis interesiĝi pri la afero, ĉar pro la kazo ŝi ekscitiĝis.

– Mil diabloj! – ŝi eksaltis – ĉi tio estas terura, kaj estas malebla. Ja tiu homo, kiu rakontis tion al Nustkorb, mensogis.

(Rozalian ankaŭ sinjorino Fabricio amis.)

– Panjo! Kien malaperis tiu Georgina rozo, kiu estis en la ĝardeno? Ĉar estis du rozoj, sed nun estas nur unu!

– Ĉi tie estis fraŭlino Klöster kaj Rozalia. Mi donis tiun al Rozalia.

– Ĉi tio estas la problemo. Nome tiu homo de Béla montris la rozon tiuvespere al la juĝisto, dirante, ke dum la rendevuo ĝi defalis el la hararo de la damo.

Ili estis en silento. La patrino ĝemetis sed diris nenion. La pluvo frapadis sur la tegmento, kvazaŭ hajlis. Post longa silento ŝi demandis indiferece:

– Ĉu vi amas ŝin treege?

– Mi tion kredas, ke mi ne estas kapabla vivi sen ŝi. Mi neniiĝos.

– Ej, tio estas frenezaĵo. Tio ne estas saĝa afero, kiun vi faras mia filo. Ankaŭ la planto ne krevigas la florpoton. Nek vi estas molaĉa homo. Vi estas dura kaj ne diru tiaĵojn.

– Ne koleru min, panjo; al kiu mi diru miajn malĝojojn?

– Bone estas. Tuj morgaŭ mi aranĝos la aferon.

– Kion vi volas fari, panjeto?

– Tion ankoraŭ mi ne scias, sed ĉio estos aranĝita. Ĉio estos en ordo. Sed nun permesu kisi vian kapon. Nun iru por dormi.

Fabricio iris al sia ĉambro. Sed li ne malvestis sin, nur kuŝis sur la lito, ĉar li pensis, ke li ne kapablos dormi. Sed li estis laca kaj ankaŭ la kiso de la panjo dormemigis lin.

Matene li havis bonan apetiton kaj la ĉiela graco ĉesigis la lacecon de la korpo kaj la animo.

Sekvatage posttagmeze la patrino survestis sin en nigran silkvestaĵon, metis ĉirkaŭ la kolon kolieron de perloj, nigran puntovirinkufon kaj orajn orelopediaĵojn.

Fabricio miris pro tio.

– Ej, panjo, vi tiel aspektas, kvazaŭ vi volus partopreni konkerantan militiron.

– Ja, ankaŭ mi ne scias, kien mi iras kaj kien mi paŝas.

– Mi ne komprenas – diris Fabricio, kiu estis tre nerva.

– Cerbumu, mia kara filo, kaj vi ekkomprenos ĉion. Nome vi, via patro kaj mi ĉiam estis justuloj. Mi iras ien pro tio, ke iun mi konsideru.

Fabricio mute klinis la kapon.

– Ĉu mi havas rajton al tio? Jes, mi havas rajton, sed nur tiuokaze, se ankaŭ mi havas du intencojn kiel la pesilo du mezurilbrakajn telerojn. Se la pesilo

montras al mi bonon, tiam la fraŭlino estos mia bofilino. Se ĝi montros la alian, tiuokaze la fraŭlino estas la filino de la diablo. Kaj tiam portu la diablo la filinon. Ameno!

– Ho, ve! Panjo! Kiel vi parolas?

Li malespere ĝemetis kaj pensis pri la ŝancoj. Dume li iĝis alterne ruĝa kaj blanka. Unue li estis simila al la ruĝa beto, pli malfrue similis al la blanka muro.

Sed la patrino ne okupiĝis pri li, prefere ŝi donis severajn ordonojn al la geservistoj por dum ŝi estos for, ĉe la: telerlavado ili nenion rompu, ĉar tiuokaze sekvos riproĉo. Ili ne lasu eniri iun mizerulon en la vestiblon, ĉar tiu forŝtelos ion. Ili portu panon al la verando por mizerulo. Anĉura, iru en la abelejon: ĉu la abelaro elvenis? Se la abelaro elvenis, tiam voku Johanon Koch por kolekti tiun. Suzaneta engorĝigu al ambaŭ anseroj kaj poste ankaŭ trinkigu tiujn. Poste en la pistujo rompu la papavon. Ŝi diris, ke ŝi baldaŭ hejmenvenos.

Poste ŝi ekiris kiel la soldatoj sur la ŝtupoj malsupren. Ŝia silkvestaĵo siblis, ŝia griza hararo bone distingiĝis de la nigra vestaĵo. Ŝi estis tute simila al la karmemora regnestro de Transilvanio.

Sed sinjorino Fabricio estis pli severa, ol Anna Bornemissza (bornemisa). Ŝi ne ŝanĝis la eldiritan vorton kaj tio estis proklamo de la Providenco antaŭ la vulgaraĵ animoj. Se ŝi koleris, ŝi kuntiris la brovojn kaj tiam ŝi similis al la montoj, inter kiuj ŝi naskiĝis. Sed se ŝi estis afabla, tiam ŝi similis al la kampo de la neĝmontaro en la aŭtuna sunbrilo.

La juna senatano aŭdis ŝiajn paŝojn dum li estis en sia ĉambro. Li vidis ŝin, kiam li staris ĉe la fenestro, ekhalti ĉe iu florbedo kaj pluki la solan Georginarozon. La aliaj rozoj estis ankoraŭ burĝonoj.

La patrino de Fabricio longtempe estis malproksime. Li klopodis fari multspecajn amuzojn, sed la tempo pasis ege malrapide. Li vidis, ke la abelaro elvenis. Sinjoro Koch alvenis, ekkaptis la abelojn, kiuj estis sur branĉoj de iu ĉerizarbo. Sinjoro Koch metis tiujn en iun abelujon. Fabricio rigardis la laboron de Koch. Poste li komencis legi la malnovan testamenton, el ĝi la ĉapitron pri tri judaj viroj. Sed nun li ne interesiĝis pri tiuj viroj, ĉar ankaŭ li sentis sin en varmega bakforno. Li volis esti sama kiel ili, ĉar ilia sorto solviĝis, ĉar ili saviĝis, sed lia sorto estas ankoraŭ duba. Jam estis malfrua posttagmezo, sed la panjo ne estas ĉi-hejme. Li ne volis legi kaj komencis ludadi kun Poprad, la hundo. Finfine la hundo atentis la pordegon, kiu ekgrincis. La hundo unue murmuradis, sed poste silentiĝis. Ja la hundo sentis la konatajn bruojn, sibladon de la vestaĵo. Fabricio iĝis ekscitita, ĉar baldaŭ alvenis lia patrino.

Ŝi demetis la mantelon kaj la perlaron de la kolo. Fabricio ne kuraĝis alrigardi ŝin por diveni ŝiajn pensojn. Li turnis sin iomete kaj demandis obtuzvoĉe:

– Kio okazis?

– Nu, atendu, mi demetas unue la orelopediajn. Tiuj estas pezaj. He! Suzaneta! Venu tuj ĉi tien! Malligu la korseton, ĉar mi tuj sufokiĝos. Por maljuna sinjorino ne estas bona la parado. La maljunulino bezonas brakseĝon kaj blankan paneton. Nu, Suzana! Vi povas forlasi la ĉambron. Kion vi demandis, mia kara filo?

– Kio okazis?

Sinjorino Fabricio sidiĝis en la brakseĝon, sed diris nenion, sed vokis Suzanan.

– Suzana! Portu tien ĉi mian triklaboron. Kaj poste portu el la kelo karoton por la kanario por kanti. (Suzana foriris.) Nome mi tiam povas paroli pri gravaj aferoj, se mi sidas konforte. La trikiloj kaj mia menso estas en strikta kontakto. Aŭ ĉio moviĝas, aŭ eĉ ne unu.

– Jes, mi dankas, sed mi suferas pro la scivolo.

– Nu, ne saĝumu, vi estas bubo, ja tiu fraŭlino estas senkulpa kiel la hodiaŭ naskiĝinta ŝafido.

La ĝojo aperis sur la vizaĝo de la juna senatano.

– Ho, mia panjo!

– Ŝi estas ege senmakula kaj senkulpa.

– Do, kiel okazis la rendevuo en la restoracio?

– Mi ne scias.

– Ĉu ne? – diris Fabricio malĝoje. – Ĉu vi ne scias? Ĉu vi ne demandis ŝin?

– Mi demandis ĉion, sed la parolo estas nur parolo.

– Kial vi diris, ke ŝi estas senkulpa? – li diris inciteme – por kolerigi ŝin.

– Ĉar mi vidis tion sur ŝi.

– Ĉu vi vidis? – li diris moke, – Ĉu eblas vidi tion?

– Jes. tion eblas vidi, nur ĝi bezonas okulojn de patrino. Vane vi ridetas dube, ja okuloj de la patrino vidas ankaŭ tiujn aĵojn, kiujn ne enhavas la libroj kaj la sciencoj. Ŝi povas vidi kaj la senkulpecon de la bofilino kaj la pekon de la bofilino.

– Ho, mia panjo, estus bone, se tio estus prava.

– Tio estas prava. Nome la amo havas miraklojn. Vian doloron mi sentas. Se mi asertas, ke ŝi estas senkulpa, tiam ĝi estas ne malplena bombasto. Kiu kuraĝas kontraŭdiri al mi, tiun mi neniigas.

Ŝi metis la manojn sur la koksojn, ĉirkaŭrigardis defie kvazaŭ nevidebla malamiko estus en la ĉambro. Sed la sola dubanto tute ne volis kontraŭdiri.

Poste la patrino rakontis la detalojn de ĉirkaŭ sia vizitado. La senatano aŭde aŭskultis la raporton.

– Nu, mi estis tie. Sed mi jam havis planon ĉi-hejme. Mi portis kiel donacon la lastan Georgina-rozon. Pri ĝi la superstiĉo vivas inter la hominoj, laŭ kiuj se tiun rozon iu metas en la hararon, tiam ŝi havos svatiĝanton samjare. Se la du rozojn ŝi metas, tiam havos samjare svatiĝanton. Mi prenis la rozon kaj iris en la

instituton. La fraŭlinoj staris sur la verando kaj ege rigardis mian rozon. Ili ĉiuj sopiris svatiĝanton. Mi demandis ilin, kie estas Rozalia. Ili diris, ke ŝi estas en la ĉambro de fraŭlino Klöster. Vere ŝi laboris apud via baptopatrino. Ni paroladis pri multo, dume mi komencis paroli ruze pri la rozo. Mi demandis Rozalian: „Ĉu mi donis al vi rozon?” Rozalia ridetante respondis, ke ŝi ricevis unu rozon, sed perdis kaj la rozon kaj la svatiĝanton. Mi demandis: „Kie vi perdis tiun?” Ŝi ridis kaj ege surpriziĝis. „Mi perdis tiun en la ĝardeno restoracio.” „Kiam ĝi okazis, onjo Matilda?” „Marde, nokte” – diris Matilda. Mi ŝajnis surprizon. „Ĉu nokte? Kion vi faris tie nokte?” Ŝi respondis tute sincere: „Mi devis subskribi iun heredaĵan skribaĵon antaŭ atestantoj.” „Kiu estis viaj atestantoj?” – mi demandis. Ŝi respondis: „Sinjoro Quendel kaj sinjoro Georgo Görgey”.

La juna senatano eksaltis kvazaŭ serpento ekmordus lin.

– Georgo Görgey – li ripetis la nomon moroze. – Estas bone scii ĉi tion.

– Ne vidu fantomojn, ja la kazo estas klara.

– Kial?

– Ĉar Rozalia estas senkulpa.

– Kial vi pensas tion?

– Nu, mi jam diris, ke ŝi rakontis ege sincere la vizitadon en la urba ĝardeno.

Iu peka fraŭlino ne estintus sincera.

– Panjo! Vi estas la plej bona sinjorino tutmonde. Sed mi havas alian opinion.

– Kial?

– Mi kritikas la tuton kaj ankaŭ fraŭlinon Klöster.

– Kial?

Sinjoro Quendel portis ŝin per permesilo de Matilda. Matilda devis lasi, ke portu ŝin Quendel.

– Vi pravas. Kial estis tie Georgo Görgey?

– Tion mi ne scias, sed tio estas neesenca.

– Io ne estas klara – ekkriis la senatano amare kaj la manon metis sur la tempion kvazaŭ li timus la kapon kaj liaj okuloj estis sangaj. – La maljuna fiulo Quendel povis porti Rozalian, sed kial?

– Pensu pri kaŭzo! Tio estas naŭva fabeleto! Iun dokumenton ŝi devis subskribi antaŭ atestantoj. Kial ili devis fari tion en misfamaejo? Kial ŝi ne subskribis tiun en la instituto de Klöster?

Sinjurino Fabricio ekridis, ankaŭ la larmoj fluis el la okuloj.

– Ho, vi estas ŝercema infano. Kial vi kontraŭparolas?

Ili iris en la domon de la ĝardeno, ĉar la dokumenton ŝi devis subskribi en persona ĉeesto de la prefekto.

– Nu, jes. Li batis sur sian frunton. Ĉi tio estas jam klara. Li jam vidis la pli novan perspektivon. Vere ankaŭ la vicprefekto estis tie. Ja tiam kaj tie li ekkaptis sinjoron Nustkorb. Nome la vicprefekto ne povis veni tage en la urbon.

Fabricio iĝis subite bonhumora kaj dancante kuregis al sia panjo kaj komencis kisadi ŝin.

– Nu, iru do! Vi sufokas min. Ne saltadu kiel virŝafo de Gabrielo Mariaŝi, kiam ĝi ekvidas la salon. Sidiĝu trankvile, ĉar mi dezirus daŭrigi.

– Ĉu io okazis ankoraŭ?

– Nun sekvas la plej grava.

– Mi dankas al vi mia panjo. La aliaj direndaĵoj min ne interesas. Mi estas jam trankvila.

– Povas esti, ke ĝi tamen interesos vin. Aŭskultu plu. Mi diris al Rozalia: „Ĉu vi bedaŭras tiun rozon?” Ŝi ridetis kaj respondis: „Mi bedaŭras nur la rozon, sed la svatiĝanton ne.” „Tio estas komprenebla – mi diris – ĉar nur la rozon vi perdis, sed la svatiĝanto ekestas.” „Sed tion ne kredas mia Rozalia” – diris la maljuna Matilda. „Sed nun tiuokaze estas certe” – mi diskutadis – „ĉar tiu estas ĉi tie en tiu ĉi domo.” Ambaŭ kredis, ke mi deliras. „Eĉ tiu estas en ĉi tiu ĉambro” – mi daŭrigis – „nome mi estas la svatiĝantino kaj mi petas, ke vi, karulino, estu edzino de mia filo.”

La vizaĝo de la infanaĝa senatano ruĝiĝis.

– Mia panjo, se vi vere faris tion – kriis li – tiuokaze...

– Jes, mi vere faris tion, sed kio estas tiuokaze?

– Tiuokaze vi faris kuraĝan agon, ja tiu ĉi afero ankoraŭ ne estas matura.

– Kial ne? Ja ŝi amas vin.

– Ĉu ŝi diris tion? – li anhelis preskaŭ febre.

– Ŝi ne diris, sed ŝi ne povis sekretigi.

– Kio okazis poste?

– Ankaŭ ŝia vizaĝo ruĝiĝis kiel la via kaj subite ŝi malaperis. Kaj ŝi ne estis en la ĉambro.

– Ĉu poste?

– Poste via baptopatrino kaj mi serĉis en la tuta domo, sed ne trovis ŝin.

– Mia dio!

– Nu, ne timu. Ŝi ne perdiĝis, ni ektrovis ŝin en la manĝaĵkamero. Ŝi sidis sur iu sako da faruno kaj ploris. Mi tiris al mi ŝin kaj konsolis. Mi demandis pri ŝia respondo, sed ŝi plu ploris... Rigardu, mia vestaĵo iĝis tute malseka.

La juna senatano rigardis sian panjon malcerte.

– Kion signifas tio?

– Vi estas naiva. La koro de la virino montriĝas en ŝiaj okuloj. Rozalia ploras, ĉar ŝia koro amas vin. Kaj nun iru por forviŝi ŝiajn larmojn.

Ŝi ne devis diri dufoje al li, sed li sin festmaniere survestis kaj rapidis al la instituto de Klöster. Jam la fraŭlino ne ploris, sed kantis iun gajan germanan kanton kaj dume gitaris.

En la salono jam estis multe da homoj. Vendredo estis, kiam la gevizitantoj de fraŭlino Klöster venis viziti. Estis inter ili filoj de elitaj soldatoficiroj kaj lokaj patricioj. Okaze de tio en la salono estis malgranda koncerto. Iu fraŭlino deklamis, alia kantis, la tria dancis. Tiu homo havis privilegion, kiu povis aperi ĉe fraŭlino Klöster. Matilda ĉiam organizis iun karan programon, kiu fascinis la publikon. Kaj multe da homoj paroladis en la urbo pri ĉi tiuj programoj.

Ĉefe vintre la fraŭlinoj estis trovemaj. Pasintjare kristnaske la geservistoj portis en la ĉambron du trogojn kaj tinojn kun akvo en la lasta. Kio okazos ĉi tie? Dio scias. La fraŭlinoj envenas kaj komencas lavi vestaĵojn – nome ili ekzameniĝis el ekzerco de la lavado. – Ĝi estis belega vidaĵo. Aliokaze la gevizitantoj vidis la fascinantajn fraŭlinojn apud la radspinoj sidantaj.

Rozalia hodiaŭ estis mallerta, kiam ŝi ekvidis la infanaĝan senatanon, elfaligis la gitaron. Nikolao Blom kuris tien kaj levis la gitaron. Pro tio ŝi iĝis konfuzita, forgesis la tekston de la kanto. La fraŭlinoj ridadis, dume iu fraŭlino sufloris la sekvan vicon de la kanto kaj Rozalia povis daŭrigi la kanton. Sed jam ŝia voĉo sonis strange.

Post la koncerto kelkaj ludoj okazis. Ekemple: „ekstere estas la lupo, interne la ŝafido.“, aŭ „veturado de floro de lotuso.“ Kvankam estis tie ankaŭ maljunulinoj, kiuj atentis la ludadon, tamen la saĝa fraŭlino Klöster, baptopatrino de Fabricio, tiel direktis la okazaĵojn, ke ŝia baptofilo povis paroli kun Rozalia. Ĉiuj kontribuis por helpi la programon. La juna Emeriko Révay, la leŭtenanto de kurucoj ventroparolis kaj pro la de li prezentita dialogo inter la generalo Andrásy kaj la maljuna sinjorino Vinkóczy (vinkoci), oni tre ridis. Poste prezentis ĵongladon Blom, kiu ellernis tion de la turkoj. Ekzemple li metis la semon de melono en iun kaĉon, li verŝis sur tiun iun rozkoloran likvaĵon. Efike de tio la melono komencis kreski, kreskigis foliojn, florojn kaj fruktojn.

Nun la ĵonglisto petis porti iun tableton.

– Rozalia, portu tiun tableton el mia ĉambro – diris Matilda.

Poste ŝi flustris al Fabricio:

– Iru, mia baptofilo, helpu al Rozalia porti la tableton.

Fabricio malaperis nerimarkate, sed Rozalia, ekvidante la junulon, tuj faligis la gitaron kaj la tableton kaj tremetis kiel poplofolio.

– Ho, ve, ĉu ankaŭ vi estas ĉi tie?

– Rozalia, ĉu vi ne koleras pro la kuraĝo de mia patrino?

Rozalia etendis sian manon al la junulo.

– Kial mi devus koleri? Ja mi iĝis feliĉa pro ŝi.

– Ĉu vi amas min? Ĉu vere vi amas min? – demandis Fabricio ekscitinte.

– Ĉu vi ne rimarkis ĝis nun? – ŝi respondis meditante.

Iu riproĉo estis en ŝiaj vortoj.

– Ja mi esperis tion, sed mia patrino ne diris decidan respondon. Ĉar tiu estus ankoraŭ frua.

– Sed vi diris, amas min.

– Sed mi devas havi ies konsenton.

– Kiu estas tiu? – balbutis Fabricio.

– Tiu estas mia karega patro, kiu estas sola en la tutmondo ĉar neniu apartenas al li.

– Li loĝos ĉe ni, kaj ĉion mi faros por li.

Rozalia ĝemetis kaj ne respondis. Ŝi iĝis ege malĝoja kaj iĝis frigida la atmosfero, iĝis frosta malvarmo, kvazaŭ estus frostintaj ĉiuj floroj.

Ĉi tiun frostan etoson Rozalia preskaŭ perforte ĉesigis.

– Nu, ni portu tiun tablon.

Kiam ili portis tiun, ŝi ekridis.

– Nun ni estos la ĉevaletoj! Hot!

Ŝi provis imiti la ĉevalblekadon: „Nji-ha-ha!”

... Ja Rozalia estas ankoraŭ infano.

Fabricio ne estis kontenta pri la parolado kaj pri la situacio. Li ĉagreniĝis, ke li ne povas paroli kun Rozalia inter kvar okuloj kaj ne povas klarigi kelkajn aferojn. Li ne volis vidi ajnajn figurojn, kiuj bone amuzis sin. Kelkfoje li povis paroli kun Rozalia, sed tio nur malbonigis la situacion.

– Rozalia – li diris mallaŭte dum la spektakloj de la ĵonglisto. – Ĉu vi povos skribi al via patro?

Ŝi jesis.

– Ĉu mi ne povas iri al li?

– Ne.

– Ĉu vi eĉ nun ne povas paroli pri li?

– Ankaŭ nun ne – ŝi respondis kaj iĝis ege malĝoja.

Li trovis ankoraŭ iun eblon por paroladi kun ŝi. Fraŭlino Klöster menciis, ke Rozalia havas hodiaŭ sian naskiĝtagon. Okaze de tio Fabricio vizitis ŝin kaj deziris feliĉon al ŝi.

– Ĉu feliĉo? – ŝi diris mekanike. – Tio estas rara birdo. Tiun ekkapti estas malfacile. Kie ĝi flugas: Dio scias.

– Rozalia, diru al mi ion, ke mi ne estu maltrankvila. Ĉu vi forlasos min, se via patro ne donas sian konsenton?

Rozalia iomete pensadis kaj respondis:

– Tiel ŝajnas, ke ne. Ekzistas aferoj, kiuj estas pli fortaj, ol la volo de mia patro. Povas esti, ke tio ne estas pli forta, ol mia volo. Kvankam mi ne provis tiujn kompari. Mi konfesas ion al vi. – Ŝi flustris enigme. – La Virgulino Maria sendis vin al mi. Ĉu tiu volas fari bonon al mi? (Ŝia voĉo tremetis kaj ŝi iĝis pala.) Mi ankoraŭ ne scias tion. En la ĉambro de onjo Matilda mi diris, ke via

patrino igis min feliĉa. Sed mi ne pravis. Iu malbona fantomo estas super mi, pro kiu mi estas malfeliĉa.

Fabricio rigardis ŝin mirante. Kion ŝi diras pri Maria Virgulino? Ja ŝi estas luterana. Ĉu pro la ĝojo ŝi estas konfuziĝinta? Ĉu ŝi estas nur fantaziema? Ĉu ŝi estas ankoraŭ infano?

Sed tuj multe da homoj proksimiĝis al ili. Blom nun malaperigis iun arĝenttaleron kaj poste kuris al Rozalia kaj la taleron eltiris el la hararo de Rozalia.

Fabricio ĉagreniĝis, ĉar Blom konfuzis ilin, pro kio li ne adiaŭante kaŝe foriris el la ĉambro por aerumi sin. Nome li fartis malbone, ĉar estis malagrabla por li la diro de Rozalia.

Kiam li iris eksteren, li renkontiĝis kun iu simpla kuruca soldato, kiu prenis iun florbukedon.

– Por kiu vi portas tiun florbukedon?

– Al fraŭlino Otrókóczy.

– Kiu sendis tiun?

– Georgo Görgey, leŭtenanto.

– Ĉu? – Pro tio Fabricio iĝis nerva, ĉar li divenis, ke la florbukedo alvenas okaze de la naskiĝtago de Rozalia. Evidente estas, ke Rozalia menciis al Georgo Görgey, sed al Fabricio ne.

– Montru tiun bukedon – li diris al la soldato morne.

La soldato transdonis tiun kaj Fabricio ĵetis tiun en la puton.

– Diru al sinjoro Georgo Görgey, ke la ranoj ĝojis pro la florbukedo.

Nome en Lőcse tiutempe estis akvodukto kaj la putojn oni uzis nur tiam, se la akvodukto malboniĝis.

Tiu soldato estis knabo de Lőcse kaj konante la senatanon, li ne kuraĝis kontraŭdiri. Li turnis sin kaj portis la mesaĝon en la bierfarejon, kien Georgo Görgey, la leŭtenanto, ĝuste nun enpaŝis. Georgo Görgey aŭdante la anoncon de la soldato, post la eldrinko de la biero, diris:

– Tiel ŝajnas, ke ankaŭ la alia orelo de la sinjoro senatano jukas.

La leŭtenanto havis bonajn nervojn. Li ne iĝis furioza, sed ekpensadis. Li sentis la amon kaj subite li sopiris la solecon. Li pagis por la biero kaj foriris. La aliaj rigardis unu la alian. Ili pensis, sekvos interbatado, kaj ili pritraktis la situacion. Sed Georgo Görgey ne volis dueli. Li pensis, ke tio estas nur vulgara ŝerco. Li ne volis misfamigi Rozalian pere de duelo. Li sopiris nur la solecon. Li volis iri tien, kie neniu estas, kie nur la arboj susuras. Li faris longan promenadon ekster la urbo por pensadi laŭ sia ŝato.

Do, Fabricio faris malĝentilon. Kial? Povas esti, ke tiu estis ĵaluza pri Rozalia. Tio ĝenis lian konsciencon. Sed li ne donis kaŭzon por esti ĵaluza. Ja li ne sentis amon pro sia kuzino, nur simple: li ŝatis ŝin. Li ĝojis, ke li divenis ĉi tiun

enigmon. Kiu pensintus tion? Li ĝoje enspiris la balzaman aeron. Kelkfoje li memoris emociajn rigardojn.

La amo alvenas neatendite, senbruite kiel la ebriado, ne flugas, sed simple ekestas. Ja la ebrio komenciĝas ne ĉe la unua vinguto, sed post longa drinkado.

Georgeto ofte renkontiĝis kun Rozalia, de kiam paĉjo Quendel laŭ la deziro de Paŭlo Görgey al fraŭlino Klöster portis lin por prezenti, ke li estu konstanta peranto inter la patro kaj filino. Fraŭlino Klöster tion kredis, ke Quendel volas edzinigi Rozalian al Georgeto. Klöster afablumis al Georgeto. Sed kiam ŝia baptofilo, Fabricio ekamis Rozalian, ŝi aprobis tiun ĉi kontakton. Nome la geedziĝoj estiĝis iam en la ĉielregno.

Georgeto ofte promenis kun Rozalia, sed multfoje paroladis ankaŭ kun Fabricio. Fabricio sopiris ĉeeston de Rozalia, sed Georgeto ne parolis al Paŭlo Görgey pri ĉi tiuj sopiradoj. Paŭlo Görgey kelkfoje interesiĝis pri sia filino. Laŭ Georgeto ne estis signifa la amindumado de Fabricio pri Rozalia. Laŭ li Fabricio estas ekstravaganca zeloto, kiu aŭ ŝatas iun, tiukaze estas ama, aŭ ĉagreniĝas, tiukaze furioziĝas kaj samas kiel uragano. Laŭvorte Fabricio estas bona fraŭlo, sed ne havas ordinarajn sentojn. Laŭ Georgeto ĉi tiaj homoj akiras bonan karieron, aŭ oni pendumas ilin. Fabricio amindumis al Rozalia, sed dume ridadis. Nu, malfeliĉa Fabricio. Nome Georgeto pravis. Ja li surpriziĝos, se li ekscios, ke fraŭlino Otrokóczy estas la filino de la vicprefekto Paŭlo Görgey. Ĉi tio estas la kruela ŝerco de la destino.

Sed pli kruela ŝerco trafas Rozalian. Nome Fabricio ne scias, kiun li amas, sed Rozalia scias, ke pro tio ŝi devas porti la nigran vestaĵon, ĉar la urbo ankoraŭ ne venĝis la mortigon de la juĝisto. Ŝi ne estas feliĉa, sed rezignacie toleras sian sorton. Ŝi estas kara kaj komplezema pri Fabricio, kiam Fabricio en la urbodomo planojn faras por puni ŝian patron. Georgeto miris pro la disciplinemo kaj animforto de Rozalia kiel ŝi ludis sian rolon, kiun ŝia patro petis de ŝi troŝarĝinte ŝin. Georgeto kompatis ŝin.

La soleco estas la plej granda babilaĉanto. Li nun tute refreŝiĝis. Enkape melodioj sonis kiel li iris hejmen post la maja festo. Li rigardis al la stela ĉielo kaj vidis, ke sur la Luno iu figuro portas arbobranĉetojn. Li vidis, ke iu stelo falas de la ĉielo. (Li fantaziis.) Li postgapis. Kio estiĝos el ĝi? Ĉu stipo? Ĉu floro? Ĉu nenio? (Unuafoje li komencis pensadi pri tiuj aferoj.) Li havis novajn sensojn. Tiel ŝajnis, kvazaŭ la Tero anhelus kaj la arbofolioj zumus, spirus. Li aŭdis la voĉon de la vespo inter la florpetaloj de la eglanterio. Kaj pro tiuj la mondo iĝis ŝatata por li.

Kiam li atingis sian loĝejon en la departementdomo, Vlasinko atendis lin, dirante, ke du sinjoroj serĉis lin.

– Kion ili diris?

– Ili diris, ke ili revenos matene.

Georgeto sciis, kial ili venas. Ekde kiam jam disvastiĝis la famo en la urbo, kion diris Georgeto pri la alia orelo de Fabricio, la junan senatanon tiu diro ofendis.

Vere ankaŭ aperis sekvatage matene Nikolao Blom kaj Sebastiano Trik por peti klarigon. Pro tio Georgeto ekridis.

– Ej sinjoroj, ja tio ne estas honorofendo, se ies orelo jukas.

Sinjoro Sebastiano Trik kontraŭargumentis.

– Tio ne estas ofendo, se ni diras tion arogante. Sed se ni diras tion minacante, ke unu orelo de iu jam estas tranĉita, tiuokaze jam tio estas ofendo.

La leŭtenanto klinis sin kaj diris:

– Mi tion kredas, ke nun kiam por la libereco multe da sango fluas, ne estus bone fluigi sangon por orelo de senatano. Cetere mi akceptas la duelon. Mi sendos miajn sekundantojn post unu horo. La sekundantoj de Georgeto estis Grodkovsky kaj Horansky. La kvar sekundantoj tute posttagmeze pritraktis pri la aranĝenda duelo, sed dume ili multajn bierojn drinkis.

La sekundantoj de Georgeto diris, ke faris pli grandan ofendon Fabricio, kiu la rozbukedon de Georgeto ĵetis en puton. Nikolao Blom iĝis ekscitita pro la argumentado.

– Ho, Dio mia! La fiuloj sendadas florojn, sed ties transdonon oni malhelpas.

Sinjoro Sebastiano Trik jam pli frue decidis kondukaĉi kun la departementanoj, nome kiel ambiciulaĉo sciis, ke tiuj scenoj estas popularaj kaj la floro estas nur senviva aĵo, sed la orelo estas parto de senatano. La antaŭa sceno nun estas senrajta faro, sed la lasta estas ofendo, krimo kontraŭ la magistrato.

Miĥelo Horánszky¹²⁸ (horanski) ege indignis pro la argumentado.

– Nu, mia sinjoro! Aŭskultu min. Se ies orelo jukas kaj ĝi estas ofendo kaj atenco, tiam mi devas fari kontraŭ mi mem atencon. Nome nun mia mankavo jukas pro via parolo. Do, tio estus pli saĝa, se vi ne babilaĉus plu.

Trik iĝis ekscitita, eksaltis al Horansky kaj gestadis antaŭ la nazo de Horansky kaj diris malĝentilaĵojn. Pro tio sekvis interbatado. Blom kaj Grodkovsky disigis ilin, dirante, ke ne estas kaŭzo por interbatadi. Ĉi tiel ili decidis: Fabricio esprimu sian bedaŭron pro konfiskado de la florbukedo kaj Georgeto retiru sian diron pri la orelo de Fabricio kaj poste etendu unu al alia amikan manon dum amika vespermanĝo, kiun partoprenos ankaŭ la sekundantoj, se ili restos vivantaj.

Sed la pli nova duelo devis okazi jam antaŭ la vespermanĝo. La interbatadantaj sekundantoj iĝis kontraŭuloj, ili baldaŭ foriris kaj ambaŭ sendis sekundantojn apud la ekskunulo. Ili decidis dum drinkado kaj pritrakto, ke la duelo okazu en la

¹²⁸ La familio-nomo Horánszky elparolendas: horanski.

arbaro¹²⁹ per glavo ĝis la unua sangoguto. La malvarman rostaĵon kaj la traŭban brandon certigos Nikolao Blom.

Ĉio okazis enorde, escepte la enigmon kaŭzitan de la unua sangoguto, pri kio multfoje temis en Lőcse. Feliĉe estas, ke la vorto ne estas sango. La afero tiel okazis (Blom estis la direktanto) ke Trik, kiu ne sciis skermi, freneze gestadis kaj per la glavo trafis la manon de Blom, kiu saltis malantaŭen kaj kriis:

– Atentu! Ja vi vundis min. (La mano de Blom sangis.)

Efike de tio ĉi, li ĉesigis la skermon.

– Nu, kio okazis? – demandis Horansky surprizate kaj ankaŭ li ĉesigis la skermon.

– Ekestas – anhelis Trik.

– Kio?

– Do, la unua sangoguto – diris Trik. Trankvile kaj efike de tio ekridis Horansky kaj lia talio komencis dolori.

Ankaŭ la aliaj ridegis, ankaŭ Trik, sed li ne sciis la kaŭzon de la ridado. Poste Horansky ekkriis:

– Kial ni freneziĝetas? Ĉi tion vi saĝe faris.

Same gaja duelo ankoraŭ ne estis en Lőcse. La tuta urbo ridetis pro tio. Sed Trik ankoraŭ ne lasis sin persvadi, dirante ke ne estis decidite de kies sango estu la unua sangoguto. Li diris, ĉe vido de la unua sangoguto la skermadon devas ĉesi. Tio ne enestas en la kodekso de la duelo, sed tion postulas la konscienco de la honestaj civitanoj.

Vespere okazis la paciĝa vespermanĝo en la restoracio „Gambrinus.” Fabricio kaj Georgeto Görgey sidis unu apud alia ĉe la tablo, kuntintigadis la glasojn, sed ĝeneco, frigideco estis inter ili. Kvazaŭ iu ombro estus inter ili kaj nek la bona vino, nek la amika vorto, vira promeso kapablis forigi tiun. Kaj la ombro konstante pliiĝis kaj disvastiĝis.

En malgrandaj urboj apenaŭ estas sekretoj. Rozalia tuj eksciis la kazon de la florbukedo. Ja tio estis maljusta pri Georgeto. Ho, ve! Fabricio estas malbelulo! Sed tiu malbelulo plaĉis al ŝi. Ŝi estis fascinata. Ja estis malbela afero ĵeti en puton tiun florbukedon, kiu estas bela. Kiom senkora estas Fabricio, ĉar li ne bedaŭris la rozojn. Kvankam ŝi troe amis la koron de Fabricio, tamen Fabricio ne povis scii, ke Georgeto estas kuzo de Rozalia. Sed ŝi sentis, ke Georgeto meritas kompenson. Pro tio, kiam Georgeto vizitis ŝin, ŝi estis pli afabla al li, ol antaŭe.

Sed ĝuste tio ĉi kaŭzis la „malbonon”. Georgeto nun unuafoje rigardis Rozalian, kiel oni kutimis rigardi virinon. Li estis fascinita. La amo ekflamis en liaj okuloj, kiam li prenis ŝian maneton kaj ŝia jupo tuŝis lian piedon. Li mirante demandis sin: „Kie estis ĝis nun miaj okuloj?” „Tiu okuloj estis tie, kie via

¹²⁹ La arbarnomo elparolenda: Ŝrajbn.

vanteco.” – diris iu sekreta voĉo. „Fabricio vekis vian vantecon kaj pro tio iĝis li pli saĝa kiel la ellerninta seruristo.”

Rozalia estis kara kaj karesema, kio pliiĝis la sentojn de Georgeto. Nome en la amo ne estas stagnado: tiu pliiĝas, aŭ malpliiĝas, sed ne ripozas. Kaj ĉi tio miksis la situacion. Amo estiĝis inter tri personoj kaj helpis unu la alian. Sed eĉ Fabricio ne estis kontenta pri la sekretaj melankoliaj paroladoj en la instituto. Li volis paroladi en dolĉa intima duopo. Fraŭlino Klöster ofte akompanis Rozalian al onjo Francka (al sinjorino Fabricio) por posttagmeza manĝado, kiam la maljunulinoj konsente iris en alian ejon por rigardi ion kaj lasis la gejunulojn en dolĉa duopo. Ja ili estis preskaŭ gefianĉoj, kaj la gejunuloj ĝojis, se ili povis resti en dolĉa duopo. Dume ili promesis unu al alia eternan fidelon. Sed ili volis fari ankaŭ ion alian. Ili jam ciumis unu la alian kaj la promeso ne sufiĉis, sed aŭdiĝis ankaŭ minacadoj.

– Mi mortigus vin, Rozalia, se vi trompus.

– Mi mortigus min, Antonio, se iam vi ne amus.

Sed ili volis fari ankaŭ la ceteron. Ili trabrakumis unu la alian, eĉ (sed tion neniu povis scii) kisis unu la alian, sigelante sian promeson. Kaj ĉar Rozalia petis lin, ke neniu povu sci pri la planita geedzeco ĝis ŝi komunikos tiun al sia patro, ĝis tiam devis resti la malnova situacio. Sed tion toleri estis malfacile. Fabricio ne volis konfuzi ŝian kapon.

Kvankam Fabricio decidis tamen edzinigi ŝin, li povis promeni kun ŝi, povis paroladi, ampetoli, sed sciis, ke se Georgeto iris al ili, tiam Rozalia iĝis timema, konfuzita kaj timis, ke Fabricio perfidos ŝin. Pro tio ŝi paroladis kun Georgeto gaje (malhelpante ĉiujn suspektojn de si mem). Tiukaze Fabricio sentis sin superflua, estis li malfeliĉa tria homo apud la amanta paro.

Ankaŭ Fabricio tediĝis de tio, ĉagreniĝis kaj se li vidis Rozalian kaj Georgeton kune, tiam li salutis ilin frigide, kaj li ne iris al ili.

Ĉi tiel vivis la amo en Georgeto, li ne kuraĝis konfesi tiun. Li estis timema, kio erarigis lin. Li konvinkiĝis, ke Rozalia amas lin, li nur devus demandi ŝin... sed tiun vorton li ne povas diri ĝis li ne komunikas la kazon al sia patro, al lia onklo Paŭlĉjo. Nome li estante malnova nobela junulo, kiu kulpas, se li frenezetigas kun fraŭlino.

Kvankam ankaŭ li decidis edzinigi ŝin, li sciis, ke tio ne estas facila. Nu, ne pro la milito, nome oni al kutimiĝis al tiu. Ja ĝuste pro la milito oni devas plimultiĝi.

Cetere la militado ne estas malkomforta kiel nun. Ja tio estis ĝuinda kaj ne donis konstantan taskon al la soldatoj. La imperiestranoj estis malrapidmovaj, pro tio la kuruoj havis libertempon. Somere la oficiroj iris ripozi en sian ĝardenon en sia vilaĝo. Vintre ankaŭ la brigadestroj iris hejmen por buĉi porkon, por fari ordon en la domejo. Ĉefe aŭtune okazis la bataloj. La nobeloj ĉasis ne leporon, apron, sed la germanon. El la lasta estas ankoraŭ abunde.

Lőcse ne suferis ĝis nun pro la milito, kvankam la kurucaj oficiroj venis-iris en la urbo, sed ne intervenis en la aferon de la urbo, eĉ iu revigligis la trafikon kaj konsolis la nigran urbon.

Ankaŭ ne la milito estis malfacila. Marso donis permeson al iu bubo, Amoro, pafadi per sagopafilo. Sed la kalendaro de Lőcse jene aŭguris la ĉi-jaran okazaĵon:

„Dek du ĉielaj signoj tiel diras,
Pli multaj homoj mortas, ol naskiĝas.”

Ja ankaŭ tio ĉi ne estus malbona, nur estus pli malmulte da imperiestranoj. Tio estas la malbono, ke geedziĝi estas malfacile. Fianĉinoj, fianĉoj, edzigantaj pastoroj estas sufiĉaj kaj estas muzikantaj ciganoj, sed ne estas nupta festantaro. Nome la familianoj estas fore. Kie trovas Georgeto sian patron? Dio scias. Kien portis lin la vento de la milito? Estus malfacile atingi Toporc-on por paroli kun sia patrino anstataŭ la patro.

Saman problemon havis ankaŭ Fabricio. Rozalia neniam parolis pri sia patro, vane li demandadis ŝin kaj fraŭlino Klőster kaj sinjorino Fabricio. Sed Fabricio estis ege scivola. Sed same ankaŭ Georgeto. Tamen Rozalia diris, ke oni organizas renkontiĝon kun sia patro, ĉar ŝi persone volas peti sian patron pere de Quendel. Fabricio ĉion faris por serĉi sinjoron Quendel. Kiu scias, kie estas nun Quendel? Dio scias. Povas esti, ke li iris en la arbaron de Szabadka, kie li iĝis turko, sed povas esti, ke li ĉesigis sian religion.

Ĉi tiel pasis la tagoj, semajnoj kaj plagoj suferigis la landon. Sur la kampoj plimultiĝis la musoj, pli frue tute ne estis muso. (Tiutempe estus bone esti kato.) La musoj ĉion voras, kion la soldatoj ne manĝis. Iufoje estis incendio en Lőcse, kiu neniigis la duonon de la urbo kaj preskaŭ neniigis ankaŭ la libropresejon de Brewer (brever), ĉar parto de la plumboliteroj fandiĝis. En septembro la kortbirdoj malsaniĝis pro iu kontaĝa pestaĉo, la kortbirdaro tute pereis. La ovojn ege mankis al la dommastrinoj. La pli grandajn dombestojn rekviziis kaj la imperiestranoj kaj la kurucoj. La mizero ĉiam pli kaj pli grandiĝis kaj pro tio okazis multe da ŝteladoj, rabadoj. Rompŝtelistoj prirabis la vendejojn. Oĉjo Joachim Fleck ne kapablis fari sole la ekzekuciistan laboron pro la multe da laboroj.¹³⁰

¹³⁰ Joahim Fleck/flek/estis ekzekuciisto de Lőcse. Li petis helpiston kaj iun praktikanton de la konsilantaro. Nome oĉjo Fleck estis la plej populara homo de Lőcse pro kio li ricevis la menciitajn homojn. (Nome la ekzekutisto – ĉefe la urba – tiutempe preskaŭ estis oficisto, kiu ne ĉiam mortigis la kulpanton. Estis urboj, kie la ekzekuciisto ne mortigis sed bonhumore sendis la kulpanton al la najbara urbo kaj tie oni ekzekuciis la verdikton. Estis inde esti en bona rilato kun la ekzekuciisto, ĉar tiutempe neniu sciis, kiam li atingos la ekzekuciiston. Nome la malĉasteco estis punata per forigo de

Kaj la Providenco eĉ nun ne volis ripozi, kiam proksimiĝis la tago de Ĉiuj Sanktuloj, ĝi surfaligis la epitafon de Miĥelo Kramler sur la malfeliĉan sinjoron Nustkorb kaj la urbo restis sen juĝisto.

Superstiĉa timo regis super la urbo kiel densa nebulo. Ĉiuj rimarkis tiun, sed ne samforme klarigis tiun. Ili vidis la aferon sekvamaniere: Miĥelon Kramler tamen Nustkorb pereis, pro tio mortigis la ŝtonhomo sinjoron Nustkorb. Pro kio Paŭlo Görgey nur iomete estis kulpa, do, la nigran vestaĵon oni devus demeti. Oni portu tiun ĝis la entombigo, poste ne estas inde porti tiun.

Laŭ aliaj, sinjoron Nustkorb la ŝtonhomo mortpremis, ĉar tiu ne venĝis la mortinton. Pro tio la ĉielo atentigas la urbon Lócse esti pripensema kaj severa...

Efike de tio ĉi jam dum la entombigo, kiun partoprenis la tuta urbo, estiĝis du partioj. La pacaj homoj menciadis la nomon de la maljuna Moŝtel.

El inter la batalemaj homoj iu riproĉis sinjoron Moŝtel:

– Al la militiro estas pli taŭga la plej juna homo kaj ne la plej maljuna.

– Tio estas frenezaĵo – diris Kristalnjik, riĉa kupristo. – Ja tiuokaze la tro juna Fabricio estus la juĝisto.

– Kial ne? – diris Konrado Kónigmaier, la rimenfaristo – li estas saĝa.

– Vere li estas saĝa – interparolis Laŭrenco Ludman, ŝuisto, – sed estas bezonata ankaŭ la barbo.

– Nu, – se estas bezonata la barbo – ridaĉis Ladislao Makhalovsky,¹³¹ mokanta dika nobelo, kiu venis al la entombigo de Mihályfalva¹³² – tiam mi sendas iun virkapron kaj estu ĝi la juĝisto.

– Ĉit! – kelkuloj silentigis la parolantojn, ĉar ili volis ĝui la baritonan voĉon de Danielo Moliĉka, kantoro, kiam li adiaŭis la mortinton.

Al la sinjorinoj plaĉis tiu kanto kaj ankaŭ la publiko emociiĝis kaj komencis larmi. Ĉefe plaĉis al ili la sekva versaĵo:

„Ne priploru lin, kara saksa popolo,
de Lócse, aliras juĝiston la juĝisto,
ĉe trono de Dio estos por li loko
ankaŭ tie leviĝos por vi la voĉo.”

– Ja li estis brava homo!

– Jes. Mi multfoje riproĉis lin dum lia vivo.

la mano, pro la malsukcesa ama aventuro oni tranĉis orelon de la pekulo. Sed estis ekzekuciistoj, kiuj la kulpanton portis el la urbo kaj tie brulstampis, aŭ ekzemple oni forigis tute la hararon de la peka homino. Multo dependis de oĉjo Fleck, kiu aŭ moroze, aŭ milde ekzekuciis la verdikton – laŭ la aparta klarigo de Kolomano Mikszáth.

¹³¹ La familio-nomo Makhalovszky elparolendas: makalovski.

¹³² La loknomo Mihályfalva elparolendas: mihajfalva.

La virinoj viŝadis siajn okulojn per la antaŭtuko, la viroj rigardis unu la alian kaj kapbalancadis. Ankaŭ al ili plaĉis la kanto de la kantoro. Sinjoro Klebe treege ploregis kaj diris al la apude starantaj ĉeestantoj:

– Ĉi tiun kantoron mi portis ĉi tien. Lia laringo estas vera trezoro. Li alvenis sur la ĉaro Molitoris¹³³ antaŭ kelkaj jaroj. Dumvoje li kantis al la ĉevaletoj, kiuj aŭskultis la kanton kaj ili ne petis avenon.

La kantoro daŭrigis la kanton nome de la mortinto:

„Mi adiaŭas vin, fiera urbodom’
malhonorita de la departementdom’.”

Maltrankvila grumblado estiĝis inter la gefunebrantoj. Iu ekscitite komencis kriadi:

– Ej, vi estas sentaŭga kantoro. Ĉu vi ne hontas eksciti kontraŭ la nobeloj ankaŭ ĉi tie apud la mortinto?

Subite ĉiuj serĉis la krianon. Oni ekvidis oĉjon Quendel, kiu kriis. Li staris apud la altstatura Grodkovski. La voĉo de Quendel estis akra, kiun rekonis jam de malproksimo Fabricio kaj tuj li ekvidis la paĉjon.

– Ho, oĉjo Quendel! Ni serĉigis vin tutlande.

– Kion vi volas fari pri mi, amiketo?

– Fraŭlino Otrókóczy ŝatus paroli kun vi.

– De kie vi scias? – diris li moroze.

– Ĉar ŝi diris.

– Kio vi estas por ŝi?

– Ŝia admiranto – diris Fabricio gaje.

Quendel gestadis per la manoj, kvazaŭflugantajn kulojn li volus forpeli.

– Nu, ĉio estas en ordo. Ne parolu, ne klarigu, mi aŭdis ion, sed nenion volas scii. Ĉu ŝi dezirus paroli kun mi? Baldaŭ mi iros tien. Mi ne forgesu tion! Mi memoros tiun.

Kaj li prenis el la poŝo la poŝtukon kaj ligis sur tiun iun nodon. Sur ĝi estis jam naŭ nodoj, laŭ kiuj ĉiu nodo signifis aranĝendan alian aferon.

Quendel estis moviĝema, ne kapablis resti samloke. Li forlasis la departementanojn kaj iris inter la komercistojn kaj estrojn de gildoj. Li vendis linon, proponis, ke li aĉetu ŝafleĵojn. Li marĉandadis por vendi – aĉeti domojn (povas esti, ke li sentis iun insidon). Li volis vendi al Johano Köpecz, riĉa bierfaranto, kaj li aĉetis porkojn de Tobio Kneppel kaj de Matiaso Ranetter kvindek barelojn da Gönc¹³⁴-a vino por sia kelo en Tokaj¹³⁵. Laŭvorte por li estis utila la entombigo de

¹³³ La esprimo: ĉaro Molitoris, montras diliĝencon de la entreprenisto dum la nomo Molitoris, liverinta vojaĝantojn.

¹³⁴ Pri la setlejo Gönc, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Gönc>

la juĝisto. Li flegme diris opinion pri planoj de elekto de la juĝisto. Ĉefe incitis lin, ke temas pri Fabricio.

– Nu, tiu ne taŭgas por esti juĝisto. Tiu estas nepripensema bubaĉo. Kiu proponis tiun, tiu estas azeno.

La memkonscia Königmayer ruĝiĝis kaj batis sur sian bruston.

– Mi diris tion. Mian voĉdonon mi donas al tiu, al kiu mi volas doni.

Quendel malestime mansignis.

– Tio ne okazos.

– Kial? – alparolis Laŭrenco Ludman, la botisto, – se tiu havus la plimulton.

Quendel estis samtempe modesta kaj orgojla. Nun li diris orgojle:

– Nu, min ne interesas, kiu estos la juĝisto de Lőcse. Nome la juĝisto de Lőcse estas sensignifa homo, kiel pulo. Nome la pulo pikas ankaŭ min, sed la juĝisto pikas eĉ ne min. Sed mi ne voĉdonus ĉi tiun arogantan bubon, sinjoron Fabricio kiel juĝiston.

Ankaŭ Jozefo Gyglas¹³⁶, la apotekisto, interparolis, kvankam li estis pia homo:

– Ej, vi estas treege granda sinjoro. Ekde kiam vi havas nobelan ĉarton?

Sed dume oĉjo Quendel malaperis kaj komencis marĉandadi ĉe la gildo de la teksistoj pri la ĉi-jara linrikolto. Sed la patriciojn li incitis, kiuj pro tio riproĉis lin.

– Ĉu li ne estas impertinenta?

– Li intervenas pri ĉio.

– Tion li kuraĝas diri, ke ne voĉdonos sinjoron Fabricio. Li ordonu ne al ni, sed al sia kato.

Kristalnyik¹³⁷, la riĉa kupristo, antaŭ unu horo proponis sinjoron Fabricio kiel juĝisto, kolere diris:

– Kiel? Ĉu li ne volas elekti sinjoron Fabricio kiel juĝiston? Spite de tio ĉi mi voĉdonos lin.

– Ĝuste – interparolis Jozefo Bujdosó¹³⁸, butonfaristo de la urbo Debrecen¹³⁹, kiu ellernis nur malpli ol dek kvin germanajn vortojn.

– Kial li malamas sinjoron Fabricio? – meditis Laŭrenco Greff, la oraĵisto. – Tio estas malkomprenebla.

– Ĉar tiu estas juna. Li envias lian junecon, ĉar li jam ne povas esti juna.

¹³⁵ Pri la vitejojn havanta setlejo Tokaj vi povas legi ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Tokaj> – pri ĝia mondfama vino Asuo vidu la artikolon:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Tokaj-vino>

¹³⁶ La familio-nomo Gyglas elparolendas: giglaŝ.

¹³⁷ La familio-nomo Krisztalnyik elparolendas: kristalnjik.

¹³⁸ La familio-nomo Bujdosó elparolendas: bujdoŝo.

¹³⁹ Pri la hungara urbo Debrecen, bv. vidi la artikolon:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Debrecen>

Laŭvorte, kiam la entombigo finiĝis, disvastiĝis la minacado de Quendel, pro kiu ĉiuj indignis. „Ĉu li ne permesas, ke estu Fabricio la juĝisto? Ni dezirus vidi tion!”

Nomon de Fabricio oni menciadis ĉie posttagmeze kaj vespere.

Sinjoro Quendel ne konjektis, ke lia nepopulareco kaŭzis popularecon al Fabricio. Sinjoro Quendel iris al Rozalia post la entombigo. Sed li ne povis paroli intime kun Rozalia, ĉar ĉeestis sinjoro Fabricio kaj fraŭlino Klöster. Rozalia petis sinjoron Quendel porti leteron al ŝia patro. Dume sinjorino Fabricio, fraŭlino Klöster kaj Quendel amuzis unu la alian.

Rozalia baldaŭ portis la sigelitan leteron. Sur la koverto ne estis nomo, titolo, adreso, simple sur ĝi estis nur tiu: „Ĉi tiun leteron mi sendas al mia kara patro.” Sinjorino Fabricio kaj fraŭlino Klöster vane rigardis la koverton. Kaj la letero enhavis la sekvajn vortojn:

La jeno:

„Kara mia patro!

Mi estas sana, dank'al Dio. Ne koleru, ke mi ĝenas vin, sed mi havas gravan komunikendaĵon. Kara mia paĉjeto!” Mi volas paroli kun vi kaj mi mortos, se mi ne paroleblas baldaŭe kun vi. Mi fartas bone, mi havas bonhavyon. *Sed okazis io stranga pri mi.* Mia vivo dependas de tio, kion vi pensas. Kie kaj kiam ni povus renkontiĝi baldaŭ. Ne lasu min longtempe esti en malcerteco. Viajn manojn kisas via obeema filino:

Rozalia”

La adoleskantino hodiaŭ estis gaja. Ŝi transdonis la leteron al Quendel. Kun infana petolo ŝi prenis la manon de la maljunulo, karesis la mankavyon de la maljunulo kaj klake aplaudis sur la mankavyon de la maljunulo. La maljunulo fermis la okulojn kaj ĝuis la tuton.

– Ĉi tio estas la drinkmono, paĉjo, sed mi petas, ke vi ne forgesu transdoni la leteron al mia patro rapide.

La maljunulo ekmoviĝis.

– Ĉu rapide? Hm. (Ruze li palpebrumis.) Ĉu mi transdonu tiun jam morgaŭ? Ja la vilaĝo de via patro estas malproksime.

Poste li klinis sin kaj jam post unu horo li kaj la letero estis en la kastelo de Görgö¹⁴⁰ ĉe lia amiko.

¹⁴⁰ Pri la setlejo Görgö estas skribite en la artikolo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Spišský_Hrhov – bildoj pri la kastelo:

<http://www.muemlekem.hu/hatareset/Gorgey--Csaky-kastely-Gorgo-3231> –

pri Toporc krome: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Toporec>

15-A ĈAPITRO

En kiu, laŭ la kaprico de la Providenco, sed ne laŭ la volo de la aŭtoro finiĝas la historio

Ankaŭ unu sinjorino povas fari malbonaĵon, sed du sinjorinoj pli multe. Kiam sinjorino Sigmundo Bibók retrovis en Görgő sian edzon, tiam oni estis egalaj laŭ la matematiko. Nome estis du edzoj kaj du edzinoj. La maljuna Vincenzo havis la malnovan edzinon kaj la novan edzinon havis Sigmundo. Sed Sigmundo ne ĉeestis. La edzinoj ekkomprenis bone unu la alian. Ili bedaŭris unu la alian, sed ambaŭ riproĉis Sigmundon. Kiam Paŭlo Görgey sukcesis kaptigi Sigmundon kaj enkarcerigis en malliberejon de la kastelo de Görgő, tiam ambaŭ edzinoj konkuradis: al kiu aliĝas Sigmundo post la liberiĝo?

En la vilaĝo ĉiuj – krom la vicprefekto – cerbumis pri tio ĉi. Nome la vicprefekto sciis, Bibók plue ne liberiĝos. Estis kolektitaj ĉiuj dokumentoj kontraŭ li: bigamio, perfido, uzado de la senkulpa arestiĝa ordono, kiuj ofendis la urbon. La kapo de Bibók meritis la glavegon.

La vicprefekto ankaŭ tion planis, ĉar ne estas utile manĝigi la fiulon, dum multe da homoj malsatas, ke li baldaŭe ekzekutigos la fiulon. La vicprefekto elportigis la tribunalon de la departemento al Görgő. Sed tio estis malbono, ke la departemento ne havas ekzekuciiston.

Pro tio li sendis fakulon pri skribado kaj legado al Lőcse al Joachim Fleck, la urba ekzekuciisto, kun la peto veni al Görgő por ekzekucii iun deliktulon.

Sed Joachim Fleck estis bonsenta Lőcse-ano kaj mesaĝis al Paŭlo Görgey ofendiĝinte, ke li por neniu juvelo ekzekucios la malliberulon de la departemento por liberigi la departementon de iu fiulo.

Pro la mesaĝo de oĉjo Fleck pliiĝis lia populareco en Lőcse. Ĉi tiel Paŭlo Görgey prokrastis la ekzekuton de Bibók.

Sed ne ripozis la du sinjorinoj. Ili sendadis sekrete tre bongustajn manĝaĵojn en la prizono: marcipanon, anserfemurojn. Nome la pola edzino estis kuiristino ĉe la luanto de restoracio de Quendel kiu iĝis fama pri la dolĉaj bakaĵoj. Bibók laŭdis ambaŭ edzinojn kaj la servistaro ne sciis, kiun edzinon amas Bibók pleje.

Dume la situacio pli malboniĝis, ĉar la maljuna Vincenzo Bibók mortis fine de la somero pro maldigesto, kio estis honto, ĉar la kamparano mortis, kiam la pruno maturiĝas. Nome la nobelo mortas vintre pro maldigesto okaze de la buĉado de porko.

Nun jam estis nur unu edzo kaj du edzinoj. Kio okazos? Ambaŭ estas lia edzino, sed unu, la vera unua, estas ankaŭ lia duonpatrino. Ŝin li edzinigis pli frue, sed ŝi jam estas edzino de lia patro, sed la alia restis lia dua edzino. Sed la

dua naskis al li infanon, dum la unua naskis nur fratojn. Neniu sciis, kiu estas la vera edzino, kio estas prava.

Sed ambaŭ estis konvinkitaj, ke Sigmundo donas pravon al ŝi. Pro tio ili interkverelis, ili ŝiris reciproke la hararon unu de la alia. Se diri inter kvar okuloj, la tuto okazis sen amo. Nome la pola edzino kaj la lunto de la restoracio de Quendel komencis ami unu la alian, kaj sinjorino Bibók post la morto de la maljuna Vincento Bibók komencis interesiĝi pri la etnabeloj. Ambaŭ dorlotis Sigmundon en la prizono pro la malamemado. Ĉi tion pruvas, ke ambaŭ petis la prefekton doni du semajnojn al Sigmundo por elveni el la prizono. Ili nur pro vanteco volis, ke la vilaĝanoj vidu, kiun amas Sigmundo pli varme. Sed la vicprefekto rifuzis la peton. Kaj la vilaĝanoj sciiĝis pri la vanteco ambaŭa. Tiel ŝajnis, ke Bibók eksentis en la prizono la situacion kaj samforme laŭdis la enportitajn manĝaĵojn de ambaŭ edzinoj.

La edzinoj klopodis superi unu la alian. La furiozo ĉiam pliiĝis. Fine sinjorino Vincento Bibók kunpakis siajn aĵojn, jungigis la ĉevalojn al la kaleŝo kaj diris:

– Nu, mi baldaŭ montros al tiu Bibovski (ĉar ĉi tiel nomis sin tiu impertinentulino), kiu kaj kio mi estas.

Poste ŝi iris rekte al la kortego de la regnestro Rákóczi en Sárospatak (ŝaroŝpatak). Tie ŝi iris al sinjoro Csáky, ĉefprefekto de Sepeŝ, kaj petegis lin plorante liberigi sian edzon, Sigmundon Bibók. La ĉefprefekto estis bonkora. Ŝi konvinkis lin kaj li promesis fari ion.

Sed ni devas diri, sinjoro Csáky ne kuraĝis agi kontraŭ la grandpotenca prefekto, ja la pli aĝan fraton de Paŭlo ege honoris la regnestro. Pro tio la ĉefprefekto skribigis leteron al kelkaj nobeloj de Sepeŝ, en kiu estis skribite, ke Paŭlo Görgey metis en prizanon de kelo de la kastelo de Görgő la nobelojn, kio estas perforto. Pro tio ĉi tio estus bona, ke la deliktulojn li liberigus, aŭ portigus al Lőcse, ĉar la malliberuloj devas esti tie. Ŝi petis la ĉefprefekton, ne admoni: sed atentigi diskrete la prefekton, ĉar la ekkaptadoj de la nobeloj kaŭzas multspecajn miskomprenojn, ĉefe en militaj tempoj.

Ĉi tiuj leteroj kaŭzis eksciton. Tiuj estis gravaj, ĉar venis el la kortego de Sárospatak. Kvankam la ĉefprefekton Csáky oni ne tre estimis, tamen la leteroj volis kredigi la volon de la kortego de Sárospatak. La nobeloj ne kredis tion, sed ili konvinkis la etnabelojn. Nome la etnabeloj ŝatas esti eĥoj de la nobeloj. Subite ili demandis: „Kial ni iru al Görgő?” „Ĉu ĉar tie estas restoracio de Quendel?” „Ni ne iras al Görgő.” Ja la vicprefekto ne estas reĝo. Kaj la reĝo iras al la nobeloj kaj ne inverse. Kial ne kuraĝas iri tiu departemento en sian domon?

Paŭlo Görgey frue informiĝis pri tiu ĉi etoso. Kvankam li ne sciis, de kie venas la famo, tamen la famoj disvastiĝis. Kion fari? Li hezitis. Ej! Certe la ekscito silentiĝos kaj estos trankvilo. Bone estos atendi kelkajn jarojn. Paŭlo ĉi tiel cerbumadis, kiam sinjoro Quendel portis la leteron de Rozalia. Rozalia volas

renkontiĝi nepre. Kion ŝi volas komuniki? Li suferis pro la malpacienco kaj eksciteco. Certe ŝi havas gravan aferon. Ŝi ne skribis, de kiam ŝi fartas en la instituto. Eĉ nun ŝi sopiras hejmen. Ŝi skribas, ke ŝi estas bone, kio signifas, ke ŝi volas resti tie. Ŝi ne altiriĝas al sia patro, povas esti ke ne li estas ŝia patro. Nu, tio estas tute egala, tamen li devas renkontiĝi kun ŝi, ja ŝi deziras tion. Kiumaniere? Ĉu li portigu ŝin helpe de Quendel al iu neŭtrala loko, ĉu li iru al Lőcse? Li ankaŭ nun hezitis. La departementaj nobeloj, kiuj informis lin pri la situacio de Lőcse, helpe de la leteroj de Csáky ŝanĝis siajn opiniojn kaj ankaŭ Grodkovsky anoncis, ke Lőcse jam ne volas venĝi la morton de la juĝisto. La damoj tediĝis de la nigraj vestaĵoj kaj la patricioj timante la superstiĉon surpriziĝis kaj opiniis, Nustkorb kaŭzis la morton de Miĥelo Kramler. La komercistoj kaj la metiistoj jam ege koleras, ĉar malpliĝis la urba fremdultrafiko kaj stagnado estas en la vendejoj pro la kolero inter la urbaj kaj departementaj senatanoj. Sed Paŭlo Görgey ankaŭ nun meditis.

Sed proksimume unu semajno pasis post la letero de Rozalia, kiam paĉjo Quendel denove aperis en Görgő kaj kunportis iun dikan aĉetanton, al kiu li vendis perforte la restoracion. Tiam Paŭlo Görgey faris decidon.

– Nun mi iros al Lőcse.

Li tuj ordonis, ke la studentoj kunvoku la aŭtunan kunvenon de la departemento por pritrakti la novajn militkostojn. La tempo de la kunveno estu la 30-a de novembro.

La studentoj rigardis lin mirante.

– Sed la domo de la departemento estas en Lőcse.

– Tio estas memkomprenebla – li diris severe kaj kurte.

Li ne estis homo de anoncoj kaj ŝajno, sed tiu de observado. La ekscito de la nobelaro kaj la anoncoj de la departementanoj ne interesis lin. Eĉ la letero de Rozalia ne ekscitis lin. Sed ĉar Quendel vendis sian restoracion, li sentis, ke sekvas la fino de la epoko de Görgő. Li faris tiel, kiel Atilo ĉe la sieĝo de Akvilejo, kiun ĝuste li volis forlasi. Sed, intertempe li vidis, ke iu maljuna cikonio flugas kaj kunportas en la beko sian cikonidon. Ho! – li kriis – la cikonio jam scias! Kaj Atilo¹⁴¹ tie restis por bruldifekti la urbon Akvilejo.

Tamen iomete da singardo devas esti, ĉar tio estas utila. Li skribigis sur la leterojn de la nobeloj, ke la kunvenejo estos en Görgő, rigardante la militajn tempojn kaj la ceteraĵojn, dum la matenaj horoj. Kaj de Görgő kune kun la familianoj sekvas la marŝado al Lőcse.

Ĉi tio estis granda sensacio. La famo disvastiĝis rapide kiel la falko. La nobeloj salutis unu la alian kun la slogano: „Lőcse! Lőcse!” Ili ĉiam salutis unu la alian

¹⁴¹ Ĉi tie temas pri la huna reĝo Atilo: https://eo.wikipedia.org/wiki/Atilo_la_Huno – pri Aquileja: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Aquileia>

kun tiu slogano, kie ajn ili ekvidis unu la alian. Tiun ĉi sloganon li diris fiere kiel sinjoro Botond¹⁴², kiam li iris kontraŭ Bizanco. En la malnova domo de la departemento estis granda venado-irado, purigado. Oni faris novajn fenestrojn, pordojn, kaj faris novajn kahelfornojn. La urbo rigardis indiferente ĉi tiujn preparojn. Sed tio ne estas miraklo, ja ankaŭ la urbo prepariĝis: la 25-an de novembro okazos juĝisto-elekto.

Du fortaj partioj kontraŭstaris. La maljuna Moŝtel ne akceptis la kandidatecon, dirante saĝajn vortojn, kiam la tribunalaj oficistoj proponis:

– Tiel ŝajnas, ke vi ne rimarkas, ke la lambastono ne estas bastoneto kaj la bastoneto ne estas lambastono. Kvankam ambaŭ uzeblas kiel apogiloj, tamen ne samforme. La saĝa kadukulo ĉi tiel volis esprimi, ke li uzas jam nur la lambastonon.

Donat Mauks estas honestulo kaj agema, sed bedaŭrinde estas nobelo. Stefano Student, bofrato de la karmemora urbestro, kiu estas saĝa scienculo, povus entrepreni ĉi tiun oficon kontraŭ stipendio (dumil forintoj) por ellerni la laborojn de la juĝisto. Sed la leĝon oni ne povas frenezigi. Kiel li ellernu tiun ĉi laboron, se li estas ankaŭ juĝisto? Nome li ne kapablas diri verdikton.

Ĉi tiel la kandidato iĝis Gosnovicer, kiun neniu ŝatas. La militon volanta partio kandidatigis kontraŭ li la senatanan Fabricio. Kio okazos? Dio scias. La partio de Fabricio ĉiam pli kaj pli fortiĝas, nome la edzinoj kaj la popolamaso protektas lin. La popolamaso ne havas balotrajton, sed la balotrajtojn oni povas ŝanĝi. Kiel la vitobranĉo ne havas floron, tamen ĝi vigligas la cerbon plej bone helpe de la likvaĵo de la vinberoj.

Sinjoro Quendel nun restadis en Lőcse, li vendis siajn domojn. (Li havis kvar domojn.) Li furioziĝis vidante la sukceson de la partio de Fabricio. Ĉar oni ĉesigis la malpermeson de la muzikado ĝis la elekto de juĝisto, pro kio la tuta urbo estis bruega pro la muzikadoj de la muzikistaroj. Oni ĉesigis la fermohoron kaj daŭris la amuzigado, diboĉado ĝis mateniĝo. La kelo de sinjoro Gosnovicer estis malfermita kaj same kelkaj gildoj, kiuj havis kontakton kun li. Li preskaŭ senpage donis la vinon. Sed ankaŭ sinjorino Fabricio estis saĝa kaj vizitis tiujn edzinojn de la metiistoj, kies edzoj estis anoj de la konsilantaro. Ŝi estis amikeca al ili. Tio estis daŭra travivaĵo por la edzinoj. Sed la vino de Gosnovicer estis efemera travivaĵo. Gosnovicer donis varmajn ŝalojn al siaj partianoj, kiuj havis la hungaran trikoloron kaj ili estis rekoneblaj jam de malproksimo. Kaj sinjorino Fabricio antaŭ la lernejoj donis al la infanoj sukeraĵojn. La infanoj alvenis hejmen havante makulojn, malpure ĉirkaŭ la buŝo kaj oni demandis ilin: „De kio vi iĝis ege malpuraj?” La infanoj respondis: „De la sukeraĵo, kiun ni ricevis de onjo

¹⁴² Pri la iama hungara militestro Botond vi trovos artikolon tie hispanlingve:

<https://es.wikipedia.org/wiki/Botond> – https://hu.wikipedia.org/wiki/Botond_vitéz

Fabricio.” Tio estis decida ĉe la balotado. Tio estis pli valora, ol la plej bela ŝalo de Hindujo.

Estas komprenebla, ke sinjorino Fabricio atingis tion, ke sinjoro Antonio Fabricio iĝis la juĝisto. Quendel konstante kontraŭadis, argumentis, sed vane. Ĝuste tagmeze eksonis la sonorilego de la templo Sankta Jakobo kaj Moŝtel anoncis la rezulton. Antonio Fabricio iĝis juĝisto de Lőcse.

Grandioza vivuado estiĝis, kanonoj ektondris sur la monto Scheiben (ŝajbn). Samtempe eksonis la hungara himno kiel danko muzikante helpe de Stadtpfeifer.

Sebastiano Trück (trik) malfermis iun fenestron de la granda ĉambrego kaj diris al la popolamaso:

– Lőcse havas novan juĝiston. Ĝoju kaj obeu al Antonio Fabricio!

Ekstere estis vivuado kiel uragano. La majstroj de la urbopartoj enseliĝis, trumpetis kaj anoncis en siaj loĝkvartaloj la rezulton de la balotado.

Sinjoro Moŝtel lanĉis proponon, ke la delegitaro iru al la nova juĝisto. La senatanoj komencis elekti la anojn de la delegitaro. Oni elektis ankaŭ sinjoron Quendel, kiu ege kontraŭis.

– Ne. Mi ne iras tien. Ĉar oni devus sendi ankaŭ vartistineton apud la novan juĝiston.

Post lia primokado li tuj malaperis el la ĉambrego.

En la urbo oni tre ĝojis. Oni diris, ke venkis la eta Fabricio. Aliuloj tion diris, ke Gosnovicer malvenkis. Oni sciis ĝoji dumaniere.

Fabricio atendis la rezulton de la balotado en iu ĉambro de la urbodomo. Lia unua penso estis Rozalia kaj li ordonis al iu hajduko:

– Kuru al fraŭlino Klöster kaj ne haltu. Kuru poste al mia patrino kaj diru al ŝi, ke mi iĝis la juĝisto.

Kiam sinjorino Fabricio aŭdis la famon, ŝi tuj portis la novaĵon al la instituto de fraŭlino Klöster. Ŝi ne metis ŝalon kaj tukon, spite de tio, ke sufiĉe malvarmeta vento blovis. Ŝi iris en la ĉambron de Rozalia. Rozalia estis sola en la ĉambro. Sinjorino Fabricio gaje klinis sin antaŭ Rozalia kaj diris:

– Mi salutas vian moŝton, mia sinjorino juĝisto.

La fraŭlino konfuziĝis, paliĝis kaj parolis nepripensinte:

– Iru, do, panjo...

Tiu ĉi diro dolĉigis la koron de la patrino. Ŝi sentis plezuron, ĉar tiu montris, ke Rozalia rigardas ŝin kiel patrino. La patrino ekkaptis la talion de Rozalia, premis al si kaj ekploris. Pro tio ankaŭ Rozalia ekploris. Ambaŭ ploris, kiel torento fluis la larmoj el iliaj okuloj. Nur ili ploris en la urbo, ĉar sinjoro Gosnovicer prefere blasfemis.

Kiam jam ili sufiĉan tempon ploris, tiam ili trankviliĝis. La patrino rigardis la karan fraŭlinon kaj plezuris.

– Ĉu vi ĝojas, mia kara filino? – ŝi demandis Rozalian kaj rigardis ŝiajn okulojn.

– Ĉu tio estos bona? – demandis Rozalia milde.

– Tio estas memkonprenebla – diris la panjo triumfe.

Rozalia sidiĝis apud la patrino sur iun benketon kaj metis sian kapon sur la genuojn de la patrino kaj tremetis.

– Mi treege timas iun...

– Ho, ve! Kiun, aŭ kion vi timas, mia filino? La juĝisto de Lócse havas grandan potencon, ne li timas iun, sed la homoj timu lin. Kiu kuraĝus suferigi fianĉinon de la juĝisto?

Kaj ŝi karesis la oran hararon de la fraŭlino, dum ŝi rimarkis, ke Rozalia ne ploras, sed snufas, kaj ne timas, sed dormas.

Paĉjo Quendel ne atendis la ĵuron de la nova juĝisto, sed li kaŝiris el la ĉambrego kaj iris per sia kaleŝo al Paŭlo Görgey por nokti, anoncante, ke Fabricio iĝis la juĝisto de Lócse. Paŭlo Görgey restis indiferenta kaj demandis nur formale:

– Kia homo li estas?

– Li estas malserioza bubaĉo.

– Kial oni elektis lin?

– Pro lia orelo – diris Quendel.

– Mi ne komprenas.

– Eĉ mi ne. Lian orelon ektranĉis via nevo, Georgeto Görgey kaj pro tio li iĝis kamparana.

– Populara – korektis lin Paŭlo Görgey.

– Tute egala. Ĉefe pro tio oni estas populara, ĉar li havas nenion, malofte pro tio, ĉar li havas ion. Nu, Fabricio ne havas tutorelon.

– Oni diras, ke li estas saĝa.

– Jes, sed lia panjo estas pli saĝa, brava, kaj soldateca sinjorino. Helpe de ŝi li iĝis juĝisto.

– Ĉu vi ne portis alian novaĵon?

– Mi scias nenion.

– Ĉu oni diras ion pri mia marŝo al Lócse?

– Nenion.

– Ĉu vi ne vidis mian filinon?

– Ekde nia adiaŭo ne.

– Nu, iru al ŝi morgaŭ kaj trankviligu ŝin, ke post unu semajno ni renkontiĝos kaj povas esti, ke ni neniam disiĝos.

Quendel skuis la kapon.

– Pardonu, via moŝta sinjoro, sed mi ne povas iri, ĉar mi mensogis, ke vi loĝas tre malproksime. Mi nun veturas ie en Transilvanio.

– Tiuokaze sendu mesaĝon pere de Georgeto.

– Tiu ne estas en Lőcse.

– Kie tiu estas? – miris la prefekto.

– Ho, ve! Tiu iradas ĉie. Sed permesu diri tion slovake, ĉar tio estas pli facila al mi, ol la hungara. Tiu iris al Toporc al sia patrino. Li sopiris la panjon. Sed ĉe lia reveno la imperiestranoj kaptis tiun. La grafo Bercsényi¹⁴³ tiun liberigis je deziro de lia patro Johano Görgey. Do, la sinjoreto liberiĝis, sed ne venis al Lőcse, ĉar la kuruoj foriris el la urbo antaŭ du semajnoj kaj Georgeto estas ie apud Kohlbach.

– Ĉu nun ne estas soldatoj en Lőcse?

– La hominoj malĝojadas – diris Quendel ridante.

– Io venis al mia kapo. Kiam vi estis lastfoje en la kastelo de Szabadka? – demandis Paŭlo Görgey.

– Ankaŭ tiun ne demandu! Ĝia fino estas! – diris la maljuna ŝakristo melankolie. Mi jam nur la monon ŝatas. Kredu min! Mi tediĝas de ĉio krom la mono. Mi kuradis post la belaj virinoj kaj freneziĝis pro tiuj. Ĉu la lampiro ne estas pli bela ol la virino? Tamen oni ne kuras post la lampiro. Ĉu ne estas pli bongusta la frago, ol la buŝo de la virino? Sed jes! Ĉesu la virinaj sentoj! Sed la amo de la mono estas varmega pasio.

– Nu, ne ŝajnu vin ja vi ne estas avara kaj monavida.

– Sed mi estas monavida. Kio estas valoraĵo, tiom mi akiras, se eblas. Kaj ankaŭ tiam, se ne eblas. Kiu estas pli valora? Ĉu iu pulo, ĉu la piedo de la virino? La pulo estas pli valora, ol la piedo de iu sinjorino, ĉar la pulo ne portas ŝuojn. Ĉu mi ne pravas? Sed jes.

Dume proksimiĝis la tago de la kunveno en la departemento. Ĉiutage venis gasto al la vespermanĝo kaj kvartiris en la kastelo. Ili portis la freŝajn famojn.

Iutage alvenis Francisko Koroŝnok¹⁴⁴, la ĉefnotario kaj diris:

– En Lőcse estas silento.

Sekvatage alvenis Budaházy kaj diris:

– Ne estas novaĵo.

Post li neniu venis.

Dum la lasta tago Quendel alvenis sur kaleŝo, sur kiu estis ankaŭ Grodkovsky. Ambaŭ venis de Lőcse. Nur ili venis de Lőcse, sed sur la korto jam estis multe da kaleŝoj.

¹⁴³ Pri Nikolao Bercsényi vidu la artikolon:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolao_Bercsényi

¹⁴⁴ La familio-nomon Koroŝnok¹⁴⁴ elparolu: koroŝnoki.

Antaŭ la vespermanĝo oni aranĝis rapidan kunvenon. Grodkovsky raportis pri la situacio. Laŭ li ĉiu maltrankvilo estas nur ĥimero. La departementdomo estas jam pura. Sinjorino Marják jam prepariĝadis al la morgaŭa tagmanĝo. En la granda ĉambrego ĝi estos surtabligita. La vicprefekto povus eniri, neniuj suferigos lin. La urbo similas al iu silenta lago, kie kelkaj ranoj kvakas sed rimarkante la paŝojn tiuj saltas ŝmacante en la lagon.

Paĉjo Quendel nerve tamburis sur la tablo dum la rapida kunveno kaj kelkfoje murmuris:

– Nu, nu.

La vicprefekto turnis sin al li maltrankvile:

– Sinjoro Quendel, tiel ŝajnas, ke vi havas alian opinion.

– Io ne plaĉas al mi. La senatanoj enigme kunvenadas, febre venas-iras, kvazaŭ ili iun nevideblan lignoĉevalon ŝovus, en kiu estas soldatoj... jam mi ne scias, en kiu urbo kio estas. Ĉefe la nova juĝisto ne plaĉas al mi. Kvankam mi ne vidas, tamen laŭ mi ili faras iun malbonon.

La aliaj malaprobis la opinion de sinjoro Quendel. Kion li povas fari? Kion povas fari la nova juĝisto? Tiu estas blinda kiel la kateto en la momento de la naskiĝo. Certe tiu kaŭzos malbonon, se li estos pli saĝa, sed nun li ĝojas, ke li iĝis juĝisto, kiel la knabeto, kiam li unuafoje ricevis poŝtranĉilon, sed ankoraŭ ne kapablas uzi tiun.

Ĉar post la kunveno dum la vespermanĝo ili drinkadis ankaŭ bongustan vinon, por ili la situacio estis pli favora. Ĉiuj trankviliĝis kaj antaŭ la noktomezo ĉiuj iris dormi, ripozi, ja frumatene ili devis ellitiĝi. Neniu pensis pri la kontraŭado de paĉjo Quendel, krom la prefekto.

... Sed paĉjo Quendel nun pravis. Certe dum la sama horo sinjorino Fabricio diris ion al Rozalia: „Ĉu vi ne rimarkis, mia karulino, ke nun Antonio estas mistera. Li pro io maltrankvilaĝadas. Li planas, aŭ sentas ion, certe li sentas danĝeron. ... Ne plaĉas al mi tiu fraŭlo.”

Post la balotado la nova juĝisto du tagojn estis feliĉa, bonhumora. Estis ĝojo vidi lin. Sed dum la tria tago li estis maltrankvila, nokte li ne kapablis dormi kaj kun neniuj parolis. Kiam lia patrino demandis lin, tiam li nur halanĝis. „Tio estas publikafero – diris li – ne estas tio fero de virinoj. Vi, panjo, baldaŭ ekscios, kio okazas.” La senatanoj konsiliĝis en la loĝejo de la juĝisto inter si kaj estis misteraj.

Dum la kvara vespero la patrino invitis la gastojn por amuziĝi, sed al Antonio ne diris tion. Malmultaj homoj estis tie, sed tiuj estis karaj homoj: Nikolao Blom, Francisketo Greff, Matilda Klöster, la petola sinjorino Teőke (teeke/ŝi estas la plej grava) kaj sinjorino Donath Mauks kaj ŝiaj fraŭlinoj kaj ŝia filo. Nu, kaj Rozalia.

La societo amuzis sin bone, sed la juĝisto estis senvorta, kun Rozalia apenaŭ li paroladis. Dume eksonis la turhorloĝo de la urbodomo. Tiam li subite eksaltis de

la tablo, ekskuzis sin, ĉar li devas foriri pri afero de la urbo. Li kisis la manon de sia patrino, dirante, ke li ne venos hejmen nokte, ĉar li havas multe da laboroj. Li estis treege ekscitita.

SinJORINO Fabricio esprimis malaprobadojn.

– Vi scias, mia filo, kion vi faras, sed...

La juĝisto severe kuntiris la brovojn:

– Tio estas decidita afero – li diris kurte ne permesante opozicion.

(Tiu kapablos ordoni, – flustris Blom al sinJORINO Teŭke.)

La maljunulino ne finis la frazon, ĉar la rigardo de la juĝisto ne permesis tion.

Rozalia mirante rigardis lin kaj vidis, ke li estas pli bela, ol kiam ajn.

Li preteriris Rozalian kaj flustris malantaŭ la seĝo de Rozalia al Rozalia:

– Morgaŭ ni povos vidi unu la alian, mia kolombino! Bonan nokton!

Ili estis proksime unu al alia kaj ŝiaj orharetoj tiklis lian lipon... sed ankaŭ malproksime estis unu de alia, kvazaŭ maroj estus inter ili.

Fabricio foriris, sed la societo amuzis sin plu ĝis la fermohoro. Ĉiuj pensis pri Fabricio, ke la nova balailo bone balaas. Fabricio entuziasme komencas la novan laboron. Nun la zenito de la potenco estas dolĉa, sed poste li ektrovos ankaŭ la amaran flankon.

SinJORINO Fabricio lamentis dirante, ke ŝi timas esti sola en la granda loĝejo, pro kio ŝi petis fraŭlinon Klöster permesi, ke Rozalia restu ĉe ŝi. Klöster permesis tion. La gastoj disiĝis. La familon Mauks kompanis hejmen Francisketo Greff. SinJORINON Teŭke akompanis Nikolao Blom kaj la aliajn akompanis kelkaj servistoj, prenante lanternon.

Estis abomena malhela vintra nokto. Estis granda densa nebulo, kiu kiel farungluaĵo gluiĝis al la korpo de la homo. Tiel ŝajnis, ke la urbo Lőcse dormas. Estis granda silento kaj kiam defalis iu folio de la tilioarbo antaŭ la domo de Gyglas, tiam ties brueto aŭdeblis ankaŭ en la najbara strato. Nur en kelkaj fenestroj videblis lumo, sed ĉiuj fenestroj de la urbodomo estis lumigitaj.

– Oni malŝparas la kandelojn – diris Blom.

– Ne timu pri la urbo – diris sinJORINO Teŭke, la bela vidvino – ĝi havas monon.

– Ho, ne, tute ne.

SinJORINO Teŭke adiaŭis sinJORON Blom ĉe la pordego, ŝi eniris la domon, enlitiĝis kaj ekdormis. Post noktomezo eblis aŭdi frapadon. Ŝi vekigis. Sur la vendoplaco granda bruego aŭdeblis. Multe da ombroj moviĝis sur la muroj de la ĉambro. Ekstere paŝoj aŭdeblis. Kvazaŭ soldatoj estus tie. Sed estis ankaŭ aliaj bruegoj: voĉoj de marteloj kaj segiloj. Pli malfrue okazis terura bruego, pro kiu la mebloj ekknaris. Ho, ve! Certe ĝi estas la sono de kanono.

SinJORINO Teŭke unue timis, ŝi kaŝis sin sub la kovrilon, sed malrapide ŝi divenis la devenon de la bruegoj. Ŝi ekpensadis.

Ŝi jam ne timis, sed iĝis scivola. Ŝi sciis, ke povas esti mortige eksalti el la varma lito kaj paŝi sur la malvarman plankon. Sed la scivolo estis pli granda, ol la timo de la morto kaj subite ŝi iris al la fenestro kaj malfermis ĝin.

Ĉe la lumoj de la strataj lampoj ŝi vidis sur la vendoplaco homamason. Multe da homoj venadis-iradis tien kaj reen. Iu barelo da brando nigriĝis ie kaj oni povis flari la odoron de la brando. Ĉirkaŭ la barelo staris multaj homoj. Bovoĵ tiris grandajn kanonojn al la ĉefpordego. Apud la kanonoj viroj laboris, entuziasme portante vestaĵojn el bubalfeloj. Tio estis fantasta vidaĵo. Kontraŭ la balkono de la urbodomo la ĉarpentistoj faris ion per hakiloj kaj segiloj. Sed en la malhelo ŝi vidis malklare. Nur la sovaĝaspektaj figuroj estis bone videblaj. Antaŭ ŝiaj fenestroj paŝadis tiuj figuroj. Ŝi kuraĝe demandis ilin:

– Diru al mi, bonaj homoj, kio okazas sur la strato?

Du figuroj rigardis al ŝi. Iu estis juna, muskola, kiu vidis ŝian blankan virinkufon kaj sciis, ke la demandinto estas homino. Li respondis ravate:

– Ne bone estas ekscii tion. Ne estu scivola, mia kara kateto!

La 30-an de novembro matene Paŭlo Görgey, la vicprefekto, vekiĝis mishumore. Li ne sciis dormi pro la bruego de la alvenantaj ĉaroj, pro la paroladoj, disputadoj de la koĉeroj kaj pro la tuta malagrabla situacio. Li riproĉis sin kaj demandis: „Ĉu mi estas normala?“ „Ja mi miksas min en tiajn aferojn, kiuj ne interesas min.“ „Mi povus vivi tiel fiŝo en la akvo kaj neniu povus ordoni al mi.“ „Tio ne estas prava, ke mi ordonas al ĉiuj. Kvankam mi ordonas al la homoj, la cirkonstancoj ordonas al mi. La cirkonstancojn la homoj formas, do la homoj ordonas al mi.“

Li ĉi tiel meditis, filozofadis havante acidan mienon kaj dume surmetis la ornamajn vestaĵojn kaj la botojn kun spronoj. Kiam li volis ligi sian glavon opalŝtonan, tiam neatendite iu forte malfermis la pordon. Li kolere turnis sin al la pordo, dirante, kiu kuraĝas enpaŝi sen permeso. Georgeto Görgey venis ene.

– Kion vi volas diri? – li demandis kolere. – Ĉu vi ne povus atendi iomete?

(Tio estis malbonhumora akcepto post longa foresto.)

– Mi havas direndaĵon, onklo Paŭlĉjo.

– Mi konas jam vian historion. Jam Quendel raportis pri tio.

– Sed mi volas ion diri.

– Nu, diru jam.

– Sed mi ŝatus diri tion inter kvar okuloj, do strikte konfidence – diris Georgeto timeme.

– Sed diru jam sen ceremonio.

– Tiel ŝajnas, ke mi venis dum malbona tempo. Mi diros tion aliokaze – diris Georgeto kaj ekiris al la pordo.

- Nu, ne foriru. Preston, foriru. Mi estas ĉagrenita, ĉar ankaŭ mi iros al Lócse.
- Mi scias. Ankaŭ mi iras kun vi.
- Tio estas bona. Sed diru vian direndaĵon.

Georgeto feste komencis paroli:

- Kara mia onklo, moŝta sinjoro prefekto! Kiel la rivereto, kiu rapidas al la florkampo...

La fama vicprefekto kolere plandofrapis per piedo.

- Ĉu vi freneziĝis?

- Mi ne... sed povas esti...

- Diru hungare la direndaĵon, ja vi ne estis pli frue maltrovema.

- Mi tute konfuziĝis, onklo Paŭlĉjo, pro tio mi diras tion nur simple: Mi petas la manojn de Rozalia.

- Kial?

- Kiel edzino.

La vicprefekto iĝis nerva senvole kaj preskaŭ freneziĝis.

- Kiel edzino? Ho, ve. vi estas malfeliĉulo... ja...

La vicprefekto pro tio estis nerva, ĉar li pensis, ke Rozalia kaj Georgeto estas samformaj, ja estas preskaŭ gefratoj. La konfeso de Georgeto estis plago por li. Li ne povis liberiĝi de tiu ĉi penso. Poste li mekanike demandis:

- Ĉu viaj gepatroj scias pri tio ĉi?

- Kompreneble.

- Ĉu jes? - li demandis avide, febre kaj ekscitite. - Ĉu ili scias pri tio ĉi?

Efike de tio la fraŭlo iĝis pli kuraĝa.

- Mi ne kutimas mensogi.

Li levis la kapon kaj fiere rigardis la prefekton, kiun apenaŭ eblis rekoni. La fraŭlo treege ĝojis.

- Kion diris viaj gepatroj?

- Mia patrino benis la amligiĝon. Mia patro mesaĝis perletere kaj esprimis sian ĝojon.

Paŭlo Görgey paciĝis. La fantomojn forblovis iu sola vorto. Ĉiuj zorgoj, malbonoj ĉesis, kiuj suferigis lin. Li estis gaja kiel en sia infanaĝo. Li estis feliĉa, havis vivemon kaj jam ege volis iri al Lócse. Li ne kapablis paroli pro la ĝojo, mute brakumis Georgeton, premis al si kaj kisis. La retenita amo, kiu akumuliĝis dum multaj jaroj, nun subite elfluis. Li komencis plori kaj post longaj minutoj li kapablis paroli:

- Do, estu Rozalia la via, kaj estu vi la mia. Loĝu ambaŭ ĉe mi!

Li brakumis Georgeton kaj ili kune iris al la manĝejo al la matenmanĝantaj gastoj.

- Jen, ĉi tie estas mia estonta bofilo.

Li estis dum la matenmanĝo gaja, ŝercadis, incitetis ĉiujn.

– Mi ne ŝatas, se li estas bonhumora troe – flustis Emerigo Mariaŝi al Abortis – tio ne povas signifi bonon.

– Ej, tio signifas tion, – respondis sinjoro Abortis – ke li estas kuraĝa homo.

Dum la matenmanĝo Paŭlo urĝis la ekiron.

– Klopodu matenmanĝi!

– La tataroj ne pelas nin, mi havas tempon! – komentis Jobo Andreanski, al kiu gustis ege la femuro de la perdriko.

– Vi havas tempon, ĉar vi ricevos en Lőcse ovacion. Sed min ankaŭ alia atendas.

Miĥelo Kubinyi de Hozalec kaj Grodkovsky, kiuj sidis unu apud la alia, ekrigardis unu al alia.

– Ni ne komprenas – ili diris mallaŭte.

– Mi komprenas – ridaĉis Quendel, kaŝante sin malantaŭ la buŝtukon.

Sed nun vere sekvis la ekiro. La vicprefekto intence volis aranĝi pompan marŝon dum tiu fama tago. Li jam pli frue priparolis tion kun la ekonomo.

Antaŭe iris Paŭlĉjo Bencsik¹⁴⁵, la hajduko kun kuproklariono, poste li ekvidis du homojn kun lanternoj en la manoj, kalkulantajn, ke eble ili revenos nokte.

La vicprefekto sidis sur la nigra virĉevalo, kiun la regnestro donacis al li. (La saksoj ne kuraĝas suferigi la donacon de la regnestro.) La vicprefekto estis bela kavalirstatura figuro, sed la ĉevalo estis belega. La vicprefekto nun ridetis kiel bubo. Kaj la ĉevalo stamfis sub li kaj tintis la multaj ringoj sur ĝia brido.

Apud la vicprefekto rajdis la kavalirstatura Steĉjo Pemete, sur kies dolmano estis multaj pasamentoj. (Bedaŭrinde estas, ke ili iris ne apud la setlejo, kie oni povus rigardi ĉi tiun vidaĵon.) Poste sekvis dek vulgaraj husaroj kun akraj glavoj, antaŭ rajdis la maljuna Preston.

Poste rajdis la nobeloj. Inter ili estis la tri sinjoroj Abortis sur grizaj ĉevaloj kaj Imre Nemessánszky¹⁴⁶ sur iu ĉevalaĉo, kiu tuis po cent metroj. Sur belega ĉevalo venis Kristoforo Atzél de Kiŝfalva kaj Georgeto Kral de Lefkowce¹⁴⁷ sur maljuna blanka virĉevalo. La ĉevalo de Jakab Ludman de Anduŝfalva estis milda. Fiere marŝis sur virinĉevalo de Francisko Zalai kaj la ĉevalo de Jakab Ribarski. Videblis, ke estas malriĉeco, ĉar la jungitaro de la pli bonaj ĉevaloj estis en la milittendaroj.

Poste sekvis la belegaj jungitaroj: virĉevaloj de Jób Andreanski, ĉevalidoj de Máriášŝy, du ĉevaloj de Matiaso Kisel, ĉevaloj de Jekelfaluŝŝy kaj fine venis ĉevalaĉoj de Quendel. Ĉu li ne estas azeno? Ja li estus havinta iun ĉevalaron.

¹⁴⁵ La familio-nomo Bencsik eldirendas: benĉik.

¹⁴⁶ La nomo eldirendas: Emeriko Nemeŝanski.

¹⁴⁷ La loknomo Lefkowce eldirendas: lefkovce.

Ĉi tiel marŝis la akompano de la prefekto. Tiu atingis tiun limon de Lőcse, kie Lőcse okupis la bienon de Paŭlo Görgey.

– Haltu! – kriis Preston al siaj kamaradoj. – Ni paŝis al bieno de la malamiko. Eltiru viajn glavojn!

Efike de tio la dek glavoj samtempe tiriĝis el la glavingo kaj estus brilintaj en la sunlumo, se estus sunlumo. Nome sur la ĉielvolbaro estis multaj nuboj kaj la vetero estis malĝoja. Sur la parceloj videblis la turbuloj, ja la rikolto jam ekokazis. La arboj estis silentaj, falis surteren la arbofolioj, la rivereto Durst nur murmuris. En la aero kornikoj flugadis, ili kelkfoje forflugis, kiam la rajdantoj estis sur la vojo. Poste ili denove flugis sur la teron.

Proksimiĝante al la urbo Lőcse, Paŭlo Görgey malrapidigis la ĉevalon „Holló” (Korvo estas la nomo de la ĉevalo). Georgeto Görgey postatingis lin.

– Mi jam komprenas – diris la vicprefekto gaje – la leteron de Rozalia, en kiu ŝi skribis, ke ŝi iun gravan aferon volas komuniki, kio grava estas pri ŝia estonteco. Do, tio ĉi estas tio.

– Ĉu Rozalia skribis ĉi tian leteron? – miris Georgeto.

– Quendel portis ĝin. Mi unue ne komprenis tion, sed nun jam estas klare.

– Sed nun jam mi ne komprenas tion – diris Georgeto konfuzite.

– Sed ja vi volas edzinigi ŝin. – ridis Paŭlo Görgey tre bonguste.

– Ĉu?

– Ĉar mi ankoraŭ nenion diris al Rozalia.

– Kiel? Ĉu vi ankoraŭ ne interkonsentis?

– Kun ŝi ne.

– Sed vi volis edzinigi ŝin – ridis Paŭlo Görgey.

– Mi scias, ke ŝi amas min.

– Nu, se ankaŭ vi scias, tiam ŝi pli bone scias, ke vi amas ŝin, ja ŝi estas pli saĝa, ol vi.

Kaj li denove ridis ŝercadante. Dume kelkuloj postatingis ilin, ekzemple Miĥelo Zanathy (zanati) kaj Kristoforo Atzel. Ili ŝatis tion, se ili povis fari ion laŭ la ŝato de la prefekto.

– Vi havas bonhumoron, moŝta sinjoro – iu diris.

– Mi estas feliĉa – respondis Paŭlo Görgey dum li enspiris la miasman malsekan aeron. – La mondo estas tre bela, miaj infanoj.

Ĉio ŝajnis por li gaja. Ankaŭ la kornikoj estis karaj kaj nigraj.

Kristoforo Atzel¹⁴⁸ volis esti agrabla.

– En la ĝusta, ke vi estas sana kaj juna, danke al Dio, kvazaŭ vi ne donus filinon, sed vi ricevus tiun.

La vicprefekto ridetis.

¹⁴⁸ La familio-nomo Atzél eldirendas: acel.

– Ja, tio estas prava, sed vi neniam ekscios.

Ĉi tiel paroladante ili atingis la ĉefpordegon de la urbo Lőcse. Pro la nebulo apenaŭ eblis vidi ion. Nur la fumo de la kamentuboj signis la proksimecon de la urbo. Sed Bencsik, kiu rajdis antaŭe, jam vidis la pordegon.

– La pordego estas fermita! – anoncis Bencsik.

– Klarionu! – ordonis Paŭlo Görgey.

Efike de tio iu voĉo demandis de interno:

– Kiu estas tiu?

– Mi estas Paŭlo Görgey, vicprefekto de Sepeŝ, kaj la sinjoroj de la departemento.

– Tuj, tuj!

La ĉevalo de Paŭlo Görgey, „Holló” baŭmis senpacience, ĉar ĝi ne kutimis atendadi. Li karesis la ĉevalon kaj trankviligis ĝin. „Tuj oni malfermos la pordegon.” Tiel okazis. La levponton oni malsuprenigis kaj la pordego malfermiĝis.

Paŭlo Görgey antaŭen iris sur la levponto, li trairis la pordegon kaj malantaŭ li neatendite la ferkradaro fermis la pordegon kaj malhelpis eniron al aliaj. La ĉevalo baŭmis pro la teruriĝo. Paŭlo Görgey preskaŭ defalis de la ĉevalo. Lia ĉapo kaj sur ĝi la ardeoplumo defalis de la kapo. Li volis ekkapti tiun kaj vidis la kazon. La tuto okazis dum unu momento. Li vidis la groteskiĝintajn figurojn, vizaĝojn, la minacantajn pugnojn, kiuj estis ekstere de la pordego. Li aŭdis furiozajn kriojn: „Perfido! Friponaĵo!” Poste li vidis, ke figuroj portantaj mantelojn el bubalfelo kuras al li, ses figuroj ekkaptas la buŝferon de la ĉevalo, iu figuro puŝas lancon en la ventron de la ĉevalo. La ĉevalo morte ĉevalblekas. Paŭlo Görgey rapide eltiras sian glavon kaj detranĉas unu manon de iu figuro, kiu volis detiri lin de la ĉevalo. Sed nun jam ĉiuj figuroj klopodas detiri lin de la ĉevalo sovaĝe, anhelante venĝon. „Finfine mi ekkaptis vin, fripono” – aŭdiĝis.

... Kaj tiun ĉi scenon liaj fideluloj, parencoj, amikoj vidis, sed nenion povis fari.

– Ne batu lin – ordonis Kristoforo Gutfinger.

Pro tio estiĝis granda grumblado.

– Kial ni devas indulgi lin, ja li mortigis nian juĝiston? – kriis la sangosoifa buĉisto Marton Hornbost.

– Ĉar la sinjoro estas ĉiam sinjoro – respondis Gutfinger kaj petole palpebrumis – kaj ĉar ni devas kunporti lin sana antaŭ la urban konsilantaron. Nu, portu lin al la urbodomo!

La situacio estis senespera. Jam eblis vidi, ke sur la vendoplaco estis multe da urbaj hajdukoj kaj figuroj kun mantelo el bubalfelo. Ĉe la stratoj kanonoj estis metitaj, do estis malhelpita la eblo de fuĝo. Li kapitulacis kaj kuraĝe paŝadis inter la hajdukoj, kiuj akompanis lin.

Dumvoje li ne parolis, ja li ne povis pritrakti kun la hajdukoj, li nur bedaŭris sian ĉapon.

– Serĉu mian ĉapon! – li diris orgojle kaj ordonante.

Gutfinger kapbalancis.

– Iru, Pohanka – diris Gutfinger al iu hajduko. – ĉiumaniere serĉu la ĉapon de la prefekto.

En la urbodomo oni malfermis la pordojn kaj Gutfinger akompanis sinjoron Paŭlo Görgey en la grandan ĉambron. Tie iĝis silento kiel en la preĝejo. Ĉiuj rigardis la prefekton.

Ĉiuj senatanoj sidis ĉe la verda longa tablo, escepte de Kripeji. (Ĉiam doloras lia ventro, se li devas decidi pri gravaj aferoj.) Ĉe la ĉefloko la juna juĝisto sidis, kiu estis pala kaj kies hararo estis hirta. Sed en liaj okuloj videblis triumfoso.

Antaŭ li kuŝis sur la tablo kelkaj paperoj, sur kiuj estis tekstoj. En la ĉambrego estis tiu vitroŝranko, en kiu estis la balzamita mano de Miĥelo Kramler. Tiu estas la plej viva mano, kiu punos hodiaŭ.

La juna juĝisto nun alparolis. Lia voĉo similis al mort-sonorado.

– Ĉu vi estas Paŭlo Görgey de Görgő kaj Toporc, la vicprefekto de la departemento Sepeŝ?

– Mi estas tiu – respondis Paŭlo Görgey obtuzvoĉe.

– Ĉu vi mortpafis la juĝiston de Lőcse, sinjoron Miĥelon Kramler, kies mano estas ĉi tie kiel deliktilo?

Kaj Fabricio montris al la akuzito la deliktilon.

– Mi mortpafis – respondis la akuzito kurte, sed li ne rigardis la manon de la mortinto.

– Kion vi povas diri por defendi sin?

– Mi havas direndaĵon.

– Do, diru tion.

Paŭlo Görgey kolere ekskuis sian mantelon.

– Vi ne estas miaj juĝistoj. Mi diros mian defendon baldaŭ antaŭ miaj rajtigitaj juĝistoj.

– Tio ne estas tiel. Nun la konsilantaro de Lőcse estas via rajtigita juĝistaro. Sinjoro Donat Mauks serĉu, la sesdekan paragrafon.

Antaŭ Donat Mauks, estis dika libro bindita, nomata Zipser Willkühr. Tio estis trezoro de Lőcse, en kiu estis la leĝoj kaj saksaj privilegioj.

Donat Mauks nerviĝis, serĉis la menciitan paragrafon. Tion li devis fari rapide kaj estis pro tio mallerta: „La diablon, mi ne trovas tiun” – li diris hontante. – „Nu, finfine tiu troviĝas.”

– Legu laŭte! – ordonis Fabricio.

– Ĉu mi ekstaru?

– Ne. Ankaŭ sidante vi povas legi.

Sinjoro Mauks snufis el la flartabako kaj legis la sesdekan paragrafon.

La teksto estis germanlingva, dume Paŭlo Görgey ludis kun sia fingroringo. Fabricio ripetis la tekston hungare:

– Se el inter niaj homoj iu vundiĝas de iu nobelo, aŭ servutulo, tiam li serĉu sian juston ĉe la posedanto de la bieno, kie okazis la malbono. La bienon, kie la juĝiston Kramler vi mortpafis, havas Lőcse. Tio estas klara.

– Mi protestas kontraŭ tio – diris Paŭlo Görgey.

La juna juĝisto tiris la ŝultron kaj ordonis al sinjoro Gutfinger akompani la akuziton en la najbaran ĉambron. Ili baldaŭ vokos lin.

La interkonsilado daŭris sume kvaronhoron.

Gutfinger tuj revenis. Li havis la rajton por partopreni la interkonsiladon. Sed li tuj ricevis novan ordonon por reakompani la akuziton. Do, li malfermis la pordon kaj diris preskaŭ tremetante:

– Sinjoro Paŭlo Görgey, bonvolu enpaŝi.

– Paŝu pli proksimen. – diris Fabricio. Lia vizaĝo estis sama kiel tiu de lunatikulo.

Paŭlo Görgey iris antaŭen al la verda tablo. Ĝis nun la juĝisto parolis sidante. Sed nun li leviĝis, prenis iun paperon kaj pli diris, ol legis:

– Nome de Dio kaj la Reĝoj, kiuj sankcias la privilegiojn de la urbo Lőcse!

Poste la senatanoj ekstaris, aŭdante nomi Dion kaj la Reĝojn!

– La konsilantaro de la urbo Lőcse! – daŭrigis la juĝisto ebriiĝinte de sia gloro – pri la afero de la mortinta Karmemora Miĥelo Kramker, juĝisto de Lőcse, portis la sekvan verdikton: Paŭlon Görgey, kiu estas vicprefekto de la departemento Sepeŝ, ĉar li mortpafis intence la menciitan juĝiston de Lőcse, oni senkapigu. Ĉi tiun rezolucion portis ok senatanoj kontraŭ du.

Paŭlo Görgey ekkaptis sian kapon. Li konsterniĝis. Ĉi tion li ne estus pensinta.

– Ĉu vi scias, ke ĉi tio estas murdo? – diris la akuzito.

– Okulon pro okulo – murmuris Gosnovicer.

– Krome la konsilantaro ordonas – daŭrigis Fabricio, kiu iĝis ĉiam pli kaj pli malama – tuj plenumigi la verdikton. Voku la ekzekutiston!

Tio rompis la kontraŭstaron de Paŭlo Görgey. Li ne timis la mortverdikton, li nome esperadis. Li pensis, ke la nobelaro liberigos lin, aŭ Georgeto portos kurucojn al Loĉe. Sed li malesperiĝis, ke la verdikton tuj oni plenumos.

Morta ŝvito aperis sur liaj tempioj. Li tremetante diris, ke ili permesu adiaŭi sian filinon. La senatanoj rigardis unu la alian. La maljuna Moŝtel kompatis lin kaj parolis en lia intereso. – Tio eble estas solvebla, sinjoro juĝisto.

– Ne! – respondis la juĝisto malvarm-kondute – la konsilantaro ne povas ŝanĝi la verdikton.

Gutfinger foriris por voki la ekzekutiston. Tiu staris senfare sur la koridoro. Tiu estis forta, dika, globkapa, variolcikatra homo. Tiu ŝajnis tiel, ke li estas pia homo, kiu povus esti kantanto dum la kermesoj.

– Ĉu mi havos iun laboron? – demandis la ekzekutisto indifere, dum li oscedis, nome li frue ellitiĝis. Tie estis ankaŭ Pohanka kun la ĉapo de Paŭlo Görgey en mano.

– Hej! – Gutfinger gratis transprenante la ĉapon – tuj la ĉapo ne havos lokon! La ekzekutisto ekkomprenis la aferon kaj Gutfinger vokis lin en la ĉambregon.

– Majstro Fleck! – diris la juĝisto – transprenu la akuziton kaj plenumu la verdikton. Dio estu kompatema al lia animo.

Dume la konsilataro iris en la alian ĉambregon, ĉar ili ne volis vidi la fortrenon de la prefekto.

Poste la senatanoj iris sur la balkonon, de kie ili vidis, ke la ekzekutisto kruele fortranĉas per sia glavego sur la eŝafodo la kapon de Paŭlo Görgey, la plej bonan kapon de la departemento Sepeŝ. La bubalfelon portantaj figuroj kriis „vivu”.

Majstro Fleck la kapon levis (li tion diris, ke la kapo estis peza kiel la fero) kaj montris al ĉiuj kaj kriis stentore:

– Ĉi tio okazas pri tiuj, kiuj estas malamikoj de Lőcse.

Efike de tio la homoj portantaj bubalfelojn vivuadis, nome nur tiuj ĉeestis. La multaj fremduloj, kiuj estis en la urbo, diradis: „Ĉi tio estas aŭdaca, sendia afero kaj naskos multe da malagrablaĵoj.” Nur iu aliregiona figuro estis kontenta. Li nur diradis al siaj gefiloj:

– Ĉu vi vidas, Magdalena, Dio amas nin. Ankaŭ ni vidis miraklon. Ankaŭ la senkapigo estas interesa, ĉefe se iun prefekton oni senkapigas. Sed vi eta Djurdjik, ne fajfu, ĉar la vivuadantoj kredos, ke mi fajfas kontraŭ tiuj kaj batos min.

Nun jam la homoj libere povis trafiki sur la stratoj. La kompano de Paŭlo Görgey povis veni tamen en la urbon, sed jam estis malfrue, ĉar ĉio havis finon...

Kiel unua Quendel kuregis al la urbodomo kaj furioze, ekscitite iris en la ĉambron de la senatanoj. Li tre ege riproĉis la senatanojn. Oni volis elĵetigi lin, sed li komencis plori laŭte, ĉar oni mortigis lian plej karan amikon. Pro tio la senatanoj mildiĝis. Cetere la senatanoj sentis la triumfon. Antaŭ la urbodomo la homoj komencis kanti psalmon: „Dio estas mia forta fortreso!” Kaj kiam la homamaso ekvidis la vizaĝon de la juĝisto, tiam ili kriis al li entuziasme. La senatanoj ne bedaŭris la maljunan paĉjon Quendel, ja ili faris hodiaŭ gravan agon.

Sed la maljuna paĉjo plu ploretis:

– Vi estas murdistoj, malicaj, Dio punos vin. Vi estas kristanaj, sed ne estas kompatemaj. Vi ne lasis tiun malfeliĉan homon adiaŭi sian filineton. Vi estas paganoj. Ho, ve! Kion faros tiu tre bela kaj bona filino? Fabricio, ja vi konas ŝin.

– Mi ne konas ŝin – diris la juĝisto flegme.

– Ej, vi konas ŝin treege bone. Ŝi havas pseŭdonomon. Ŝi estas Rozalia Otrokóczy.

La senatanoj ektimante eksaltis. Fabricio estiĝis pala kiel la mortinto kaj terenfalegis.

– Ĉu li estas malsana? – ili demandis.

Sinjoro Donat Mauks kuregis al la pordo kaj kriis al la servistoj:

– Portu tuj akvon, ĉar la sinjoro juĝisto svenis.

Fino

*

Opinioj pri la kreîĝo de la romano La Nigra Urbo

Ĉi tio estas la lasta, plej granda verko de Kolomano Mikszáth. Li verkis tiun ĉi romanon proksime al sia morto. La „Dimanĉa Gazeto” komencis komuniki ĝin aŭtune de la jaro 1908-a po ĉapitro. La komunikado ĉesis en januaro 1909, ĉar li havis tre danĝeran pneŭnomion, pro kiu dum multaj tagoj li estis senkonscia. Liaj familianoj, parencoj maltrankviliĝis pri lia vivo. Li tion diris, ke lia animo iris ekskursi al la Transmondo. Post la resaniĝo li finis la verkadon de la verko, sed tiu aperis en libroformo nur post lia morto, printempe de 1911, unu jaron post la morto de la verkisto.

Ĉi tiu verko estas la plej malserena romano de Kolomano Mikszáth. La ekluma nivelo de la stilo kaŝas ombrojn. La facilmovi babilada voĉo kaj la anekdotoj unu al alia apartenantaj pelas obstinajn tragediojn. La proksimeco de la morto miksis en la verkon malhelajn kolorojn. Pro la antaŭe sentita morto la perspektivon igis senkompata kaj la vorto iĝis senindulga. Li, kiu devis konfesi, ne povis toleri iluziojn: la interpretiĝoj de la homa vivo kaj la amaraj spertoj devis aperi. En ĉi tiu romano esprimiĝas la maltrankvilo de Kolomano Mikszáth pri sia nacio.

„Mi, kiu ege amas ĉi tiun nacion, scias, ke ĉi tiu lando havas nuntempe ege malbonan situacion, ne klaran estonton” - li diris dum lia lasta parolo en majo 1910. antaŭ la elektantoj de Rahó. Li jam sciis, ke la lando rapidegas al la katastrofo. Ja en la hungara socio krizo kolektiĝis. Malnovaj pekoj: defraŭdaj naciaj kaj sociaj demandoj malfortigis la patrujon. La mondo pretiĝis al la milito. Kaj Kolomano Mikszáth sciis, ke la nacio ne edukiĝis sufiĉe por elteni la pezajn elprovojn. Li antaŭ sentis la tragedion kaj pro tio verkis ĉi tiun verkon. Pro tio li turnis sin al la historio. Li serĉis la kaŭzojn de la iamaj katastrofoj, malvenkitaj bataloj, liberecbataloj. Ĉar li volis ekkompreni ĝisfunde la nunon, pro tio li citis la estintecon.

Historia romano povas naskiĝi el ŝato de la fabelo. La romantiko eldonis al li bonan recepton al la romano. La antikveco estas malfacile kontrolebla kaj iom libere povas flirti la fantazio de la verkisto. La verkista fabelo, povas sonĝi pri la venko de la bono. En la pli fruaj historiaj verkoj de Kolomano Mikszáth ĉi tiu pretendo estas trovebla. La verkojn „Du almozaj studentoj” kaj „Eta primaso” jam skribis la romantika Mikszáth. Li rifuĝis en la estintecon de antaŭ la dezerteco de sia epoko. Ne hazarde li memorigis en ĉi tiuj verkoj Eugenon Péterffy, la kritikiston al la muziko de la opereto. La verko „La nigra urbo” estas realista historia romano. La agado de la verko okazas dum la 18-a jarcento, en la jaroj de la liberecbatalo de Ferenc Rákóczi la 2-a. La romano respondas la nunan, kies antaŭaĵo estis la historio.

La bazon de la agado, la batalojn de Paŭlo Görgey, la vicprefekto kaj la urbo Lőcse, Kolomano Mikszáth trovis en la revuo „Jarcentoj” en 1902. Tiu revuo estis revuo de la Historia Asocio. En tiu Stefano Görgey verkis eseon pri la historio de la familio Görgey. Mikszáth ne ŝanĝis la temon, nur la ĉirkaŭaĵon. Li ŝanĝis la tempon, pro kiu la agado okazas tempe de bataloj de la kurucoj. Ĉi tiel iĝis la historio pli kredebla. Li volis ekkomprenigi la verkaĵon. Por Mikszáth estis bezonata la liberecbatala fono. Li tion volis atingi, ke aperu klaraj bildoj de la malsukcesaj liberecbataloj. Ĉi tio povas klarigi la kverelojn de Lőcse kaj Paŭlo Görgey. La nacio luktis por sia vivo kaj dum tio la nobeloj kaj la civitanoj faris la kvereladojn. En la tuta lando regis la egoismo. La nacio deziris sangon, ĉar ĝi volis rikolti liberecon, sed ilin interesis nur ĝiaj intereso. La batalo de Rákóczi estis kriza kaj proksimiĝis la fino, la tragedio, sed la homoj batalis por la propraj celoj. Pri la sorto de la nacio ili faris nenion. Ĉi tiu rekono rilatis kaj la nunon kaj la estintecon. Mikszáth timis pri la sorto de sia patrujo, la sinjoroj, la civitanoj. Lőcse diris verdikton kontraŭ ili.

Ne estas inda por diskuti, ĉu la nobeloj, aŭ la civitanoj estas pli simpatiaj. Li ne simpligis la komplikecon de la vivo. Li estis realista, la detalojn detale aŭtentike li verkis. El multspecaj fontoj li kolektis la 18-ajn jarcentajn historiajn okazintaĵojn, la karakterizajn vestaĵojn, la kutimojn kaj la vivon de la popoloj. La verkisto rimarkis la puritanan vivmanieron de la civitanoj kaj la labortagojn de la homoj. Li ekvidis la bonecon de la nobela vivo. Li rimarkis, ke ekzistas homoj havantaj la saman fortikan karakteron kiel Görgey, la vicprefekto. Sed tiuj ĉi bonaj ecoj jam deformiĝis pro la orgojlo kaj la havaĵadoro. La verko reliefis ĉi tiujn ecojn.

Li klopodis plenigi la malplenajn partojn de la romano, pro kiu la romantikan veran amon de la filino de Görgey, vicprefekto kaj Antonio Fabricio, juna civitano de Lőcse, enkorpigas. En aliaj verkoj de Mikszáth la vekanta feliĉa amo havis gravan signifon. La liberecbatala fono kaj la skiztita klara sento esprimis la direndon de la romano: juĝon de Mikszáth super la sinjoroj kaj la civitanoj. La nobeloj kaj la civitanoj estas egoismaj, ne batalas por la komunumo kaj por la nacio.

Ĉi tiu lasta verko estas kruela kalkulado, en kiu kompletiĝis kritika realismo de Kolomano Mikszáth. Li disŝiris ĉiujn iluziojn pri la regantaj klasoj.

Ĉi tiu verko apartenas al niaj famaj historiaj verkoj, kiel la „Dózsa”¹⁴⁹ de Eötvös kaj „Sándor Rózsa”¹⁵⁰ de Zsigmond Móricz (Sigmundo Moric).

Stefano Király

(Redaktanto por la hungarlingva presado)

¹⁴⁹ La romano-nomo elparolendas: Doĵa

¹⁵⁰ La romano-nomo elparolendas: Aleksandro Roĵa

Vivovojo de



László Pásztor

(1940-2021)

la tradukinto

de la romano:

La Nigra Urbo

verkita de Kolomano Mikszáth

László PÁSZTOR (laslo pastor) estis hungara [esperantisto](#), ĝardenistfaka uzin-inĝeniero, kiu tradukis hungarajn literaturaĵon al [Esperanto](#).

Vivo

László Pásztor naskiĝis la 10-an de Decembro 1940 en la setlejo Kőrösladány apud la rivero Kőrös, en Hungarujo, kiel la tria infano de la geedzoj Gyula (Julio) PÁSZTOR kaj Margareta ZSÓTÉR. Li mortis la 21-an de aŭgusto en 2021.

Sekvante la ekzemplon de la tre amata patro – kiu estis komence la ekonomia gvidanto de la terbieno de la grafo Holyos – ankaŭ li elektis la profesion por okupiĝi pri plantoj. Post la mezlernejaj jaroj li plulerninte finis unue la ĝardenistan ĉeflernejon en urbo [Nyíregyháza](#). Poste li plu studis en [Gödöllő](#) kaj ricevis diplomon por instrui siajn fakajn temojn. Li estiĝis ĝardenisto (pri vinberkulturo-vinfaristo, ĝenerala fruktokultivanta) uzin-inĝeniera instruisto. Li fine estis dungita kiel instruisto ĉe la Agrikultura kaj Nutraĵindustria Faka Mezlernejo en la urbo [Miskolc](#), kie li instruis ĝis sia pensiuliĝo.

Li edziĝis kun la same esperantista f-ino Adrienne Földi en 1975, kun kiu lia poresperanto-movado estiĝis unu, ĉar ekde tiam ili finis ĉian movadan aranĝaĵon kune. Inter ili estis gastoakceptadoj enurbaj eĉ regionaj, esperantaj libro-ekspozicioj, florkronadoj de tomboj kaj memortabuloj de la unuaj grandaj esperantistoj ktp.

Esperanto

László PÁSZTOR ekkonis la internacian lingvon [Esperanto](#) en 1969, de Stefano PÁL kaj d-ro Ferenc JÁKI: elstaraj lingvoinstruistoj de la hungarlanda Esperanto-movado. Kelkajn jarojn poste li akiris la diplomon por instrui Esperanton. Lia konvinkiĝo estis, ke per ĉi tiu lingvo malfermiĝis por li la vasta mondo. En la Departementa Sindikata Kulturdomo nomita Sándor Rónai (Aleksandro Ronai) li estis fakronda gvidanto, poste junulara sekretario de la kulturdoma Esperanto-rondo nomita „Ora Duopo doktoro Kalocsay-Baghy”, levanta li la Esperanto-kulturan nivelon de ties membraro. Li ne gvidis multajn Esperanto-lingvokursojn, ĉar lia unua movada celo estis al fremdlandanoj per tradukado transdoni la perlojn de la hungara literaturo. Lia ideo estis: „La homa scio nur tiam estiĝos utila, se ni transdonos ĝin al aliuloj”. Li agis ĉiam tiusence.

Redaktado

Li tradukis unue ĉiuspecan interesaĵon en la hungara-esperantolingva reta ĵurnalo **{Északmagyarországi Hír}** („**Nordhungaria Informo**” = **N.H.I.**), kies redaktoro li estis inter 2005 kaj 2013. Per tiuj paĝoj li volis kunpreni la restintajn membrojn de la pli frue jam disiĝinta, fame bone funkcianta Esperanto-klubo, akiri novajn membrojn al estigota nova klubo kaj disavastigi la sciojn pri la internacia lingvo Esperanto por ekscii, kiel bona ebleco estas tiu lingvo al aliuloj por la transdono de la hungara kulturo. Nova klubo ne fondiĝis, sed la kunpreno tamen sukcesis kaj li akiris multajn simpatiantojn por la hungara Esperanto-movado.

Li, kaj esperantigis diversajn hungarlingvajn verkojn kaj origine verkis en Esperanto artikolojn pri Hungario, pri lia vivloko Miŝkolco kaj tradukis la verkon de la Miŝkolca aŭtorduopo:

- **Piroŝka CSORBA** (Ĉorba) kaj **Vilmoŝ FEDOR**: [Miŝkolcaj Legendoj](#), kies rakontoj aperis en la supre menciita retgazeto. Lia sekva tradukaĵo estis de
- **Károly SZIKLAVÁRI** (karlo siklavari): [Historio de la muzikarto de la Miŝkolca teatra vivo](#). Ĝi aperis same en la jam menciita retgazeto N.H.I. Poste aperis samloke de li tradukite la libro pri la samurba reformacia libro:
- **Gyula NOVOTNY** (julio novotni): [Preĝejo sur la monto Avaŝ](#)

Ilin sekvis la esperantigo de la junulara romano kaj la priskribo de la Miskolc-urba Esperanto-movado.

Imre FARKAS (Emeriko Farkaŝ: [Mi trapasas la „Király-hágo”-n pordegon de Transilvanio](#). / Junulara romano ĉe MAS en 2015 (ISBN 978-2-36960-031-2).

Lia sekva verko estis la post duono (de Stefano Pál) verkita verketo pri la 100 jaroj de la Miŝkolca Esperanto-Movado. Aperjaro 2013, titolite:

Stefano PÁL – Ladislao PÁSZTOR: [Fragmentoj el Historio de Esperanto-Movado en Miŝkolc](#), eldonita de la Eldonejo Holnap Magazin en 2013 (ISBN 978-615-5083-82-2)

(Vidu la katalogon de OSZK: <http://nektar.oszk.hu/hu/manifestation/3508643>)
Trovita ankaŭ en MEK.

Liaj sekve eldonitaj tradukaĵoj estis la historiaj romanoj de:

- **Géza GÁRDONYI** (gardonji): [La homo nevidebla](#), aperinta en la Hungara Elektronika Biblioteko en 2019, **ISBN: 978-615-00-5264-9**
- **Kolomano MIKSZÁTH:** [La Nigra Urbo](#), aperinta en la Hungara Elektronika Biblioteko en 2022, **ISBN: 978-615-01-4295-1**

Krome li verkis:

Turisma-n Vojaĝlibro-n en Esperanto kune kun sia edzino pri la historioj de la nordhungariaj setlejoj. Ties ekzemplerojn titolite: **László Pásztor-Adri Pásztor: Vojaĝlibro pri Norda Hungarujo** ricevis donace la 50 membroj de pola esperantista grupo vizitanta ekskursante en Abaújszántó, Encs, Miŝkolc en 2008, atenditaj de la geedzoj Pásztor kaj de la du honoraj prezidantoj de HEA: D-roj György Nanovfszky kaj Endre Dudich salutantaj la polan esperantistan grupon nome de la HEA. El tiu libro liaj historioj videblas sur la paĝo de la Hungarlanda Esperanto - Asocio: [www.hungario.hu]. La enhavo de la vojaĝlibro aperis detale en la retgazeto N.H.I.

• **Li esperantigis krome priskribojn pri la:**

- **Historioj de preĝejoj de Miŝkolc**
- **Historio de la sonorilturo kaj la tombejo,**
- **Historioj de la miŝkolca Ortodoksa Eklezia Muzeo, kaj la Greka Katolika Preĝejo (episkopejo) de urbo Miŝkolc...**
- **Historio pri la Miŝkolca-ordeno de Karmelitanoj,**
- **Historio de la Miŝkolca Gimnazio LÉVAY, József.**
- **Historio de la „NYÚZÓ, Gáspár” Regiona Domo de Potofaristoj de Tiszafüred**
- **Historio de la fortikaĵo de Diósgyőr**
- **Historio de la fama Kopcsik-marcipan-sukeraĵista-sukerskulptisto de urbo Eger**
- **Historiojn de Societoj de Montosubaj Artaj Kreantoj en urbo Szerencs kaj de la Interretaj Verkistoj – Artaj Kreantoj de Miskolc**

- **Historiojn kaj konigajn tekstojn pri la Miskolc-urbaj muzeoj** – tiuj tradukoj aperis en la retgazeto: N.H.I.

László (Ladislao) Pásztor – Adri Pásztor: [Ŝercoj](#) – traduko - (Aperinta en la Hungara Elektronika Biblioteko: MEK)

Liaj kromaj tradukitaj verkoj, inter ili romanoj, ĝis nun ne eldonitaj

Bedaŭrinde, de la verkisto permesitaj sed post lia baldaŭa morto de lia filino malpermesitaj verkoj pri la patrujkonkero de Hungaroj, kies temo fermiĝas en 896:

Péter Földes: [La niza flago](#). (La romano kiel manuskripto ĝi troveblas en la Esperanto-Muzeo en Vieno.)

Péter Földes: [Post Arpad](#). (La romano kiel manuskripto, ĝi troveblas en la Esperanto-Muzeo en Vieno)

- **Romanoj de la hungaraj klasikuloj:**

Mór Jókai: [Filoj de la ŝtonkora homo](#), (romano)

Kolomano Mikszáth: [La Slovakaj Samvilaĝanoj](#) – [La bonaj Palocoj](#) (rakontoj)

Kolomano Mikszáth: [La du malriĉegaj almozetantaj studentoj](#), (romano)

Mór Jókai: [Damaĝo estas maljuniĝi](#) – [Maljuna homo ne estas kadukulo](#);

Mór Jókai: [Orepoko de Transilvanio](#) (romano);

Mór Jókai: [Turka mondo en Hungarujo](#).

FAKA LERNO-LIBRO - Pri la hungara batita punto verkita de:

Magdolna Mátray: [La Lernejo de la Puntobato](#), kiu la eldonpermeson fine reprenis ne volante, ke siaj fakaj sekretoj disvastiĝu en la mondo.

FABELLIBROJ:

Nekonata verkisto (eble portugala): [La enuiga preĝo](#), (fabeloj).

Pli juna Mikelo PATAKI: [Rakontas la birdeto](#) (fabeloj);

... La notojn de la verkaro kunkolektis, kompilis: Adrienne, sinjorino László Pásztor (Adrienne, Lászlóné Pásztor): la vidvino de László (Ladislao) Pásztor, la tradukinto forpasita en 2021.

Miŝkolc, Hungarujo, la 28-an de januaro 2022.

*